Harriet Beecher Stowe

Verko el la publika fako.

https://fr.wikisource.org/wiki/La_Case_de_l'oncle_Tom

Enhava tabelo.

01. En kiu oni prezentas al leganto.....4
homon kiu fieras pri humaneco.....4
02. La Patrino.....17
03. Edzo kaj Patro.....21
04. Iu Vespero en la Kabano de Onklo Tomo.....28
05. Sento de Vivanta Posedaĵo.....43
kiam ĝi ŝanĝas la Mastron.....43
06. La Malkovro.....54
07. La Lukto de la Patrino.....66
08. La Ĉassekvantoj de Homoj.....82
09. La Eskapado.....94
10. De kie evidentas.....102
ke senatano estas nur homo.....102
11. Preno de Posedaĵo.....122
12. La Proprieto prenas licencon.....135
13. Incidentoj de laŭleĝa komerco.....152
14. Hejmo de kvakera familio.....173
15. Evangelino.....185
16. Pri nova Mastro kaj pri lia kunvivantaro.....198
17. La Mastrino de Tomo kaj ŝiaj Opinioj.....218
18. Sindefendo de Libera Homo.....242
19. Spertoj kaj Opinioj de fraŭlino Ofelio.....264
20. Daŭrigo de la Spertoj kaj Opinioj.....284
de fraŭlino Ofelio.....284
21. Topsi.....309
22. En Kentukio.....329
23. La Herbo sekiĝas, la Floro velkas.....336
24. Henro.....345
25. Malbonaŭguraj Antaŭsignoj.....356

26. La eta Evangeliistino.....365
27. Morto.....372
28. Jen la fino de tio kio estas surtera.....390
29. Kunveno.....400
30. La Forlasitoj.....418
31. La Provizejo de Sklavoj.....427
32. La Transŝipiĝo.....440
33. La Eksteraj Mallumoj.....448
34. Vidu la larmojn de tiuj kiujn oni subpremas.....460
35. La Potenco estas flanke de la Subpremantoj.....470
36. La Rememoroj.....484
37. Emelina kaj Kasiso.....493
38. La Libereco.....502
39. Venko.....511
40. La Strategio.....525
41. La Martiro.....537
42. La Juna Mastro.....546
43. Rakonto de Aŭtentikaj Reaperantoj.....555
44. Rezultoj.....563
45. La Liberiganto.....574
46. Konkludo.....579



La aboliciistaj (blue) kaj sklavaj (ruĝe) ŝtatoj en 1861.

Bostono	Ĉefurbo de Masaĉuseco
Cincinatio	Sudokcidenta urbo de Ohio, sur la riverego Ohio
Mobilo	Marborda urbo de la Golfo de Meksiko en Alabamo.
Montrealo	Dua plej granda metropolo en Kanado.
Naĉezo	Urbo kiu sin trovas borde de la rivero Misisipo.
Nov-Orleano	Havenurbo de Luiziano
Oaklando	Urbo de Kalifornio situanta oriente de la Golfo de San-Francisko.
Sanduskio	Urbo ĉe la bordo de Lago Erio en Ohio.

Anglio	Eŭropa insula lando norde de Francio.
Francio	Okcidenta lando de Eŭropo
Haitio	Granda insula lando sude de Usono.
Liberio	Okcidenta atlantika lando de Afriko.
Nov-Anglio	Regiono konsistanta el 6 ŝtatoj, inter alie Masaĉuseco kaj Vermonto.
Usono	Unuiĝintaj Ŝtatoj de Ameriko preskaŭ tute en la okcidenta hemisfero.

Alfabeta klasifiko laŭ la antaŭnomo.

Persono		alinome	Kiu li estas	Nomo en la franca libro
	Adolfo	Adĉjo	Mulata sklavo ĉe Sanklaro.	Adolphe
Sanklaro	Alfredo		Frato de Aŭgusteno kaj patro de Ofelio.	Alfred Saint-Clair
	Andio		Nigra servisto de sro Ŝelbi.	Andy
Lokero	Antono		Ekspartnero de Sro Halej	Tom Loker
Ŝelbi	Arturo		Honesta viro ŝuldanta al Halej.	Shelby Arthur
Sanklaro	Aŭgusteno		Juna ĝentlemano de Nov-Orleano, patro de Evangelina.	Augustin Saint-Clair
Halej	Danielo		Malŝatindaj finegocistoj de la Sudo, konata de Sro Ŝelbi	Haley
	de Tukso		Franca virino renkontita sur la ŝipo de Kasiso kaj Georgio.	de Thoux
	Debora		Mulata servistino ĉe la Birdoj.	Déborah
	Diego		Eta brunhaŭtulo, servisto de Sro Ŝelbi.	Jacquet
	Dinaho		Sklavino ĉe Sanklaro.	Dînah
	Dodo		Dektrijaraĝa mulato, grumo de Henro.	Dodo
	Doroteo		Kvakera avino kiu flegas Atonon vundita de Georgo kaj Fineaso.	Dorcas
	Elina		Filino de Eliza.	Élise
	Eliza	Elnjo	Dudekkvinjaraĝa kvarteronino, patrino de 6 kaj ĉambristino de Sino Ŝelbi	Éliza
	Emelina	Emnjo	Juna belega sklavinino vendita kune kun la aro de Tomo, filino de Suzana.	Emmeline
Ŝelbi	Emilia		Edzino de Arturo Ŝelbi.	Shelby Émilie
	Emma		Vendita fratino de Georgo.	Émilie
Sanklaro	Evangelina	Evnjo	Juna filino de Marta kaj Aŭgusteno.	Évangeline Saint-Clair/Eva
Fletŝer	Fineaso		Amiko de la familio Halidaj.	Phinéas Fletcher

Persono		alinome	Kiu li estas	Nomo en la franca libro
Fletŝer	Fineaso		Kvakera amiko de Simeono Halidaj.	Phinéas Fletcher
	Georgio		Juna instruisto de Tomo, kaj filo de la ge-Ŝelbioj.	Georgie
Hariso	Georgo		Mulato edzo de Eliza, sklavo de Sro Hariso (p20)	Georges Harris
	Heliaso		Filo de Kasiso.	Henri
Butlero	Henriko		Ekslaboristo de Sr Vilsono.	Henri Butler
	Henriko	Tiĉjo Kroŭ	Kvar- aŭ kvin-jaraĝa kvarterono filo de Eliza.	Jim/Henri
Sanklaro	Henro		La plejaĝa, dek du jaroj, filo de Alfredo.	Henrique Saint-Clair
Seldeno	Jakobo		servisto de Henriko Butlero.	Jim Selden
	Jane		Pranca kvarterona ĉambristino de Sinjorino Sanklaro.	Jane
Jerĉjo kaj Vilĉjo			Du ĉevaloj de Sro Ŝelbi.	Jerry et Bill
Birdo	Johano		Senatano	Bird John
Stedmano	Johano		Edzo de Ruto.	John Stedman
	Jona		Sklavo de la familio Halidaj.	John
	Kasiso	Kasnjo	Sklava mulatino malamata de la aliaj sklavoj de Lagrizo kaj anstataŭita de Emelina.	Cassy
	Kimbo		Unu el la du ĉefaj sklavoj de Simono Lagrizo, jam antaŭ la alveno de Tomo kaj Emelina.	Quimbo
	Kuĝoo		Maljuna reŭmatisma onklo, faktoto ĉe la Birdoj.	Cudjoe
	Lucia		Maljuna mulatino vendita kun Tomo al Lagrizo.	Lucie
Halidaj	Magdalena		Filino de la familio Halidaj.	Marie
Birdo	Maria		La edzino de la senatano.	Bird Marie
	Markso		La ratulo kiu akompanas Antono Lokero.	Marks

Persono		alinome	Kiu li estas	Nomo en la franca libro
Sanklaro	Marta		Belega riĉa edzino de Aŭgusteno.	Marie Saint-Clair
Kruco	Mikaelo		Amiko de Fineaso Fletŝer.	Michel Cross
	Moseo		Unua infano de Kleo kaj Tomo.	Moïse
Sanklaro	Ofelio	Felio	Ĉirkaŭ kvardekkvinjara kuzino de Aŭgusteno.	Ophélia Saint-Clair
	Paola		Lasta bebo de Kleo kaj Tomo.	Polly
	Petro		Dua infano de Kleo kaj Tomo.	Pierrot
	Prunjo		Alta kaj senkarna neblankulino, drinkulino.	Prue
Halidaj	Raĥela		Edzino de Simeono.	Rachel Halliday
	Roza		Malgranda petola kvarteronino el la sklavaro de Sanklaro.	Rosa
Stedmano	Ruto		Kvakera amikino de Raĥela.	Ruth Stedman
	Salio		Sklavino ĉe Ŝelbi kun Kleo.	Sally
	Sambo		Petola nigrulo renkontita de Tomo en la sklavdeponejo post la morto de Sanklaro.	Sambo
	Samĉjo	la Nigro	Nigrulo de la ĉirkaŭaĵo de Ŝelbi.	Sam
Halidaj	Simeono		Kvakero kiu akceptis Eliza.	Siméon Halliday
Lagrizo	Simono		La posedanto de kotona plantejo, kiu aĉetis Tomon kaj Emelinan.	Legris Simon
	Suzana		Belega sklavinino vendita kune kun la aro de Tomo, patrino de Emelina.	Suzanne
	Tembo		Unu el la du ĉefaj sklavoj de Simono Lagrizo, jam antaŭ la alveno de Tomo kaj Emelina.	Sambo
Linkolno	Tomaso		Mastro de Jinia, sia kuiristino.	Tom Lincoln
	Tomjo		Juna filo de la mastro de Georgo Hariso.	Tommy

Persono		alinome	Kiu li estas	Nomo en la franca libro
Birdo	Tomjo, Ĵakĉjo kaj Mariana		La tri infanoj de la familio Birdo.	Tommy, Jim et Mary
	Tomo		Sklavo, heroo de la rakonto.	Tom
	Topsi		Ok- aŭ naŭ-jaraĝa nigrulidino donacita al Ofelio.	Topsy
	Vilsono		Maljuna fabrikisto kie Georgo laboris kaj inventis.	Wilson
		Avino	Maljuna mulata sklavino kiu nutris Evangelina Sanklaro.	Mamie

01. En kiu oni prezentas al leganto homon kiu fieras pri humaneco.

Je malfrua horo de frosta februara posttagmezo, du ĝentlemanoj estis sidintaj, kune kun botelo, en komforta manĝejo en la urbo P*** *(eble Perryurbo)*, en Kentukio. Neniu servisto ĉeestis; kaj la proksimigitaj seĝoj indikis ke la priparolata temo estis varme diskutata.

Por la dececo ni diras du ĝentlemanojn, sed, rigardita laŭ kritika flanko, unu el ili tute ne rajtis ĉi tiun titolon. Li estis grasa, dika, senartifika viro, kies la ordinaraj trajtoj, la fanfarona kaj aroganta sinteno, aperigis malaltrangan individuon kiu celas, per siaj kubutoj, bori al si vojon alten. Lia vestaranĝo, el malbongusta rafiniteco, lia bunta svetero el okulfrapaj koloroj, lia blua kravato punktita de flavaj punktoj, senhontece sterniĝanta laŭ larĝa nodo, kompletigis la ĝeneralan aspekton de la persono. Kvanto da ringoj plie pezigis liajn dikajn kaj larĝajn manojn. Li surhavis masivan ĉenon de ora poŝhorloĝo, de kiu pendis grandega fasko da brelokoj kaj sigeliloj kiujn, en la varmo de la interparolado, li manipulis kaj tintigis kun evidenta kontentiĝo. Lia konversacio estis konstanta defio spite al gramatiko, plenigita, laŭ mallongaj intertempoj, de profanaj esprimoj kiujn, malgraŭ nia respekto al la vero, ni liberiĝos transskribi.

Lia kunulo, s^{ro} Ŝelbi, havis, li, la konduton kaj aspekton de ĝentlemano. La lukso de la meblaro, la internaj detaloj, sciigis la bonhavecon kaj eĉ la riĉecon. Ambaŭ ŝajnis okupitaj pri vigla diskuto.

- Jen kiel mi finaranĝus, diris s^{ro} Ŝelbi.

- Neeblas ! Mi ne povas trakti je ĉi tiu prezo. Tion mi

vere ne povas, sinjoro Ŝelbi, rebatis la alia, levante sian glason inter sia okulo kaj la taglumo.

- Fakte, Halej, Tomo estas senkompara homo. Li valoras tiun monsumon, ie ajn. Bonkonduta, honesta, kapabla, reganta mian tutan bienon kiel horloĝo.

- Vi volas diri honesta, kiel la negroj, rebatis Halej, verŝante al si glason da brando.

- Ne; Tomo estas vere bonega homo, sobra, saĝa, pia. Li aniĝis al religio antaŭ kvar jaroj en unu el iliaj kuniĝlokoj[1], kaj mi kredas ke li serioze adoptis ĝin. De tiam mi senrezerve konfidis al li monon, domon, ĉevalojn; mi lasis lin iri kaj veni en la landon, kaj mi ĉiam trovis lin fidela kaj fidinda.

- Estas homoj kiuj ne kredas al piaj negroj, Ŝelbi, diris Halej, sed mi kredas tion. Mi havis viron, en la lasta grupo kiun mi kondukis al Nov-Orleano, nur aŭdi ĉi tiun estulon preĝi, tio indis predikon. Vera ŝafido por dolĉeco kaj trankvileco ! Mi ankaŭ eltiris bonan rondan sumon el li. Mi rabate aĉetis lin de mastro kiu estis devigita vendi; mi per li realigis profiton de sescent luidoroj[2]. Ho ! mi konsideras religion kiel grandvaloran komercaĵon, nur ke ĝi estu bonkvalita kaj sen difekto.

- Nu ! Tomo aniĝis la realan kaj la bonan, se iam ĝi ekzistis. Je la lasta falo de folioj, mi sendis lin sola al Cincinatio por komercaj aferoj; je la reveno, li alportis al mi kvincent dolarojn[3]. "Tomo, mi diris al li, mi fidas vin ĉar mi kredas vin kristano. Mi scias ke vi ne volus trompi min". Li vere ne malbonintencis. Mi certis ke li revenos al mi, kaj tamen tie, ne mankis fiuloj por diri al li : "Tomo, kial vi ne ekvojiras al Kanado ?" - "Ho ! mi, ne kapabli : mastro fidi

1 Religiaj kunvenoj, okazantaj meze de la arbaro, kaj al kiuj la nigruloj de la najbaraj plantejoj alvenas de ĉiuj flankoj por preĝi, kanti, aŭdi predikadon.
2 Aktuale, en 2020, unu luidoro valoras proksimume 255€.
3 1$ en 1850 samvaloras ĉirkaŭ 29€ en 2020 (laŭ https://www.officialdata.org/us/inflat).

Tomoⁿ !" Mi sciis tion de aliaj. Mi bedaŭras senigi min de Tomo, mi konfesas tion. Nu ! Necesas ke li kovru la diferencon, kaj saldu mian ŝuldon; ĉu vi dirus jes, Halej, se vi havus iom da konscienco.

- Mi tion havas tiom kiom necesas en la komerco, ĝuste sufiĉe por aserti pri li, diris la komercisto laŭ ŝercema tono; kaj mi ne petas pli bonan ol fari tion kio estas konvena por komplezi al amikoj, sed tio vere estas tro multe postuli de malriĉulo, vere, estas tro malfacile !

La vendisto kompateme suspiris, kaj verŝis al si novan glasplenon.

- Nu ! Do, Halej, kiel plaĉas al vi trakti ?

- Ĉu vi ne havas iun, knabon aŭ knabinon, por veki kun Tomo decidan rezulton ?

- Hm !... Neniun kiun mi povas seniĝi. Verdire, necesas nepra bezono por decidi min vendi. Mi ne ŝatas forigi miajn manojn, certe tio estas fakto.

Nune, la pordo malfermiĝis, kaj eta kvarterono, je kvar aŭ kvin jaroj, eniris en la ĉambron. Li estis rimarkinde bela kaj alloga. Liaj haroj, tiel maldikaj kiel kruda silko, bukle falis ĉirkaŭ liaj rondaj vangoj kun ĉarmaj kavetoj, dum du grandaj nigraj okuloj, plenaj de fajro kaj dolĉeco, ĵetis de sub liaj longaj okulharoj scivolajn rigardojn. Jako kun skarlataj kaj flavaj strioj strikte strečis lian talion kaj reliefigis lian ŝprucan kaj malhelan belecon. Pro ia miksaĵo de timemo kaj ridiga memfido, oni divenis iun etan favoraton de la mastro, kutimita esti rimarkata kaj karesata de li.

- Hola ! Tiĉjo Kroŭ[4], diris sʳᵒ Ŝelbi, fajfante, kaj prezentante al li grapolon da vinberoj. Glutu tion !

La infano kolektis siajn malgravajn fortojn, kaj saltis por atingi la logaĵon, sub la ekridegoj de la mastro.

- Ĉi tie, Tiĉjo ! Ĉi tie, eta korvo !

4 Angle, tiu nomo kiun oni povas traduki per "korvo" povas signifi "arlekenon, pajacon".

La infano antaŭenpaŝis. La mastro pasigis la manon sur lian kapon kaj kaptis al li la mentonon.

- Nun, Tiĉjo, montru al ĉi tiu sinjoro, kiel vi kapablas danci kaj kanti.

La knabeto ekkantis, per klara kaj laŭta voĉo, unu el tiuj groteskaj kantoj kiujn nigruloj ŝatas, kaj kiujn li akompanis per ridigaj movoj de la manoj, de la piedoj, de la tuta korpo, unisone kun la muziko.

- Brave ! ekkriis Halej, ĵetante al li orangpecon.

- Nun, Tiĉjo, daŭrigis la mastro, paŝu kiel la maljuna onklo Kuĝoo kiam li suferas pro reŭmatismo.

Tuj la flekseblaj membroj de la infano kripliĝis, dum la dorso duige kurbiĝis, kun la irbastono de la mastro enmane, li lamante ĉirkaŭiris ĉirkaŭ la ĉambro, sulketante sian infanecan vizaĝon kaj kraĉante dekstren maldekstren, laŭ la modelo de la maljunulon.

La du spektantoj ridegis el la tuta gorĝo.

- Nun montru al ni kiel la maljuna Robinso ekkantas la ĉanton.

La infano supermezure plilongigis sian keruban mienon, kaj nazkantis la arion de la psalmo kun netimigebla gravmieneco.

- Hura ! Brave ! diris Halej, jen stranga simieto ! Ĉi tiu knabo estas esperdona. Jen, li aldonis, subite frapante sur la ŝultron de Ŝelbi, metu ĉi tiun amuzan knabeton kiel apunton kaj mi finarangas la aferon. Vere ! Nu, tio estas tio kiu nomiĝas esti saĝa.

Tiumomente, la pordo, malrapide duonmalfermata, lasis junan kvarteroninon ĉirkaŭ dudekkvinjaraĝa eniri.

Sufiĉis kompari la infanon kun la virino por ekkoni la patrinon; samajn profundajn nigrajn okulojn, samajn longajn okulharojn, samajn silkajn harajn ondojn. Tra la bruna koloro de ŝia haŭto, oni vidis ŝiajn vangojn ruĝiĝi sub la

aŭdaca rigardo kiun la fremdulo fiksis sur ŝi kun aroganta admiro. Ŝiaj puraj, belaspektaj vestaĵoj reliefigis la elegantecon de ŝia talio. Delikata mano, malgranda kaj bone farita piedo, modlita maleolo, estis prezaj valoroj kiuj ne eskapis el la esplora ekzameno de la komercisto, kutimigita juĝi per ekrigardo la esencajn punktojn de la ina artiklo.

- Kion vi volas, Eliza ? diris ŝia mastro, vidante ŝin hezite halti sur la sojlo.

- Mi venis serĉi Henriko, mi petas, sinjoro.

La infano eksaltis al ŝi, kaj montris al ŝi la akiron kiun li kolektis en faldo de sia robo.

- Nu ! Kunprenu lin, diris s^ro Ŝelbi.

Ŝi prenis la infanon en siajn brakojn kaj hastege eliris.

- Per Jupitero ! ekkriis la komercisto, jen elstara artiklo ! En Nov-Orleano vi povus, certe, riĉiĝi nur per ĉi tiu knabino. Mi vidis pagi milon da dolaroj por kreitinojn kiuj ne estas duone tiel belaj.

- Mi ne kalkulas kun ŝi por riĉiĝi, seke diris s^ro Ŝelbi; kaj por alie evoluigi la interparoladon, li malkorkis novan botelon, kaj petis sian gaston diri al li sian opinion pri ĝi.

- Suverena sinjoro ! El la ĉefvitejo ! Poste, intimece frapante denove la ŝultron de Ŝelbi, li aldonis : Nu, ni traktu pri ĉi tiu knabino. Kiom mi ofertus al vi ?… Kiom vi volas por ŝi ?

- Sinjoro Halej, ŝi ne estas por vendi, diris Ŝelbi; mia edzino ne forvendus ŝin por sia pezo da oro.

- Ba ! Estas tio kion ĉiam virinoj diras, ĉar ili nenion komprenas pri kalkulo; sed nur montru al ili tiom kiom oni povus aĉeti da juvelaĵoj, da plumoj, da aĵetoj, kun la pezo da oro de sia plej preferata negrino, kaj tio ŝanĝas la tezon.

- Mi diras al vi unu fojon por ĉiam, ke ne necesas paroli pri tio, Halej; mi diris ne, kaj estas ne, rebatis Ŝelbi per decida tono.

- Vi almenaŭ donos al mi la infanon. Konsentu, ke pro li mi fortege rabatis miajn pretendojn.

- Kaj kion vi povus fari per la infano ?

- Ho ! Mi havas amikon kiu ekspluatas ĉi tiun komercan branĉon. Li bezonas belajn knabojn por eduki por la merkato. Distra artiklo, tio vendiĝas al riĉuloj, kiuj sufiĉe havas por pagi belecon, por la servo de la tablo kaj de la antaŭĉambro. Beleta knabo kiu malfermas la pordon, kiu venas ĉe la unua sonorado, reliefigas faman domon. La artiklo plivalorigas, kaj ĉi tiu eta elfo estas tiel amuza, tiel bona kantisto, ke li perfekte taŭgos al mia amiko.

- Mi pli ŝatus ne vendi lin, diris s^ro^ Ŝelbi laŭ zorgoplena tono. Fakte mi estas humana viro, kaj al mi estas malinklina forpreni infanon de lia patrino.

- Ha ! Tio mallogas vin ! Jes tio estas sufiĉe natura. Mi komprenas. Foje estas kruele malagrabla trakti kun virinoj. Mi malamas ĉiujn tiujn kriadojn, ĉiujn tiujn ploretojn ! Sed mi havas propran manieron aranĝi la aferojn. Sufiĉas sendi la patrinon iom for, dum unu tago, aŭ du, dum semajno, tio dependas; tiel ĉio kviete sin faras, estos finita kiam ŝi revenos. Via edzino povus doni al ŝi paron da orelringojn, novan robon, aŭ kian ajn bagatelon, por kompensi ŝin.

- Mi timus ke tio ne sufiĉus.

- Ho ! Certege, Dio benu vin ! Ĉi tiuj kreitinoj ne similas al la blankulinoj, vi vidas : ili rapide transpasas tion, se eĉ malmulte oni scias bone elturniĝi. Estas tiuj kiuj asertas, aldonis la komercisto kun naiva kaj konfidenca mieno, ke nia komerca speco malmoligas la koron. Nu, mi neniam rimarkis tion. Estas vere ke mi ne agas kiel iuj homoj. Mi vidis lin elŝiri la infanon el la brakoj de la patrino kaj vende proponi lin, la virino ĉiam kriante kiel frenezulino. Tio estas abomeninda metodo ! La artiklo difektiĝas, kaj

kelkfoje fariĝas tute nekapabla por servo. Mi konis, en Nov-Orleano, belega knabino kiun ĉi tiu procedo komplete damaĝis. La viro kiu marĉandis ŝin, ne volis ŝian bubon. Ŝi estis unu el tiuj rasaj virinoj, kiuj ne estas cedemaj kiam ili nervoziĝas. Ŝi premis la infanon en siaj brakoj, ŝi sin alkroĉis al li; ŝi parolis !... Estis terure por vidi kaj aŭdi ! Nur pensi pri tio malfluidigas mian sangon ! Kiam, post esti perforte forprenintaj la infanon de ŝi, ili enfermis lin, ŝi furioze freneziĝis kaj mortis post unu semajno. Neta deficito de mil dolaroj, sinjoro ! Kaj tio pro manko de bona lerteco. Ĉiam pli bone necesas humane fari la aferojn : tio estas mia principo.

La komercisto sin apogis malantaŭen sur sian seĝon kaj krucis la brakojn kun mieno de virta kontenteco, kredante sin almenaŭ ian duan Vilberforse.

Li ŝajnis grave fervori pri ĉi tiun temon; ĉar dum s^ro^ Ŝelbi, tute pensema, senŝeligis oranĝon, li reparolis kun certa modesteco kaj kvazaŭ pelita de la forto de siaj konvinkoj :

- Apenaŭ taŭgas sin mem laŭdi; sed mi diras tion ĉar ĝi estas la pura vero. Mi estas rigardata kiel alkondukanta al la merkato la plej belajn gregojn da negroj, almenaŭ oni diris tion al mi, ne unu fojon, sed cent, ĉiujn artiklojn bonstatajn, grasajn, pretajn ! Mi perdas tiom malmulte da homoj kiel iu ajn el miaj kolegoj, kaj tio, dank'al mia maniero por procedi. Mi fieriĝas, sinjoro, la humaneco estas mia povo, la volboŝlosilo de miaj operacioj.

S^ro^ Ŝelbi, ne scianta kion diri, murmuris : "Vere !"

- Nu ! Oni mokis pri miaj principoj, sinjoro; oni priŝercis mi pro tio. Ili ne estas popularaj; sed mi volegis ilin, mi volegas ilin, kaj mi volegos ilin; des pli ĉar mi realigis per ili sufiĉe bonajn profitojn; ili pagis siajn frajton, interezon kaj kapitalon, sinjoro ! La komercisto ekridis pri

sia ŝerceto.

Estis io tiel pika, tiel originala en ĉi tiuj komentoj pri la humaneco, ke s^ro Ŝelbi ne sukcesis reteni sin kune ridi. Eble ĉu ankaŭ vi ridas, leganta amiko ? Sed vi scias ke la humaneco alprenas nuntempe tiel strangajn kaj tiel diversajn formojn ke tute ne estas fino al la strangecoj kiun sin permesas diri kaj fari tiuj kiuj asertas sin humanaj.

La rido de s^ro Ŝelbi kuraĝigis la homvendiston.

- Estas strange, li daŭrigis, mi neniam sukcesis enŝovi miajn ideojn en la kapojn de la homoj. Ekzemple Antono Lokero, mia ekspartnero, tie en Naĉezo. Li estis lerta viro, sed vera demono por la negroj. Principa afero, vi vidas ! Ĉar neniam plej bona knabo manĝis la panon de la bona Dio. Tio estis lia sistemo, sinjoro. Mi ofte diris al li : "Tomo, kiam la knabinoj ekploras, por kio utilas frapi ilin tiel forte sur la kapon, svenbati ilin per pugnobatoj unujn post la aliaj ?" Estas ridinda; kaj kio bona rezultas el tio ? Mi vidas nenian damaĝon kiam ili ploras. Mi diras ke tio estas naturo, kaj se la naturo ne povas malŝveliĝi unuflanke, necesas ja ke ĝi malŝveliĝas aliflanken. Cetere tio difektas ilin al vi, viajn knabinojn; ili fariĝas malsanemaj; ilia buŝo pendas. Ekzistas iuj kiuj fariĝas tute malbelaj, ĉefe la junaj, kaj tiam estas malfacilege forigi ilin. Mi ankaŭ diris al li : "Ĉu vi ne povus iom kaĵoli ilin, de tempo al tempo doni al ili kelkajn afablajn parolojn ? Kalkulu kun tio, Antono, iomete da humaneco ĵetita ĉi tie kaj tien trafas pli ol ĉiuj viaj batoj de vipo kaj de bastono, kaj estas pli da profito, estu certa pri tio". Sed Antono Lokero ne kapablis pri tio. Kaj li tiom ruinigis el ili ke mi estis devigita ĉesigi kun li, kvankam li estis bona koro kaj bonega negocisto.

- Kaj ĉu via metodo vere donas pli bonajn rezultojn ?

- Jes, certe, sinjoro. Se la afero eĉ malmulte okazus, mi antaŭzorgus, kiel forigi la patrinojn dum la vendado de la

idaron, for de la okuloj, for de la koro, vi scias. Kiam tio estas finita kaj kiam oni ne plu povas ion, nepras decidiĝi. Ne estas kiel la blankuloj, kiuj estas edukitaj kun la ideo ke ili povos gardi siajn edzinojn, siajn infanojn kaj la tutan ceteron. Bone edukitaj negroj ne estas preparitaj al simila situacio, kaj la aferoj iras nur pli bone.

- Tiam mi timas ke la miaj ne estas bone edukitaj, diris s^ro Ŝelbi.

- Mi suspektas ke ne. Vi, homoj de Kentukio, vi eldorlotas viajn negrojn. Kun bona intenco; sed finfine estas fari al ili malbonan servon. Bela donaco por doni al negro kiu estas destinita por esti balancita, skurĝita, vundita, vendita al Petro, al Paŭlo, al iu ajn; bela donaco doni al li ideojn kaj esperojn ! Se li komence estis dorlotita, li nur estos des pli malbone preparita al la faloj kaj skuoj de la vojo. Jen, mi vetus ke viaj negroj havus la mienon terure longigitaj, tie kie la negroj de la plantejoj nur kantas kaj saltas kiel demonhavantoj. Ĉiu, sinjoro Ŝelbi, nature havas bonan opinion pri sia metodo. Mi ja kredas ke mi traktas la negrojn precize kiel necesas trakti ilin.

- Oni estas feliĉa esti kontenta pri si, diris s^ro Ŝelbi, kun eta ŝultrumo kaj lasante vidiĝi nuancon de abomeno.

- Nu, reparolis Halej, post kiam ambaŭ estis silente senŝeligintaj siajn nuksojn dum kelka tempo, kion vi diras pri tio ?

- Mi tion pripensos, kaj parolos pri tio kun mia edzino. Intertempe, Halej, se vi volas trankvile agi, zorgu pri tio ke via speco de finegoco ne koniĝu en la najbaraĵo. Se eĉ malmulte sciiĝus el tio, vi ne facile trovos oportunaĵon ĉe miaj homoj, mi pri tio avertas vin.

- Ho ! Aŭdinta : mute. Sed urĝas al mi, kaj mi volus scii kiel eble plej frue, tien kie oni staras. Parolante, li leviĝis, kaj surmetis sian surtuton.

- Tiuokaze revenu ĉi-vesperen, de la sesa ĝis la sep, vi havos mian respondon.

La komercisto salutis kaj eliris.

- Kiom mi plezurintus ĵeti la fiulon per la piedbato malsupren de la ŝtuparo, lin kaj lian senhontecon ! murmuris s^ro Ŝelbi, kiam la pordo estis bone refermita. Sed li tenas min per sia potenco. Se iu iam diris al mi ke mi vendus Tomo^n al iu el tiuj malŝatindaj finegocistoj de la Sudo, mi respondintus : "Ĉu via servisto estas hundo kiun vi juĝas lin kapablan de tia afero ?" Kaj nun necesas alpaŝi al tio. Kaj do la infano de Eliza ! Mi scias ke mi min kverelos kun mia edzino pri tio kaj ankaŭ pri la afero de Tomo. Jen kie finiĝas la ŝuldoj !... Ha ! La fiulo konas siajn avantaĝojn kaj profitas de ili.

Eble ne ekzistas ŝtato en kiu la sklaveca sistemo alprenis pli milda formo ol en Kentukio. Tie, la kampolaboroj, kvietaj kaj laŭgradaj, ne okazigante tiujn periodajn revenojn de febra aktiveco, de superhomaj klopodoj kiujn postulas la speco de kultivaĵo kaj de komerco de la Sudo, ebligas la taskon de la nigrulo pli sanan kaj pli justan. Dum siaflanke, la mastro, kontenta pro iom post iom kreskigi sian bienon, tute ne estas submetita al la tentoj de hardiĝo, kiuj tiel rapide regas nian nefortan humanecon, kiam la perspektivo de subita kaj rapida gajno ne havas alian kontraŭpezon ol la interesoj de kompatindaj laboristoj, sen subteno kaj sen protekto.

Tiu ajn kiu vizitas kelkajn loĝejojn de Kentukio, tiu ajn kiu vidas la ameman indulgon de iuj mastroj, de iuj mastrinoj, la sindoneman lojalecon de kelkaj sklavoj, povas revi pri la fabela kaj poezia legendo de la patriarkaj institucioj, kaj ĉio kio sekvas. Sed ĉirkaŭ kaj super la ĉarma pentraĵo ŝvebas fatala ombro, la ombro de la leĝo. Tiel longe dum la leĝo klasifikos ĉiujn tiujn estulojn, kun batantaj koroj, kun viglaj

korinklinoj, kiel aferojn proprajn al la mastro, dum la ruino, la malfeliĉo, la neantaŭzorgemo aŭ la morto de la plej bona sklavposedanto, povos unutage pasigi ĉi tiujn de trankvila kaj milda vivo al devigaj laboroj, al senespera mizero, ne eblos eltiri ion ajn bonan aŭ belan el la plej bone normaligita sklavsistemo.

S^ro Ŝelbi averaĝe estis brava viro. Milda, amema, inklina al indulgo por tiuj kiuj alproksimiĝis al li, li neniam troŝparis pri tio kio povus kontribui al la materia bonstato de liaj nigruloj. Sed, kuntirita por grandskale spekuli, li ŝuldiĝis, kaj liaj monbiletoj, por grava sumo, trafis en la manojn de Halej. Tio estas tio kio klarigas la antaŭan konversacion. Tamen okazis ke, alproksimiĝinte al la pordo, Eliza aŭdis sufiĉe por kompreni ke finegocisto de sklavoj faris proponojn al ŝia mastro.

Ŝi ja volintus halti elirante por ekscii pli, sed ŝia mastrino alvokis ŝin.

Ŝi kredis esti aŭdinta ke temas pri ŝia knabo. Sendube ŝi eraris. Kun la koro peza kaj premita, ŝi instinkte premis la infanon kontraŭ sian bruston per tia forto ke li rigardis ŝin tute mirigita.

- Eliza, filino mia, kion vi havas hodiaŭ ? demandis ŝia mastrino, kiam post esti renversinta la akvokruĉon kaj faliginta la kudrotablon, ŝi alportis matenan negliĝon anstataŭ la silkan robon kiun oni sendis ŝin serĉi.

Eliza ektremis. "Ho ! Mastrino ! ŝi diris levante la okulojn, poste eksplodante en larmoj, ŝi sidiĝis kaj komencis plorsingulti.

- Eliza, infano ! Kion vi havas ? Kio estas ?

- Ho ! Mastrino ! Mastrino ! Estis en la manĝoĉambro sklavvendisto kiu parolis kun la mastro. Mi aŭdis lin.

- Nu, frenezulino ! Ni supozu ke tio estu.

- Ho ! Mastrino, ĉu vi kredas ke la mastro volus vendi

mian Henrikoⁿ ? kaj la kompatinda estulino singultis ankoraŭ pli forte.

- Vendi lin ! Ho ne, infano kiun vi estas ! Ĉu vi ne scias ke via mastro neniam traktis kun tiuj finegocistoj el la Sudo, kaj ke li neniam pensis vendi iun el siaj sklavoj, tiel longe dum ili bone kondutas ? Freneza kapo ! Ekimagi al si ke iu volus aĉeti ŝian Henrikoⁿ ! Ĉu vi kredas ke ĉiuj amegas lin kiel vi ? Nu, sekigu viajn larmojn, kaj agrafu mian robon. Jen, nun suprenfiksu miajn harojn; faru al mi tiun beletan harligon kiun vi lernis la alian tagon, kaj ne plu permesu al vi aŭskulti ĉe la pordoj

- Kompreneble, mastrino, vi ne donus vian konsenton pri… pri…

- Certe ne. Sed estas absurde, kial eĉ paroli pri tio ? Mi pensus tute same konsideri vendi unu el miaj propraj infanoj ! Reale, Eliza, vi fariĝas tro fiera pri ĉi tiu infano. Iu viro ne povas enigi sian nazon en la domon, ke vi imagas ke li venas tute intence por aĉeti vian Henrikoⁿ !

Trankviligita de la sincereca mieno de sia mastrino, Eliza povis lerte okupiĝi pri siaj taskoj de ĉambristino, kaj fine ridis mem pri siaj teruroj.

Sinjorino Ŝelbi estis virino kun alta nobleco, pri inteligenteco kaj pri moralo. Ŝi kunigis kun la grandanimeco kiu ofte karakterizas la virinojn de Kentukio, veran sentemecon, kaj religiajn principojn, kiujn ŝi uzis kun energio kaj deco en la ĉiutaga praktiko de la vivo. Ŝia edzo, kvankam li sin alligis al nenia aparta konfesio, respektis la firmecon de kredoj de sia edzino, kaj eble iom timis ŝian opinion. Almenaŭ, li lasis senliman amplekson al ĉiuj ŝiaj bonkoraj klopodoj por edukado, bonstato kaj plibonigo de siaj sklavoj, sin detenante aktive partopreni en tio. Fakte, sen havi kompletan kredon pri efikeco por aliulo de la bonaj faroj de la sanktuloj, sʳᵒ Ŝelbi ŝajnis pensi ke lia inda kunulino havas

bonkorecon kaj piecon por du; eble li eĉ nutris konfuzan esperon atingi la ĉielon, dank'al troaĵo da kvalitoj de kiuj li liberigis sin.

Tio kio ĉefe tedis lin post sia konversacio kun la homvendisto, estis la bezono sin konfidi al sia edzino kaj devi kontraŭbatali la protestojn kiujn li antaŭvidis.

Siaflanke, s^ino Ŝelbi, ne suspektante la embarason de sia edzo, kaj sciante la ĝeneralan mildecon de lia karaktero, senartifike estis nekredema pri la suspektoj de Eliza. Ŝi alkroĉis ilin nur momenton, kaj tute kaptita de la preparoj por iu vizito kiun ŝi devis fari la vesperon mem, ŝi ne plu pensis pri tio.

02. La Patrino.

Ekde sia plej frua infaneco, Eliza estis edukita kaj dorlotita laŭ amata infano fare de sia mastrino. La vojaĝanto kiu trairis la sudajn Ŝtatojn, devas multfoje konstati la apartan elegantecon, la mildecon de manieroj kaj de voĉoj, kiuj ŝajnas propraj talentoj de kvarteroninoj kaj de mulatinoj. Unue cititaj, ĉi tiuj naturaj gracioj ofte miksiĝas kun brila beleco, kaj preskaŭ ĉiam kun agrabla kaj plaĉa aspekto. Eliza, tiel kiel ni portretis ŝin, ne estas fantazia figuro, sed laŭnatura portreto farita el memoro, kaj kies originalon ni vidis en Kentukio. Ŝi kreskis sub la protekto de sia mastrino, ŝirmite de la tentoj kiuj faras de beleco tiel fatalan heredaĵon por la sklavo. Pli poste ŝi edziniĝis kun mulato, Georgo Hariso, el najbara loĝejo.

La junulo estis ludonita de sia mastro al fabriko de saktolo, kaj lia lerteco, lia inteligenteco igis lin la plej bona laboristo. Li eltrovis maŝinon por tili kanabon[5] kiu, se oni konsideras la edukadon kaj antaŭaĵojn de la inventinto, atestis genion pri mekaniko, kiun Witnej sukcesis disvolvi en sia maŝino por elpurigi la kotonon.

Bela, bonaspekta, dotita de agrablaj manieroj, Georgo sukcesis fari sin amata de la tuta fabriko. Tamen, ĉar li ne estis homo, sed afero, ĉiuj tiuj kvalitoj estis submetitaj al la kontrolo de despota, kruda kaj ŝtipkapa mastro. La jam nomita ĝentilhomo, aŭdinte laŭde paroli pri la eltrovo de Georgo, iun matenon surĉevale rajdis kaj iris al fabriko por vidi tion kion faras lia uzataĵo.

Li estis entuziasme akceptita de la fabrikisto, kiu gratulis lin pro havi sklavon el tia prezo. Li vizitis la

5 Tia maŝino estis fakte inventita en Kentukio de nigrulo.

manufakturon, la maŝino estis klarigita al li kaj montrita de Georgo kiu, pro sia ĝojo, parolis tiel flue, sin tenis tiel rekte, havis mienon tiel altan kaj tiel viran, ke malserena konscio pri lia malsupereco iom post iom ekregis la mastron. Pri kio zorgis lia sklavo por trairi la landon, por elpensi maŝinojn, por aŭdaci levi la kapon inter la ĝentilhomoj ? Li tuj ĉesigus tion; li rekondukus lin al la sulko; li metus lin por fosi la teron kaj por ŝpati, "por vidi ĉu li ankoraŭ aspektus tiel petola". Konsekvence, je la granda konsterno de la fabrikisto kaj de liaj laborantoj, li subite postulis la lupagon de Georgo, kaj sciigis sian intencon rekonduki lin siahejmen.

- Sed, sinjoro Hariso, malaprobis la fabrikisto, tio vere estas subita !

- Ne gravas ! Ĉu la viro ne estas al mi ?

- Ni estus pretaj, sinjoro, pliigi la kompensan prezon.

- Tute ne. Mi tute ne bezonas luigi unu el miaj manoj se tio ne konvenas al mi.

- Sed, sinjoro, li ŝajnas aparte taŭga por ĉi tiu speco de laboro.

- Tio eblas. Li neniam taŭgis por io ajn kiun mi volis farigi al li.

- Pensu ke li inventis ĉi tiun maŝinon, diris sufiĉe mallerte unu el la laboristoj.

- Jes ! Maŝinon por ŝpari la laboron ! Li inventos pli ol necese, certu pri tio. Fidu al la negroj pri tio ! Kio ili estas aliaj ol maŝinoj por ŝpari la laboron ? Ne, ne, li iros !

Georgo restis ŝtonigita sub la influo de tiu ĉi decido, metita de potenco kiun li sciis nekontraŭstarebla. Kun la brakoj krucitaj, la lipoj kunpremitaj, iu tuta vulkano da amaraj sentoj brulis en lia brusto, kaj sendis fajrajn ondojn en liajn vejnojn. Lia spirado estis malprofunda, kaj liaj grandaj nigraj okuloj, similaj al du ardaj karboj, ĵetis fajreroj. Necesis timi iun danĝeran eksplodon, se la

fabrikisto ne estis tuŝanta al li la brakon kaj diranta tute mallaŭte :

- Submetiĝu, Georgo, nuntempe sekvu lin, ni provos helpi al vi.

La tirano rimarkis la flustradon kaj divenis ĝian sencon, kiu plie konfirmis al li lian decidon.

Georgo, revenigita ĉe la mastro, ricevis kiel parton la plej aĉajn kaj la plej dolorigajn taskojn. Li sukcesis deteni ian ajn ofendan parolon; sed la fulmo de lia okulo, la falto de lia ĉagrenita frunto, sufiĉe klare kaj sufiĉe laŭte diris ke la homo ne povas fariĝi io.

Estis dum la feliĉa pasinta tempo ĉe la manufakturo ke li koniĝis kaj edziĝis kun Eliza. Ĝuante la estimon kaj fidon de sia estro, li povis libere iri kaj veni. La geedziĝo estis aprobita de s^ino Ŝelbi kiu, kun iom da inklino kiun havas la virinoj entrudiĝi en tiajn aferojn, estis ravita geedzigi sian belan favoratinon kun viro el la sama klaso, kaj kiu ŝajnis tiel bone taŭgi al ŝi. La ceremonio okazis en la granda salono kaj la mastrino estis per siaj propraj manoj miksinta la orangflorojn kun la belaj haroj de la fianĉino kaj kovrinta ŝian ĉarman kapon per la geedziĝa vualo. Estis abundege da blankaj gantoj, da kukoj, da vino kaj da gastoj avidantaj pri la beleco de la juna knabino kaj la malavareco de la mastrino.

Dum unu jaro aŭ du Eliza povis ofte vidi sian edzon, kaj la feliĉo de la junaj geedzoj estis nur afliktitaj de la perdon de du etaj infanoj, pasie amataj de ilia patrino, kaj kiujn ŝi ploris kun malespero kiu altiris al ŝi la mildajn admonojn. de s^ino Ŝelbi, malserena por revenigi ĉi tiujn tro ardajn sentojn en la limojn de la saĝo kaj de la religio.

Post la naskiĝo de la eta Henriko, la juna virino iom post iom trankviliĝis. Ĉiu sanga ligilo, ĉiu skuita nervo, denove volvinta ĉirkaŭ ĉi tiu neforta ekzisto, plifirmiĝis kaj plifortiĝis kun ĝi. Eliza estis feliĉa virino ĝis la tago kiam ŝia

edzo, brutale forprenita disde bonkora estro, refalis sub la feran vergon de sia laŭleĝa posedanto.

Fidela al lia parolo, la fabrikisto iris viziti s^ron Hariso^n unu semajnon aŭ du post la forrabo de Georgo kaj prezentis antaŭe ĉion kio devis decidigi la mastron redoni al la sklavo sian unuan oficon.

- Vi povas ŝpari al vi la penon pli diri pri tio, insideme rebatis la posedanto, mi estas juĝanto pri miaj propraj aferoj.

- Mi ankaŭ ne pretendas entrudiĝi en tio, sinjoro; nur mi pensis ke en via intereso vi povus akcepti luigi al ni vian viron laŭ la proponitaj kondiĉoj.

- Ho ! Mi komprenas pli ol necese. Mi vidis vin okulumi kaj flustri la tagon kiam mi reprenis lin. Sed vi traktas kun tiom ruza kiom vi ! Ni estas en libera lando, sinjoro. Ĉi tiu viro estas mia, kaj mi faras de li tion kio plaĉas al mi. Jen !

Tiel svenis la lasta espero de Georgo. Nenio, nenio pli ol vivo de fiaj kaj dolorigaj laboroj, ankoraŭ pli amarigitaj de ĉiuj indignindaĵoj, ĉiuj pikaj ofendoj de detalo kiujn tiraneco estas tiel lerta por elpensi.

Jurkonsilisto el la plej humanaj iam diris : "La plej malbonan uzon kiun oni povas fari de homo, estas pendigi lin". Ne; estas maniero uzi lin kiu estas ankoraŭ pli malbona !

03. Edzo kaj Patro.

S^ino Ŝelbi ĵus foriris por sia vizito. Eliza, stare en la verando malgaje sekvis per la okuloj la veturilon kiu malproksimiĝis, kiam mano sin metis sur ŝian ŝultron. Ŝi turniĝis, kaj brila rideto priradiis ŝiajn belajn okulojn.

- Ho ! Georgo, ĉu estI vi ? Vi timigi min ! Kiom mi ĝojI ke vi veni ! Mastrino foriri dum la tuta posttagmezo. VenI en mian ĉambreton, ni havI multan tempon por babili.

Parolante, ŝi enkondukis lin en beletan malgrandan ĉambron rigardanta al la galerio, kie ŝi kutime kudris, voĉatingebla de sia mastrino.

- Kiel kontenta mi estI ! Sed kial vi ne ridetI al mi ? RigardI nian Henriko^n ! Kiel jen li granda ! *La infano, alkroĉanta al la robo de sia patrino, timeme konsideris sian patron tra sia longa, bukla hararo.* Li esti bela, ĉu ne ? diris Eliza. *Ŝi flanken puŝis liajn harojn kaj kisis lin.*

- Mi deziri ke li ne naskiĝi ! amare ekkriis Georgo. Mi deziri esti mem ne naskiĝinta !

Surprizita, timigita, Eliza sidiĝis, klinis sian kapon sur la ŝultron de sia edzo kaj ekploris.

- Ĝuste nun… esti malbone de mi fari al vi ĉi tiun plenan doloron, kompatinda edzino, esti tre malbone ! Ho ! Kial vi iam vidi min, vi povi esti tiom feliĉa !

- Georgo ! Georgo ! Kiel vi povi diri tion ?… Kio do okazi tiel terura ? Ĉu ni ne esti feliĉaj, tre feliĉaj, ankoraŭ lastatempe ?

- Jes, ni esti, kara ! diris Gorgo. *Li altiris la infanon sur siajn genuojn, atente rigardis liajn brilajn nigrajn okulojn kaj trairigis siajn fingrojn tra la silkaj ringoj de lia hararo.*

- Tutĝuste via portreto, Elnjo, kaj vi vere esti la plej bela virino kiun mi iam vidi, kaj la plej bona kiun mi iam ajn deziri vidi, kaj tamen preferinde esti neniam renkontiĝantaj unu la alian.

- Ho ! Georgo. Kiel vi povi…

- Jes, Eliza, suferi, ĉiam suferi, nur suferi ! Mia vivo esti pli amara ol absinto, ĝi eluziĝi kaj konsumiĝi de minuto al minuto. Mi esti kompatinda turmentata mizerulo forlasita al sia aĉa sorto. Mi kuntiri vin en la koto kun mi, jen ĉio ! Kial provi fari ion, scii ion, esti iu ? Kial vivi ? Mi deziri esti morta !

- Ho ! Georgo, jen kiu esti vere malbone ! Mi scii ĉion kion vi suferi perdante vian postenon en la fabriko, vi havi malagrablan mastron; sed pacienci, kaj eble…

- Pacienco ! li diris interrompante ŝin. Ĉu mi ne esti pacienca ? Ĉu mi diri unu solan vorton kiam, sen ia racia preteksto, li veni por forŝiri min el la loko kie mi esti bone, kie ĉiuj ami min ! Mi fidele redoni al li ĝis la lasta speso de mia gajno, kaj ĉiuj diri ke mi labori kiel du.

- Esti vere ke tio esti terura, diris Eliza. Sed finfine, li esti via mastro, vi scii.

- Mia mastro ! Kiu fari lin mian mastron ? Jen tio kion mi demandi al mi. Kian rajton li havi sur mi ? Mi esti homo kiel li. Pli bona homo ol li ! Mi pli bone kompetenti pri komerco. Mi esti pli lerta administranto ol li esti. Mi pli flue legi; mi havi pli belan manskribon, kaj mi sole lerni ĉion; mi nenion ŝuldi al li. Mi lerni malgraŭ li ! Kaj kian rajton li havi por fari de mi ŝarĝobeston ? Por forpreni min el okupoj pri kiuj mi kapabli, pli ol li, por meti min en la loko de ĉevalo ? Jen tio kion li voli, li diri ke li rompi min, ke li humiligi min, kaj li intence doni al mi la plej malfacilajn, la plej aĉajn, la plej malpurajn taskojn !

- Ho ! Georgo, Georgo… vi timigi min ! Neniam mi aŭdi

vin tiel paroli, mi timi ke vi fari ion malbonan. Mi scii ĉion kion vi suferi; sed esti prudenta. Ho ! Mi petegi vin por la amo al mi, por nia Henriko !

- Mi esti prudenta, mi esti pacienca; sed la aferoj plimalboniĝi de horo al horo. Karno kaj sango ne plu kapabli elteni. Ne esti unu okazo por insulti min, por turmenti min, kiun li ne kapti ! Mi pensi sukcesi plenumi mian laboron, resti kvieta, kaj mia tasko finita, ankoraŭ trovi tempon por legi kaj lerni. Sed ju pli mi labori, des pli li superŝarĝi min. Li diri ke, kiom ajn mi silenti, li bone vidi ke demono loĝi en mi, kaj ke li foririgi ĝin el mi ! Kaj unu el la ĉi tiuj tagoj la demono eliri, sed laŭ maniero kiun ne plaĉi al li, aŭ mi tre erari.

- Ho ! Kara, kion ni fari ? diris Eliza malgaje.

- Ne plu malfrue ol hieraŭ, daŭrigis Georgo, mi ŝarĝi ŝtonojn en ĉaron, la juna mastro Tomjo ĉeesti, klakigante sian vipon tiel proksime al la ĉevalo, ke la besto ektimi. Mi mildege peti al li ĉesi; li daŭrigi pli laŭte; mi denove petegi al li, li sin turni kaj frapi min. Mi reteni sian manon, tiam li eligi laŭtegajn kriojn, ĵeti al mi piedbatojn kaj kuri diri al sia patro ke mi batali kun li. La patro furioze veni, ĵurante ke li instrui al mi koni mian mastron. Li ligi min al arbo, detranĉi branĉojn por sia filo, kaj diri al li ke li devi vipi min ĝis kiam li laciĝi; kaj li meti longan tempon por laciĝi !... Se iam mi ne rememorigi tion al li !

La frunto de la mulato malheliĝis, kaj en liaj okuloj vekiĝis malbrila fajro kiu tremigis la junan virinon. "Kiu fari de ĉi tiu viro mian mastron ? Jen tio kion mi voli scii.

- Mi ĉiam pensi ke mi ŝuldi obeadon al la mastro kaj la mastrino, se ne mi ne esti kristanino, diris Eliza.

- Ho ! Vi, esti malsama, ili eduki vin tute junaĝan. Ili nutri, vesti, instrui vin. Ĉi tiuj esti specoj de rajtoj. Sed mi, kion mi ricevi ? Piedbatojn, pugnobatojn, insultojn, tro feliĉa

esti kelkfoje forgesita en angulo. Kaj kion mi ŝuldi ? Mi pagi centoble tion kion mi kosti. Mi ne pli elteni tion. Ne, mi ne voli tion ! *li diris kun fermita pugno kaj minaca mieno.*

Eliza, tremetanta, silentis. Neniam ŝi vidis sian edzon tiel incitegita. Lia milda natureco fleksiĝis kiel kanon sub la impetega skuo de ĉi tiu uragano.

- Vi scii, la kompatinda Karlo kiun vi doni al mi, daŭrigis Georgo, ĝi esti mia sola konsolado. Li nokte dormi kun mi, sekvi min al laboro, kaj ofte rigardi min kvazaŭ ĝi kompreni tion kion mi suferi. Nu ! La alian tagon mi doni al li kelkajn ĵetitajn ostojn kiujn mi pluki ĉe la pordo de la kuirejo, kiam la mastro pasi. Li plendi ke mi nutri ĝin koste de li. Li ne havi la monrimedojn, li diri, vivteni la hundon de ĉiu negro, kaj li ordoni al mi alligi ŝtonon al la kolo de Karlo, kaj ĵeti ĝin en la marĉeton.

- Ha ! Georgo, vi ne fari tion !

- Ne, ne mi, sed li. La mastro kaj lia filo Tomjo droni kaj svenbati ĝin per ŝtonoj. Kompatinda besto ! ĝi rigardi min tiel malĝoje, kvazaŭ ĝi peti al mi savi ĝin. Poste mi esti skurĝita pro ne voli mortigi mian hundon. Sed ne gravi ? La mastro vidi ke mi ne esti el tiuj kiuj oni subpremi per la vipo. Mia tago veni, ke li sin gardi !

- Kion vi esti faronta, Georgo ? Ho ! Mi petegi vin, ne fari ion malbonan. Se vi nur voli fidi al Dio kaj pacienci, Li liberigi vin.

- Mi ne esti kristano kiel vi, Eliza; mia koro esti plenplena de galo. Mi ne kapabli fidi al Dio ! Kial li lasi la aferojn okazi laŭ ĉi tiu pereiga maniero ?

- Ho ! Georgo, ni havi fidon ! Mastrino diri eĉ ke ĉio aĉiĝi, ni devi kredi ke Dio fari kiel eble plej bone.

- Esti facile por diri al tiuj kiuj sidi sur sofoj, tirataj en kaleŝegoj. Ke ili ŝanĝi lokon kun mi, kaj ili ŝanĝi lingvaĵon. Mi deziri povi esti bona, sed la koro bruligi min, kaj ne sukcesi

rezigni. Eĉ vi ne kapabli tion, vi ne kapabli, kiam mi esti dirinta al vi tion kion mi devi diri al vi. Vi ankoraŭ ne scii ĉion.

- Kio pli povi esti ?

- La mastro antaŭnelonge deklari ke li penti lasi min edzinigi ekster la bieno, ke li malami s^ron Ŝelbi^n kaj lian tutan rason, ĉar ili esti orgojluloj kiuj levi la kapon pli alte ol li. Li diri ke esti de vi ke mi akiri miajn ideojn pri sendependeco, ke li ne plu permesi al mi veni ĉi tien kaj ke mi devi preni alian edzinon, kaj kunvivi en la plantejo. Unue li grumbli kaj obtuze minaci, sed hieraŭ li ordoni min preni Mina^n kaj ekloĝi en kabano kun ŝi, alie li vendi min por la Malsupra Rivero.

- Sed vi esti edziĝinta kun mi de la ministro, nek pli nek malpli ol se vi esti blankulo, diris Eliza naive.

- Ĉu vi ne scii ke sklavo ne rajti edziĝi ? La leĝo ne kalkuli kun tio. Mi ne kapabli gardi vin kiel mian edzinon, se plaĉi al li disigi nin. Jen kial mi deziri esti neniam vidante vin, kial mi riproĉi min esti naskiĝinta ! Pli bone esti por ni ambaŭ, pli bone esti por ĉi tiu kompatinda infano ne esti en la mondo. Ĉio ĉi povas ankaŭ okazi al li.

- Ho ! Nia mastro al ni, esti tiel bona !

- Jes, sed kiu scii ? Li povi morti, kaj tiam la infano esti vendata, Dio scii al kiu ? Ĉu esti plezuro vidi lin belan, lertan, inteligentan ? Ne, mi diri al vi, Eliza, ke ne esti en li kvalito, beleco, kiu iam ne trapiki al vi la koron kiel glavo; necesi tro multe da mono por ke vi povi gardi lin, kompatinda edzino !

Ĉi tiuj paroloj konsternigis Eliza^n. La vidaĵo de la sklavkomercisto revenis al ŝi. Ŝi paliĝis, la spirado mankis al ŝi kvazaŭ ŝi ricevis mortigan baton. Ŝi serĉis per la okuloj sian Henriko^n, kiu, laca pro la serioza tono de la interparolo, iris sub la verandon, kie li triumfe galopis rajde sur la irbastono de s^ro Ŝelbi. Ŝi emis paroli al sia edzo pri siaj

timoj, sed ŝi sin detenis.

"Ne, ne, li jam sufiĉe havi, kompatinda viro !" ŝi pensis. "Mi nenion diri al ŝi. Cetere, tio ne esti vera; mastrino neniam trompi min".

- Tiel, Eliza, knabino mia, diris ŝia edzo, kuraĝo kaj adiaŭ, ĉar mi foriri.

- Vi foriri, kaj al kie, Georgo ?

- Al Kanado, li stariĝis plenalte, kaj tuj tien mi elaĉeti vin. Ni ne plu havi alian esperon. Vi havi bonan mastron kiu ne rifuzi vendi vin. Mi elaĉeti vin kaj la knabon. Kun la helpo de Dio, mi finvenki tion !

- Aĥ ! Ve !... se vi esti kaptita ?

- Mi ne esti kaptita, Eliza, mi morti antaŭe. Mi esti libera aŭ morta.

- Vi almenaŭ ne mortigi vin, ĉu ?

- Mi ne havi ĉi tiun problemon. Ili sufiĉe rapide mortigi min, neniam ili forigi min vivantan al la Malsupra Rivero.

- Georgo, por mia amo, gardi vin ! Ne fari perforton aŭ al vi aŭ al iu ajn !... La tento esti tro forta, mi scii tion. Foriri, ĉar tio necesi, sed esti singardema, preĝi Dion helpi vin.

- Aŭskulti mian planon, Eliza. La mastro enkapigi al si sendi min ĉi tien proksime por alporti letereton al s^{ro} Simeso. Li kalkuli, mi kredi, ke mi halti preterpasante por diri al vi tion kion mi havi en la koro. Li esti ravita ke la afero ofendi la ge-Ŝelbi^{ojn}, "tiun genton !", kiel li nomi ilin. Mi rezignacie reiri al la loĝejo, vi kompreni, kvazaŭ ĉio esti finita. Mi fari miajn preparojn, kaj esti homoj kiuj helpi min. Post unu semajno aŭ du, iun tagon, mi malesti dum la alvoko. Preĝi por mi, Eliza, la bona Dio eble aŭskulti vin.

- Ankaŭ preĝi lin, Georgo, fidi al li, kaj vi ne fari ion malbonan.

- Nun adiaŭ, diris Georgo.

Li prenis la manojn de Eliza inter la siajn, kaj fikse rigardis ŝin en la okuloj sen moviĝi. Ambaŭ silentis. Poste venis la lastaj paroloj, la amaraj ploroj, la tuta korŝiro de la disiĝo, kiam la espero sin revidi kuŝas sur araneaĵo. Fine la edzo kaj edzino disiĝis.

04. Iu Vespero en la Kabano de Onklo Tomo.

La kabano de Onklo[6] Tomo, farita el apenaŭ ĉirkaŭhakitaj arbotrunkoj, estis iom proksime de la "domo"; la nigrulo tiel moŝte nomas la loĝejon de la mastro. Ĉe la fronto etendiĝis ĉarma ĝardeneto kie, diligentaj zorgadoj, kreskigis, ĉiujn somerojn, fragojn, frambojn, kaj mirindan diversecon, pro la spaco, de fruktoj kaj legomoj. La tuta fasado estis tapiŝita de granda skarlata bignonio, kaj bela plurflora rozujo, kies branĉoj kruciĝantaj kaj volviĝantaj, apenaŭ permesis vidi la rustikan konstruaĵon. Brilaj ĉiujaraj plantoj, taĝetoj, petunioj, konvolvuloj, orgojlo kaj ĝuoj de onklino Kleo, ankaŭ trovis etan angulon kie etendi sian splendecon.

Sed ni ne haltu ekstere. La vespera manĝo estas finita en la granda domo, kaj onklino Kleo, post esti reganta la preparojn kiel "estrino", lasante al la subalternaj geservistoj la zorgadon reordigi la aferojn kaj lavi la vazaron, revenis al sia kara bieneto, por prepari la vespermanĝon de sia "maljunulo"[7]. Estas ŝi mem kiu, tie, antaŭ la fajro atentas kun plenstreĉita zorgemo la progreson de fritado kiu tremetas en la pato. De tempo al tempo, ŝi levas kun pensema mieno la fermoplaton de kampara forno, el kiu liberiĝas bonaŭguraj aromoj. Ŝia dika ronda vizaĝo estas tiel brila, ke oni estus tentata kredi ke ŝi surmetis sur ĝi ovoblankon kiel sur siaj biskvitoj. Sub ŝia bunta kaj amelita turbano, elradias gaja vizaĝaspekto, aperiganta, necesas konfesi tion, iom da tiu natura sufiĉeco de kuiristino taksita kaj aprobita kiel "estrinon" en la tutaj ĉirkaŭaĵoj.

6 La amemaj titoloj de onklo kaj onklino estas donitaj al nigruloj kiuj loĝas en la intimaĵo de la domo, kaj kiuj vidis la infanojn kreski.

7 Ĉi tiu nomo ne implicas ke Tomo estas maljuna. Estas nur amika dirmaniero.

Estas vere ke onklino Kleo estis kuiristino denaska ĝis la medolo de la ostoj. Ne kokido, ne meleagro, ne anaso de la birdokorto kiu ne serioziĝis ĉe sia alproksimiĝo, kaj fakte ŝia konstanta pasio por kuirpretigi, farĉi, rosti, estis ja kapabla veki terurojn ĉe ĉiuj atentemaj birdoj. Ŝiaj maizaj kukoj, en ĉiuj iliaj diversecoj de nomoj kaj formoj, restis neatingeblaj misteroj al malpli lertaj artistoj, kaj ŝi ridegis ĝis teni al si la flankojn, rakontante, kun naiva fiereco, la vanajn klopodojn kiujn faris tiu aŭ tiu el ŝiaj kunulinoj por atingi ŝian altecon.

La atendo de gastoj en la granda domo, la menuo de la tagmanĝoj, de la vespermanĝoj, servitaj laŭ "nobela maniero", vekis sian tutan energion; kaj nenio povis esti pli agrabla al ŝi ol vidi malŝarĝi stakon da kofroj sub la verando. Tioj estis la anoncantoj de novaj klopodoj, de novaj triumfoj.

Nuntempe, onklino Kleo estas okupita pri sian fritpaton. Ni lasos ŝin tie kaj finos pentri la internon de la kabano.

Lito, kovrita de neĝblanka peplomo, okupas unu el la anguloj; tre apude sterniĝas granda peco de tapiŝo, sur kiu kutime tronas onklino Kleo, kiel en supera regiono. Traktita kun aparta konsidero, kaj kiel eble plej malpermesita al ekskursoj fare de malgrandaj marodistoj de la loĝejo, ĉi tiu angulo estis la salono. Ĉe la alia angulo, kontraŭe, pli humila kuŝloko estas destinata por ĉiutaga uzo. Sur la kamenbreto, ornamitaj bildoj reprezentas temojn eltiritajn el la Biblio; meze brilas portreto de Vaŝingtono, desegnita kaj kolorigita, tiamaniere por mirigi tiun eminentulon, se estus donite al li vidi sin tiel reproduktita.

En iu tria angulo, sur kruda benko, du knabetoj kun krispaj haroj, kun brilegaj nigraj okuloj, kun pufaj vangoj, priatentas la unuajn provojn de fratineto; provoj kiuj konsistas, kiel ĉiam, en peniga stariĝo sur siaj piedetoj, en dumsekunda ŝanceliĝo kaj en refalo sur grundon; ĉiu sinsekva

malsukceso estanta akceptata de ekridoj, kaj mirinda sukceso proklamata.

Tablo, iom lama, lokita antaŭ la fajro, kovrita de tuko, kaj provizita de tasoj kaj subtasoj el la plej brilaj koloroj, sciigas ke oni atendas kompanion. Ĉe ĉi tiu tablo sidas onklo Tomo, la ĉefoficisto de s^ro Ŝelbi, kaj nia heroo kies dagerotipo ni tuj provos doni al la leganto.

Li estas alta, fortika beltalia viro, kun larĝa brusto, el nigro de gagato, kies forte afrikaj trajtoj esprimas seriozan kaj firman komunan saĝon, kunigitan kun multe da bonkoreco kaj humaneco. Ĉio en li esprimas la respekton al si mem, kaj grandan naturan dignon, kiu ne malebligas humilan kaj fideman simplecon.

Onklo Tomo estas ĉi-momente tute penema al ardezo, sur kiu li provas, zorgeme kaj malrapide, reprodukti la literojn de la alfabeto, sub inspekto de la juna mastro Georgio, bela dektriaĝa knabo kiu ŝajnas penetrita de siaj gravaj taskoj de instruisto.

- Ne, ne tiel, onklo Tomo, ne tiel ! li diris kun vigleco, dum onklo Tomo pene desegnas malĝuste la voston de sia g, tio faras iu oj, ĉu vi komprenas ?

"Ha ! Vere !" respondas onklo Tomo sekvante per la okulo kun respektoplena admiro la multnombrajn g kaj oj kiujn rapide skribas lia juna instruisto por lia edukado. Prenante siavice la krajonon inter siaj dikaj kaj mallertaj fingroj, li pacience rekomencas.

"Kiel la blankuleto, bone fari ĉion !" diris onklino Kleo, kiu, kun peco da lardo fine de sia forketo kaj grasante sian kuirkradon, paŭzis por fiere kontempli la junan instruiston. "Esti li kiu scii skribi kaj legi ! Do kiam li vespere veni ĉi tie por reciti al ni siajn lecionojn, jen tio kio esti amuza !"

- Sed, onklino Kleo, mi tre malsatas, diris Georgio; ĉu via kuko ne estas baldaŭ bakita ?

- Preskaŭ, massa[8] Georgio; ŝi levis la kovrilon kaj rapide ekrigardis al sia faron. Jen ĝi kiu bruniĝi el bela ora bruno ! Ha ! Lasi min fari, nu mi kompetenti ! Mastrino ordoni al Salio la alian tagon baki kukon, nur por lerni. Ho ! Mastrino, mi diri, tio ne sukcesi ! Esti peko difekti bonajn aĵojn ! Kuko kiu ŝveli ĉion unuflanke, ne pli da formo ol mia pantoflo ! Nu, iri !

Kaj kun ĉi tiu interjekcio de profunda malestimo por la sensperteco de Salio, onklino Kleo rapide forprenis per rapidmova mano la kamparan fornon kaj elmontris antaŭ la okuloj de la rigardantoj kukon taŭge bakitan, kaj kiun ne mallaŭdus majstro-kukisto. Tuj ĉi tiu ĉefa peco alvenita ĉe sia bona destino, onklino Kleo prizorgis pri la pli substanca parto de la vespermanĝo.

- Nu, Moseo, Petro, eliri el la vojo, negridoj ! Savi vin ankaŭ, eta Paola, juvelo mia, panjo post momento doni al la etulino bombonon. Kaj vi, massa Georgio, forigi la librojn, kaj sidiĝi apud mia maljunulo, dum mi pretigi la kolbasojn kaj turni la benjetojn. En palpebruma daŭro, vi tuj havi bonan telerplenon.

- Oni volis ke mi revenu vespermanĝi hejmen, diris Georgio; sed mi konjektis pri tio kio okazis ĉi tie, onklino Kleo.

- Vi konjekti tion… Vera, juvelo. *Kaj ŝi amasigis la benjetojn sur lia telero.* Vi bone scii ke via bona onjo gardi por vi la plej bonan. Ha ! ne bezoni multe diri al vi, ruzulo !

Ŝi akompanis ĉi tiun ŝerceman babiladon per kubutbaton por akrigi la pikparolon, kaj reiris al la krado kun nova vigleco.

Kiam la vora aktiveco de la apetito de Georgio iom kvietiĝis, li ekkriis, svingante larĝan tranĉilegon : "Je la vico de la kuko, nun !"

8 Pli familiara vorto el ilia ĵargono signifanta sinjoro aŭ mastro.

- Dio beni vin ! massa Georgio, diris onklino Kleo haltigante lian brakon, vi ne aŭdaci trancî ĝin per tiu granda trancîlo, por tute dispecigi ĝin, kaj difekti ĝian bonan aspekton ! Jen, preni, malnovan maldikan klingon kiun mi tutintence akrigi. Paroli al mi pri tio ! Ĉu ĝi trancîĝi precize kaj bone ! Ŝvelita pasto, malpeza kiel plumo. Nune delektiĝi, karulo mia, vi ne ofte manĝi pli bonan ol ĝi.

- Tomaso Linkolno tamen diras, daŭrigis Georgio kun la buŝo plena, ke ilia Jinia estas pli bona kuiristino ol vi, onklino Kleo.

- Ĉi tiuj Linkolnoj esti senvaloraĵo, rebatis malestime onklino Kleo. Mi voli diri kompare kun nia mondo. Malaltranguloj, sufiĉe respektindaj laŭ ilia speco; sed pri tio kio esti la bonmanieroj, ili ne havi ideon de tio. Nur meti mastron Linkolnon apud mastro Ŝelbi, Disinjoro bona Dio ! Kaj mastrino Linkolno, ne esti ŝi kiu eniri en salonon kiel mastrino Ŝelbi, kun moŝta sinteno, necesi vidi ! Nu, nu ! Ne paroli al mi pri viaj Linkolnoj ! *Kaj onklino Kleo relevis la kapon, kun la aspekto de homo kiu konas sian mondon.*

- Mi kredis, reparolis Georgio, esti aŭdinta vin diri ke Jinia estis sufiĉe bona kuiristino ?

- Eble ja, por kutima manĝo; ne certa ke ŝi elturniĝi kun tio. Ŝi kapabli fari al vi bonan fornoplenon da pano, taŭge boligi terpomojn; sed, ekzemple, ŝiaj platkukoj ne esti bongustaj ! tute ne bongustaj ! kaj rilate al fajna kukaĵo, ŝi kompreni nenion. Ŝi fari pastecojn, esti vere; sed kia krusto ! Mi defii ŝin fari veran foliigitan paston kiu ŝveli kiel monto en la forno kaj kiu fandiĝi kiel sukero en la buŝo. Mi iri tien por la geedziĝo de fraŭlino Maria; Jinia montri al mi siajn pastecojn kaj geedziĝajn kukojn. Ĉar ni esti amikinoj, mi ne voli diri ion ajn; sed vi povi kredi min, massa Georgio, mi ne fermi la okulon dum semajno se mi esti farinta tian fornoplenon. Ne pli da ŝajno ol nenio, kio !

- Mi supozas ke Jinia kredis ilin bongustegajn ? demandis Georgio.

- Tio ne surprizigi min. Ŝi bone elmontri ilin, kompatinda naivulino ! Kaj, kompreni, ĝuste tio esti ĉar ŝi scii nenion pli. Kie ŝi esti lerninta, en tia domo ? Ne esti ŝia kulpo. Ha ! Massa Georgio, vi ne koni la duonon de la privilegioj de via familio kaj via eduko, suspiris onklino Kleo, ruladante la okulojn.

- Mi certigas vin, onklino Kleo, ke mi elkonas miajn privilegiojn pri pasteĉoj, pri tortoj kaj pri pudingoj. Prefere, demandu al Tomaso Linkolno ĉu mi ne krias venkon ĉiufoje kiam mi renkontas lin.

Onklino Kleo apogis sin malantaŭen sur sia seĝo kaj ravata de la sprito de sia juna mastro, ŝi ridis ĝis kiam larmoj fluis laŭlonge de ŝiaj nigraj kaj brilaj vangoj. De tempo al tempo ŝi sendis al massa Georgio plurajn batojn de pugno aŭ kubuto, ekkriante ke li devis foriri, ke li riposplite krevigis ŝin, ke li tutcerte iam mortigus ŝin. Ĉiu el ĉi tiuj sangavidaj prognozoj akompanataj de pli kaj pli longdaŭraj eksplodoj, Georgio komencis vere maltrankviliĝi pro la konsekvencoj de sia vervo, kaj antaŭdecidis ĉesigi ĉi tiujn ekscesajn spritaĵojn.

- Vi diri tion al Tomaso, ĉu vere ? Pri kio ne aŭdaci ĉi tiuj junuloj ! Ĉu vi krii venkon al la oreloj ? Disinjoro bona Dio, massa Georgio, vi ridigi melolonton !

- Jes, daŭrigis Georgio, mi diris al li : "Tomaso, se vi nur vidus la pasteĉojn de onklino Kleo ! ili estas ja pasteĉoj !"

- Estas kompatindege ke li ne vidi ĝin ! reparolis onklino Kleo, kortuŝata de kompato pro penso pri la mallumo en kiu mergiĝis Tomaso Linkolno. Vi devi inviti lin por vespermanĝi unu el ĉi tiuj tagoj, juvelo mia. Tio esti afabla de vi. Vi scii, massa Georgio, ke necesi nek malestimi la aliajn, nek fieri pri siaj avantaĝoj, ĉar niaj avantaĝoj esti donitaj al ni de supre,

kaj ne esti afero por forgesi, ŝi aldonis kun serioza mieno.

- Mi precize intencas inviti Tomasoⁿ la venontan semajnon; vi faros vian plejbonon, onklino Kleo, por larĝe malfermigi al li la okulojn. Ni plenŝtopos lin tiel bone ke li ne resaniĝos dum dusemajno !

- Jes, jes, ekkriis onklino Kleo ravata, massa vidi ! Disinjoro ! Kiam mi pensi pri kelkaj el niaj vespermanĝoj ! Ĉu vi memori, massa, la grandan kortobirdopastecon kiun mi fari por la tago de la generalo Knokso ? Mi kaj mastrino, ni preskaŭ kvereli pro ĉi tiu pastecо ! Mi ne scii tion kio kelkfoje trapasi tra la menso de la virinoj; sed kiam kompatinda estulino esti diligenta pri sia forno, kiam ŝi respondeci pri ĉio, kiam ŝi ne plu scii per kio komenci, esti ekzakte la momento kiun ili elekti por veni rondiri en la kuirejo kaj enmiksiĝi en tio kio ne koncerni ilin ! Mastrino voli ke mi fari iel, poste tiel. Fine mi ekkoleriĝi, kaj mi diri al ŝi : "Mastrino, iom rigardi viajn belajn blankajn manojn, kaj viajn belajn longajn fingrojn tute brilantajn de ringoj, kiel miaj blankaj lilioj brili de roso ! Kaj apude vidi miajn dikajn nigrajn manojn ! Ĉu ne ŝajni al vi ke la bona Dio krei kaj naskigi min por fari pastecon en krusto, kaj vi, por manĝi ĝin, kaj resti en la salono ?... Ja ! Mi esti kolera, kaj tio instigi min al malrespekto, massa Georgio.

- Kaj kion diris mia patrino ?

- Tio kion ŝi diri ? Ŝi kvazaŭ ridi per siaj okuloj, siaj belaj, grandaj okuloj ! "Nu ! Onklino Kleo, mi kredi ke vi pravi !" Kaj per la sama paŝado, jen ŝi kiu reiri al la ĉambrego. Ŝi esti devanta firme frapi min sur la kapon por lernigi al mi esti malrespekta. Sed kion vi voli, massa Georgio ! Neebli fari ion kun damoj en mia kuirejo.

- Vi ne malpli bone elturniĝis el tiu vespermanĝo. Mi memoras ke ĉiuj diris tion. Ho ! Jes ja !... Ĉu mi ne estis malantaŭ la pordo de la manĝejo tiun tagon, kaj ĉu mi ne vidis

la generalon trifoje pasigi sian teleron por rehavi ĉi tiun saman pastecon ? Ĉu mi ne aŭdis ke li diris : "Certe vi havas kompetentan kuiristinon, sinjorino Ŝelbi !"

- Ho ! Mi esti ĝojplena ! Esti ankaŭ ke la generalo esti sperta, diris onklino Kleo sidiĝante kun kapabla mieno. Tre bela viro ! El unu el la tre unuaj familioj de Virginio ! Li kapabli tute tiel bone kiel mi, la generalo ! Vi vidi, massa Georgio, esti ĉefpunktoj en pastecо, ne ĉiuj scii tion, sed la generalo scii tion. Mi bone vidi tion tra liaj rimarkoj. Li scii kioj esti la ĉefpunktoj, li !

Massa Georgio atingis la kompletan neeblecon, tiel maloftan ĉe siaaĝa knabo, gluti plian glutaĵon. Havante nenion por fari, li ekvidis la amason da krispaj kapoj kaj da avidaj okuloj kiuj, de la kontraŭa angulo, rigardis lin agi.

- Jen ! Por vi, Moseo ! Por vi, Petro ! li rompis kelkajn dikajn pecojn kaj ĵetis ilin al ili. Vi certe volas tion, ĉu ne ? Nu, onklino Kleo, donu al ili iom da platkuko !

Georgio kaj Tomo komforte enlokiĝis ĉe la angulo de la kameno, dum onklino Kleo, post esti eltirinta el la fajro kromaĵo da kukoj, prenis sian filineton sur sia intergenuaĵo kaj komencis alterne plenigi la buŝon de la infano kaj sian, sen forgesi Moseon kaj Petron kiuj preferas manĝi siajn porciojn, sin ruligante sub la tablo, tiklante unu la alian kaj tirante de tempo al tempo la piedojn de la fratineto.

- Ĉu vi voli ĉesi, malbonaj buboj ! diris la patrino, ekĵetanta al ili piedbaton tien kaj tien, kiam la ludo fariĝis tro maloportuna. Ĉu do vi ne povi resti kvietaj dum minuto antaŭ la blanka mastreto ? Ĉu vi ĉesi ? Gardi vin, aŭ mi butoni la kuloton iom pli malsupren kiam massa Georgio esti for.

Kia ajn estis la senco kaŝita en ĉi tiu terura minaco, ĝi tre malmulte efikis sur la junaj deliktintoj.

- Nu ! Tio esti pli forta ol ili, diris onklo Tomo; ili esti

tiel ludemaj, tiel petolemaj, ke ili ne kapabli senmoviĝi.

Tiam la du knaboj eliris de sub la tablo, kun la manoj kaj la vizaĝo tute ŝmiritaj de melaso, ili liveris viglan kisosturmon al la fratineto.

- Bonvoli forkuri ! diris la patrino forpuŝante iliajn lanecajn kapojn, vi fine resti gluitaj ĉiuj kune, kaj ne plu esti rimedo por vin disigi. Rapide kuri al la fontano. Ŝi akompanis ĉi tiun ordonon per manfrapo kiu brue sonis, sed kiu nur estigis novajn ridojn de la etaj koboldoj, dum ili tumulte hastis eksteren, kie ilia ĝojo eksplodis.

"Ĉu ni iam vidi tiel ekscititajn etulojn ?" diris kompleze onklino Kleo; kaj prenanta malnovan viŝtukon, apartigita por la ekstremaj kazoj, ŝi verŝis sur ĝi iom da akvo el fendetita tekruĉo, kaj penadis forigi la melason el la manoj kaj la vizaĝo de la knabineto. Kiam ŝi estis frotpuriginta ŝin ĝis briligi ŝin, ŝi metis ŝin sur la genuojn de onklo Tomo, kaj komencis formeti la teleraron. Paola uzis ĉi tiun intertempon por tiri la nazon de paĉjo, por gratvundeti al li la vizaĝon kaj por enŝovi siajn diketajn manetojn en la plej densa parto de la krispa hararo de Tomo, amuzaĵo per kiu ŝi ŝajnis senti apartan plezuron.

- Ŝi esti vigla ! diris Tomo formovante ŝin laŭ la braklongo por pli bone vidi ŝin.

Li stariĝis, sidigis ŝin sur sian larĝan ŝultron, kaj komencis danci kaj kaprioli kun la infano, ĉirkaŭ la ĉambro, dum massa Georgio klakigis sian naztukon, kaj dum Moseo kaj Petro revenintaj de sia aventuro, kursekvis lin rorante kiel leonoj. Tiel bone ke onklino Kleo deklaris ke "ŝi havis la kapon tute lacegan". Ĉi tiu aserto, ĉiutage renoviĝanta, neniel malpliigis la gajecon kaj la bruegon, kiu nur ĉesis kiam ĉiu roris,kapriolis, saltis ĝis lacegeco.

- Nu ! Mi esperi ke vi ĉiuj esti ĝissate kontentaj, diris onklino Kleo, eltirante krudan kofron kun ruliloj de sub la

lito. Rapide enŝoviĝi enen, Moseo kaj Petro baldaŭ esti la horo de la kunveno[9].

- Ho ! Patrino, ni ne voli iom dormi ! Voli resti por kunveno, tio esti stranga ! Ni tre ŝati kunvenon !

- Nu, onklino Kleo, remetu la maŝinon al ĝia loko kaj lasu ilin staraj, diris decide Georgio, kaj per piedbato li ruligis la kofron kiun onklino Kleo, kontenta savi sian dignon, finis formeti sub la liton.

- Bone pripensite, ŝi diris, tio povi nur bonigi ilin.

La tuta ĉambranaro tuj formiĝis en komitato por pridiskuti pri la fiksendaj aranĝoj cele al la kunveno.

- Kien trovi seĝojn ? Ne esti mi kiu scii tion, diris onklino Kleo. Sed ĉar ekde senfina tempo la kunveno okazi unufoje semajne ĉe onklo Tomo, sen tio ke la nombro da seĝoj pliigi, esti probable ke ankoraŭ ĉi-foje oni trovi provizorajn rimedojn.

- La onklo Paŭlo, li tiel laŭte kanti pasintfoje, ke li esti rompi la du malantaŭajn krurojn de la malnova seĝo, diris Moseo.

- Bonvoli silenti ! Pli ĝuste esti vi kiu derompi ilin, bubaĉo !

- Seĝo, ĝi tamen stari, se rekte loki kontraŭ muro, sugestis Moseo.

- Onklo Paŭlo, li ne sidiĝi sur ĝi, daŭrigis Petro, ĉar ĉiam li danceti tiel forte kantante ! La alian vesperon, li preskaŭ fali laŭ tuta longo tra la kabano.

- Jes, Sinjoro bona Dio ! necesi lasi lin sidiĝi, reparolis Moseo. Li komenci : "Alkuri, sanktuloj kaj pekuloj; aŭskulti, junuloj kaj maljunuloj !" Kaj pum ! Jen li surplanken !

Moseo imitis kun malofta precizeco la nazosonan kanton de la maljunulo, kaj transkapiĝis por ilustri la katastrofon.

9 Religia kunveno okazigita de nigruloj, ĉie kie oni lasas al ili la liberecon kunveni, kaj kiujn ili pasigas en legadoj, preĝoj kaj kantoj.

- Nu ! Ĉu vi fine konduti dece ? diris onklino Kleo. Ĉu vi ne honti ?

Tamen massa Georgio estanta ridinta kun la kulpulo, kaj deklarinta ke Moseo estis "stranga korpo", la patrina admono maltrafis sian celon.

- He, maljunulo ! Rapidi do ! Iri serĉi la bareletojn, ruligi ilin ĝis ĉi tie !

- Bareloj de patrino, ili neniam manki, murmuris Moseo al Petro : tute same kiel oleokruĉo al la vidvino de la bona libro[10], vi scii, kie Massa Georgio legi dum la alia tago.

- Ej ! Sed barelon li pasintsemajne frakasi, rebatis Petro, kaj ili rulfali tute meze de preĝo ! Barelo, ĝi tiufoje manki; ĉu ne ?

Dum ĉi tiu konversacio, du malplenaj bareloj estis ruligitaj en la kabanon kaj alfiksitaj per ŝtonoj. Tabuloj transverse kuŝitaj super ili, kolekto da renversitaj kuvoj kaj siteloj, flankita de kelkaj lamaj seĝoj, kompletigis la preparojn.

- Massa Georgio tiel bone legi ! diris onklino Kleo; se li resti por legi ? Esti tio kio esti interesa !

Massa Georgio ne petis pli bone. Kiu estas la knabo kiu ne ŝategas tion kio gravigas lin ?

La kabano baldaŭ pleniĝis per diverskolora kunigado, de la okdekjara maljunulo ĝis la plej juna knabino kaj la adoleskanto. Okazis sengrava babilado pri diversaj temoj : "Kie do onklino Salio akiri tiun belan, tute novan ruĝan koltukon ? - Kompreneble, mastrino doni al Elnjo ŝian punktitan muslinan robon, kiam Elnjo fini la bareĝan robon de mastrino. - Oni aserti ke mastro Ŝelbi pensi aĉeti novan bejan ĉevalon, kiu ankoraŭ pliigi la pompon de la fama domo".

Malmulte da disĉiploj apartenantaj al najbaraj familioj, kiuj donis al ili permeson veni al la kunveno, ankaŭ alportis

10 La Biblio.

sian kontingenton da novaĵoj, kaj la komentoj pri la diroj kaj faroj de ĉiu cirkulis tie, tute tiel libere kiel la sama monereto ĉe la pli altaj rangoj.

Finfine, por la evidenta kontentigo de ĉiuj, la kantado komenciĝis. La nature belaj voĉoj, la sovaĝaj kaj akcentitaj arioj, produktis frapantan efikon malgraŭ la nazosonaj intonacioj de la gekantistoj. Ili estis jen la paroloj de la himnoj adoptitaj en la ĉirkaŭaj preĝejoj, jen pecetoj de strangaj kaj malklaraj alpreĝoj, kolektitaj en la religiaj kuniĝlokoj[1]. Unu el la rekantaĵoj estis precipe kantata kun multe da energio kaj pia mildeco :

La lukto konduki nin al eternaj gloroj,
Ho mia animo, iri per viajn flugilojn !

Alia preferata kanto diris :

Ho ! Mi iri supren ! Alkuri kun mi.
Aŭskulti ! La anĝelo alvoki nin !
Vidi la oran urbon kaj ĝian eternan volbon !

La plejmulto da himnoj laŭdis "la Jordanajn bordojn", la "Kanaanajn kampojn" kaj la "Novan Jerusalemon", ĉar la arda kaj sensiva imago de la nigrulo ĉiam alkroĉiĝas al pitoreskaj kaj animaj esprimoj. Kantante, iuj ridis, aliaj ploris, aplaŭdis aŭ interŝanĝis ĝojajn manpremojn, kvazaŭ ili jam atingis la alian bordon de la riverego.

Admonoj kaj rakontoj sekvis la kanton aŭ sin miksis al ĝi. Maljuna blankharulino, delonge akceptita sen labordevo, kaj tre respektita kiel la kroniko de la pasinteco, stariĝis kaj apoginte sin sur sia irbastono, diris :

- Infanoj ! Mi esti tre kontenta aŭdi vin ĉiujn, revidi vin ĉiujn ankoraŭfoje, ĉar mi ne scii kiam mi foriri al la glora urbo, sed mi gardi min preta, infanoj, kiel oni diri kun mia pakaĵo sub la brako, mia ĉapo sur la kapo, atendante nur la veturilon kiu veni preni min por rekonduki min al la lando. Ofte dumnokte mi kredi aŭdi la radojn ĝemi, kaj mi ellitiĝi

kaj mi rigardi ! Gardi vin ankaŭ pretaj, vin aliulojn; ĉar mi diri tion al vi ĉiuj, infanoj ! *kaj ŝi frapis la grundon per sia irbastono* : Ĉi tiu gloro de supre esti senegala afero, granda afero, infanoj ! Vi scii nenion pri tio, vi suspekti nenion pri tio… Ĝi esti la mirindaĵo el la mirindaĵoj ! *Kaj la maljunulino sidiĝis, inundita de larmoj, emociplena, dum ĉiuj ĥore ekkantis :*

Ho Kanaano, kara kaj promesita lando !
Ho Kanaano, mi iri al vi !

Massa Georgio, postule de la ĉeestantaro, legis la lastajn ĉapitrojn de la Apokalipso, ofte interrompita de ekkrioj : "Disinjoro, ĉu ebli !" - "Nur aŭskulti !" - "Pensi pri tio !" - "Kompreneble tio esti proksima !"

Georgio, inteligenta knabo, inicita de sia patrino al religiaj kredoj, kaj vidanta sin la celpunkton de la kunveno, riskis de tempo al tempo komentojn el sia maniero, kun seriozeco, graveco, kiu valoris al li admiron de la junuloj. kaj la benojn de la maljunuloj. Oni interkonsente akordiĝis ke pastro ne kapablus pli bone diri, kaj ke li estas mirindega knabo !

Onklo Tomo estis rigardata en la tuta najbareco kiel orakolo pri religiaj aferoj. La morala sento kiu forte superregis en li, pli alta mensa lerteco kaj pli da kulturo ol liaj kunuloj havis, igis lin respektatan inter ili kiel ia pastoro. Kaj la severa kaj korplena stilo de liaj admonoj povintus edifi pli elektitan aŭskultantaron, sed li ĉefe majstris en preĝado. Nenio egalis la kortuŝan simplecon, la naivan ardon de liaj alvokoj al Dio, intermiksitaj de paroloj de la Biblio, tiel profunde enigitaj en lia animo ke ili ŝajnis esti parto de li, kaj flui el liaj lipoj sen lia scio. Laŭ la esprimo de maljuna nigrulo, "li preĝis rekte supren". Liaj paroloj tiom ekscitis la piecon de la aŭskultantoj ke ili fine estis sufokataj de la amaso da improvizaĵoj kiujn ili ĉiuflanke okazigis.

* * * * * * * * * * *

Dum ĉi tiu sceno okazis en la kabano de onklo Tomo, alia, el tre malsama aspekto, okazis en la loĝejo de la mastro.

La sklavkomercisto kaj s^ro Ŝelbi denove estis sidantaj en la manĝĉambro, antaŭ tablo kovrita de paperoj. La unua nombris ligaĵojn da monbiletojn kaj sinsekve antaŭenpuŝis ilin al la komercisto kiu siavice rekalkulis ilin.

- Estas ĝuste, diris la viro; nun subskribu tion por mi.

S^ro Ŝelbi tiris al si la vendokontraktojn, kaj subskribis ilin kvazaŭ homo kiu plenumas malagrablan laboron, poste puŝis ilin al la alia flanko de la tablon kun la mono. Halej tiam elprenis el sia valizo pergamenon, kaj post esti trarigardinta ĝin, transdonis ĝin al s^ro Ŝelbi, kiu ekkaptis ĝin kun duone bremsata vigleco.

- Nu, jen kiu estas farita kaj finita, diris la fi-negocisto, stariĝante.

- Jes, farita kaj finita, rediris s^ro Ŝelbi laŭ pensema tono. Li pene spiris, kaj ripetis : finita…

- Vi ne ŝajnas ĉarmita, diris la komercisto.

- Halej, vi rememoros, mi esperas, ke vi promesis al mi, je via honoro, ne vendi Tomo^n sen scii en kiajn manojn li falos.

- Vi ja ĵus vendis lin, ĉu ne ?

- La cirkonstancoj, vi tro bone scias tion, trudis min, diris digne s^ro Ŝelbi.

- Kaj ili ankaŭ povas trudi min, rebatis la komercisto. Ne gravas, mi faros kiel eble plejbone por trovi bonan lokon por Tomo. Pri malbone trakti lin, vi tute ne bezonas timi tion, dank'al Dio, pro inklino, mi ne estas kruela.

La prezentado kiun li jam faris pri siaj humanecaj principoj, ne estis el la plej trankviligaj, sed ĉar la kazo ne

vere enhavis alian konsolon, s^{ro} Ŝelbi silente lasis la komerciston foriri kaj komencis solece fumi sian cigaron.

05. Sento de Vivanta Posedaĵo kiam ĝi sanĝas la Mastron.

Sinjoro kaj sinjorino Ŝelbi estis enirintaj en sian ĉambron; la edzo, etendinta en sian larĝan apogseĝon, tralegis la leterojn alvenitajn per la vespera poŝto. Staranta antaŭ la spegulo, lia edzino malplektis la harligojn kaj la buklojn, verkon de Eliza, ĉar kortuŝita de la konfuzita mieno kaj de la paleco de la juna virino, ŝi estis liberiginta ŝin de sia servo kaj sendinta enlitiĝi. Aranĝante siajn harojn, ŝi tute nature memoris pri sia matena interparolo, kaj sin turnante al sia edzo :

- Nu, Arturo, ŝi senzorge diris al li, kio estas tiu abomeninda ulo kiun vi alkondukis al ni por vespermanĝi ?

- Li nomiĝas Halej, rebatis Ŝelbi, tordiĝante sur sia sidilo, kaj sen okule forlasi sian leteron.

- Halej ? kiu tiu estas ? Kion li devas fari ĉi tie, mi petegas ?

- Sed… mi havis kelkajn interesojn por pridiskuti kun li dum mia lasta rondvizitado en Naĉezo.

- Kaj li utiligas tion por aranĝi sin komforte, veni vespermanĝi kaj enlokiĝi ĉi tie kvazaŭ siahejme ?

- Pardonu; li estis invitita; mi havas konton kun la viro.

- Ĉu li estus sklavkomercisto ? demandis s^{ino} Ŝelbi rimarkanta en la manieroj de sia edzo nuancon de embaraso.

- Ba ! Kiu enmetas tian ideon en vian kapon, karulino mia ? kaj ĉifoje Ŝelbi levis la okulojn.

- Nenio. Nur ĉi tiun postmanĝon Eliza larmoplena alvenis al mi, kriante, ĝemadante. Ĉu ŝi ne asertis ke vi traktis negocon, kaj ke ŝi aŭdis sklavfikomerciston fari al vi proponojn pri sia Henriko ? Kia sensencaĵo !

- Vere !… Ŝi aŭdis lin ? reparolis s^ro Ŝelbi, ankoraŭ absorbita pri siaj leteroj, kvankam li tenis ilin senorde. Ĉar necesos trakti tion, li diris al si mem, pli bone valoras tuj sin liberigi pri tio.

- Mi diris al Eliza pro ŝia peno, daŭrigis s^ino Ŝelbi, ankoraŭ brosanta siajn harojn, ke ŝi estis nur eta stultulino, kaj ke vi havis nenion por pridiskuti kun tiaj homoj. Certe, mi ja sufiĉe scias ke neniam en la vivo vi sonĝus vendi unu el niaj, kaj ĉefe al tia specio !

- Bonege, Emilia, mi parolis, mi pensis kiel vi. Sed la fakto estas ke miaj embarasoj tiom multe kreskis ke ne plu eblas malantaŭenirai. Necesas al mi vendi kelkajn el miaj manoj.

- Al tiu viro ! Neeblas. Vi ne serioze parolas, sinjoro Ŝelbi.

- Bedaŭre mi devas diri ke tiel estas, estas konsentita afero pri Tomo.

- Kio ! Nia Tomo ! Ĉi tiu bona kaj fidela kreitulo ! Via fervora servanto ekde via frua infanaĝo ! Ho ! Sinjoro Ŝelbi ! Sed vi promesis al li lian liberecon ? Sed vi kaj mi centfoje parolis al li pri tio ! Ha ! Mi povu ĉion kredi post tio ! Mi povas nun kredi vin kapabla vendi eĉ la etan Henriko^n, la solan infanon de tiu kompatinda Eliza ! ekkriis S^ino Ŝelbi laŭ dolora kaj indigna tono.

- Nu, se necesas diri tion al vi, ĝi estas farita afero. Mi konsentis vendi ambaŭ, Tomo^n kaj Henriko^n. Sed mi ne tro scias kial oni nomus min monstron pro esti unufoje farinta tion kion ĉiuj faras ĉiutage de sia vivo !

- Kaj ĉi tiuj plie ! denove ribelis S^ino Ŝelbi, kial elekti ilin inter ĉiuj ?

- Ĉar oni plie ofertis al mi, jen kial. Dependas nur de vi ke mi elektu alian, ĉar la sentaŭgulo pliproponis pri Eliza.

- La malŝatindulo ! ekkriis S^ino Ŝelbi incitite.

- Mi rifuzis aŭskulti lin, nur pro konsidero al vi, Emilia, kaj almenaŭ vi povus konsideri tion.

- Karulo mia, diris S^ino Ŝelbi, enpensiĝante, pardonu min. Mi troigas. Sed mi estis tiel malmute preparita, mi tiel malmute konjektis tion ! Lasu min, mi petegas, propeti pro ĉi tiuj kompatindaj estuloj. Se li estas nigra, Tomo tamen ne estas malpli lojala, malpli fidela; li estas nobla koro. Mi kredas, sinjoro Ŝelbi, ke se necesus al li doni sian vivon por vi, li ne hezitus.

- Mi scias tion… mi certas pri tio. Sed kial ĉio ĉi ? Mi estas senpova, mi diras al vi.

- Kial ni ne faras kelkajn monajn oferojn ? Mi bonkore eltenos mian parton de embaraso. Ho sinjoro Ŝelbi, estas per mia tuta animo ke mi strebis plenumi miajn kristanajn devojn rilate al ĉi tiuj kompatinduloj tiel simplaj, tiel dependaj. Mi antaŭ longaj jaroj interesiĝas pri ili, instruas ilin, prizorgas ilin, dividas kun ili kaj iliajn etajn afliktiĝojn kaj iliajn naivajn ĝojojn. Kiel de nun maltimi aperi meze de ili, se pro ŝato de senvalora profito, ni estus vendonta fidindan kaj sindoneman serviston, senigante per unu fojo de ĉi tiu kompatinda Tomo ĉion kion ni instruis al li por estimi, por ami ? Mi, kiu instruis al ili la familiajn devojn, de la patro rilate al la infano, de la edzo rilate al la edzino, kiel mi elportus la publikan agnoskon, ke nek rajtoj, nek ligoj, nek rilatoj, nenio estas sankta por ni ekde temas pri mono ? Mi, kiu tiom babilis kun Eliza pri ŝia infano, pri ŝiaj devoj, kiel kristana patrino, al konstanta atento, al teneraj preĝoj, al pia edukado ! Kion mi povos nun diri al ŝi, se vi forŝiras lin de ŝi por transdoni lin, senrestrikte, al iu homo sen principoj, iu senkredulo; kaj tio por kelkaj dolaroj ! Mi ripetis al ŝi ke animo pli valoras ol ĉiuj trezoroj de la universo, kiel ŝi kredos min, kiam ŝi vidos nin tiel deflankiĝi, kaj vendi ŝian infanon ? Vendi ŝin ! Kiu scias ? Por la eble certa ruino de

animo kaj korpo !

- Mi bedaŭras ke vi tiel forte prenas tion sur vian koron, Emilia; ĉagrenita, vere. Sen samopinii ilin laŭ ilia tuta amplekso, mi respektas viajn pensmanierojn; sed estas vana peno, mi ĵuras tion al vi, mi nenion povas. Necesas ellasi la vorton kiun mi volintus evitigi al vi, Emilia, mi ne povas elekti. Necesas al mi vendi tiujn aŭ ĉion perdi, ilin aŭ ĉiujn. Halej ekkaptis hipotekon kiu, se mi ne nuligas ĝin senprokraste, kunprenos ĉion kun ĝi. Mi ĉiuflanke kolektis, serĉis, kromenspezis, pruntepreneis; krom almozpeti, mi ĉion faris. La prezo de tiuj du sole kapablis starigi bilancon; necesis decidiĝi. Halej, troentuziasmigita de la infano, estis rezoluta tiel aranĝi tion kaj nur tiel. Mi estis sub lia povo, necesis al mi submetiĝi. Tiom kortuŝita pro ĉi tiuj du, ĉu vi pli ŝatus vidi ĉiujn esti venditajn ?

S^ino Ŝelbi restis konsternegita. Reirante fine sidiĝi en sia tualetejon, ŝi kaŝis al si la vizaĝon en siajn manojn kaj eligis ĝemon.

- Estas la malbeno de Dio al sklaveco ! Amara, amara fatalaĵo ! Malbeno al la mastro ! Malbeno al la sklavo ! Mi estis freneza aserti akiri kelkan bonon el ĉi tiu fonto de malbono ! Estas peko gardi sklavon sub leĝoj tiaj kiaj la niaj; mi ĉiam sentis tion; mi pensis tion tute junan knabinon, mi certe ja pensas tion ankoraŭ pli ekde kiam mi faris elekton de eklezio. Sed mi esperis mildigi la ĉenon, mi volis, per multe da boneco, da zorgoj, da edukado, estigi la kondiĉon de la miaj preferindan al libereco. Frenezulino kiun mi estis !

- He sed, edzino mia, vi tute aliĝas al la aboliciistoj !

- La aboliciistoj ! Ha ! Se ili scius ĉion kion mi scias, tiam ili parolus ! Ni havas nenion por lerni de ili. Vi scias ĉu iam mi aprobis la sklavecon, ĉu iam, miavole, mi posedis sklavon !

- Mirinde ! Akordiĝu iom kun niaj saĝaj kaj piaj

pastoroj, diris s^ro Ŝelbi. Ĉu vi memoras pri la prediko de la pasinta dimanĉo?

- Mi malmulte zorgas pri tiaj predikoj. S^ro B... pli bone farus prediki aliloken ol en nia preĝejo. La pastoroj eble ne pli ol ni, kapablas malhelpi malbonon aŭ resanigi ĝin; sed pravigi ĝin ! Ho, tio estas insulti la komunan saĝon ! Mi cetere scias ke funde vi ne ŝatas pli ol mi ĉi tiun predikon.

- Se necesas konfesi tion, sinjoroj niaj pastoroj kelkfoje antaŭmetas tion kion ni ja, kompatindaj pekuloj, apenaŭ kuraĝus aserti. Necesas por mondumano ignori multajn aferojn kaj kutimiĝi al tio kion li ne povas aprobi. Sed kiam la virinoj kaj la pastoroj superas nin, kaj tiel firme decidas pri aferoj de moraleco kaj de modesteco, tio fakte malmulte taŭgas al mi. Nun, almenaŭ, kara mia, mi supozas tion, vi cedas antaŭ la neceso kaj konsentas ke pro la cirkonstancoj, mi kiel eble plej bone agis.

- Jes, ho jes ! rapide diris S^ino Ŝelbi, enpense, fingrumante sian poŝhorloĝon. Mi ne havas multekostajn juvelaĵojn, ŝi aldonis pripensante; sed ĉi tiu ora horloĝo valoras ion; ĝi multege kostis; se mi povus nur savi la infanon de Eliza ! Mi oferus ĉion kion mi posedas por ĝi.

- Mi vere estas afliktita, senespera, diris s^ro Ŝelbi, ke vi tiom malĝojas pro tio; sed estas tute vane; la vendokontraktoj estas subskribitaj kaj inter la manoj de Halej. Necesas al vi esti feliĉa ke ĝi ne estas pli malbona. Ĉi tiu viro tenis nin sub sia povo. Dependis nur de li tute ruinigi nin, kaj jen ni kvitaj. Se vi konus lin kiel mi, vi pensus ke ni elturniĝis !

- Ĉu do li estas tiel malmolkora ?

- Ne ĝuste kruela, sed li estas viro el ledo[11]; esence komercisto, kiu konas nur profiton; senpasia , decida, senindulga kiel morto kaj tombo. Li vendus sian propran

11 Ĉi tiu esprimo devenas de la originalo (el angla) kaj estas laŭvorte tradukita.

patrinon por dudek-procenta profito, kaj tio sen voli suferigi la kompatindan maljunulinon.

- Kaj estas ĉi tiu aĉulo kiu estas la mastro de ĉi tiu bona kaj fidela Tomo ! la mastro de la infano de Eliza !

- Ni ne iru plu, kara mia. La afero estas malfacila al mi; mi malŝatas reveni al ĝi. Halej, kiu vigle regas la aferojn, ekposedos ekde morgaŭ; tial mia ĉevalo estos preta, kaj mi foriros ĉe la tagiĝo. Mi ne kapablas vidi Tomo^{n}, ne, mi ne kapablas. Pri vi, tio kio estos la plej bona, estos jungigi frumatene, kaj elkonduki Eliza^{n} ien ajn. Pli bone estos ke ĉio okazu nevideble.

- Ne, ne, diris S^{ino} Ŝelbi, mi estos nek agantino nek komplicino de la faro. Kompatinda Tomo, Dio helpu lin ! Mi iros vidi lin en lia senhelpeco, kaj kiom ajn ĝi kostos al mi, ili scios ke ilia mastrino suferas por ili kaj kun ili. Rilate al Eliza ! Mi ne kuraĝas pensi pri tio. Disinjoro pardonu nin ! Kion ni faris por trafi tion !

Tamen, sen ke sinjoro kaj sinjorino Ŝelbi povis suspekti tion, triulo aŭskultis ilin. La kabineto kiu komunikiĝis kun ilia dormoĉambro, rigardis al koridoro. Eliza, turmentata pro maltrankviloj, forpelita por la nokto de sia mastrino, ekhavis la subitan ideon enŝoviĝi en ĉi tiun kameron; kaj kun la orelo gluata al la fendo en la pordo, ŝi ne perdis unu vorton de la interparolo.

Kiam la voĉoj mortis en la silento, ŝi restariĝis kaj elŝteliĝis. Pala, tremetanta, kun la trajtoj kuntiritaj, la lipoj streĉitaj, ŝi ne plu estis la milda, timema estulino kiun ŝi estis ĝis nun. Singardeme ŝi paŝis la trairejon, haltis dum sekundo ĉe la pordo de sia mastrino, levante la manojn al la ĉielo, mutan alpreĝon ! Poste sin deturnante, ŝi enŝoviĝis en sian ĉambron. Ĝi estis malgranda, kvieta kaj pura ĉambro sur la sama etaĝo kiel la apartamento de la mastroj. Kiom da fojoj ŝi sidiĝis antaŭ tiu fenestreto en la suno ! Estis tie kie

ŝi kantis kudrante. Sur ŝiaj mallarĝaj bretoj provizitaj de kelkaj libroj, etendiĝas karaj bagateloj, donoj de naskiĝtagoj kaj festoj; en la ŝranko, en la tirkestoj, lokiĝis ŝia modesta tualeto. Unuvorte, ĝi estis sia propra hejmo, kie dumlonge ŝi estis feliĉa. Sed tie, sur ĉi tiu lito, dormis ŝia filo; longaj silkaj bukloj kadris la naivan vizaĝon, lia rozeta buŝo restis malfermetita, liaj diketaj manetoj senzorge kuŝis sur la litkovrilo, kaj sublima rideto lumigis ĉiujn ŝiajn trajtojn.

- Kompatinda knabo ! Kompatinda karulo ! Ili vendis vin ! Sed via patrino savos vin !

Neniu larmo malsekigis la kapkusenon, en tiaj momentoj estas gutoj da sango kiujn la koro silente ŝvitas; ŝi ekprenis paperfolion, krajonon kaj tuthaste skribis :

"Ho mastrino ! Kara mastrino ! Ne kredu min nedankema, ne malbone pensu pri mi, tute ne, mastrino. Mi aŭdis tion kion la mastro kaj vi ĉi-vespere diris, kaj mi tuj provos savi mian knabon. Vi ja ne mallaŭdos min. Dio benu vin kaj rekompencu vin pro ĉiuj viaj bonaĵoj !"

Ŝi faldis kaj haste adresis la leteron, kuris al tirkesto, volvis por sia filo malgrandan pakon da vestaĉoj, kiun ŝi firme ligis ĉirkaŭ si; kaj patrina bonkoreco estas tiel tenera ke, eĉ en la teruro de la momento, ŝi ne forgesis kunpreni kelkajn el la plej preferataj ludiloj de la infano, rezervante papagon pentritan el brilaj koloroj, por amuzi lin ĉe la vekiĝo. Ne estis sen malfacilaĵo ke ŝi ŝiris la etan dormanton el lia profunda dormo; sed post kelkaj penoj ŝi lin sidrektigis sur lia postaĵo, kaj dum la patrino surmetis ĉapelon kaj ŝalon, la infano ludis kun sia birdo.

- Kien do panjo iri ? li demandis kiam ŝi alproksimiĝis la liton, tenante la jaketon kaj la malgrandan mantelon.

Lia patrino rigardis lin tiel proksime, inter la okuloj kaj kun tia esprimo, ke li divenis ke io stranga okazis.

- Ĉit ! Henriko, ŝi diris; necesi ne paroli laŭte, necesi ke

ili ne aŭdi. Malbona viro veni por preni etan Henriko^{n} de lia patrino kaj kunporti lin foren, tre foren. Sed panjo ne voli; ŝi surmeti al la knabeton lian jaketon kaj lian mantelon, kaj ŝi fuĝi kun li, kaj la malbona viro ne kapti lin.

Parolante, ŝi estis surmetinta al la infano kaj agrafinta lian simplan vestaĵon; prenante lin en siajn brakojn, ŝi flustris en lian orelon la ordono esti "tre kvieta"; kaj malfermante la pordon kiu, de ŝia dormĉambro, kondukis sub la verandon, ŝi elŝoviĝis eksteren.

Estis dum stelita nokto, malvarma kaj brilega; la patrino ĉirkaŭvolvis sian ŝalon ĉirkaŭ la infanon kiu, muta pro teruro, premis sin al ŝia kolo.

La maljuna Bruno, granda Novlandhundo, kiu dormis sub la porĉo, stariĝis kun obtuza grumblado ĉe ŝia alproksimiĝo. Ŝi milde murmuris la nomon de la besto, kaj ĉi tiu favorato, malnova kamarado de ŝiaj ludoj, tuj svingis la voston kaj pretiĝis por sekvi ŝin, ne sen ŝajni mirigita en sia simpla cerbo de hundo, pro la nokta promenado. Kelkaj malklaraj duboj pri nesingardo, pri manko de konveneco, eĉ trairis ĝian honestan penson, kaj dum Eliza rapidigis ŝtelajn paŝadojn, ĝi haltis, rigardis kun zorgoplena mieno jen la fuĝantinon, jen la loĝejon; poste, kvazaŭ trankviligata de siaj pripensoj, ĝi denove trotis post ŝi. Post kelkaj minutoj ili alvenis al la fenestro de la kabano de onklo Tomo, kaj Eliza milde frapis sur la vitron.

La pia kunveno pludaŭris danke al la kantoj, kaj onklo Tomo krome sin donis plurajn soloojn, do nek li nek lia kunulino jam dormis, kvankam estis pli proksime de unu horo ol de noktomezo.

- Sinjoro bona Dio ! Kio ĝi esti tio ? diris onklino Kleo, hasteme stariĝante, kaj kurante distiri la kurtenojn. Por nia savo, esti Elnjo ! Nu, maljunulo, rapide surmeti la veston. Nu ! kaj jen ankaŭ Bruno, kompatinda besto ! Kio do ĝi esti !

Mi tuj malfermi.

La ago akompanis la parolojn, la pordo malfermiĝis, kaj la lumo de la kandelo kiun Tomo ĵus lumigis, plentrafis la anksian vizaĝon kaj panikitaj okuloj de la fuĝantino.

- La bona Dio beni nin ! Mi senti min tute emociita, nur vidante vin, Elnjo ! Ĉu malsano trafi vin ? Kio esti tio ?

- Mi esti fuĝanta, onklo Tomo, onklino Kleo, mi kunpreni mian infanon, la mastro vendi lin.

- Vendi ! Ili ambaŭ ripetis, levante la manojn pro timego.

- Jes, vendi ! Mi ĉi-vespere kaŭriĝi en la kabineto kontraŭ la pordo; mi aŭdi mastron diri al mastrino ke li esti vendinta Henriko^{n}, kaj vin, onklon Tomo^{n}, ambaŭ al sklavkomercisto; ke li, mastro, rajdi ekde la mateno, kaj ke la viro hodiaŭ ekposedi ilin.

Tomo, kun la manoj levitaj, la okuloj dilatitaj, restis senmova kiel en sonĝo. Malrapide, iom post iom, li komprenis, kolapsis sur sian malnovan seĝon kaj kaŝis sian kapon inter la genuoj.

- Sinjoro bona Dio, kompati nin ! diris onklino Kleo, ne ebli, ne esti vere ! Kion li fari, Tomo, por ke la mastro vendi lin ?

- Nenion en la mondo. Tio ne esti propravole de la mastro; kaj de la mastrino, ĉiam tiel bona ! Mi aŭdi ŝin pledi kaj petegi por ni; sed li diri al ŝi ke tio utili al nenio; ke li sidi en ŝuldoj, kaj ke la viro teni lin sub sia povo; ke se li ne pagi al li ĉion, necesi aŭkcii kaj la loĝejon, kaj nin ĉiujn, tiom kiom ni esti. Jes, mi bone aŭdi, li diri : "Vendi ĉi tiujn du aŭ vendi ĉion !" Mastro diri ke li esti malĝoja; sed mastrino ! Ha ! Necesi aŭdi ŝin ! Se ŝi ne esti kristanino kaj anĝelo, neniam iu ajn ekzisti nek en la ĉielo nek sur la tero. Mi esti malafabla knabino por forlasi ŝin, sed mi ne scii kion fari pri tio ! Ĉu ŝi ne diri, ke animo esti pli ol mondo ? La infano havi

ĝin; se mi ne savi lin, kiu scii tion kion ĉi tiu animo fariĝi ? Tio kion mi fari devi esti justa, kaj se tio ne esti bona, ke Disinjoro pardoni min, ĉar mi ne kapabli fari alie !

- He, maljunulo ! diris onklino Kleo, kial ne fuĝi ankaŭ ? Ĉu vi voli atendi, esti irigita al la Malsupra Rivero, tien kie kompatinda nigrulo krevi de laboro kaj malsato ? Mi preferi morti ol iri tien. Rapide, forkuri kun Elnjo ! Vi havi la tutan tempon, vi havi vian permesilon[12] por iri kaj reiri; eliri do, Tomo. Mi tuj fari la pakaĵon.

Malrapide Tomo relevis la kapon kaj ĵetis ĉirkaŭ si longan rigardon, malgajan kaj rezignitan.

- Ne, ne, li diris, mi resti. Eliza foriri, ŝi bone pravi, ne esti mi kiu diri ne, iu patrino devi foriri. Sed vi aŭdi, edzino, necesi vendi Tomo^{n}, se ne ĉio esti ruinanta kaj disrabanta. Oni vendi min ! Mi eble kapabli suferi tiom kiom alia ! li aldonis, kaj spasma sopirĝemo skuis lian larĝan bruston. Ĉiufoje kiam mastro alvoki Tomo^{n}, Tomo ĉeesti. Li ankoraŭ ĉeesti. La permesilo aparteni al mastro; mi neniam trompi mastron, mi ne trompi lin hodiaŭ. Pli bone valori vendi min sole ol perdi kaj vendi ĉion. La mastro ne esti por mallaŭdi, Kleo ! Li zorgi pri vi kaj la senhavuloj…

Li turnis sin al la rulkofro kie krispiĝis tiom da buklaj kapetoj, kaj la koro mankis al li. Apogante sin sur la dorson de sia seĝo, li kovris sian vizaĝon per siaj larĝaj manoj; profundaj kaj maloftaj plorĝemoj skuis lian tutan korpon, kaj larmegoj, fluantaj inter liaj fingroj, inundis la plankon. Larmoj, blanka leganto, similaj al tiuj kiujn vi verŝis sur la ĉerkon de via unuenaskito; larmoj, sinjorino, similaj al tiuj kiuj bruligis viajn okulojn kiam la stertoro de via mortanta infano enigis vian orelon ! Ĉar Tomo estis homo kiel vi, leganto, kaj vi, sinjorino, kun viaj silkaj vestoj, viaj juveloj, viaj ornamaĵoj, vi estas nur virino, kaj en la gravaj kaj

12 Permeso subskribita de lia mastro por iri je kelka distanco de la hejmo.

teruraj elprovoj de la vivo, ĉiuj vi travivas la saman angoron.

- Plian vorton, diris Eliza haltante ĉe la sojlo. Mi ĉi-posttagmeze vidi mian edzon; mi tiam apenaŭ suspekti tion kio esti okazonta ! Sed li, ili peli lin ĝis ekstremo, kaj li veni diri al mi ke li forkuri. Provi, se vi povi, sciigi al li, ke mi foriri, kaj kial. Diri al li ke mi provi atingi Kanado[n]. Fari al li miajn korinklinojn, kaj bone rekomendi al li, se mi ne plu devi revidi lin, *ŝi momente deturniĝis, poste aldonis per sufokita voĉo*, rekomendi al li esti tiel bona kiel li povi esti, por ke fine ni revidi unu la alian tien supren. Voki Bruno[n], *ŝi aldonis*, reenfermi ĝin, kompatinda besto ! Necesi ke ĝi ne sekvi min.

Ankoraŭ kelkajn vortojn, kelkajn larmojn, simplan adiaŭon, benon kaj brakumante sian timigitan infanon sur la sia brusto, ŝi malaperis en la ombron.

06. La Malkovro.

La longdaŭra diskutado de la antaŭa nokto deteninta sinjoron kaj sinjorinon Ŝelbi^{ojn} longtempe maldormantaj, ili ellitiĝis la morgaŭon, iom pli malfrue ol kutime.

- Kio fariĝas Eliza ? diris S^{ino} Ŝelbi, post esti vane sonoranta plurfoje.

Neblankulo samtempe eniris, alportanta varman akvon al s^{ro} Ŝelbi kiu estis razanta sin.

- Andio, daŭrigis lia mastrino, iru frapi sur la pordon de Eliza, kaj diru al ŝi ke mi trifoje sonoris al ŝi. "Kompatinda knabino !" ŝi flustris kun suspiro.

Andio preskaŭ tuj reaperis, kun okuloj eksese malfermitaj.

- Disinjoro ! Mastrino ! La tirkestoj de Elnjo, ĉiuj malfermitaj, kaj ĉiuj ŝiaj vestaĉoj malordigitaj ! Ŝajni al mi ke ŝi foriri.

La vero evidentiĝis al la okuloj de edzo kaj edzino, kaj s^{ro} Ŝelbi ekkriis :

- Ŝi flaris la aferon; kaj ŝi jam estas for.

- Laŭdu Disinjoron pri tio ! ekkriis lia edzino, mi esperas ke jes.

- Ĉu vi freneziĝas, sinjorino ? diris Ŝelbi. Estus malbela afero ! Halej, kiu vidis min heziti pri la infano, kredus min komplicon en la fuĝo. Tio koncernas la honoron ! Kaj li haste eliris.

Okazis tumulto; iroj kaj reiroj; la pordoj malfermiĝis, fermiĝis kaj dum plenega kvaronhoro aperis vizaĝoj el ĉiuj specoj en ĉiuj anguloj. La sola persono kiu povintus klarigi la aferon, la ĉefkuiristino, onklino Kleo, restis muta. Dika nubo mallumigis ŝian antaŭe tiel gajan vizaĝon, kaj ŝi silente

daŭrigis knedi la kukojn de la matenmanĝo, kvazaŭ ŝi nek vidis nek aŭdis ion el la tumulto kiu zumis ĉirkaŭ ŝi.

Baldaŭ ĉirkaŭ dekduo da etaj bubaĉoj sin apogis, kiel tiom da korvoj, sur la apogrelo de la verando, ĉiu aspiranta la honoron esti la unua por sciigi al la fremdulo sian malbonŝancon.

- Li freneziĝi, mi veti ! diris Andio

- Li sakri, ĉu ne ? demandis Diego, la eta brunhaŭtulo.

- Ho jes, li sakri ! diris eta Mandia kun krispa kapo, mi bone aŭdi lin, dum vespermanĝi hieraŭ. Mi ĉion scii, ĉar mi enŝovi min en la provizejo inter la grandaj kruĉoj de mastrino, kaj ne mi perdi vorton !

Kaj Mandia kiu, en siaj tagoj, ne divenis pli ol nigra kato farintus tion, la signifon de la frazo dirita antaŭ ŝi, afektis gravajn mienojn, kaj pavis, forgesante aldoni ke, se ŝi estis kaŭriĝinta inter la terkruĉoj, ŝi tutkore ronkadis tie.

Kiam Halej fine aperis, kun botoj kaj spronoj, li estis ĉiuflanke salutata de la malbona novaĵo. La elfoj de la verando ne estis seniluziigitaj pri la espero aŭdi lin "sakri kaj blasfemi". Tio kion li kutime faris kun vigleco kiu plezurigis ilin dum ili sin ĵetis, dekstren kaj maldekstren, por eviti la trafon de lia rajdovipo. Tiam, amase, eligante grandegan huon, ili falruliĝis sur la velkintan gazonon, kie ili sin fordonis, kun neforigeblaj rideksplodoj al la plej senordaj transkapiĝoj.

- Se mi tenis la etajn demonojn ! flustris Halej inter siaj dentoj.

- Ha ! Ha ! Vi ne teni ilin tiel frue ! diris Andio, kun triumfa kapriolo, kaj tuj kiam la malfeliĉa komercisto turnis la dorson, la petola simio komencis senbridan sinsekvon da nepriskribeblaj grimacoj.

- Mi devas diri al vi, Ŝelbi, ke okazas ĉi tie tre strangaj aferoj, diris Halej abrupte enirante en la salonon. Kio ! La

knabino estas, oni diras, foren kaj ŝia bubo kun ŝi ?

- Sinjoro Halej, sinjorino Ŝelbi ĉeestas, diris s^ro Ŝelbi.

- Pardonu, sinjorino, kaj Halej iomete kapsalutis, kun la frunto pli kaj pli malserena. Mi tamen ripetas ke la novaĵo estas el la pli strangaj, ĉu ĝi estas vera, sinjoro ?

- Sinjoro, rebatis s^ro Ŝelbi, se vi havas por paroli kun mi, mi rajtas postuli de vi la respekton kiu regas inter altedevenaj uloj. Andio ! Liberigu sinjoron de lia ĉapelo kaj de lia rajdovipo. Prenu seĝon, sinjoro. Jes, sinjoro, mi bedaŭras devi diri al vi ke la juna virino, incitegita de tio kion ŝi eksciis aŭ divenis pri nia afero, ekprenis la infanon kaj ekfuĝis dum ĉi tiu nokto mem.

- Mi atendis ke oni lojale traktus min, mi konfesas tion, grumblis Halej.

- Kion tio signifas, sinjoro ? ekkriis Ŝelbi vigle turnante sin. Kion vi volas aŭdigi ? Se iu ajn permesas al si pridiskuti pri mia honoro, mi havas nur unu respondon.

La finegocisto iomete blankiĝis pro ĉi tiu rebato, kaj reparolis per pli mallaŭta tono : "Estas tamen tre malfacile, por brava ulo kiu faris lojalan negocon, esti tiel trompita !

- Se mi ne partoprenus en via seniluziiĝo, sinjoro Halej, reparolis Ŝelbi, mi ne tolerintus vian senĝenan manieron eniri ĉe mi ĉi-matene; sed kiaj ajn estas la ŝajnoj, mi persistas ripeti ke mi ne eltenus la plej etan aludon al mallojala interkonsento kies mi ne kapablas. Mi cetere konsideras min kiel devigita disponigi al vi ĉian helpon. Ĉevaloj, servistoj, ĉio kio povas helpi vin por reakiri vian proprietaĵon, estas sub viaj ordonoj. Mallonge, *li daŭrigis subite refalante de sia tono de severa digno al sia kutima kaj senetiketa afableco*, tio kio estas la plej bona por vi, Halej, kredu min, estas refariĝi konsentema, pace matenmanĝi, kaj ni poste konsiliĝos.

Sinjorino Ŝelbi leviĝis, ŝiaj okupoj, ŝi diris, ne ebligus

ŝin fari ĉi-matene la honorojn de ŝia tablo, kaj forlasante la ĉambron, ŝi komisiis al digna mulata matrono zorgi pri la servado de la kafo.

- La brava sinjorino ne ŝategas vian humilan servanton, diris Halej kun mallerta strebo por aranĝi sin komforte.

- Mi ne kutimas aŭdi paroli pri mia edzino laŭ tia tono, seke rebatis s^ro^ Ŝelbi.

- Pardonu ! Bedaŭron ! Spritaĵo, vi komprenas ! diris Halej kun afekta rido.

- Estas ŝercoj pli agrablaj unuj ol aliaj, respondis Ŝelbi.

"Malbeno ! Li nekredeble kuraĝiĝis ekde kiam mi subskribis la kvitancojn. La diablo forrabu lin !" murmuris Halej al si mem. "Li afektas gravecon, nune !"

Neniam, en iu ajn kortego, falo de ĉefministro kaŭzis pli da malserenajn sentojn ol la novaĵo pri la sorto de Tomo vekis ilin inter liaj kamaradoj. Ĉi tiu temo senĉese revenis, ĉie, en ĉiuj buŝoj, kaj nenio estis farita en la domo aŭ sur la kampoj, ol diskuti pri la probablaj rezultoj de ĉi tiu evento. La fuĝo de Eliza *(neniam okazinta en la loĝejo)* ankoraŭ plivigligis la ĝeneralan ekscitiĝon.

Samĉjo la Nigro, tiel nomata ĉar li estis ĉirkaŭ tri nuancoj pli nigra ol la aliaj ebonaj filoj de la loko, Samĉjo turnis kaj returnis la temon laŭ ĉiuj ĝiaj flankoj, kun fajneco de percepto kaj ĝusteco de antaŭvido, pri la konsekvencoj rilate al sia propra kvieteco, kiuj farintus honoron al la plej ruza blanka patrioto en Vaŝingtono.

- Esti malbona vento, tiu kiu blovi nenie, vere ! *diris Samĉjo laŭ sentencoplena tono, kaj li relevis sian kuloton per lumbtordo, lerte alĝustigante longan najlon anstataŭ mankanta ŝelk-butono, artifiko el mekanika genio kiun li poste kontemplis kun evidenta kontentiĝo.* Jes, esti malbona la vento kiu blovi nenie ! li ripetis. Jen Tomo malsupren ! Loko supren por iu alia nigro. Kial ne Samĉjo la alia nigro ?

Tomo iri tien, Tomo iri tien ĉi, ĉiam la permesilo en la poŝo kaj la ciritaj botoj, li, Tomo, iu preskaŭ massa. Nun, kial ne vico de Samĉjo ?

— Hoj, Samĉjo, hoj ! Mastro volas ke vi alkonduku al li Vilĉjo kaj Jerĉjo, kriis Andio tuj ĉesiganta la monologon.

- He, ho ! Kio kiu nun okazi, junulo ?

- Nu ! Vi eble ne scii ! Elnjo forpeli siajn piedojn kaj kuri kun la infano.

- Iri instrui vian avinon, rebatis Samĉjo kun nedirebla malestimo. Mi amase scii ĉion ĉi; la nigro ne plu esti tiel freŝbakita, iri !

- Tamen, mastro voli Vilĉjo^{n} kaj Jerĉjo^{n} selitaj kaj briditaj kiel eble plej rapide. Kaj vi, mi, kaj massa Halej, tuj postkuri Elnjo^{n}.

- Bone ! Jen ni esti al la kerno. Nun Samĉjo esti. Samĉjo esti la nigro. Ni baldaŭ vidi kiel mi kapti lin ! Mastro scii tion kion Samĉjo valori.

- Ha ! Sed, Samĉjo ! Pli bone pripensi dufoje ! Ĉar mastrino ne voli Elnjo esti kaptita; kaj la mano de la mastrino esti tre proksima al via lano.

- He Ho ! kriis Samĉjo malfermegante la okulojn, kiel vi scii tion, junulo ?

- Mi aŭdi ŝin per miaj oreloj, ĉi tiun malbenitan matenon mem, dum mi alporti al mastro la akvon por lia barbo. Esti mi kiun mastrino sendi vidi kial Elnjo ne veni por vesti ŝin; kaj kiam mi diri al ŝi ke Elnjo foriri, mastrino rektiĝi sur sia postaĵo kaj krii : "Dio esti laŭdita !" Mastro, tute kolere : "Vi esti freneza !" kiun li diri, la mastro; sed mastrino turni sin. Dio beni min ! La flanko de la mastrino esti ankoraŭ la plej sekura, mi diri tion al vi.

Post tio, Samĉjo la Nigro gratis sian lanan kapon kiu, pro manko de alia scienco, estis plenmezure provizita per tiu kiun estas plej ŝatita de politikistoj el ĉiuj landoj kaj el ĉiuj

koloroj. Li mirinde bone sciis, kiel oni diras, de kiu flanko lia pantranĉo estis buterigita. Absorbiĝinta en profundaj meditadoj, li relevis kaj tiradis, ankoraŭ kaj ankoraŭ, siajn kuloton, favoran geston kiu kutime helpis lin dum liaj mensaj embarasoj.

- Ne esti por fidi al io ajn, ne. Ĉi tiu mondo esti trompilo, *fine diris Samĉjo parolanta kiel filozofo, kaj emfazanta la adverbon kiel homo kun vasta sperto bone informita pri multaj aliaj specoj de mondoj, kaj kiu plenkonscie juĝas*. Mi esti vetanta, li fine daŭrigis, ke mastrino esti metonta ĉiujn niajn krurojn post Elnjo.

- Por reakiri ŝin, jes ja ! Sed ĉu vi, granda nigra nigrulo, ne kapabli vidi tra ŝtupetaro ? Mastrino ne voli ke massa Halej ekkapti la etulon de Elnjo, jen la afero.

- Hoj, ho ! kriis Samĉjo, kun tiu stranga guturala intonacio nur konata de tiuj kiuj vivis inter la nigruloj.

- Mi ankoraŭ pli diri al vi, daŭrigis Andio, sed necesi venigi la ĉevalojn kaj rapide, ĉar mi aŭdi mastrinon informiĝi pri vi. Sufiĉe tiel maldiligenti.

Samĉjo tiam serioze rapidis, kaj baldaŭ reaperis, rajdanta kun belega aspekto, kaj plengalope direktanta sin al la domo kun Jerĉjo kaj Vilĉjo. Sen plimodestigi ilian ardon, li delikate saltis flanken, tanĝigis ilin, kiel kirlovento, la randon de la ĉevalbloko, kaj subite haltigis ilin antaŭe. La ĉevalido de Halej, juna kaj timema besto, kalcitris, baŭmis, forte skuante sian kolbridon.

- Ho ! Ho ! Ni esti tikliĝemaj, *diris Samĉjo, kaj petola ekbrilo lumigis lian nigran vizaĝon*, jen, jen ! Mi tuj zorgi vin.

Larĝa fago ombris la lokon, kaj ĵetkovris la grundon per siaj malgrandaj triangulaj fruktoj. Samĉjo prenis unu el ili inter siaj fingroj kaj alpaŝis al la ĉevalido, kiun li karesis kaj milde frapetis, kvazaŭ por trankviligi ĝin. Ŝajnigante sin rearanĝanta la selon, li levis ĝin kaj lerte ŝovis suben la

malgrandan fagofrukton kun akraj anguloj, tiel ke la plej eta pezo kiu premus sur ĝi supermezure incitus la nervan ekscitebleconde la besto, sen lasi sur ĝia dorso la plej subtilan spuron.

- Jen ! mi prizorgi ĝin, diris Samĉjo, ruligante siajn pupilojn kaj permesante al si mem aproban grimacon.

Tiam, sinjorino Ŝelbi, sin montrante sur la balkono, signis al li alproksimiĝi. Tiel decidita bone amindumi kiel neniu petanto de neokupataj oficoj en Vaŝingtono aŭ en Sankta Ĵakvo, Samĉjo tuj antaŭenpaŝis.

- Vi multe malfruis, Samĉjo, kial tio ? Mi komisiis Andio^{n} urĝigi vin.

- La bona Dio beni mastrinon ! La ĉevaloj ne lasi sin kapti en minuto; ili kaprioli tien, tien, tra la vastaj sudaj gresejoj, kaj Dio scii kien !

- Kiomfoje mi ripetis al vi, Samĉjo, ne diri : "Dio benu vin !" "Dio scias !" kaj aliaj similaĵoj ! Tio estas malbona.

- La bona Dio beni mian animon ! Mi ne forgesi tion, mastrino, mi neniam, neniam diri tion.

- Sed, Samĉjo, vi ĵus denove rediris tion.

- Mi ! Ho Disinjoro ! Ne, mi ne diri ! Neniam plu diri tion.

- Estu atenta, de nun.

- Mastrino, nur lasi al Samĉjo tempon por spiri, kaj li reiri per firma piedo. Ĉio atenta, de nun.

- Nu, Samĉjo, estas vi kiu akompanos s^{ron} Halej^{on} por montri al li la vojon kaj helpi lin. Bonege zorgu pri la ĉevaloj, Samĉjo. Vi scias ke Jerĉjo iomete lamis la pasintan semajnon; ne tro pelu viajn bestojn.

Ĉi tiuj lastaj vortoj, mallaŭte diritaj, estis energie akcentitaj.

- Lasi la naivulon, la nigron fari, mastrino, rebatis Samĉjo kun ruliĝo de okuloj el la plej esprimplena, la bona

Dio scii… Hola, mi ne diri ! Kaj li provis reteni siajn parolojn per grimaco de antaŭtimo tiel amuza, ke malgraŭ si, sinjorino Ŝelbi ekridis. "Jes, jes, mastrino, Samĉjo havi okulon sur ĉevaloj".

- Nun inter ni du, Andio, daŭrigis Samĉjo reveninta sub la fago en sia observejo. Vidi, mi, ne surprizita se la ĉevaleto de la massa fari petolaĵojn kiam la massa rajdi sur ĝin. Scii, Andio, la ĉevalido havi kapricojn ! *Kaj Samĉjo doni signifoplenan puŝon en la ripojn de sia kamarado.*

- He Ho ! rebatis Andio kun mieno de perfekta kompreno.

- Jes ja ! Vidi, Andio, mastrino voli gajni tempon. Ne bezoni surmeti siajn okulvitrojn por vidi tion. Mi, mi jam iom labori por ŝi. Atenti, Andio ! la ĉevaloj liberigitaj, ili kaprioli tien kaj tien, tra herbejo, tra arbaro, kaj mi certigi tion, massa ne haste foriri.

Andio rikanis.

- Atenti, Andio, atenti ! Se io okazi, se la ĉevaleto de massa Halej ekpensi kalcitri kaj forkuri, esti supozo, Andio, ni liberlasi la du aliajn ĉevalojn por kuri helpi. Ho ! Jes, bone helpi massaⁿ ! *Kaj Samĉjo kaj Andio, ĉiu klinante la kapon al la ŝultro, klakante per siaj fingroj kaj dancigante siajn krurojn, fordonis sin kun neesprimeblaj plezuregoj al subpremataj ridoj.*

Iom kvietigita de taso da plej bona kafo, mastro Halej tiam aperis sub la verandon. Li alvenis ridetante, parolante, preskaŭ bonhumore. Samĉjo kaj Andio malkroĉis kelkajn pecetojn de plektitaj palmfolioj, kiuj kutime servis al ili kiel ĉapelo, kaj kuris por esti disponeblaj proksime al la piedingo, tute pretaj por "helpi massaⁿ !

Sagace senigita de ĉio kio povis fari iluzion de randoj, la palmfolio de Samĉjo ventumilforme disstariĝis rigide, sufiĉe rememoriganta, pro lia aroganta senĝeneco, la

hararanĝon de sovaĝa ĉefo. Male, la palmfolio de Andio, estanta senfunda, kaj havanta nur la volvon, li surmetis ĝin sur la kapon kun feliĉa mieno. "Kiu do, li ŝajnis diri, maltimus supozi ke mi ne havas ĉapelon ?"

- Vigle, infanoj ! Ni ekiru, diris Halej, kaj senprokraste !

- Ne unu minuton, massa, diris Samĉjo kiu prezentis la kondukrimenojn kaj tenis la piedingojn, dum Andio malligis la du aliajn ĉevalojn.

Apenaŭ Halej tuŝis la selon ke la varmega besto saltegis de la tero, kaj per subita flankenĵetiĝo, elseligis sian mastron je kelkaj paŝoj de tie, sur la sekan ebenan herbejon. Samĉjo, kun furiozaj ekkrioj, saltis sur la bridon, kaj sukcesis nur sendi la radiojn de sia hararanĝo en la okulojn de la ĉevalo, tio kio tiel malmulte kunefikis por pacigi ĝin, ke, faligante la nigrulon, li baŭmis, du- aŭ tri-foje snufis laŭ malestima maniero, vigle skuis siajn kvar hufojn en la aeron, kaj galope malsupreniris laŭ la gazono, sekvata de Jerĉjo kaj Vilĉjo, kiujn Andio, fidela al la ricevitaj ordonoj, certe ne malsukcesis liberlasi, forsendante ilin per multe da malbenoj. Sekvis tumulta sceno : Samĉjo kaj Andio kuris ĉi tie kaj tie, blekegante, la hundoj ĉiudirekte bojis, kaj Mikaelo, Moseo, Mandia, Stenjo, ĉiuj etaj genigrilidoj de la loĝejo, saltegis, trotetis, alvokis, frapis per la manoj, kriegis kun la plej malutila diligenteco kaj la plej senlaca fervoro.

La ardoplena blanka ĉevalido de Halej mirinde eniris en la logikon de la ludo. Li trovis por karakoli, gazonon, larĝe je duonmejlo *(+/-750m)*, irantan deklive perdiĝi en senlimaj arbaroj. La besto ŝajnis ŝategi lasi alproksimiĝi tiujn kiuj postkuris ĝin, poste kiam la mano estis kaptonta la bridon, hop ! flankenĵetiĝo, heno, kaj la petola besto rapidege kuris laŭ iu aleo de la arbaro. Samĉjo tute ne deziris haltigi la fuĝantojn antaŭ la oportuna momento; dum ĉi tiu tuta

ĉasado, li montriĝis vere heroa. Kiel la glavo de Leonkora Rikardo fulmis ĉe la fronto kaj ĉe la plej varmega de la batalo, la palmfolio de Samĉjo aperis ĉie kie estis la plej eta ŝanco ke iu ĉevalo estu kaptita. Li subite impetis al la minacatan lokon, blekante : "Jen ni ! Kapti ! Firme ! Kapti do !" Tiel ke la konfuzo kaj la turniro ankoraŭ pli forte rekomenciĝis.

Halej kuris dekstren maldekstren. Li malbenis, blasfemis, furiozis, alterne stamfis. S^ro Ŝelbi, laŭtigante la voĉon, vane penis direkti la ĉasadon de la supro de sia balkono, kaj lia edzino, ĉe la fenestro de sia dormoĉambro, ridis kaj miris, ne sen suspekti pri tio kio estis funde de ĉi tiu tuta tumulto.

Finfine, ĉirkaŭ tagmezo, Samĉjo triumfe aperis, rajdanta sur Jerĉjo, li revenigis la ĉevalon de Halej anhelantan, fumantan pro ŝvito. Sed la ekbrilo de la okuloj de la besto, la fajro de ĝiaj dilataj naztruoj, ankoraŭ atestis ke la spirito de libereco ne tute trankviliĝis.

- Kaptita, kaptita ! triumfe kriis Samĉjo. Se ne esti Samĉjo la Nigro, ĉiuj ankoraŭ moviĝi. Sed, mi kapti ĝin !

- Vi ! grumblis malbonhumore Halej; sen vi ni ne havus ĉi tiun tutan damnitan tumulton !

- Disinjoro beni nin, massa, diris Samĉjo per tono de ofendata senkulpulo, mi ja penegi kuri, peli, ĝis kiam mi esti tute ŝvitoplena !

- Nu, per viaj malbenitaj stultaĵoj, vi perdigis min preskaŭ tri horojn, vi ĉiuj tiom kiom vi estas ! Ek ! Sufiĉe da viaj ekstravagancoj.

- Kiel, massa, diris Samĉjo kun dolora miro, ĉu vi do voli mortigi ĉiujn kompatindulojn, ĉevalojn kaj nigrulojn ? Ni elĉerpe lacaj, kaj la bestoj tute ŝvitegantaj. Ho ! Massa, ne ebli foriri antaŭ tagmanĝi. La ĉevalo de massa tute surŝprucigi sin, necesi ke ni strigli ĝin; kaj Jerĉjo kiu denove

lami ! Neniam mastrino lasi nin tiel foriri. Disinjoro beni vin, massa, ne bezoni tiom rapidi por kapti Elnjo^{n}, ŝi ne esti tiel bona piedirantino !

Sinjorino Ŝelbi kiu, por sia bonega distro, aŭdis ĉi-tiun tutan konversacion de la verando, tiam opiniis devi ludi sian rolon. Ŝi antaŭenpaŝis al Halej, esprimis al li ĝentilajn bedaŭrojn pro la akcidento kiu ĵus okazis, kaj petegis lin resti por tagmanĝi, certigante ke la kuiristino servus senprokraste.

Post bonaj pripensoj, Halej, kun suspektinda bonvolo, sin decidis eniri en la salonon, dum Samĉjo, serioze kondukante la ĉevalojn al la stalo, sekvis lin per sia rigardo plena de nedirebla petoleco.

- Ĉu vi vidi lin, Andio, ĉu vi vidi lin ? *diris Samĉjo kiam li estis sin ŝirminta malantaŭ la stalmuro kaj liginta sian ĉevalon al la fosto*. Sinjoro Dio ! Li esti tiel amuza kiel mitingo. Vidi lin danci, salti, furiozi, insulti nin ! Ĉu mi ankoraŭ ne aŭdi lin ? Blasfemi, maljuna kanajlo kiun mi diras al mi mem, ĉu plaĉi al vi havi la ĉevalon tujtuj, aŭ ĉu Samĉjo devi kapti ĝin por vi ? Sinjoro bona Dio ! Ŝajnas ke mi ankoraŭ vidi lin !

Kaj Samĉjo kaj Andio, sin apogante al la muro, plengorge ridegis.

- Necesi vidi lin koleriĝi kiam mi revenigi lian beston ! Se li ne mortigi min, ne esti pro manko de envio. Kaj mi tiam, tute rekta, tute senkulpa, vera ŝafido !

- Ha ! Mi bone vidi vin, nu ! Vi esti iu ruzulo, Samĉjo !

- Mi, ne diri ne. Kaj mastrino ĉe sia fenestro ! Ĉu vi vidi ŝin ridi ?

- Ha ! Mi ne vidi ĉion, tro multe kuri por tio.

- Aŭskulti, Andio, *serioze daŭrigis Samĉjo striglante la ĉevalon de Halej*, la observado, vi vidi, jen la afero. Kaj mi gajni observadon. Tio tute esti la diferenco inter iu nigrulo

kaj alia nigrulo. Necesi praktiki tion dum sia junaĝo, Andio. Ĉu mi ne vidi ĉi matene de kiu flanko blovi la vento ? Levi la malantaŭan piedon, Andio. Ĉu mi ne vidi tion kion voli mastrino sen ke ŝi flustri vorton ? Ĉio esti observado, ne aliaĵo, ia kapableco ! La kapablecoj, ili ne veni al ĉiuj, sed ili esti kulturataj, vi vidi, Andio !

- Mi doni grandan helpon al via observado ĉi-matene !

- Andio, vi esti infano kiu promesi, ne esti dubo. Mi vere estimi vin, Andio. Mi tute ne honta preni vian opinion. Sed necesi ne rigardi iun super la ŝultro : la plej bona kuristo povi esti preterpasita. Kaj, nun, hejmen ! Veti ke ni havi de nia mastrino kelkajn bonajn mordaĵojn !

07. La Lukto de la Patrino.

Ne povas esti imagata pli afliktita , pli senhelpa homa estulo ol la kompatinda Eliza kiam ŝi forlasis la kabanon de onklo Tomo.

La suferoj kaj danĝeroj de ŝia edzo, tiuj de ŝia infano, miksiĝis en ŝia konsternita menso, kun la timiga sento de ŝiaj propraj riskoj, ĉe la momento kiam ŝi foriĝis de la sola azilo kiun ŝi konis, kaj perdis la protekton de mastrino tiom respektata kiom amata.

Tio estis la adiaŭo al ĉiu hejma objekto, laŭmezure kiam elviŝiĝis, sub la malvarma kaj hela brilo de stelplena ĉielo, la tegmento kiu vidis ŝin kreski, la arbo kiu ombris ŝiajn unuajn ludojn, la arbareto kie, apogita sur la brako de sia juna edzo, ŝi ĝuis tiom da feliĉaj vesperoj. La rememoroj ekaperis unu post la alia renkonte al ŝiaj paŝoj, kvazaŭ por riproĉi al ŝi ŝian foriron, la forlason de ŝia pasinteco kaj de tiom da korinklinoj kiujn ŝi ne plu retrovos.

Sed patrina amo, incitegita ĝis frenezeco de la alproksimiĝo de terura danĝero, regis en ŝi ĉiujn bedaŭrojn, ĉiujn terurojn. Ŝia filo jam estis sufiĉe maljuna por paŝi apud ŝi; ŝi tamen portis lin, kaj la nura ideo liberigi ĉi tiun konvulsian ĉirkaŭpremon tremetigis ŝin dum ŝi pli kaj pli rapidigis la paŝadon.

La frosta grundo kraketis sub ŝia piedo, kaj ŝi ektimis pro la bruo. Svingiĝanta folio, moviĝanta ombro sendis al ŝia koro ŝprucon de sango, kaj ŝia rapida paŝado fariĝis ankoraŭ pli rapida, kaj ŝi miris pro la forto kiun ŝi sentis kreski en si. La pezo de ŝia knabo ne plu estis afero, iu plumo, iu pajlero, kaj ĉiu palpitacio pro timego pliigis la supernaturan viglecon kiu ĵetis ŝin antaŭen, dum el ŝiaj palaj lipoj senĉese eliĝis ĉi

tiu preĝo al la ĉiela amiko de tiu kiu suferas : “Disinjoro, veni al mia helpo ! Hasti helpi min !"

Se li estis via Henriko, blankhaŭta patrino, se li estis via Vilhelmo kiun senkora komercisto de homa karno devis matene forkapti de vi; se vi estus vidinta la viron, vidinta la subskribon de la akto, kaj havus nur kelkajn noktajn horojn donacitajn al via fuĝo, ho ! kiel viaj paŝoj estus rapidaj ! kiom da vojo vi farus, en ĉi tiu malgranda tempo, kun via trezoro premata kontraŭ via brusto, lia bukla kapo dormanta sur via ŝultro, liaj etaj brakoj ĵetitaj ĉirkaŭ via kolo !

Ĉar la infano dormis. Unue la surprizo kaj la timo tenis lin maldorma. Sed lia patrino tiel rapide bridis la plej malfortan suspiron, la plej mallaŭtan sonon; ŝi tiel firme asertis ke ŝi savos lin, ke li pace alkroĉiĝis al ŝia kolo, kaj nur demandis, ĉar la dormo premegis lin :

- Panjo, ĉu necesi resti maldorma, diri ?

- Ne amo mia ! Dormi, se vi voli.

- Sed se mi dormi, panjo, ĉu vi ne lasi lin preni min ?

- Ne ! Dio helpi min ! respondis la paliĝanta patrino, kun sovaĝa fajro ŝprucanta el siaj okuloj.

- Vere, panjo ! Verege ?

"Tre certe, mia infano", diris la patrino per voĉo kiu ektremigis ŝin mem, ĉar ŝajnis al ŝi ke spirito ekster ŝi parolis en ŝi, kaj la knabeto, lasante fali sian kapon sur la ŝultro de sia patrino, baldaŭ estis profunde dormanta. La premo de tiuj etaj varmaj brakoj, la karesoj de tiu freŝa spiro, aldonis fajron al ŝia flamo, ardon al ŝia ardeco. Ĉiu nerimarkebla movo, ĉiu delikata tuŝo de la infano, verŝis en ŝin, per elektraj fluoj, superhoman forton. La influo de la animo super la korpo estas tia ke dum tempo ĝi igas la muskolojn nefleksebla j, la nervojn ŝtalaj kaj penetras la plej malfortan ulon per nevenkebla energio.

La limoj de la bieno, la bosketoj, la kopsoj, forŝvebis

kiel en sonĝo, kaj ŝi ankoraŭ paŝis, sen halto, sen paŭzo, vidante malaperi unu post alia ĉiuj konataj objektoj. Fine la ruĝiĝanta tagiĝo trovis ŝin sur la ĉefa vojo, preterpasinte je pluraj leŭgoj *(+/-4Km)* ĉion kio estis al ŝi konata.

Multfoje ŝi akompanis sian mastrinon kiam ŝi iris viziti parencojn en la vilaĝo de T…, sur Ohiorivero, kaj ŝi sciis la vojon. Iri tien, transiri la riveron, tie finiĝis ŝiaj planoj; poste ŝi fidis al Dio.

Kiam la ĉevaloj kaj la veturiloj komencis moviĝis, ŝi sentis, per tiu rapida percepto kiu apartenas al perfortaj situacioj, ke ŝia hasta paŝado, ŝia konfuzita mieno, estis okazigontaj rimarkojn, vekontaj suspektojn. Ŝi remetis la infanon teren, reordigis siajn vestaĵojn, sian hararanĝon kaj marŝis tiel rapide kiel tion permesis la singardeco. En ŝia malgranda pakaĵo troviĝis kelkaj kukoj, kelkaj pomoj, kiujn ŝi uzis por rapidigi la iradon de la knabeto. Ŝi ruligis la frukton iom malproksime antaŭ li; li postkuris ĝin, kaj pere de ĉi tiu manovro ŝi ankoraŭ sukcesis gajni pli ol duonleŭgon.

Ili finfine alvenis apud malgranda arbarkovrita ĉirkaŭbaritejo, kie murmuris klara rojo. La infano plendis pri malsato kaj soifo; ŝi transiris la heĝon kun li, kaj kaŝkaŭranta malantaŭ roko kiu ŝirmis ilin de la okulo de preterpasantoj, ŝi eltiris matenmanĝon el sia maldika pakaĵo. Henriko afliktiĝis pro tio ke patrino ne povis manĝi. Kun la brakoj ĉirkaŭ ŝia kolo, li penis enŝovi en ŝian buŝon kelkajn pecetojn de kuko. Sed ŝajnis al la kompatinda virino ke la plej eta peco estis sufokonta ŝin.

- Ne, Henriko, ne, trezoro mia ! Panjo ne manĝi ĝis vi esti savita. Necesi iri, iri, atingi la riveron ! *Kaj, tuj revojirante, ŝi strebis ne tro rapide paŝi.*

Ŝi delonge preterpasis la tujan najbaraĵon de la loĝejo, kaj eĉ se ŝi devis fari iujn malfeliĉajn renkontojn, la bonkoreco de la familio al kiu ŝi apartenis estis tro vaste

konata por ke oni suspektas ŝin fuĝi. Cetere ŝi preskaŭ konservis neniun spuron de sia origino; la blankeco de ŝia filo kaj la ŝia devis forigi malfidon.

Pro ĉi tiu konjekto ŝi haltis ĉirkaŭ tagmezo ĉe malgranda, pura kaj bonorda bieno, por iom ripozi kaj aĉeti kelkajn porvivaĵojn; ĉar laŭmezure kiel la distanco forpuŝis la danĝeron, la streĉiĝo de ŝiaj nervoj moliĝis, ŝi sentis lacecon kaj malsaton kreski. La mastrino de la loĝejo, bona virino, kontentega havi iun kun kiu babili, akceptis sen obĵeto la klarigon de Eliza, kiu diris ŝin survoje por iri pasigi semajnon ĉe amikoj; aserto kiun ŝi anticipis eble efektiviĝi.

Unu horon antaŭ la sunsubiro, elĉerpita, kun la piedoj dolorigitaj, sed kore ankoraŭ forta, ŝi eniris en la vilaĝon T..., sur la bordo de Ohiorivero. Tie ŝia unua rigardo estis por la riverego, tiu Jordano kiu apartigis ŝin de la promesita lando, de la grundo de libereco.

Printempo estis alvenonta, kaj la ŝvelinta kaj brua rivero flutransportis grandegajn glaciblokojn kiuj peze balanciĝis tra la ŝlimaj fluaĵoj. La aparta formo de la kurba bordo flanke de Kentukio kaŭzas ke la glacio alkroĉiĝas kaj amasiĝas tie, mallarĝigante la kanalon kie la akvo pelas kaj kunportas sinsekvon da glaciaj amasoj, kiuj venas amasiĝi unu sur la alia kaj momente formi baron, laŭlonge de kiu glitis novaj glaciblokoj, moviĝanta floso kiu preskaŭ kunigas kun la alia bordo.

Eliza dum momento kontemplis tiun minacatan aspekton, la transveturado de la pramo devis esti interrompita, por pli da informoj ŝi eniris en malgrandan najbaran gastejon.

La gastigantino estis streĉe okupita pri la pretigo de la vespermanĝo; sed ŝi turniĝis, kun forketo enmane, al dolĉa kaj plenda voĉo kiu demandis :

- Ĉu ne plu esti kablopramo por transpaigi homoj kiuj iras al B...o ?

- Ne, vere, diris la virino, la boatoj ne plu funkcias.

La aflikta kaj terura esprimo de Eliza frapis la bravan gastigantinon, kaj ŝi daŭrigis :

- Eble vi havas grandan intereson transiri ? Ĉu iu malsanas ? Vi ŝajnas tiel turmentata !

- Mi havi infanon en granda danĝero, diris Eliza, mi ekscii tion nur lastan vesperon, kaj de tiam mi ĉiam paŝadi kun la espero alveni al la pramo.

- Nu ! Tio estas vere bedaŭrinda ! rebatis la virino kies patrinaj simpatioj ĵus vekiĝis. Mi estas ĉagrenita pro vi. Salomono ! ŝi kriis de la fenestro.

Viro en leda antaŭtuko kun tre malpuraj manoj aperis ĉe la pordo de malantaŭa konstruaĵo.

- Diru do ! Ĉu la ŝipisto transveturos ĉivespere kun la bareloj ?

- Li diris ke li provos, kondiĉe ke eblos, rebatis Salomono.

- Estas, reparolis la gastigantino, je ŝtonĵeta distanco de nia domo, viro kiu devas transiri, se li maltimas tion, por transporto de urĝaj varoj. Li venos ĉi tien vespermanĝi post momento. Vi do pli bone farus sidigi vin tie kaj atendi lin. Ĉu ne estas aflabla eta kamarado ! *aldonis la virino, kaj ŝi prezentis kukon al infano. Sed Henriko, fleksiĝante, ploris pro laceco.*

- Kompatinda etulo ! Li ne kutimi tiom paŝi, kaj mi tro kurigi lin, diris Eliza.

- Nu, reparolis la virino, ripozigu lin iom ĉi-enen, kaj ŝi malfermis la pordon de malgranda ĉambro kie troviĝis lito. La patrino metis en ĝin sian kompatindan knabon, mortlacan, kies ŝi tenis la etajn manojn inter la ŝiajn ĝis kiam la infano estis dormanta.

Por la patrino, ne estis dormo : kvazaŭ fajro gluiĝinta al ŝiaj ostoj brulis en ŝi; penso de la ĉasistoj alligitaj al ŝia

spuro. Kaj ŝi fiksis ardan rigardon al la nigraj kaj ŝvelintaj akvoj kiuj apartigis ŝin de la savo. Sed necesas al ni adiaŭi ŝin kaj reveni al tiuj kiuj persekutas ŝin.

* ** *** ***** *** ** *

Kvankam S^ino^ Ŝelbi sin devontigis tuj servigi, ni baldaŭ vidis, tio kio de ĉiam vidiĝis, ke necesas esti du por fari interkonsenton. La ordono estis laŭte donita en la orelojn de Halej, kaj portita al onklino Kleo de duondekduo da junaj mesaĝistoj, al kiuj tiu granda potenco malvolonte konsentis du aŭ tri malafablajn kapjesojn, sen nenion ĝeni pri la serioza kaj zorgema malrapideco de ŝiaj operacioj.

Per ia sekreta intuicio, ĝenerala impreso ke mastrino tute ne estus embarasata de malfruo, ŝajnis regi; kaj la sinsekvo de akcidentoj kiuj prokrastis la servadon, vere estis mirakla. Iu malfeliĉulo trovis manieron elverŝi la sukon. Necesis refari ĝin kun la tuta zorgemo, la tutaj postulataj proceduroj. Onklino Kleo, mordeme turnante la karegan likvaĵon, maldelikate respondis al ĉiuj aludoj de hasto, ke ne estus ŝi kiu, "por helpi kapti la kompatindajn homojn, servus malbonan sukon". Unu falis kun la terkruĉoj, kaj necesis reiri serĉi akvon al la fonto; alia faligis la buteron meze de la okazintaĵoj. Briditaj ridoj trairis la kuirejon, kiam intermite alvenis novaĵoj pri massa Halej : "Li ne kapabli resti sur sia seĝo; li nur iri kaj reiri de la pordo al la fenestro !"

- Prave li ricevi ! indigne diris onklino Kleo. Esti pli malbone por li, se li ne korektiĝi, kiam la mastro veni kaj diri al li pravigi sin ! Necesi tiam vidi lian vizaĝon !

- Li iri al la infero, nedubeble ! diris la eta Diego.

- Kaj ke li fiere gajni ĝin ! rebatis onklino Kleo, li kiu tiom kaj tiom rompi da kompatindaj koroj ! Esti mi kiu diri tion al vi, al vi ja, *ŝi daŭrigis levante kun terura mieno sian grandan forketon kiel tridenton; ĝuste tion kion legis s^ro^ Georgo en la Revelacioj* : "La animoj krii al la Disinjoro sub la

altaro; ili peti venĝon ! Kaj la Disinjoro aŭdi ilin, veni la tempo; jes, je lia damaĝo, veni la tempo !"

Onklino Kleo, tre respektata en sia fako, estis aŭskultita de ĉiuj, kun gapanta buŝo; kaj ĉar la tagmanĝo estis finfine servata, la kuireja servistaro kolektiĝis ĉirkaŭ ŝi por aŭdi ŝin kaj iom klaĉi.

- Liaj samuloj vivebruli dum la tuta eterneco, certe, ĉu ne ? diris Andio.

- Mi feliĉa, vidi lin rostadi ! Ĉiam ! Ĉiam ! kriis Diego.

- Infanoj ! diris voĉo kiu ektremigis ilin, estis onklo Tomo kiu, staranta sur la sojlo, aŭdis ĉion.

- Infanoj, vi ne kompreni, mi timi. La eterneco esti terura vorto ! Nur pripensi ĝin, hirtigi al vi la haŭton ! Esti malbone deziri eternajn turmentojn al homa estaĵo ?

- Li ne esti homa estaĵo ! ekkriis Andio, la ĉaspelistoj de animoj esti malafablaj hundoj, ne homoj !

- La naturo mem krii kontraŭ ili, aldonis onklino Kleo. Ĉu ili ne forpreni la sucinfanon el la mamo de la patrino por lin vendi ? La etaj ĝemantoj pendantaj ĉe ŝia subjupo por ilin vendi ? Ĉu ili ne forpreni la edzon de lia edzino ? daŭrigis onklino Kleo, la larmoj ekatingantaj ŝin, kaj ĉu ne estas preni la vivon de ambaŭ ? Kaj tio sen perdi manĝon, glason da vino ! Ili fumi, trinki, vivĝojaj kiel antaŭe ! Ha ! Se la diablo ne harpuni ĉi tiujn, por kio la diablo esti bona ! *Kaj onklino Kleo kovris al si la vizaĝon per sia antaŭtuko el katuno, kaj tutkore plorĝemis.*

- Preĝi por tiuj kiuj persekuti vin, la libro diri, reparolis Tomo.

- Por ili ! ekkriis onklino Kleo, esti tro malfacile ! Mi ne kapabli preĝi por ili !

- Esti la kulpo de la karno, Kleo, kaj la karno esti malforta, sed la graco de Dio estas pli forta. Nur pensi pri la animo de ĉi tiuj kompatindaj kreitaĵoj, kaj danki la

Disinjoron, Kleo, ne esti sur ilia loko. Ha ! Certege, mi pli ŝati esti vendata cent kaj centfoje, ol havi sur la koro ĉion de kio ĉi tiuj kompatindaj malvirtuloj havi por respondeci !

- Mi tamen, diris Diego. Hej ! Bona Dio, neniam ni voli kapti Elnjo^{n,} ĉu ne, Andio ?

Andio levis la ŝultrojn, kaj konsente fajfis.

- Mi ĝoji ke mastro ne foriri ĉi matene kiel li decidi, daŭrigis Tomo. Mi esti ankoraŭ pli ĉagrenita, mi kredi, vidi lin foriri ol esti vendata. Esti nature por li ne voli esti tie; sed mi ja havi koron tre pezan ! Mi vidi lin tiel malgrandan ! Nune, mi senti min tute rezignaciinta. Tio esti la volo de Dio. Mastro ne povi, sed li fari kiel eble plej bone. Tio kio afliktigi min nun, esti pripensi kiel tio esti kiam mi ne plu esti ! Necesi ne atendi ke la mastro iri vidi ĉion por provi plenumi la monatajn bezonojn kiel mi fari; kaj kvankam ili havi bonvolon, niaj homoj esti fieraj senzorgemuloj; jen tio kio turmenti min.

La sonorilo aŭdiĝis, kaj Tomo estis alvokita al la salono.

- Tomo, diris tenere lia mastro, mi volas ke vi sciu ke mi subskribis al sinjoro kompenson de mil dolaroj en la okazo se vi ne troviĝus ĉi tie ĝuste kiam li venos postuli vin. Li hodiaŭ okupiĝas pri aliaj aferoj; vi povas disponi pri la tago. Iru do kien vi volos, bona knabo mia !

- Mi danki vin, mastron, diris Tomo.

- Kaj zorgu pri tio ! daŭrigis la komercisto, ne ekpensu ludi al via mastro unu el viaj negraj trompaĵoj, ĉar se vi ne ĉeestos, mi ĉerpos de li ĝis la lasta groŝo. Se li kredus min, li ne estus tiel freneza fidi al iu el vi nigruloj kiuj glitas tra la fingroj kiel angiloj !

- Mastro, diris Tomo, kaj li plengrande rektiĝis, mi esti ĝuste okjaraĝa kiam maljuna mastrino meti vin sur miajn brakojn, vi tute juna knabo kiu ne esti unujaraĝa. Ŝi diri al mi : "Tomo, jen via juna mastro, bone zorgi pri li". Hodiaŭ,

mastro, mi demandi tion al vi, ĉu mi iam trompi vin ? Neniam malobeinta, ĉefe de kiam mi kristaniĝi ?

La emocio ekregis s^ron Ŝelbi^on, larmoj plenigis liajn okulojn kiam li respondis :

- Brava knabo mia, Disinjoro scias ke vi nur diras la simplan veron, kaj se estus en mia povo konservi vin, la trezoroj de la tuta mondo ne aĉetus vin !"

- Sed ĉar estas vere ke mi estas kristanino, aldonis S^ino Ŝelbi, vi estos elaĉetita, Tomo, tuj kiam mi estos povinta kiel ajn kolekti la necesan sumon. Sinjoro, ŝi daŭrigis sin turnante al Halej, bone notu tiun al kiu vi vendos lin, kaj konigu lin al mi.

- Volontege, rebatis la komercisto. Mi povas alporti al vi la negron post unu jaro sendifekta, kaj vere sen uzuro revendi lin al vi; tio ests mia stato al mi !

- Mi tiam elkore komercos kun vi, kaj vi trovos vian profiton, ŝi diris.

- Sendube, reparolis la komercisto, vendi aŭ aĉeti, ĉio estas egala al mi, kondiĉe ke la afero estu bona. Tio kion mi volas, estas honeste perlabori mian vivon, sinjorino, kaj ni faras nek pli nek malpli, ĉiuj tiom kiom ni estas, mi supozas !

Gesinjoroj Ŝelbi^oj, unu kaj la alia embarasitaj, sin sentis por tiel diri malindigitaj de la aroganta familiaraĵo de la komercisto; sed ambaŭ vidis la neceson sin devigi. Ju pli la viro sin montris senkompata kaj fia, des pli sinjorino Ŝelbi timis ke li sukcesos kapti Eliza^n kaj Henriko^n, kaj des pli ŝi multigis la klopodojn kaj la inajn artifikojn por reteni lin. Ŝi gracie ridetis al li, facile kaj familiarece babilis, kaj uzis ĉiujn rimedojn por nerimarkeble fluigi la tempon.

Je la dua horo Samĉjo kaj Andio alkondukis la refreŝigitajn ĉevalojn, kaj tute vigligitaj de ilia matena vagado.

Samĉjo staris tie, renovigita de la tagmanĝo,

komplezema kaj tute bolanta je fervoro. Kiam Halej alproksimiĝis, li estis fanfaronanta, laŭ eleganta stilo, pri la maniero kies li direktus la aferojn nun kiam li serioze komencis.

- Via mastro ne havas hundojn, mi vetus ! diris penseme Halej dum li pretiĝis surseliĝi.

- Li ! He, havi multajn el ili ! rebatis grave Samĉjo. Unue jen Bruno, fama bojaĉulo ! Kaj plie, ĉu ĉiu el ni, nigruloj, ne havi sian hundaĉon ?

- Pu ! diris Halej, kaj li aldonis kelkajn vortojn kiuj tiklis la ofendiĝemon de Samĉjo, kiu murmuris.

- Mi ne kompreni kial sakri pri kompatindaj bestoj !

- Sed, diris Halej, ĉu via mastro havas hundojn, mi anticipe estas sufiĉe certa ke ne, dresitajn por spuri negrojn ?

Samĉjo bonege sciis tion kion la komercisto volis diri; sed li gardis la mienon de la plej naiva, la plej senespera simpleco.

- Niaj hundoj havi flarpovon kiu gravas. Ili esti el la bona raso ! Ne dresitaj, vere; sed altnivelaj iam irigitaj. Ĉi tie, Bruno ! *Kaj li fajfis la grandan novlandhundon kiu, kun la vosto supren, alkuris al li, petolante.*

- Iru pendigi vin ! ekkriis Halej antaŭenirante sur sia ĉevalo. Ekrajdu viajn bestojn, kaj ek !

Samĉjo obeis, kaj surĉevaliĝante trovis ankoraŭ la rimedon por tikli sian kamaradon. Andio tuj eksplodis per senbrida rido, je granda indigno de Halej, kiu regalis lin per bato de rajdovipo.

- Malbona por vi, Andio, observigis Samĉjo kun neŝancelebla seriozeco. Grava afero, Andio, kaj vi fari la petolulon. Ne bona rimedo por helpi massa !

- Mi iros al la rivero laŭ la plej mallonga vojo, diris la komercisto per decidita tono tuj kiam la limoj de la

proprietaĵo estis transpasitaj. Mi konas ĉiujn iliajn ruzojn, ili fosus vojojn sub tero !

- Nu ! ekkriis Samĉjo, jen bona ideo. Massa tuj iri al sia celo. Estas du vojoj por iri al granda rivero, malnova vojo desube, nova vojo desupre. Kiun massa voli preni ?

Andio malfermis larĝajn okulojn je ĉi tiu rivelado de nova geografia fakto, sed ne malpli rapidis vigle konfirmi ĝin.

- Por scii, reporolis Samĉjo, Elnjo, mi veti tion, esti preninta la desuban vojon, konsiderante ke ĝi esti la malplej vizitadata.

Kvankam Halej estis lerta ruzulo kiu de malproksime flaris trompilon, ĉi tiu vidpunkto trafis lin.

- Se vi ambaŭ ne estus tiel damnitaj mensoguloj !..., li diris pripensante.

La dubinda tono de la rimarko ŝajnis mirindege amuzi Andio^{n} kiu li iom izoliĝis malantaŭen, ridante tiel forte ke li preskaŭ falis de sia ĉevalo, dum Samĉjo konservis la saman solenan kaj malgajan seriozecon.

- Massa iri tra kie massa voli, certe, li reparolis, plejmallonge, desupra vojo, se massa pensi esti la plej bona. Kion ni fari ? Tute egale por ni. Nun, mi pripensi tion, dekstra vojo esti evidente la plej mallonga.

- Ŝi nepre elektos la plej senhoman vojon, laŭte pensis la komercisto, sen aŭskulti Samĉjo^{n}.

- Ne certe, rekomencis ĉi tiu. Knabinoj havi siajn kapricojn ! Fari neniam kiel oni kredi ke ili devi fari, sed tute ĝuste kontraŭe. Ĉu vi kredi ke ili iri laŭ iu flanko ? Esti kialo por ŝi iri laŭ la alia. Mi esti kredinta Elnjo^{n} preni la desuban vojon, bona kialo ke ŝi elekti la desupran vojon.

Ĉi tiu profunda vidpunkto pri la ina gento tute ne klinante Halej favore al la lasta opinio de Samĉjo, la komercisto demandis ĉu la desuba vojo estis proksima ?

- Mallongan iron antauen, *rebatis Samĉjo,*

palpebrumante al Andio per la okulo kiu troviĝis liaflanke, kaj serioze aldonis : Sed, massa, mi nun esti bone ekzameninta la aferon; ni ne devi elekti tra tien. Unue mi tute ne koni ĉi tiun desuban vojon, veran dezerton por perdiĝi, kaj alveni Dio scii kien !

- Ne gravas, mi prenas la malaltan vojon, asertis Halej.

- He, mi memori tion ! Oni diri ĉi tiun malnovan vojon tute tranĉita de riveretoj, de krekoj, de heĝoj; nenia eblo trairi ĝin; ekster uzo; ĉu ne, Andio ?

Andio ja aŭdis ion pri ĝi; sed li certis pri nenio, neniam irinte tra tien. Resume, li ne volis kompromitiĝi.

Kutimiĝinta pesi la pli-malpli evidentajn mensogojn, Halej kliniĝis al la malnova vojo. Li suspektis Samĉjo^{n} esti unue indikanta ĝin senkonsidere, kaj la provoj de la negro por deadmoni lin elekti ĝin ŝajnis al li tiom da senhontaj mensogoj faritaj, post pli longa cerbumado, favore al Eliza.

Konsekvence, ekde kiam Samĉjo indikis la desuban vojon, li blinde sin ĵetis al ĝi, sekvata de la du nigruloj.

Fakte ĝi estis la malnova vojo al la rivero, sed forlasita antaŭ jaroj, kaj kiu, ebenigita nur ĉe la enirejo, estis poste tranĉita de fosaĵoj, de golfetoj kaj de baroj. Samĉjo perfekte sciis ĉi tion, kaj ĉi tiu vojo estis ekster uzo de tiel longe, ke Andio neniam aŭdis paroli pri ĝi. La nigrulo eniris sur ĝi kun mieno de humila submetiĝo; nur, de tempo al tempo, li ĝemis kaj kriis ke "ĝi estis diable malglata por la piedoj de la kompatinda Jerĉjo".

- Ha do, mi havas konsilon por doni al vi, diris Halej. Mi de for sentas tion kion vi celas, vi negroj ! Kun ĉiuj viaj embarasoj, vi esperas fordirekti min de ĉi tiu vojo ? Neniel !

"Kiel massa voli", respondis Samĉjo kun paŭtema vizaĝo, sed palpebrumante per la okulo kun pliigo de vervo, al sia kamarado, kies ĝojo estis ankoraŭ eksplodonta.

Samĉjo, tre bonhumora, asertis esti atenta, jen li

ekkriis ke li vidis aperi virinan ĉapelon ĉe la supro de iu deklivo; jen li alvokis al Andio :

"Ĉu ne esti Elnjo kiu sin kaŝi en tiu kavaĵo de valeto ?" Ĉiam farante ĉi tiujn ekkriojn en la plej malglataj, la plej rokecaj lokoj de la vojo, kie estis tre malfacile instigi la ĉevalojn, kaj Halej estis ĉiam tenata en vigla interesiĝo

Post esti tiel rajdantaj dum longa horo, ĉiuj tri tumulte alvenis, laŭ krutega deklivo, en larĝan korton ĉirkaŭitan de garbejoj. Ĉiujn brakojn estantajn okupatajn sur la kampoj, estis neniu videbla; sed la bieno de kiu ĉi tiuj garbejoj dependis, baris la vojon, kiu evidente tie finiĝis.

- Ĉu mi ne diri tion ! Mi bone antaŭsciigis massa^{n}, ĝemis Samĉjo la Nigro kun senkulpeca mieno. La fremdaj massa^{j} ne povi koni la landon kiel la nigruloj naskiĝinta en la lando.

- Amuza ! ekkriis Halej, vi tion sciis tro bone !

- Ho ! Mi tre ĝuste diri ĉion al massa, kaj massa ne voli kredi min. Mi diri ke ĉio esti fermita : baroj, heĝoj, fosaĵoj, ne ebla trapasi. Ĉu vi ne aŭdi min, Andio ?

La afero estis tro vera por esti kontestata; necesis ke la malfeliĉa komercisto kaŝu sian koleregon tiel volonte kiel li kapablis, kaj ĉiuj tri, returne, direktiĝis al la nova vojo.

Dank'al ĉi tiuj multnombraj prokrastoj, povis pasi tri kvaronhoroj de kiam Eliza endormigis sian infanon en la gastejo, kiam la trio atingis la vilaĝon. Sidanta ĉe la fenestro, la juna virino rigardis al alia direkto kiam la akra okulo de Samĉjo ekvidis ŝin. Halej kaj Andio troviĝis kelkajn paŝojn malantaŭen. En ĉi tiu danĝero, Samĉjo sukcesis formetigi sian ĉapelon de la vento, kaj eligis plendan krion kiu tremigis ŝin; ŝi ĵetis sin malantaŭen. La malgranda rajdantaro pasis laŭlonge de la fenestro kaj haltis antaŭ la portalo.

Miliono da vivoj ŝajnis koncentriĝi en la sino de Eliza. Kaŝita pordo eliris sur la riveron, kunprenante la infanon en

siajn brakojn, ŝi rapide malsupreniris la ŝtupojn, kaj malaperis malantaŭ la riverrandon kiam Halej plene ekvidis ŝin. Deĉevaliĝante, li laŭtege alvokis : "Samĉjo ! Andio !" kaj sin ĵetis sur ŝiaj spuroj, kiel ĉashundo kuras al damao. En ĉi tiu kapturniga momento, la piedoj de la fuĝantino ne tuŝis la teron. En palpebruma daŭro, ŝi atingis la ekstreman randon, ili alvenis sur ŝin. Vigligita de forto kiun Dio konsentas nur al malesperuloj, kun sovaĝa krio kaj terura impeto, ŝi transiris per unu salto la ŝliman fluon kiu laŭiris la riverbordon, kaj troviĝis sur la floso de glacioj kiun ĝi flutransportis transen. Estis mirindega eksalto, nur malsaĝulo, frenezulo, povis provi tion; kaj Samĉjo, Andio, Halej, kun levataj manoj, spontane kriis.

La verdeta glacio sur kiun ŝi falis, krakis kaj sinkis sub ŝia pezo, sed ŝi ne haltis tie. Kun akraj krioj kaj nebridebla energio, ŝi sin ĵetas sur alian, poste sur alian glacion; ŝi stumblas, restariĝas, ŝanceliĝas, glitas, resaltas, denove impetas; ŝiaj ŝuoj foriris, ŝiaj ŝtrumpoj ŝiritaj; ŝia sango makulas ĉiun el ŝiaj paŝoj; ŝi rimarkas nenion, aŭdas nenion, sentas nenion, ĝis kiam, malklare, kvazaŭ en sonĝo, ŝi videtas la alian bordon, kaj viron kiu helpas ŝin surgrimpi ĝin.

- Brava knabino, kiu ajn vi estas ! Brava estulino ! Kriis la viro, sakrante.

Eliza rekonis la voĉon kaj trajtojn de farmisto kiu loĝis proksime de ŝia malnova domo.

- Ho ! Sinjoro Simeso ! Savi min, savi min, kaŝi min ! kriis Eliza.

- Kiel do ! Kiu estas ĉi tie ? He, sed ĉu ne estas la knabino de Ŝelbi[oj] ? diris la viro.

- Mia infano ! Ĉi tiu knabo ! Ili vendi lin ! Tie esti lia mastro, ŝi diris, montrante per la fingro la rando de Kentukio. Ho ! Sinjoro Simeso, ankaŭ vi, vi havi knabeton !

- Jes, mi havas unu, *diris la viro kiu per samtempe*

abrupta kaj tenera maniero, tiris ŝin supren de la kruta bordo. Cetere, vi estas kuraĝa knabino, kaj mi amas tion kio estas intensa.

Kiam ili atingis la altebenaĵon, la viro haltis :

- Mi estus kontenta fari ion por vi, sed mi ne havas tien kien meti vin. La sola helpo kiun mi povas doni al vi, estas konsili al vi iri tien ! *Kaj li montris al ŝi grandan blankan domon, flanke, en la domvicon de la ĉefa strato de la vilaĝo.* Iru tien, tie estas bonaj homoj tie; ne dubas ke ili helpos vin; ili kapablas pri tiaj aferoj.

- Disinjoro beni vin, diris Eliza fervore.

- Nedankinde, nedankinde, diris la bravulo, ĝi ja estas la malplej.

- Kaj, evidente, sinjoro, vi ne diri tion al iu !

- Mil tondroj ! Kiel vi konsideras min, knabino ? Certe ne. Nu, iru nun, kiel bona kaj brava kreitaĵo kiu vi estas. Vi ja gajnis vian liberecon, kaj vi havus ĝin se tio dependus de mi.

Eliza premis sian filon en siaj brakoj, kaj paŝis per firma kaj rapida paŝado. La viro restis por rigardi ŝin.

- Ŝelbi eble opinios ke ĉi tio ne estas ago de bona najbareco, sed kion fari ? Se li kaptus unu el miaj ulinoj en la sama situacio, vere, li estus bone inspirata kvitiĝi ! Ba ! Mi neniam kuraĝos vidi kompatindajn estulojn, iuj ajn, kuri, anheli sen spiro, kun hundoj tuŝe sekvantaj, kaj ekpartopreni mi ankaŭ kontraŭ ilin ! Vere, mi ne vidas kial mi ĉasus en la nomo de aliulo !

Tiel parolis ĉi tiu kompatinda loĝanto de Kentukio, vera pagano, nescianta siajn konstituciajn devojn, kristane aganta. Pli bone edukita, pli bone klerigita, li scintus pli bone konduti.

Halej, konsternita, restis senmova spektanto de la tuta sceno, ĝis kiam Eliza tute malaperis; tiam li turnis al Samĉjo kaj Andio sian elrevigitan vizaĝon kaj sian demandan okulon.

- Jen bela sortobato ! diris Samĉjo.

- Necesas ke la knabino havu sep diablojn en la korpo ! diris Halej. Ŝi saltegis kiel sovaĝa kato !

- Pardoni, bedaŭron, massa, rekomencis Samĉjo gratante al si la kapon, sed mi, ne tentata sekvi ŝian vojon, mi ne pensi esti sufiĉe vigla por tio !

Kaj la ripoj de la nigrulo ekskuiĝis pro lia raŭka rido.

- Vi strange ridas ! grumblis la komercisto.

- Dio beni vin, massa, ne ebli reteni ĝin, diris Samĉjo sin allasante al siaj tro longe detenitaj raviĝoj. Ŝi esti tiel amuza ! Ŝi salti ! Ŝi kuri. Kaj la glacio kraki, sinki ! Kaj puf ! Kaj pif ! Kaj spliŝ ! Kaj splaŝ ! Kiaj saltegoj ! Disinjoro, kiel ŝi iri !

Samĉjo kaj Andio eksplodis per senbridaj ridoj, kaj larmoj ŝprucis el iliaj okuloj.

- Mi ridigos vin inverse, sentaŭguloj ! diris Halej. Lia rajdovipo svingis ĉirkaŭ iliaj kapoj; ambaŭ pafiĝis, kaj rapidante supren de la riverrando, ili estis sur la selo antaŭ ol li atingis ilin.

- Bonan vesperon, massa, diris Samĉjo kun solena seriozeco; mi diveni mastrinon esti malkvieta pro Jerĉjo. Massa Halej ne plu bezoni nin. Neniam mastrino voli permesi al siaj ĉevaloj transiri ĉi-vespere per la ponto de Elnjo.

Donante ŝerceman pugnobato en la ripojn de Andio, li trote ekrajdis, sekvata de sia kamarado, kaj iliaj ridegoj formortis, forportitaj de la vespera brizo.

08. La Ĉassekvantoj de Homoj.

Krepuskiĝis kiam okazis la senespera forkuro. La grizeca nebulo kiu leviĝis de la rivero, envolvis Elizaⁿ kiam ŝi malaperis ĉe la supro de la riverrando, kaj kiam la ŝveligita, tumulta fluo, kaj la flosantaj glacioj starigis netranspaseblan baron inter la ĉasisto kaj lia predo. Malrapide, kun afliktita mieno, Halej reatingis la malgrandan tavernon por tie oportune konsideri tion kion fari. La gastigantino malfermis por li mallarĝan salonon, meblitan de ŝirpeco de tapiŝo, de tablo kovrita de brila nigra laktolo, kaj de kelkaj mizeraj seĝoj kun altaj dorsapogiloj el ligno. Super fummalpurigita krado, la kamenkapuĉo sin vestis per gipsobildoj kolorigitaj de akraj koloroj, kaj apude, kuŝiĝis benko el la plej malmolaj kaj el senmezura longo. Estis tie kie sin lokis Halej por ĝissate mediti pri la malstabileco de la homaj atendoj.

- Pro kio mi bezonis implikiĝi pri ĉi tiu malbeneto de infano, li diris al si, por igi min moki, trompi kaj esti kaptata kiel lavurso en la kuŝloko[13] !

Kaj Halej konsoliĝis per lavango da malbenoj al si mem, kiujn taŭgas kredi merititaj, sed kiujn, pro afero de gusto, ni permesos al ni preterlasi.

La laŭta kaj neharmonia voĉo de viro kiu deĉevaliĝis ĉe la pordo de la gastejo, eltiris la komerciston de sia monologo kaj ekĵetiĝante al la fenestro, li ekkriis :

- Ĉielo kaj tero, se tio ne estas ĝuste kvazaŭ providenco ! Antono Lokero persone, vere !

Halej tuj foriris. Antaŭ la verŝtablo staris sunbruna, fortmuskola viro, ses futoj *(+/-1,8m)* alte, proporcie larĝa, kaj al kiu lia surtuto el bubala haŭto, kun la felo ekstere, donis

13 Aludo al la maniero ĉasi per lavurso.

sovaĝan kaj teruran ŝajnon kiun lia fizionomio neniel malkonfirmis. Ĉiu organo, ĉiu trajto kiu povus esprimi brutalecon kaj perforton, atingis, sur ĉi tiu kranio kaj sur ĉi tiu vizaĝo, sian plej altan disvolviĝon. Se la leganto povas imagi buldogon transformitan al stato de homo, stariĝantan sur siaj malantaŭaj kruroj kaj promenantan kun mantelo kaj ĉapelo, li havas sufiĉe ĝustan ideon pri la aspekto de ĉi tiu persono. La viro estis akompanata de individuo kiu plej perfekte kontrastis kun li. Ĉi tiu lasta estis malalta kaj maldika; malrigida kaj hipokrita en sia tuta aspekto. El liaj nigraj okuletoj eliris rigardon de muso, akran, zorgoplenan, kun kiu akordiĝis la resto de liaj akrigitaj trajtoj, oni ne povas pli bone. Lia maldika nazo ŝajnis longiĝi por traserĉi kaj sondi ĉiujn aferojn, liaj nigraj, plataj, glataj kaj malabundaj haroj, tiritaj antaŭen, gluiĝis sur lia kranio, kaj ĉiuj liaj movoj, ĉiuj liaj evoluoj, antaŭsignis senfruktan kaj kalkuleman subtilaĵon. La granda dika viro verŝis al si duonglason da forta brando, kaj senvorte englutis ĝin per unu gluto. La malgranda maldikulo, piedpinte leviĝinta, promenigis sian nazon de unu flanko de la verŝtablo al la alia, flaris ĉiujn botelojn, kaj fine mendis, per malbone memfida voĉo de falseto, mentan julepon, kiun oni servis al li, kaj kiun li rigardis kun mieno de ruza memkontento, kiel homo kiu ĝuste trafis la aferon; poste li frande trinketis la trinkaĵon.

- He ! Vivu ! ekkriis Halej, kiu antaŭdirus al mi ĉi tiun bonŝancon ? Hola, Lokero, kiel vi fartas ? kaj li etendis la manon al la dikulo.

- Al diablo ! estis la ĝentila respondo. Kia hajla vento blovas vin ĉi tie, Halej ?

La ratulo, kiu nomiĝis Markso, kaj kiu trinketis per glutetoj en sia angulo, ekhaltis kaj fikse ĵetis al la novveninto spritan rigardon kiel tiun de la kato kiu atente observas la sekan folion, aŭ tute alian malgrandan moviĝan

objekton, kaj estas eksaltonta sur ĝin.

- Mi diras, Antono, ke ĉi tio estas ŝanco ! Mi estas en diabla embaraso, kaj mi vidas nur vin kiu kapablus eltiri min el tio.

- Plago ! Verŝajne ! grumblis lia kompleza interparolanto. Tiu kiu vi afable akceptas, ja povas ĵuri ke vi volas tiri profiton el li. Nu, ni vidu kien la muŝo pikas vin ?

- Kiun vi havas tie ? Ĉu amikon ? *demandis Halej kun iom da hezito, rigardante Markso*n, eble iun asociiton ?

- Jes ja ! Venu, Markso ! Jen mia malnova partnero de Naĉezo.

- Feliĉa fari vian konon, *kaj Markso etendis sian manon senkarnan kiel kruro de korvo*, sinjoro Halej, mi pensas ?

- Li mem, sinjoro, *diris Halej*, kaj kiu festos nian renkontiĝon per unu aŭ du glasoj da io varma. Hola ! Maljuna lavurso ! *li kriis al la viro ĉe la verŝotablo*, oni servu al ni varman akvon, sukeron, cigarojn kaj rumon, el la fama, ĉu vi aŭdas ! Laŭvole, kaj ni dibocu.

Rigardu ! La kandeloj brilas, la fajro vekiĝas, kaj la tri dignaj kunuloj estas altabliĝintaj ĉirkaŭ la necesaj akcesoraĵoj de iu ajn kunveno de siaj samideanoj.

Halej senatende sin ĵetis en la patosan rakonton pri siaj misaventuroj. Kun buŝo fermita, Lokero aŭskultis lin kun malgaja atento; Markso, profundiĝinta en la laŭvola miksado de nova trinkaĵo, sin deturnis por preskaŭ ŝovi siajn pintajn nazon kaj mentonon en la vizaĝon de la rakontanto, kies li ekzamenis ĉiun parolon. La konkludo ŝajnis senmezure ĝojigi lin, kaj liaj ŝultroj kaj ripoj ekskuiĝis pro interna rido kiu kuntiris liajn maldikajn lipojn.

- Do, jen vi kun la kapo en la sako ! Enprofundigita ! Hi ! Hi ! Hi ! la ŝerco estas bona !

- Ĉi tiuj buboj, reparolis Halej per veoplena tono, estas la pereo de la komerco !

- Se ni sukcesus trovi rason de virinoj kiuj ne zorgus pri idoj, mi diras ke tio estus la plej grava malkovro de la jarcento, *kaj Markso subtenis sian ŝercon per malsimpatia rikanado*.

- Prave, diris Halej. Mi neniam komprenis ! Ĉi tiuj etuloj donas al ili nur amason da laceco kaj turmento; ŝajnas ke ili devus esti kontentegaj liberiĝi de tio; nu ne ! Ju pli ido estas zorgodona kaj utila por nenio, des pli ili estas obstinemaj !

- Nu ! Sinjoro Halej, daŭrigis Markso, pasigu al mi iom da varma akvo. Jes, sinjoro, estas kiel vi diras; ni alvenis ĝis tie. Imagu ke iam, mi tiam komercis, mi aĉetis fortikan, plenkreskan knabinon, beletan senhontulinon, vere, kaj tre kapabla. Ĉu ŝi ne havis malsaneman infanon, rakitan, kriplan, kion mi scias ? Mi cedis la embrion al viro kiu kaptis la ŝancon eduki lin, ricevinte lin kontraŭ bagatelo. Mi ja ne estis pensanta ke la knabino freneziĝus pro tio, vi komprenas ! Sed, Disinjoro ! Mi dezirus ke vi estus vidanta ŝin ! Kia bruego ! Vere, ŝi ŝajnis ju pli ŝati la etulon des pli li estis malsanema, grumblema, vera plago post ŝi ! Kaj tio estis ververa ! Ŝi ploris, ŝi ĝemadis, ŝi sin ĵetis teren. Ŝajnintus ke ŝi perdis ĉion. Tamen, estas stranga afero, ĉi tiuj virinaj kapricoj ! Estas por sin perdi en ĝi.

- Ankaŭ mia rakonto, reparolis Halej. Ne pli frue ol la pasintan someron, sur la Ruĝa Rivero, mi aĉetis knabinon kaj ŝian infanon, bubon kun bona mieno, kun okuloj tiel brilaj kiel la viaj. Nu, ĉu li ne estis blinda ? sed, tute blinda ! Ne unu vorton, kompreneble, kaj mi belete interŝanĝis lin kontraŭ barelo da brando. Sed, kiam temis pri forpreni lin de la patrino; ho, ŝi estis vera tigrino ! Bedaŭrinde tio okazis antaŭ la foriro, kaj mia bando ne jam estis ĉenita. La virino ne hezitis, ŝi ekprenis tranĉilon de unu el la matrosoj, saltis kiel sovaĝa kato sur kotonan pakaĵon, kaj fuĝigas la

ĉeestantaron. Tio estis bona ĉe la momento, kompreneble. Kiam ŝi vidis tion, ŝi turniĝis, kaj, paf ! Ŝi sin ĵetis kapon antaŭen, kun infano kaj ĉio, en la riveron kie ŝi ankoraŭ troviĝas.

- Pa ! diris Antono Lokero kiu aŭskultis kun evidenta malestimo; vi ambaŭ estas nur eldorlotitoj ! Miaj knabinoj ne permesas al si tiajn malicaĵojn kun mi !

- Ĉu vere ? Kaj kiel vi malhelpas ilin, mi petegas vin ? vigle demandis Markso.

- Mi ! Kiam mi aĉetas knabinon, tuj kiam ŝia etulo estas matura por vendo, mi iras rekte al ŝi, mi metas al ŝi la pugnon sub la nazon : "Rigardu ĉi tiun pugnon, mi diras al ŝi, se vi kuraĝas suspiri, vi vidas tion kio platigos vian vizaĝon. Mi ne volas aŭdi vorton, ne la komencon de vorto. Ĉi tiu etulo estas mia, ne via, kaj vi tute ne bezonas zorgi pri li. Mi vendos lin ekde la unua okazo. Gardu vin ! Nenian komedion ! Aŭ mi igos vin deziri neniam esti naskiĝinta". Mi certigas vin ke ili scias ke ne temas pri ridado kiam mi tenegas ilin, kaj mi mutigas ilin kiel fiŝoj. Se estas unu kiu iom plorpepas, tiam ! … *La pugno de S^ro Lokero, peze malsuprenirante sur la tablon, finis sian frazon.*

- Jen tio kio nomiĝas elokventeco, diris Markso, ridante frapanta sur la ventron de Halej. Li estas originala, ĉi tiu Antono ! Hi, hi, hi ! Ni vetu ke ne ekzistas krispa kapo kiu ne komprenas, kiom ajn malmola ĝi estu ! Vere, Antono, vi ja scias penetrigi la aferojn en la cerbo, kaj se vi ne estas la diablo, certe vi estas lia kuzo !

Lokero akceptis la komplimenton laŭ taŭga modesteco, kaj ŝajnis tiel afabla kiel ebligis lia buldoga natureco. Koncerne Halej^on, kiu ne malevitis la alkoholaĵojn, li komencis senti en si pliintensiĝon de moraleco, fenomenon kiu ne estas malofta en tia cirkonstanco ĉe seriozaj kaj meditemaj viroj.

- Nun, Antono ! Nu, mi ĉiam diris al vi, vi estas tro

kruda ! Ni ofte kune babilis pri tio en Naĉezo; kaj, kiel mi multfoje pruvis tion al vi, iom domaĝante la varon, oni ne malpli sukcesas en ĉi tiu mondo, kaj oni konservas pli da ŝanco por la alia mondo, la plej malbona venas el la plej malbona, vi komprenas !

- Fi ! He, mi cetere vidas ! Ne estu rakontonta al mi ĉiujn viajn sentaŭgajn sensencaĵojn, Halej. Mi jam ne havas stomakon tro fortan, kaj tio estigas al mi naŭzojn. *Ĉesante paroli, Antono englutis duonglason da pura alkoholo*.

- Mi diras, *kaj klinante sin malantaŭen sur sia seĝo, Halej vigle gestadis*, kaj mi persiste asertas tion. Mi ĉiam daŭrigis mian komercon por fari tiom kiom kiu ajn, unue kaj unuatempe, monon. Sed la negocado ne estas ĉio; la mono ne estas ĉio; ni havas animojn, ĉiuj tiom kiom ni estas, ĉion enkalkulinte. Ne gravas ĉu ni ŝultrumas, mi havas mian opinion pri tio, kaj nenio malhelpos min diri tion. Mi havas religion, mi kredas al ĝi, kaj en ia venonta tago, kiam mi estos pliiganta mian malgrandan bieneton, mi serioze pensos pri mia animo. Kial fari sin pli aĉa ol konvene ? Ĉu tio estas prudente agi, mi demandas tion ?

- Zorgu pri via animo ! ripetis disdegne Antono. Fama nazumo, tiu kiu malkovrus la vian ! Ŝparu la frajton por ĉi tiu varo, Halej, kredu min. Se la diablo iam ekpensas kribri vin, mi vere defias lin trovi spuron de animo !

- Ha jen, Antono, vi estas tro kruda, ankaŭ ! Ĉu vi ne kapablas bone interpreti tion kion oni diras al vi nur por via bono !

- Do lasu iomete ripozi viajn makzelojn, Halej, kolerkriis Antono. Mi povas elteni ĉiujn viajn sensencaĵojn, krom viajn devotajn senspritaĵojn. Viaj predikoj tedegas min, mi diras al vi ! Kia malsimileco estas inter vi kaj mi, mi petas ? Ĉu vi havas iom pli da kompato, iom pli da honto aŭ da io ajn ? Estas bona, bela kaj pura malnoblaĵo por trompi la diablon

kaj savi vian haŭton. Ĉu vi kredas ke oni ne senmaskigas vin kun vian tutan religion, kiel vi nomas ĝin ? He ! Tio frapas la okulojn ! Afero por trompi la diablon, ricevi kvitancon kaj ne pagi.

- Nu, nu, sinjoroj, ne temas pri tio, diris Markso sin intermetante. Estas diversaj manieroj konsideri la aferojn. S^ro Halej estas skrupula viro, li havas sian konsciencon; kaj vi, Antono, vi havas vian sistemon, kaj bonan sistemon, Antono. Sed kvereloj nenion helpas. Nu, sinjoro Halej, pri kio temas ? Kapti por vi la knabinon, ĉu ne ?

- La knabino tute ne koncernas min, ŝi estas al la Ŝelbi^oj. Estas nur ŝian etulon kiun mi volas. Stultulo kiun mi estas pro esti aĉetinta la simion !

- He ! Kiam vi ne estas stulta ? diris Lokero abrupte.

- Nu, Antono, sufiĉe da ventopuŝoj, reparolis Markso lekante al si la lipojn. Vidu ! Jen sinjoro Halej kiu, mi sentas tion, estas sendanta nin sur bonan spuron. Nur restu trankvile, ĉi tiuj negocoj estas mia fako. Ĉi tiu knabino, sinjoro Halej, kia ŝi estas ?

- Ho ! Bela kaj blanka, tre bone edukita. Mi proponus al Ŝelbi inter okcent kaj mil dolaroj, kaj estis por gajni per ŝi.

- Blanka, bela, bone edukita ! *ripetis Markso, kaj liaj akraj okuloj, lia nazo, liaj lipoj akriĝis pro avideco*. Vidu iomete, Lokero, tio promesas ! Estas negoco por ni en ĝi. Ni entreprenas la ĉason; la infano iras al sinjoro Halej, tio estas klara; kaj ni kunkondukas la knabinon al Nov-Orleano por spekuli pri ŝi. Tio estas bela, ĉu ne ?

Antono, kies la pezaj makzeloj restis duonfermitaj dum ĉi tiu komunikado, subite refermis ilin, kvazaŭ li ekmordus en bonan manĝopecon, kaj pretiĝis por senhaste digesti la ideon.

- Komprenu, diris Markso al Halej daŭrigante kirli sian punĉon, ni havas laŭ la riverbordo kontentiĝemajn pacigajn juĝistojn, kiel necesas en nia profesio. Antono unue plenumas

la aferon, kaj energie frapas; poste, mi miavice alvenas, kiam temas ĵuri, bone vestita, kun lakitaj botoj, tute laŭ bona aspekto. Vi devus vidi, daŭrigis Markso ekkaptata de tre natura memestimo, kiel mia maniero malgravigas la aferojn ! Iutage mi estas s^ro Tŭikemo de Nov-Orleano; alifoje mi alvenas el mia plantejo ĉe la rando de la rivero kun Perloj, kie mi laborigas ĉirkaŭ sepcent negrojn; aŭ mi estas malproksima parenco de s^ro Henriko Clay, aŭ de iu alia maljuna moŝto de Kentukio. Ĉiu havas sian talenton en ĉi tiu mondo. Antono, vera leono kiam necesas pugni aŭ batali, tute ne valoras por mensogi. Ne, Antono neniam sukcesos, tio ne nature venas al li. Sed, per la ĉielo ! se estas en la distrikto, iu kiu povas ĵuri pri ĉio al ĉiuj homoj, rakonti la okazaĵojn, multigi la cirkonstancojn, fanfaroni kun pli serioza mieno kaj elturniĝi pli bone ol via servanto, mi estus kontentega vidi lin, kaj mi ne pli diras. Parolon mian ! Se mi ne kredas min certan por dubigi miajn juĝistojn, eĉ se ili fariĝus skrupulaj. Mi ŝatus tion, vere, la farso havus pli da valoro : tio estus pli amuza.

Antono Lokero kiu, ni povis vidi tion, estis malrapida pri kompreno, peza pri moviĝo, interrompis ĉi tie Marksoⁿ, donante al la tablo pugnobaton kiu saltigis la glasojn : "Sufiĉos !" li ekkrris.

- Dio benu vin, Antono ! Ne rompigu la vazaron ! Destinu vian pugnon por okazoj de urĝo.

- Sed, sinjoroj, ĉu mi ne havos parton de la profito ? demandis Halej.

- Kion ! Ĉu ne sufiĉas ke ni kaptus la infanon por vi ? Kion vi ankoraŭ bezonas ? diris Lokero.

- He ! Ĉu ne estas mi kiu donis la ĉasaĵon por persekuti ? Tio valoras ion, mi supozas. Dek procentojn el la profitoj, ĉiuj elspezoj deprenitaj. Nu !

- Ĉifoje ! ekkriis Lokero kun timiga sakraĵo kaj preskaŭ frakasante la tablon, vi estas bone, vi, Danielo Halej ! Ha !

Vi pretendas afekti grandsinjoron kun mi ! Ni faros nin ĉaspelantoj de fuĝintaj sklavoj, Markso kaj mi, por la belaj okuloj de ĝentlemanoj el via speco, kaj plie senpage ! Ne, per ĉiuj diabloj ! La knabino estas por nia konto, kaj tenu vin trankvile, aŭ ni gardos la du. Kiu malhelpas ? Vi montris al ni la ĉasaĵon, konsentite; dependas de vi krome postkuri, kaj ankaŭ de ni, mi supozas. Se plaĉas al vi aŭ al Ŝelbi procesi kontraŭ ni, tiel estu. Bonege serĉu kie estas la perdrikoj de la pasinta jaro, vi eble trovos nin sub iliaj flugiloj.

- Nu ! Bonege ! Kiel konsentite, diris Halej alarmita, vi kompense kaptos por mi la knabon. Ni kune faris multajn aferojn, Antono; vi ĉiam lojale agis kontraŭ mi, kaj mi scias ke vi estas honestulo.

- Ha ! Vi scias tion ! Mi ja ne falas en ĉiujn viajn afektaĵojn; sed mi estas ekzakta en miaj kontoj, eĉ kun la diablo mem. Tion kion mi diras, mi faras, kaj faros, vi scias tion, Danielo Halej !

- Tiel dirite, tiel farite. Antono, vi promesas demeti la infanon, plej malfrue post ok tagoj, ĉe la loko kiun vi mem indikos, kaj mi konsideras min kontenta.

- Jes ja ! Sed ne mi, kaj vi treege eraras. Ne estas vane ke mi tiom longe faris negocojn kun vi, Halej, tie en Naĉezo. Mi lernis ne malteni la angilon kiam mi ĝin tenas; vi estas tuj elspezonta al mi, sur la tablo, kvindek dolarojn, aŭ neniun infanon.

- Kiel ! Kiam vi havos sub la mano, grandiozan aferon, kiu gajnigas al vi klare kaj certe inter mil kaj mil ses cent dolaroj ! Ha ! Antono ! Vi ne estas konvena.

- Vere ! Kaj ĉu ni ne havas pli ol kvin semajnojn da laboro skribita en niaj libroj ? Pli ol ni kapablos fari. Supozu ke ni nun forlasus ĉion por ĉien serĉadi vian bubon, kaj rezulte ni kaptus nek la infanon nek la patrinon ! Ĉiam estas malfacile kapti ĉi tiuj knabinoj. Jen ni en malbona situacio !

Ĉu vi kompense pagus al ni speson ?

- Ŝajnas al mi ke viaj intencoj klare aperas, he ! Ne, ne, prezentu al mi ĉi supre viajn kvindek dolarojn. Se la ĉasaĵo estas nia kaj ke ĝi respondas, la mono estos redonita; alie ĝi estas por niaj klopodoj. Ĉu tio estas agi lojale ? Hej ! Markso ?

- Certe, certe, diris ĉi-lasta per konsentema tono, simpla garantio de honorario, jen ĉio. Hi hi hi ! Ni estas iom leĝistoj, sed ne malpli bonaj infanoj pro tio. Do jen ni en akordo. Antono demetos la infanon kien vi volos, ĉu ne, Antono ?

- Se mi ekkaptas la bubon, mi kunkondukos lin al Cincinatio, kaj mi lasos lin ĉe avino Belŝu de la elŝipejo, diris Lokero.

Markso estis elpreninta el sia poŝo agendon makulitan de graso, el kiu li eltiris longan paperon. Kun la kapo en la manoj, fikse rigardante sian liston per siaj akraj nigraj okuloj, li murmuris ĝian enhavon inter siaj dentoj :

- *He ! Barnes (distrikto de Ŝelbi), lia knabo Ĵakĉjo; tricent dolaroj por li, vive aŭ morte.*
- *Eduardo, Rikĉjo kaj Lucia, geedzoj, sescent dolaroj.*
- *La negrino Paola, kun du infanoj, sescent; ŝi aŭ ŝia kapo.*

- Mi tralegas la agendon por vidi ĉu la afero povas esti tuj prizorgata, li diris, interrompante sian legadon. Lokero, li reparolis post paŭzo, se ni transdonus la Paola[n] al Adamso kaj Springero ? Jen longtempe ke ŝi estas en la poŝlibreto.

- Ili postulos tro multekoste, murmuris Antono.

- Mi aranĝos la aferon al konvena prezo. Ili komencas kaj devas fariĝi pli indulgemaj. Ni vidu ! Estas du aŭ tri facilaj kazoj : kutima laboro, fusilpafo pafita al la fuĝantoj; kaptas kiu povas, kaj necesos nur ĵuri ke ili estas mortigitaj. Oni ne povus multe pagigi tion. La aliaj mendoj atendos. Nun ni alvenu al la detaloj. Vi do diras, sinjoro Halej, ke vi vidis

la knabinon grimpi ĉe la alia flanko ?

- Certe; vidinta kiel mi vidas vin.

- Kaj viro helpis ŝin grimpi ? aldonis Lokero.

- Certege, mi vidis lin.

- Ŝi estas akceptita ie, tio ne estas duba, reporolis Markso; sed kie ? Tio estas la demando. Kion vi diras pri tio, Antono ?

- Ĉu mi ? Mi diras ke necesas transiri la riveron ĉi-vespere, kaj sen heziti.

- Estas tute neniu boato, kaj la akvo diable flutransportas ! Ĉu tio ne estas danĝera, Antono ?

- Mi nenion scias; ĉio kion mi scias, estas ke necesas trairi.

- Diable ! reparolis Markso nervoziĝante, kaj proksimiĝante al la fenestro, li aldonis : Tio estas nigra kiel faŭko de lupo ! Hej, Antono !

- Ĉio kaj ĝia malo, tio estas ke vi timas, Markso. Sed mi ne povas helpi vin, necesas antaŭeniri. Prenu unu aŭ du tagojn de ripozo, vi donas al ili tempon, kun iliaj subteraj manovroj, foririgi la knabinon ĝis Sanduskio, kaj ŝi iros al vi preter la buŝon.

- Ho ! Mi ne havas ombron de timo, diris Markso, nur...

- Nur kio ? demandis Antono.

- La pramo, evidente ! Vi vidas ke ne estas boatoj.

- La gastigantino diris ke estus unu ĉi-vespere. Iu boatisto devas transiri. Ni riskos nian kolon kaj transiros kun li, daŭrigis Antono.

- Vi sendube havas hundojn, diris Halej.

- El la unua kvalito, rebatis Markso. Sed por kio ? Ni havas nenion por flarigi ilin.

- Se vere ! ekkriis Halej kun triumfa mieno. Mi havas ĉi tie ŝian ŝalon forgesitan sur la lito dum ŝia hasto, kaj ŝi ankaŭ lasis sian ĉapelon.

- Vera ŝanco ! diris Lokero. Etendu por mi ĉi tiujn ĉifonaĵojn.

- Tamen atentu la hundojn, observigis Halej, ili povus, se ni agas sen antaŭzorgo, grave difekti la artiklon.

- Tio estas konsiderinda, respondis Markso. La alian tagon en Mobilo, ĉu niaj hundoj ne dispecigis negron pli ol duone antaŭ ol ni sukcesis forkapti lin de ili !

- Necesas atentegi, precipe rilate al artikloj venditaj pro ilia beleco, komprenu !

- Mi tre bone komprenas, Halej, rebatis Markso. Poste, se la knabino estas loĝigita, la hundoj fariĝas senutilaj. Ili cetere malmulte valoras en viaj nordaj ŝtatoj, kie ĉi tiuj estuloj estas veturigitaj. Tio ne plu estas kiel en niaj plantejoj, kie la negro kiu fuĝas, utiligas nur siajn krurojn, kaj tute ne estas helpata.

- Nu, *diris Lokero kiu estis irinta informiĝi ĉe la verŝotablo*, la viro alvenas kun la boato. Ek, Markso !

Ĉi-lasta, kompatinda viro, ĵetis malĝojan rigardon al la komfortaj loĝejoj kiujn li devis postlasi, kaj malrapide staris por obei. Post interŝanĝinte kelkajn vortojn pri la postaj aranĝoj kun la du partneroj, Halej elspezis, ne sen videbla malemo, la interkonsentitajn kvindek dolarojn, kaj la digna trio disiĝis.

Se la delikateco de iuj el niaj kristanaj legantoj sin trovas ŝokita de la socio en kiu ĉi tiu sceno ĵus enkondukis ilin, ke ili bonvolu silentigi siajn antaŭjuĝojn kaj prokrasti siajn skrupulojn. La metio de sklavĉaspelistoj kreskas, kaj promesas dank'al la nova leĝo, iam esti honorinda, patriota kaj laŭleĝa profesio. Se la tuta larĝa teritorio kiu etendiĝas de Misisipo ĝis Pacifiko, fariĝas vasta bazaro por la debito de korpoj kaj animoj, kaj ke la varo konservas la moveblecon kiun trudas al ĝi la deknaŭan jarcenton, la komercisto kaj la ĉaspelisto de sklavoj povus altiĝi en la usona aristokrataro.

09. La Eskapado.

Samĉjo kaj Andio revenis al la loĝejo, tre ĝojegaj, dum ĉi tiu sceno okazis en la gastejo. Samĉjo ne kapablis sin deteni de ĝojo. Liaj ekzaltiĝoj eksteriĝis per ĉiaj specoj de kriadoj, de strangaj interjekcioj, de senkoheraj movoj kaj de absurdaj tordiĝoj. Foje li kontraŭsence sidis, kun vizaĝo turninta al la vosto kaj la gropo de la ĉevalo; subite li eligis triumfan krion, kaj transkapiĝo remetis lin bondirekte sur la selo. Tiam longigante malafablan vizaĝon, li admonis Andion per deklama tono, pri maldecaj mokridoj kiujn permesis al si la senpripensulo. Poste li tuj batis al si la flankojn per siaj brakoj, kaj sin fordonis al tondroj da ridadoj kiuj igis brui la arbaro. Tra ĉiuj ĉi evoluoj li sukcesis teni la ĉevalojn galopegantajn, kaj inter la deka kaj la dekunua, iliaj hufoj sonis sur la gruzo de la korto.

Sinjorino Ŝelbi sin pafis al la balkono.

- Ĉu estas vi, Samĉjo ? Kie ili estas ?

- Massa Halej esti por ripozi en la taverno; li, tre laca, ha ! Lacega, mastrino !

- Sed Eliza ! Samĉjo ?

- He ! He ! Jordano esti preterpasita, ŝi gajni, kiel oni diras, la landon de Kanaano.

- Kion ? Kion vi volas diri, Samĉjo ?

Kaj perdante la spiron pro la ideo kiun ĉi tiuj paroloj vekis, sinjorino Ŝelbi sentis sin sveneti.

- Disinjoro protekti la siajn, mastrino ! Elnjo atingi Ohion[14], trans la rivero, kvazaŭ Disinjoro forporti ŝin en sia

14 La ŝtato kie sklaveco ne ekzistas, kaj kiu estas apartigita de Kentukio de la samnoma rivero. Laŭ la leĝo ofte menciita en ĉi tiu libro, estas nun ekstradicio de sklavoj el la libera ŝtato kie ili rifuĝis, al la ŝtato el kiu ili fuĝis. Estas nur en Kanado, iama franca lando, ke nigraj fuĝantoj povas kredi sin sekuraj.

fajra ĉaro jungita de du blankaj ĉevaloj.

La religia inspiro de Samĉjo ĉiam ekzaltiĝanta en la ĉeesto de sia mastrino, li ofte elmontris antaŭ ŝi citaĵojn kaj bildojn eltiritajn el la sanktaj skriboj.

- Venu supren, Samĉjo, diris s^ro Ŝelbi antaŭenpaŝante sur la verandon, kaj venu respondi al via mastrino. Nu ! Nu ! Emilia, vi malvarmiĝas. Jen vi tute frostiĝinta; vi ja lasas vin tro kortuŝi, kara mia !

- Tro multe ! Ĉu mi ne estas virino ? Ĉu mi ne estas patrino ? Kaj ĉu ni ambaŭ ne respondos al Dio pri ĉi tiu kompatinda knabino ! Dio mia ! Dio mia ! Ĉi tiu peko ne falu sur niajn kapojn !

- Kia peko, Emilia ? Vi scias tion, ni nur faris tion kion ni pozitive devigis fari.

- Tute egale ! Estas funde de ĉio ĉi, konfuza krimsento kiun mi vane klopodas rezonadi.

- Ĉi tie, Andio, vi, negrido ! Lerte kaj rapide ! kriis Samĉjo sub la verando. Enstaligi la ĉevalojn, kaj rapide ! Ĉu vi ne aŭdi mastron voki min ? *Kaj Samĉjo preskaŭ tuj aperis en la salonon, kun sia kapvesto el folioj en la mano.*

- Nu, Samĉjo, klare diru al ni tion kio okazis. Kie estas Eliza, se vi scias tion ?

- Nu, mastro, mi vidi ŝin, per miaj okuloj vidi, transiri sur la flosantajn glaciojn. Tamen rimarkinde ! Nek pli, nek malpli ol miraklo, kaj mi vidi viron helpi Elnjo^n grimpi al la flanko de Ohio, poste nokto veni, kaj nenion pli vidi.

- Samĉjo, via miraklo ŝajnas al mi iom apokrifa. Vojaĝi sur flosantaj glacioj ne estas facila afero.

- Facile ! Neniu fari tion sen helpo de Disinjoro ! Jen, mastro, la afero tute detale. Massa Halej, mi kaj Andio, preskaŭ alveni al la malgranda taverno, ĉe la kurbo en la rivero, mi iomete antaŭe, ne kapabla deteni min, tro fervora por atingi Elnjo^n. Kiam mi, rekte antaŭen, vidi ŝin ĉe la

fenestro de la taverno; la aliaj esti ne for ! Paf ! Jen mia ĉapelo kiu foriĝi, kaj mi kriegi por revigligi mortinton. Elnjo, estas klare, aŭdi kaj elŝteliĝi. Pa ! Ĝuste kiam ŝi forkuri al la rivero, massa Halej preterpasi antaŭ la pordego, ekvidi ŝin, bleki al ŝi, kaj li, mi, Andio, persekuti Elnjo^{n}. Ŝi, kuri ĝis la rando. Tie, forta fluo, dek futojn *(± 3m)* larĝa, transe, dikaj glacioj kunbatiĝi, kolizii, brui ĉiujn kune; kvazaŭ granda moviĝema insulo. Kaj ni tuj post ŝi; mi vere kredi ŝin kaptitan, ĵure ! Sed la krio kiun ŝi eligi ! Neniam aŭdi ion similan ! Kaj vidi ŝin, subite trans la fluon, sur la glacioj, iri ! iri ! kriante ! Saltante ! Iu glacio fari krakon ! Ŝi esti en la aero. Krak, alia glacio, ŝi resalti ! Vera kapreolo ! Disinjoro, ĉu esti risorto en ĉi tiu kreitaĵo ! Ĉu tio esti ! Esti por ne kredi tion !

Sinjorino Ŝelbi restis senmova, muta, pala pro emocio, dum la tuta rakonto de Samĉjo.

- Laŭdatu Dio ! ŝi finfine diris, ŝi ne mortis. Sed nun kie estas la kompatinda infano !

- Disinjoro zorgi ŝin ! diris Samĉjo pie ruligante siajn levitajn pupilojn. Mi ĉiam diri, Providenco esti. Mastrino bone instrui nin : la instrumentoj esti tute pretaj por plenumi la volon de Disinjoro. Nu ĝuste, sen mi, kompatinda instrumenteto, Elnjo esti kaptita dekduon da fojoj. Kiu ellasi la ĉevalojn ĉi-matene kaj konduki ilin ĉasantaj ĝis preskaŭ la tagmanĝo ? Samĉjo. Kiu promenigi massa^{n} Halej^{on}, kvin mejlojn *(+/- 8Km)* ekster la rekta vojo, ĝis la nebuliĝo ? Samĉjo ! Alie massa Halej surfalis sur Elnjo^{n}, kiel hundo sur lavurson. Jen providencoj !

- Mi konsilas al vi, majstro Samĉjo, fariĝi pli sobra pri tiaj providencoj. Mi ne postulas ke ĝentlemanoj estu tiel azenigataj ĉe mi, diris s^{ro} Ŝelbi kun tiom da severeco kiom li povu trovi por la okazo.

Sed ne estas pli facile fitrakti nigrulon ol infanon pere

de ŝajniga kolero. Ambaŭ klare vidas la veron de aferoj tra la mensogaj eksteraĵoj, kaj Samĉjo estis neniel embarasita pro la riproĉo, kvankam li opiniis konvene afekti ploreman seriozecon kaj lasi pendi siajn lipangulojn kiel signo de bedaŭro.

- Mastro pravi, tute pravi. Tre aĉa de mi, ne ebli nei; kaj mastro kaj mastrino ne kuraĝigi tion. Sed kompatinda nigrulo tre tentita fari malicaĵon al tiuj senvaloraj homoj kiuj mieni kiel ĉi tiu massa Halej. Samĉjo sufiĉe bonedukita por vidi lin tute ne ĝentlemano.

- Nu, Samĉjo, diris sinjorino Ŝelbi, ĉar vi ŝajnas al mi profunde senti viajn misojn, vi povas malsupreniri al la kuirejo, kaj diri al onklino Kleo doni al vi tranĉaĵon el la ŝinko kiun oni demetis hodiaŭ. Vi kaj Andio devas esti malsategaj.

"Mastrino, vere tro bona por ni", respondis Samĉjo; kaj viglete salutanta, li malaperis.

Ni vidas, kaj ni diris tion, ke Samĉjo posedis naturan talenton kiu, laŭ politika linio, sukcese kaj alten pelintus lin. Li kapablis kapitaligi, honore kaj glore al si, ĉion kio okazis bone. Estante, li almenaŭ sin flatis pri tio, pufreklaminta laŭ la kontento de la ĉirkaŭantaro, sian piecon kaj sian humilecon, li konkereme lokis sian palmfolion sur sia kapo kaj direktis sin al la fako de onklino Kleo, decidita famigi sin en la kuirejo.

- Mi tien iomete paroladi kun tiuj nigruloj, diris Samĉjo al si, nun kiam mi havi ŝancon. Disinjoro ! Se mi ne blindigi ilin per vortoj !

Unu el la grandaj ĝuoj de la vivo de Samĉjo estis akompani sian mastron al ĉiuspecaj politikaj kunvenoj. Rajde sur balustrado, aŭ sidante sur iun arbon, li ĝojege pasigis tutajn horojn observante, aŭskultante la oratorojn. Poste malsuprenirante inter siaj fratoj, el diversaj nuancoj, kunigintaj pro la sama okazo, li admonis ilin, delektis ilin per

la plej burleskaj, la plej ridindaj imitadoj, eldiritaj laŭ nekonsternebla seriozeco, soleneco el la plej distraj. Kvankam lia proksima aŭskultantaro ĝenerale konsistis el nigruloj, ofte troviĝis tie sufiĉe impona ĉirkaŭularo da individuoj el pli helaj vizaĝkoloroj, kiuj aŭskultis, ridis, palpebrumis, je la neesprimebla orgojlo de Samĉjo. Fakte, konvinkita pri sia oratora alvokiĝo, li kaptis ĉiun okazon por plene liberellasi sian elokventon.

Sed inter Samĉjo kaj onklino Kleo de ĉiam ekzistis ia kronika milito, aŭ pli ĝuste forta malvarmeco. Ĉifoje la interesoj de Samĉjo estantaj entenitaj en la fako de la proviantoj, li opiniis saĝa sin montri akordiĝema. Certa ke la ordonoj de mastrino estus ĉiam strikte plenumataj, li deziris ke la spirito vivigu kaj pligrandigu ĝian efektivigon. Li do aperis antaŭ onklino Kleo kun kortuŝa esprimo de rezigno kaj sufero, kiel viro kiu ĵus eltenis nekredeblajn laciĝojn por la defendo de la premata senkulpeco. Li lerte rakontis la okazaĵojn, kaj diris ke mastrino sendis lin al onklino Kleo por ke ŝi reĝustigu la interrompitan ekvilibron inter liaj solidoj kaj liaj fluidoj. Li tiel eksplicite malkontestis la rajtojn kaj la superregecon de la kuiristino en la tuta vasteco de ŝiaj kampoj.

La afero perfekte sukcesis. Neniam naiva voĉdonanto, kaĵolita de politika kandidato, estis pli facile gajnita ol onklino Kleo de la milda elokvento de Samĉjo. Eĉ se li estus la malŝparema filo, li ne povus esti ricevita kun pli da patrina malavareco.

Senprokraste, li glore sin trovis sida antaŭ larĝa kaserolo garnita per *olla podrida*[15] el restaĵoj de ĉio kio estis servita sur la tablo de la gemastroj ekde du aŭ tri tagoj : frandaj pecoj de ŝinko, oraj blokoj de maizkukoj, trianguloj de pasteĉoj je ĉiuj ampleksoj, flugiloj kaj kropoj

15 Hispana plado enhavanta ĉiajn viandojn.

de kokidoj, ĉio en pitoreska konfuzo. Kaj Samĉjo, monarko de ĉi tiu festeno, gajmiene sidis kun sia flankenfaldita palmfolio, kaj protektis Andio^{n}, lokitan ĉe sia dekstro.

La kuirejo pleniĝis de kamaradoj alkurintaj de ĉiuj kabanoj por aŭdi la finon de la tagaj heroaĵoj. Estis la horo de la triumfo de Samĉjo. La historio estis ripetita kun ĉiaj ornamaĵoj kaj disvolvadoj. Samĉjo tute ne maltrafis oportunecon por ĉio kio povis plibeligi la efekton. Kiel la lertuloj, li tute ne intencis lasi la rakonton perdi sian brilon trapasante sur liajn lipojn. Ridaj muĝadoj akompanis lian rakonton, kaj estis baldaŭ reprenitaj kaj pluigitaj, kun ĝojaj kriadoj, de la tuta sengravularo kiu svarmis sur la planko aŭ lokiĝis en ĉiu anguleto. Sed meze de la bruego, de la eksplodoj, de la ekzaltiĝoj, Samĉjo gardis sian neŝanĝeblan seriozecon; nur li foje ruladis siajn okulojn duonlevitajn al la ĉielo, aŭ flanken okulumis al siaj plej amuzaj aŭskultantoj, sed cetere sen perdi ion el la pompa alteco de sia elparolado.

- Vi, samurbanoj kaj amikoj, li diris, energie svingante femuraĵon de meleagro, vi nun vidi la aferon. Mi, via infano, defendi vin ĉiujn, jes, ĉiujn ! Preni unu, ĉu ne esti kiel preni ĉiujn aliajn ? Vi kompreni, la sama principo, ĉu esti klare ? Ke unu el tiuj homĉasistoj veni flari ĉi ĉirkaŭen ! Li trovi min, Samĉjo^{n} ! Mi subteni vin ĉiujn, fratojn, mi defendi viajn rajtojn, mi defendi vin ĝis la lasta spiro !

- Kiel tio esti, Samĉjo ? interrompis Andio, ĉimatene, vi diri voli kapti Elnjo^{n} por massa, tutcerte. Viaj du parolmanieroj ne esti samaj !

- Aŭskulti, etulo, reparolis Samĉjo kun miriga supereco, vi ne babili kiam vi ne scii, ĉu vi kompreni ? Infanoj kiel vi, Andio, plenaj de bonvoloj, bonaj knaboj ! Sed ili ne kapabli eniri en la koluzion de la principo de aferoj.

Andio ŝajnis dispremita, ĉefe de la impona vorto koluzio kiu malfermigis rondajn okulojn al la junaj anoj de la

kunveno, kaj ŝajnis al ili senreplika argumento.

- Esti pro pura konscienco, Andio, ke mi voli kapti Elnjoⁿ. Mi ankaŭ kredi mastron sur ŝia spuro, sed kiam mi vidi mastrinon tute kontraŭe, konscienco tiam pli forta flanke de mastrino. Tutsimple, esti al la plej bona flanko ! Vi vidi min ĉiam persisti en mia opinio, neniam cedi pri konscienco kaj principoj. Super ĉio, la principoj ! *ekkriis Samĉjo, avide ŝirante per siaj blankaj dentoj kolaĵon de kokido*. Kaj kial principoj sen persisteco ? Mi demandi tion, kial do ? Jen, Andio, vi skrapi ĉi tiun oston; ankoraŭ bona viando poste.

La aŭskultantaro de Samĉjo restanta kun malfermita buŝo, li ne povis fari pli bone ol daŭrigi.

- Vi eble ne kompreni, amikoj kaj fratoj nigruloj, *daŭrigis Samĉjo, enprofundiĝante en la abstraktajn profundecojn de sia temo*, vi ne kompreni tion kion esti persisteco ? Afero ne ĉiam klara ja al ni. Jen, kiam iu voli hodiaŭ aferon, kaj morgaŭ la malon de ĉi tiu afero, la homoj diri ne persista. Esti nature, ili diri tion. - *Pasigu al mi tiun pecon da kuko, Andio*. - Sed ni vidi iomete en la fundo de la afero. Mi esperi la ĝentlemanojn kaj la belan sekson bonvoli senkulpigi min fari komparon. Mi, Samĉjo, voli grimpi tien sur stakon; nu, mi, Samĉjo, meti mian ŝtupetaron ĉiflanken. La ŝtupetaro ne bone stari ? Mi metis ĝin ĉe la alian flankon. Ĉu mi ne esti persista ? Mi, ĉiam voli grimpi super la stakon ! Ĉu vi ne vidi tion, vi ja ?

- Esti via sola persisteco, kompreneble, diris onklino Kleo malĝojigita de la vespera festeno kiu, laŭ la komparo de la Skribo, similis al ŝi kiel vinagro sur salpetro.

- Jes, vere, ekkriis Samĉjo superabundanta je manĝaĵoj kaj je gloro, kaj stariĝante por la parolfino : jes, kunuloj kaj fratoj, kaj ĝenerale sinjorinoj el alia sekso, mi havi principojn. Mi fanfaroni pri ilin, ili persisti ĝis ĉi tago kaj

ĉiutage. Mi havi principojn kaj mi alkroĉiĝas al ili. Tuj kiam Samĉjo pensi ke principo ĉeesti, Samĉjo kuri al ĝi. Oni povi bruligi Samĉjo^{n} tute vivan, Samĉjo kuri al la fosto. Samĉjo iri kaj diri : Ĉi tie mi veni, mi, Samĉjo, verŝi mian lastan sangon pro miaj principoj, por mia patrujo kaj por la ĝeneralaj interesoj de la socio.

- Nu, reparolis onklino Kleo, ke unu el viaj principoj estu iri enlitiĝi, kaj rapide ! Ĉu vi plani teni ilin tie dum la tuta nokto ? Nun al vi ja, fiularo ! Tiu kiu ne voli esti batata devi nur foriri kiel eble plej frue.

- Nigruloj ! Kaj vi ĉiuj, *diris Samĉjo svinganta sian palmfolion, majeste salutante* : Mi beni vin ĉiujn ! Iri al viaj litoj, kaj esti saĝaj !

Provizita per ĉi tiu patosa beno, la ĉeestantaro disiĝis.

10. De kie evidentas ke senatano estas nur homo.

La brilo de gaja fajro, reflektiĝanta sur la tasoj kaj la brilanta tekruĉo, gaje lumigis la fajrujon kaj la tapiŝon de la ĉarma malgranda salono kie senatano Birdo demetis siajn botojn, antaŭ ol enŝovi siajn piedojn en la komfortajn pantoflojn kiujn, dum la kunsido de la Kongreso, lia edzino ĵus brodis por li.

Sinjorino Birdo kun ravita mieno, prizorgante la aranĝojn de la tablo, disdonis tie kaj tie kelkajn atentigojn al aro da petolemaj etuloj ĵetintaj en ĉiaj senzorgaj kaprioloj kaj malicetoj kiuj, ekde la diluvo, tiel konstante mirigas la patrinojn.

- Tomjo, lasu trankvile la pordotenilon. Bone ! Jen bona knabo ! Mariana, Mariana, ne tiru la voston de la kato, kompatinda kateto ! Ĵakĉjo, necesas ne grimpi sur la tablon, ne, tute ne, tute ne ! Tio estas tiel bona surprizo por ni ĉiuj havi vin ĉi tie ĉi-vespere ! ŝi fine diris al sia edzo tuj kiam ŝi trovis la momenton.

- Jes, jes, mi pensis ke mi havis nur tempon por veni ripozi dum vespero apud vi, kaj pasigi en la loĝejo trankvilan nokton. Mi estas lacega ! Mi sentas kapdoloron !

S^{ino} Birdo turnis la okulojn al la flakono da kamforo kiun lasu videti duonmalfermita ŝranko. Ŝi stariĝis, S^{ro} Birdo haltigis ŝin.

- Ne, ne, Maria, neniajn drogojn ! Iun tason da via teo, bone varma, kaj kelkajn horojn de kvieteco en la loĝejo, jen ĉio kion mi volas. Fari leĝojn estas, vere, malfacila tasko !

Kaj la senatano ridetis, feliĉa sin konsideri kiel viktimon oferitan al la patrujo.

- Nu, diris lia edzino kiam ŝiaj okupoj ĉirkaŭ la tablo komencis malrapidiĝi, kion ili faris en la senato ?

Nu, maltrankviligi al si la kapon pri la aferoj de la leĝfaraj ĉambroj estis senekzempla afero por la dolĉa malgranda s^ino Birdo, tio kio okazis en la ŝiaj cetere sufiĉis por okupi ŝin. S^ro Birdo do larĝe malfermis la okulojn, dum li respondis al ŝi : "Nenio tre grava".

- Bone ! Do ĉu ne estas vere ke oni faris leĝon por malpermesi doni trinkaĵon kaj manĝon al la kompatindaj neblankuloj kiuj preterpasas ĉi tie ? Oni asertis ke temis pri io simila; neniam kristana asembleo akceptus tian leĝon !

- He sed, Maria, vi komencas en politiko !

- Kia frenezaĵo ! Certe ne, mi ne zorgas pri ĉiuj viaj longaj paroladoj; sed tio ja estus kruela, malpia afero, vere ! Kaj mi esperas, kara mia, ke nenio tia okazis.

- Ni sankciis leĝon kiu malpermesas helpi forkurantajn sklavojn kiuj alvenas al ni de Kentukio, kara mia. Ĉi tiuj frenezoj de abolistoj tiom faris ke niaj fratoj de Kentukio ekzaltiĝis, kaj ŝajnis necese, kaj ne malpli saĝa ol kristana, fari ion ĉi-flanke de Ohiorivero por kvietigi la ekscitiĝon.

- Kaj kion do ĝi diras, ĉi tiu leĝo ? Ĝi ne malpermesas al ni, mi esperas, nokte gastigi kompatindajn estulojn, doni al ili bonan manĝon, kelkajn malnovajn vestaĉojn, kaj poste resendi ilin pace al ilia afero ?

- Kiel ? Sed jes, kara mia. Estus helpi ilin kaj fari sin iliajn komplicojn.

S^ino Birdo estis malgranda virino malpli ol kvarfute alta *(+/-1,2m)*, kun mildaj bluaj okuloj, persikflora vizaĝkoloro, timema, ruĝiĝanta, kun belsona voĉo. Koncerne la kuraĝo, oni sciis ke la klukado de meleagro iam fuĝigis ŝin, kaj mezstatura hundo, por teni ŝin malproksime, devis nur montri al ŝi la dentojn. Ŝia edzo, ŝiaj infanoj, estis ŝia mondo, kiun ŝi regis per tenereco kaj preĝoj, ne per

rezonado aŭ aŭtoritato. Unu sola afero povis ribeligi ĉi tiun mildan kaj simpatian naturon; la plej eta ŝajno de krueleco vekis en ŝi neatenditan, subitan koleron, tute eksterproporcie al ŝia delikata kaj tenera humoro. Ŝi fakte estis la plej indulga patrino, la plej rapida por pardoni, kaj tamen ŝiaj knaboj tute ne intencis forgesi iun korektadon kiun ŝi uzis al ili, pro tio ke ŝi trovis ilin, en la kompanio de kelkaj bubetoj de la ĉirkaŭaĵo, ŝtonumante malfeliĉan kateton.

- Vere, diris la unuenaskito, mi ankoraŭ portas la spurojn. Patrino venis al mi kiel furiozulino, kaj mi estis vipita kaj ĵetita en la liton sen vespermanĝo, antaŭ ol demandi kial. Poste mi aŭdis patrinon plori malantaŭ la pordo, tio kio doloris min pli ol ĉio. Tial oni ne plu rekaptos nin ĵetantan ŝtonon al kato, mi respondecas pri tio !

Ĉifoje S^ino^ Birdo ekstaris vigle, kun ŝiaj vangoj purpura, tio kio nur pli beletigis ŝin, antaŭenpaŝis rekte al sia edzo, kaj firme diris al li :

- Johano, mi nun volas scii, ĉu tia leĝo ŝajnas al vi justa kaj kristana ?

- Ĉu vi mortigus min, edznjo mia, se mi dirus jes ?

- Mi neniam pensus tion pri vi, Johano ! Sed vi ne voĉdonis por ?...

- Jes, bela malamikino mia.

- Vi devus honti, Johano ! Kompatindaj estuloj sen loĝejoj, sen amikoj ! Ĝi estas malaminda, malkuraĝa, abomenda leĝo, kaj mi malobservos ĝin, koncerne min, ĉe la unua okazo. Mi esperas ke mi trovos okazojn, kaj pli ol unu ! Vere hontus ke virino ne povu doni vespermanĝon kaj liton al kompatindaj malsatuloj, ĉar ili estas sklavoj, ili estis insultitaj, batitaj, subpremitaj dum ilia tuta vivo, kompatindaj homoj !

- Aŭskultu min do, Maria. Viaj sentoj estas tute pravaj,

teneraj, bonaj, kaj mi des pli amas vin pro tio, kara mia, sed necesas, vi komprenas, ke nia sentemo ne sufoku nian juĝon. Ne estas nur privataj sentoj, estas pri publikaj interesoj ke tio temas. La emocio kreskas iom post iom, kaj necesas ja oferi niajn proprajn simpatiojn.

- Mi nenion komprenas pri via tuta politiko, vi cetere scias tion, Johano; sed mi povas malfermi mian Biblion, kaj mi legas en ĝi ke necesas nutri tiun kiu malsatas, vesti tiun kiu estas nuda, konsoli tiun kiu ploras, kaj estas al mia Biblio kiun mi estas fidela.

- Sed se, tiel agante, vi kaŭzas grandajn publikajn malfeliĉaĵon ?

- Obei al Dio ne povas kaŭzi damaĝon al iu ajn; kaj kiel ajn la aferoj okazas, la plej sekura estas fari tion kion li ja ordonas al ni !

- Aŭskultu iomete, Maria, kaj, per la plej klaraj argumentoj, mi pruvos al vi…

- He ! Lasu min trankvila, Johano ! Vi parolus dum la tuta nokto ke vi nenion pruvus al mi. Mi alvokas vin mem ! Ĉu estas vi kiu forpuŝos de via pordo kompatindan estulon, tremantan, malsatan, mortiĝantan ! Kaj tio ĉar li estas sen azilo ? Vi, Johano !

Se necesas konfesi tion, nia senatano estis nature humana. La ago de forpuŝi malfeliĉulojn tute ne enigis en liaj kutimoj, kaj la argumento de lia edzino havis des pli da forto ke ŝi konis ĉi tiun vundeblan punkton. S^ro^ Birdo sin turnis do al rimedoj konatajn por ŝpari tempon. Hm ! Hm ! Li plurfoje ripetis; li tusis, eltiris sian naztukon kaj komencis viŝi la lensojn de siaj okulvitroj. Vidante la malamikon cedi, S^ino^ Birdo daŭrigis siajn avantaĝojn.

- Mi ŝatus vidi vin tie, Johano, reale mi ŝatus tion. Vidi vin ekzemple, elpeli eksteren virinon meze de neĝoŝtormo, aŭ sendi ŝin en malliberejon, ĉu ne ? Tio taŭgus al vi !

- Ekzistas tre penigaj taskoj… reparolis kviete S^ro Birdo, sed lia edzino interrompis lin.

- Taskoj, Johano ! Ne eldiru tiun vorton ! Ĝi ne estas, ĝi ne povas esti devo, vi perfekte scias tion. Tiuj kiuj volas konservi siajn sklavojn devas nur bone trakti ilin; tio estas mia doktrino al mi. Se mi havus iun, kaj Dio antaŭsavu min, por ke mi neniam havas iun, mi riskus ke ili volus forkuri de mi, aŭ de vi ankaŭ, Johano. Sed, kredu min, homoj apenaŭ forkuras de la loko kie ili estas feliĉaj. kaj kiam ili forkuras, kompatindaj estuloj, ili sufiĉe suferas pro malvarmo, pro malsato, pro timo, sen tio ke ĉiuj sin turnu kontraŭ ilin. Do ĉu la leĝo ordonas ĉu ne ordonas, ne estas mi kiu obeos al ĝi, mi prenas Dion kiel atestanton !

- Sed, kara Maria, lasu min rezoni iom kun vi…

- Ho ! Nenia rezonado, Johano ! Mi maŝatas ilin, ĉefe pri tia temo. Vi havas manieron, vi ja politikistoj, konfuzi la plej simplan demandon kaj trompi vin mem, sed alvenanta al la praktikado, ĝi estas alia afero, kaj mi bone konas vin, Johano ! Tio ne ŝajnas pli lojala al vi ol al mi, kaj vi ne faros tion pli ol mi.

En ĉi tiu kriza momento, la maljuna Kuĝoo, la faktoto de la loĝejo, malfermetis la pordon, montris sian nigran vizaĝon kaj petegis mastrinon pasigi momenton en la kuirejo. La senatano profitis de la paŭzo; lia duonŝercema, duonofendita rigardo sekvis dum minuto lian etan edzinon, poste li enprofundiĝis en sian kusenfotelon kaj en sian gazeton.

Iom poste, la konsternita voĉo de S^ino Birdo aŭdiĝis ĉe la pordo : "Johano ! Johano ! Venu ! Venu tuj, mi petegas !"

Li demetis la gazeton, iris al la kuirejo kaj restis konsternita antaŭ la spektaklo kiu sin prezentis al li. Sur du seĝoj, antaŭ la kameno, kuŝis korpo, ŝajne senigita je vivo. Ili estis la delikataj formoj de juna virino; ŝiaj rigidaj, glaciiĝintaj vestoj pece disfalis; unu el ŝiaj sangantaj kaj

ŝiritaj piedoj konservis la restaĵojn de ŝuo, la alia la restaĵojn de ŝtrumpo; la marko de la malestimata raso ankoraŭ apereti sur tiu pala vizaĝo, kies tamen ne eblis kontempli sen emocio la kortuŝan kaj dolorigan belecon. Tiuj rigidaj trajtoj, tiu glacia senmoveco, tiu tuta aspekto de morto tremigis S^ron^ Birdo^n^ kiu, silenta, retenis sian spiron, dum helpata de ilia sola mulata servistino, onklino Debora, lia edzino malŝparis la sukuradojn. La maljuna Kuĝoo, tenante la infanon sur siaj genuoj, rapidis demeti al li liajn ŝtrumpojn kaj liajn ŝuojn, kaj revarmigi liajn etajn glaciiĝintajn piedojn.

- Mi diri ke estas konsiderinda vidpunkto ! diris Debora kompateme. La tro varmo esti kaŭzo de ĉi tiu sveno, certe. Kiam kompatinda estulino frapi tie, ankoraŭ tute vigla, ŝi eniri, petegi por havi fajra etoso, poste kiam mi demandi de kie ŝi veni ? Subite jen ŝi svenanta ! Necesi nur vidi ŝiajn manojn ! Neniam ili fari pezan laboron.

- Kompatinda virino ! diris S^ino^ Birdo kiam, finfine malfermetante siajn grandajn nigrajn okulojn, la nekonatino promenigis ĉirkaŭ si vakan kaj malviglan rigardon. Sed subite ŝiaj trajtoj kuntiriĝis, ŝi tordiĝis, rektiĝis ekkriante : "Mia Henriko ! Ili kapti lin de mi !... Ili teni lin ! Helpi !..."

Je ĉi tiu krio, la infano ekpafiĝis de sur la genuoj de Kuĝoo kaj alkuris etendante siajn braketojn al sia patrino. "Jen li ! Jen li !" ŝi ekkriis". Poste, turnante sin al la mastrino : "Ho ! Sinjorino, protekti nin ! Savi lin ! Ne lasi ilin forkapti lin de mi !" ŝi diris kun senespera mieno.

- Vi estas sekura ĉi tie, kompatinda virino, reparolis S^ino^ Birdo kun bonkoreco. Trankviliĝu, timu nenion.

- Dio beni vin ! diris la virino, sufokante siajn plorĝemojn en siaj manoj; la infano, kiu rigardis ŝin plori, strebis grimpi sur ŝin.

Dank'al teneraj zorgoj, kompreneble, kiujn neniu kapablintus pli bone doni, S^ino^ Birdo sukcesis trankviligi la

virinon. Tendolito estis improvizita por ŝi sur la benko proksime al la fajro, kaj baldaŭ, tenante la dormantan infanon, kiun ŝi neniam kapablis decidiĝi momente forlasi, ŝi falis en profundan dormon, sed sen malstreĉi sian malcedeman brakumo.

Revenintaj en la salonon, gesinjoroj Birdo^{j}, stranga afero, nek iu nek la alia, faris la plej etan aludon al ilia antaŭa konversacio. La edzino estis tute absorbita de sia trikado, la edzo montris sin okupita de sia ĵurnalo.

- Mi ne povus imagi kiu ŝi estas, kaj kio ŝi estas ! li fine diris demetante la gazeton.

- Kiam ŝi vekiĝos kaj estos iom retrankviliĝinta, ni vidos, rebatis S^{ino} Birdo.

- Mi diras, edzino…

- Kion, kara mia ?

- Ĉu ŝi ne povus surmeti unu el viaj roboj ? Malfarante orlon, faldon. Ŝi ŝajnas al mi pli alta ol vi.

Tre videbla rideto glitis sur la rondan vizaĝon de S^{ino} Birdo, dum ŝi respondis : "Ni vidos".

Alia paŭzo, kaj S^{ro} Birdo daŭrigis :

- Mi diras, edzino…

- Nu, kion ? amiko mia.

- Ĉu ne estas malnova mantelo el fusteno kiun vi gardas por kovri min kiam mi iomete dormetas post la tagmanĝo ? Vi povus tiel same doni ĝin al ŝi. Ŝi tiom multe bezonas da vestaĵoj !

Tiumomente, Debora aperis ĉe la pordo por diri ke la vekiĝinta virino petis por vidi mastrinon. Gesinjoroj Birdo^{j} iris al la kuirejo, sekvataj de la du plejaĝaj filoj, la etuloj estis jam konsignitaj en la lito.

La virino nun sidis sur la benko apud la fajro. Ŝi konstante rigardis en la fajron, kun kvieta kaj senkuraĝa mieno, tre malsama ol sia iama maltrankvila frenezo.

- Ĉu vi deziris vidi min ? dolĉe diris S^ino Birdo, mi esperas ke vi nun pli bone fartas, kompatinda virino mia ?

Profunda kaj rompita suspiro estis ŝia sola respondo. Sed, malrapide levante siajn nigrajn okulojn, ŝi rigardis S^inon Birdo^n kun peteganta esprimo kiu naskigis larmojn en la okuloj de la bonegaj virinetaj.

- Vi devas nenion timi ĉi tie; vi estas kun amikoj; diru al mi, de kie vi venas, kaj tion kion ni povas fari por vi.

- Mi veni de Kentukio.

- Kiam ? demandis S^ro Birdo, reprenante la demandadon.

- Ĉi tiun vesperon.

- Kiel vi faris ?

- Mi transiris sur la glacio.

- Sur la glacio ! ili ĉiuj ekkriis.

- Jes, malrapide diris la virino, Dio helpanta, mi fari tion. Ili esti malantaŭ mi, tre proksime, kaj ne esti alia vojo.

- He nu ! Mastrino, ekkriis Kuĝoo, la glacio esti tute rompita, kaj la blokoj balanciĝi kaj svingiĝi tutlonge de la akvo !

- Mi scii tion, mi bone scii tion, daŭrigis la virino ekzaltiĝanta, sed mi fari tion ! Mi ne esperi transiri; tute egale ! Mi nur povi morti. Disinjoro veni helpi min. Neniu scii antaŭ ol provi, ĝis kie Disinjoro kapabli helpi lin ! ŝi aldonis, kaj fulmo ekbrilis el ŝiaj okuloj.

- Ĉu vi estis sklavino ? rekomencis S^ro Birdo.

- Jes, sinjoro, de loĝanto de Kentukio.

- Ĉu li estis malagrabla por vi ?

- Ne, sinjoro; bona mastro.

- Kaj via mastrino ?... malbona eble ?

- Ne, sinjoro; bonega.

- Kial do forlasi bonan domon kaj fuĝi tra tiom da danĝeroj ?

La virino ĵetis al S^ino Birdo kritikan rigardon, ŝi estis

vidinta la profundan funebron de ŝiaj vestaĵoj. "Sinjorino, ŝi diris, ĉu vi neniam perdi infanon ?"

La tute neatendita demando remalfermis akran vundon; ne pasis monato de kiam amata infano estis metita en la tombon.

S^ro Birdo sin deturnis kaj paŝis al la fenestro. Lia edzineto ekploris, kaj fine reakirante la voĉon : "Kial tion demandi al mi ? ŝi diris, mi perdis karan etulon..."

- Vi do kompati min; mi perdi du, unu post la alia; ili esti entombigitaj tien, de kie mi veni. Resti al mi nur ĉi tiu. Mi neniam dormi nokton sen li. Li esti mia tuta havaĵo, mia tuta amo, mia tuta fiereco ! Kaj oni esti forprenonta lin de mi, sinjorino, por vendi lin ! Vendi lin al la Sudo ! Forkonduki lin tutsola ! Iu infano ! Iu eta infano kiu neniam forlasi sian patrinon ! Mi ne kapabli toleri tion, sinjorino. Mi havi nur lin en la mondo; sen li, mi ne plu povi esti bona por io ajn. Kiam mi scii la paperojn subskribitajn, kiam mi scii lin vendita, mi preni lin en miajn brakojn, mi kuri dum la tuta nokto. Sed ili postkuri min, la viro kiu aĉeti lin kaj kelkaj el la homoj de mia mastro. Mi senti ilin malantaŭ mi, mi aŭdi ilin, kaj mi eksalti sur la glacion. Kiel mi transiri, Dio scii tion, ne mi. Nur mi memori pri viro kiu etendi manon al mi, de la riverbordo, kaj helpi min grimpi supren.

Nek larmoj, nek singultoj, la virino estis en la situacio kiam la larmoj sekiĝas. Sed ĉiu ĉirkaŭ ŝi, laŭ sia maniero, lasis eligi signojn de profunda kompato.

La du knabetoj, post senespera traserĉado en siaj poŝoj, serĉante tion kio neniam troviĝas tie, naztukon, singultis en la baskoj de la subjupo de sia patrino, kie ili viŝis ĝisfunde la okulojn kaj la nazojn. S^ino Birdo kaŝis sian vizaĝon en sian naztukon; kaj la maljuna Debora, kun larmoj ruliĝantaj laŭlonge de ŝia nigra kaj honesta vizaĝo, ekkriis "Disinjoro kompati nin !" kun la tuta fervoro de konvento

preĝanta; dum la maljuna Kuĝoo respondis laŭ la sama tonalto, disigante siajn trajtojn al sinsekvo de kompatemaj grimacoj kaj frotante al si la okulojn per siaj tutaj fortoj sur la refaldo de siaj manikoj. Koncerne la senatanon, li estis ŝtatisto, oni ne povis esperi vidi lin plori kiel simpla mortemulo. Do li turnis sian dorson al la kompanio, konsideris la fenestron, plurfoje ektusetis, denove viŝis siajn okulvitrojn kaj plurfoje purigis sian nazon laŭ tre suspekta maniero.

- Kiel vi povis diri al mi ke vi havis bonan mastron ! li subite ekkriis regante firmece iun kunpremiĝon de gorĝo, kaj abrupte sin turnante al la kompatinda fremdulo.

- Ĉar li vere esti bona; kaj mia kara mastrino, tiel bona ! Sed ili ne povi sin tiri el embaraso; ili ŝuldi, mi tute ne scii kiel. La viro al kiu ili ŝuldi, havi rajton super ili, kaj ili esti devigitaj plenumi lian volon. Mi aŭskulti, mi aŭdi mastron diri tion al mastrino, dum ŝi pledi kaj preĝi por mi. Li diri ke li ne kapabli elturniĝi, kaj ke la paperoj esti subskribitaj. Esti tiam kiam mi kunpreni la etulon, kaj forlasi la karan domon, kaj mi forkuri.

- Vi tamen havas edzon ?

- Jes, sed li aparteni al alia viro, iu malagrabla mastro, kiu apenaŭ permesi al li veni vidi min. Ĉi tiu mastro fariĝi pli kaj pli malmilda kontraŭ ni; li minaci vendi lin al la Sudo. Esti kvazaŭ mi neniam plu revidi lin !

Ŝi diris ĉi tiujn parolojn per tiel trankvila voĉo, ke iu vulgara observanto povintus supozi ŝin senĉagrena; sed en ŝiaj nigraj senmovaj okulegoj, oni povis legi profundan angoron.

- Kaj kien vi intencas iri, mia kompatinda virino ? demandis S^ino Birdo.

- En Kanado, se mi nur scii kie ĝi esti ! Kanado ! Ĉu do ĝi esti tiom for ? Ŝi levis al S^ino Birdo fidan kaj naivan

rigardon.

- Kompatinda infano ! diris senintence S^ino Birdo.

- Ĉu necesi fari multe, multe da vojo ? rekomencis la virino kun vigleco.

- Pli ol vi pensi, kompatinda infano, diris S^ino Birdo, sed ni tuj pripensos pri tio kion ni povos fari. Nu, Debora, pretigu por ŝi liton en via ĉambro, apud la kuirejo, kaj morgaŭ matene, ni zorgos pri la cetero. Dume, nenion timu, kara virino, metu sur Dio vian fidon, li ŝirmos vin.

S^ino Birdo kaj ŝia edzo reiris al la salono, kie ŝi sidiĝis, tute enpensiĝanta, en sia eta lulseĝo antaŭ la fajro. Ŝi klinis sin jen al iu flanko, jen al la alia, kun pensema mieno. Rilate al S^ro Birdo, li paŝadis en la ĉambro per paŝegoj : "Uf ! al si li grumblis, malbenon ! malagrablan aferon !" Fine, rekte alvenante al sia edzino :

- Tre decidite, sinjorino Birdo, li diris, necesas ke ŝi iru ĉi nokte mem. La fiulo estas sur la spuro, kaj morgaŭ ekde frumatene li estos ĉi tie. Se nur temus pri la virino, ni tenus ŝin enfermita ĝis kiam ĉio estus kvieta. Sed pri la bona knabeto, iu armeo, iu infanterio kaj iu kavalerio, ne tenus lin trankvila, mi respondecas pri tio. Li trapasos sian kapeton tra ian truon, fenestron aŭ pordon, kaj malkaŝos sekreton. Beleta laboro por mi, se ili ambaŭ estis kaptitaj ĉi tie ! Ne, ne ! Necesas ke ŝi tujtuj foriru.

- Ĉi nokton ! Ne eblas ! kaj kien iri ?

- Ho ! Mi sufiĉe scias kien alkonduki ŝin.

Kaj la senatano komencis resurmeti siajn botojn. Poste, ĉesante duonvoje, li kisis sian genuon kaj restis enprofundiĝinta en siaj pripensoj.

- Ĉi tio estas malbonvena, embarasa, damnita afero ! *li finfine reparolis, denove baraktante kontraŭ la tiriloj de siaj botoj, jen la fakto. Poste, tuj kiam li ĝisfunde surmetis unu, li restis sida kun la alia boto enmane, droninta en*

atentema ekzameno de la desegnoj de la tapiŝo. Tute egale ! Tio necesas, ne estas por diri. Plagon al la taskaĉo ! *Post ĉi tiu ekkrio, li vigle finis vesti sin kaj iris rigardi tra la fenestro.*

La eta S^ino^ Birdo estis singardema virino kiu, dum sia vivo kaj dum siaj tagoj, ne permesus al si diri : "Mi vere diris tion al vi !" Kaj kvankam ŝi bonege ekvidis la direkton, kiun prenis la pripensoj de ŝia edzo, ŝi tre prudente detenis sin enmiksiĝi, kaj restis trankvila sur sia seĝo, atendante ke plaĉu al ŝia S^ro^ kaj mastro komuniki al ŝi la rezulton de liaj meditoj.

- Estas, vi komprenas, mia malnova kliento Dekorno, kiu venis al ni el Kentukio post esti liberiginta ĉiujn siajn sklavojn. Li aĉetis domon sep mejlojn *(+/-11Km)* pli for, laŭ longe de la kreko. Estas lando perdita en la arbaroj kie neniu kuraĝus iri, krom se bezono. Ŝi certe estos tien sufiĉe sekura, sed la malbono estas ke necesas veturi ŝin tien per kaleŝo kaj nokte, kaj estas nur mi kiu kapablas tion.

- Nur vi ? Sed Kuĝoo estas bonega koĉero !

- Jes, jes, ĉi tie. Tien, estas alia afero. Necesas dufoje transiri la krekon, kaj la lasta vadejo estas danĝera, krom se oni perfekte konas ĝin. Mi pli ol centfoje trairis ĝin per ĉevalo, kaj mi precize scias la kurbiĝon kiu necesas preni. Tiel, vi vidas, ne estas por diri. Ĉe la noktomezo, Kuĝoo jungos kiel eble plej sekrete, kaj mi elkondukos ilin kun mi; poste, por kolorigi la aferojn, li kondukos min al najbara gastejo, kie pasos nokte inter la tria kaj la kvara la diliĝenco kolumbuso. Mi aspektos esti preninta mian veturilon nur por tio, kaj mi aperos en la Kongreson, tute en afero, ĉe la malfermo de la kunsido. Mi tien faros strangan mienon post ĉio kio okazis ! Sed ke mi estu pendigita, se mi povas alimaniere agi !

- Via koro estas pli bona ol via kapo, ĉiuokaze, Johano,

diris lia edzino metante sian blankan maneton sur tiun de sia edzo. He, ĉu mi tiom multe amus vin, se mi ne konus vin pli bone ol vi mem konas vin !

Kaj la virineto, dirante tion, estis tiel beleta kun siaj okuloj brilantaj pro larmoj, ke la senatano rigardis sin kiel tre allogan personon pro esti altirinta al si la admiron pri tiel ĉarma estulino. Kio restis al li por fari, krom iri inspekti la veturilon ? Tamen ĉe la pordo li haltis dum minuto, kaj retropaŝante, diris heziteme :

- Maria ! Pardonu… mi ne scias tion kion vi pensos… sed estas ĉi tiu tirkesto tute plena… plenplena de la vestaĵoj de tiu kompatinda… de tiu kompatinda etulo. Kaj, turnante sin sur la kalkanoj, li tiris la pordon post si.

Lia edzino malrapide malfermis kabineton samliman kun sia dormoĉambro, prenis lampon kiun ŝi iris meti sur skribotablon. Tie, el sekreta kavaĵo, ŝi elprenis ŝlosilon kiun ŝi englitis en la seruron de tirkesto, kaj ŝi senmove haltis. Ŝiaj du filoj kiuj, kiel ĉiuj infanoj, sekvis sian patrinon, restis starantaj, silentaj ĉe ŝiaj flankoj, kaj fiksis al ŝi demandajn rigardojn. Ho ! Vi kiuj legas ĉi tiun, se ne estas en via domo sekreta angulo, kaŝejo, kiun vi malfermas nur kun batanta koro, kun malsekaj okuloj, kun dolora respekto, kvazaŭ oni malfermus tombon, tiam ! ho tiam ! Diru vin feliĉan, feliĉan patrinon !

S^ino^ Birdo malrapide elglitis la tirkeston. Troviĝis ene etaj manteloj, etaj diversformaj vestaĵoj, stakoj da etaj antaŭtukoj, vicoj da etaj ŝtrumpoj, eĉ paro da ĉarmaj ŝuoj, eluzetitaj ĉe la pinto, kiuj duoneliris el sia papera envolvaĵo. Ankoraŭ estis ludiloj : ĉevaleto, ĉareto, turbo, pilko, memoroj kolektitaj kun tiom da korŝiroj !… Sidanta, kun la vizaĝo kaŝita inter la manoj, ŝi ploris ĝis kiam la larmoj, filtriĝante tra ŝiaj fingroj, falis en la tirkeston. Tiam vigle relevante la kapon, ŝi elektis, kun febra hasto, la plej

solidajn kaj simplajn objektojn, kaj faris pakon el ili.

- Panjo ! diris unu el la knabetoj, milde tuŝante al ŝi la brakon, ĉu vi estas dononta ĉi tiujn… ĉi tiujn aferojn ?

- Bonaj infanoj miaj, ŝi diris, kaj ŝia voĉo tremis pro fervoro kaj emocio, se nia tre amata Harĉjo rigardas nin de la ĉiela supro, li estos kontenta. Neniam mi kapablintus doni tion al iu senĉagrena, feliĉa ! Sed estas al patrino, multe pli dolorplena, multe pli afliktita ol mi, kiun mi donas tion, kaj la beno de Dio sekvos ĝin, mi esperas tion !

Ĉi tie sube estas animoj benitaj de supre, kies la doloroj maturiĝas al ĝojo por la malfeliĉuloj, kies submetitaj esperoj ĝermas al rikoltoj de floroj, transformiĝas en bonfarajn balzamojn por vunditaj koroj, por suferantoj, por forlasitoj. Ĉi tiu juna kaj delikata virino, tie sidanta apud sia lampo, lasanta malrapide flui siajn larmojn, kaj haste kolektanta la lastajn memorĵojn de la kara etulo kiun ŝi ploras, por doni ilin al la kompatinda fuĝanta infano, ĉi tiu virino estas unu el tiuj elitaj animoj.

S^ino^ Birdo poste stariĝis, malfermis ŝrankon, elprenis du vestaĵojn en bona stato, kaj sidiĝis ĉe sian tablon. Tie, per siaj tondiloj, sia kudrilo, sia fingringo, ŝi rapidis kiel eble plej bone, laŭ la opinio taksita de ŝia edzo, por malfari orlojn kaj plisojn, kaj plilongigi la jupojn; loboro kiun ŝi forlasis nur kiam la malnova horloĝo en la angulo sonis noktomezon, kaj kiam ŝi aŭdis la obtuzan bruon de la radoj antaŭ la pordo.

- Maria, *diris S^ro^ Birdo kiu eniris kun sia palto sur la brako*, estas la tempo; veku ilin, ni jam devus esti for.

S^ino^ Birdo rapide demetis la diversajn objektojn en malgrandan kofron kiun ŝi fermis, petegante sian edzon portigi ĝin en la veturilon, kaj ŝi kuris voki la kompatindan virinon. Ĉi tiu, kovrita per mantelo, ĉapelo kaj ŝalo kiuj apartenis al sia bonfarantino, baldaŭ aperis sur la sojlo kun sia infano en siaj brakoj. La senatano engrimpigis ŝin en la

kaleŝon kiel eble plej rapide, kaj lia edzino grimpis malantaŭ li sur la piedbreto. Eliza, kliniĝanta ekster la pordo, etendis sian manon, tiel belan, tiel dolĉan, tiel blankan kiel tiu kiu reciproke kaptis ĝin. Ŝiaj longaj nigraj okuloj ligiĝis al tiuj de S^ino Birdo kun penetrema kaj pasia esprimo. Ŝajnis ke ŝi baldaŭ parolos, ŝiaj tremetantaj lipoj duondisiĝis, dufoje ŝi provis, sed neniu sono kapablis eliĝi. Per fingro ŝi montris la ĉielon kun neesprimebla rigardo, refalis sur sian sidlokon, kovris al si la vizaĝon per siaj manoj, kaj la veturilo ruliĝis.

La situacio estis el la plej kritikaj por la patrioto kiu ĵus, la antaŭan semajnon, estigis en la leĝaro de sia lando severajn disponojn kontraŭ fuĝantaj sklavoj, iliaj kaŝistoj kaj iliaj komplicoj. La elokventeco de nia bona senatano, en la sesio de Ohio, konkuris kun tiu kiu tiom honoris en la granda Kongreso siajn kolegojn de Vaŝingtono. Sublima kiel ili, kun la manoj en siaj poŝoj, li riproĉis kontraŭ la sentimentala malvirto de tiuj kiuj povas kompari, kun la grandaj interesoj de la Ŝtato, sian infanan kompaton al kelkaj mizeraj fuĝantoj.

Aŭdaca kiel leono, plena de sia konvinko, li ĝin penetrigis en ĉiujn animojn; sed tiam li vidis nur la senesprimajn literojn kiuj formas la vorton fuĝanto. Maksimume li konfuze pensis pri la kruda bildo de nigrulo, kunportanta pakaĵon fine de bastono, kun ĉi tiuj vortoj gravuritaj sube : "*Fuĝanto apartenanta al la subskribinto…*", vortoj kiujn li tiel ofte legis en gazetaj anoncoj. La impreson, la korŝiran realecon, la okulon kiu petegas, la nefortan kaj tremantan homan manon kiu petegas, la korŝiran alvokon de senespera suferego, li eĉ ne pensis pri ili. Li sin detenis imagi ke la fuĝanto povus esti malfeliĉa patrino, kompatinda infano sen protekto, kiel tiu kiu nun surmetis la ĉapeleton, tiel rapide rekonitan, de la infano kiun li vidis mortiĝi. Tiel do, nia senatano estanta nek el bronzo nek el ŝtono, sed viro kaj

kuraĝulo, lia patriotismo estis en malĝoja situacio. Ne tro triumfu damaĝe al li, bonaj fratoj el la Sudŝtatoj, ĉar ni ege dubas ke multaj el vi havus kialon en sama cirkonstanco por doni al si pli da heroeco. Ni havas kialojn kredi ke en la ŝtatoj de Kentukio, de Misisipo, troviĝas noblaj kaj oferemaj animoj al kiuj la alvoko de la malfeliĉo tute ne vane venas. Ha ! Bonaj fratoj kaj samlandanoj ! Ĉu estas lojala viaflanke postuli de ni servojn kiujn, se vi estus sur nia loko, via grandanimeco malpermesus al vi doni ?

Ĉiaokaze, se nia brava senatano ŝarĝis al si la konsciencon per politika peko, li estis bone pentofaranta ĝin per nokto de pentopuno. Estis senfinaj pluvperiodoj; la profunda kaj riĉa grundo de Ohio estas, oni scias tion, el la plej ŝlima, kaj necesis sekvi vojon kun reloj el la bona malnova tempo.

- Kia vojo do ? demandos la vojaĝantoj el la Oriento kiuj konas kiel relojn nur tiuj sur kiuj flugas lokomotivoj.

Sciu do, senkulpa amiko, ke en ĉi tiuj feliĉegaj regionoj de Okcidento, kie koto estas el senlima profundo, la vojoj estas realigitaj helpe de krudaj arbotrunkoj transverse metitaj flankalflanke, kaj kovritaj per tero, musko, gazono, ĉio kio estas sub la mano, laŭ sia primitiva freŝeco. Poste, la landanoj sin aplaŭdas unu la aliajn, nomas ĉi tiun radkaptilon vojo, kaj hastas troti sur ĝi. Pro vetero kaj pluvoj, gazonoj kaj teroj malaperas, la trunkoj vojaĝas tien kaj tien, haltas en pitoreskaj pozicioj, iu fino supren, la alia malsupren, aŭ farantaj la krucon, kaj lasantaj inter ili vastajn vojsulkojn, abismojn plenajn de nigra kaj likva ŝlimo.

Estis sur tia vojo ke stumblis nia senatano, pensante, tiom kiom la cirkonstancoj permesis, dum enkotiĝis la radoj kaj knaris la radaksoj. Jen ni kliniĝas al iu flanko, jen al alia. Neantaŭvidita skuo ĵetis al la kliniĝanta pordo la senatanon, la infanon, la virinon, kaj subite la kaleŝo haltis. Oni aŭdis

Kuĝoon ekstere furioziĝi kontraŭ siaj ĉevaloj; ili tiras, ili vane penadis. Kiam la senatano perdis ĉian paciencon, la veturilo restariĝis per iu reskuo. La du antaŭaj radoj sin ĵetis en la aeron, kaj virino, infano, senatano falis kun nazo antaŭen en la kusenoj. La ĉapelo de la senatano senceremonie glitis sur lia kapo kiel estingilo; la infano kriis; Kuĝoo sendis al siaj bestoj kiuj baŭmante kalcitris sub la vipo, la plej energiajn admonojn. La veturilo denove leviĝis, ĉifoje estis la malantaŭaj radoj kiuj glitis en la kavaĵon, kaj la vojaĝantoj estis pelmele reĵetitaj al la seĝo de la fundo; la kubutoj de la senatano malkombis la junan virinon kies piedoj, kompense, iris sin loki en la malfeliĉan kastorĉapelon, kiu resaltis pro la skuo. Ankoraŭ kelkajn minutojn, kaj la kotejo estis transveturita, la anhelantaj ĉevaloj haltis. La senatano plukis sian ĉapelon, la virino religis la sian, kvietigis sian infanon, kaj ĉiuj tri streciĝis kontraŭ la estontaj okazaĵoj.

Dum vojireto, estis nur la knara kaj kutima ruliĝado de la lamaj radoj, intermiksita de kelkaj balancadoj kaj skuoj. Sed ĵus kiam niaj vojaĝantoj sin flatis ke ili estis ekster sufero, abrupta plonĝo subite starigis ilin kaj ne malpli subite reĵetis ilin sur siajn sidlokojn. La veturilo abrupte haltas, kaj Kuĝoo, post esti multe turniĝadinta ekstere, aperis ĉe la pordo.

- Mastro, bonvolu, la loko esti tre malbona. Ne ebli sin tiri el la afero. Necesi meti relojn, certe.

La senatano, kun malmulta espero, pretiĝis eliri; li heziteme esploris, serĉanta firman grundon; subite lia piedo sinkas en nemezurebla profundo. Li luktis por eltiri ĝin, perdis ekvilibron, ruliĝis en la koto, de kie li estis eltirata de la fidela Kuĝoo, en la plej bedaŭrinda stato.

Pro pura simpatio por la ostoj de la leganto, ni rezignas daŭrigi ĉi tiun rakonton. La okcidentaj vojaĝantoj kiuj pasigis la noktajn horojn kun la agrabla okupo eltiri la

palisojn de bariloj por fari de ili relojn, kaj tiri siajn veturilojn el kelka abomena truo, havos sufiĉan kompaton por nia malfeliĉa heroo. Ni petu al ili por li, silentan larmon kaj ni pluiru.

Estis tre malfrue kiam la kota, gutanta veturilo eliris el la kreko, kaj haltis ĉe la pordo de granda farmodomo. Necesis iom da persistado por veki la loĝantojn. Finfine la respektinda bienulo aperis kaj malbaris la pordon. Li estis granda, dika, fortika ursido, kun ses futojn kaj kelkajn colojn alta *(>1,8m)* ekster la botoj, envolvita de ĉaskitelo el ruĝa flanelo. Dika kaj malorda plektaĵo de rufaj haroj, barbo el sama nuanco kaj datanta de pluraj tagoj, ne kontribuis por komplezigi lian aspekton. Li restis tute rekta dum kelkaj minutoj, suprenlevante sian kandelon, rigardante niajn vojaĝantojn per mirigita okulo, kun timigita esprimo el la plej legeblaj. Ne estis sen penoj ke la senatano sukcesis komprenigi al li tion pri kio temis. Dum li penegas al tio, ni iom sciigu al niaj legantoj pri ĉi tiu nova rolulo.

La honesta maljuna Ĵano Dekorno, antaŭlonge posedanto de vastaj bienoj en Kentukio, kaj de tre konsiderinda sklavaro, havis de urso nur la haŭton. Naturdotita de justa, honesta kaj nobla koro, iu granda koro en korpo de giganto, li dum kelkaj jaroj eltenis, kun kreskanta maltrankvilo, la funkciadon de sistemo same fatala al la premanto kaj al la premato. Fine iun tagon, lia nobla koro ŝvelante tiel ke ĝi rompis sian ĉenon, li prenis sian monujon, kaj transirante Ohio^{n}, aĉetis en ĉi tiu ŝtato multajn hektarojn da riĉa kaj produktema tereno. Post tio, malsklavigante sian tutan dungitaron, virojn, virinojn, infanojn, li sendis ilin per ĉaroj al ĉi tiuj novaj terenoj por ekloĝi tie. Kaj la honesta Ĵano, retiriĝante al izolita bieno rande de golfeto, pace ĝuis, en ĉi tiu profunda solejo, de sia konscienco kaj siaj pripensadojn.

- Ĉu vi estas tia homo kiu protektas kompatindan virinon kaj ŝian infanon kontraŭ tiuj ĉaspelistoj de sklavoj ? klare demandis la senatano.

- Mi supozas ke jes ! respondis Dekorno per kelka emfazo.

- Mi estis certa pri tio.

- Lasu ilin veni ! *rekomencis la bravulo, etendante per sia tuta longo, siajn muskolajn membrojn.* Lasu ilin veni ! Mi havas sep filojn, ĉiu kun ses futojn altaj *(+/-1,8m)*, ĉiuj laŭ iliaj ordonoj. Prezentu al ili niajn humilajn respektojn ! *daŭrigis la ŝercema Ĵano Dekorno*, diru al ili ke ni estas pretaj ! Ke ju pli frue des pli bone ! *La giganto trapasigis sian potencan manon tra la densa pajlo kiu formis lian hararon, kaj eksplodis per homera rido.*

Laca, elĉerpita, senkuraĝa, la kompatinda Eliza trenis sin al la pordo, kun sia infano profunde dormanta en ŝiaj brakoj. La ursido alproksimigis la lumon al ŝia vizaĝo, kaj, lasante eligi kompatan grumblon, malfermis la pordon de malgranda dormoĉambro samlima kun la vasta kuirejo kie ili troviĝis. Li gestis al ŝi eniri tien, ekbruligis kandelon, metis la torĉon sur la tablon kaj tiam sin direktanta al Eliza :

- Nun mi diras tion al vi, junulino, ne aŭdacu timi. Lasu ilin veni ! Mi nur diras tion al vi, mi estas preta ! Kaj li montris du aŭ tri bonajn karabenojn lokitajn super la kameno. Tiuj kiuj konas min, nur iomete, sufiĉe scias ke tute ne estus sana provi forrabi iun el mia domo, kontraŭ mia volo ! Nu do, nun dormu tute trankvile, kvazaŭ via patrino lulus vin. Estante parolinta, li refermis la pordon.

- Ŝi estas el la plej belaj, li diris al la senatano, kaj en tia kazo, la plej belaj havas la plej bonajn kialojn forkuri, se eĉ malmulte ili havas kelkajn sentojn. Mi scias pri tio !

La senatano rakontis per malmultaj vortoj la aventurojn de Eliza.

- Ho ! Ha ! Uf ! Nu ! Tute ne eblas ! He ho ! Ŝi ! Ho! Ŝi ! Iu patrino ! He ! Tio estas la naturo mem ! Kaj ĉasita kiel damao, pro havi naturajn sentojn, pro esti aginta kiel devas agi patrino ! Ĉi tiuj aferoj blasfemigus min ! *diris la honesta Ĵano, viŝante siajn okulojn per la dorso de sia malglata mano*. Komprenu, sinjoro, jen kial mi pasigis jarojn kaj jarojn sen aliĝi al iu ajn eklezio. La pastroj de niaj flankoj predikis ke la Biblio permesas ĉi tiujn homraziojn. Mi ja ne kapablis kontraŭstari ilin, kun ilia greka kaj ilia hebrea ! Do mi forlasis ilin tie, ilin kaj iliajn librojn. Estis nur kiam mi trovis pastron kiu kapablis najli ilin mutaj, en la greka kaj en ĉiuj lingvoj, kaj kiu predikis ĝuste male, ke mi diris : "Jen mia viro !", kaj mi mordis la aferon kaj aliĝis al lia kapelo. Jen la historio !

Kaj Ĵano kiu parolante diligentis malŝtopi kelkajn botelojn da ŝaŭma cidro, servis ĝin al sia gasto.

- Vi bone farus, komprenu, resti ĉe ni ĝis la tagiĝo, li kore daŭrigis. Mi alvokos al la maljunulino, kaj via lito estos farita en palpebruma daŭro.

- Dankon, bona amiko mia, mi jam devus esti foririnta. Necesas ke mi veturos per la diliĝenco al kolumbuso.

- Ha ! Necesas, tiam mi faros vojireton kun vi, kaj mi montros al vi transiron kiu pli bone valoras ol la abomena vojo tra kiu vi venis.

Ĵano sin ekipis, prenis lanternon kaj gvidis la veturilon laŭ vojo kiu malsupreniris al la fundo de la bieno. Forlasante lin, la senatano metis al li en la manon bileton de dek dolaroj.

- Estas por ŝi, li diris.

- Jes, jes, *rebatis Dekorno tiel mallonge. Ili interŝanĝis manpremon, kaj disiĝis*.

11. Preno de Posedaĵo.

La tago aperas griza kaj nebula tra la fenestro de la kabano de onklo Tomo. Ĝi lumigas senkuraĝajn vizaĝojn, speguliĝojn de ankoraŭ pli malĝojaj koroj. Unu aŭ du krudaj, sed puraj ĉemizoj, freŝe gladitaj, estas metitaj sur la dorsapogilo de seĝo antaŭ la fajro, kaj sur la apuda tableto, onklino Kleo etendas trian. Ŝi kunigas kaj platigas per gladilo ĉiun faldon, ĉiun orlon, laŭ la plej skrupula ekzakteco. De tempo al tempo ŝi direktas sian manon al sia vizaĝo por viŝi la larmojn kiuj fluas laŭlonge de ŝiaj vangoj.

Tomo sidas, kun sia Biblio malfermita sur siaj genuoj, la kapo apogita sur sia mano. Ambaŭ silentas. Estas frumatene, kaj la buboj kune dormas en la rulkofro.

Tomo posedis laŭ la plej alta grado la tenerecon de la koro, la familiajn korinklinojn kiuj, por la malfeliĉo de sia malbonsorta raso, estas unu el liaj distingaj karakteroj. Li ekstaris, kaj iris silente rigardi siajn infanojn.

- Por la lasta fojo, li diris.

Onklino Kleo ne parolis, sed energie glitigis kaj reglitigis la gladilon sur la kruda ĉemizo, jam tiel glata kiel eble. Poste, subite ĉesante kun senespera gesto, ŝi sidiĝis, laŭtigis la voĉon kaj ploris.

- Mi supozi ke ni devi submetiĝi, sed, ho Sinjoro, bona Dio ! kiel sukcesi ?...Se mi ja nur scii kien oni konduki vin, kompatindan edzon mian, kaj kiel vi esti traktata ! Mastrino diri ke ŝi provi, ke ŝi elaĉeti vin post unu aŭ du jaroj; sed, Disinjoro ! Neniu reveni el tiuj kiuj foriri tien ! Oni certe mortigi ilin tie ! Ĉu mi ne aŭdi rakonti pri kiel oni trolaborigi sur la plantejoj !

- Esti la sama Dio tie kiel ĉi tie, Kleo.

- Tio povi esti; sed la bona Disinjoro kelkfoje lasi terurajn aferojn okazi. Tiuflanke mi ne havi gravan konsolon por atendi.

- Mi esti inter la manoj de la Disinjoro, diris Tomo. Nenio povi esti pli grava ol tio kion li voli, kaj ĉiam esti io pro kiu mi danki lin : tio esti ke esti nek vi, nek la geetuloj, kiuj esti venditaj, sed mi. Vi resti ĉi tie en sekureco; tio kio devi fali, fali nur sur min, kaj Disinjoro helpi min… Mi scii tion.

Ha ! Kuraĝa kaj vira koro, vi sufokas vian doloron por konsoli viajn plejamatojn ! Tomo pene parolis, io premis lin ĉe la gorĝo; sed lia volo estis firma kaj kuraĝa.

- Ni pensi pri la gracoj kiujn ni ricevi, *li aldonis per rompita voĉo, kvazaŭ efektive necesis al li grandan kuraĝstrebon por pensi pri tio en ĉi tiu momento*.

- Gracojn ! diris onklino Kleo, mi ne vidi multe el ili. Ne esti juste, ne, ne esti juste ! La mastro neniam devi fine lasi preni vin por pagi siajn ŝuldojn. Ĉu vi ne gajnigi al li duoble pli multe ol oni doni por vi ? Li ŝuldi al vi vian liberecon; li ŝuldi tion al vi ekde jaroj. Li eble esti devigata, mi ne diri ne; sed tio kion li nun fari, esti malbona, mi senti tion. Nenio forigi tion el mia opinio. Estulo tiel fidela, kiu ĉiam meti la intereson de la mastro antaŭ la sia, kiu fidi pli al li ol al edzino kaj infanoj ! Ha ! Tiuj kiuj vendi la koran amon, la koran sangon por sin tiri el embaraso, iam devi reguligi siajn kalkulojn kun la bona Disinjoro !…

- Kleo, se vi ami min, necesi ne tiel paroli, dum la lasta horo kiun, eble, ni neniam plu povi kune pasigi. Vere, mi ne kapabli aŭdi unu vorton kontraŭ mastro. Ĉu li ne esti metita en miajn brakojn tute eta ? Esti nature, komprenu, ke mi pensi pri li ĉiajn bonajn aferojn; sed li, kial li zorgi pri la kompatinda Tomo ? La mastroj esti alkutimiĝintaj al tio ke ĉio esti akurate plenumata, kaj ili ne alte taksi tion. Ni ne povi atendi tion, komprenu ! Nur kompari nian mastron kun

aliaj. Kiu esti pli bone traktita, pli bone nutrita, pli bone loĝigita ol Tomo ? Neniam la mastro lasi ĉi tiun malfavoran sorton okazi, se li povi antaŭvidi ĝin, mi scii tion; mi certi.

- Esti egale, esti io malbona ĉe la fundo, *diris onklino Kleo kies superrega trajto estis obstina sento de justeco*. Mi ne kapabli diri precize kie, sed ie esti malbono, certe.

- Ni levi la okulojn tien supren, al Disinjoro, li esti super ĉio; kompatinda birdeto ne fali de la ĉielo sen lia permeso.

- Tio devi rekonsoli min. Nu, tio tute ne konsoli min, diri onklino Kleo; sed por kio utili paroli ? Mi pli bone fari malsekigi mian paston, kaj prepari al vi bonan tagmanĝon, ĉar kiu scii kiam vi havi alian ?

Por taksi la suferon de nigruloj venditaj en la Sudo, necesas memori ke ĉiuj instinktaj korinklinoj de ĉi tiu raso estas aparte fortaj. Por ĝi, la loka alligiteco estas tre profunda. El timema kaj malmute riskema naturo, ĝi ŝatas la loĝejon, hejman vivon. Kunigu al ĉi tiuj tendencoj, ĉiujn terurojn kiuj akompanas la nekonataĵon. Pensu ke ekde la infanaĝo, la nigrulo estas edukita por kredi ke la lasta limo de puno estas esti vendata en la Sudo. La minaco esti sendita al la rivera malaltaĵo estas pli malbona ol la vipo, pli malbona ol la torturo. Ni mem aŭdis nigrulojn esprimi ĉi tiun senton. Ni vidis kun kia sincera teruro ili aŭskultas, dum la ripozaj horoj, la terurajn rakontojn de la Malsupra Rivero. Por ili, ĝi estas : La terura, nekonata lando,

De kie neniu vojaĝanto iam revenis.

Misiisto, kiu vivis inter la fuĝintaj sklavoj en Kanado, rakontis al ni ke multaj konfesis esti fuĝinta de ĉe sufiĉe bonaj mastroj, kaj esti aŭdacintaj maleviti ĉiujn danĝerojn de fuĝo, nur pro la teruro kiun inspiris al ili la ideo esti vendota en la Sudo, verdikto ankoraŭ pendanta super iliaj kapoj, tiuj de iliaj edzoj, de iliaj edzinoj kaj de iliaj infanoj. La afrikano, nature timema, pacienca, nedecidema, ĉerpas el

ĉi tiu teruro heroan kuraĝon, kiu igas lin alfronti malsaton, malvarmon, suferon, transiron de la dezerto kaj la ankoraŭ pli timindajn danĝerojn kiuj atendas lin se li malsukcesas.

La familia tagmanĝo nun fumis sur la tablo, ĉar S^ino Ŝelbi, por ĉi tiu mateno, sendevigis onklinon Kleo^n de ŝia servo ĉe la granda domo. La kompatinda animo elspezis ĉion kio restis al ŝi da energio, en la kuiradoj de ĉi tiu adiaŭa manĝo. Ŝi mortigis sian elektindan kokidon, knedis siajn platkukojn laŭ sia plejbono, ĝuste laŭ la gusto de sia edzo; ŝi estis elpreninta el la ŝranko kaj lokinta sur la kamenbreton iujn botelojn da konservaĵoj kiuj aperis nur en gravaj okazoj.

- Disinjoro, bona Dio ! diris triumfe Moseo, ni gajni bongustan manĝon hodiaŭ ĉimatene !

Kaj li samtempe ekprenis kokidan flugilon.

Onklino Kleo donis al li vangofrapon.

- Fi ! Malbela korvo ! Tiel ataki la lastan tagmanĝon kiun via kompatinda paĉjo esti manĝonta hejme !

- Ho, Kleo ! milde reparolis Tomo.

- La impulso esti pli forta ol mia volo, ŝi diris kaŝante al si la vizaĝon en sian antaŭtukon; mi esti tiel kortuŝita ke mi ne povi deteni min malbone fari.

La infanoj ne plu moviĝis. Ili unue rigardis sian patron, poste sian patrinon, al kies vestoj alkroĉiĝis la filineto, eligante postulemajn kaj akrajn kriojn.

Onklino Kleo viŝis al si la okulojn, kaj ĉirkaŭbrakis la etulinon. "Nu, nu ! ŝi diris. Jen kiu esti finita, mi esperi. Nu, manĝi pecon, maljunulo mia, ĝi esti mia plej fajna kokido. Vi ankaŭ havi vian parton, kompatindaj etuloj ! Via panjo esti malagrabla kun vi".

Moseo kaj Petro ne atendis duan inviton, kaj eklaborante, ili honoris la tagmanĝon kiu, sen ili, riskintus resti netuŝita.

- Nun, diris onklino Kleo, diligentante ĉirkaŭ la tablo, mi

tuj paki viajn vestaĉojn. Kiu scii, ĉu ili ne forpreni ilin de vi ! Ili tute kapabli tion ! Mi koni iliajn manierojn !… Kotaj homoj, fine !… Mi meti en tiun angulon la flanelajn subĉemizojn por viaj reŭmatismoj; necesi zorgi pri ili, ĉar vi havi neniun por fari alian al vi. Ĉi sube esti la malnovaj ĉemizoj, kaj super la novaj. Jen la ŝtrumpetoj kiujn mi hieraŭ vespere ŝtopi, mi enen meti la lanbulon por fliki ilin. Sed, bona Disinjoro ! kiu ripari vin ? *Kaj onklino Kleo, denove deprimita, kun la kapo klinita super la rando de la kesto, ekplorĝemis.* Iomete pripensi ! Ne animo por prizorgi vin, bon- aŭ mal-sanan ! Mi kredi ke mi ne plu kuraĝi esti bona post ĉi tio.

La knabetoj, manĝinte ĉion kio estis por tagmanĝi, komencis kompreni tion kio okazis, kaj vidante sian patrinon plorantan, sian patron profunde malĝojan, ili komencis ploreti kaj viŝi al si la okulojn. Onklo Tomo tenis la etulinon sur siaj genuoj, kaj lasis ŝin okazigi ĉiujn siajn fantaziojn : ŝi skrapetis al li la vizaĝon, tiris al li la harojn, kaj kelkfoje ellasis bruajn eksplodojn de ĝojo, evidentajn rezultojn de siaj internaj meditoj.

- Jes, ridi, kanti, kompatinda estulino ! diris onklino Kleo. Ankaŭ vi atingi tiun punkton ! Vi vivi por vidi vian edzon vendatan, por eble esti mem vendata. Kaj la knaboj esti siavice vendataj kiam ili taŭgi por io. Pli bone esti por kompatinda nigrulo havi nek infanojn, nek ion ajn.

Moseo kriis de ekstere : "Mastrino, ŝi veni ĉi tien !"

- Kion ŝi veni serĉi ĉi tie ? Kian bonon ŝi povi fari al ni ?

Sinjorino Ŝelbi eniris. Onklino Kleo antaŭenpuŝis al ŝi seĝon kun firme grumblema mieno, sed ŝi atentis nek pri la seĝo, nek pri la maniero proponi ĝin. Ŝi estis pala kaj maltrankvila.

- Tomo, ŝi diris, mi venas por… Ŝi subite ĉesis, rigardis la silentan grupon kaj kovrante al si la vizaĝon per sia

naztuko, ŝi plorsingultis.

- Disinjoro, bona Dio ! Mastrino, ne plori ! Ne tiel plori ! diris onklino Kleo ekplorante siavice. Dum kelkaj momentoj ĉiuj kune ploris, kaj en ĉi tiuj larmoj kiujn disverŝis kune la plej noblaj kaj la plej modestaj, kunfandiĝis ĉiuj koleroj, ĉiuj rankoroj kiuj bruligas la koron de la prematoj.

Ho vi kiu vizitas la malriĉulon, bone sciu tion, ĉio kion via mono povas aĉeti, donata per malvarma mano deturnante la okulojn, ne valoras larmon de amplena simpatio !

- Mia brava Tomo, rekomencis sinjorino Ŝelbi, mi ne povas proponi al vi ion ajn kiu helpos vin : monon, oni prenus ĝin de vi. Sed mi solene promesas al vi, kaj antaŭ Dio, ne perdi vian spuron kaj elaĉeti vin tuj kiam mi estos kolektinta la necesan sumon. Ĝis tiam fidu al Providenco.

La infanoj tiam kriegis ke massa Halej venis. Piedbato senĝene malfermis la pordon, kaj la komercisto aperis sur la sojlo, kun tre kverelema humoro pro esti pasiginta la nokton galopante sen sukcesi rekapti sian predon.

- Nu, negro, ĉu vi estas preta ? Saluton, sinjorino, li diris demetante sian ĉapelon antaŭ S^{ino} Ŝelbi.

Onklino Kleo fermis kaj ŝnuris la keston. Poste, restariĝante, ŝi ĵetis al la komercisto furiozan rigardon, kaj ŝiaj larmoj ekbrilis kiel fajro.

Tomo ekstaris por sekvi sian novan mastron. Li ŝarĝis la pezan keston sur siajn ŝultrojn. Lia edzino, kun la eta Paola en siaj brakoj, komencis akompani lin, kaj la infanoj, ankoraŭ plorantaj, trotetis malantaŭe.

S^{ino} Ŝelbi kuniĝis kun la komercisto, kaj retenis lin dum kelkaj minutoj. Dum ŝi vigle parolis kun li, la malĝoja familio alpaŝis al ĉaro jungita antaŭ la pordo. Ĉiuj sklavoj de la loĝejo, junaj kaj maljunaj, amasiĝis por adiaŭi sian malnovan kamaradon. Ili respektis lin kiel la fidindan homon de la

mastro kaj kiel sian religian gvidiston, kaj estis grandaj esprimoj de doloro kaj simpatio, precipe de la virinoj.

- He ! Kleo, vi rezignacii pli bone ol ni ! diris unu el ili kiu ellasis siajn larmojn, kaj kiun skandalis la malgaja kaj trankvila teniĝo de onklino Kleo, staranta apud la ĉaro.

- Mi ja fini plori, *ŝi rebatis, rigardante per sovaĝa mieno la komerciston kiu proksimiĝis*, kaj ĉiuokaze, mi ne doni al ĉi tiu malbela demono la plezuron aŭdi min ĝemi !

- Engrimpu, kaj rapide ! diris Halej al Tomo kiam li trairis la amason da sklavoj kiuj sekvis lin per minaca okulo.

Tomo enveturiĝis; Halej, eltirante de sub la benketo du pezajn ĉenojn, ligis ilin al li ĉirkaŭ la maleoloj.

Obtuza murmuro de indigno rondiris en la rondo, kaj S^ino Ŝelbi, restinta sub la verando, ekkriis :

- Sinjoro Halej, ĉi tio estas tute neutila antaŭzorgo, mi certigas vin.

- Ne povas scii, sinjorino. Mi ĉi tie perdis almenaŭ kvincent dolarojn, kaj mi ne eblas al mi preni novajn riskojn.

- Kion alian ŝi do atendi de li ? diris indigne onklino Kleo, dum la du infanoj, nun komprenante la destinon de sia patro, alkroĉiĝis al ŝia robo kaj eligis priplorindajn kriojn.

- Mi bedaŭri, diris Tomo, ke massa Georgio esti survoje.

Georgio iris pasigi du aŭ tri tagojn kun kamarado en najbara loĝejo. Foririnta frumatene, antaŭ ol la malfeliĉo de Tomo disbabiliĝis, li ignoris tion.

- Fari miajn amikaĵojn al massa Georgio, diris Tomo vigle.

Halej vipis la ĉevalon kaj forprenis sian posedaĵon kiu, kun la kapo malantaŭen turninta, ĵetis malĝojan kaj longan rigardon al la kara malnova domo.

S^ro Ŝelbi zorgis ne esti hejme. Li vendis Tomo^n sub la premo de neceso, kaj por liberigi sin de la potenco de kanajlo kiun li timis. Lia unua sento, post la fintraktita negoco estis

tiu de alta kvietiĝo. Sed la riproĉoj de lia edzino vekis liajn duondormajn bedaŭrojn, kaj la rezigno de Tomo eĉ pli akrigis ilin. Vane li diris al si ke li rajtis tiel agi, ke ĉiuj same faris, kaj multajn sen havi kiel li, la pretekston de la neceso. Li ne sukcesis konvinki sin. Malmulte zorgema pri la ĉeesto en la malagrablaj scenoj de la transpreno, li iris por komerca rondvizitado en la alta lando, esperante ja ke ĉio estu finita je lia reveno.

Tomo kaj Halej veturis sur la pulvora vojo, ĉiu konita objekto fuĝis malantaŭen, ĝis kiam ili atingis la limojn de la plantejo, kaj direktiĝis sur la ĉefa vojo. Post proksimume unu mejlo *(+/-1,6Km)*, Halej haltis antaŭ forĝejo, kaj eniris en ĝi, kun mankateno en mano.

- Ĝi estas iomete tro malgranda por la maniero laŭ kiu li estas konstruita, diris Halej, montrante per fingro la katenojn kaj per alia Tomo[n].

- Disinjoro ! Ĉu estus Tomo el Ŝelbi ! ekkriis la forĝisto, li ne vendis lin, ĉu ne ? Ne eblas !

- Jes eblas.

- Vi ne diras tion ! Kiu iam kredus tion ?… Ho ! Vi tute ne bezonas kateni lin tiel forte ! Ne ekzistas pli bona, pli fidela estulo…

- Jes, jes, viaj mirindaĵoj ĉiam estas la plej hastemaj forkuri ! Parolu al mi pri la tute stultaj kiuj ne zorgas pri kie ili iras, pri la ebriuloj kiuj zorgas nur pri drinkado ! Ĉi tiuj estas facilaj por teni ! Ili eĉ sentas ian plezuron esti promenigitaj dekstren, maldekstren. Tio kion viaj subuloj el la unua kvalito malŝatas kiel pekon. Mi ne konas pli bonan garantion ol bonajn ĉenojn. Lasu al ili krurojn, ili uzos ilin, kalkulu kun tio.

- Ankaŭ estas, daŭrigis la forĝisto, serĉante inter siaj iloj, viaj Sudaj plantejoj, ili ne estas ekzaktte la loko kie nigrulo de Kentukio zorgas iri. Ili mortas kiel muŝoj tie ! Ĉu

ne vere ?

- Jes, sufiĉe multe mortas, rebatis Halej. La malfacileco alklimatiĝi, iu afero aŭ alia, sufiĉe rapideme ekspedas ilin por pli daŭrigi la merkaton.

- Nu ! Domaĝe tamen ke trankvila kaj honesta knabo, tiel bona subulo kiel Tomo, iru tien por esti dispremita, ostoj kaj karno, en unu el viaj plantejoj de sukerkanoj.

- Li ja ankoraŭ havas ŝancon. Mi promesis fari laŭ la plej bona. Mi vendos lin kiel serviston al ia malnova familio, kaj se flava febro ne kunprenos lin, se li sukcesos alklimatiĝi, li havos tiel bonan lokon kiel neniu el liaj similuloj povus deziri.

- Li lasas siajn edzinon kaj infanojn ĉi tie, mi supozas ?

- Jes, sed li ne malhavos iun tie. Estas, dank 'al Dio, sufiĉe da virinoj ĉie.

Dum ĉi tiu konversacio, Tomo malgaje restis sidanta sur sia loko. Subite li aŭdis la rapidan galopon de ĉevalo, kaj li ne jam elsurpriziĝis, ke la juna mastro Georgio jam saltis en la ĉaron, ĵetis al li siajn du brakojn ĉirkaŭ la kolon kaj spasme ĉirkaŭpremis lin, ekkriante kun furiozo miksita de singultoj :

- Tio estas malinda ! Ni vane dirus !... Estas honto ! Ha ! Se mi estus viro, oni ne aŭdacus tion !... Oni ne farus tion ! li diris, kun bremsita kolerkriado.

- Ho ! Massa Georgio ! Esti tiel granda feliĉo por mi vidi vin ! Mi ne povi elteni la penson foriri sen adiaŭi vin ! Se vi scii la tutan bonon kiun vi fari al mi !

Iu movo de Tomo altiris la okulojn de Georgio al la ĉenoj kiuj ligis al li la piedojn.

- Kia malnoblaĵo ! li diris levante la manojn. Mi svenbatos tiun malŝatindulon, jes, mi svenbatos lin !

- Ne. Vi fari nenion, massa Georgio. Trankviligi vin, kaj ne paroli tiel laŭte, mi ne farti pli bone se vi kolerigi lin.

- Nu ! Mi detenos min pro amo al vi; sed mi ne kapablas

ne pensi pri tio ! Estas honto ! Esti ne sendinta serĉi mi ! Esti ne diriginta ion al mi ! Sen Tomaso Linkolno mi ne sciintus tion ? Mi certigas vin ke mi malmildege traktis ilin ĉiujn, alvenante hejmen !

- Mi timi ke vi malpravi, massa Georgio.

- Ne gravas ! Mi hontigis ilin pri tio ! Rigardu ĉi tien, onklo Tomo, *li diris kun la dorso turnita al la forĝejo kaj mallaŭtigante la voĉon kun mistera mieno*, mi alportis al vi mian dolaron !

- Ho ! Neniapreze mi voli preni ĝin de vi, massa Georgio, diris Tomo tute kortuŝita.

- Vi prenos ĝin, mi volas tion, diris Georgio. Vidu anstataŭe ! Mi diris al onklino Kleo ke mi alportos ĝin al vi. Ŝi konsilis al mi fari truon en ĝi kaj trapasi ŝnuron tra ĝi; tiel ke vi ĉiam povas havi ĝin ĉirkaŭ la kolo kaj teni ĝin kaŝita. Alie ĉi tiu aĉa sentaŭgulo ŝtelus ĝin de vi. Mi ŝatus sincere diri al li tion kion mi pensas pri lia agmaniero, Tomo ! Tio konsolus min.

- Sed, massa Georgio, tio ne farus bonon al mi; tute male.

- Tiam mi rezignas tion, diris Georgio. Li pendigis al li la dolaron ĉirkaŭ la kolo. Jen, nun streĉe butonu vian jakon. Gardu ĝin bone, kaj ĉiufoje kiam vi vidos ĝin, onklo Tomo, memoru ke mi malsupreniros tien, intence por serĉi vin kaj revenigi vin. Ni parolis pri tio, onklino Kleo kaj mi. Mi diris al ŝi nenion timi. Mi viglos super tio, mi nokte kaj tage persekutos mian patron, ĝis kiam li cedos.

- Ho ! Massa Georgio, ne tiel paroli pri via patro.

- Mi ne volas diri malbonojn pri li, onklo Tomo.

- Kompreni, massa Georgio, necesi al vi esti brava knabo ! Pensi pri tiom da koroj kiuj meti sian esperon en vin. Ĉiam apogi vin sur via patrino. Ne esti kiel tiuj junaj malsaĝuloj kiuj pensi sin tro grandaj por aŭskulti tiun kiu

porti ilin kaj naskigi ilin. Disinjoro, kiu renovigi al ni siajn plej belajn donacojn, doni al ni nur unu patrinon ! Vi neniam vidi similan al la via, massa Georgio, eĉ se vi vivi cent jarojn. Do vi stari apud ŝi, kaj vi kreski proksime al ŝi, por esti ŝia konsolo kaj ŝia ĝojo. Ĉu ne, kara infano mia, vi fari tion ?… Vi voli tion ?

- Jes, mi volas tion, onklo Tomo, diris Georgio serioze.

- Kaj, necesi atenti pri paroloj, massa Georgio. En via aĝo, la junuloj esti kelkfoje libervolaj, tio esti laŭ naturo, sed vera ĝentlemano, tia kia vi poste esti, mi esti certa, ne voli eligi vorton kiu povi ĉagreni patron aŭ patrinon. Tio kion mi diri, ne esti por ofendi vin, massa Georgio. Ĉu vi ne kulpigi min ?

- Ne, vere, onklo Tomo, vi ĉiam donis al mi tiel bonegajn konsilojn.

- Esti ĉar mi havi pli aĝan ideon, komprenu, *diris Tomo karesante per sia larĝa kaj forta mano la buklan kapon de la juna knabo, kaj parolante per voĉo tiel tenera kiel tiu de virino*. Mi vidi, kiel iu ajn dirus, ĉion kio esti entenata en vi, kaj kio ne esti en vi, massa Georgio ?… Scienco, privilegioj, legado, skribado… Tial, vi fariĝi bona, granda kaj klera homo. Viaj gepatroj kaj ĉiuj en la loĝejo esti tiel fieraj pri vi ! Estu bona mastro… kiel via patro; estu kristano kiel via patrino. Memoru pri via Kreinto dum la tagoj de via junaĝo !, massa Georgio.

- Mi ĉefe strebos esti bona, onklo Tomo, tion mi promesas al vi, diris Georgio. Mi volas esti modelo ! Sed vi ankaŭ promesas al mi ne perdi kuraĝon. Mi iam revenigos vin, kaj kiel mi diris al onklino Kleo ĉimatene, kiam mi estos ĝentlemano, mi konstruigos por vi kabanon kie estos dormoĉambro, kaj salonon kun tapiŝo. Ho ! Vi ankoraŭ ĝoje vivos !

Halej eliris el la forĝejo kun mankatenoj en manon, kiam

Georgio saltis malsupren de la ĉaro.

La juna knabo turnis sin kun supereca mieno : Mi sciigas vin, sinjoro, ke mi diros al mia patro kaj mia patrino kiel vi traktas onklon Tomo[n].

- kiel plaĉos al vi ! rebatis la komercisto.

- Ĉu vi ne hontas pasigi vian vivon vendante virojn kaj virinojn, kaj katenante ilin kiel brutojn ? Mi kredintus ke vi konsciintus pri via malnobleco.

- Tiel longe kiel viaj altranguloj aĉetos virojn kaj virinojn, mi ne kredos valori malpli ol ili ĉar mi vendas ilin al ili. Ne estas pli da malnobleco vendi ilin ol aĉeti ilin.

- Mi neniam faros aŭ unu, aŭ la alian, kiam mi estos ĝentlemano, ekkriis Georgio. Hodiaŭ mi ruĝiĝas pro mia lando. Mi tiom fieris pri ĝi antaŭe !

Li rektigis sin sur sia selo, kaj rigardis ĉirkaŭ sin, kvazaŭ por juĝi pri la efikon kaŭzita en Kentukio de tiu aserto.

- Adiaŭ, onklo Tomo ! Ĉiam estu fiera, kaj havu bonan kuraĝon !

- Ĝis revido, massa Georgio ! *diris Tomo rigardante lin kun admira tenereco.* La Plejpotenculo benu vin ! Ha ! Kentukio ne havas multajn kiel vi ! *li aldonis en la pleneco de sia koro kiam li perdis la vidon de la sincera kaj infana vizaĝo. Li plu rigardis ĝis kiam la eĥo de la paŝadoj de la ĉevalo mallaŭtiĝis en la malproksimeco, lasta sono, lasta eĥo de la loĝejo !*

Li sentis varman punkton sur sia koro, estis la kara dolaro kiun Georgio metis tie. Li metis la manon sur ĝin kaj premis ĝin kontraŭ li.

- Nun, Tomo, atentu, diris Halej revenante al la ĉaro kaj ĵetante la mankatenon enen. Mi komencos laŭ mildeco, kiel mi kutime faras kun miaj negroj. Bone kondutu kun mi, mi bone kondutos kun vi, tio estas mia principo. Mi ne estas

brutala kontraŭ miaj homoj, mi kalkulas kaj faras kiel eble plej bone. Mi do konsilas al vi adaptiĝi, kaj ne malutili al mi. Unue, mi alkutimiĝis al ĉiuj viaj artifikoj, kaj oni ne trompas min. Se la negro estas trankvila kaj ne provas forkuri, li ĝoje vivos kun mi; alie estos sia kulpo lia, ne la mia.

Tomo asertis ke li tute ne intencis forkuri, nenecesa certigo venanta de homo kiu havis katenoj ĉe la piedoj. Sed s^ro Halej kutimis komenci siajn rilatojn kun sia varo per kelkaj bagatelaj avertoj, taŭgaj por konsoli la artiklon, por sugesti konfidon kaj gajecon, kaj por antaŭforigi malagrablajn scenojn.

Provizore adiaŭante Tomo^n, ni sekvos la sorton de la aliaj rolantoj de nia rakonto.

12. La Proprieto prenas licencon.

Malfrue posttagmeze, en densa nebulo, vojaĝanto deĉevaliĝis antaŭ la pordo de sufiĉe aĉa hotelo de la vilaĝo N***, en Kentukio. En la enirhalo ariĝis tre miksita kompanio, kiun la rigoreco de la vetero devigis serĉi ŝirmejon tie. Altaj Kentukianoj, kun elstaraj ostoj, vestitaj per ĉaskiteloj, etendantaj siajn malgraciajn membrojn en la eble plej multe da spaco, laŭ malzorgo propra al sia raso. Fusiloj amasigitaj en la anguloj, pulvokornoj, ĉasosakoj, ĉashundoj kaj nigruletoj pelmele kuŝantaj, formis la ĉefajn trajtojn de la sceno. Antaŭ la fajro sidis longkrurulo, sin lulanta sur sia seĝo, kun sia ĉapelo sur la kapo, kaj la kalkanumoj de siaj kotaj botoj majeste ripozantaj sur la kamenbreto, sinteno tute favora por la meditadoj kiujn vekas la okcidentaj tavernoj, kie vojaĝantoj montras deciditan preferon por ĉi tiu aparta maniero altigi siajn komprenojn[16].

La gasto kiu sin tenis malantaŭ la verŝtablo estis kiel la plej multaj el siaj samlandanoj, alta, osta, gaja kaj kurbakrura, kun arbarego da haroj, kiun superis grandega ĉapelo.

Ĉi tiu karakteriza emblemo de suvereneco de la viro aperis, estas vere, sur la kapo de ĉiuj ĉeestantoj : feltĉapelo, palmfolio, malpurega kastorĉapo aŭ brila nova ĉapelo, ĝi brilis ĉie kun tute respublika sendependeco. Ĝi eĉ ŝajnis partopreni en la naturo de ĉiu individuo. Iuj metis ĝin sur la orelojn – bruemaj, ili estis gajaj bonvivantoj, kun facila humoro kaj sen ĝeno; aliaj fiere surŝovis ĝin ĝis la nazo - feraj karakteroj, kiuj ne demetis siajn ĉapelojn, ĉar

16 Estas ĉi tie, laŭ la originala angla vorto "understanding", netradukebla vortludo, kiu signifas samtempe komprenon, kaj intimece, lignajn ŝuojn.

ne taŭgis al ili demeti ĝin, kaj kiuj pretendis surmeti ĝin laŭ sia plaĉo ! Estis iuj kiuj repuŝis ĝin malantaŭen - viglaj homoj, kiuj volis klare vidi antaŭ ili; dum la malzorgemuloj, malmulte zorgantaj pri sia hararanĝo, lasis ĝin libera preni ajnajn imageblajn aspekton. Mallonge, ĉi tiuj diversaj ĉapeloj provizintus studaĵon indan je Ŝekspiro.

Nigruloj, en larĝaj pantalonoj, sed malmulte provizitaj per ĉemizoj, kuris tien kaj reen, sen atingi alian rezulton ol pruvi sian bonvolon, kaj sian diligentecon meti la tutan kreaĵon kun la supro malsupren, por la plej alta bono de sia mastro kaj liaj gastigantoj. Aldonu al ĉi tiu tumulto, fajron meze de kameno, krakadantan, flamantan, fulmetantan, inter pordoj kaj fenestroj tutege malfermitaj, kies kurtenoj el katuno flirtas kaj baraktas sub la energia blovo de glacia venteto, kaj vi havos la ideon de la logpovo de iu Kentukia taverno.

La Kentukiano nuntempe estas frapanta ekzemplo de la transdono de instinktoj kaj propraĵoj. Liaj prapatroj, potencaj ĉasistoj, bivakis en la arbaroj, senŝirme dormis sub la libera ĉielo, sen aliaj torĉoj ol la steloj. Ilia moderna posteulo precize agas kvazaŭ la domo estus bivako; li neniam demetas sian ĉapelon, sin ĵetas, sin etendas ĉien kaj metas siajn kalkanumojn sur la dorsapogiloj de seĝoj kaj sur la kamenbredo, kiel antaŭlonge lia prapatro apogis la siajn sur arbotrunko, kaj sin etendis laŭ longe de la verda gazono. Vintre same kiel somere, li lasas malfermitaj pordojn kaj fenestrojn, por havi sufiĉe da aero por siaj vastaj pulmoj. Li senĝene vokas ĉiujn : "Mia kara !" kun senzorga simplanimeco, kaj fine, li estas la plej sincera, la plej kontentiĝema, la plej gaja estulo kiu estu en la mondo.

La vojaĝanto, hazarde enkondukita en ĉi tiun kunvenon de adeptoj de senĝeneco, estis maljuna, malalta, dika, kun malkaŝema kaj ronda vizaĝo, kun originala kaj iomete amuza

aspekto. Li tenis en la mano sian valizon kaj sian pluvombrelon, kaj obstinege rezistis al provoj kiujn faris la servistoj por liberigi lin de ĝi. Post esti maltrankvile ĉirkaŭrigardinta la ĉambron, li retiriĝis ĝis la plej varma angulo, eklokiĝis tie kun siaj karaj pakaĵoj, kiujn li ŝovis sub sian seĝon, kaj timeme levis la okulojn al la longa strangulo kies la kalkanumoj ornamis la breton de la kameno, kaj kiu tuskraĉis de dekstre maldekstren, kun maltimemo el la plej maltrankviligantaj por la nervozuloj kun antaŭjuĝoj.

- He ! Kiel vi fartas, kara mia ? diris la supredirita ĝentlemano ĵetante, kiel salutmanieron, timigan elverŝon de tabaksuko al flanko de la ĵusalveninto.

- Ne malbone, rebatis la alia timege evitanta la honoron, kiu minacis lin.

- Kia novaĵo ? diris la ĉefulo elprenante el sia poŝo rulon da tabako kaj grandan ĉastranĉilon.

- Neniun kiun mi scias.

- Maĉaĵon ?... Ĉu ne ? rekomencis la unua, kaj li etendis al la vojaĝanto tranĉaĵon da tabako, kun tute frata mieno.

- Ne, dankon, tio tute ne taŭgas al mi, respondis la vireto deturniĝante.

- Ne taŭgas ? Ha ! diris la alia senzorge, kaj li enŝovis la pecon en sian buŝon, por nutri la senĉesan ŝprucadon kiun li ĵetis por la ĝenerala bono de la socio.

La maljuna sinjoro ektremis ĉiufoje kiam lia longkrura najbaro pafis en sia direkto. Ĉi tiu lasta rimarkis tion, kaj degneme turnante sian artilerion al alia punkto, li komencis senesperan sturmon kontraŭ unu el la fajrohundoj, kun ĝusteco de ekrigardo kaj strategia precizeco kiuj sufiĉintus por la kapto de urbo.

- Kio estas tio ? demandis la malgranda maljunulo vidante plurajn homojn grupiĝi ĉirkaŭ granda afiŝo.

- La identiga priskribo pri nigrulo, iu mallonge diris.

S^ro Vilsono, ĝi estas la nomo de la maljuna ĝentlemano, ekstaris, kaj post esti flankenmetinta siajn valizon kaj ombrelon, li metode elprenis sian okulvitron el ĝia ujo, surmetis ĝin sur sian nazon kaj legis :

"Fuĝinte de ĉe la subskribinto, la mulato Georgo. La dirita Georgo^n estas kvin futojn ok colojn (+/-1,7m) alta, tre hela vizaĝkoloro kun brunaj buklaj haroj. Li estas inteligenta, bone sin esprimas, kapablas legi kaj skribi. Li probable provos ŝajnigi sin kiel blankulo. Li havas profundajn cikatrojn sur la dorso kaj la ŝultroj. Li estis markita en la dekstra mano per la litero H.

Mi donos kvarcent dolarojn al tiu kiu revenigos lin al mi viva; saman sumon al tiu kiu alportos al mi akcepteblan pruvon ke li estis mortigita".

La maljuna ĝentlemano mallaŭte tralegis ĉi tiun priskribon de iu fino al la alia, kvazaŭ li studis ĝin.

La veterano ĉesigis la atakon kiun li direktis al la fajrohundo, revenigis siajn kalkanumojn al la grundo, ekstaris laŭ sia tuta longo, paŝis rekte al la afiŝo kaj senhezite kraĉis sur ĝin.

- Jen ! Tio estas mia pensmaniero, li diris kaj reiris sidiĝi.

- He ! diru do, reparolis la gastiganto, atentu pri tio kion vi faras ?

- Mi tiom same farus al subskribinto de ĉi tiu papero, se li estus ĉi tie, *kaj la longulo kviete rekomencis tranĉi sian tabakon*. Ĉiu homo kiu havas sklavon kiel tiun kaj kiu ne trovas manieron por pli bone trakti lin, meritas perdi lin. Tiaj afiŝoj estas honto por Kentukio; tio estas mia opinio, kaj mi ne kaŝas tion.

- Ha ! Pri tio, tio estas fakto, diris la gastiganto enskribante la kostojn de la damaĝo en sia libro.

- Mi mem havas tutan regimenton de nigruloj, *daŭrigis*

la viro, reakirante sian pozicion kaj sian atakon kontraŭ la fajrohundo, mi diras al ili : *"Infanoj, fosu, ŝpatu, kuru, se la koro tiras vin ! Mi neniam estos malantaŭ vi por spioni vin"*, kaj tiel mi gardas ilin. Ekde kiam ili sentas sin liberaj forkuri, la bezono estingiĝas. Plie, mi havas iliajn aktojn de malsklavigo tute pretaj, tute registritaj, en la okazo se mi finfine renversiĝos iam baldaŭ, kaj ili scias tion. Mi povas diri al vi ke estas neniu en la tuta lando kiu pli bone profitas de siaj nigruloj ol mi. Mi sendis iujn al Cincinatio kondukti kvincentdolarajn ĉevalidojn, kaj ili transdonis al mi la monon, fiere kaj senprokraste. Tio estas evidenta. Traktu ilin kiel hundojn, kaj vi havos malbonegan faron; traktu ilin kiel homojn, ili laboros kaj agos kiel homoj.

Kaj, en la varmego de sia konvinko, la honesta bredisto de brutoj akompanis ĉi tiun moralan riproĉon per vera fajraĵo direktita al la fajrejo.

- Mi kredas ke vi vere povus pravi, amiko, diris s^ro^ Vilsono. La viro kiun oni denuncas, estas rara ulo, mi pri tio ne eraras. Li laboris dum ĉirkaŭ ses jaroj en mia fabriko; li estis mia plej bona laboristo. Lerta, trovema knabo : li inventis maŝinon por tili kanabon. Io vere utila : ĝi jam estas uzata en pluraj manufakturoj. La mastro prenis patenton.

- Mi tio certigas, diris la viro : li prenas la patenton kaj la monon, poste turnas sin kaj markas la inventinton per ruĝa ferstampilo en la dekstra mano ! Se mi havus bonŝancon, mi ja ankaŭ markus lin, kaj li havus tion dum kelka tempo.

- Ĉi tiuj lertaj knaboj ĉiam estas la plej spitemaj kaj la plej ribelemaj de la grupo, diris de la alia flanko de la ĉambro malĝentila krudulo. Tial oni vipadas ilin kaj oni stampas ilin. Se ili bone kondutus, tio ne okazus al ili.

- Tio estas ke Disinjoro faris de ili homojn, kaj ke necesas forte bati por fari de ili bestojn, seke reparolis la bredisto.

- Negroj kiuj tiom multe scias tute ne estas favora por la mastro, *daŭrigis la alia rifuĝinta en sia kruda kaj obstina nesciado*. Por kio utilas talentoj kaj ĉiuj tiaj artifikoj, kiam oni mem ne kapablas uzi ilin ? Nu, ĉio kiun ili faras, estas erari vin. Mi havis unu aŭ du el ĉi tiuj fiuloj kaj mi rapide vendis ilin por la Malsupra Rivero. Mi sciis ke mi perdus ilin pli malpli frue, se mi ne forvendis ilin.

- Kial vi ne sendas tien supren petegi al la Disinjoro ke li faru al vi sortimenton de ili, minus la animoj, kompreneble ! spiteme diris la bredisto.

La konversacio interrompiĝis pro la alproksimiĝo de eleganta malgranda kariolo kun unu ĉevalo, kiun stiris neblanka servisto.

El ĝi eliris juna viro, bone vestita, kun distingita aspekto, kiu estis tuj ekzamenita kun la tuta intereso kiun vekas, ĉe la nenifarantoj dum pluva tago, la ĉeesto de novveninto. Li estis alta, havis la malhelbrunan vizaĝkoloron de hispano, belajn esprimplenajn okulojn, buklajn kaj ebonnigrajn harojn. Lia agleca nazo, liaj maldikaj kaj delikataj lipoj, kaj la belaj proporcioj de lia tuta staturo tuj donis al la rigardantoj la ideon de superulo. Li senĝene eniris, montris per signo al sia servisto kien meti sian kofron, salutis la ĉeestantaron, kaj kun lia ĉapelo enmane, malrapide sin direktis al la verŝtablo. Li registrigis sin sub la nomo de Henriko Butlero, de Oaklando, en Ŝelbi-grafejo. Poste indiferente turniĝanta, li ekvidis la afiŝon, kaj legis ĝin :

- Jakobo, li diris al sia servisto, ŝajnas al mi ke ni renkontis iun el tia aspekto ĉe Bernano en la alta lando.

- Jes, mastro, sed mi ne certas pri la mano.

- Ankaŭ ne mi. Mi certe ne rigardis tion, *diris la fremdulo oscedante. Li petegis la gastiganton donigi al li individuan ĉambron, kie li povos sendi iujn urĝajn skribaĵojn.*

La gastiganto estis tute fervora, kaj sinsekvo da ĉirkaŭ

sep negroj, junaj kaj maljunaj, vir- kaj in-seksaj, etaj kaj grandaj, falis ĉirkaŭen kiel svarmo da perdrikoj, zumantaj, klopodemaj, interpuŝiĝantaj, trakubutantaj, surtretantaj unu la alian sur la kalkanoj, en sia lukto pretigi la dormĉambron de "mastro" dum ĉi lasta sidanta meze de la ĉambro, tenis konversacion kun sia najbaro.

Ekde la eniro de la eksterlandano, s^ro Vilsono ne ĉesis ekzameni lin per malkvieta kaj enviema okulo. Ŝajnis al li esti vidinta lin ie, sed kie ? Neeblas memori tion. Temp' al tempe, kiam la viro parolis, moviĝis, ridetis, la fabrikisto tremetis kaj fikse rigardis lin; poste li deturnis la kapon, tuj kiam la nigraj kaj brilaj okuloj renkontis liajn kun malvarma indiferenteco. Fine subita memoro ŝajnis lumigi lin, kaj li observis la fremdulon kun mieno tiel surprizita kaj tiel konsternita, ke ĉi tiu stariĝis kaj rekte venis al li.

- Sinjoro Vilsono, mi kredas ? li diris per tono de konato, etendante la manon al li. Pardonu ne esti rekonante vin pli frue. Mi vidas ke vi ne forgesis min. S^ro Butlero, de Oaklando, en Ŝelbi-grafejo.

- J…es… jes… jes… sinjoro, respondis s^ro Vilsono, kvazaŭ li provis paroli en revo.

Negro venis anonci ke la ĉambro de "mastro" estis preta.

- Jakobo, vidu pri la kofroj, *diris senzorge la ĝentlemano; kaj alparolante al s^ro Vilsono, li aldonis* : Mi dezirus havi interparolan momenton kun vi pri negocoj en mia ĉambro, mi petas.

S^ro Vilsono eksekvis lin, ankoraŭ kun mieno de homo kiu paŝas revante. Ili supreniris en grandan ĉambron kie kraketis nove flamigita fajro, kaj kie pluraj servistoj finpretigis la aranĝojn de la dormoĉambro.

Ĉio finita, ili eliris; la junulo fermis la pordon, metis la ŝlosilon en sian poŝon, turnis sin kaj, kun la brakoj krucitaj

sur sia brusto, rigardis S^ron Vilsono^n en la vizaĝon.

- Georgo ! ekkriis ĉi tiu.

- Jes, Georgo, rebatis la alia.

- Mi ne kapablis kredi tion !

- Mi esti akcepteble maskita, ĉu ne ? li diris kun fiera rideto. Iom da juglanda likvaĵo igi de mia flava haŭto distingan brunon, kaj mi tinkturi miajn harojn; tiel ke mi tute ne respondi al la priskribo, kiel vi vidi.

- Ho ! Georgo, vi nun ludas tre danĝeran ludon ! Mi ne povintus preni sur min konsili tion al vi.

- Tial mi preni sur mi sola la respondecon, fiere diris Georgo kun la sama rideto.

Ni rimarkos, preterdirite, ke Georgo estis filo de blankulo, kaj de unu el tiuj malfeliĉulinoj kiujn escepta beleco kondamnas fariĝi sklavino de la pasioj de iliaj mastroj, kaj naski infanojn kiuj neniam konos sian patron. Deveninta de unu el la plej orgojlaj familioj de Kentukio, li havis de ili la delikatecon de trajtoj kaj la nebrideblan spiriton. Li ricevis de sia patrino nur helan koloron de mulato, abunde kompensitan de la brilo kaj velureco de liaj grandaj nigraj okuloj. Apenaŭ ŝanĝo en la koloro de lia haŭto kaj de liaj haroj sufiĉis por metamorfozi lin al hispanon, kaj la gracieco de liaj movadoj, la malvulgareco de manieroj, kiu estis por li natura, faciligis al li la aŭdacan rolon kiun li adoptis.

La brava S^ro Vilsono, kun singardema kaj trozorgema karaktero, trapaŝis la ĉambron tien kaj reen, "tre atakita kaj skuita en spirito", kiel diras Johano Bunjan[17]. Hezitanta inter deziro helpi Georgo^n, kaj ia voleto doni helpon al la leĝo kaj la ordo, li paŝante grumbletis :

- Nu, Georgo, jen vi fuĝinta, laŭ tio kion mi supozas ! Vi

17 Aŭtoro de Pilgrim's Progress, religia kaj alegoria verko kiu ĝuas grandan popularecon en Anglio kaj Usono.

fine forlasis vian mastron… mi ne miras pri tio, kaj tamen mi koleras, Georgo. Jes, certe… mi devas diri tion al vi, Georgo… tio estas mia devo.

- Pri kio vi koleri, sinjoro ? trankvile demandis Georgo.

- Vidi vin, por tiel diri, rekte kontraŭanta al la leĝoj de via lando.

- De mia lando ! ripetis Georgo kun profunda amareco. Ĉu mi havi alian landon ol la tombon ?… Plaĉi al Dio ke mi jam esti en ĝi !

- He ne, ne, Georgo ! Ne diru tion ! Ili estas malbonaj kaj malpiaj paroloj ! Georgo, vi havas severan mastron, estas vere ! Li malbone kondutas kun vi… Mi ne intencas defendi lin. Sed vi scias ke la anĝelo ordonis al Hagar reiri al lia mastrino kaj humiliĝi antaŭ ŝi *(Genezo 16)*. La apostolo ankaŭ resendis Onezimo[n] al sia mastro *(Letero de Paŭlo al Filemono 1:10)*.

- Ne tiele citi al mi la Biblion, sinjoro Vilsono, diris Georgo kun la okulo brilega. Ne, ne citi ĝin al mi ! Ĉar mia edzino esti kristana, kaj mi voli esti tia, se iam mi sukcese povi tion. Citi al mi tiajn fragmentojn de la Biblio, en la situacio kie mi troviĝi, sufiĉi por forigi min de ĝi por ĉiam. Mi alvoki al ĉiopova Dio : mi esti preta pledi mian kaŭzon antaŭ Li, kaj demandi al Li, ĉu mi malpravi voli esti libera.

- Ĉi tiuj estas tre naturaj sentoj, Georgo, reparolis la digna fabrikisto kaj nazpurigis sin. Jes, tre naturaj, sed mi nepre devas ne subteni ilin. Jes, brava knabo mia, mi bedaŭras por vi. Ĉi tio estas grava, tre grava kazo ! La apostolo diris : "Ĉiu restu en la stato al kiu li estas vokita". Ni ĉiuj devas submetiĝi al la sugestoj de Providenco, komprenu, Georgo !

Georgo estis stara kun la kapo malantaŭe, la brakoj firme alpremitaj sur lia larĝa brusto, dum maldolĉa rideto kuntiris liajn lipojn.

- Sinjoro Vilsono, li diris, se la indianoj veni kapti vin,

vian edzinon kaj viajn infanojn kaj pretendi gardi vin dum la tuta vivo por plugi kaj kreskigi la maizon por ili, ĉu vi senti la nepran devon resti en la stato al kiu vi esti alvokita ? Mi plivole imagi ke la unua vaga ĉevalo kiu enfali en vian manon, ŝajni al vi sugesto de Providenco. Kion vi opinii pri tio ?

La malgranda maljunulo larĝe malfermis la okulojn al ĉi tia apologo. Li ne estis grava rezonemulo, sed li almenaŭ havis tion kio mankas al tiom multe da logikistoj pri ĉi tiu speciala temo, la saĝan kapablon silenti kiam oni havas nenion bonan por diri. Li komencis karesi sian pluvombrelon, kaj zorge glatigi ĉiujn sulketojn, esprimante de tempo al tempo kelkajn ĝeneralajn observojn.

- Vi bone scias, Georgo, ke mi ĉiam estis el viaj amikoj, tio kion mi diras estas por via bono. Vere ŝajnas al mi ke vi elmetas vin al terurajn riskojn ! Vi ne povas esperi sukcesi. Se vi estos kaptita, tio estos centoble pli malbona ol antaŭe. Oni mistraktos vin, kaj post esti duonmortiganta vin, oni vendos vin al Sudo, ĉe la malaltan riveron.

- Mi scii ĉi ĉion, sinjoro Vilsono. Mi elmeti min al riskoj; sed mi resti preta. *Li malfermis sian surtuton, kaj montris du pistolojn kaj iun pintan ponardon.* Neniam mi iri al sudo. Ne ! Se la aferoj tiel alveni, mi ĉiam havi la eblon konkeri ses futojn *(1,8m)* da libera tero, unuan kaj lastan posedaĵon kiun mi iam postuli de Kentukio.

- Vere, Georgo, vi estas en alarma mens-dispozicio ! Vi malespere parolas. Mi ĉagreniĝas ! Pensu ke vi estas malobservonta la leĝojn de via lando.

- Mia lando denove ! Sinjoro Vilsono, vi ja havi landon ! Sed mi kaj miaj samuloj, naskitaj de sklavaj patrinoj, kiun landon ni havi ? Kiuj leĝoj esti por ni ? Ni ne fari ilin, ni ne voĉdoni ilin, ni esti por nenio en ilin. Kompense ili humiligi nin kaj kurbigi nin al tero. Ĉu mi ne aŭdi viajn diskursojn de la

4an de julio[18] ? Ĉu vi ne diri al ĉiuj, unufoje jare, ke la registaroj ricevi sian justan potencon de la konsento de la regatoj ? Homo kiu aŭdi ĉi tiujn aferojn, ne kapabli reteni sin pensi, kompari la protestojn kun la faroj, kaj vidi tion kio eliĝi el tio.

La naturo de Sro Vilsono povis esti komparata al kotona pakego : ĝi estis mola, dolĉa, sen firmeco, kaj implikita. Li vere tutkore plendis Georgon; li havis nuban percepton pri la sentoj kiuj turmentis lin; sed li kredis sian devon diri al li bonajn parolojn, kun neeltenebla obstino.

- Georgo, ĉi tio estas malbona, mi devas amike konsili vin, ne ĵeti vin en tiujn ideojn. Ili estas malsanigaj, tre malsanigaj por homoj el via speco. *Sro Vilsono sidiĝis ĉe tablo, kaj komencis nervoze mordeti la tenilon de sia pluvombrelo.*

- Nun, sinjoro Vilsono, *diris Georgo antaŭenpaŝante kaj senhezite sidiĝante vidalvide al li*, rigardi min, mi peti. Ĉu mi ne esti ĉi tie homo tute kiel vi ? Vidi mian vizaĝon, vidi miajn manojn, vidi mian tutan personon. *Kaj la junulo fiere stariĝis*. Kial mi ne esti homo tiel bona kiel iu ajn ? Aŭskulti, sinjoro Vilsono, tion kion mi havi por diri al vi. Mi havi patron, unu el viaj Kentukiaj ĝentlemanoj, kiu ne taksi min inda esti metita aparte de siaj hundoj kaj ĉevaloj; kiu eĉ ne pensi antaŭŝirmi min kontraŭ vendado post sia morto por liberigi la posedaĵon. Mi vidi mian patrinon aŭkcie vendata, ŝin kaj ŝiajn sep infanojn. Ili esti venditaj antaŭ ŝiaj okuloj, unu post unu, ĉiuj al malsamaj aĉetantoj, kaj mi esti la plej juna. Ŝi veni kaj genuiĝi antaŭ mia malnova mastro, petegante lin aĉeti ŝin kun mi, por ke resti al ŝi almenaŭ unu infano. Li forpuŝi ŝin per bato de sia peza boto. Mi vidi lin, kaj lastfoje aŭdi la kriojn kaj ĝemojn de mia kompatinda patrino, kiam li alligi min al la kolo de sia ĉevalo por elkonduki

18 Datreveno de la Sendependeca Deklaro de Usono.

min ĉe li.

- Kaj poste ?

- Poste, mia mastro fari interŝanĝon kaj aĉeti mian pli aĝan fratinon; dolĉa kaj pia knabino, el la eklezio de la anabaptistoj, kaj tiel bela kiel esti mia kompatinda patrino, ankaŭ bone edukita, kaj bonmora. Mi unue ĝoji ke oni aĉeti ŝin; ŝi esti por mi kunulino, amikino. Sed mi ne malfrui bedaŭri. Mi stari ĉe la pordo, sinjoro, kaj aŭdi ŝin vipata; ĉiu bato akre tranĉi al mi la koron, kaj mi nenion povi por ŝi ! Oni vipi ŝin, sinjoro, ĉar ŝi voli konformiĝi al honesta vivo, al kristana vivo, malpermesita de viaj leĝoj por la kompatinda sklavino. Finfine, mi vidi ŝin katenita kun la grego de sklavkomercisto, kaj ekspedita al la Nov-Orleana merkato. Kaj tio nur ĉar ŝi obstini en sia honesteco. Ekde tiam mi ne plu scii ion pri ŝi. Mi kreski, dum longaj jaroj, sen patro, aŭ patrino aŭ fratino; sen animo kiu zorgi pri mi pli ol pri hundo : vipita, riproĉita, malsatigita ! Jes, sinjoro, mi ofte tiom malsategi ke mi esti tro feliĉa pluki la ostojn kiujn oni ĵeti al la hundaro; kaj tamen, kiam, tute malgranda knabo, mi nokte maldormi kaj plori, ĝi ne esti pro malsato, ĝi ne esti pro la vipo, ne ! mi plori pri mia patrino kaj miaj fratinoj; mi plori pro ne havi sur la tero amikon kiu ami min. Mi neniam sperti pacon aŭ konsolon : neniam oni direkti al mi amoplenan vorton, ĝis la tago kiam mi iri labori en via fabriko, sinjoro Vilsono. Vi humane trakti min; vi kuraĝigi min bone fari, lerni legi, skribi, ekzerciĝi en io, kaj Dio scii kiun ŝuldosenton mi teni por vi ! Estis tiam kiam mi ekkoni mian edzinon; vi vidi ŝin, vi scii kiel bela ŝi estas ! Kiam mi ekscii ke ŝi ami min, kiam mi edziĝi kun ŝi, mi apenaŭ povi kredi ke mi vivi, mi esti tiel feliĉa. Kaj sinjoro, ŝia koro esti ankoraŭ pli bela ol ŝia vizaĝo. Nu ! Nun veni mia mastro kiu tuj forpreni min de mia laboro, de miaj amikoj kaj de ĉio kion mi ami, kiu frakasi min kaj enbati min ĝis la lipoj en la koton. Kaj kial ? Ĉar, li diri,

mi forgesi kiu mi esti, kaj ke li instrui min ke mi esti nur negro ! Tio ne esti ĉio; li ĵeti sin inter mia edzino kaj mi, li ordoni al mi forlasi ŝin por iri vivi kun alia. Kaj viaj leĝoj kiuj doni la potencon fari ĉion ĉi antaŭ Dio kaj homoj ! Gardi vin kontraŭ tio, sinjoro Vilsono, ne esti unu sola el tiuj aferoj kiuj ŝiri la koron de mia patrino, de mia fratino, de mia edzino kaj de mi, ke viaj leĝoj ne kondamni kaj ne permesi ĉiun homon fari en Kentukio, sen ke iu ne povi diri ne al li ! Ĉu vi nomi ĉi tiujn leĝojn, la leĝoj de mia lando ? Mi ne havi landon, sinjoro, ne pli ol mi havi patron ! Esti lando kiun mi esti serĉonta. Pri la via, mi peti de li nenion krom lasi min transpasi. Se mi alveni al Kanado, kies leĝoj akcepti kaj protekti min, Kanado esti mia lando, kaj mi obei al ĝiaj leĝoj. Sed se iu provi haltigi min, ve al li ! Ĉar mi esti senespera. Mi batali por mia libereco ĝis la lasta spiro. Vi honori viajn patrojn ke ili same fari. Tio kio esti prava por ili, ankaŭ tiel esti por mi.

Ĉi tiu rakonto, donita parte sidante ĉe la tablo, kaj parte paŝante tien kaj reen en la ĉambro, akompanata de ploroj, de flamaj rigardoj, de energiaj gestoj, estis pli ol povis elteni la pacema kaj bona naturo de la digna viro al kiu li parolis : li elprenis el sia poŝo grandan flavan naztukon kaj viŝis al si la vizaĝon per ĉiuj siaj fortoj.

- Dio senmaskigu ilin ! li subite ekkriis. Ĉu mi ne ĉiam diris tion ! La malnova infera malbeno ! Mi tamen ne volus ĵuri ! Nu, iru antaŭen, Georgo, iru antaŭen ! Sed estu singarda, knabo mia : pafu neniun, Georgo, krom se... sed ne... pli bone estus ne pafi, mi kredas. Mi ne celumus, se mi estus sur via loko. Kie estas via edzino, Georgo ? *Li ekstaris tuŝita de nervoza ekscitiĝo kaj promenis en la ĉambro.*

- Fuĝanta, sinjoro, foririnta kun sia infano en siaj brakoj, por iri nur Dio scii kien ! Al la polusa stelo ! Kaj kiam ni retrovi unu la alian, se iam ni retrovi unu la alian, tion neniu

estulo povi diri.

- Ĉu eblas ? Fuĝanta ! de ĉe tiel bonaj mastroj, de tiel bona familio !

- La plej bonaj familioj ŝuldiĝi, kaj la leĝoj de nia lando rajtigi al ili forpreni la infanon el la sino de lia patrino, kaj vendi lin, por pagi la ŝuldojn de la mastro, amare diris Georgo.

- Bone ! Bone ! *reparolis la honesta fabrikisto serĉfosante en sia poŝo*. Eble mi ne agas akorde kun mia juĝo. Domaĝe, ja ! Mi ne volas aŭskulti miajn skrupulojn… Prenu, Georgo ! *Kaj elprenante el sia monpaperujo faskon da monbiletoj, li prezentis ilin al li.*

- Ne, bona sinjoro mia; vi jam multe fari por mi, kaj mi timi kaŭzi al vi kelkajn embarasojn. Mi havi sufiĉe da mono, mi esperi, por alvenigi min tien kien necesi al mi iri.

- Ne, ne, Georgo, prenu. Mono ĉie estas granda helpo; oni ne povas tro havi ĝin, kiam oni honeste havas ĝin. Prenu ĝin, prenu, mi petegas vin, knabo mia.

- Mi akcepti ĝin, sinjoro, kondiĉe ke mi iam redoni ĝin al vi.

- Kaj nun, Georgo, diru al mi : kiom da tempo vi planas tiel vojaĝi ? Nek for nek longtempe, mi esperas. La artifiko estas bone organizita, sed tro aŭdaca. Kaj ĉi tiu nigrulo, kiu li estas ?

- Fidinda viro, kiu fuĝi al Kanado antaŭ pli ol unu jaro. Li tie ekscii, per diraĵo, ke, furioza pro lia fuĝo, lia mastro vipigi sian kompatindan maljunan patrinon; kaj li reveni la tutan vojon por veni konsoli ŝin, kaj provi la ŝancon revenigi ŝin kun li.

- Ĉu li sukcesis tion ?

- Ne jam; li vagadi ĉirkaŭ la loĝejo, sed sen sukcesi trovi la banan momenton. Dume li akompani min ĝis en Ohio; tie li transdoni min inter la manoj de amikoj kiuj helpi lin;

poste li reveni serĉi sian patrinon.

- Tio estas danĝera, tre danĝera, diris la maljunulo.

Georgo rektiĝis kaj malŝate ridetis. S^ro Vilsono ekzamenis lin de la kapo ĝis la piedoj kun naiva surprizo.

- Georgo, io tute aliigis vin; vi ne plu estas la sama. Vi fiere levas la kapon, vi parolas, vi agas.

- Esti ĉar mi esti libera, fiere rebatis Georgo. Jes sinjoro, mi lastfoje diris "mastro^n" al homo. Mi esti libera.

- Gardu vin ! Tio ne certas, vi povas esti rekaptita.

- Ĉiuj homoj esti egalaj kaj liberaj en la tombo, se la aferoj tiel alveni, sinjoro Vilsono.

- Mi konsterniĝas pro via aŭdaco ! Loĝi ĉi tie ! Ĉe la plej najbara taverno !

- Ĝuste; la afero esti tiel aŭdaca, la taverno tiel najbara, ke ili ne pensi pri tio. Ili serĉi min pli for. Vi mem peni rekoni min. La mastro de Jakobo ne loĝi en ĉi tiu grafejo; li ne esti konata ĉi tie. Kaj pri Jakobo, ĉiu esploro esti forlasita. Neniu pripensi, mi pensas, aresti min laŭ la priskribo.

- Sed, diris S^ro Vilsono heziteme, la marko… en via mano ?

Georgo demetis sian ganton, kaj montris nove resanigitan cikatron.

- Lasta pruvo de la estimo de S^ro Hariso, li diris. Antaŭ dekkvinkelkaj tagoj li enkapigi al si doni tion al mi, ĉar li suspekti min, li diri, voli forkuri. Tio ŝajnigi interesan, ĉu ne ? *Kaj li remetis sian ganton.*

- Mia sango glaciiĝas nur pensante pri via pozicio, Georgo, pri viaj riskoj !

- La mia esti de longe glaciigita, sinjoro Vilsono, dum jaroj. Nun ĝi bruligi miajn vejnojn. *Li daŭrigis, post momento de silento.* Mi vidi ke vi rekoni min; mi voli paroli kun vi, pro timo ke via surprizo malkaŝi min. Mi foriri morgaŭ

matene antaŭ tagiĝo; morgaŭ vespere mi esperi dormi sana kaj savita en Ohio. Mi tage vojaĝi, halti ĉe la plej bonaj hoteloj, kaj vespermanĝi ĉe la komuna tablo kun la sinjoroj kaj moŝtoj de la lando. Adiaŭ, sinjoro; se vi aŭdi ke mi esti kaptita, esti certa ke mi esti morta !

Georgo, rekta kaj firma kiel roko, etendis la manon kun mieno de princo al S^ro^ Vilsono, kiu kore premis ĝin. Poste esti ripetinta ĉiujn siajn rekomendojn pri singardemo, la vireto ekprenis sian pluvombrelon, kaj pretiĝis por eliri, mallerte palpante sian vojon.

Georgo penseme rigardis lin foriri; subite brileto trapasis lian spiriton, li revenigis lin.

- Sinjoro Vilsono, ankoraŭ unu vorton.

La maljunulo reeniris. Kiel plifrue, Georgo reŝlosis la pordon. Poste li restis revema kaj nedecidema, kun la okuloj fiksitaj al la planko. Fine, pene levante la kapon, li diris :

- Sinjoro Vilsono, vi montriĝi kristano en la maniero per kiu vi trakti min. Mi voli peti de vi lastan agon de kristana karitato.

- Parolu, Georgo.

- Nu, sinjoro, tio kion vi diri estis vera. Mi meti al mi teruran riskon ! Ne esti animo sur la tero kiu maltrankviliĝi pri tio, ĉu mi vivi aŭ morti, *li aldonis, pene spirante kaj malfacile parolante*. Mi esti eksteren elpelita per piedbatoj, entombigita kiel hundo, kaj neniu pensi pri tio la sekvan tagon, neniu krom mia kompatinda edzino ! Ŝi ja plori, kun afliktita koro. Se vi nur povi trovi rimedon sendi al ŝi ĉi tiun pinglon. Ŝi donace doni ĝin al mi pasintan Kristnaskon. Kompatinda animo ! Redoni ĝin al ŝi, kaj diri al ŝi ke mi ami ŝin ĝis la fino. Ĉu vi fari tion ? Ĉu vi voli tion ? *li viglece aldonis*.

- Jes certe. Kompatinda knabo ! diris la maljunulo prenante la pinglon, kun la okuloj malsekaj kaj la voĉo

tremetanta.

- Diri al ŝi unu aferon, reparolis Georgo, esti ke mia lasta deziro esti ke ŝi iri al Kanado. Ne gravi ke ŝia mastrino esti bona; ne gravi ĉu ŝi mem esti ligita al la domo; ke ŝi ne reiri tien, ĉar la sklaveco ĉiam finiĝi en mizero. Diri al ŝi eduki nian filon kiel liberan homon, por ke li ne suferi kiel mi suferi. Vi diri tion al ŝi, ĉu ne, sinjoro Vilsono ?

- Jes, Georgo; sed vi ne mortos, mi esperas. Kuraĝiĝu. Vi estas brava knabo ! Fidu al Disinjoro, Georgo. Mi deziras per mia tuta animo, ke vi estu ekster tio sana kaj savita.

- Ĉu esti Dio al kiu fidi ? *diris Georgo kun amara malespero kiu abrupte ĉesigis la admonojn de la maljunulo*. Ho ! Mi vidi aferojn dum mia tuta vivo, kiuj dubigi min ke ekzisti Dio. La kristanoj ne scii per kia okulo ni vidi iliajn agojn ! Esti Dio por vi, sed por ni ?…

- Ho ! Ne diru tion, knabo mia ! *diris la brava viro plorĝemante*. Ne pensu tion ! Estas unu Dio por ĉiuj. Nuboj kaj mallumo ĉirkaŭas lin, sed justeco kaj honesteco loĝas apud lia trono. Dio estas, Georgo, vere kredu tion, kredu al li, kaj li helpos vin, mi certas pri tio. Ĉio estos ĝustigita, en ĉi tiu vivo aŭ en la alia.

La sincera pieco, la reala bonkoreco de la bona maljunulo donis al li aŭtoritaton kaj dignon. Georgo interrompis sian impetegan paŝadon, restis pensema dum momento kaj diris per trankvila voĉo :

- Dankon ! Dankon esti tiel parolanta al mi. Mi konsideri tion.

13. Incidentoj de laŭleĝa komerco.

Oni aŭdis en Rama kriadojn, lamentadojn, ploradojn kaj laŭtajn ĝemadojn : Raĥel ploranta siajn infanojn kaj ne volanta esti konsolita, ĉar ili jam ne plu estas (Mateo 2:18 aŭ Jeremio 31:15).

S^ro Halej kaj Tomo bone-malbone kunveturis, absorbitaj de siaj pensadoj. Estas mirinda afero ke la malsameco kiu povas esti renkontita en la pripensoj de du homoj, sidantaj flankon ĉe flanko sur la sama benko, provizitaj per la samaj organoj, same havantaj okulojn, orelojn, manojn, kaj vidantaj la samajn objektojn pasi antaŭ ili.

S^ro Halej, ekzemple, unue pensis pri la staturo de Tomo, lia larĝeco, lia alteco, pri tio kion li povus valori se li estus tenita grasa kaj bonstata, kiam li montros lin ĉe la merkato. Li poste pripensis pri la maniero per kiu li prezentus sian varon; pri la proksimuma valoro de viroj, virinoj, infanoj, kiujn li intencis aĉeti por konsistigi elittrupon. Poste li faris memanalizon, kaj aplaŭdis sin pro sia humaneco. Dum liaj kolegoj "streĉe ligis" siajn negrojn, li kontentiĝis meti al ili katenoj ĉe la piedojn, lasante al ili liberan uzon de iliaj manoj, kondiĉe ke ili ne trouzu tion. Li suspiris pro la sendankeco de la homa naturo; ĉar li suspektis ke Tomo ne estimis tiom da respektoj. Kiomfoje li ne estis trompita de la negroj kiujn li plej bone traktis ! Tial li miris ke li restis tiel bona.

Pri Tomo, li pensis pri kelkaj paroloj de elmodiĝinta malnova libro kiu revenis al lia memoro : "*Ni tute ne havas ĉi tie sube daŭran urbon, sed ni serĉas la venontan urbon. Tial Dio mem ne malŝatas esti nomata nia Dio; ĉar li preparis por ni eternan loĝejon*". Ĉi tiuj paroloj el malnova volumo, kolektitaj de malkleraj, analfabetaj homoj, de ĉiam disvolvis

dank' al mi ne scias kian potencan magion, strangan povon super la mensoj de la malriĉuloj kaj humiluloj. Ili skuas la animon ĝis en ĝiaj profundecoj; ili vekas, kiel la sono de la klariono, la kuraĝon, la energion, la entuziasmon; ili dispelas la mallumon de malespero kaj morto.

S^ro Halej elprenis el sia poŝo diversajn gazetojn, kaj komencis tralegi la anoncojn kun profunda intereso. Malmulte trejnita al la legarto, li adoptis ian duonvoĉan recitativon, alvokon de siaj okuloj al siaj oreloj. Li deklamis per ĉi tiu tono la jenan paragrafon :

"Postule de la testamentaj plenumantoj,
VENDO de la JUSTICA ATORITATO – GENIGRULOJ
Laŭ ordono de la kortumo, estos vendataj, mardon la 20^an de februaro, antaŭ la pordo de la juĝejo, en la vilaĝo Vaŝingtono (Kentukio), la genigrulojn menciitajn ĉi poste : Hagar, 60-jaraĝa; Johano, 30-jaraĝa; Beneo, 21-jaraĝa; Saŭlo, 25-jaraĝa; Alberto, 14-jaraĝa . La dirita vendo profite al la kreditoroj de la heredo de Ĵeso Bluĉfordo, eskviro.
Ĵeromo FLINTO, Samuelo MORICO, plenumantoj."

- Mi viglos tion, *li diris al Tomo, pro manko de iu alia kun kiu paroli*. Komprenu, negro, mi volas organizi sortimenton de elektindaj artikloj, por konduki ilin tien kun vi. Tio faros al vi kompanion; tio helpos vin pasigi la tempon. Ni unue iros rekte al Vaŝingtono; tie, mi lokos vin en malliberejon, dum mi iros kaj plenumos mian aferon.

Tomo ricevis ĉi tiun agrablan novaĵon kun perfekta kvieteco, nur sin demandante, funde de sia koro, ĉu ĉi tiuj kompatindaj malfeliĉuloj havis edzinojn kaj infanojn, kaj ĉu ili suferis, kiel li, disiĝante de ili. Necesas ankaŭ agnoski ke la perspektivo esti lokita en malliberejo ne ebligis rideti iun kompatindulon, kiu fieris dum sia tuta vivo pri la plej strikta lojaleco. Jes, Tomo estis fiera pri sia honesteco, ne havante multajn aliajn kialojn de orgojlo. Se li apartenus al la plej

altaj klasoj de la socio, eble li ne estus trudpelita al tio.

Tamen la tago pasis, kaj la vespero vidis Halej kaj Tomo komforte loĝintaj en Vaŝingtono, unu en la hotelo, kaj la alia en la malliberejo.

La morgaŭon, ĉirkaŭ la dekunua, konfuza homamaso kunpremiĝis sur la ŝtupoj de la juĝejo, fumante, tabakmaĉante, kraĉante, sakrante, babilante, laŭ la inklinoj kaj humoro de ĉiu, atendante ke la vendo komencu.

La vendotaj viroj kaj virinoj aparte grupigitaj mallaŭte parolis unu al la alia. La nigrulino Hagar, kape de la listo, estis el pura afrika raso, trajtoj kaj staturo. Ŝi povis esti sesdekjara, sed malfacila laboro kaj malsano maljunigis ŝin. Ŝi estis duonblinda kaj kripla pro reŭmatismo. Apud ŝi staris ŝia plej juna filo, Alberto, vigla kaj inteligenta dekkvarjara knabo, la sola kiu supervivis grandan familion, kiun la patrino vidis sinsekve vendata al la sudaj merkatoj. Alkroĉiĝinta per ambaŭ manoj al la junulo, ŝi timege rigardis kiu ajn alproksimiĝis por ekzameni lin.

- Ne timi, onklino Hagar, diris la pli maljuna negro, mi paroli pri li al massa Ĵeromo, kaj li provi vendi vin du kune.

- Ne ŝajnigi min kiel maljuna kaj bona por nenio, ŝi impete diris. Mi scii kuiri, frotpurigi, frotlavi. Mi valori la monon, se oni ne tro postuli de mi. Diri tion al ili, diri do tion al ili ! ŝi vigle aldonis.

Halej traboris al si la vojon tra la grupo, rekte iris al la maljunulo, tiris al li la malsupran makzelon, ekzamenis la internon de lia buŝo, tuŝis al li la dentojn unu post alia, igis lin rektiĝi, streĉiĝi, kurbiĝi kaj plenumi diversajn movojn, por juĝi pri la funkciado de la muskoloj. Li poste iris al alia kiun li submetis al sama provado. Fine alveninta antaŭ la juna knabo, li palpis liajn brakojn, malfermis al li la manojn, rigardis liajn fingrojn kaj ordonis al li salti por montri lian lertecon.

- Li ne esti vendita sen mi, pasie diris la maljunulino. Li kaj mi esti nur unu pakaĵo. Mi esti forta, nu, mastro ! Mi povi fari amasojn da laboro… amasojn… mastro !

- Ĉu sur la plantejoj ? *reparolis Halej kun disdegna rigardo*, bona rakonto ! *Kaj kontenta pri sia ekzameno, li foriris kun ambaŭ manoj en la poŝoj, sia cigaro en la buŝo, kaj sia ĉapelo oblikve, atendante la momenton por agi.*

- Kion vi pensas pri tio ? diris viro kiu sekvis Halej[on] dum lia kontrolado, kvazaŭ por informiĝi pri lia sperto.

- Mi vidos… Mi kredas ke mi celos la pli junajn, kaj la infanon, li rebatis.

- Sed oni volas vendi lin nur kune kun la maljunulino, diris la alia.

- Tio estos malfacila por eltiri ! La maljunulino estas nur aro da ostoj; ŝi ne valoras la salon kiun ĝi manĝos.

- Vi do ne metus sur ŝi ?

- Ia stultulo ! Ŝi estas pli ol duonblinda, tute kurbakrura pro reŭmatismo, kaj krome stulta.

- Tamen estas tiuj kiuj aĉetas ĉi tiujn maljunulinojn, kaj kiuj asertas ke ili longe daŭras kaj ke oni povas tiri el ili pli bonan profiton ol oni kredus, diris la demandanto kun pripensema tono.

- Neniam estos mi; mi ne volus ŝin, eĉ se oni donacis ŝin al mi. Estas decidite, cetere.

- Nu ! Estus tamen kompata maniero aĉeti ŝin kun ŝia filo; ŝi estas tro ligita al li; ŝi ne kapablos malhavi lin. Ni supozu ke oni rabate vendu ŝin ?

- Ĝi estas bona por tiuj kiuj havas monon por malŝpari. Mi ja metos proponon por la knabon. Estas ŝanco por vendi lin al plantisto; sed mi ne intencas embarasi min per la maljunulino; ne, ne eĉ se oni donu ŝin al mi kontraŭ nenio.

- Ŝi prenos la aflikton grave al la koro, diris la alia.

- Verŝajne, indiferente respondis la vendisto.

Konfuzita zumo interrompis la konversacion; la anoncisto, dika viro, grava kaj aferema, boris al si vojon per kubutoj en la homamason. La maljunulino retenis sian spiron, kaj instinkte altiris la infanon al ŝi.

- Stari vin apud patrino, Alberto, tute proksime, ĉu vi aŭdi ?… Post momento la viro aŭkcii nin kune.

- Mi timi ke ne, patrino, diris la juna knabo.

- Necesi, infano; ili bone scii ke mi ne povi vivi sen vi, diris impete la maljunulino.

La komisiito anoncis, per stentora voĉo, ke la vendado tuj komenciĝos. La homamaso malproksimiĝis, la aŭkcio estis malfermita. La viroj estis aljuĝitaj por prezojn kiuj pruvis, ke la varoj estis deziratai, kaj la kurzoj bone prizorgataj. Du estis aljuĝitaj kiel parton al Halej.

- Nu, junulo ! diris la anoncisto tuŝante la infanon per sia martelo, ekstaru kaj montru al ni la flekseblecon de viaj artikoj !

- Ho ! Kunmeti nin ambaŭ, mastro ! Kune, mi peti ! diris la maljunulino alkroĉiĝante al sia filo.

- Maltenu do ! kriis la viro, dum li krude malkroĉis la manojn de la virino, vi ja venos laste ! Nu ! Saltu, negrido !

Li puŝis la infanon al la stabloj. Obtuza kaj plenda ĝemo laŭtiĝis malantaŭ li. La juna knabo hezitis, sin turnis, sed la minutoj estis kalkulitaj, kaj forpelante per la mandorso la larmojn de siaj grandaj okuloj, li impetis al la podio.

Lia svelta staturo, liaj lertaj membroj, lia inteligenta vizaĝo, tuj okazigis viglan konkurencon. Duondekduo da ofertoj samtempe atakis la orelojn de la anoncisto. La koncernato de la kontesto, malserena, konsternita, rigardis flanken kaj aliflanken dum la ofertoj sinsekvis, jen ĉi tie, jen tie, ĝis kiam refalis la levita martelo. Li apartenis al Halej. Oni puŝis lin al lia nova mastro. Li momente haltis por rigardi sian kompatindan maljunan patrinon kiu, tremanta per ĉiuj

siaj membroj, etendis al li siajn senfortigitajn manojn.

- Aĉeti ankaŭ min, mastro ! Por la benata amo de Disinjoro, aĉeti min !… Se vi ne aĉeti min, mi morti !

- Vi vere mortus, se mi farus tion, jen la problemo ! diris la vendisto. Kaj li sin turnis sur la kalkanoj.

La aŭkcio de la kompatinda estulino ne estis longdaŭra. La viro kiu alparolis al Halej, kaj kiu ne ŝajnis senkompata, aĉetis ŝin kontraŭ preskaŭ nenio, kaj la spektantoj komencis disiĝi.

La malĝojaj viktimoj kiuj loĝis en la sama loko dum jaroj, kolektiĝis ĉirkaŭ la kompatinda patrino kies suferego dolorigis esti vidata.

- Ĉu ili do ne povi lasi unu al mi ?… La mastro ĉiam diri ke mi havi unu; li diri tion ! *ŝi ripetis ree kaj ree per rompita voĉo.*

- Necesi fidi al Disinjoro, onklino Hagar, reparolis malĝoje la plej maljuna el la trupoj.

- Por kio utili ? ŝi diris, amare plorĝemante.

- Patrino ! Patrino ! Ne afliktiĝi, ekkriis la infano, ili diri ke vi fali ĉe bonan mastron.

- Ne gravi al mi, ĉu li esti bona aŭ malbona ! Ĉio egali por mi ! Ho, Alberto ! Mia knabo ! La lasta kiun mi nutri ! Disinjoro, bona Dio ! Kiel mi fari !…

- Nu, forprenu do ŝin ! Iu forprenu ŝin, seke diris Halej. Tio ne bone efikas nek por ŝi, nek por la aliaj, lasi ŝin kriaĉi per tiu tono !

La pli aĝaj el la ĉeestantoj sukcesis, duone per nura persvado, duone per perforto, disigi la kompatindan estulinon de la frukto de ŝia ventro, kaj kondukis ŝin al la ĉaro de ŝia nova mastro, strebante konsoli ŝin.

- Nun, niavice ! diris Halej. Li kunigis siajn tri aĉetaĵojn, kaj elprenis el sia surtuto, provizon da mankatenoj, kiujn li firme alfiksis ĉirkaŭ iliaj manartikoj.

Longa ĉeno, trapasita tra la ringoj, servis lin por peli ilin antaŭ li ĝis la malliberejo.

Malmulte da tagoj poste, la vendisto sidiĝis sur unu el la ŝipoj de Ohio, kun siaj posedaĵoj, komenco de la elektinda kargo kiun li devis kompletigi, kolektante, ĉe diversaj lokoj de la riverbordo, la varojn kiujn li, aŭ liaj agentoj, rezervis.

La Bela-Rivero, unu el la plej belaj kaj la plej bonaj boatoj kiuj neniam trasulkis la akvojn de sama nomo[19], gaje iris laŭflue sub luma ĉielo. La steloj kaj strioj de la flago de la libera Ameriko disvolviĝis kaj flirtis en la aero. Belaj sinjorinoj, belaj sinjoroj, promenis kaj babilis sur la ferdeko, ĝuante sunbrilan tagon. Ĉiuj estis plenaj de vivo, sanaj, gajaj. Ĉiuj krom la trupo de Halej kiu, enmagazenigita kun alia kargo en la interferdeko, ŝajnis ne ŝati siajn diversajn privilegiojn. Amase kolektitaj, la nigruloj parolis inter si mallaŭte.

- He ! Infanoj, diris Halej frotante al si la manojn, mi esperas ke vi staras kun ĝoja koro ! Neniun insidemecojn, mi ne ŝatas ilin, komprenu ! Kun nazo alvente kaj ridanta buŝo, knaboj ! Kondutu bone kun mi, mi kondutos bone kun vi.

La sklavoj respondis per la neŝanĝebla "Jes, mastro" kiu, de nememorebla tempo, estis la instrukcio de la kompatinda Afriko. Sed ili ne fariĝis pli gajviglaj. Ili havis kelkajn antaŭjuĝojn koncerne la patrinojn, edzinojn kaj infanojn, kiujn ili lastfoje vidis. Kaj kvankam "tiuj kiuj elpremis ilin, postulis gajecon de ili", ĝi ne povis tuj naskiĝi. "*Mi havi edzinon !* diris la artiklo enskribita sub la nomo de - Johano, tridekjara - kaj li metis sian ĉenitan manon sur la genuon de Tomo; *ŝi ne scii eĉ vorton pri ĉio ĉi, kompatinda estulino !*

- Kie ŝi loĝi ? demandis Tomo.

- En taverno, ĉi tie proksime, malsupre de la rivero. Se

19 O-Hio, indiana vorto kiu signifas belan akvon, belan riveron

mi nur povi ankoraŭ vidi ŝin unufoje en ĉi tiu mondo !

Kompatinda Johano ! Tio estis tre natura deziro; kaj liaj larmoj fluis tiel nature kiel tiuj de blankulo. Profunda suspiro eligis el la ĉagrenita koro de Tomo, kaj li provis, laŭ sia humila bontrovo, konsoli lin.

En la supra kajuto sidis patroj, patrinoj, edzoj kun siaj edzinoj. Ĝojaj infanoj kuris, saltis, turniĝadis ĉirkaŭe, kiel tiom da gajaj papilioj ! La vivo abunde fluis facila kaj dolĉa.

- Ho ! Panjo, diris knabeto kiu supreniris de la suba etaĝo, estas sklavkomercisto surŝipe, kaj li havas tie kvar aŭ kvin nigrulojn.

- Kompatindaj estuloj ! diris la patrino per tono duone malĝoja, duone indigna.

- Kio estas ? diris alia sinjorino.

- Kompatindaj sklavoj en la interferdeko.

- Kaj ili estas ĉenitaj ! rekomencis la infano.

- Estas honto por nia lando ke oni vidas tiajn aferojn ! ekkriis tria virino.

- Ho ! Estas multe por diri pri la "por" kaj la "kontraŭ", *diris bela sinjorino, okupita kudri ĉe la pordo de la salono, dum ŝiaj knabeto kaj knabineto ludis antaŭ ŝi*. Mi iris en la Sudo, kaj mi devas diri ke la negroj ŝajnas al mi ĉiuflanke pli feliĉaj ol se ili estus liberaj.

- Kelkaj eble, laŭ iuj vidpunktoj, *rekomencis la ulino kiu okazigis ĉi tiun respondon*. Laŭ mi, la plej terura plago de la sklaveco estas la ofendego farita al sentoj kaj al korinklinoj, ekzemple la disiĝo de familioj.

- Tio fakte estas malbona afero, certe, *diris la alia, suprenlevante robeton de infano kiun ŝi ĵus finis, kaj zorge ekzamenante la garnaĵon*, sed mi imagas ke tio ne ofte okazas.

- Tre ofte, male, *vigle reparolis la unua*. Mi vivis dum jaroj en Kentukio kaj Virginio, kaj tie vidis korŝirajn scenojn.

Ni supozu, sinjorino, ke viaj du jenaj infanoj estu forkaptitaj kaj venditaj ?

- Ni ne povas kompari nian sentmanieron kun tiu de ĉi tiuj homoj, *diris la sinjorino, asociante lanpecojn sur siajn genuojn*.

- Vi ne konas ilin, pro tiel paroli pri ili, *varme diris la unua*. Mi naskiĝis kaj kreskis inter ili. Mi scias ke ili sentas tiel intense, kaj eble pli intense, kiel ni.

- Ĉu vere ? *oscedis la sinjorino. Ŝi rigardis tra la fenestro de la kajuto kaj konklude ripetis :* Tamen mi kredas ilin pli feliĉajn ol se ili estus liberaj.

- La intenco de Providenco sendube estas ke la afrika raso estu sklavigita, tenata en stato de malsupereco, *daŭrigis membro de la klerikaro, nigre vestita gravulo sidanta ekster la kajuto*. "Malbenita estu Kanaano; sklavo de sklavoj li estu ĉe siaj fratoj" *(Genezo 9:25)*. La Skribo diras tion.

- Ĉu vi certas, kara mia, ke ĉi tiu teksto diras tion kion vi igas ĝin diri, *demandis granda viro kiu staris apud li*.

- Sen iu ajn dubo. Plaĉis al la Providenco, pro kelka nepenetrebla celo, kondamni ĉi tiun rason al servuteco dum jarcentoj. Ne rajtas al ni kontraŭmeti nian opinion al la dekretoj de Disinjoro.

- Tiuokaze, ni antaŭeniru, kaj aĉetu nigrulojn, diris la viro, ĉar Providenco volas tion. Ĉu vi ne konsentas kun tio, kara mia ? *Li turnis sin al Halej, kiu kun manoj en poŝoj apud la stovo, atente aŭskultis la konversacion*. Jes, li daŭrigis, ni ĉiuj devas rezignacii antaŭ la dekretoj de Providenco. La nigruloj devas esti venditaj, sklavigitaj, interŝanĝitaj. Ili estas faritaj por tio, kiel ni por aĉeti ilin. Tio estas tute trankviliga vidpunkto, kion vi diras pri tio, kara mia ? *li demandis al Halej*.

- Mi neniam pripensis tion, respondis la vendisto. Mi ne

kapablus tiom diri pri tio kiom ĉi tiu sinjoro. Mi ja ne estas klerulo. Mi prenis ĉi tiun komercon por amasigi profiton; kaj se estas io por kritiki, Dio mia ! Mi kalkulis ke mi ĉiam havos tempon por pripenti. Vi komprenas.

- Kaj nun vi ŝparos al vi la penon, ĉu ne ? Vidu tion kio estas koni la Skribon ! Se nur vi studintus vian Biblion, kiel ĉi tiu sankta viro, vi scius pri kio temas, kaj vi ŝparintus al vi multe da turmentoj. Vi nur devintus diri, "Malbenita estu tiu… " Kiel do vi nomas lin ? Kaj ĉio tute glate funkcius.

La fremdulo, kiu estis neniu alia ol la honesta bredisto de brutoj, kun kiu ni jam konatiĝis en la Kentukia taverno, sidiĝis kaj komencis fumi, dum mokema rideto ŝrumpigis lian longan kaj maldikan vizaĝon.

Juna pasaĝero, kun afabla kaj inteligenta fizionomio, enmiksiĝis : "Tio kion vi volas ke la homoj faru al vi, same faru tion al ili". Ŝajnas al mi, li aldonis, ke ĉi tio estas ekstrakto de la Sankta Skribo, tute tiel bona kiel "Malbenita estu Kanaano".

- La teksto ŝajnas almenaŭ same klara al sensciuloj kiel ni, diris la bredisto, blovante vulkanajn elspiraĵojn de fumo.

La junulo estis pli dironta, sed la boato haltis. Laŭ la kutimo, ĉiuj pasaĝeroj rapidegis al la pruo por vidi kien ni albordiĝis.

- Tiuj estas du manieroj de pastoroj, ĉu ne ? demandis la bredisto al unu el la viroj kiuj elŝipiĝis.

La alia signis sian jesadon per movo de la kapo.

Ĉe la momento kiam la radoj de la maŝino ĉesis bati la akvon, nigrulino ekĵetiĝis de la riverbordo sur la mallarĝan tabulon, trairis tra la homamaso, kaj atinginte la interferdekon, ĵetis siajn du brakojn ĉirkaŭ la malbonsortan artiklon, enfakigita sub la titolo de - Johano, tridekjara -. Ŝiaj ploroj, ŝiaj plorĝemoj depostulis lin kiel edzo.

Sed ĉu necesas ripeti la rakonton tiel ofte rakontitan,

ĉiutage ripetitan, pri rompitaj ligoj, pri malesperigaj koroj, pri la malfortuloj ekspluatataj de la fortuloj ? Ĉu ĝi ne senĉese renoviĝas ? Ĉu ĝi ne sufiĉe laŭte krias en la orelojn de tiu kiu aŭdas, kvankam li silentas ?

La junulo, kiu defendis la kaŭzon de Dio kaj de la homaro, kontemplis ĉi tiun scenon. Li turnis sin al Halej.

- Mia amiko, li diris per kortuŝa voĉo, kiel vi kapablas, kiel vi aŭdacas fari ĉi tiun malpian trafikon ?... Rigardu ĉi tiujn kompatindajn estulojn ! Jen mi ĉi tie, mi, tre ĝoja iri retrovi en la loĝejo mian edzinon kaj mian infanon. Kaj la sama sonorilo, kiu sciigas al mi ke mi estas alproksimiĝonta al ili, tintas por ĉi tiu viro kaj lia edzino la funebran sonoradon de la disiĝo ! Iam, estu certa, Dio petos al vi praviĝi pri ĉi tio.

La silenta vendisto deturnis sin.

- Mi diras, kara mia, reparolis la bredisto, tuŝante al li la kubuton ke estas pastro kaj pastro. Ĉi tiu ne ŝajnas al mi kapabla digesti la "Malbenitan Kanaanon !"

Halej eligis malkvietan grumbladon.

- Kaj tio kio estas pli malbona, daŭrigis la alia, estas ke Disinjoro mem povus treege skandaliĝi per tio, kiam vi venos, kiel ni ĉiuj, por reguligi viajn kontojn kun li, unu el tiuj tagoj.

Halej penseme paŝis ĝis la alia fino de la boato.

"Se mi realigos sufiĉe bonan profiton per unu aŭ du el miaj venontaj negocoj, li pensis, mi retiriĝos ĉi tiun jaron. La metio fariĝas danĝera". Li elprenis sian notlibron, kaj komencis sumigi siajn kontojn; tre efika specifaĵo por malserena konscienco, kaj por multaj aliaj komercistoj ol S^ro^ Halej.

La boato fiere malproksimiĝis de la riverbordo, kaj ĉio denove iris laŭ sia ĝoja vojo. La viroj rekomencis babili, legi, fumi, la virinoj kudri, la infanoj ludi, kaj la radoj pli kaj pli turniĝi.

Iam kiam la boato paneis antaŭ urbeto en Kentukio, Halej surteriĝis por negoca afero.

Tomo, al kiu liaj katenoj permesis moviĝi en mallarĝa vojiro, proksimiĝis al la rando, kaj indiferente rigardis super la pavezo. Post momento, li vidis la vendiston reveni per vigle paŝado, akompanata de nigrulino kiu tenis infanon en siaj brakoj. Ŝi estis elegante vestita; nigrulo sekvis ŝin ŝarĝita de malgranda kofro; ŝi alparolis al li de tempo al tempo. Ŝi gaje antaŭeniris ĝis la tabulo, kiun ŝi transiris per rapida paŝado. La sonorilo tintis, la vaporo fajfis, la maŝino ĝemis, anhelis, kaj la boato malsupreniris laŭ la rivero.

La virino enŝoviĝis inter kestoj kaj pakaĵoj kiuj embarasis la interferdekon, kaj sidiĝante ŝi komencis pepi kun sia suĉinfano.

Post esti paŝinta unu rondiron aŭ du en la boato, Halej alproksimiĝis al ŝi. Li indiferente diris al ŝi kelkajn vortojn.

Tomo vidis malhelan nubon pasi super la frunto de la virino kiam ŝi ardege respondis :

- Mi ne kredi tion, mi ne voli kredi tion ! vi petoli kun mi !

- Se vi ne volas kredi tion, almenaŭ rigardu ! diris la vendisto, elprenante paperon. Jen la vendkontrakto, kaj malsupre la nomo de via mastro. Mi pagis lin per vera bona mono, tion mi povas diri al vi.

- Mi ne povi kredi ke mastro voli tiel trompi min, ŝi daŭrigis, kun kreskanta maltrankvilo.

- Vi devas nur demandi al la unua renkontito kiu kapablas legi la skribaĵon. He ! Ĉi tie ! diris Halej al iu viro kiu preterpasis. Prenu ! Laŭte legu ĉi tiun paperon. Ĉi tiu knabino obstinas ne kredi min, kiam mi diras al ŝi tion kio tio estas.

- Ĝi estas vendkontrakto, subskribita de Johano Fosdiko, diris la viro, kiu cedas al vi la knabinon Luciana kaj

ŝian infanon. Ĉi tio ja estas laŭregula, laŭ tio kion mi vidas.

La pasiaj ekkrioj de la virino altiris ĉirkaŭ ŝi amason da scivolemuloj, kaj la vendisto maldetale klarigis al ili pri kio temis.

- Li diri al mi ke li sendi min al Luizurbo, por luigi min kiel kuiristinon en la taverno kie labori mia edzo, ŝi ekkriis. Esti tie ke mastro mem diri al mi, per sia propra buŝo, kaj mi ne povi kredi ke li mensogi al mi.

- Li vendis vin, mia kompatinda virino; ne eblas dubi tion, diris viro kun bonvola mieno, post esti ekzameninta la paperon, li faris tion; ne eblas erari.

- Do, ne plu bezoni paroli pri tio, ŝi diris subite kvietiĝante. Ŝi pli preme brakumis la infanon kontraŭ si, sidiĝis sur sia kofro, kun la dorso direktita al la pasaĝeroj, kaj malprecize rigardis la riveron.

- Ŝi finfine bone akceptas la aferon, diris Halej. Jen ŝi kiu trankviliĝas. Fiera knabino, certe !

La virino restis senmova dum la boato iris. Varmeta kaj milda venteto de somero pasis sur ŝian kapon kiel la blovo de kompata spirito. Venteto de la ĉielo, kiu ne informiĝas ĉu la frunto, kiun ĝi refreŝigas, estas blanka aŭ nigra. Ŝi vidis la sunon flagri sur la akvo en oraj retoj; ŝi aŭdis ĉirkaŭe brui ĝojajn voĉojn vigligitajn de la plezuro; sed roko estis falinta sur ŝian koron. La infano, apogita sur ŝia brusto, ekstaris sur siaj piedetoj, kaj liaj manetoj karesis al ŝi la vangojn. Li saltis, restaris, balbutante kaj pepante, kvazaŭ decida eltiri ŝin el ŝia letargio. Subite ŝi ĉirkaŭbrakis lin inter siaj brakoj, kaj ŝiaj larmoj malrapide falis, unu post la alia, sur la mirigitan kaj ridantan vizaĝeton. Poste ŝi denove ŝajnis trankviliĝi, kaj absorbiĝi en la donendaj zorgadoj al la infano.

Li estis dekmonata knabeto, kun forto kaj vigleco super sia aĝo. Ĉiam moviĝanta, li ne lasis ripozmomenton al sia patrino, senĉese okupata teni lin, senĉese atenta al lia

nelacigebla aktiveco.

- Jen bela infaneto ! diris viro haltanta antaŭe, kun ambaŭ manoj en siaj poŝoj. Kiom li aĝas ?

- Dek monatoj kaj duono, respondis la patrino.

La viro fajfis por la bubeto, kaj prezentis al li bastonon el kando, kiun li avide prenis, kaj kiun li tuj direktis al sia buŝo, ĝenerala deponejo de ĉiuj trezoroj de infanoj.

- Agrabla bubo ! diris la viro, kaj kiu konas tion kio estas bona ! Li fajfis kaj preterpasis.

Alveninta ĉe la alia fino de la boato, kie Halej fumis, sidanta sur amaso da pakaĵoj, li haltis, elprenis alumeton, kaj ekbruligis sian cigaron, dirante :

- Vi havas tien sufiĉe bonaspektan knabinon. Hej !

- Jes, ŝi ne estas malbona, diris Halej, blovante el la buŝo spiraĵon de fumo.

- Ĉu vi kondukas ŝin suden ?

Halej kapjesis, kaj daŭrigis fumi.

- Por la plantejoj ?

- Fakte, daŭrigis la vendisto, mi havas mendon de plantisto, kaj mi pensas ke mi enmetos ŝin. Oni diras al mi ke ŝi bone kuiras. Tie oni povos utiligi ŝin kiel kuiristinon, aŭ meti ŝin al la plukadon de la kotono. Ŝi havas la fingrojn kiuj taŭgas por tio, mi rigardis tion. Tiel aŭ alie, ŝi estos facile vendita. Kaj Halej reprenis sian cigaron.

- Sed sur plantejo, ili ne volos la etan junulon.

- Tial mi vendos lin je la unua okazo, rebatis la vendisto.

- Mi supozas ke vi lasus lin malmultekoste, diris la viro grimpante sur la amason da pakaĵoj kaj komforte sidiĝante.

- Mi ne scias ! Li estas beleta etulo, tre vigla, rekta, grasa, forta, kun karno tiel malmola kiel briko.

- Tio estas vera; sed ankaŭ estas la zorgo kaj la elspezo por eduki lin.

- Ba ! Oni edukas tion tiom facile kiom ĉiu alia estulo

kiu paŝas. La negridoj ne donas pli da malfacilaĵo ol la hundetoj. Ĉi tiu knabo kuros tutsole post unu monato.

- Mi ĝuste havas perfektan lokon por eduki ilin, kaj mi pensis iom pliigi mian fonduson, diris la viro. La kuiristino perdis sian bebon pasintan semajnon, li dronis en la kuvo dum ŝi etendis la tolaĵon por sekigi, kaj mi pensis doni al ŝi ĉi tiun infanon por prizorgi.

Halej kaj la fremdulo silente fumis sufiĉe longe, nek unu nek la alia zorgis unue ektrakti la ĉefan demandon. Finfine la viro reparolis :

- Vi ne petus pli ol dek dolarojn por ĉi tiu etulo, ĉar necesos al vi seniĝi je li.

Halej skuis la kapon kaj kraĉis per signifoplena maniero.

- Mi ne kredas vin, li diris; kaj li rekomencis fumi.

- Kiom do vi volas por li ?

- Komprenu ! Mi povus mem eduki la infanon, aŭ edukigi lin. Li estas mirige sana kaj vigla. Post ses monatoj, li valoros cent dolarojn, kaj ducent post unu aŭ du jaroj, se mi alkondukos lin al feliĉa fino. Tiel estos kvindek dolaroj, kaj ne unu cendon malpli.

- Ho ! Tio estas ridinda prezo ! ekkriis la aĉetanto.

- Nepre ! diris Halej, kun rezoluta balancado de kapo.

- Mi donos tridek por tio, sed ne unu groŝon pli.

- Nu, reparolis Halej, ni dividu la malkonsenton, kaj ni diru kvardek kvin. Tio estas ĉio kion mi povas konsenti al vi.

- Nu, estas konsentite, diris la viro post momento da pripensado.

- Konsentite ! Kien vi elŝipiĝas ?

- Al Luizurbo.

- Al Luizurbo ! ripetis la vendisto. Bonege ! Ni albordiĝos ĉe la noktiĝo. La bubeto dormos. Nenio pli bona. Ni tute malrapide forprenos lin, sen bruo, sen kriadoj. Mi ŝatas trankvile fari aferojn, mi malŝatas bruegon, tumulton.

Post esti transpasinta de la monpaperujo de la fremdulo en la sian kelkajn monbiletojn, Halej revenis al sia cigaro.

Dum travidebla kaj serena vespero, la boato haltis ĉe la albordiĝejo de Luizurbo. Ankoraŭ samloke sidita, la virino tenis en siaj brakoj sian profunde dormantan suĉinfanon. Kiam ŝi aŭdis krii la nomon de la haltejo, ŝi hastege demetis la infanon en malgrandan lulilon, formitan de kavaĵo meze de la valizoj. Poste ŝi rapidis al la rando de la boato, esperante ekvidi sian edzon inter la servistoj de hotelo kiuj alkuris al la albordiĝejo. Dum, kliniĝinta super la balustradon, ŝi ĵetis penetremajn rigardojn al la moviĝantaj kapoj de la riverbordo, la surŝipe restanta homamaso kunpremiĝis inter ŝi kaj la infano.

- Atentu ! Jen la momento ! diris Halej. Li deprenis la dormanteton kaj transdonis lin al fremdulo. Estu almenaŭ ne tuj vekonta aŭ plorigonta lin ! Ni havus diablan bruegon de la patrino.

La viro zorge prenis la pakaĵon, kaj baldaŭ perdiĝis inter la pasaĝeroj kiuj elŝipiĝis.

Kiam la boato, ĝemanta kaj blovanta, estis disiĝinta de la riverbordo kaj malrapide komencis reakiri sian potencon, la virino revenis al sia loko. La vendisto estis tie, la infano ne plu estis tie !

- Kio !... Kien... Kien do ? ŝi ekkriis tute deliranta.

- Luciana, diris Halej, la infano foriris; preferinde ke vi tuj sciu tion. Vi ne povis pensi eduki lin en la Sudo; mi ja sciis tion, kaj mi trovis la okazon vendi lin al bona familio, kiu edukos lin pli bone ol vi povintus fari.

La vendisto atingis tiun gradon de kristana kaj morala perfekteco, tiom rekomendata de nelonge de kalkaj predikistoj kaj kalkaj politikistoj de la Nordo; ne restis al li ombro de antaŭjuĝo aŭ homa malforteco. Lia koro precize atingis tiun gradon, kiun la mia kaj la via, sinjoro, povus

atingi, helpe de kulturo kaj streboj. La terurigita rigardo kiun la malesperiga patrino ĵetis sur lin, povintus malkvietigi malpli spertan viron; sed li kutimiĝis tion. Li cent- kaj cent-foje vidis tiun saman esprimon. Ankaŭ vi alkutimiĝos, amiko leganto; kaj la granda celo de la lastatempaj klopodoj estas alkutimigi al tio niajn nordajn respublikojn, por la pli granda gloro de la Unio. Tial la finegocisto rigardis la mortigan suferegon kiu kuntiris tiujn malserenajn trajtojn, tiujn kuntiriĝintajn manojn, tiun anhelantan spiron, kvazaŭ ordinarajn okazaĵojn de la komerco. Li nur demandis al si, ĉu ŝi estis krionta kaj kaŭzonta la ekscitiĝon sur la boato; ĉar, same kiel varmegaj defendantoj de iaj institucioj, li ĉefe malŝatis ekscitiĝon.

Sed la virino ne kriis, la bato trafis ŝin tro rekte en la koron.

Ŝi sidiĝis, ŝia kapo turniĝis. Ŝiaj manoj malstreĉitaj refalis senvivaj ĉe ŝiaj flankoj. Ŝi rigardis antaŭ si, sen vidi ion ajn. La bruo, la zumado de la boato, la ĝemo de la maŝino, miksiĝis, kiel en koŝmaro, en ŝiaj konsternitaj oreloj. La kompatinda koro frakasita ne plu havis aŭ krion aŭ larmojn por elverŝi ŝian profundan turmenton. Ŝi ŝajne estis kvieta.

La vendisto kiu, krom siaj profitoj, estis preskaŭ tiel humana kiel la plejmulto el niaj politikistoj, kredis sin vokita por doni al ŝi la konsolojn kiujn la cirkonstanco permesis.

- Mi scias ke unue tio devas esti dolora por vi, Luciana, li diris, sed saĝa knabino, vigla kiel vi, rapide rekvietiĝos. Tio necesas, komprenu. Neniu povas helpi.

- Ho ! Ne paroli al mi, mastro ! Ne paroli al mi ! ŝi diris kun voĉo de iu kiu sufokas.

Li persistis : "Vi estas bela knabino, Luciana. Mi deziras al vi bonon, kaj mi provos havigi al vi bonan oficon ĉe Malsupra Rivero. Belforma kiel vi estas, vi rapidege trovos alian edzon…

- Ha, mastro ! Se nur vi voli ne paroli al mi… ne nun ! ŝi diris. *Estis en la voĉtono tiel korŝira suferego, ke la vendisto komprenis ke tio ne rilatis al lia fako. Li ekstaris. La virino sin turnis kaj enŝovis la kapon en sia mantelo.*

Halej, kiu paŝadis tien kaj reen, kelkfoje haltis por rigardi ŝin.

- Ŝi diable prenas la aferon al koro ! li murmuris, sed almenaŭ ŝi sin tenas trankvile. Lasu ŝin iom ŝviti, kaj tio pasos.

Tomo spektis la negocon, de la komenco ĝis la fino, kaj li antaŭvidis la konsekvencojn. Por li, kompatinda, malklera nigrulo, tio aspektis terura kaj kruela aĉaĵo ĉar li ne lernis ĝeneraligi, plivastigi siajn vidpunktojn. Instruita de iuj pastroj de kristanaro, li ne pli bone juĝintus tion, kaj vidintus en ĝi nur ĉiutagan incidenton de laŭleĝa komerco. Sed en sia nesciado, Tomo kies legadoj limiĝis je la Biblio, ne havis tiajn konsolojn. Lia koro sangis ene de li ĉe la penso de la difektegoj de la suferanta kompatinda aĵo kiu kuŝis tie kiel rompita kano. Aĵo dotita de vivo, de sento, de senmorteco, kiun la usona leĝo senemocie klasifikas kun la kestoj, pakaĵoj kaj aliaj pakoj.

Tomo alproksimiĝis, kaj provis diri al ŝi kelkajn vortojn, sed ŝi nur obtuze ĝemis. Naive kaj kun larmoj fluantaj sur siaj propraj vangoj, li parolis al ŝi pri la koro de tiu kiu estas tute amo, kaj kiu loĝas en la ĉieloj, kaj pri Jesuo tiel plena de kompato por ĉiuj, pri la eterna hejmo kie ŝi rekuniĝus kun sia infano. Sed la turmento de malespero fermis ŝiajn orelojn, kaj paralizis ŝian koron.

Venis la nokto, trankvila, glora, senpartia, kun siaj miloj da brilantaj steloj, anĝelaj okuloj, tiel belaj, sed tiel mutaj ! Ne iu parolo, ne iu signo de kompato, ne iu etendita mano de tiu fora ĉielo !

La voĉoj kiuj babilis pri aferoj aŭ plezuro, silentis unu

post alia. Ĉio surŝipe dormis, kaj ni aŭdis la akvon bobeli sub la pruo. Tomo sin kuŝis sur kesto. De tempo al tempo sufokita plorsingulto alvenis al li, krio de la kompatinda virino kiu petegante kuŝis : "Ho ! kion mi fari ?... Disinjoro !... Disinjoro, Dio mia, kompati !... Helpi min !" Tiel, intermite, ĝis kiam la murmuro iom post iom estingiĝis.

Ĉirkaŭ la noktomezo, Tomo ektremis kaj vekiĝis. Ombro rapide pasis inter li kaj la rando de la boato. Li aŭdis la akvon reŝpruci. Sola, li vidis kaj aŭdis. Li levi la kapon, la loko kiun okupis la virino estis malplena ! Li vane traserĉis ĉirkaŭ si. La kompatinda sanganta koro ĉesis bati, kaj la akvoj kiuj ĵus refermiĝis supre, ondetis gajaj kaj helaj.

Pacienco ! Pacienco ! Vi kies la indigno vekiĝas ĉe tiaj malbonoj. Ne unu pulsobato, ne unu larmo de la premato perdiĝas por la Homo de Malĝojoj, por Disinjoro en lia gloro. En sia pacienca kaj malavara sino, li portas la suferegojn de mondo. Kiel li, pacience eltenu kaj ameme laboru ĉar tiom certe kiom li estas Dio, "la tago de elaĉeto venos".

Halej frue leviĝis, kaj kuris, vigla kaj preta, por viziti sian vivantan varon. Estis lia vico maltrankvile ĉirkaŭrigardi ĉien.

- Kien diable soviĝis ĉi tiu knabino ? li demandis al Tomo.

Ĉi tiu, kiun la sperto prudentigis, ne kredis devi informi lin pri siaj rimarkoj. Li diris ke li ignoris tion.

- Neeblas ke ŝi elŝoviĝis eksteren tiun nokton ĉe unu el la stacioj. Ĉiufoje kiam la boato haltis, mi estis staranta kun la okulo gvatanta. Mi ĉiam fidas nur al mi en tia kazo.

Ĉi tiu parolado direktiĝis al Tomo, per konfidenca tono, kvazaŭ ĝi devintus aparte interesi lin. Li nenion respondis.

La vendisto traserĉis tra la boaton de la pobo ĝis la pruo, renversis la kestojn kaj la pakaĵojn, serĉis en la maŝinejo, ĉirkaŭ la kamentuboj, ĉien; vane.

- Nun, Tomo, estu sincera, li diris, kiam post siaj senfruktaj serĉadoj li revenis kien li lasis lin. Vi scias ion, ne diru ne al mi, mi certas. Mi vidis la knabinon kuŝantan tien ĉirkaŭ la deka hieraŭ vespere, mi noktomeze revidis ŝin tien, kaj ankoraŭ de la unua ĝis la dua. Je la kvara ŝi ne plu estis tien, kaj vi kuŝis tien, tute apud, vi devas scii tion kio okazis, maleblas alie.

- Nu, mastro, diris Tomo, ĉirkaŭ la mateno io pasis tre proksime al mi; mi duonvekiĝis, kaj aŭdis grandan bruon de akvo. Tiam mi tute malfermis la okulojn, kaj la knabino ne plu estis tien. Tio estas ĉio kion mi scias pri tio.

La vendisto estis nek kortuŝita nek mirigita, ĉar kiel mi diris al vi, li kutimis al multaj aferoj, kun kiuj vi ne estas jam familiariĝinta. La ĉeesto mem de la morto vekis en li nek solenan timon, nek glaciigan tremon. Li vidis ĝin tiom kaj tiom da fojoj ! Li renkontis ĝin sur la negocaj vojoj, kaj bone konis ĝin. Sed li rigardis ĝin kiel senkompatan kreditoron kiu kelkfoje insideme malhelpis siajn komercajn operaciojn.

Li nur ĵuris ke la knabino estis vera friponino, ke li estis diable malbonŝanca, kaj ke se la aferoj tiel daŭrus, li ne gajnus moneron dum sia vojaĝo. Unuvorte, li fine konsideris sin kiel priplukita homo, kun kiu oni malbone agis. Sed ne estis kuracilo. La virino fuĝis en ŝtaton kiu ne redonas la fuĝantojn, ne, eĉ ne laŭ ordono de la tuta glora Unio ! La vendisto do sidiĝis, kaj malkontenta, notis en sia agendo, en la kolumno "profitoj kaj perdoj", la animon kaj la korpon kiuj mankis[20].

20 Al la kritikantoj kiuj akuzas la aŭtoron pri troigo, ni respondos per fakto, eltirita de usona ĵurnalo, la Boston Daily Evening Transcript, de la 14an de decembro 1852. "Nigrulino estis lasttempe pendigita en Cedartown. Lia mastro sciigis al ŝi ke li vendis ŝiajn kvar infanojn. La akiranto estis viro konata tra la tuta ĉirkaŭaĵo kiel avarulo kaj tirano, kiu ne nur malsatigis siajn sklavojn, sed batis ilin laŭ la plej abomena brutaleco. La senesperigita patrino surgenue petegis sian mastron por ĉesigi la merkaton, lasi al ŝi siajn infanojn aŭ almenaŭ vendi ilin al iu alia. Ŝiaj petegoj estis vanaj. La infanoj estis liverotaj la morgaŭon. Ŝi dumnokte mortigis ilin. Ŝi estis juĝita kaj pendigita pro krimo de infanmurdo".

- Kia fia estulo estas ĉi tiu vendisto, ĉu ne ? Tiel multe senkora ! Tio estas terura !

- Ho ! Sed neniu zorge atentas pri ĉi tiuj homoj ! Ili estas universale malestimataj. Neniam akceptitaj en deca kompanio.

- Kaj mi petegas vin, sinjoro, kiu do faras la vendiston ? Kiu estas la plej kulpa inter la kruda fivendisto, kaj la klera, instruita, inteligenta individuo kiu defendas la sistemon, kies la fivendisto estas nur la neevitebla rezulto ? Vi formas la publikan opinion kiu kuraĝigas lin en lia komerco, kiu koruptas lin, kiu senmoraligas lin, ĝis kiam li ne plu ruĝiĝos pri tio. Kaj vi asertas esti pli bona ol li !

- Li estas senscia kaj vi estas instruita. Li sidas sur la malsupra ŝtupo kaj vi sur la supra. Li estas kruda kaj vi estas ĝentila. Vi havas talentojn, li havas limigitan menson.

Ĉe la tago de la venonta juĝo, ĉi tiuj konsideroj bonege povus klini pesilon favore al li.

Por ĉesigi ĉi tiujn malgravajn incidentojn de la laŭleĝa komerco, ni plorpetas la mondon ne kredi la usonajn leĝfarantojn tiom malprovizitajn de humaneco, kiel emus pensigi tion la enormaj klopodoj de nia Nacia Kongreso, por protekti kaj daŭrigi ĉi tian komercaĉon.

Kiu ne scias ke niaj famaj homoj konkure deklamas kontraŭ la komerco de nigruloj eksterlanden ? Stariĝis inter ni tuta armeo da Clarkson[oj] aŭ da Vilberforse[oj], el la plej edifaj por vidi kaj aŭdi.

La komerco de nigruloj en Afriko ! Fi, kia hororo ! Sed la komerco de nigruloj en Kentukio, ho ! tio estas tute alia afero !

14. Hejmo de kvakera familio.

Sceno de sereneco kaj paco nun sin prezentas al ni. Ni eniru en ĉi tiun puran kaj vastan kuirejon, kun flava, glata, brila planko, kie oni ne videtas atomon de polvo. Brila nigra hejtoforno el giso servas samtempe kiel stovo kaj forno. Vicoj da teleroj el stano brilas kiel arĝento, stimulas la apetiton kaj vekas la memoron de la stomako. Verdaj antikvaj kaj fortikaj seĝoj el ligno ornamas la muregojn. Meze de la ĉambro estas du lulfoteloj; unu malgranda, mallarĝa, kun fundo el kano, provizita de kuseno farita de alkudritaj pecoj, mozaiko de ŝtofoj kun kontrastaj koloroj; la alia, granda, patrina, invitanta vin per malfermaj brakoj, altirante vin per siaj ŝvelmolaj kusenoj, vere komforta, persvada, pli gastama, en sia rustikeco, ol dekduo da brakseĝoj de salono el veluro aŭ brokaĵo. En la unua, sin milde lulas nia malnova amikino Eliza, atenta al delikata laboro de kudrado. Fakte estas ŝi, sed pli pala kaj pli malgrasa ol en sia ĉambreto en Kentukio. La ombro de ŝiaj longaj okulharoj, la konturo de ŝia beleta buŝo, aperigas profundan doloron, sed briditan. Estas facile vidi ke la koro de la juna virino maturiĝis sub la severa disciplino de sufero; kaj kiam, de tempo al tempo, ŝi levas siajn grandajn nigrajn okulojn por priatenti la ludojn de sia Henriko kiu, simile al tropika papilio, flirtas tie kaj tie, oni legas en ili firmecon, decidon, kiun oni vane serĉus en pli feliĉaj tagoj.

Apud ŝi, virino sidas, ŝi tenas sur siaj genuoj brilan metalan kaserolon, en kiu ŝi laŭmetode aranĝas sekajn fruktojn. Ŝi povas esti kvindekkvin- ĝis sesdek-jara, sed ŝia vizaĝo estas el tiuj kiujn la tempo flugtuŝas nur por plibeligi kaj purigi ilin. Ŝia neĝblanka kufo el glata krepo, tajlita laŭ

la strikta kvakera ŝablono, ŝia simpla koltuko el blanka muslino, krucigita super ŝia brusto laŭ regulaj faldoj, ŝia robo kaj ŝia griza ŝalo, tuj sciigas al kiu komunumo ŝi apartenas. Ŝiaj rondaj rozkoloraj vangoj havas ankoraŭ, kiel dum la junaĝo, la silkecan lanugon de persiko. Ŝiaj haroj, delikate arĝentaj pro aĝo, disiĝas sur kvieta frunto, kie la vivo lasis nur unu spuron, "pacon sur la tero kaj bonvolon al la proksimulo". Sube brilas du grandaj brunaj okuloj, honestaj, kristalaj, amemaj. Nur sufiĉas rigardi ilin antaŭe por legi ĝis la profundo de la plej bona, de la plej lojala koro kiu neniam batis en la brusto de virino. Oni tiom kaj tiom laŭdis la belecon de junulinoj, eble troviĝas poeto facile trafita de la beleco de maljunulinoj ? Ke li inspiriĝu el nia bona amikino, Raĥela Halidaj, tia kia ŝi ĉeestas nun antaŭ ni, sidanta en sia lulfotelo ! La nomita lulfotelo, eble sekve de kataro trafita dum ĝia junaĝo, el astma aŭ nerva inklino, akiris la kutimon ĝemi; tiel ke ĝi akompanis ĉiun iroreiran movadon per plorema plendo, kiu estintus netolerebla fare de iu ajn alia seĝo. Sed la maljuna Simeono Halidaj deklaris ami ĉi tiun muzikon, kaj ne povi rezigni tion. Ankaŭ la infanoj tute ne volintus ke la lulseĝo de la patrino ĉesu krii. Kial ? Ĉar, ekde dudek jaroj kaj pli, ĉi tiu bruo miksiĝis kun la amoplenaj paroloj, kun la mildaj riproĉoj, kun la patrinaj karesoj. Kiom da kapdoloroj, kiom da kordoloroj kvietiĝis pro ĉi tiu sono ! Kiom da demandoj, spiritaj kaj mondaj, estis solvitaj ĉirkaŭ ĉi tiu fotelo ! Kiom da ĉagrenoj kvietigitaj ! Kaj ĉio ĉi de bona kaj tenera virino. Dio benu ŝin !

- Do vi daŭre volas iri al Kanado, Eliza ? diris Raĥela, daŭrigante la klasifikon de siaj fruktoj.

- Jes, sinjorino, reparolis Eliza per firma voĉo, necesi ke mi iri pluen, mi ne aŭdaci halti.

- Kaj kion vi tuj faros, tien surloken ? Estas saĝe pripensi tion, filino mia.

Ĉi tiu vorto, "mia filino", venis tutnature al la lipoj de Raĥela, la sankta nomo de "patrino" ŝajnis tiel bone taŭga al ŝi. La manoj de Eliza ektremis, kaj kelkaj larmoj falis sur ŝian laboraĵon.

- Mi fari… ĉion ajn kion mi povi trovi por fari, kaj… mi esperi trovi ion.

- Vi scias ke nur dependas de vi resti ĉi tie tiom longe kiom plaĉos al vi.

- Ho ! Dankon, sed… Eliza montris per la fingro la etan Henrikon, mi ne kapabli paĉe dormi. Mi neniel povi ripozi. Lastvespere ankoraŭ, mi sonĝi ke mi vidi ĉi tiun viron eniri en la korton, ŝi diris tremetante.

Raĥela viŝis al si la okulojn : "Kompatinda infano ! Ne tiel maltrankviliĝu ! Disinjoro ne permesis ke ununura fuĝinto iam estu forkaptita el nia vilaĝo. Via filo ne estos la unua, mi esperas.

Ĉimomente la pordo malfermiĝis, kaj virineto, diketa kiel lanbulo, apetitveka kaj kolora kiel pomo, montriĝis sur la sojlo. Same kiel Raĥela, ŝi estis grize vestita, kaj muslina koltuko kruciĝis sur ŝia ŝveleta brusto.

- Ruto Stedmano ! diris Raĥela irante feliĉe renkonte al ŝi, kaj korece etendante al ŝi ambaŭ manojn. Kiel vi fartas, Ruto ?

- Mirinde, respondis Ruto. Ŝi demetis sian malgrandan grizan ĉapelon, kaj senpolvigis ĝin per sia naztuko, lasante malgrandan rondan kapon ne ŝirmita, sur kiu la kvakera ĉapo havis petolan aspekton, malgraŭ la klopodoj de du pufetaj manetoj por taŭge loki ĝin. Iuj hartufetoj, obstine buklaj, ankaŭ eskapis tie kaj tie, kaj eniris en sian malliberejon nur post multe da kaĵoladoj. La ĵusvenintino, kiu povis esti dudekkvinjara, kaj kiu konsultis la spegulon por ripari la malordon de sia tualeto, finfine turniĝis kun kontenta mieno. Kiu ne kontentiĝus vidi ŝin, tiu havintus malfacilan humoron,

ĉar ŝi ja estis la virineto la plej afabla, la plej gaja, la plej babilema, kiu iam ĝojigis la koron de edzo.

- Ruto, ĉi tiu amikino estas Eliza Hariso, kaj jen la eta knabo pri kiu mi parolis al vi.

- Mi estas kontenta vidi vin, Eliza, tre kontenta, *diris Ruto manpremante ŝin, kiel por malnova amikino delonge atendita*. Tie estas via kara infano !... Mi kunportis por li kukon. *Ŝi prezentis koron el biskvito al la eta knabo, kiu alpaŝis kaj timeme prenis ĝin*.

- Kie estas via brakinfano, al vi, Ruto ? demandis Raĥela.

- Ho ! Li venos, sed via Magdalena kaptis lin pasantan, kaj foriris kun li en la garbejon por montri lin al la infanoj.

Ĉe tiu momento, la pordo malfermiĝis, kaj Magdalena, honesta fraŭlino, kun roza vizaĝkoloro, kun brunaj okuloj kiel tiuj de sia patrino, eniris kun la brakinfano.

- Ha ! Ha ! diris Raĥela prenante la dikan kaj blankan bubon en siajn brakojn, kiel li sane aspektas, kaj kiel li kreskas !

- Mi ja kredas ! diris la malgranda Ruto. Ŝi ekprenis la brakinfanon, kaj komencis zorgoplene demeti de li malgrandan bluan kapuĉon, kaj malvindis lin el multe da eksteraj envolvaĵoj. Post esti tiranta dekstren, tiranta maldekstren, por reordigi lin laŭ sia plaĉo, ŝi kisis lin per sia tuta koro, kaj metis lin planken, liberlasitan al siaj pensoj.

La brakinfaneto ŝajnis kutimigita al ĉi tiu agmaniero. Li metis sian fingron en sian buŝon kaj absorbiĝis en siaj pensoj, dum la patrino elprenante sian trikaĵon el sia sako, arde trikis ŝtrumpon el blua kaj blanka lano.

- Vi bone faros plenigi la bolilon, Magdalena, infano mia, milde sugestis Raĥela.

Magdalena alportis la bolilon al la fonto, kaj revenis meti ĝin sur la fajrujon, kie la hejma poto baldaŭ komencis

zumkanti, kaj ĵeti en la aeron vaporan nubon, antaŭsignon de bonhumoro kaj gastamo. Per kelkaj vortoj flustritaj de Raĥela, la sekaj fruktoj ankaŭ iris kune varmiĝi. La patrino tiam prenis sur la kredenco perfekte puran tabulon, ligis antaŭtukon antaŭ si, kaj kviete komencis knedi biskvitojn.

- Ĉu vi ne bone farus, Magdalena, ŝi antaŭe diris al sia filino, konsili Jonan prepari kokidaĵon ? Kaj Magdalena konsekvence malaperis.

- Kiel fartas Abigaelo Peterso ? demandis Raĥela fingrumante sian paston.

- Ho ! Ŝi fartas pli bone, rebatis Ruto. Mi iris viziti ŝin ĉi matene, mi pretigis la liton kaj ordigis la domon. Lia Hilario pasigis tie la posttagmezon, ŝi bakis panon kaj platkukojn por pluraj tagoj. Mi promesis reiri tien ĉi vespere, por iom starigi Abigaelon.

- Mi iros morgaŭ zorgi pri la purigoj, kaj pri riparendaj tolaĵoj, diris Raĥela.

- Bone, rekomencis Ruto. Sed mi aŭdis, ŝi aldonis, ke Hana Stanarbo estas malsana. Johano flegis dum la lasta nokto. Morgaŭ estos mia vico.

- Johano povas veni ĉi tien por manĝi, vi scias, se vi estas okupata dum la tuta tago.

- Dankon, Raĥela, ni vidos morgaŭ; sed jen Simeono.

Simeono Halidaj, alta, fortika kaj rekta, surhavis pantalonon, veston el griza drapo kaj larĝrandan ĉapelon.

- Kiel vi fartas, Ruto ? li varme diris etendante sian larĝan manon al la pufeta malgranda mano de la juna virino, kaj Johano ?

- Ho ! Johano bone fartas, tiel kiel la tuta cetero de niaj homoj, gaje diris Ruto.

- Neniu novaĵo, patro ? demandis Raĥela enfornigante siajn kuketojn.

- Jes. Prospero Stebinso diris al mi ke ili estos ĉi tie ĉi

vespere kun amikoj, respondis Simeono per signifoplena tono, lavante al si la manojn en malgranda malantaŭa porĉo.

- Vere ! kaj Raĥela penseme rigardis Elizan.

- Ĉu vi ne diris ke vi estis nomata Harisonn, diris Simeono al Eliza, kiam li eniris la kuirejon.

- Jes, respondis Eliza per tremanta voĉo, ĉar en ŝiaj teruroj, ankoraŭ viglaj, ŝi pensis ke eble oni afiŝis ŝian priskribon.

- Patrino ! diris Simeono, staranta en la porĉo, alvokante sian edzinon.

- Kion vi volas de mi, patro ? diris Raĥela viŝanta siajn farunitajn manojn, kaj irante al li.

- La edzo de ĉi tiu junulino estas kun la niaj, kaj estos ĉi tie ĉi vespere.

- Ĉu vi certas, patro ? diris Raĥela kun la vizaĝo radianta de ĝojo.

- Tre certe. Prospero malsupreniris hieraŭ kun la ĉaro al la suba stacio. Tie li trovis maljunulinon kaj du virojn, el kiuj unu diris nomiĝi Georgo Hariso, kaj, laŭ tio kion li rakontis pri sia historio, estas li, mi certas. Bela kaj brava knabo ! Ĉu ni tuj diros tion al lia edzino ?

- Ni konsultu Rutonn, diris Raĥela. Ruto ! Venu ĉi tien !

Ruto demetis sian trikaĵon, kaj estis en la porĉo en palpebruma daŭro.

- Kion vi pensas pri tio, Ruto ? diris Raĥela. La patro asertas ke la edzo de Eliza estas inter la lastaj venintoj, kaj ke li estos ĉi tie ĉi vespere.

Eksplodo de ĝojo de la eta kvakerino interrompis la patrinon. Ŝi faris tian salton, kunigante siajn manetojn, ke la du ribelemaj bukloj, ankoraŭfoje eskapintaj el sia kaĝo, malvolviĝos sur ŝian blankan koltukon.

- Pacon ! Kara ! milde diris Raĥela. Pacon, Ruto ! Konsilu nin : ĉu necesas tuj diri tion al ŝi ?

- Jes, kompreneble, tujtuj ! Supozu ke li estu mia Johano, mi ne zorgus atendi. Rekte diru tion al ŝi.

- Viaj observadoj pri vi mem estas ankoraŭ amo al proksimulo ! diris Simeono kies la vizaĝo lumiĝis rigardante Rutoⁿ.

- Kaj ĉu ni estas ĉi tie por io alia ? Se mi ne amis Johanoⁿ kaj mian knabeton, mi ne povus meti min en ŝian lokon kaj imagi al mi ĉion kion ŝi devas senti. Nu, iru diri al ŝi, iru rapide ! *Kaj ŝi premis per siaj karesaj manoj la brakon de Raĥela*. Alkonduku ŝin en vian ĉambron, mi zorgos pri la rostado de la kokidaĵo.

Raĥela eniris en la kuirejo, kie Eliza kudris; kaj malfermante la pordon al apuda ĉambreto, ŝi diris al ŝi per sia plej milda voĉo : "Venu ĉi tien, filino mia, mi havas novaĵojn por sciigi al vi.

Eliza ruĝiĝis, ekstaris tremante pro maltrankvilo kaj rigardis sian filon.

- Ne, ne, *ekkriis malgranda Ruto, sin ĵetante al ŝi kaj prenante al ŝi la manojn*, ne timu, estas bonaj novaĵoj, Eliza ! Eniru, eniru do !

Ŝi milde puŝis ŝin al la pordo, kiu refermiĝis malantaŭ ŝi, poste turnante sin, ŝi ekkaptis la etan Henrikoⁿ kaj kisis lin kun korelverŝado.

- Vi revidos vian patron, etulo ! Ĉu vi ne scias ? Via patro revenas ! Ŝi ripetis dum la infano malfermis larĝajn mirigitajn okulojn.

Ĉe la alia flanko de la pordo, Raĥela Halidaj, altirante al si Elizaⁿ, diris al ŝi : "Disinjoro kompatis vin, filino mia. Via edzo eskapis el la lando de sklaveco".

La sango purpurigis la palajn vangojn de Eliza, poste tuj refluis al ŝia koro. Ŝi sidiĝis, kaj sentis sin moliĝi.

- Kuraĝu, infano, diris Raĥela metante al ŝi la manon sur la kapon; li estas kun amikoj kiuj alkondukos lin ĉi tie ĉi

vespere.

- Ĉi tiun vesperon ! balbutis Eliza, ĉi tiun vesperon !

Sed la vortoj ne plu havis sencon. Ŝia menso estis nur emocio kaj konfuzo. Ĉio perdiĝis en nebulo.

Kiam ŝi remalfermis la okulojn, ŝi estis en bona lito, bone kuŝigita, bone kovrita. Eta Ruto spirigis al ŝi kamforon kaj frotis al ŝi per ĝi la manojn. Ŝi travivis neklaran kaj dolĉegan langvoron, kvazaŭ delonge premita sub peza ŝarĝo, ŝi estis liberigata de ĝi. La troa streĉiĝo de ŝiaj nervoj, kiu ne ĉesis ekde la unua horo de ŝia fuĝo, finfine cedis. Profunda sento de paco kaj sekureco disfluis en ŝi. Kun la okuloj larĝe malfermitaj, ŝi sekvis, kiel en paca sonĝo, la movojn de tiuj kiuj ĉirkaŭis ŝin. Ŝi vidis malfermiĝi la pordon kiu komunikigis kun la kuirejo, ŝi vidis la tablon aranĝitan por la tagmanĝo, kun ĝia blanka tablotuko; ŝi aŭdis la kanton de la tekruĉo; ŝi vidis Ruto^{n} iri kaj reiri, kun teleroj da frandaĵoj, halti por doni biskviton al Henriko, karesi lin, volvi sur siaj blankaj fingroj la longajn nigrajn kaj buklajn harojn de la infano. Ŝi vidis Raĥela^{n}, la dignan kaj respektatan matronon, de tempo al tempo alproksimiĝi al la lito por reloki la kapkusenon, aranĝi la litotukojn kaj iel ajn elversi sian bonkorecon; ŝajnis al ŝi ke, el tiuj grandaj brunaj kaj klaraj okuloj, sunradio malsupreniris sur ŝin, kaj revarmigis al ŝi la koron. Ŝi vidis la edzon de Ruto eniri; ŝi vidis la junan virinon kuri al li, kaj mallaŭte paroli al li kun vigleco, montrante per esprimplena gesto la dormĉambron. Ŝi vidis ŝin sidan kun sia brakinfano en ŝiaj brakoj. Ŝi vidis ilin ĉiujn ĉe la tablo, kaj la etan Henriko^{n} sidigitan sur alta seĝo kaj ŝirmitan sub la larĝaj flugiloj de Raĥela Halidaj. Agrabla murmuro de babiladoj, malforta tintado de kuleroj, harmonia bruo de tasoj kaj subtasoj, ĉio fandiĝis en dolĉegan revadon, kaj Eliza dormis, kiel ŝi ne dormis ekde la terura horo kiam ŝi ekprenis sian infanon, kaj forfuĝis kun li, dum stela kaj

frosta nokto.

Ŝi sonĝis pri bela lando, pri tero kiu ŝajnis al ŝi ripozejo, pri verdaj riverbordoj, pri ridantaj insuloj, pri akvoj kiuj brilis en la suno; kaj tie, en domo kiun mildaj voĉoj diris al ŝi esti la ŝia, ŝi vidis sian infanon ludi, libera kaj feliĉa. Ŝi aŭdis la paŝadon de sia edzo; ŝi sentis lin alproksimiĝi; li ĉirkaŭbrakis ŝin; liaj larmoj inundis ŝian vizaĝon. Ŝi vekiĝis ! Ne estis sonĝo ! La suno delonge subiris. Ŝia filo dormis ĉe ŝiaj flankoj; kandelo malklare lumigis la ĉambron, kaj ĉe ŝia litkapo plorĝemis ŝia edzo.

La morgaŭon, la tago ĝoje ekaperis sur la kvakera domo. La patrino, stara de la tagiĝo, ĉirkaŭita de aktivaj geknaboj kiujn ni ne havis tempon por hieraŭ prezenti al la leganto, kaj kiuj ĉiuj, obeante al la amemaj alvokoj de Raĥela *"Vi bone faros..."* aŭ eĉ pli milde *"Ĉu vi ne pli bone farus... ?"*, klopodis pri la grava faro de la matenmanĝo; ĉar matenmanĝo en la fekundaj valoj de Indianio, estas multobla, malsimpla afero. Kaj, kiel por la plukado de rozaj folioj, kaj por la tondado de Edenaj tufarbustoj, la sola mano de la patrino ne kapablus sufiĉi. Dum Jona kuris al la fonto ĉerpi akvon, dum Simeono, dua de la nomo, kribris la maizan farunon, dum Magdalena estis muelanta la kafon, Raĥela okupiĝis malrapide kaj kviete pri la distranĉado de la kokidaĵo, pri knedado de la biskvitojn, dissemante, kiel la suno, ĉien kaj sur ĉiujn, sian varman kaj radian lumon. Se la neatendita diligenteco de la junaj laboristoj minacis kaŭzi iun kolizion, milda *"Nu ! Nu !"* aŭ *"En via loko mi ne farus tion"*, sufiĉis por kvietigi ĉion. La bardoj laŭdis la zonon de Venuso, kiu turnigis kapojn de generacio al generacio. Mi miaflanke pli ŝatus la zonon de Raĥela, kiu malhelpis kapojn turni, kaj konsentigis ĉiujn. Ĝi certe pli bone taŭgus por nia moderna epoko.

Dum ĉi ĉiuj preparoj, Simeono la unua, stara antaŭ la spegulo, kun siaj manikoj de ĉemizo kuspitaj, ekplenumis la

kontraŭ-patriarkan taskon de razado. Ĉio okazis en la granda kuirejo, laŭ maniero tiel amika, tiel paca, tiel harmonia, ĉiuj ŝajnis tiel ŝategi sian taskon, ĉie regis etoso de reciproka fido kaj de frateco tiel forta, ke tranĉiloj kaj forketoj ŝajnis mem gliti sur la tablon, kaj ke la kokidaĵo kaj la ŝinko fajfetis en la pato, kvazaŭ kontentegaj ludi sian parton en la koncerto. Kiam Georgo, Eliza kaj la eta Henriko eniris, ili estis tiel varme akceptataj, ke ne estis mirinda ke ĉi tiu tuta kuneco ŝajnis al ili revo.

Fine oni komencis matenmanĝi, dum Magdalena, stara apud la forno, kontrolis la kuiradon de la platkukoj kiuj, tuj kiam ili perfekte atingis la belan orbrunon, pasis de la rostokrado sur la telerojn.

Raĥela neniam estis pli favore bela, pli vere feliĉa, ol kiam ŝi prezidis la familian manĝon. Ŝi metis patrinan tenerecon cirkuligi la kukojn, koran plenecon por versi tason da kafo, kiu ŝajnis infuzi spiriton de konkordo kaj de bonfaremo en la nutraĵo kaj la trinkaĵo.

Por la unua fojo, Georgo sidiĝis, samegale, ĉe la tablo de blankulo. Li unue sentis ĝenon, kaj kelkan sindevigon; sed ĉi tiu sento disiĝis, kiel nebulo, sub la influo de ĉi tiu simpla kaj kora gastamo. Ĝi fakte estis la domo, la familia interno, la hejmo, vorto kies signifon Georgo ankoraŭ neniam komprenis. Kredo al Dio, fido al lia providenco, komencis ĉirkaŭi lian koron per aŭreolo de paco kaj sekureco. La malhelaj duboj de ateismo, la mizantropeco de malespero, disfluidiĝis antaŭ la lumo de vivoplena evangelio, vigligita de la spiro de la vivantoj, predikita de multe da amagoj kaj da bonvolo. Agoj kiuj, kiel la glaso da malvarma akvo donita je la nomo de Sinjoro Jesuo, ne restos sen rekompenco.

- Patro, kio okazus se ĉifoje vi estus denove malkovrita ? diris Simeono la dua, buterante sian platkukon.

- Mi pagus la monpunon, rebatis kviete Simeono la unua.

- Sed se ili metus vin en malliberejon ?

- Ĉu vi ne kapablus, via patrino kaj vi funkciigi la farmobienon ? diris Simeono ridetante.

- Ho ! Patrino kapablas ĉion regi, diris la juna knabo, sed ĉu ne estas honto fari tiajn leĝojn ?

- Ne malbone parolu pri tiuj kiuj regas vin, Simeono, reparolis serioze la patro. Disinjoro donacas al ni surterajn bienojn nur por uzi ilin juste kaj bonkore. Se por tio niaj regantoj postulas de ni dekonaĵon, ni devas pagi ĝin al ili.

- Mi ne malpli malamas tiujn maljunajn posedantojn de sklavoj ! diris la knabo tiel kontraŭkristana kiel povas esti moderna reformatoro.

- Vi mirigas min, filo mia ! Via patrino neniam instruis al vi malaman parolon. Tio kion mi faris por la sklavo, mi farus por la mastro, se Disinjoro sendus lin al mia pordo je lia horo de afliktiĝo.

Simeono la dua fariĝis purpura; sed la patrino ridetis kaj kontentiĝis diri : "Simeono estas mia bona filo; li estas juna. Kreskante, li pensos kiel sia patro".

- Mi esperas, mia kara sinjoro, ke neniu danĝero minacas vin pro ni, diris Georgo maltrankvile.

- Ne timu, Georgo. Kial do ni estu ĉi tie sube ? Se ni ne akceptus kelkan malagrablaĵon por servi bonan motivon, ni ne indus esti nomataj amikoj.

- Sed por mi !... Mi ne povas rezignacii pri tio ! diris Georgo.

- Ne malsereniĝu, amiko Georgo. Ne por vi, sed por Dio kaj por proksimulo. Nun necesas al vi kviete dormi. Ĉivespere, je la deka, Fineaso Fletŝer kondukos vin antaŭen, ĝis la sekva stacio, vi kaj tiuj kiuj akompanas vin. La ĉassekvistoj sekvas vin de proksime, necesas ne malfruiĝi.

- Do kial atendi ĉi vesperon ? demandis Georgo.

- Ĉar tage vi estas sekura ĉi tie. Ne estas iu, en la

kolonio, kiu ne estas amiko, kaj ĉiuj viglas. Plie estas pli sekure vojaĝi nokte.

15. Evangelino.

Matena stelo, via ŝancelanta lumeco
Ne povus sin miksi kun profanaj briletoj;
Esti tiel dolĉa, tiel pura, tiel bela kaj ĉarma,
Rozo, en via korolo, enfermu viajn bonodorojn.
Ĉatobriand (Atala)

Misisipo ! Kia sorĉovergo subite ŝanĝis la scenojn tiel poezie priskribitajn de Ĉatobriand ! Ĉi tiu majesta riverego kiu, en grandioza silento, tra ĉiuj pompoj de la kreitaro, rulis siajn potencajn ondojn meze de senlimaj solecoj, ekaperis el lando de sonĝoj, de vizioj, de mirindaĵoj, al apenaŭ malpli impresa kaj malpli belega realaĵo. Kiu alia rivero portus al la oceano, la riĉaĵojn de tiel vasta lando ? De lando kiu, de la tropikoj ĝis la poluso, tiel grandskale disvolvas tiom grandnombre da produktaĵoj ? Ĝiaj akvoj ŝlimaj, ŝvelaj, rapidaj, senĉese sin ĵetantaj, estas kiel la emblemo de la impetega fluo da aferoj verŝita laŭlonge de ĝia fluejo de pli energia, pli arda gento ol iu ajn el tiuj de la malnova mondo. Ha ! Ke de nun, la riverego ne plu transportu ĉi tiun hororan kargon de plorantaj prematoj, kompatindaj neinstruitoj, kies la ĝemoj, la amaraj kaj sopiraj preĝoj, alvokas nekonatan, nevideblan, mutan Dion, sed kiu iam venos "savi ĉiujn kompatindulojn de la tero".

La oblikva lumo de la subiranta suno tremetis sur la vasta etendaĵo de la riverego simila al maro. La fragmitoj tremis, kaj la malhelaj kaj gigantaj cipresoj, kun la frunto superŝarĝita de funebraj girlandoj el pendantaj nigraj muskoj, purpuriĝis per ĝiaj mortantaj radioj, laŭmezure kiam la vaporŝipo peze malsupreniris laŭ la rivero. Stakigitaj sur ĝiaj ferdekoj, alligitaj sur ĝiaj flankoj, la dikegaj pakegoj da kotono, produktaĵoj de nombraj plantejoj, kiujn ĝi

transportis al la najbara merkato, aspektigis ĝin de malproksime kiel kvadrata grizeca bloko. Surŝipe moviĝadis diverskolora amaso, inter kiuj oni longe serĉintus, antaŭ ol malkovri lin, Tomo^n, nian humilan amikon. Fine, ni ekvidas lin, rifuĝintan en malgranda kaŝangulo, ĉe la supro de amasigitaj pakegoj. Parte dank'al la konfido inspirita de la rekomendoj de S^ro Ŝelbi, kaj ankoraŭ pli al la influo de sendanĝera kaj trankvila personeco, Tomo iom post iom enŝoviĝis sufiĉe profunde en la konfido mem de Halej.

Unue, la komercisto zorge observis lin tage, kaj rekatenis lin ĉiunokte. Sed la muta pacienco, la milda kvieteco de la manieroj de Tomo, iom post iom humanigis la krudan mastron, kaj la nigrulo nun ĝuis specon de laŭpromesa libereco; li povis iri kaj reiri sur la boato laŭ sia plaĉo.

Ĉiam kvieta, ĉiam bonvola, rapida ĉiuokaze doni helpon al la laboristoj, al la matrosoj, li faris sin ami de ili, kaj plejparte pasigis sian tempon helpante ilin, kun la sama bonkoro kiel kiam li antaŭ nelonge laboris en la Kentukia bieno. Kiam li ne plu trovis ion por fari, li grimpis sur la pobferdekon, ĉe la supro de la stako da pakegoj, kaj tie kaŭrinta en la kaŝangulo kie ni trovis lin, pie agordiĝis, feliĉa literumi sian Biblion.

Ekde preskaŭ kvardek leŭgoj *(+/-190Km)* norde de Nov-Orleano, la riverego, pli alta ol la ĉirkaŭaj regionoj, fluigas la imponan volumenon de siaj akvoj inter masivaj digoj, de proksimume dudek futojn *(+/-6m)* altaj. De la galerio de la ferdeko de vaporŝipo, kiel de la supro de flosanta citadelo, la vojaĝanto superstaras tutan vastaĵon de la lando. Tomo do vidis disvolvi antaŭ si, de plantejoj al plantejoj, la planon de sia estonta ekzisto.

Li malproksimen vidis la sklavojn laborantajn; li vidis vice lokitaj la longajn liniojn de kabanoj, ĉiam malproksime de la majesta loĝejo de la mastro kaj de siaj pompaj parkoj.

Kaj samtempe kiam disvolviĝis la moviĝanta spektaklo, lia kompatinda frenezita koro reiris al la Kentukia bieno kun ĝiaj malnovaj foliriĉaj fagoj; al la granda domo kun ĝiaj malvarmetaj kaj longaj vestibloj; kaj tute proksime, al la malgranda kabano kovrita per la rozujoj kaj bignonioj. Tie, li revidis la amatajn vizaĝojn de infanaĝaj kamaradoj kreskintaj kun li; li retrovis sian viglan edzinon hastigantan la pretigadojn por ilia vespermanĝo; li aŭdis la gajan ridon de la knaboj ĉe iliaj ludoj, kaj la dolĉan pepadon de la eta karulino sur sia genuo. Poste li subite ektremis; ĉio malaperis, kaj glitante laŭlonge de la du riverrandoj, reaperis la senfinaj kampoj de sukerkano, la cipresoj, la sinsekvaj plantejoj; dum la krakadoj, la muĝadoj de la maŝino, venis rememorigi al li ke tio estis finita, por ĉiam finita, pri ĉi tiu stadio de lia vivo.

En tia kazo, leganto, vi skribus al via edzino, al viaj infanoj. Sed Tomo ne kapablis skribi, la poŝto por li tute ne ekzistis; neniam signo, vorto transirus la abismon de la disiĝo.

Ĉu do estas strange ke larmoj venu malsekigi la paĝojn de lia Biblio kiam, tenante ĝin malfermita sur pakego, sekvante per pacienca fingro linion post linio, li serĉis rememori ĝiajn diajn promesojn ? Tomo lernis malfrue; li estis malmulte sperta leganto, kaj li peze iris de versiklo al versiklo. Feliĉe, lia preferata libro estis el tiuj kiuj perdos nenion esti malrapide legata. Male, ĉiu vorto, simile al orbriko, devas esti aparte pesita, por ke la menso penetriĝu de ĝia netaksebla valoro. Tiel faris Tomo, sekvante per la fingro ĉiun silabon kaj eldirante ĝin duonlaŭte.

"Ke-via-koro-tute-ne-konfuziĝu. Estas-pluraj-loĝejoj-en-la-domo-de-mia-patro. Mi-iras-prepari-por-vi-la-lokon".

Cicerono, kiam li perdis sian solan kaj karan filinon, sentis doloron egalan al tiu kiun sentis Tomo, ne pli fortan,

ĉar ili ambaŭ estis nur homoj. Sed la romia oratoro ne konis ĉi tiujn superbelajn parolojn, plenplenaj de espero kaj certajn promesojn pri estonta kunveno. Se li konus ilin, estas dek por veti kontraŭ unu, ke li ne volintus kredi ilin; li unue estigintus mil demandojn pri la aŭtentikeco de la teksto, pri la fideleco de la tradukistoj. Por kompatinda Tomo, tio estis ĝuste tio kion necesis al li, tiel evidentaj veroj, tiel diaj, ke la eblo de dubo neniam trairis lian humilan cerbon. Tio devis esti vera; se ne, kiel li trovus la forton por vivi ?

La Biblio de Tomo, sen prinotoj, sen erudiciaj noticoj, estis riĉigita de li per kelkaj gvidsignoj, per kelkaj markoj el lia invento, kiuj gvidis lin pli efike ol povintus fari la komentoj de la erudiciuloj. Li kutimis legigi al si la Biblion de la infanoj de sia mastro, ĉefe de la juna Georgio; kaj dum la legado li markis per inko, per sentima streko aŭ per inkmakulo, ĉiun frazon kiu ĉarmis lian orelon aŭ pli profunde tuŝis lian koron. Lia Biblio, tiel prinotita de komenco ĝis fino, kun granda diverseco de stilo, permesis al li relegi liajn plej preferatajn fragmentojn, sen pene elparoli la intervalojn. En la sankta libro, malfermita antaŭ li, ĉiu paĝo rememorigis al li kelkajn karajn memoradojn pri la loĝejo, revivigis kelkajn pasintajn ĝojojn; li trovis en ĝi ĉion kio restis al li en ĉi tiu mondo, kaj ĉion kion li esperis kaj atendis en la alia.

Inter la multaj pasaĝeroj de la ŝipo estis juna ĝentlemano, riĉa kaj altedevena, kiu loĝis en Nov-Orleano kaj portis la nomon de Sanklaro. Li havis kun si sian filinon, kvinaŭ ses-jaraj, pri kiu sinjorino el ŝiaj parencoj prizorgis.

Tomo ofte videtis la infaninon, ĉar ŝi estis unu el tiuj ĉiam okupataj kaj zigzagantaj estuletoj, kiuj ne kapablis fiksiĝi pli ol sunradio aŭ somera venteto, kaj ŝi ne estis tiu kiun oni facile forgesas kiam oni iam vidis ŝin.

Ŝia tuta eta persono estis la idealo de infana beleco,

sen ĝiaj pufvangaj kaj diketa formoj. Ŝi estis la aera, ondiĝa gracio de la fantasta mondo de silfoj kaj niksoj. La allogo de ĉi tiu ĉarmega vizaĝo rezultis eble malpli el la reguleco de la trajtoj, ol el la aparta seriozeco de revema kaj tenera esprimo, kiu iafoje tremetigis tiujn kiuj ŝin kontemplis, kaj kies la penetrema impreso emociis, nesciate de ili, ĝis la vulgaraj kaj materiaj naturoj. Estis, en la pozo de ŝia kapo, en la gracia zono de ŝia kolumo kaj ŝia busto, neordinara eleganteco. Kaj la longaj kaŝtankoloraj haroj, kun oraj rebriloj, kiuj ĉirkaŭis ŝin per aŭreolo, la serioza profundeco de ŝiaj malhele bluaj okuloj kiujn ŝiaj longaj brunaj okulharoj ombris per iliaj franĝoj. Ĉio ŝajnis tiel forte izoli ŝin de la aliaj infanoj, ke ĉiu sin turnis kaj longtempe sekvis ŝin per la okuloj dum per diskretaj paŝadoj ŝi enŝoviĝis tie kaj tie en la boato. Tamen ŝi estis nek serioza nek malĝoja; naiva gajeco, flirtanta sur ŝiaj trajtoj, pasis kaj repasis kiel nedaŭra ombro de someraj folioj. Oni renkontis ŝin ĉie samtempe. Ĉiam moviĝanta, kun ŝiaj rozaj lipoj disigitaj de duona rideto, paŝanta kiel sur la nebulo, senĉese pepanta al si iun kanzoneton, ŝi ŝajnis profundiĝinta en feliĉa sonĝo. Kiam ŝiaj patro kaj parencino, ofte postkurantaj ŝin, sukcesis ekkapti ŝin, printempan nubon, ŝi fandiĝis inter iliaj manoj.

En ŝiaj tutaj petolaĵoj, neniam admono aŭ riproĉo venis al ŝi; tial ne estis kaŝangulo, supre, sube, ĉie sur la boato, kien ŝiaj etaj feinaj piedoj ne alportis ŝin.

Ĉiam blanke vestita, ŝi kuris, subtilan ombron, sen iam esti trafita de makulo aŭ de malpuraĵo. Kaj tiu ora kapo, tiuj okuloj el viola bluo, aperis ĉiuflanke kiel ĉiela vizio, kaj same elŝteliĝis.

La hejtisto, kiam li relevis sian ŝvitantan frunton, trafis la naivan rigardon kiun la infano ĵetis kun timema surprizo al la fundo de la muĝanta fornego, kaj kun timo kaj kompato al li, kvazaŭ ŝi kredus lin en terura danĝero.

La stiristo, ĉe la kapstano sur la poba kastelo, vidis la anĝelan bildon ekaperi kaj sveni malantaŭ la fenestra vitro de sia kajuto. Raŭkaj voĉoj ĉiuminute benis ŝin, ĉe ŝia vido ridetoj lumigis la plej grumblemajn vizaĝojn; kaj kiam ŝi maltimeme kuris sur kelkan danĝeran randaĵon, manojn, raspajn kaj nigrajn pro fulgo, nevole etendiĝis por subteni ŝin kaj glatigi ŝian vojon.

Tomo, dotita de la sentema kaj milda naturo de sia simpatia raso, tiel facile ĉarmita de ĉio kio estas naiva, infana, gracia, observis la etan estulinon kun kreskanta intereso. Ŝi estis por li preskaŭ dia estulino. Kiam tiu vizaĝo kadrita de polurita oro, kun siaj malhele bluaj pupiloj, kaŝe eliris de malantaŭ kelka nigra pakego, aŭ brilis ĉe la supro de monto da bagaĝoj, li kredis duonvidi anĝelon eskapintan el la folioj de sia sankta Evangelio.

Multfoje ŝi malĝoje vagis ĉirkaŭ la loko kie la grego de Halej, viroj kaj virinoj, kuŝis katenitaj. Ŝi ŝoviĝis inter ili, rigardis ilin kun doloriga angoro, levis per siaj nefortaj manetoj iliajn pezajn ĉenojn, poste foriris suspirante. Baldaŭ poste ŝi alkuris, ŝarĝita per kandoj, nuksoj, oranĝoj, kiujn ŝi feliĉe disdonis al ili; poste ŝi denove malaperis.

Tomo longe rigardis la etan sinjorinon, antaŭ ol riski sin flati ŝiajn bonajn favorojn. Li havis al sia dispono multegon da artoj kaj ruzaĵoj por altiri la malgrandan mondon, kaj li decidis lerte elturniĝi. Li kapablis skulpti el ĉerizaj kernoj kuriozajn korbetojn, li ĉizis groteskajn figurojn en nuksoj de karjo, kaj faris admirindajn saltantojn el medolo de sambuko. Pajno mem ne estas pli sperta pri la fabrikado de ĉiaj flutoj kaj fajfiloj. Liaj poŝoj abundis de multe da ĉi tiuj tentaj logaĵoj, iam preparitaj por la infanoj de lia mastro, kaj kiujn li nun produktis, unu post unu, ŝpareme kaj sagace; ili estis komencoj por pli kompleta konatiĝo, logaĵoj proponitaj por estonta amikeco.

Facile timanta, malgraŭ la scivolema intereso kiun ŝi montris al ĉiuj aferoj, la etulino malmulte familiariĝi. La birdo sidiĝis sur iu kofro aŭ pakego en la najbarejo de Tomo, spionante la beletajn mirindaĵojn el lia maniero, kiujn la infano akceptis nur kun ruĝiga kaj serioza timemo, laŭmezure kiam li proponis ilin al ŝi; tamen kun la tempo la familiareco alvenis.

- Kiu esti la nomo de la eta fraŭlino, diris Tomo kiam li kredis povi riski la demandon.

- Evangelina Sanklaro, respondis la etulino, kvankam paĉjo, kvankam ĉiuj nomas min Evnjo. Kaj vi, kiel oni nomas vin ?

- Mia nomo esti Tomo. Sed mi ĉiam esti onklo Tomo por la etaj infanoj, tie, tre malproksime, en Kentukio.

- Do ankaŭ por mi vi estos onklo Tomo, ĉar, komprenu, mi ja ŝatas vin. Kien vi iras tiel, onklo Tomo ?

- Mi nenion scii, fraŭlino Evnjo.

- Nenion ! diris la etulino.

- Ne. Oni baldaŭ vendi min al iu. Mi ne scii al kiu.

- Paĉjo povas aĉeti vin, diris Evnjo vigle; kaj tiam vi bone vivos. Mi tuj demandos tion al lin.

- Grandan dankon ! Virineto mia, diris Tomo.

La boato haltis por ŝarĝi brullignon. Evnjo, aŭdante la voĉon de ŝia patro, saltis al li, kaj Tomo rapidis iri proponi siajn servojn kaj miksi sin kun la aliaj laboristoj.

Evnjo kaj ŝia patro, staraj apud la galerio, rigardis la boaton malproksimiĝi de la elŝipiĝejo. La rado jam faris du aŭ tri turniĝojn, kiam, pro subita ekskuo de la boato, la knabineto perdis la ekvilibron kaj falis en la akvon. Ŝia patro, apenaŭ sciante tion kion li faris, sin ĵetis post ŝi. Iu retenis lin de malantaŭe, pli efika helpo alvenis por savi la infanon.

Ĉe la momento de la falo, Tomo sin trovis ĝuste sube,

sur la malsupra ferdeko. Li vidis Evnjon frapi la akvon, malaperi, kaj li sekvis ŝin post malpli ol sekundo. Dank'al lia larĝa brusto kaj liaj fortikaj brakoj, estis nur ludo por li resti flosanta, ĝis kiam la infano reaperis sur la akvosupraĵo. Li tiam ekkaptis ŝin, kaj, naĝante laŭlonge de la flankoj de la boato, prezentis ŝin, tute gutantan, al la milo da samtempe etenditaj manoj, kiel tiu de ununura viro, por ricevi ŝin. Ŝia patro kunportis ŝin senkonscie en la sinjorinan ĉambron kie, kiel kutime en tia kazo, estis granda tumulto, kaj superfluo da fervoro kaj da bonvolo, okazigante nur la laciĝon de la malsanulino kaj la prokraston de ŝia reveno al vivo.

La morgaŭon, ĉe la ekfiniĝo de la tago, sub sufoka varmo, Nov-Orleano estis videbla de la boato. Ĉiuflanke estis nur agitado, nur preparadoj. Ĉiuj amase kolektis siajn pakaĵojn antaŭ ol atingi la riverbordon, kaj la servistoj rapidis por pretigi ĉion, purigi ĉion, poluri ĉion, por fine fari triumfan eniron.

Sur la pobferdeko, nia amiko Tomo, sida kun krucitaj brakoj, direktis de tempo al tempo, maltrankvilan rigardon al iu grupo haltita ĉe la alia flanko de la boato.

Tie troviĝis la blanka Evangelina, iom pli pala ol dum la antaŭtago, sed sen iu ajn spuro de la akcidento kiu okazis al ŝi. Juna viro, kun eleganta talio, kun distingita aspekto, staranta apud ŝi, senatente apogis sian kubuton sur pakego da kotono, kaj tenis grandan monujon malfermitan. Necesis nur ekrigardo por rekoni la patron de Evnjo. Estis la sama nobla kaj gracia teniĝo de kapo, la samaj belaj bluaj okuloj, la sama nuanco de orbrunaj haroj; sed la fizionomio estis tute alia. Tiuj grandaj, helaj okuloj, el sama formo kaj sama koloro kiel tiuj de Evnjo, havis nenion el tiu mistera kaj profunda esprimo; ĉio estis vigla, aŭdaca, brila kaj monduma. La buŝo, fajne desegnita, havis fieran kaj iom sarkasman esprimon. Ĉiuj gestoj, ĉiuj movoj de tiuj flekseblaj kaj

graciaj membroj malkaŝis kutimojn de facileco kaj supereco. La ĝentlemano, kun senzorga bonhumoro kaj duone mokema, duone malestima esprimo, strecîs la orelojn al la disvolvadojn de Halej, kiu laŭdis kiel eble plej bone, kaj kun granda elokvento, la marĉanditan artiklon.

- Ĉiuj moralaj kaj kristanaj virtoj, binditaj en nigra marokeno, kompleta eldono, diris Sanklaro kiam Halej ĉesis. Nun ni vidu, mia honesta debitanto, ni vidu, kiel oni dirus en Kentukio, kia estas la damaĝo ? Kiom necesas al mi pagi por ĉi tiu ekzemplero de ĉiuj virtoj ? Kiom vi volas prifriponi min ? Diru tion maltime.

- He ! daŭrigis Halej, petante mil tricent dolarojn, mi nur kompensus miajn elspezojn; honesta vorto !

- La kompatinda viro, vere ! *Kaj la nobla aĉetanto fiksis sur Halej sian penetran, mokeman rigardon*. Sed vi lin lasos al mi je tiu kosto, pro pura konsidero al mi, ĉu ne ?

- La juna jena fraŭlino ŝajnas tiel entuziasma, tio kio cetere estas tre natura !

- Ho ! Certe. Tio estas rekta alvoko al via bonvolo, mia lojala amiko. Nu, pro kristana karitato, kiom vi rabatas por komplezi al la juna fraŭlino kiu tiel multe entuziasmiĝas pri li ?

- Nu, diris la vendisto, rigardu nur la artiklon. Vidu iom ĉi tiujn membrojn ! Larĝan bruston ! Li estas fortika kiel ĉevalo. Ekzamenu tiun kapon ! Tiuj altaj fruntoj ĉiam faras kalkulemajn negrojn, kiujn oni povas meti al ĉio. Mi pli ol unu fojon spertiĝis pri tio. Nun, negro kun ĉi tiu staturo kaj ĉi tiu ŝultrolarĝo ĉiam kostas tre alte, nur pro la brusto, eĉ se li estus stulta, kaj ne estas la kazo de ĉi tiu. Ni plie havas la kapablojn por aldoni. Mi povas pruvi tion al vi, sinjoro, ĉi tiu knabego havas kelkajn el ili, kaj kiuj nature ŝveligas lian prezon. Ĉu vi scias ke li regis la tutan bienon de sia mastro ! Mirindegan kapablecon por la aferoj, sinjoro !

- Embarasa, tre embarasa ! Li tro multe scias, *diris la junulo kun la sama mokema rideto flirtanta ĉirkaŭ lia buŝo*. Tio ne helpos lin al la merkato. Viaj tiel lertaj knabegoj kapablas ŝteli la ĉevalojn kaj ekfuĝi. Ili montras multege da vigleco. Nu, ducent dolarojn malpli, pro ĝiaj meritoj.

- Mi ne diras por ĉiu alia, sed ĉi tiu havas personecon ! Mi havas ĉi tie la atestojn kaj dokumentojn de lia mastro, kiuj pruvas ke li estas unu el viaj veraj devotuloj, la plej humila, la plej pia, la plej fervora estulo kiu oni povas vidi. Ili faris de li sian predikanto, tie, de kie li venas.

- Kaj mi povus uzi lin kiel pastron, aldonis seke la junulo. Bonega ideo ! La religio estas inter la maloftaj artikloj en la loĝejo.

- Sinjoro ŝercas !

- Kion vi scias ? Ĉu vi ne garantiis lin al mi kiel atestitan predikanton ? Ĉu li havas sian diplomon de iu ajn sinodo aŭ konsilio ? Nu, donu al mi viajn paperojn.

Se kelkaj bonhumoraj trembriloj en la okulo ne konvinkus la vendiston ke ĉiuj ĉi ŝercoj fine ŝanĝiĝus en bonaj eskudoj, li perdintus paciencon. Ĉiaokaze, li metis sian dikan monpaperujon sur pakegon, kaj komencis esplori ĝian enhavon, dum la junulo, ankoraŭ staranta, konsideris lin mokeme.

- Do aĉetu lin, paĉjo ! Kiom ajn li kostas, mallaŭte murmuris Evnjo grimpinta sur pakaĵon por atingi la orelon de sia patro. Vi havas sufiĉe da mono, tutcerte, kaj mi volas havi lin.

- Kial, junulineto ? Ĉu vi volas fari per li sku-ludilon ? Lulĉevalon ? Marioneton ? Kion ?

- Mi volas feliĉigi lin.

- Origina kialo, ĉifoje !

Ĉimomente la vendisto prezentis atestilon, subskribitan de S^ro^ Ŝelbi, kiun la junulo ekprenis per la pintoj de siaj

aristokrataj fingroj kaj senzorge tralegis ĝin.

- La mano kaj la stilo de ĝentlemano, li diris sed, ĉion enkalkulinte, mi havas miajn skrupulojn pri la religia artiklo, *kaj denove la petoleto eksplodis en lia granda blua okulo*. La lando preskaŭ ruiniĝas pro blanka religieco, ni havas, por la antaŭtago de la balotadoj, superabundon de piaj politikuloj. Tiom da piaj homoj interpuŝiĝas en ĉiujn ĉefoficojn de la Eklezio kaj de la Ŝtato, ke vere oni ne scias, al kiu fidi. Mi cetere nescias kiu ĝuste estas la kurzo de la religio nuntempe. Mi delonge ne konsultis en la gazetojn por vidi kiel ĝi estas kvotita. Je kiom da centoj da dolaroj vi taksas la artiklon religion ?

- Vi ŝatas ridi, laŭ tio kion mi vidas, daŭrigis la vendisto, sed fakte estas iom da saĝo en via diro. Ankaŭ mi konas religiojn el diversaj specoj; kaj mi scias ke kelkfoje estas sentaŭgaĵo. Vi havas viajn kunvenojn de bigotoj; viaj devotuloj kiuj senspiriĝinte krias por kanti, kaj kiuj, blankaj aŭ nigraj, sonas kiel malplena barelo. Sed ĉi tiu pieco estas bonkvalita. Mi observis tion ĉe negroj kiel ĉe blankuloj; tio faras al vi homojn afablajn, trankvilaj, firmaj, honestaj. Por nenio en la mondo ili sin lasus tenti por fari tion kion ili imagas esti malbone. Cetere vi vidis en la letero tion kion la eksa mastro de Tomo diris pri li.

- Nu, reparolis la junulo per serioza tono, foliumante siajn bankbiletojn, se vi certigas al mi ke tio estas sendifekta pieco, kaj kiu estos tie supre enskribata ĉe mia debeto, en la ĉeflibro, kiel apartenanta al mi, mi malsaĝe elspezos por tio. Kiom vi diris ?

- La lasta punkto superas mian garantion, rebatis la vendisto. Mi kredas ke ĉe la supra borso ĉiuj ludas por sia konto.

- Tamen estus malfacile ke brava homo ruiniĝu en religio, kaj ne povu spekuli pri artiklo, tie kie ĝi altiĝas.

Kaj la junulo kiu parolante faris rulvolvaĵon da monbiletoj, prezentis ilin al la vendisto.

- Tenu ! Kalkulu viajn dolarojn, maljuna ruzulo.

- Estas bone ! Halej diris kun radianta vizaĝo; kaj elprenante el sia poŝo malnovan inkujon el korno, li skribis la kvitancon kiun li donis al Sanklaro.

- Mi dezirus scii, diris ĉilasta tralegante la paperon, tio kion mi ja povus valori se mi estus taŭge detalita kaj inventarita; tiom por la formo de la kapo, tiom por la alta frunto, kaj la brakoj, kaj la manoj, kaj la kruroj ! Kaj plie, la edukado, la scienco, la talentoj, la honesteco, la religio ! Bedaurinde ! Ĉi tiu lasta alineo apenaŭ ŝveligus la fakturon. *Sed venu, Evnjo, li daŭrigis; kaj prenante la infanon per la mano, li kondukis ŝin ĉe la alian flankon de la boato. Tie, neglekte pasigante la fingron sub la mentono de la nigrulo, li bonhumore diris* : "Levu la okulojn, Tomo, kaj vidu kiel vi ŝatas vian novan mastron".

Tomo rigardis lin. Oni ne povis kontempli ĉi tiun gajan, junan, malkaŝeman, ĉarman figuron sen sento de plezuro, kaj larmoj preskaŭ ŝprucos el la okuloj de la brava nigrulo, kiam li diros plejprofunde de sia koro : "Dio beni vin, mastro !"

- Amen ! Ĉiukaze vi havas eĉ pli da ŝancojn esti elaŭdita ol mi. Kiel vi nomiĝas ?... Tomo ? Ĉu vi kapablas veturi, Tomo ?

- Mi ĉiam prizorgi ĉevalojn; mastro Ŝelbi bredi multajn el ili.

- Nu, mi pensas ke mi faros vin koĉeron, kondiĉe ke vi ebriiĝos nur unufoje semajne, krom se urĝeco.

Tomo ŝajnis surprizita, iom ofendita, kaj respondis : "Mi neniam drinki, mastro".

- Malnova rakonto ! Konata, Tomo. Nu, ni vidos. Malbeno ! Vi kalkulos kiel gravega akiraĵo, se ĉi tio estas vera. Nu, ne ĉagreniĝu, knabo mia, *li bonhumore daŭrigis*

rimarkante la kuntiritan mienon de Tomo, mi ne dubas ke vi faru kiel eble plej bone.

- Esti sendube kaj certe, mastro.

- Kaj vi ĝoje vivos, diris Evnjo. Paĉjo estas tre bona al ĉiuj; nur li ŝatas moki ĉiujn.

- Paĉjo dankegas vin pro la laŭdo, *diris ridante Sanklaro, dum li sin turnis sur la kalkano, kaj foriris kun la infano.*

16. Pri nova Mastro kaj pri lia kunvivantaro.

La vivo de nia heroo venas miksiĝi kun tiu de homoj el la alta rango, necesas al ni prezenti tiujn lastajn al la leganto.

La familio de Aŭgusteno Sanklaro loĝanta en Luiziano devenis de Kanado. El du fratoj kun similaj humoroj, karakteroj, naturoj, unu iris regi belan bienon en la ŝtato Vermonto; la alia, restinta en Luiziano, fariĝis unu el la plej riĉegaj plantistoj. La patrino de Aŭgusteno devenis de la unuaj francaj kolonianoj kiuj transiris Atlantikon. Ŝi havis nur du filojn : Aŭgusteno, la lasta, heredis la ekstreman delikatecon de la konstitucio de sia patrino, kaj laŭ la nepra ordono de la kuracistoj, estis sendita tute juna al la bieno de sia onklo, por plifortigi sian temperamenton en la viviga aero de la Nordo.

Se la preskaŭ ina sentemo kiun Aŭgusteno vidigis, dum sia infanaĝo, ŝajne malaperis kiam li atingis la aĝon de viro, ĝi tamen konservis ĉe la fundo sian tutan viglecon, sian tutan freŝecon. Liaj eminentaj talentoj, kondukante lin al literaturaj kaj filozofiaj studoj, forigis lin de la aferoj kaj de la pozitiva vivo, kaj apenaŭ li finis sian edukadon, kiam li estis absorbita de profunda pasio. Lia horo, tiu kiu sonoras nur unufoje, sonoris; lia stelo, tiu kiu tiel ofte lumigas nur sonĝojn, aperis ĉe la horizonto. Resume, li amis, estis amata, fianĉiĝis kun ĉarma knabino el la nordaj ŝtatoj, kaj foriris por rapidigi la preparojn de la geedziĝo.

Li alvenis nur de nelonge en la Sudo, kiam li ricevis pakaĵon enhavantan ĉiujn siajn amleterojn. Ili estis resenditaj al li kun noto de la kuratoro de lia fianĉino, kiu sciigis lin ke ŝi faris alian elekton, kaj estus edziĝinta kiam li ricevus tiun avizon. Trafita ĉe la koro, sed tro fiera por peti

klarigon aŭ aŭdigi plendon, Aŭgusteno provis, per malespera barakto, elŝiri la doloron kiu afliktis lin. Ĵetita en la vorticon de la mondo, li amindumis la junan laŭmodan belulinon, sukcesis esti akceptita senprokraste, kaj tuj kiam la afero eblis, fariĝis la edzo de iu bela vizaĝo, de du brilantaj nigraj okuloj, de iu doto de cent mil dolaroj, kaj estis konsiderita kiel la plej feliĉan el la mortemuloj.

La riĉaj geedzoj ĝuis sian mielmonaton, honore gastigante multajn amikojn en belega vilao lokita ĉe la bordo de la lago Ponĉetrejn. Aŭgusteno, meze de brila kuniĝo, gaje ŝercis kun siaj gastoj, kiam oni transdonis al li leteron, kun tro konata skribo. Li paliĝis, sed sukcesis deteni sin, kaj daŭrigis la konversacion. Tuj kiam li povis, li forŝoviĝis, kaj iris sola en sian ĉambron por malfermi la fatalan skribaĵon; feliĉa se li povintus neniam legi ĝin ! Ĝi estis de ŝi; ĝi estis la historio de la longaj persekutadoj kontraŭ kiuj ŝi sukcesis rezisti. La familio de ŝia kuratoro volis devigi ŝin edziniĝi kun sia filo kaj interkaptis la leterojn de Aŭgusteno. Ŝi skribis, ankoraŭ skribis, preskaŭ subfalante sub doloro kaj dubo. Ŝia sano kliniĝis sub la pezo de la angoroj. Sed finfine sukcesante malkovri la fraŭdon pri kiu ili estis viktimoj, ŝi venis prezenti al li la certigojn pri senlima fido kaj pri la nedifektebla amo kiu estis nun la malespero de Aŭgusteno. Li tuj respondis :

- Via letero alvenas tro malfrue, mi kredis ĉion kion oni skribis al mi. En mia malespero, mi edziĝis kaj ĉio estas farita ! Nur forgesu ! Tio estas ĉio kio restas al ĉiu el ni.

Tiel finiĝis por Aŭgusteno la romaneco kaj la idealo de la vivo. La realaĵo restis; la realaĵo simila al la ŝlima fluejo kiun lasas la tajdo, kiam la brilegaj kaj bluaj marondoj retiriĝis, kun sia krono el blankaj veloj, kaj sia harmonia muziko de akvoj ŝprucantaj sub la regula batado de la remiloj, kiam restas nur ŝlimo kota, plata, glueca, nuda,

unuvorte, la realaĵo !

En romano la koroj rompiĝas, la homoj mortas, la afero finiĝis. Tiel ne estas en la reala vivo. Kiam ĉio kio faris ami ĝin, malaperis, ĝi restas kun vi. Trinki, manĝi, vestiĝi, promeni, viziti, aĉeti, vendi, legi, paroli, ĉi tiu parto de la vivo restis kun Aŭgusteno. Se lia edzino havintus la virtojn de virino, ŝi povintus religi la rompitajn fadenojn de la vivo kaj refari la vefton de la feliĉo. Sed ĉu Marta Sanklaro nur konjektis ke estis rompitaj fadenoj ? Ni scias tio, ĝi estis nur bela vizaĝo, du belegaj okuloj, cent mil dolaroj, kaj ĉiuj ĉi avantaĝoj proponas nenion kiu povu mildigi ŝiritan koron.

Aŭgusteno, pala kiel mortinto, kuŝinta sur sofo, pretekstis subitan migrenon, kaj lia edzino rekomendis al li volatilajn salojn. La paleco kaj la kapdoloro daŭris semajnon post semajno malgraŭ la rimedo.

- Vere, diris Marta , mi tute ne suspektis ke S^{ro} Sanklaro estis malsanema ! Liaj konstantaj kapdoloroj estas tre malagrablaj por mi; oni povas opinii stranga ke estante tiel freŝe edziniĝinta, mi ĉiam montras min sola en la mondo.

Plejprofunde en sia koro, Aŭgusteno aplaŭdis sin pro la manko de distingo de tiu kiun li edziĝis; sed li povis observi, laŭmezure kiel la verniso de la unuaj geedziĝaj tagoj viŝiĝis, metamorfozon cetere sufiĉe komunan. Li vidis la junan belulinon admirita, flategita, servita ekde infanaĝo, fariĝi en la hejma vivo severa kaj postulema mastrino. Marta estis naturdotita nek de akra sentemo, nek de granda ampotenco; la malmulto kiun ŝi havis pri ĝi, perdiĝis en egoismo senbrida kaj senhelpa, ĉar ĝi estis tute naiva. Ĉirkaŭita ekde la lulilo de geservistoj kiuj vivis nur por studi ŝiajn kapricojn; sola filino de riĉega patro kiu nenion rifuzis al ŝi; neniam la ideo de sento, de rajto ĉe aliaj, ne pli ol de devo ĉe si mem, tuŝetis ŝian spiriton. Riĉa heredantino, juna, bela, ornamita, la mondo, tuj kiam ŝi aperis en ĝi, bonvenigis ŝin kiel reĝinon.

Adorantoj el ĉiuj rangoj sin pelis ĉirkaŭ ŝi, kaj kiam Aŭgusteno venkis super siaj rivaloj, ŝi evidente rigardis lin kiel tro feliĉan. La manko de koro tute ne indulgigas koncerne la ama interŝanĝo. Eble ne ekzistas sur tero pli senkompata kreditoro ol la egoista virino; ŝi montras sin postulema kaj ĵaluza proporcie al sia sensenteco kaj malvarmeco; ŝi volas esti tiom pli amata kiom ŝi estas malpli aminda. S^ino Sanklaro, kiu ne akceptis ke la edzo povu malstreĉiĝi pri la komplezoj kaj galantaĵoj de amanto, faris la plej viglan defendon por reteni Aŭgusteno^n sub la jugo. Estis larmoj, paŭtadoj, koleratakoj, multa humuro, kapricoj, plendoj, riproĉoj. La afabla kaj akordiĝema naturo de Sanklaro instigis lin unue peni aĉeti pacon per donacoj kaj flataĵoj; poste, kiam Marta donis al li ĉarman knabineton, li sentis fulmojn de tenereco vekiĝi en si. Lia patrino estis rimarkinda de nekutimaj nobleco de karaktero kaj pureco de animo. Nomante la infanon per la respektata nomo de lia avino, li esperis parte doti ŝin per ŝiaj virtoj; sed ĉi tiu miksaĵo de fila respektego kaj patra tenereco rimarkita de S^ino Sanklaro vekis ĉiujn ŝiajn ĵaluzajn incitiĝemojn. Ŝajnis ke la amo direktita de ŝia filino estas ŝtelita al ŝi mem. De tiam lia sano komencis difektiĝi. Konstanta senagado de korpo kaj de animo, la ronĝema laboro de enuo kaj de grumblema humoro, kunigita kun la malforteco ligita al la unuaj tempoj de patrineco, ŝanĝis en malmutaj jaroj la florantan kaj belan junulinon al flava, malvigla, velkema virino, kies diverseco da imagaj malsanoj konsumis la vivon, kaj kiu konsideris sin la plej malsana kaj la plej malfeliĉa el la homaj estuloj.

Estis nek fino nek paŭzo al ŝiaj plendoj : la migreno interalie ĉirkaŭfermis ŝin en ŝia ĉambro po tri tagoj en ses; la mastrumado falis entute sur la geservistoj, kaj Sanklaro havis neniun kialon trovi ŝian hejmon agrabla. Lia sola filino

estis tre delikata. Oni povis timi ke ŝia sano, eble ŝia vivo, estu oferata al sensperteco, al la senkapableco de la patrino. Aŭgusteno do decidiĝis rondviziti siajn geparencojn en la ŝtato Vermonto. Li kunprenis sian etan Evangelina^{n}, kaj sukcesis persvadi sian kuzinon, fraŭlinon Ofelio^{n} Sanklaro^{n}, veni loĝi proksime de ŝi kaj li en ilian sudan rezidejon. Li alkondukis ŝin tien, kiam ili estis renkontitaj sur la boato de nia amiko Tomo.

Dum la kupoloj kaj turpintoj de Nov-Orleano ankoraŭ brilas tra la vesperaj vaporoj en la okuloj de la pasaĝeroj, ni iomete konatiĝu kun f^{ino} Ofelio.

Kiu ajn vojaĝis en Nov-Anglio memoras, meze de kelka freŝa vilaĝo, pri la granda farmodomo kun ĝia tiel pura herboriĉa korto sub la densa ombro de sukeracero. Ĉu li ne memoras pri tiu etoso de ordo, de paco, de pureco, de senfino, de senŝanĝa ripozo, kiun oni spiras ĉirkaŭe ? Nenio perdita, nenio ekster loko, ne iu paliso malrekta en la bariloj, ne pajlero forgesita sur la gazontapiŝoj, ne bukedo ŝirita el la siringoj florantaj sub la fenestroj. Interne estas grandegaj ĉambroj, tiel trankvilaj kaj puraj, ke ŝajnas neeble ke oni vivis tie, ke oni ankoraŭ laboras tie. La mebloj, metitaj en iu loko, estas lokitaj unu fojon por ĉiam; kaj la mastrumaj organizoj sekvas periodajn ciklojn, tiel akuratajn kiel tiuj de la horloĝo kiu de ĝia angulo fiksas kaj regas ilin. Certe ja la vojaĝanto ne forgesos la grandan salonon, kiel oni nomas ĝin en la familio, kun ĝia respektinda vitra libromeblo, kie troviĝas la *Historio* de Rolin, la *Perdita Paradizo* de Miltono, la *Progresoj de la Pilgrimo* de Bunyan[(17)], kaj la *Familia Biblio* de Skot viciĝas flank'al flanke kun sinsekvo da volumoj, ne malpli solenaj kaj ne malpli respektindaj. Neniu servistino en la domo. La mastrino, kun sia neĝblanka ĉapo, siaj okulvitroj sur la nazo, posttagmeze sidiĝas, babilante inter siaj filinoj, kvazaŭ neniam iu el ili sin okupis pri la

mastrumado. Estis dum iu el la plej foraj momentoj de la tago, nun plene forgesita, ke ŝi kaj ŝiaj filinoj rapide plenumis la tutan taskon, kaj ne gravis kioma horo vi renkontis ilin, la laboro estis finita. La kuireja planko ne plu konas aŭ makulojn aŭ malpuraĵojn; la kuriloj, la seĝoj, la tabloj neniam estis malpurigitaj aŭ malordigitaj, almenaŭ ne eblus supozi tion; kaj tamen oni faras tie tri kaj kvar manĝoj tage, la lavado kaj la gladado por la tuta familio tie okazas; kaj tie, per ia diskreta kaj mistera procezo, produktiĝis grandegajn kvantojn de fromaĝo kaj butero.

Estas en simila farmodomo, meze de familio kun ĉi tiu karaktero, ke f^ino Ofelio vidis kviete flui ĉirkaŭ kvardek kvin aŭtunojn, kiam ŝia kuzo invitis ŝin viziti lian sudan rezidejon. Kvankam ŝi estis la unuenaskita de grandnombra idaro, Ofelio, laŭ siaj geparencoj, estis ankoraŭ nur "infano". La ideo sendi ŝin al Nov-Orleano ŝajnis impresa al ĉiuj. La maljuna blankhara patro elprenis la maparon de Morso el la libromeblo; li ene serĉis la latitudojn kaj longitudojn de ĉi tiu fora lando; kaj por instruiĝis pri la naturo de la lando. Li diligente legis la vojaĝojn de Flinto al la Sudo kaj la Okcidento. La bona patrino maltrankvile demandis "ĉu Orleano ne estas tre perversa urbo ?" Siaflanke ŝi pli ŝatus ekziliĝi "al Sandviĉaj Insuloj, aŭ al iu ajn alia pagana regiono".

Ĉe la pastro, ĉe la kuracisto, en la butiko de f^ino Pizkorpo, la modistino, aŭdiĝis la bonega novaĵo : Ĉu Ofelio Sanklaro ne parolis akompani sian kuzon al Orleano ? La tuta vilaĝo ne povis fari pli bone ol helpi ellabori tiel malsimplan aferon; sekve, estis por tiu kiu parolus pri tio. La pastro, inklina al la aboliciistoj, timis ke ĉi tiu tre grava paŝo instigus la sudulojn konservi sklavecon. La kuracisto, vigla subteno de la federacio, opiniis la foriron de f^ino Ofelio necesa; estis bone pruvi al la civitanoj de Nov-Orleano ke finfine oni ne

pensis tro malbone pri ili en la Nordo : la suduloj vere bezonis esti kuraĝigitaj. Kiam fine la fiksita decido eniris en la publikan fakon, Ofelio estis, dum dekkvino da tagoj, solene invitita de siaj amikoj kaj konatoj por laŭvice preni teon ĉe ĉiun, kaj ĉiuj ŝiaj projektoj kaj planoj estis diskutataj kaj ĝissate pripensataj. F^ino Moselej, alvokita al la bieno kiel kudristino, subite akiris ian gravecan gradon, konsiderante la okazigitajn evoluojn de la vestaro de Ofelio. Fidindaj homoj asertis ke eskviro Sanklaro, kutima maniero formuli la nomon en la lando, transdonis al f^ino Ofelio kvindek bone kalkulitajn dolarojn, instigante ŝin aĉeti tion kion ŝi opinius plej bela; kaj du novaj roboj el silko, kun belega ĉapelo, estis senditaj al ŝi de Bostono.

Pri la taŭgeco de ĉi tiuj ekstravagancaj elspezoj, la publika spirito hezitis. Iuj opiniis ke oni povas sin permesi lukson unufoje en la vivo; aliaj asertis ke la mono estintus pli fruktodone uzata de la misiistoj; sed ĉiuj akordiĝis pri la beleco de la nekomparebla sunombrelo sendita de Novjorko; kaj, oni ankaŭ diris ke ŝi havis silkan robon al kiu oni povis fidi ke ĝi taŭgos sola, kion ajn oni povus diri pri ĝia mastrino. Kelkaj onidiroj disvastiĝis pri aĵuraj poŝtukoj, kaj eĉ, ĉu ni kredus tion, ornamitaj per puntoj ! Oni eĉ aldiris ke ili estis broditaj ĉe la anguloj ! Sed ĉi tiu lasta punkto, dubinda, neniam povis esti klarigita.

Vidu nun, en la vaporŝipo, jen ŝi, f^ino Ofelio mem, vestita de sia nova vojaĝa vesto el bruna kalandrita indieno; granda, rigida, kun sia osta strukturo, siaj angulaj konturoj, sia svelta vizaĝo, siaj maldikaj lipoj, kunpremitaj pro la kutimo ĉiaokaze firme decidiĝi, siaj nigraj kaj penetraj okuloj, atentaj por malkovri kelkan zorgon por preni, kelkan malordo por korekti. Ŝiaj movoj estas viglaj, sekaj, energiaj. Silentema cetere, ŝi tamen diras ĉion kion ŝi volas diri, kaj ŝiaj vortoj iras rekte al la celo. Fine, ŝi estas entute la

vivanta personigo de la ordo, de la metodo, de la precizeco. Ŝia akurateco spitas tiun de la plej bona horloĝo, kaj sin montras tiel senindulga kiel la svingilo de vapormaŝino.

Ŝiaopinie, la peko de la pekoj, la esenco de ĉiuj malbonoj, estas resumita per unu vorto: malordo ! Kaj ĉi tiu vorto ofte reaperas. Ŝia tuta malestimo densiĝas per la emfazo per kiu ŝi aŭdigas ĝin. Ĉiu ago kiu ne estas rezulto de difinita celo, la homoj kiuj nenion faras, tiuj kiuj ne scias tion kion ili faros, tiuj kiuj ne prenas la rimedojn por fini tion kion ili entreprenas, "senordaj, malordo !" Sed plejofte la malestimo de Ofelio frostiĝas laŭ malmilda, malbonhumora aspekto, plivole ol ĝi eliĝas per paroloj.

Ŝia inteligenteco estas kultivita; ŝia menso klara, aktiva, vigla. Ŝi legis, kaj bone legis la historion. Ŝi konas siajn maljunajn klasikajn aŭtorojn; kaj ŝia penso, en limigita rondo, estas rekta kaj forta. Ŝiaj moralaj reguloj, ŝiaj religiaj dogmoj, tre senkonfuzaj, tre kompletaj, precize kunordigitaj, estas enfakigitaj, aranĝitaj, klasifikitaj, kiel la nombraj pakaĵoj en ŝia necesujo. En ĝi estas la taŭga nombro, kaj neniam estos pli aŭ malpli. Samas pri ŝiaj nocioj pri ĉio kio koncernas la praktikan vivon : mastrumado en ĉiuj ĝiaj branĉoj; politikaj, sociaj kaj privataj opinioj aktualaj en ŝia naskiĝvilaĝo; fine, funde de ĉio, kiel supre ĉio, troviĝas la principo mem de ŝiaj agoj kaj ŝiaj pensoj, ŝia konscienco; kaj nenie la konscienco montriĝas tiel supera, tiel ekskluzive reĝina kaj mastrina, kiel ĉe la virinoj de Nov-Anglio. Ĝi estas la granita formacio, kiu estas la plej profunda, kaj eĉ altiĝas ĝis la supro de la plej altaj montoj.

F^{ino} Ofelio estas la blinda sklavo de la devo. Tuj kiam ŝi suspektas ke la pado de la devo, ĝi estas ŝia plej preferata esprimo, iras laŭ iu direkto, ŝi ekiras al ĝin, kaj nek akvo nek fajro deviigus ŝin. Ŝi paŝos tra la faŭkantan aperturon de puto, aŭ rekte al la buŝo de kanono, kie ajn, se la pado

alkondukas tien. Bedaŭrinde por ŝia ripozo, ŝia tipo de perfekteco estas el tiel alta rango, entenas tiom da detaloj, kaj tiel komplete abstraktas la homan malkuraĝon, ke kompatinda Ofelio, malgraŭ heroaj klopodoj, ne finis tion kion ŝi komencis; tial ŝia humoro kaj ŝia pieco suferas kelkan amarecon en la dolora sento de kontinua manko.

Sed kiu, en la nomo de la ĉielo, sukcesis kunigi tiel heterogenajn elementojn, f^inon^ Ofelio^n^ kaj Aŭgusteno^n^ Sanklaro^jn^ ? Aŭgusteno, gaja, facila, ventanima, skeptika, piedpremanta kun sentima senzorgemo aŭ spitema libereco, la plej karajn kutimojn, la plej respektajn opiniojn de la bonega knabino ? Se necesas diri tion, ĝi preskaŭ estas patrina amo. Iam estas de Ofelio ke la knabeto lernis sian katekismon; ŝi riparis liajn ĉifonaĵojn, kombis liajn harojn, flegis la dolorojn de lia infaneco; fine, kutiminta fari tion, Aŭgusteno ekde longe akaparis la plej grandan parton de la amo de iu koro kiu estas for esti malvarma. Li do senpenege persvadis f^inon^ Ofelio^n^, ke la "pado de la devo" kondukas rekte al Nov-Orleano, kie ŝi devas veni kun li por prizorgi Evnjo^n^ kaj malhelpi ke ĉio difektiĝu kaj ruiniĝu pro la oftaj malsanoj de lia edzino. La ideo de senmastra domo cetere skuas la kvieton de Ofelio; plie ŝi korinklinis al la ĉarma knabineto, kiun estas malfacile vidi sen ami ŝin; fine, kvankam ŝi rigardas Aŭgusto^n^ kiel specon de pagano, ŝi amas lin, ridas pro liaj ŝercoj, senkulpigas liajn kulpojn, kaj montras pri liaj eraroj indulgon, kies mirus tiuj kiuj plene konas lin aŭ ŝin. Sed estas vidante ŝin agi ke ni elfinos juĝi f^inon^ Ofelio^n^.

Jen do ŝi en la ĉambro de malantaŭaĵo, ĉirkaŭata de konfuza amaso da malgrandaj kaj grandaj noktaj sakoj, da skatoloj, da korboj, ĉiu enhavanta kelkan pezan sindevontigon. Ŝi seriozege gluas, envolvas, ligas, ŝnuras.

- Evnjo, ĉu vi nombris viajn pakaĵojn ? Vi ne pensis pri tio, mi certis tion ! Tio estas la maniero de ĉiuj infanoj.

Estas la punktita sako por nokto el tapiŝo, kaj la bluranda kartono kie troviĝas via plej bela ĉapelo, tio faras du. Estas la malgranda sako el kaŭĉuko, tri; mia kesteto de rubandoj kaj kudriloj, kvar; mia kartono, kvin; la skatolo de koltukoj, ses; kaj tiu eta kofro el ledo, sep. Kion vi faris per via sunombrelo ? Donu ĝin al mi, por ke mi envolvu ĝin en paperon kaj kunligu ĝin kun la mia kaj mia pluvombrelo; Nu ! Jen kiu estas farita.

- Sed, onklino, kial do ĉar ni iros rekte al la domo ?

- Por bone konservi, infano; necesas zorgi pri tio kion oni havas, se oni volas havi ion; kaj nun ĉu via rimeno estas strečita ?

- Vere, onklino, mi ne scias tion.

- Neniam atento ! Nu, mi tuj ekzamenos vian kudrilujon : fingringo, vakso, du bobenoj, tondilo, pikilo, tredilo. Perfekte ! Metu ĝin tien por mi. Sed vere, kompatinda infano mia, kiel do vi elturniĝas, kiam vi estas sola kun via patro ? Vi certe perdas ĉion !

- Nu, onklino, kiam mi perdas miajn aĵojn, paĉjo aĉetas al mi aliajn pli belaj.

- Ĉielo gardu nin, infano ! kia metodo !

- Tre oportuna, onklino, mi certigas tion al vi.

- Sed ĉi tio estas malordo kiu transiras ĉiujn limojn !

- He ! He ! Kiel nun vi faros, onklino ? Jen la kofro kiu ne plu fermiĝas, ĝi estas tro plena.

- Ĝi fermiĝos, *diris la onklino kun aspekto de armea generalo komandanta la sturmon*.

Ŝi puŝas, premas, enigas la ribelemajn aferojn kaj sin ĵetas sur la kovrilon; la proksimaj randoj ankoraŭ ne tute kuniĝis.

- Ĉi tie, Evnjo, grimpu ! *ŝi kuraĝe ekkriis*; tio kio okazis, povas esti farata. Ne eblas nei tion, ĝi fermiĝis, ĝi fermiĝos !

Sendube timigita de la energia aserto, la kofro kapitulacis; la ringo eniris en la seruron, kaj f^ino Ofelio triumfe fermis kaj enpoŝigis la ŝlosilon.

- Bone; jen ni pretaj ! Sed via patro kie li estas ? Jam estas tempo, mi pensas, por kunprenigi niajn bagaĝojn. Rigardu iomete tien ĉirkaŭe, Evnjo, ĉu vi vidos lin.

- Jen li tien for, ĉe la alia flanko de la ĉambro de la sinjoroj; li manĝas oranĝon.

- Ĉu li do ne pensas ke ni alvenas ? Ĉu vi ne farus pli bone, Evnjo, kuri por alvoki lin ?

- Ho ! Paĉjo neniam rapidas, kaj ni ne jam estas ĉe la elŝipiĝejo. Venu do al la galerio, onklino. Jen vidu ! Jen nia domo ! Tien ! Tute supre de ĉi tiu strato…

La boato tiam komencis, kun obtuzaj zumadoj, kolosa kaj laca monstro, trabori al si vojon inter la multaj ŝipoj kaj alproksimiĝi al la kajo. Evnjo, tute feliĉe, montris per la fingro la turpintojn, la spajrojn, la kupolojn de sia hejmurbo, samtempe kiel ŝi rekonis ilin.

- Jes, jes, kara mia, estas bele kaj bone; sed jen la boato kiu haltiĝas !… kaj via patro, ankoraŭ unufoje ?

Oni estis dum la kutima tumulto de la alveno. La stevardoj iris kaj venis, interpuŝiĝis. La portistoj ekkaptis la kestojn, la sakojn por nokto, la kofrojn. La virinoj maltrankvile alvokis siajn infanojn, kaj densa homamaso kunpremiĝis al la surteriga tabulo.

F^ino Ofelio, rezolute lokita sur la antaŭnelonge venkita kofro, kun ĉiuj siaj havaĵoj kaj vestaĵoj ordigitaj laŭ bela milita ordo, montris sin decidita defendi ilin ĝis la fino.

"Ĉu mi preni vian kofron, sinjorino ?" "Ĉu mi forigi vian bagaĝon ?" "Ĉu Mastrino ne voli lasi min porti ĉion ?" "He ! sinjorino, ĉu mi zorgi pri viaj pakaĵoj ?" Petoj, instigoj, insistoj, vane pluvis ĉirkaŭ ŝi. F^ino Ofelio, sida, neskuebla, senpasia, rekta kiel stango, tenis sian faskon da pluv- kaj

sun-ombreloj kvazaŭ senminacan fusilon, kaj ŝiaj mallongaj kaj firmaj rebatoj senaplombigintus koĉeron de fiakro. Ĉe ĉiu sturmo tamen ŝi apelaciis al Evnjo : "Pri kio do via patro pensas ?… Nur ke li ne elŝipe falis ! Necesas ke io okazis al li".

Fine ŝia maltrankvilo fariĝis serioza, kiam li aperis, antaŭenpaŝis kun sia kutima maldiligenteco kaj diris, prezentante al Evnjo parton de oranĝo :

- Nu, nia kuzino el Vermonto, ĉu ni estas pretaj ?

- Jen pli ol unu horo ke ni estas pretaj, kaj mi vere komencis maltrankviliĝi por vi !

- Tro feliĉa, kuzino. Nu, la veturilo atendas; la homamaso maldensiĝis, ni nun povas eliri laŭ deca kaj kristana maniero, sen esti puŝitaj kaj sufokitaj. Ĉi tie, li diris al la koĉero staranta malantaŭ li, kunprenu por mi ĉi tiujn pakaĵojn.

- Mi iras vidi ilin ŝarĝi, diris Ofelio.

- Kaj ne vere, kuzino, kial do ?

- Ĉiuokaze, mi kunprenas ĉi tion, ĉi tion, ankoraŭ tion, diris f^{ino} Ofelio, apartigante tri skatolojn kaj malgrandan sakon por nokto.

- Sed, mia kara fraŭlino Sanklaro de Vermonto, ne necesas tiel fali sur nin de supre de viaj Verdaj Montoj; alprenu, kredu min, iom da niaj sudaj kutimoj. Oni rigardus vin sub ĉi tiu ŝarĝo kiel servistinon. Lasu ĉion al ĉi tiu brava viro, kaj mi garantias ke li demetos ĉiun aĵon kun tiom da zorgado kiom se ili estus ovoj.

F^{ino} Ofelio malespere vidis ŝian kuzon ordoni la forprenon de ŝiaj trezoroj, kaj respiris nur kiam ŝi sin trovis en la veturilo, ĉirkaŭita de ĉiuj siaj pakaĵoj sendifektaj.

- Kie estas Tomo ? demandis Evnjo.

- Ie alte sidiĝinta, ekster la veturilo, junulineto. Mi alkondukas Tomo^{n} al via patrino kiel olivbranĉon por kompensi

tiun ebriulon kiu renversis la kaleŝon.

- Mi certas ke Tomo estas perfekta koĉero, kaj ke li neniam ebriiĝos, diris Evnjo.

La veturilo haltiĝis antaŭ antikva hotelo kun stranga arkitekturo; miksaĵo de hispana stilo kaj franca stilo. La konstruaĵo enfermis vastan korton el la maŭra ĝenro, kien eniris la veturilo trairante volban portalon. La interno estis el eleganta kaj volupta gusto; larĝaj galerioj kuris tute ĉirkaŭ, kaj la maldikaj kaj delikataj arkaĵoj, la gracilaj pilastroj, la ornamaĵoj, la arabeskoj transigis la imagon al la regado de la Orientanoj en Hispanio, al Alhambro kaj Abenseragoj. Meze de la korto, la ŝprucantaj akvoj de fontano refalis ŝaŭmaj en basenon el blanka marmoro, kiun ĉirkaŭis dika bordero de bonodoraj violoj. Miriadoj da oraj kaj arĝentaj fiŝoj, vivantaj juvelŝtonoj, fajreris tie kaj tie flirtante tra la kristalaj akvoj. Mozaiko de ŝtonetoj, aranĝitaj laŭ fantaziaj desegnaĵoj kaj kadrita de gazono delikata kaj razita kiel veluro, ĉirkaŭis la fontanon, kaj sablita aleo por veturiloj rondiris ĉirkaŭ la florbedo. Du altaj oranĝujoj, tiam florantaj, ĵetis siajn ombrojn, ellasis siajn parfumojn. Multaj vazoj el blanka marmora de araba skulptarto, cirkle aranĝitaj, ornamis la marĝenojn de la gazono, kaj enhavis la plej maloftajn florojn de la tropikoj; ili estis belaj granatujoj, kun siaj smeraldaj folioj kaj siaj flamkoloraj floroj, jasmenoj de Arabio kun malhelaj folioj kaj arĝentaj kvinpetalaj floroj, tiuj de Hispanio kun oraj floroj, buntaj geranioj, belegaj rozujoj kliniĝintaj sub siaj aromoplenaj girlandoj, citronodoraj verbenoj. Ĉiuj ĉi floroj malŝparis siajn parfumojn, siajn lumegajn kolorojn; kaj de loko al loko, malgaja kaj mistika aloo kun strangaj, masivaj, eternaj folioj, maljuna sorĉisto, kompate rigardis la nedaŭrajn graciecojn, la portempajn freŝecojn, kiuj abundis ĉe ĝiaj piedoj.

Kurtenoj el maŭraj ŝtofoj levitaj, sed kiujn oni povis mallevi laŭvole por kontraŭi la sunradiojn, ornamis la galeriojn kiuj rondiris ĉirkaŭ ĉi tiu ĉirkaŭaĵo, kie ĉio elspiris lukson kaj elegantecon.

Kiam la veturilo alvenis en la korton, Evnjo ŝajnis kiel birdo preta eskapi el sia kaĝo, ŝi ne kapablis reteni sian ĝojon.

- Ĉu ĝi ne estas, ĉu ĝi ne estas agrablega, nia domo, nia kara, nia ĉarmega domo ! Ho ! Ĉu ĝi ne estas tre bela, kara onklino ?

- Ne malbela, se ĝi ne ŝajnis tiel antikva kaj tiel pagana, diris Ofelio elirante el la fiakro.

Tomo, jam alteriĝinta, rigardis ĉirkaŭ si kun kvieta feliĉego. La nigrulo, ekzota planto, forŝirita el la plej belegaj regionoj de la mondo, konservas plejprofunde de sia koro senbridan amon por ĉio kio estas bela, riĉa, fantazia, kaj ĉi tiu pasio kiun li kontentigas kiel li povas, krude kaj senguste, incitas la malestimon de la blanka raso, pli ĝusta, pli prava kaj pli malvarma.

Epikurano kaj poeto en la koro, Sanklaro ridetis pro la rimarko de f^{ino} Ofelio, kaj turnante sin al Tomo, kiu tute ŝtoniĝinta pro admiro, ĵetis ĉien sian ravitan rigardon, kaj kies la nigra vizaĝo brilis pro plezuro :

- Tomo, knabo mia, li diris al li, ŝajnas al mi ke tio ĉi plaĉas al vi, ĉu ne ?

- Ho, mastro, vera paradizo !

Ĉi tiuj paroloj estis interŝanĝitaj dum la kofroj estis demetitaj, la koĉero forpermesita, kaj dum svarmo da homoj el ĉiuj aĝoj, ĉiuj kreskoj kaj ĉiuj koloroj, viroj, virinoj, infanoj, alkuris tra la galerioj de supre kaj de malsupre, por vidi la mastron alveni. Ĉe la kapo de la homamaso, juna mulato, grava persono, vestita laŭ la lasta modo, svingis parfumitan poŝtukon el batisto, kaj strebis kun granda

fervoro retroirigi la tutan trupon al la alia fino de la verando.

- Malantaŭen, vi ĉiuj, malantaŭen do ! li kriis per regema tono. Mi ruĝiĝi por vi ! Ĉu vi ja maltimi ĝeni la mastron ĉe la unua momento de lia reveno, kaj malhelpi lin dum liaj familiaj korelverŝadoj !

Post ĉi tiu eleganta parolado, eldirita kun serioza mieno, ĉiuj retiriĝis konfuzite, kaj restis je respektinda distanco, formante densan amason, el kiu nur du pordistoj deliberiĝis por forporti la pakaĵojn.

S^ro^ Adolfo, sukcesinta resti sola videbla, li, lia satena veŝto, lia ora ĉeno kaj lia blanka pantalono, salutis kun malofta bondezireco kaj delikata gracio, ekde kiam Sanklaro, kiu ĵus pagis la koĉeron, sin turnis.

- Ho, ĉu estas vi, Adolfo ? Kiel vi fartas, knabo mia ? diris la mastro etendante al li la manon.

La mulato hastis eldiri, kun granda fluo da paroloj, la improvizaĵon, kiun li preparis ekde tri semajnoj.

- Estas bone ! Estas bone ! *diris Sanklaro kun sia kutima mieno de senzorga moketo*, tre bone deklamita, Adolfo. Atentu ke la bagaĝoj estu bone lokataj, mi post momento revenos al niaj homoj. *Parolante, li kondukis f^inon^ Ofelio^n^ en la salonon.*

Por Evnjo, ŝi ekflugis ĝis la malgranda buduaro kiu eliris sur la verandon; tie granda flava virino kun nigraj okuloj kuŝis sur kanapo. Ekvidante la knabineton, ŝi duonleviĝis.

- Panjo ! kriis entuziasme Evnjo ĵetante sin al ŝia kolo kaj plurfoje kisante ŝin.

- Sufiĉe, sufiĉe ! Prizorgu do, infano ! Vi skuas al mi la tutan kapon ! *diris ŝia patrino post esti velke tuŝetante per siaj lipoj la frunton de Evnjo.*

Sanklaro eniris; li kisis sian edzinon laŭ maniero pli ortodoksa ol tenera, prezentante al ŝi sian kuzinon, kiun ŝi

akceptis ĝentile, sopireme kaj kun nuanco de scivolemo.

En la homamaso ĉimomente kolektita ĉe la pordo sin antaŭenpuŝis, tute tremanta pro espero kaj ĝojo, mezaĝa mulatino kun respektinda aspekto.

- Ho, jen vi, avinjo ! *Kaj, sagante al ŝi, Evnjo impetis en ŝiajn brakojn, kaj ĉirkaŭbrakis ŝin per ĉiuj siaj fortoj.*

La virino tute ne plendis pri sia kapo; tute male, ŝi supergrunden levis la infanon kiun ŝi mamnutris, manĝis ŝin per karesoj kaj, duonfreneza pro ĝojo, fine ekploris. Apenaŭ surgrunden remetita, Evnjo kuris de unu al la alia, disdonante manpremadojn kaj brakumadojn, kun malŝparemo kiu, laŭ la diraĵo de f^ino^ Ofelio, konfuzis ŝin ĉe la koro.

- Se tio taŭgas al vi, bonege ! sed vi ja, suduloj, vi faras aferojn al kiuj mi ne kapablus decidiĝi.

- Kiajn aferojn, mi petegas ? demandis Sanklaro.

- Por la tuta universo mi ne volus humiligi iun ajn; sed, koncerne enbrakigi…

- Ha, la nigrulojn ! Mi aŭdas. Vi ne alkutimiĝis, mi vidas.

- Ne vere. Kiel ŝi havas ĉi tiun kuraĝon !

Sanklaro ridetis kaj eniris en la pasejon alvokante :

- Hola ! Ĉi tien, ĉiuj tiom kiom vi estas ! Ke mi pagu mian bonvenon, nu, ĉiuj ! Avino, Jeremio, Paŭleta, Sonkej, ĉu ni estas kontentaj revidi mastron ? li diris pasante de unu al la alia, manpremante. Atentu pri la buboj ! l*i aldonis, stumblante kontraŭ nigrulido kiu kvarpiede vojiris*. Se mi surtretas iun, ke li sciigu min !

Pluvego da gajaj ekridoj kaj da benoj laŭdantaj "la bonan mastron" salutis la malgrandajn arĝentajn monerojn kiujn li disdonis ĉirkaŭe.

- Nun ĉiuj iru al via tasko kiel bravaj knabinoj kaj honestaj knaboj, li reparolis.

Kaj la bunta homamaso tuj disiĝis, sekvata de Evnjo ŝarĝita de la granda sako, kiun je sia reveno de la loĝejo ŝi

plenigis, laŭ longe de la tuta vojo, per pomoj , nuksoj, kandoj, rubandoj, festonoj, puntoj kaj diversaj aliaj bagateloj.

Sanklaro returne iris kiam liaj okuloj falis sur Tomo^{n} kiu, tute embarasita, anaspaŝis de unu piedo al la alia sub la rigardo de Adolfo. Ĉi lasta, apoginta sin ĉe la balustrado, strabis al li kun la aroganteco de perfekta dando.

- Nu ! Pudeleto ! *diris la mastro, mallevante la nazumon per sia mandorso*, ĉu estas tiel kiel oni akceptas kamaradon ? He, vere ! *li daŭrigis rigardante lin de pli proksime kaj metante la montrofingron sur la brilan veŝton kiun Adolfo elmontris*, kion vi havas tie ? Ŝajnas al mi ke tio ĉi estas konata de mi !

- Ho, mastro ! Tute makulita de vino. Mastro en sia rango ne esti por surmeti tian veŝton ! Mi kompreni ke ĝi alfali al mi. Maksimume nur bona por kompatinda nigrulo kiel mi. *Kaj Adolfo, skuante sian kapon, gracie trapasigis siajn fingrojn en siaj parfumitaj haroj.*

- Tio estas via opinio, ĉu ne, he ? respondis maldiligente Sanklaro. Ha do, aŭskultu iomete, mi baldaŭ prezentos Tomo^{n} al lia mastrino, poste vi kondukos lin al la servistejo, kaj pripensos tion : ekkonsciu ne afekti gravan mienon kun li. Li dufoje valoras frivolulo el via speco.

- Mastro ĉiam havi amuzan vorton, rebatis Adolfo radiante. Mi ĝoji vidi mastron en tiel bona humoro.

- Ĉi tie Tomo ! diris Sanklaro, kaj li enirigis lin en la ĉambron.

La nigrulo restis senmova sur la sojlo, kun la okulo fikse alkroĉinta al tiuj neimageblaj pompoj de speguloj, de pentraĵoj, de statuoj, de drapiraĵoj, kaj spirite ravata kiel la reĝino de Ŝebao antaŭ Salomono, li ne kuraĝis ien meti la piedon.

- Rigardu, Marta, diris Sanklaro al sia edzino, mi finfine aĉetis por vi laŭregulan koĉeron. Li estas, mi diras al vi, vera

koĉero de ĉerkoveturilo, pro nigreco kaj sobreco. Se tio taŭgas al vi, li kondukos vin kiel por entombigo. Nu, malfermu la okulojn, ekzamenu lin, kaj ne plu diru ke tuj kiam mi havas la dorson turnita, mi ĉesas pensi al vi.

Marta, sen movi, levis la okulojn al Tomo.

- Mi certas ke li ebriiĝos, ŝi diris.

- Ne ne, li estas garantiita pia kaj sobra.

- Estu, mi deziras ke li bone kondutu, multe pli ol mi esperas.

- Adĉjo, daŭrigis Sanklaro, malsuprenigu Tomo^{n}, kaj ankoraŭfoje prizorgu, li aldonis, memoru tion kion mi ĵus diris al vi.

Adolfo paŝis antaŭen per lerta paŝado, kaj Tomo sekvis lin per peza paŝado.

- Li estas vera Behemoto ! diris Marta.

- Nu nun, kara mia, *reparolis Sanklaro sidiĝante sur malgranda tabureto ĉe la kaploko de la sofo*, ni estu afablaj. Ĉu vi ne havas graciaĵon por diri al iu kompatinda knabo ?

- Vi malfruis dek kvin tagojn, laŭ tio kion vi promesis, murmuris la sinjorino paŭtante.

- Ĉu mi ne skribis al vi la kialon ?

- Iun tiel frostan leteron, tiel mallongan !

- He ! Kara, la kuriero estis forironta; ne estis tempo. Necesis mallongigi, aŭ tute ne skribi.

- Ĉiam la sama ! Multe da bonegaj kialoj por fari viajn vojaĝojn longajn kaj viajn leterojn mallongajn !

- Jen, bonvolu iomete rigardi ĉi tion. *Li elprenis el sia poŝo elegantan juvelujon el veluro, kaj malfermis ĝin*. Mi alportas al vi ĉi tiun donacon el Novjorko.

Ĝi estis la dagerotipo de Evnjo kaj ŝia patro sidantaj manon en mano. La vizaĝoj estis admirinde bone redonitaj.

Marta malkontente konsideris la portretojn.

- Kie do vi iris elekti pozon tiel mallertan ?

- Mallertan, konsentite ! La pozo estas afero de gusto. Sed, kion vi diras pri la simileco ?

- Vi ne pli estimus mian opinion pri ĉi tiu punkto ol pri ĉiu alia, laŭ tio kion mi supozas, rebatis Marta kaj ŝi refermis la juvelujon.

- Plagon al la virino ! *Tute mallaŭte pensis Sanklaro, kaj li laŭte daŭrigis* : Nu, Marta, sufiĉe da infanaĵoj kiel tiuj, diru, ĉu vi opinias ilin similantaj ?

- Necesas esti tiel senzorga kiel vi estas, por tiel turmenti min, kaj devigi min paroli kaj rigardi, kiam vi scias ke mi restis kuŝinta dum la tuta tago kun la plej timiga kapdoloro ! Ekde via alveno, tio estas bruo, tumulto ! Mi pro tio estas duonmorta.

- Vi havas emon al migreno, sinjorino ? diris f^ino^ Ofelio subite elirante el la profundoj de la kusenfotelo, kie ŝi restis kaŝinta, inventarante la meblaron kaj kalkulante sian elspezon.

- Ho ! Mi estas vera martiro, sopirĝemis la sinjorino.

- Juniperbera teo estas bona kontraŭ la kapdoloroj, diris f^ino^ Ofelio, almenaŭ Aŭgusta, la edzino de la diakono Abrahamo Perio, kutimis diri tion, kaj ŝi estas la plej bona el la flegistinoj.

- Mi zorgos alportigi ĉi tien la unuajn juniperberojn kiuj maturiĝos en nia ĝardeno ĉe la lagorandoj, *diris Sanklaro solene sonoriganta*. Intertempe, kuzino, vi certe bezonas retiriĝi en via apartamenton, kaj iom ripozi post ĉi tiu longa vojaĝo. Adĉjo, *li aldonis*, sendu al ni Avino^n^.

La honesta mulatino kiun Evnjo tiel tenere karesis, eniris preskaŭ tuj. Ŝi estis tre pure vestita, kun la kapo ornamita de ruĝa kaj flava turbano, freŝdata donaco de Evnjo, kiun la infano mem alĝustigis.

- Avino, diris Sanklaro, mi konfidas al vi ĉi tiun sinjorinon, ŝi estas laca. Konduku ŝin en sian ĉambron, kaj

bone zorgu pri tio ke nenio mankas al ŝi.

Fraŭlino Ofelio sekvis Avinon kaj malaperis.

17. La Mastrino de Tomo kaj ŝiaj Opinioj.

- Hodiaŭ, Marta, via ideala epoko komenciĝas, diris Sanklaro. Nia kuzino, vigla kaj lerta kiel vera knabino de Nov-Anglio, malŝarĝos viajn ŝultrojn de la peza ŝarĝo de la mastrumado, donos al vi tempon por ripozi kaj ĝissate refariĝi bela kaj juna. Kaj ju pli frue okazos la ceremonio de la transdono de la ŝlosiloj, des pli bone tio indos.

Ĉi tio okazis dum la tagmanĝo, malmulte da tagoj post la alveno de f^ino^ Ofelio.

- Ŝi estas bonvena, respondis Marta, lasante sian kapon pigre fali sur sian manon. Ŝi rapidege konscios proprasperte ke la veraj sklavoj ĉi tie estas la mastrinoj.

- Certe, ŝi malkovros tion, kaj mondon da aliaj utilaj veraĵoj el la sama speco, tute sen dubo.

- Ni parolas pri havi sklavojn ! Kvazaŭ tio estis por nia bonstato ! Se ni konsultus nian feliĉon kaj nian ripozon, ni tuj lasus ilin ĉiujn foriri samtempe.

Evangelina fiksis al vizaĝo de sia patrino siajn grandajn seriozajn okulojn, kun arda esprimo de angoro, kaj simple diris : "Kial vi do konservas ilin, panjo ?"

- Certege, mi tute ne scias, krom kiel pentofaro. Ili estas la kruco de mia vivo, la solsola kaj vera kaŭzo de ĉiuj miaj malsanoj. Ili estas la plej malbonaj sklavoj per kiuj neniu iam ajn afliktiĝis.

- Nu, tio ne estas, vi scias tio, Marta. Vi estas melankolia ĉimatene. Nu ĉu Avino ne estas la plej bona el la estulinoj ? Kio vi fariĝus sen ŝi ?

- Avino estas la plej bona kiun mi renkontis, kaj tamen Avino mem fariĝas egoista, kruele egoista; tio estas la difekto de la raso.

- Egoismo estas ja kruela difekto, fakte, serioze diris Sanklaro.

- Jen Avino, ĉu ne estas egoista de ŝi tiel profunde dormi, kiam ŝi scias ke preskaŭ ĉiun noktan horon mi bezonas etan atenton ? Ŝi estas tiel malfacila por veki dum miaj plej grandaj suferoj ! Mi estas pli malsana ĉi matene, dank'al la klopodoj kiujn mi faris por alvoki ŝin.

- Ĉu ŝi ne staradis plurajn noktojn sinsekve, apud vi antaŭ nelonge, panjo ? demandis Evnjo.

- Kion vi scias pri tio ? respondis akre Marta, ŝi plendis, mi supozas ?

- Ŝi ne plendis, ŝi nur rakontis al mi pri tiom da malbonaj noktoj kiujn vi travivis.

- Kial vi ne prenas Jane^{n} aŭ Roza^{n} dum unu nokto aŭ du, por lasi ŝin ripozi ? interrompis Sanklaro.

- Vi frenezas, Sanklaro, fari al mi tian proponon ! Nervoza kiel mi estas, la plej eta blovo malkvietigas min, kaj mallerta mano frenezigus min. Se Avino havus por mi la diligentecon kiun ŝi devus havi, ŝi vekiĝus ĉe la plej eta bruo, tio estas ŝia devo. Mi aŭdis paroli pri homoj kiuj posedis sindonemajn servistojn; tia neniam estis mia sorto, suspiris Marta.

F^{ino} Ofelio aŭskultis ĉi tiun konversacion kun serioza kaj observema mieno. En tiu momento ŝi forte kunpremis la lipojn, kiel persono decidita esplori sian terenon antaŭ ol riski sin.

- Avino fakte havas ian bonecon, daŭrigis Marta, ŝi estas milda, respektema, sed funde egoista. La memoro pri ŝia edzo ĉiam malkvietigos kaj turmentos ŝin. Ĉe la epoko de mia edziniĝo kaj mia veno ĉi tie, mi estis devigita, vi scias tion, kunpreni ŝin kun mi. Mia patro ne povis malhavi la edzon; li estas forĝisto, kaj sekve li estis tre necesa al li. Mi pensis, kaj tiam diris tion, ke Avino kaj li bone farus liberigi

unu la alian, ĉar estis pli ol verŝajne ke ili neniam revidus unu la alian. Hodiaŭ mi bedaŭras ne esti pli insistanta, kaj donanta al Avino alian edzon; sed mi estis malfirma, malsaĝa, kaj cedis. Mi sciigis Avino^n ke ŝi ne povas esperi revidi lin pli ol unu aŭ du fojojn en sia vivo, ke mi ne reiros al la domo de mia patro, la aero ne estanta favora al mi. Mi do konsilis ŝin ŝanĝi edzon, sed ŝi ne volis, absolute ne. Estas punktoj pri kiuj Avino havas obstinon kiu preterpasas ĉian kredon !

- Ĉu ŝi havas infanojn ? demandis f^ino Ofelio.

- Jes, ŝi havas du.

- Devas esti dolora por ŝi esti disigita de ili.

- Mi ne povis kunpreni ilin, kompreneble. Ili estas abomenaj estuloj ! Ne necesis pripensi tion; cetere ili estis tro tempovoraj por ŝi. Sed mi suspektas ke Avino ĉiam gardis specon de rankoro kontraŭ mi. Ŝi ne volis reedziniĝi; kaj, kvankam ŝi scias tiom kiom ŝi estas necesa por mi, kaj kiom mi malforte fartas, mi kredas ke ŝi irus rekuniĝi ekde morgaŭ kun sia edzo, se ŝi povus tion, mi ne dubas tion, vere. La plej bonaj el ili fariĝis hodiaŭ tiel egoistaj !

- Ĉi tio estas ĉagrena temo por meditado, seke diris Sanklaro.

F^ino Ofelio ekrigardis al li, kaj vidis sur lia vizaĝo delikatan ruĝiĝon pro honto, kaj la esprimon de malestimo kaj de ironio kiuj kuntiris liajn lipojn.

- Mi ĉiam traktis Avino^n kiel dorlotitan infanon, daŭrigis Marta. Mi volus ke unu el viaj servistinoj de la Nordo povu vidi ŝiajn ŝrankojn, kaj ĉion kiun ili entenas; robojn el silko, el muslino, ĝis el vera batisto. Mi kelkfoje laboris dum tutaj posttagmezoj por aranĝi ŝiajn kufojn kaj vestaĵojn, por ke ŝi estu preta por festo. Koncerne esti riproĉita, ŝi ne scias tion kio tio estas. Ŝi estis vipita nur unu- aŭ du-foje en sia vivo. Matene, ŝi prenas sian teon aŭ sian nigran kafon, kun blanka sukero. Tio estas absurda ! Mi scias tion. Sed

Sanklaro ŝatas la malŝparemon por si kaj ĉirkaŭ si, kaj lasas siajn geservistojn fari kiel ili deziras tion. Niaj homoj estas dorlotitaj, estas fakto, kaj la kulpo estas nia ke ili agas kiel egoistoj kaj rabemaj infanoj. Sed mi tiom kaj tiel ofte predikis al Sanklaro pri tio ke mi estas laca pri tio.

- Kaj ankaŭ mi, respondis Sanklaro prenante la gazeton.

Evnjo, la bela Evnjo restis staranta aŭskultante sian patrinon, kun tiu esprimo de profunda kaj mistika ardo kiu estis propra al ŝi. Ŝi malrapide alproksimiĝis al ŝi, kaj metis siajn brakojn ĉirkaŭ la kolon.

- Nu ! Evnjo, kio denove okazas ? diris Marta.

- Panjo, ĉu mi povus flegi vin dum unu nokto, nur unu ? Mi ne malpaciencigos vin, kaj mi ne dormos, mi certas tion. Ofte en mia lito mi ne dormas, mi pripensas.

- Frenezo, frenezo ! diris Marta. Vi estas tiel stranga infano !

- Ĉu vi permesos tion al mi, panjo ? ŝi timeme rekomencis. Mi pensas ke Avino ne bone fartas, ŝi lastatempe diris al mi ke la kapo multe doloris ŝin.

- Ho ! Ĉi tio estas unu el la ĉiamaj plendoj de Avino. Avino estas kiel ili ĉiuj, aŭdigante grandan bruon pro doloreto ĉe la fingro aŭ la kapo. Neniam mi kuraĝigos tion, neniam ! Mi havas pri tiu temo firmajn principojn, *ŝi diris sin turnante al f^ino Ofelio;* vi konsentos pri la neceso de ili. Se vi lasos la geservistojn ĝemadi pri ĉiu bagatela malagrablaĵo aŭ ĉiu negrava malsaneto, vi baldaŭ surdiĝos. Mi ja neniam plendas, neniu konjektas tion kion mi suferas. Mi sentas ke estas devo silente elteni ĝin, kaj mi faras tion.

Ĉe ĉi tiu paroladfino, la rondaj okuloj de f^ino Ofelio esprimis miregon, kiu ŝajnis tiel amuza al Sanklaro, ke li eksplodis per rido.

- Sanklaro ĉiam ridas kiam mi faras la plej etan aludon pri miaj doloroj, diris Marta kun voĉo de mortanta martiro.

Dio volu ke li ne amare memoras tion iun tagon !

Kaj Marta direktis sian naztukon al siaj okuloj.

Estis embarasa silento. Je la fino Sanklaro ekstaris, rigardis sian poŝhorloĝon, diris ke li havis rendevuon, kaj foriris.

Evnjo sin glitis malantaŭ li, f^ino Ofelio kaj Marta restis solaj ĉe la tablo.

- Estas bone de Sanklaro ! *diris acerbe ĉi tiu forigante sian naztukon, tuj kiam la krimulo estis neatingebla.* Neniam li povos, neniam li volos kompreni tion kion mi suferas, kaj tion ekde jaroj ! Se mi estus unu el tiuj dolorsentemaj virinoj, multe fanfaronanta pri iliaj malsanoj, tio estus pardonebla. Virino kiu plendas nature lacigas virojn. Sed mi restigis ĉion al mi, kaj silente suferis, tiel bone ke Sanklaro fine kredis ke mi povis ĉion elteni.

F^ino Ofelio ne precize sciis kian respondon oni atendis de ŝi.

Dum ŝi pripensis tion, Marta iom post iom sekigis siajn larmojn kaj reordigis sian tualeton, kun la koketeco de kolombo kiu glatigas sian plumaron post pluvego. Ŝi komencis tute virinan alparolon pri la ŝrankoj, la tolaĵoj, la provizejo, ktp., fakoj kiujn, per komuna akordiĝo, f^ino Ofelio estis prenonta sub sia estreco. Kaj ŝi samtempe amasigis tiom da rekomendoj kaj informoj, ke iu kapo malpli bone ordigita kaj malpli sistema ol tiu de f^ino Ofelio, estintus tute konsternita kaj senkonsila.

- Nun mi kredas esti ĉion dirinta al vi. Je mia sekvonta malsaneto, vi kapablos anstataŭigi min, eĉ sen konsulti min. Ankoraŭ unu vorton pri Evnjo : ŝi tre bezonas esti priatentata.

- Ŝi ŝajnas al mi bonega infano, diris f^ino Ofelio, mi neniam renkontis pli bonan.

- Evnjo estas tre stranga; estas aferoj pri kiuj ŝi estas

tiel originala ! Ŝi similas al mi pri nenio. *Kaj Marta suspiris, kvazaŭ ŝi pensus ke tio estis grava kaŭzo de malĝojo.*

F^ino Ofelio diras al si interne de sia animo : "Mi vere esperas ke ŝi ne similas al vi". Sed ŝi havis la singardon reteni ĉi tiun pripensadon por si.

- Evnjo ĉiam ŝatis esti meze de la sklavoj. Por iuj infanoj, ĉi tio ne estas bedaŭrindaĵo. Mi ja ĉiam ludis kun la negridoj de mia patro, kaj tio neniam malutilis al mi. Sed Evnjo samrange rilatas kun ĉiuj estuloj kiuj proksimiĝas al ŝi. Ĝi estas stranga manio de ĉi tiu infano. Mi neniam sukcesis korekti ŝin pri tio; kaj mi sufiĉe emus kredi ke Sanklaro instigas ŝin fari tion. Estas fakte ke Sanklaro, sub sia tegmento, indulgas ĉiujn krom sian edzinon.

F^ino Ofelio denove gardis la plej profundan silenton.

- Ĉi tio ne estas la vojo kiun ni devas sekvi kun sklavoj, necesas meti ilin ĉe ilia rango, kaj restigi ilin tie. Tio estis ĉiam nature al mi, eĉ tute infano. Per si sole, Evnjo eldorlotus tutan loĝejon. Kiel ŝi faros kiam necesos al ŝi regi sian domon, mi tute ne scias tion. Ni devas esti bonaj kun siaj homoj, mi ĉiam estis tia, sed ni ankaŭ devas sciigi al ili ilian rangon. Evnjo neniam faras tion; ne estas en la kapo de ĉi tiu infano la unua ideo pri kio estas sklavo. Vi aŭdis ŝin antaŭ nelonge proponi flegi min por lasi Avino^n dormi. Nu ! Tio estas skizo de tio kion ŝi konstante farus, se ni lasus ŝin al ŝi mem !

- Sed, ekkriis impete F^ino Ofelio, vi agnoskas, mi pensas, ke viaj sklavoj estas homaj estuloj, kaj bezonas ripozi kiam ili estas elĉerpitaj pro laciĝo ?

- Certe, tio estas justeco. Mi tre atentas ke ili havu tion kion ili bezonas, kondiĉe ke tio ne iru ĝis trouzado, vi komprenas. Avino povas, dum iu horo aŭ alia, regajni sian dormon; tio ne kaŭzas malfacilaĵon. Cetere, ŝi estas la plej dormema maso kiun mi iam ajn vidis ! Stara, sida, babilanta

aŭ paŝanta, ŝi dormas ĉie, malgraŭ ĉiuj obstakloj. Nenio estas por timi ke Avino ne sufiĉe dormu ! Sed trakti la sklavojn kiel ekzotajn florojn aŭ ĉinajn vazojn, tio vere estas ankaŭ tro ridinda !

Marta paŭzis por droni en la molajn profundojn de grandega kuseno, kaj altiri al si elegantan flakonon el facetita kristalo.

- Vi vidas tion, *ŝi daŭrigis per velkema kaj milda voĉo, tia kia povus esti la lasta elspiro de araba jasmeno aŭ de tute alia aĵo same etera*; vi vidas, kuzino Ofelio, mi malofte parolas pri mi. Tio estas nek laŭ miaj gustoj nek laŭ miaj kutimoj; por diri la veron, mi ne havas la forton por tio. Sed estas punktoj pri kiuj mi diferencas de Sanklaro. Sanklaro neniam komprenis min, neniam estimis min, kaj eĉ tio ĉi estas, mi kredas, la fonto de ĉiuj miaj doloroj. Li estas bonintenca, mi volas kredi tion; sed viroj estas kun egoista temperamento kaj sen respekto por siaj edzinoj. Almenaŭ tio estas mia impreso.

F^ino^ Ofelio ne ricevis kiel parton malgrandan porcion de la singardema genio de Nov-Anglio; ŝi plie havis apartan teruron pri familiaj malkonsentoj; ŝi nun komencis do konjekti tuj venontan aferon el tia speco. Tial, donante al sia vizaĝo la esprimon de severa neŭtraleco, ŝi elprenis el sia poŝo trikaĵon longe je unu ulno *(+/-1m)*, kiun ŝi konservis kiel specifaĵon kontraŭ tio kion la doktoro Vato asertis esti unu el la plej efikaj faliloj de Satano, tio estas la senokupeco de la manoj.

Ŝi komencis rapide triki, energie kunpremante la lipojn, kiuj diris pli bone ol vortoj : "Vi ne igos min paroli, tio estas viaj aferoj, ne la miaj, mi havas nenion rilate al tio". Ŝi ne ŝajnis pli simpatia ol leono el ŝtono je ŝia loko povintus ŝajni; sed Marta malmulte zorgis pri tio. Ŝi havis iun kun kiu paroli, kaj ŝi sentis ke estis ŝia devo paroli, kaj tio sufiĉis al ŝi. Kaj

rekuraĝigante sin spirante sian flakonon, ŝi daŭrigis :

- Mi alportis, edziniĝante kun Sanklaro, mian doton kaj miajn sklavojn, kaj la leĝo permesis al mi direkti ilin laŭ mia plaĉo. Sanklaro, li ankaŭ, havis sian riĉaĵon kaj siajn homojn, kaj mi estintus ravita ke li direktus ilin laŭ sia maniero, se li ne enmiksiĝus en miajn aferojn. Li havas kelkajn strangajn, ekstravagancajn ideojn pri kelkaj ĉapitroj, interalie pri la traktado de sklavoj. Li preskaŭ metas ilin antaŭ mi, kaj eĉ antaŭ li. Li lasas ilin fari ĉiajn damaĝojn sen iam kontraŭstari. Foje, tamen, Sanklaro timigas. Li timigas min, en iom da kazoj, mi mem, milda kiel li kutime ŝajnas ! Li tiel starigis la aferojn ke, kio ajn okazos, ni ne devas en lia domo doni eĉ unu baton, krom de li aŭ de mi; kaj lia volo pri ĉi tiu punkto estas tiel absoluta, ke mi ne kuraĝas kontraŭi ĝin. Vi povas diveni kien ĉi tio kondukas ! Sanklaro ne batus ilin, eĉ kiam ili piedpremus lin ! Kaj mi… Vi vidas kiel estus kruele trudi al mi tian laciĝon. Vi scias tio, la sklavoj estas nur grandaj infanoj.

- Mi nenion scias pri tio, kaj dankas Dion nescii tion, respondis mallonge f^ino^ Ofelio.

- Vi spertos tion, kaj koste de vi, se vi restas ĉi tie. Vi ne suspektas tion kio estas ĉi tiu grego da malicaj, pigraj, sendankaj estuloj !

Ĉi tiu temo, kiam ŝi ektraktis ĝin, ĉiam ŝajnis mirinde superegsciti Marta^n^. Ŝiaj okuloj malfermiĝis, ŝia malvigleco forflugis, kiam ŝi reparolis kun pli da impeteco :

- Vi ne imagas, vi ne povas imagi la malfacilaĵojn kiujn ili ĉiutage kaŭzas, je ĉiuj horoj, pri kaj por ĉio, al sia mastrino. Sed ne utilas plendi al Sanklaro; li havas pri tio la plej strangajn principojn. Ĉu li ne asertas ke, farinte ilin tiajn kiaj ili estas, ni devas toleri ilin ! Ke iliaj neperfektecoj devenas de la niaj, kaj estus kruele doni ilin al ili kaj puni ilin pro tio. Li diris ke sur ilia loko ni farus tute same, kvazaŭ ili

povus esti komparitaj kun ni !

- Ĉu vi kredas ke Dio eltiris ilin el la sama silto ? lakone demandis f^ino Ofelio.

- Ne, vere, ne, mi ne kredas tion ! Bela fabelo, vere ! Ĝi estas malsupera raso !

- Ĉu vi donas al ili senmortajn animojn ? ekkriis f^ino Ofelio kies la indigno kreskis.

- Jes, ŝi respondis oscedante, estas konstatite; neniu kontestas tion. Sed egali ilin al ni, pri kio ajn, kompari ilin al ni, neeblas ! Nu ! Sanklaro parolis al mi pri la disigo de Avino kaj ŝia edzo, kvazaŭ li parolintus al mi pri mia disiĝo de mia edzo, al mi ! Estas neniu paralelaĵo por estigi. Avino ne kapablas senti tion kion mi sentintus. Ĉi tiuj estas tiel malsamaj aferoj, ĉu ne ? Kaj tamen Sanklaro asertas ne kompreni tion. Kvazaŭ, ekzemple, Avino kapablus ami siajn naŭzajn nigrajn diabletojn kiel mi amas Evnjo^n ! Ĉu vi kredus ke Sanklaro iam serioze provis persvadi min ke estis mia devo, malgraŭ mia malforta sano kaj tio kion mi suferas, resendi Avino^n al ŝiaj infanoj kaj ŝia edzo, kaj preni iun alian anstataŭe ? Estis vere tro krude por elteni, eĉ por mi ! Mi ne ofte lasas vidi tion kion mi travivas; mi faris al mi regulon silente suferi ĉion; ĉi tio estas malfacila sorto de la virino, kaj mi akceptas tion. Sed ĉi-foje mi eksplodis; kaj de tiam, li neniam faris la plej etan aludon al tio. Mi ne malpli vidas, per liaj rigardoj kaj kelkaj vortoj de tempo al tempo, ke li ankoraŭ pensas same. Kaj tio estas tiel aflikta, tiel spitema !

F^ino Ofelio ŝajnis timi rompi la silenton; sed, en la rapida kaj hakata movado de siaj trikiloj ŝi interfrapis ilin laŭ maniero kiu estis tre signifa, se Marta povintus kompreni tion.

- Vi nun estas, ŝi daŭrigis, informita pri tio kion vi devas estri. Iu domo sen reguloj, kie la geservistoj havas kaj faras tion kio plaĉas al ili, escepte tion kion, malgraŭ mia malbona

sano, mi aŭtoritate sukcesis protekti. Mi prenas mian bovtendenon, kaj kelkfoje metas kelkajn batojn al ili; sed ĝi estas multe tro laciga ekzerco por mi. Se Sanklaro nur volus fari kiel la aliaj !

- Kaj kion ili faras ?

- Ili sendas ilin al malliberejo, aŭ aliloken, por ke oni vipus ilin. Ĉi tio estas la sola rimedo. Se mi ne estus kompatinda malsanema virino, mi kredas ke mi alkondukus ilin kun dufoje la energio de Sanklaro.

- Kiel do li sukcesas esti obeita ? Vi diras ke li neniam batas ilin.

- La viroj, vi scias tion, havas pli gravan ordonvoĉon ol ni; tio estas pli facila por ili. Plie, se vi iam atente observis la okulojn de Sanklaro (tio estas tre speciala), vi vidis, ke kiam li parolas per firma tono, liaj okuloj fulmetas. Foje mi preskaŭ konfuziĝas pro tio, kaj la sklavoj tiam scias ke ili devas obei. Mi ne kapablas akiri tiom multe, per ŝtormo kaj krioj, kiom Sanklaro per fulmeto de siaj okuloj, kiam li koleras. Ili silentas antaŭ Sanklaro, kaj de tio devenas lia indiferenteco pri tio kion mi ja suferas ! Vi vidos, kiam necesos al vi laborigi ilin, ke oni povas nenion akiri de ili sen severeco. Ili estas tiel malbonaj, tiel trompemaj, tiel pigraj !

- Ankoraŭ la malnova gurdaĵo ! interrompis Sanklaro malrapideme eniranta. Kaj kian belan modelon ĉi tiuj malbonaj estuloj havas por kopii, ĉefe pri la pigreco ! Vidu, kuzino, *li aldonis ĵetante sin laŭ sia tuta longeco sur la sofon kontraŭ tiu de Marta;* vidu, kuzino, ĉu ilia mallaboremo ne estas tute nepardonebla, kiam ni donas al ili, Marta kaj mi, tiel brilan ekzemplon !

- Nu ! Sanklaro,vi vere estas tro malafabla ?

- Ĉu ankaŭ mi ? Mi pensis tute bone paroli, laŭ rimarkinda maniero por mi ! Mi ĉiam provas plenumi viajn

rimarkojn, Marta.

- Vi bone scias ke vi faras ĝuste la malon !

- Estas do ke mi eraras. Mi dankas vin, kara mia, reloki min sur la ĝustan vojon.

- Vi volas inciti min, ekkriis Marta.

- Ho ! Mi petegas vin, Marta^{n}; la varmo estas sufoka, kaj mi ĵus havis kun Adĉjo malkonsenton kiu elĉerpis min. Tial, mi petegas vin, montru vin afabla, kaj lasu kompatindan, elĉerpitan knabon revigligi sin per la brilo de via rideto.

- Kion faris Adĉjo ? Lia senhonteco kreskis ĝis tia grado ke ĉi tiu sentaŭgulo fariĝis por mi neeltenebla. Mi dezirus havi lin, dum kelka tempo, sub mia ekskluziva regado. Mi rompus lin, tion al vi mi certigas.

- Tio kion vi diras nun, kara mia, estas markita de via mensa akreco kaj de via kutima saĝo. Koncerne Adĉjo^{n}, jen la fakto : li tiel longe trejniĝis imiti miajn graciojn kaj aliajn perfektaĵojn, ke li fine rigardis sin kiel sian mastron, kaj mi devis sentigi al li lian eraron.

- Kiel ?

- Mi eksplicite komprenigis al li ke mi deziris konservi kelkajn el miaj vestaĵoj por mia propra uzo. Mi ankaŭ ĉesigis lian malavaremon rilate al mia Kolonja akvo, kaj mi eĉ estis sufiĉe kruela por limigi lin al unu dekduo da miaj poŝtukoj el batisto. Ĉi tio ĉefe profunde humiligis Adĉjo^{n}, kaj por konsoli lin, mi parolis al li kiel patro.

- Ho ! Sanklaro, kiam do vi lernos estri viajn sklavojn ! Vi perdas ilin pro via malfirmeco.

- Finfine, kie estas la malbono en tio ke la granda kompatinda hundo deziras simili al sia mastro ? Kaj se mi edukis lin tiamaniere ke li metu sian superan feliĉon en la Kolonja akvo kaj la poŝtukoj el batisto, kial mi ne donus tion al li ?

- Kial pli ĝuste vi ne pli bone edukis lin ? demandis f^{ino}

Ofelio kun subita firmeco.

- Tro da klopodo por preni; la pigreco, kuzino, la nevenkebla pigreco kiu ruinigas pli da animoj ol oni dispelus homojn per svingado de glavo. Sen la pigreco, mi estintus anĝelo. Mi estus inklina kredi ke la pigreco estas tio kion via maljuna doktoro el Vermonto nomis : "La esencon de la morala malbono". Ĉi tio certege estas malĝoja temo por meditado.

- Mi pensas ke terura respondeco pezas sur vi, mastroj de sklavoj ! Mi ne ŝatus havi ĝin por mil mondoj. Vi devas eduki viajn sklavojn, kaj trakti ilin kiel raciajn estulojn, senmortajn estulojn, pri kiuj vi iam ŝuldos konton al Dio. Tio estas mia penso, ekkriis f^ino^ Ofelio, cedante al la indigna ekbolo kiu, dum la tuta tago, amasiĝis en ŝia brusto.

- Nu ! Nu ! Kuzino ! *respondis Sanklaro vigle ekstarante*, vi ne jam konas nin !

Li sidiĝis ĉe la piano kaj komencis bravuron. Sanklaro havis talenton por muziko, lia ludado estis brila kaj firma, liaj fingroj flugis super la klavoj kun la rapida kaj malpeza movo de birdo. Li ludis arion post ario, kiel homo kiu provas remeti sin en bonan humoron. Fine, forpuŝante la kajerojn de muziko, li stariĝis kaj gaje diris :

- Nu, kuzino, vi donis al ni lecionon iom verda, sed vi plenumis vian devon, kaj sume, mi nur pli estimas vin pro tio. Mi ne dubas ke vi ĵetis al mi puran diamanton, sed ĝi tiel abrupte trafis min meze de la vizaĝo, ke ĉe la unua ŝoko mi ne aprezis ĉion kion ĝi valoras.

- Por mi, mi ne vidas la celon de ĉi tiu admono, reparolis Marta. Se estus en la mondo, iu kiu pli bone traktas siajn sklavojn ol ni, mi estus kontentega ke oni montru lin al mi. Tio ne plibonigas ilin de unu atomo; male ili fariĝas pli kaj pli malbonaj. Koncerne instigi aŭ riproĉi ilin, mi faris tion ĝis perdi la spiron, dirante al ili ilian taskon kaj la ceteron. Ili

povas iri al preĝejo tiom kiom ili volas, kvankam ili ne pli komprenas la predikadon ol porkoj komprenus ĝin. Tiel ke, vi vidas tion, tio ne estas tre utila al ili; sed ili iras tien. Tiel la rimedoj por instruiĝi estas donitaj al ili. Sed, kiel mi jam diris al vi, ĝi estas malsupera raso, ĉiam ĝi estos. Ne ekzistas elaĉeto por ĝi. Vi povos nenion fari per ĝi, se vi provos tion. Vi ne jam provis tion, kuzino Ofelio; mi provis tion. Mi naskiĝis kaj kreskis meze de ili, mi konas ilin.

F^ino^ Ofelio opiniis ke ŝi diris sufiĉe, kaj ŝi restis silenta. Sanklaro komencis fajfi.

- Sanklaro, mi petegus vin ne fajfi; tio pliigas mian kapdoloron.

- Mi silentas, diris Sanklaro. Ĉu estas ankoraŭ iu alia afero kiun vi dezirus ke mi ne faru ?

- Mi dezirus ke vi havu kelkan simpation al miaj suferoj, vi montras neniun konsideron al mi.

- Kara akuzanta anĝelo !

- Estas netolereble aŭdiĝi paroli per tiu tono !

- Kiel mi devas paroli al vi ? Diru, kaj mi parolos laŭ via komando, tiel kiel vi indikos, nur por plaĉi al vi.

Freŝa rido eksplodis en la korto, penetris tra la kurtenoj el silko de la verando. Sanklaro alpaŝis, levis la kurtenon kaj ankaŭ ridis.

- Kio okazas ? demandis f^ino^ Ofelio, alproksimiĝante al la balkono.

Tomo sidis en la korto sur malgranda muska benko. Ĉiu butontruo de lia jako estis ornamita per branĉoj de jasmeno, Evnjo ridante pasigis al li girlandon el rozoj ĉirkaŭ la kolo, poste, ankoraŭ ridante, ŝi sidigis sin sur liajn genuojn, kiel malsovaĝa pasero.

- Ho Tomo, vi estas tiel amuza !

Tomo havis bonan kaj diskretan rideton, kaj ŝajnis, laŭ sia paca maniero, esti tiel ĝojigita de sia burleskaĵo kiel

estis lia eta mastrino. Ekvidante sian mastron, li levis la okulojn al li kun mieno duonkonfuza, duonpeteganta.

- Kiel vi povas lasi ŝin tiel familiare kun ili ? demandis f^ino Ofelio.

- Kaj kial ne ? demandis Sanklaro laŭvice.

- Mi ne scias, sed tio mallogas min.

- Vi ne trovus malbona ke la infano karesu dikan hundon, kvankam ĝi estus nigra. Sed racia, sentema, senmorta estulo mallogas vin ! Mi konas pri tio la pensmanierojn de viaj nordaj loĝantoj, ne ĉar niaflanke ekzistas la plej malgranda virta peceto ne senti ilin, sed kutimo faras ĉe ni tion kion devus fari la kristana karitato, ĝi detruas mallogon. Mi havis la okazon, dum miaj vojaĝoj, observi kiom multe ĉi tiu abomeno estis pli akra ĉe vi ol ĉe ni. Ili mallogas vin kiel tiom da serpentoj aŭ da bufoj, kaj tamen ilia mizero indignigas vin. Vi ne volas mistrakti ilin, sed vi ne volas havi iun ajn kontakton kun ili. Vi sendus ilin al Afriko, for de via vidpovo kaj via flarpovo, poste vi sendus al ili unu aŭ du misiistojn, kiuj havus sindonemon por instrui ilin per la kiel eble plej mallonga maniero, ĉu ne ?

- Bedaŭrinde ! Kuzo, *respondis penseme f^ino Ofelio*, estas da vero en tio kion vi diras.

- Kio fariĝus la humilulo kaj malriĉulo sen infanoj ? *rekomencis Sanklaro revenante al la balkono kaj montrante Evnjo^n kiu petolis apud Tomo*. La infano estas la sola vera demokrato. Tomo, ĉimomente, estas heroo por Evnjo; liaj rakontoj ŝajnas al ŝi mirindaj; liaj metodismaj himnoj kaj kantoj, pli belaj ol opero; la malgrandaj logaĵoj kaj aliaj bagateloj, kiuj plenigas liajn poŝojn, fekunda mino da juveloj ! Li estas en ŝiaj okuloj la plej mirinda Tomo kiun ebona haŭto kovras ! Evnjo estas unu el tiuj ĉielaj floroj senditaj de Dio, ĉefe por la malriĉulo kaj por la humilulo kiuj, sur tero, havas tiel malmulte da aliaj ĝojoj !

- Estas strange, kuzo, aŭdi vin paroli, oni preskaŭ rigardus vin kiel predikiston.

- Ĉu predikisto ? ekkriis Sanklaro.

- Jes, kiel religian predikiston.

- Ha ! Certe ne; kaj, ĉiuokaze, ne kiel unu el viaj furoraj predikistoj; kaj tio kio estas plej malĝoja, ne kiel kultanto, certege.

- Kial do vi tiamaniere parolas ?

- Nenio estas pli facila ol paroli. Ŝekspiro, mi kredas, dirigas de unu el siaj roluloj : *"Estus pli facile por mi instrui al dudek disĉiploj tion kio estas bona fari, ol esti unu el la dudek"*. Nenio estas tiel efika kiel divido de laboro. Mia vervo pasas en paroloj, kuzino; la via, en agoj.

En tiu epoko, la ekstera situacio de Tomo ne estis, laŭ la mondo, tiu de plendinda viro. En ŝia inklino al li, kaj ankaŭ pelata de la instinkto de nobla naturo, dankema kaj amema, la eta Evnjo petegis sian patron alpreni Tomo^{n} en sian propran servon, por eskorti ŝin dum ŝiaj piedaj aŭ surĉevalaj promenoj. Tomo ricevis do la formalan ordonon lasi ĉion por meti sin sub la dispono de f^{ino} Evnjo; ordono kiu, kiel imagas niaj legantoj, ne estis por malplaĉi al li. Lia vestomaniero estis belaspekta, Sanklaro estis pri ĉi tiu temo skrupula ĝis la detaleto. Lia servo en la stalo, vera sinekuro, simple konsistis ĉiutage en inspektado kaj estrado de la stalisto. Marta Sanklaro deklaris ke ŝi ne povis toleri la odoron de ĉevaloj, kaj ke tiuj el ŝiaj homoj kiuj alproksimiĝis al ŝi, devis ne esti laborigitaj en iu ajn malagrabla servo. Ŝia nerva sistemo ne eltenus tian travivaĵon. La plej eta malbona odoro, laŭ ŝia diro, povus mortigi ŝin, kaj ĉesigi per unu fojo ĉiujn ŝiajn surterajn turmentojn. Tomo, kun sia loza vestaĵo, sia bone brosita ĉapelo, siaj brilaj botoj, sia kolumo kaj siaj manumoj el neriproĉebla blanko, sia serioza kaj bona nigra vizaĝo, povintus ŝajni inda esti episkopo de Kartago, kiel

estis dum aliaj tempoj viroj kun lia koloro.

Li loĝis en luksa rezidejo; konsidero al kiu ĉi tiu impresebla raso neniam estas indiferenta. Li feliĉe, kviete kaj mediteme ĝuis la lumon, la birdojn, la florojn, la fontanojn, la parfumojn kiuj plibeligis la korton, la silkajn tapetojn, la pentraĵojn, la lustrojn, la statuojn, la oritaĵojn, kiuj faris por li per la sinsekvo de ĉi tiuj riĉaj salonoj, specon de palaco de Aladino.

Se iam Afriko civiliziĝos kaj altiĝos - *kaj ĝia vico aperi en la granda dramo de la homa progreso alvenos siatempe* - la vivo vekiĝos ĉe ĝi kun pompeco, superabundeco, kiun apenaŭ niaj malvarmaj okcidentaj triboj kapablas koncepti. Sur ĉi tiu fora kaj mistera tero, fekunda je oro, je gemoj, je mirtoj, je palmoj kun ondaj folioj, je maloftaj floroj, estiĝos novaj artoj, el nova kaj belega stilo. Kaj ĉi tiu nigra raso, tiel longe malestimata kaj piedpremata, eble donos al la mondo la lastajn kaj la plej grandiozajn rivelojn de homa potenco. Ĉiukaze ĝi estos, per sia mildeco, sia humila dolĉeco de la animo, sia fido al siaj superuloj, sia obeemo al aŭtoritato, sia infana simpleco de tenereco, sia admirinda kapableco por pardono, ĝi certe estos la plej alta esprimo de kristana vivo. Kaj eble, ĉar Dio punas tiujn kiujn Li amas, eble li deĵetis la kompatindan Afrikon en la fajregon de la aflikto, nur por fari ĝin la plej nobla, la plej granda en la regno kiun Li altigos, kiam ĉiuj aliaj regnoj estos provitaj kaj malakceptitaj, ĉar "la unuaj estos la lastaj, kaj la lastaj estos la unuaj !"

Ĉu do tio estis tiam la zorgoj de Marta Sanklaro, dum staranta, pompe ornamita en la verando, iun dimanĉan matenon, ŝi ligis al sia maldika pojno riĉan brakringon de diamantoj ? Tio devis esti, aŭ samspecaj pensoj, ĉar Marta adoris la belajn aĵojn; kaj ŝi estis ironta, en sia tuta brilo de diamantoj, silkoj, puntoj, juveloj, al laŭmoda preĝejo, por

montri sian tualeton kaj sian piecon. Marta ĉiam faris al si regulon esti dimanĉe tre pia. En la preĝejo, surgenue aŭ stare, lerta, eleganta, delikata, facilmova en ĉiuj siaj movoj, envolvita en sia punta koltuko kiel en nubo, ŝi estis gracia estulino kaj ŝi fakte ĝojis esti tiel eleganta kaj tiel pia. F^ino Ofelio, ĉe ŝia flanko, formis kun ŝi perfektan kontraston. Ne ĉar ŝi ne havis sian belan silkan robon, sian riĉan kaŝmiron, sian belan poŝtukon, sed necedema kaj senartifika rigideco donis al ŝi ion nedifinitan, tamen tiel senteman kiel estis la gracio de ŝia eleganta najbarino. Ne la graco de Dio, bone komprenu, tio estas tute alia afero.

- Kie estas Evnjo ? diris Marta.

- Ŝi haltis sur la ŝtuparo por paroli kun Avino.

Kion diris Evnjo al Avino sur la ŝtuparo ? Aŭskultu legantojn, kaj vi aŭdos ŝin, kvankam Marta ne aŭdis ŝin.

- Avino kara, mi scias ke via kapo multe doloras vin.

- La Disinjoro beni vin, fraŭlinon Évnjo^n; mia kapo ankoraŭ dolori nun, sed ne zorgi pri tio.

- Mi tre ĝojas vidi vin eliri; *kaj la knabineto ĵetis siajn ambaŭ brakojn ĉirkaŭ ŝin*. Jen, prenu mian flakonon, Avino.

- Kion ! Vian belan oran aferon, kun ĝiaj diamantoj ! Disinjoro, fraŭlino Evnjo, tio esti multe tro bela por mi !

- Kial ? Vi bezonas ĝin, kaj mi ne. Panjo ĉiam uzas ĝin kiam ŝi suferas per la kapo, tio sanigos vin. Preni ĝin, mi petegas vin, por la amo al mi !

- Ĉu vi aŭdi ŝin, la karan dolĉulinon ! *ekkriis Avino dum Evnjo enŝovis la flakonon en ŝian ŝultrotukon, kaj post esti kisanta ŝin, kuris aliĝi al sia patrino*.

- Kial vi haltis ? demandis Marta.

- Por doni mian flakonon al Avino por ke ŝi uzu ĝin en la preĝejo.

- Evnjo ! *diris Marta piedfrapanta malpacience*, vi donis vian oran flakonon al Avino ! Kiam do vi komprenos tion kion

oni faras kaj tion kion oni ne faras ? Iru, iru ! Tuj reprenu ĝin de ŝi.

Evnjo, trista kaj konsternita, malrapide turniĝis.

- Marta, lasu la infanon fari ! Ŝi agu kiel plaĉas al ŝi ! intervenis Sanklaro.

- Kiel tiam ŝi kondutos en la mondo ?

- Dio scias tion; sed ŝi certe kondutos pli bone, laŭ la Ĉielo, ol vi aŭ mi.

- Ho paĉjo ! Ŝŝ ! *diris Evnjo milde tuŝante sian kubuton*. Ne ĉagrenu panjon.

- Nu, kuzo, ĉu vi estas preta por akompani nin ? demandis f^ino^ Ofelio sin turnante al lia flanko per unu movo.

- Mi ne iras al prediko, mi dankas vin, respondis Sanklaro.

- Mi volus ke Sanklaro kelkfoje akompanu min al preĝejo, diris Marta, sed li ne havas iun atomon de religio. Tio vere estas malkonvena.

- Mi scias tion, respondis Sanklaro. Vi ja, virinoj, vi iras, mi supozas, al preĝejo, por lerni kiel konduti en la mondo, kaj via pieco honorigas nin. Se mi celus iri, mi irus tien kien Avino iras. Tie, almenaŭ, estas ŝanco sin teni vekita.

- Kio, inter tiuj bruemaj metodistoj ! Fi ! La hororo !

- Ĉion kion vi volos, Marta, krom la Mortan maron de viaj respektindaj kapeloj ! Tio estas tro multe postuli de viro. Ĉu vi ŝatas iri tien , Evnjo ! Venu, restu hejme; vi ludos kun mi.

- Dankon, paĉjo, mi pli ŝatas iri al la prediko.

- Ĉu tio ne estas terure enuiga ?

- Jes, iome, kelkfoje, diris Evnjo, kaj mi ankaŭ endormiĝas tie; sed mi provas teni min maldorma.

- Do kial vi iras tien ?

- Vidu, paĉjo, ŝi flustris al li en la orelo, kuzino diras ke

Dio deziras ĉi tion de ni, kaj li tiom donas al ni ! Se Li deziras tion ? Tio vere ne estas multo; poste tio fine ne estas tiel enuiga.

- Vi estas dolĉa kaj bonkora animeto, diris Sanklaro kisante ŝin. Iru, kara knabineto mia, iru kaj preĝu por mi.

- Certe jes; mi neniam neglektas tion, respondis la infano, dum ŝi rapidis al sia patrino en la veturilo.

Sanklaro restis staranta sur la perono, kaj per la mano sendis al ŝi kison, dum la veturilo malproksimiĝis; pezaj larmoj ruliĝis en liaj okuloj.

- Ho Evangelina, la taŭge nomata ! Ĉu Dio ne donis vin al mi kiel vivantan evangelion !

Li tiel kortuŝita pensis dum sekundo; poste li ekbruligis sian cigaron, legis la gazeton kaj forgesis sian etan Evangelion. Ĉu li pro ĉi tio diferencis de multaj aliaj homoj ?

- Atentu, Evangelina, diris Marta; ĉiam estas bone kaj konvene esti bonkora kun la servistoj; sed maldecas trakti ilin kiel ni traktus parencojn aŭ homojn de nia kasto. Se Avino estus malsana, vi ne metus ŝin en vian liton, ĉu ne ?

- Jes ja, panjo, respondis Evnjo, ĉar estus pli oportune por prizorgi ŝin, kaj ankaŭ ĉar mia lito estas multe pli bona ol ŝia, vi scias.

La kompleta manko de morala senco kiun ĉi tiu respondo indikis, ĵetis Marta^{n} en la plej profundan malesperon.

- Kion fari por esti komprenata de ĉi tiu infano ? ŝi ekkriis.

- Nenion, respondis f^{ino} Ofelio per decidiga tono.

Evnjo eksentis momente ĉagrenon kaj konsternon; sed feliĉe la impresoj de la infanoj estas nedaŭraj, kaj post malmulte da minutoj, Evnjo ĝoje ridis pri ĉiu nova objekto kiun ŝi vidis tra la pordoj de la veturilo.

- Nu, sinjorinoj, demandis Sanklaro dum la tagmanĝo, kiam ili komforte sidis, kion oni servis al vi hodiaŭ en la

preĝejo ?

- Doktoro G… faris belegan predikon, respondis Marta, ĝuste predikon kiel necesus al vi. Ĝi precize esprimis ĉiujn miajn ideojn.

- En tiu kazo, ĝi devis esti el la plej edifaj, diris Sanklaro, kaj el larĝa vidpunkto !

- Ho ! Simple miaj ideoj pri socio kaj ĝiaj malsamaj klasoj. La teksto estis : "Dio faris ĉion bela en sia sezono". La predikisto atestis ke ĉiuj rangoj kaj ĉiuj sociaj distingoj devenis rekte de Dio. Ke estis admirinde juste, ke iuj estu metitaj supre kaj la aliaj malsupre, pluraj estantaj naskitaj por estri, kaj pluraj por obei. Kaj tiel plu. Fine, li perfekte aplikis ĉi tiujn parolojn al la ridinda babilado kiun oni aŭdas pri la sklaveco. Li pruvis klara kiel tago ke la Biblio estis por ni, kaj subtenis niajn instituciojn. Mi estis deziranta ke vi estus aŭdanta lin !

- Dankegon, mi tute ne zorgas tion. Mi ekscios tiom multe en picajuno[21], kaj plie mi fumos mian cigaron, tio kion mi ne povus fari en la preĝejo.

- Vi do ne aprobas ĉi tiujn vidmanierojn ? demandis f^ino Ofelio.

- Kiu, mi ! Mi estas tiel malbona homo ke ĉi tiu pia aspekto de la temo tute ne edifas min. Se mi estus invitita difini la sklavecon, mi nepre dirus : "Ni havas ĝin, ni ĝuas ĝin kaj ni konservas ĝin, por nia avantaĝo kaj nia bonstato". Ĉi tio estas la fortaĵo kaj la malfortaĵo, kaj resume, la ĉefaĵo mem de ĉi tiu hipokrita babilado. Mi kredas ke tiel parolante, mi estus komprenata de ĉiuj kaj ĉie.

- Vere, Aŭgusteno, ĉi tio estas tro nerespektema, ekkriis Marta. Ĉi tio estas ofenda afero aŭdi vin !

- Ofenda estas la vorto. Kial viaj religiaj belparoluloj

21 Populara gazeto de Nov-Orleano kies nomo devenas de la hispana monero tiam samvalora kun 1/16 de dolaro. per kiu oni pagis ĝin.

ne antaŭenpuŝas komplezon iom pli ? Kial ili ne montras la belecon, en sia sezono, de unu troan glaseton da vino ? de la vigiloj pasigitaj por la ludado ? de pluraj aliaj providencaj akcidentoj el la sama speco, al kiuj ni estas inklinaj, ni junuloj ? Ni vere kontentiĝus kun ĉi tiu homa kaj dia sankcio.

- Fine, diris f^ino Ofelio, ĉu vi opinias ke la sklaveco estas bonaĵo aŭ malbonaĵo ?

- Mi malŝatas la teruran logikon de via Nov-Anglio, kuzino, diris gaje Sanklaro. Se mi respondas al tiu demando, vi metos kontraŭ mi duondekduon da aliaj, ĉiu pli malfacila ol la antaŭa, kaj mi ne intencas difini mian pozicion. Mi estas el tiuj kiuj ŝatas ĵeti ŝtonojn al la vitraj domoj de la najbaroj. Mi do tute ne volas starigi iun por mi por ĵetigi ŝtonojn al ĝi.

- Tute kiel li estas ! Vi nenion eltiros de li; li ĉiam eskapos vin, diris Marta. Kaj mi kredas, vere ja, ke estas lia malmulto da religio kiu igas lin preni ĉiujn ĉi elturniĝojn.

- Religio ! *diris Sanklaro per tono kiu levigis la okulojn de la du virinoj*. Ĉu vi nomas religion tion kion oni predikas al vi en preĝejo ? Ĉu vi nomas religion tion kion povas kliniĝi, turniĝi, malsupreniri, supreniri, por pravigi ĉiun torditan fazon de egoista kaj monduma socio ? Ĉu estas la religio kiu estas malpli oferema, malpli justa, malpli skrupula, malpli tolerema, ol mia profana, blinda kaj filistra naturo ? Ne, se mi serĉus religion, mi rigardus super min, neniam malsupren.

- Vi do ne kredas ke la Biblio pravigas la sklavecon ? demandis f^ino Ofelio.

- La Biblio estis la libro de mia patrino, respondis Sanklaro; ĝi helpis ŝin vivi; ĝi helpis ŝin morti. Dio gardu min kredi ke ĝi pravigas la sklavecon ! Mi preferus ke oni volus pruvi al mi ke mia patrino drinkis brandon, maĉis tabakon kaj blasfemis, por konvinki min ke mi pravis fari la same. Mi ne estus pli kontenta pri mi mem, kaj mi perdus la konsolon

respekti ŝin. Kaj estas granda konsolo en ĉi tiu mondo havi ion por respekti ! Finfine, vi vidas tion, *li diris subite reakirante sian gajecon*, ĉio kion mi volas estas ke ĉiu afero restu en sia loko, en sia fako. La kadro de la socio en Eŭropo, kiel en Usono, konsistas el senfina nombro da elementoj kiuj ne eltenus la ekzamenon de skrupula moraleco. Tio kio pruvas ke homoj ne kapablas aspiri al absoluta bono, sed nur sekvi kiel eble plej bone la batitan vojon. Nun se viro venas diri al mi : "La sklaveco necesas por ni, ni ne povas vivi sen ĝi; se ni abolas ĝin, ni estos reduktata al almozuleco, kaj ni pretendas konservi ĝin". Ĉi tio estas klara, preciza kaj forta lingvaĵo; ĝi almenaŭ havas por si la meriton de la vero; kaj se ni juĝus laŭ sperto, la plimulto subtenus ĝin. Sed se viro, male, vidigante hipokritan mienon, venas per piafekta tono citi al mi la sanktan skribon, mi tuj suspektas lin ne esti tiel multe sankta kiel li volus ŝajni.

- Vi estas tre malmulte bonkora ! ekkriis Marta.

- Ni supozu dum momento, diris Sanklaro, ke iu neantaŭvidita evento tute subite kaj por ĉiam malaltiĝus la kotonon, kaj reduktus al nenio la valoron de sklavoj en la merkato. Ĉu vi ne pensas ke ni tujtuje ricevus alian version de Sankta Skribo ? Kiaj lumfluoj inundus la preĝejon ! Kiel rapide oni malkovrus ke racio kaj Biblio iris kontraŭsence !

- Ĉiuokaze, *respondis Marta klinante sin malantaŭen sur la sofo*, mi dankegas la ĉielon esti naskiĝinta en lando kie la sklaveco ekzistas. Mi kredas ĝin bona kaj permesita. Mi sentas ke ĝi devas esti tiel. Kaj kio ajn okazus, mi ne povus formeti ĝin.

- Kaj vi, kion vi pensas pri tio, junulineto, *diris Sanklaro al Evnjo, kiu ĉimomente eniris kun floro en la mano*.

- Pri kio, paĉjo ?

- Kio pli plaĉus al vi, vivi kiel oni vivas ĉe via onklo, tie supre en Vermonto, aŭ en domo plene da geservistoj kiel la

nia ?

- Ho ! Nia domo estas la plej agrabla, certege.

- Kaj kial ? *demandis Sanklaro al ŝi karesante al ŝi la kapon.*

- Ĉar tio okazas ĉirkaŭ si tiom pli da homoj por ami ! Ĉu ne ? *diris Evnjo entuziasme rigardante lin.*

- Tute ĝuste kiel Evnjo estas, ekkriis Marta, unu el ŝiaj strangaj ideoj !

- Ĉu ĉi tio estas stranga, paĉjo ? *murmuris Evnjo dum ŝi grimpis sur liajn genuojn.*

- Eble, laŭ ĉi tiu mondo, junulineto, respondis Sanklaro. Sed kie estis mia eta Evnjo dum la tuta tagmanĝo ?

- Mi estis tie supre, en la ĉambro de Tomo, aŭskultante lin kanti. Onklino Dinaho alportis al mi mian tagmanĝon.

- Ha ! Ĉu por aŭskulti Tomon kanti ?

- Ho jes ! Li kantas tiajn belajn aferojn pri la Nova-Jerusalemo, pri la anĝeloj, pri la lando de Kanaano !

- Tio estas pli bela ol opero, mi vetas.

- Jes, kaj li instruos ilin al mi.

- Kion, ĉu instrui vin kanti ? Kaj ĉu vi progresas ?

- Jes; li kantas al mi, kaj mi legas la Biblion al li; li klarigas al mi tion kion tio signifas, sciu.

- Tio estas, ververe, diris Marta ridante, la plej spica ŝerco de la sezono.

- Tomo ne estas malbona komentanto, mi ĵurus tion, reparolis Sanklaro. Li havas laŭ naturo ian religian genion. Frue ĉimatene, mi bezonis la ĉevalojn, mi supreniris al la loĝejo de Tomo, super la staloj. Tie li gvidis kunsidon per si mem. Fakte mi jam delonge ne aŭdis ion tiel delikatan kiel lia preĝo; li enigis min en ĝi kun tute apostoleca fervoro.

- Eble li suspektis ke vi aŭskultis lin ? Mi scias pri ĉi tiuj komedioj.

- Se li suspektis tion, li apenaŭ montriĝis politika, ĉar li

tute libere donis al Disinjoro sian opinion pri mi. Tomo ŝajnis pensi ke estis en mi pliboniginda spaco, kaj petis mian konvertiĝon al ĉielo kun edifa fervoro.

- Mi esperas ke vi bone notos ĝin funde de la animo, diris f^ino^ Ofelio.

- Mi vidas ke vi samopinias kiel Tomo, diris Sanklaro. Nu, ni vidos, ĉu ne, Evnjo ?

18. Sindefendo de Libera Homo.

La posttagmezo baldaŭ finiĝis; ni senhaste rapidis en la domon de la kvakeroj. Raĥela Halidaj, ĉiam egalanima, iris kaj reiris, elektante inter siaj hejmaj proviantoj, tion kio povis okupi la plej malgrandan spacon en la bagaĝoj de la vojaĝantoj. La ombroj etendiĝis orienten, la ruĝa disko de la suno atingis la horizonton, kaj ĝiaj radioj, el ora flavo, lumigis la malgrandan dormĉambron. Georgo sidis, kun sia infano sur siaj genuoj, la mano de sia edzino en sia. Ili ambaŭ ŝajnis pensemaj, kaj iliaj vangoj konservis spurojn de larmoj.

- Jes, Eliza, daŭrigis Georgo, mi scii ke tio kion vi diri, esti vera. Vi esti bona kaj digna estulino, multe pli bona ol mi. Mi provi fari tion kion vi deziri, mi peni agi kiel libera viro, konduti kiel kristano. Ĉiopova Dio scii ke mi intenci bone fari, ke mi lukti dum ĉio esti kontraŭ mi. Nun mi forgesi la pasintecon, mi silentigi ĉiujn amarajn kaj venĝemajn sentojn; mi legi la Biblion, kaj mi lerni esti bona.

- Iam en Kanado, mi povi helpi vin, diris Eliza. Mi esti lerta kudristino; mi scii lavi, gladi, kaj kune ni du trovi rimedon por vivi.

- Jes, Eliza, ni ambaŭ, kaj kun nia infano. Ho ! se ĉi tiuj homoj nur scii kia ĝojo estas por viro pensi ke lia edzino kaj lia infano aparteni al li ! Mi ofte miri vidi blankulojn, en plena posedo de siaj infanoj, de sia edzino, senmotive estigi al si ĉagrenojn kaj turmentojn ! Nu, mi ja senti min riĉa kaj forta, kvankam ĉiu el ni havi nur niajn dek fingrojn. Mi apenaŭ kuraĝi peti al Dio aliajn favorojn. Jes, kvankam mi dolore labori ĉiujn tagojn de mia vivo, kaj ke post dudek kvin jaroj mi havi nek speson, nek tegmenton por kovri min, nek

peceton da tero kiun mi povi nomi mian. Tamen, se oni lasi min en paco, mi esti feliĉa, dankema. Mi labori, kaj mi sendi la monon de la elaĉeto de vi kaj de mia filo. Koncerne mian malnovan mastron, li kvinobligi kaj pli tion kion mi povi kosti al li; mi nenion ŝuldi al li.

- Ni ne esti ekster danĝero, diris Eliza; ni ne jam esti en Kanado.

- Esti vere, sed ŝajni al mi jam spiri ĝian liberan aeron, kaj ĝi revigligi min.

En ĉi tiu momento voĉoj aŭdiĝis en la apuda ĉambro. Oni vigle parolis. Iom poste oni frapis la pordon, Eliza malfermis.

Simeono Halidaj estis tie, akompanata de kvakera kolego, kiun li anoncis sub la nomo de Fineaso Fletŝer. Fineaso estis alta, senkarna, rufa; lia fizionomio esprimis multe da sagaceco kaj sufiĉe da ruzo. Li havis nek la kvietan mienon de Simeono, nek lian indiferentecon de la aferoj de ĉi tiu mondo. Tute kontraŭe, li estis kiel eble pli vigla, kaj multscia, kiel viro kiu pretendas scii pri kio temas, kaj havi singardan okulon, apartaĵoj kiuj strange kontrastis kun lia larĝ-randa ĉapelo, kaj lia metoda frazeologio.

- Nia amiko Fineaso, diris Simeono, malkovris ion gravan por vi kaj viaj, Georgo; estas bone ke vi aŭdu lin.

- Efektive, daŭrigis Fineaso, kaj tio bone pruvas, kiel mi ĉiam diris, ke kelk-loke viro neniam devas tute trankvile dormi. La pasintan nokton, mi haltis ĉe malgranda izolita gastejo sur la suba vojo; vi memoras, Simeono, la saman kie ni pasintjare vendis kelkajn pomojn al dika virino kiu havis grandegajn juvelpendaĵojn de orelo. Nu, mi estis laca pro esti longtempe veturinta, kaj post la vespermanĝo mi kuŝiĝis sur amason da sakoj en la angulo, kaj tiris sur min bubalan felon, atendante ke mia lito estu preta. Jen mi kiu permesas al mi endormiĝi, ho sed, kiel gliro !

- Ne tute trankvile, Fineaso ? trankvile diris Simeono.

- Ne, kiel ŝtono ĉi-foje ! Mi dormegis dum pli ol plenan horon, ĉar mi estis vere lacega. Kiam mi komencis iom vekiĝis, mi rimarkis ke estis en la ĉambro viroj sidantaj ĉirkaŭ tablo, kiuj trinkis kaj babilis. Mi pensis, en mi mem, ke antaŭ moviĝi, mi pli bone sciiĝus iomete pri tio kio kondukis ilin tie, des pli ke ili murmuris ion pri la kvakeroj. "Certas, diris unu, ili estas en la kolonio, ne estas dubo pri tio". De tiam mi aŭskultis per ambaŭ oreloj, kaj mi komprenis ke temis pri vi ĉiuj. Mi ne diris eĉ unu vorton; ili elvolvis ĉiujn siajn planojn. La junulo devas esti resendita al Kentukio, al sia mastro, kiu volas fari pri li ekzemplon, por naŭzi la negrojn forfuĝi. Du el ili devas kapti la virinon kaj iri vendi ŝin por sia propra konto en Nov-Orleano; ili kalkulas ke ili ricevvos inter mil sescent kaj mil okcent dolaroj. Koncerne la etulon, li devas iri al la komercisto kiu aĉetis lin. Restas ankoraŭ Jakobo kaj lia maljuna patrino kiujn oni redonos ambaŭ al ilia mastro. Ili ankaŭ diris ke estis du konstabloj en iu urbo lokita iom plu supren, kiuj venus kun ili aresti la fuĝantojn. La juna virino estos kondukita antaŭ juĝisto; kaj unu el la fiuloj, kiu estas malgranda kaj estas babilema, ĵuros ke ŝi apartenas al li, kaj aljuĝigos ŝin al si por konduki ŝin en la Sudon. Ili scias ĝuste laŭ kiu vojo ni iros ĉinokte, kaj ili nombre estos ĉe niaj kalkanoj, kiel oni dirus ses aŭ ok. Jen ! Kion fari nun ?

La grupo kiu ĵus aŭdis ĉi tiun komunikaĵon, restis ŝtonigita en diversaj sintenoj. Raĥela Halidaj ĉesis knedi sian paston por aŭskulti la novaĵojn, kaj levis al la ĉielo siajn farunitajn manojn, kun afliktoplena mieno. Simeono ŝajnis profunde pripensema. Eliza ĉirkaŭbrakis sian edzon kaj rigardis lin. Georgo, stara, kun la pugnoj kunpremitaj, la okuloj brilegaj, havis la teruran sintenon de viro kies la edzino devas esti aŭkciota, kaj la filo transdonota al

sklavvendisto, la tuto sub la protekto de la leĝoj de kristana nacio.

- Kion ni fari, Georgo ? demandis Eliza per mallaŭta voĉo.

- Mi scii tion kion mi ja devi fari, diris Georgo, kaj enirante en la ĉambreton, li ekzamenis siajn pistolojn.

- Huj ! Huj ! diris Fineaso signante per la kapo al la mastro de la loĝejo; vi vidas, Simeono, kiel tio finiĝos.

- Mi vidas, rebatis Simeono suspirante; kaj mi preĝas al Dio ke ni ne devu batali.

- Mi ne voli impliki iun kun mi, aŭ por mi, diris Georgo. Se vi nur voli pruntedoni al mi vian ĉaron, kaj indiki al mi la vojon, mi iri sole al la sekva stacio. Jakobo esti forta kiel giganto, kuraĝega kiel morto kaj malespero, kaj mi, mi esti rezoluta.

- Perfekte ! Amiko, daŭrigis Fineaso, vi tamen bezonos gvidanton. Vi estas bonvena por uzi ĉiujn viajn sciojn dum la batalo, vi scias tion; sed mi ja scias unu aŭ du aferojn pri la vojo, kiun vi ne scias.

- Mi ne voli impliki vin, diris Georgo.

- Impliki min ! ripetis Fineaso kun strange klarvida kaj ruza mieno. Kiam vi implikos min, bonvolu averti min.

- Fineaso estas saĝa kaj lerta, diris Simeono. Vi bone faros, Georgo, fidi al lia juĝo, *kaj ameme metante sian manon sur la ŝultron de la fuĝinto, li indikis per la fingro la pistolojn*, ne prenu konsilon de ĉi tiuj, kaj ne estu tro rapida ! En juneco la sango estas varma.

- Mi ne ataki, diris Georgo, ĉio kion mi peti de la lando, esti lasi min pace foriri. *Sed, li paŭzis, lia frunto malheliĝis kaj liaj trajtoj kuntiriĝis*, mi havi fratinon venditan al la Nov-Orleana merkato. Mi scii kial oni vendi ilin kaj tion kion fari de ili tiuj kiuj aĉeti ilin. Kaj mi lasi forpreni de mi mian edzinon, kaj mi lasi vendi ŝin, kiam Dio doni al mi por defendi

ŝin du fortikajn brakojn ! Ne; Disinjoro helpi min ! Mi batali ĝis la lasta spiro, antaŭ lasi forpreni mian edzinon kaj mian filon. Ĉu vi mallaŭdi min ?

- Neniu mortulo povus mallaŭdi vin, Georgo. Karno kaj sango pelas vin. Ve al la mondo pro skandaloj, sed ve al tiu per kiu venas la skandalo.

- Ĉu vi mem ne fari same sur mia loko ?

- Dio ŝparigu al mi la tenton, diris Simeono. La karno estas malforta.

- Mi kredas ke mia karno estus sufiĉe forta en tia kazo, *reparolis Fineaso etendante du brakojn simile al du aloj de ventmuelilo*. Mi ne diras, amiko Georgo, ke mi ne donos al vi helpon por perforte reteni unu el tiuj kanajloj dum vi forregalos lin.

- Se la homo devis ĉiam rezisti al malbono, diris Simeono, Georgo havus ĉiujn kialojn por tiel agi; sed la saĝaj konsilistoj de nia popolo instruis al ni pli altan doktrinon. Ĉar la kolero de homo ne plenumas la justecon de Dio. Lia graco kontraŭas nian koruptitan volon, kaj neniu kapablus havi ĝin, se ĝi ne estu donita al li de la Ĉielo. Ni do preĝu Disinjoron ne esti tentata.

- Tio fakte estas tion kion mi ankaŭ petas de li, diris Fineaso, ĉar se la tento estas tro forta, ke ili sin gardu. Jen !

- Oni bone vidas ke vi ne estas denaska Amiko, reparolis Simeono ridetante. La maljunulo ankoraŭ vigle estas supera.

Verdire Fineaso estis dum longa tempo aŭdaca pioniro, maltimema ĉasisto, bonega pafisto de damao; sed enamiĝinta al beleta kvakerino, li lasis sin kuntiri per ŝiaj ĉarmoj por aliĝi al la sekto de Amikoj. Kaj kvankam li estis honesta, sobra kaj helpema membro de la komunumo, la plej spiritaj el ili ne trovis en li sufiĉe da pia mildeco, almenaŭ en la parolo.

- La Amiko Fineaso volas ĉiam fari laŭ sia maniero, diris

Raĥela Halidaj kun rideto. Sed ni ĉiuj scias ke li havas justan koron.

- Ĉu ne pli bone valori urĝi nian fuĝon ? demandis Georgo.

- Mi staris je la kvara, kaj mi ne perdis tempon. Ni antaŭas ilin, se ili foriros kiel ili planis. Ĉiaokaze ne estus sekure ekvojiri antaŭ plena noktiĝo, ĉar estas en la supraj vilaĝoj homoj kun malbona volo kiuj estus pretaj provoki kvereleton kun ni, se ili vidus nian ĉaron, kaj tio prokrastus nin pli ol la atendadon. Mi kredas ke post du horoj ni povos riski nin. Mi tuj iros varbi Mikaelo^{n} Kruco^{n} por ke li rajde sekvu nin por atente inspekti la vojon kaj averti nin pri la alproksimiĝo de la malamiko. Mikaelo havas beston kiu, sen sin ĝeni, venkus ĉiujn siajn egalulojn. Galope li kuniĝus kun ni, se estus danĝero. Mi preterpasante diros al Jakobo kaj al la maljunulino stari pretaj kaj zorgi la ĉevalojn. Ni havas ŝancon alveni en la stacion antaŭ ol ili atingos nin. Tiel, bonan kuraĝon, amiko Georgo. Ĉi tiu ne estas la unua implikaĵo el kiu mi eltiris min kun kunuloj el via raso !

Fineaso eliris kaj fermis la pordon.

- Fineaso estas lerta, diras Simeono; li faros por vi tion kio estas la plej bona, Georgo.

- Tio kio ĉefe ĉagreni min, reparolis la junulo, estas ke ekzisti risko por vi.

- Vi agrablus al mi, amiko Georgo, ne plu paroli pri tio. Tio kion ni faras estas afero de konscienco. Ni ne povas agi alimaniere. Kaj vi, patrino, *li diris turnante sin al Raĥela*, hastigu viajn preparojn, ĉar necesas ne lasi foriri niajn amikojn nemanĝinte.

Dum Raĥela kaj ŝiaj infanoj rapidigis, kiel eble plej bone, la kuiradon de la platpanoj, de la kokaĵo, de la ŝinko kaj de la ceteroj de la vespermanĝo, Georgo kaj Eliza, kun la brakoj interplektitaj, sidaj en sia malgranda ĉambro,

interparolis kiel povas fari edzo kaj edzino ĵus antaŭ iu eble eterna disiĝo.

- Eliza, diras Georgo, la homoj kiuj havi amikojn, domojn, terojn, monon, kaj ĉion laŭ deziro, ne kapabli ami unu la alian kiel ni ja ami unu la alian, kiuj havi en la mondo nur ni mem. Antaŭ ol mi koni vin, Eliza, neniu ami min krom mia malfeliĉa patrino, kun la koro rompita, kaj mia fratino. Mi vidi Emmaⁿ la matenon mem kiam la komercisto forpreni ŝin. Ŝi veni en la angulon kie mi kuŝi, kaj diri : "Kompatinda Georgo ! Via lasta amikino foriri. Kio vi fariĝi, kompatinda knabo !" Mi ekstari, etendi miajn ambaŭ brakojn ĉirkaŭ ŝin. Mi krii, mi plorsingulti, ankaŭ ŝi plori. Ĉi tiuj esti la solaj amplenaj paroloj kiujn mi aŭdi dum dek longaj jaroj. Tial mia koro esti velkinta kaj reduktita al cindroj kiam mi renkonti vin. Senti sin amata, ho ! esti preskaŭ reviviĝi el la mortintoj. Mi esti nova viro de tiam, kaj nun oni forpreni vin de mi nur kun la lasta guto de mia sango. Por akiri ĝin, necesi paŝi sur mian kadavron.

- Disinjoro kompati nin ! diris Eliza tute larmanta. Li nur permesi al ni eliri kune el ĉi tiu lando, kaj mi nenion pli peti al li.

- Ĉu Dio esti iliaflanke ? *murmuris Georgo sin lasante al amareco de siaj pensoj plivole ol li respondis al sia edzino.* Ĉu li vidi ĉion kion ili fari ? Kial li lasi ĉi tiujn aferojn okazi ? Ili diri al ni ke Biblio esti por ili. Certe ja, ili havi povon ! Ili esti riĉaj, bonfartaj, feliĉaj. Ili esti membroj de eklezioj kaj kalkuli kun la ĉielo. Ilia vivo facile flui en ĉi tiu mondo. Ĉio veni al ili laŭdezire ! Kaj kompatindaj, honestaj, fidelaj kristanoj, tiel bonaj aŭ pli bonaj kristanoj ol ili, kuŝi en la marĉoŝlimo sub iliaj piedoj ! Ili aĉeti ilin; ili vendi ilin; ili ŝakri ilian sangon, ilian koron, iliajn ĝemojn, iliajn larmojn - kaj Dio tion permesi !

- Amiko Georgo, diris Simeono en la apuda ĉambro,

aŭskultu ĉi tiun psalmon, ĝi plezurigos vin.

Georgo alproksimigis sian seĝon al la pordo; Eliza viŝis siajn larmojn, kaj ambaŭ atente aŭskultis. Simeono legis :

"Tamen preskaŭ miaj piedoj stumblis, iom pli, kaj mi falis. Mi ĵaluzis pri la arogantuloj, vidante la trankvilecon de la malvirtuloj. Ĉar ili estas liberaj de turmentoj ĝis ilia morto kaj dikiĝas.

"Ili ne partoprenas en la laboroj kiuj estas la ordinara sorto de homoj. Ili ne spertas la malbonoj kiuj afliktas la homojn.

"Tial ili ornamiĝas per aroganteco kiel oni surmetas kolĉenon, ili envolviĝas en perforteco kiel en vesto, iliaj okuloj fulmetas ĉe iliaj grasoplena vizaĝo, la malbonaj deziroj de ilia koro senmezure superfluas. Ili etas mokemaj, ili malice parolas per aroganta tono, kaj minacas subpremi.

"Ilia buŝo atakas la ĉielon mem, ilia lango furiozas sur la tero.

"Tial la popolo sekvas ilin, trinkante per grandaj glutoj iliajn parolojn, dirante : "Dio ? Kion li scias ? Ĉu tiu kiu estas tie supre, scias ion ?"

- Ĉu tio ne estas tio kiun vi sentas, Georgo ?

- Jes, vere, li respondis; tio esti miaj pensoj, kvazaŭ mi esti skribinta ilin.

- Nu, ankoraŭ aŭskultu, diris Simeono.

"Mi ekpensis por provi kompreni; ĉi tio estis afero de turmento por mi, ĝis kiam mi iris en la sanktejon de Dio. Tiam mi pripensis pri la sorto kiu atendas ilin.

"Ĉar fakte vi metas ilin sur glitiga loko, vi ĵetas ilin al ruino. Kiel subite ili estas ruinigitaj ! Ili estas detruitaj kaj forprenitaj de teruro.

"Sed mi ĉiam estas kun vi, kaj vi kaptis mian dekstran manon; per viaj konsiloj, vi kondukas min, poste vi akceptos min en via gloro.

"Mi prenis la Disinjoron, la Eternulon, kiel rifuĝon kaj mi

rakontos ĉiujn liajn farojn.

Psalmo 73.

Ĉi tiuj sanktaj paroloj de fido verŝiĝis el la lipoj de la maljunulo kiel sankta muziko. Ili eniris en la kolerigan spiriton de Georgo, kaj liaj belaj trajtoj iom post iom reakiris mildan kaj rezignacian esprimon.

- Se ĉio finiĝus en ĉi tiu mondo, Georgo, diris Simeono, tiam vi povus diri : "Kie estas Disinjoro ?" Sed ofte estas por tiuj kiuj havas la malplej grandan parton en ĉi tiu vivo, ke li rezervas sian regnon. Metu do en li vian esperon, kaj kio ajn okazus al vi ĉi tie malsupre, li iam rekonos viajn meritojn.

Ĉi tiuj paroloj, diritaj de iu predikisto, severmora por aliulo, indulga por si mem, kaj vortigitaj kiel banalaĵojn de pia retoriko por la uzo de la suferantoj, maltrafintus sian efikon. Sed, venante de homo kiu ĉiutage sin riskis kviete al monpuno kaj malliberigo, por servi humanan kaj dian kaŭzon, ili havis grandegan pezon. Kaj la kompatindaj afliktitaj fuĝintoj ĉerpos el ĝi aldonon de forto kaj de kuraĝo.

Raĥela prenis Elizan per la mano kaj kondukis ŝin ĉe la tablon. Apenaŭ ili vespermanĝis kiam oni milde frapis. Ruto eniris.

- Mi rapidege kuris, ŝi diris, por alporti ĉi tiujn ŝtrumpetojn por la knabo, estas tri paroj el lano, bonaj kaj varmaj. Estas tiel malvarme en Kanado ! Vi ne lasas vin subfleksiĝi, mi esperas, *ŝi aldonis ĉirkaŭirante la tablon por alveni al Eliza. Ŝi kore premis ŝian manon kaj enŝovis maizkukon en tiun de Henriko*. Mi alportis malgrandan pakon da ili, *ŝi diris malespere klopodante por eltiri ĝin el sia poŝo*. La infanoj ĉiam malsatas, vi scias.

- Ho dankon, vi estas tro bona, diris Eliza.

- Metu vin tien kaj vespermanĝu kun ni, Ruto, diris Raĥela.

- Neeble. Mi lasis kuketojn en la forno kaj Johano kun

la etulo; se mi restos minuton tro longe, Johano lasos la kuketojn bruli, kaj donos al la etulo ĉion kio estas da sukero en la sukerujo. Li neniam faras alie, diris ridante la malgranda kvakerino. Adiaŭ do, Eliza, adiaŭ, Georgo. Disinjoro donu al vi sekuran vojaĝon ! *Kaj tion dirinte, ŝi vigle ekiris.*

Granda kovrita ĉaro baldaŭ haltis antaŭ la pordo. La nokto estis hela, kaj la steloj brilis sur la ĉielo. Fineaso facilmove saltis el la sidloko por doni helpon en la aranĝojn de la vojaĝantoj. Georgo eliris el la domo, donante sian brakon al sia edzino iuflanke kaj portante sian filon aliflanke. Li paŝis per firma paŝado; lia vizaĝo estis trankvila kaj decida, Raĥela kaj Simeono sekvis lin.

- Eliru dum momento, homoj, diris Fineaso al tiuj kiuj jam estis en la veturilo, por ke mi alfiksu la malantaŭan benkon por la virinoj kaj la infano.

- Jen du bubalaj feloj, diris Raĥela; aranĝu la sidlokojn kiel eble plej oportune. Estas laciĝo vojaĝi dum tuta nokto ! Jakobo unue ekĵetiĝis el la ĉaro, kaj zorge elveturiligis sian maljunan patrinon kiu, alkroĉinte al lia brako, angore rigardis ĉirkaŭ si, timante vidi iun ĉassekvanton sin ŝovi en la ombron.

- Jakobo, ĉu viaj pistoloj estas ŝargitaj, kaj pretaj ? demandis Georgo mallaŭte.

- Jes, tute pretaj, rebatis Jakobo.

- Kaj vi scias tion kion vi devos fari, se ili venos ? Ĉu vi ne hezitos ?

- Heziti ? Ho ne ! *Jakobo malfermis sian larĝan bruston kaj forte enspiris la aeron* : Ĉu vi kredas min preta lasi ilin rekapti mian patrinon ?

Dum ĉi tiu mallonga diskuto, Eliza adiaŭis Raĥela[n]; Simeono helpis ŝin enveturiĝi, kaj enŝoviĝante funden kun sia filo, ŝi sidiĝis sur la bubalaj feloj. La maljunulino venis poste. Georgo kaj Jakobo lokis sin sur la antaŭan benkon,

kaj Fineaso sur la seĝon.

- Adiaŭ, amikoj ! kriis Simeono al ili de ekstere.

- Dio benu vin ! Ili ĉiuj respondis de interne.

Kaj la ĉaro ekruliĝis, saltante kaj skuiĝante laŭ la glacia vojo.

La bruo de la radoj, la malglateco de la vojo, malebligis ian konversacion. La veturilo do iris tra longaj spacoj kovritaj de arbaroj, tra vastaj aridaj kaj izolitaj ebenaĵoj, suprenirante montetojn, malsuprenirante valojn, kaj bone-malbone antaŭenirante horon post horo. La infano, profunde dormanta, ripozis sur la genuoj de sia patrino. La kompatinda maljunulino finfine forgesis siajn terurojn. Eĉ la malkvieto de Eliza cedis al dormo laŭmezure kiel la nokto pasis. Fineaso sole, ĉiam atentema, ĉarmis la longojn de la vojo, fajfante kelkajn ariojn malmulte edifajn, kaj forte kontraŭ-kvakeroj.

Ĉirkaŭ la tria matene Georgo distingis la rapidan kaj urĝatan klakadon de ĉevalpaŝado, alvenantan malantaŭ ilin. Li puŝis Fineason per kubuto. Fineaso haltigis siajn ĉevalojn : li aŭskultis.

- Li devas esti Mikaelo, li diris; mi kredas rekoni la galopon de lia besto.

Li stariĝis sur la seĝo, kaj rigardis malantaŭen. Rajdanto, galopege alkuranta, aperis supre de fora monteto. "Estas li, aŭ mi eraregas", diris Fineaso. Georgo kaj Jakobo saltis teren, antaŭ ol scii tion kion ili faris. Senmovaj kaj mutaj, ili atendis kun la vizaĝo turnita al la mesaĝisto. Ĉi tiu alproksimiĝis; subite li malaperis en valon, sed ili ankoraŭ aŭdis la impetan kaj hastan piedfrapadon de la ĉevalo. Finfine, li ekaperis sur la alvokebla supro de altaĵo.

- Estas Mikaelo kun karno kaj ostoj, diris Fineaso; kaj li alvokis : Mikaelo ! Hola he !

- Fineaso ! Ĉu estas vi ?

- Jes; kiaj novaĵoj ? Ĉu ili venas ?

- Je cent paŝojn malantaŭ mi ! Ok aŭ dek, varmigitaj de brando, sakrantaj, ŝaŭmantaj, kiel bando de lupoj.

Li ankoraŭ parolis, la venteto alportis la malfortan sonon de galopanta trupo.

- Regrimpu, kaj vigle ! diris Fineaso. Se necesas batali, atendu ke mi kondukos vin vojireton pli for.

Georgo kaj Jakobo saltis sur la benkon, kaj Fineaso impete irigis siajn ĉevalojn plengalope. Mikaelo eskortis ilin. La ĉaro ruliĝis, saltegis, preskaŭ flugis super la malmoligita tero, sed la bruo de la rajdantoj kiuj alkuris malantaŭ fariĝis pli kaj pli distinga. La virinoj aŭdis ĝin; ili terure rigardis eksteren, kaj vidis sur la supro de malproksima monteto, aron da viroj kiuj kontrastis kun la ruĝa fono de la ĉielo, striita de la unuaj lumetoj de la tagiĝo. Ankoraŭ alia monteto transirita; la ĉasosekvantoj estis vidantaj la ĉaron kiun ĝia blanka baŝo signalas de malproksime. Sovaĝa triumfkrio alvenis al la fuĝantoj. Eliza, kiu sentis sin sveneti, forte premis sian infanon sur sian sinon; la maljunulino ĝemis kaj preĝis; Georgo kaj Jakobo pretigis siajn pistolojn kun la energio de malespero. La malamiko konkeris terenon. La veturilo faris subitan ĉirkaŭvojon, kaj haltis ĉe la vido de superelstaranta ĉeno el krutaj rokoj, formanta izolitan kaj gigantan mason meze de ebena, nesirmita tereno. Ĉi tiu soleca rokamaso kiu staras, nigra kaj masiva, kontraŭ la kolora matena ĉielo, ŝajnas ebligi certan retiriĝon.

Ĉi tiu loko estis bone konata de Fineaso, kiu esploris ĝin foje kaj refoje dum siaj ĉasaj ekskursoj, kaj estis por atingi ĝin ke li senkompate vipis siajn ĉevalojn.

- Nun ni ataku ! li diris elsaltante malsupren de sia seĝo. Ĉiuj eliru en palpebruma daŭro kaj grimpu tien supren kun mi ! Mikaelo, alligu vian ĉevalon al la ĉaro, rapidu ĝis ĉe Amarja; decidigu lin veni, lin kaj liajn filojn, helpi nin

prudentigi ĉi tiujn fiulojn.

Ili ĉiuj estis grunden post sekundo.

- Tien, diris Fineaso kunprenante Henriko^{n}; prizorgu pri la virinoj, vi, kaj kuru tiel rapide kiel vi neniam kuris !

La instigo estis senutila. Ĉiuj, pli lertaj ol parolo, transiris la palisaron kaj fuĝis al la rokoj, dum Mikaelo, liginte per la brido sian ĉevalon al la ĉaro, plenrapide malproksimiĝis.

- Antaŭen, diris Fineaso kiam, alveninta ĉe la piedo de la rokoj, li distingis per la miksa lumo de steloj kaj tagiĝo, la spurojn de malbone trabatita pado. Jen unu el niaj malnovaj ĉasejoj. Antaŭenpaŝu !

Li unue paŝis, suprengrimpante la rokon kiel kapro, kun la infano ankoraŭ en siaj brakoj. Jakobo poste venis, kunportante sur siajn ŝultrojn sian tremantan maljunan patrinon, Georgo kaj Eliza formis la ariergardon.

La roto da rajdantoj, alveninta al la palisaro, grumblis, sakris kaj, elĉevaliĝante, pretiĝis persekuti sian predon.

Siaflanke, la kompatindaj malfeliĉaj ĉaspelatoj atingis la supron de la ĉeno. Tie la pado malaperis tra mallarĝan interkrutejon kie ni povis pasi nur unu post la alia. Subite ili sin trovis haltigitaj de fendego je pli ol unu metro larĝa. Transe, stako da rokoj, apartigitaj de la cetero de la ĉeno, starigis je tridek futoj *(+/-1m)* alta siajn nudajn kaj perpendiklajn flankojn kiel la muregoj de fuorto. Fineaso transiris per unu salto la fendegon, kaj demetis la infanon sur muskokovritan platformon ĉe la supro de la roko.

- Je via vico ! li kriis. Firme saltu, se vi preferas la vivon ! Unu post alia, ili transiris la faŭkon, kaj suprengrimpis la rokon. Fragmentoj de moviĝantaj ŝtonoj servis al ili kiel remparon malhelpante vidi ilin de malsupre.

- Nu ! Jen ni ĉiuj estas ! diris Fineaso sin ŝirmanta malantaŭ la granitaj fragmentoj, de kie li spionis la

atakantojn kiuj malorde supreniris. Ke ili kaptu nin, se ili kapablas ! Neniu alvenos ĉi tien sen unue pasi sola en la interkrutejon inter ĉi tiuj du rokoj, tute ĝuste atingeblaj de viaj pistoloj, infanoj. Ĉu vi vidas !

- Mi vidi, respondis Georgo, sed ĉar ĉi tio koncerni nin, lasi nin preni la tutan riskon kaj ekbatali.

- Laŭ via plaĉo, Georgo, ĝissate ! reparolis Fineaso maĉante kelkajn timianajn foliojn; sed vi ne malpermesas al mi la plezuron de la spektaklo, mi supozas. Vidu do kiel ili interkonsiliĝas tien ! Ili aspektas kiel kokinoj kiuj pretiĝas grimpi sur la sidstangon. Ĉu vi ne bone farus sendi al ili avertan noton, antaŭ ol lasi ilin ekvojiri ? Eĉ nur por lojale averti ilin ke ili estos mortigataj ?

La suba grupo, lumigita de la unuaj lumetoj de la tago, nun estis tre videbla. Ĝi konsistis el niaj malnovaj konatoj, Antono Lokero kaj Markso, du konstabloj, kaj fiamaso da vaguloj varbitaj per glaso da brando ĉe la lasta taverno, por partopreni en la distraĵo de pelado de fuĝintaj negroj.

- Nu, Antono, jen viaj lavursoj kaptitaj en la kuŝloko[13], diris unu el ili.

- Jes, mi vidis ilin grimpi tien supren, respondis Antono, kaj la vojo iras tien. Mi opinias grimpi rekte. Mi defias ilin fari la saltegon, kaj ni baldaŭ trovos ilin !

- Sed, Antono, ili povas pafi nin de malantaŭ la ŝtonoj, diris Markso; kaj ni travivus malbonan kvaronhoron.

- Pu ! diris Antono kun ironia rikano. Vi ankoraŭ provas savi vian haŭton, Markso. Ne estas danĝero, la negroj estas diable tro malkuraĝaj.

- Mi ne vidas kial mi ne prizorgu mian haŭton, diris Markso, konsiderante ke mi ne havas iun anstataŭan. La negroj kelkfoje batalas kiel demonoj.

Ĉe tiu momento Georgo aperis sur la supro de la roko supre, kaj diris per laŭta trankvila voĉo :

- Sinjoroj, kiuj vi esti, kaj kion vi voli ?

- Ni volas bandon da fuĝantaj negroj, respondis Antono Lokero. Iu Georgo Hariso, Eliza Hariso kaj ilia filo, plie Jakobo Seldeno kaj iu maljunulino. Ni ĉi tie havas juĝoficistojn kaj mandaton por aresti ilin. Kaj ni havos ilin, ĉu vi aŭdas ? Vi mem, ĉu vi ne estas Georgo Hariso, apartenanta al s^ro Hariso, de la grafejo Ŝelbi, en Kentukio ?

- Mi estas Georgo Hariso. Iu s^ro Hariso de Kentukio nomis min sian sklavon. Sed nun mi estas libera, stara sur la grundo kiun Dio faris libera, kun la edzino kaj la infano kiujn mi rajtas nomi miajn. Jakobo kaj lia patrino estas kun ni. Ni havas armilojn por defendi nin, kaj ni defendos nin. Vi povas supreniri, se vi volas; sed la unua kiu alvenas atingeble de niaj pistoloj estas mortonto, kaj tiel de la dua, la tria kaj la aliaj ĝis la lasta.

- Nu, nu, diris senspira dikulo kiu antaŭeniris nazpurigante sin, tio ne estas taŭga maniero paroli, juna ribelulo. Ni estas juĝoficistoj, kiel vi vidas; ni havas niaflanke la leĝon, la rajton kaj la ceteron; vi do pli bone farus tute trankvile kapitulaci, ĉar necesos al vi frue malfrue alveni al ĉi tio.

- Mi tre bone scias ke vi havas por vi leĝon kaj rajton, amare diris Georgo. Vi volas preni mian edzinon por vendi ŝin al Nov-Orleano, mian infanon por enteni lin kiel bovidon en la staloj de sklavvendisto, kaj la maljuna patrino de Jakobo por redoni ŝin al la kruelega besto kiu insultis kaj vipis ŝin pro ĉagreno ne plu povi mistrakti ŝian filon. Vi volas resendi Jakobo^n kaj min al la vipo, al la torturo, por esti dispremitaj sub la kalkanojn de tiuj kiujn vi nomas niajn mastrojn, kaj viaj leĝoj donas al vi sian subtenon por fari tion. Honto al ili ! Honto al vi ! Sed vi ne tenas nin. Viaj leĝoj, ni forneas ilin ! Via lando ne estas nia. Ni estas ĉi tie, sub la ĉielo de Dio, tiel liberaj kiel vi. Kaj, per la Ĉiopovulo kiu kreis nin, ni

defendos nian liberecon ĝis la morto !

Georgo estis bela por vidi, sur la supro de ĉi tiu roko, faranta sian deklaron de sendependeco. La matenaj ruĝecoj purpure kolorigis liajn malhelajn vangojn, kaj la unuaj fajroj de la tago ekbruligis flamon en liaj nigraj okuloj, dum kiam kun la mano levita al la ĉielo, li alvokis la homon al la justeco de Dio.

Se li estus juna Hungaro kuraĝe defendanta, en iu monta gorĝo, la retiriĝon de fuĝantoj eskapintaj de Aŭstrio, en Ameriko, oni proklamintus lin heroon ! Sed ni estas tro bone instruitaj kaj tro bonaj patriotoj por vidi nenion heroan en la defendo de neblankuloj, el afrika raso, fuĝantaj de Usono al Kanado. Tiuj el niaj legantoj kiuj ne sammaniere vidus la aferon, devas preni pri tio la plenan respondecon. Ke hungaraj rifuĝintoj, sukcesintaj eviti la mandatojn kaj la aŭtoritatojn de sia legitima registaro, metas la piedon en Usono, la gazetaro kaj la leĝdonantoj rivalas per aplaŭdoj kaj gratuloj. Sed ke senesperaj afrikaj fuĝintoj same faras, estas… ho ve ! kio tio ne estas ? Kio ajn estu, certas ke la sinteno, la okulo, la voĉo, la gesto mutigis dum momento la suban grupon. Estis io en la aŭdaco kaj la decido kiu trudas, eĉ al la plej krudaj naturoj. Markso sole ne estis kortuŝita. Li kaŝe pretigis sian pistolon, kaj profitante de la silento kiu sekvis la paroladon de Georgo, li celis lin kaj pafis.

- La pagenda sumo en Kentukio estas sama, ĉu li estas morta aŭ viva, li senemocie diris, viŝante sian pistolon de la maniko de sia vesto.

Georgo faris saltegon malantaŭen, Eliza eligis krion, la kuglo, post esti flugtuŝinta la harojn de sia edzo, pasis proksime de ŝia vango, kaj iris lokiĝi en la supran arbon.

- Estas nenio, Eliza, vive diris Georgo.

- Vi pli bone faros teni vin nevideblan, kaj ne plu paroladi, reparolis Fineaso, ĉi tio estas vera kanajlaro.

- Jakobo, diris Georgo, rigardu ĉu viaj pistoloj estas pafpretaj, kaj viglu kun mi super la interkrutejon. Mi pafos al la unua kiu montriĝos, vi al la dua, kaj tiel plu. Necesas, vi vidas, ne perdi du pafojn sur unu sola homo.

- Sed se vi ne trafos ?

- Mi trafos, diris senemocie Georgo.

- Bone ! murmuris Fineaso inter siaj dentoj; estas karaktero en ĉi tiu knabo.

Post la pafo de Markso, la malamikaro ŝajnis dum momento nedecidema.

- Mi kredas ke la pafo trafis, diris unu el la viroj. Mi aŭdis ŝrikon.

- Koncerne min, mi supreniras tute rekte, diris Antono. Mi neniam timis ĉi tiujn negrajn hundojn, kaj mi ne nun komencos. Kiu sekvos min ? Kaj li impetis al la rokoj.

Georgo klare aŭdis ĉi tiujn vortojn; li pretegis sian pistolon, ekzamenis ĝin kaj celis la punkton de la interkrutejo kien la unua kiu alvenus supren, devis sin montri.

Unu el la plej kuraĝaj de la bando sekvis Antono^{n}, kaj la impulson donitan, ĉiuj rapidis sinsekve unuj post la aliaj, la vosto pelanta la kapon pli rapide ol konvenis al ĝi iri. Ili antaŭeniris; baldaŭ la masiva formo de Antono aperis ĉe la alia flanko, preskaŭ sur la rando de la fendego.

Georgo ekpafis; la kuglo penetris la dekstran flankon; sed, kvankam vundita, li ne retropaŝis. Eligante la muĝon de furioza virbovo, li mezuris la spacon kaj ekimpetis.

- Amiko, *diris Fineaso, subite sin metante fronte al li, kaj donante al li bruskan puŝon per siaj longaj brakoj*, ni ne bezonas vin ĉi tie.

Li ruliĝis en la faŭkon, rulfalante meze de stumpoj, de arbustoj, de malkroĉitaj ŝtonoj kiujn lia pezo kuntrenis kun li, ĝis kiam li alvenis, vundoplena kaj ĝemanta, je profundo de tridek futoj *(+/-9m)*. La falo mortigus lin, se ĝi ne estus

mildigita de la branĉoj de granda arbo kiu alkroĉis liajn vestojn preterpasante. Li tamen malsupreniris en ĝi kun rapideco kiu estis al li nek agrabla nek oportuna.

"*Disinjoro helpu nin ! Ili estas veraj diabloj !*", ekkriis Markso, retretante al la malsupro de la roko, multe pli diligente ol kiam li grimpis. La aliaj pelmele malsupreniris post li; ĉefe la dika konstablo, anhelanta kaj blovanta laŭ la plej energia maniero.

- Vi homoj, diris Markso, ĉirkaŭiru kaj kuru tien levpreni tiun kompatindan Antono^{n}, dum mi tuj rajdos kaj galopos plenrapide serĉi helpon ! Komprenite ? *Kaj sen atenti al la pikparoloj kaj al la huadoj de siaj kunuloj, Markso plenumis sian promeson kaj galopege malproksimiĝis.*

- Ĉu oni iam vidis pli malestimindan kanajlon ? diris unu el la viroj. Venigi nin ĉi tien por fari siajn aferojn, kaj forkuri lasante nin en la kaptilo !

- Ĉu li ne sendu nin levpreni sian kamaradon ? diris alia. La diablo forprenu min, se mi zorgas pri tio, ĉu li estas viva aŭ morta !

Gvidataj de la ĝemoj, ili traboris al si vojon tra la stumpoj kaj arbustoj ĝis la loko kie kuŝis Antono, alterne plendanta kaj sakranta kun egala vigleco.

- Vi havas bonan spiradon, hej Antono ! diris unu. Ĉu vi estas grave vundita ?

- Mi ne scias. Provu levi min; huj ! huj ! Malbenita estu tiu infera kvakero ! Sen li mi sendus kelkajn ĉi tie malsupren por vidi ĉu la promenado plaĉus al ili.

Oni sukcesis, ne sen multaj malfacilecoj kaj penoj, restarigi la defalintan heroon, kaj konduki lin, subtenatan sub ĉiu brako, ĝis la loko kie atendis la ĉevaloj.

- Se vi nur povus rekonduki min je mejlo *(+/-1,6Km)* malantaŭen en ĉi tiun tavernon. Donu al mi naztukon, ion por tamponi tien, por haltigi tiun damnitan sangon.

Georgo rigardis super la rokoj. Li vidis la virojn provi levi sur la selon la gigantan korpon de Antono kiu, post du aŭ tri malsukcesaj provoj, turniĝis ĉirkaŭ si mem kaj peze falis sur la teron.

- Ho ! Mi esperi, ke li ne esti mortigita ! ekkriis Eliza, kiu rigardis de malproksime kun la aliaj.

- Kial ne, diris Fineaso; li estis servita laŭ siaj meritoj.

- Ho ! Esti ke post la morto veni la juĝo ! diris la juna virino.

- Jes, *daŭrigis la maljunulino kiu pasigis la tutan tempon de la batalo por ĝemi kaj murmuri metodistajn preĝojn*. Esti tamen terura transiro por la animo de la kompatinda estulo !

- Ververe, mi kredas ke ili forlasas lin surloke ! diris Fineaso.

Estis la vero. Post kelkaj intertraktoj, kelka hezita ŝajno, ĉiuj surĉevaliĝis kaj foriris. Tuj kiam ili estis ekster vido, Fineaso removiĝis.

- Necesas al ni malsupreniri kaj fari vojireton, li diris. Mi petis al Mikaelo iri antaŭen serĉi helpon kaj reveni kun la ĉaro, sed ni bone faros iri renkonte al li. Disinjoro faru ke li ne tro malfruu ! Estas frumatene, kaj dum ankoraŭ kelka tempo ne estos multaj piedirantoj sur la vojo. Ni estas ne pli ol du mejlojn *(+/-3,2Km)* de nia haltejo. Se la vojo ne estis tiel malbona ĉi tiun nokton, ni certe povintus postlasi ilin.

Kiam ili alproksimiĝis al la palisaroj, ili malkovris malproksime sur la vojo, la ĉaron, eskortatan de rajdantoj.

- Jen Mikaelo, Stefano kaj Amarja ! ĝoje ekkriis Fineaso. Nun ni povas kredi nin tiel sekuraj kvazaŭ ni jam estus tien.

- Do ni iom halti, diris Eliza, kaj fari ion por ĉi tiu kompatinda viro. Li ĝemi por veki kompaton !

- Esti nur agi kiel kristanoj, diris Georgo. Ni restari lin kaj kunporti lin kun ni.

- Ĉu por doni lin por flegi al kvakeroj ? diris Fineaso. Jen tio kio estus bela ! Vere, koncerne min, mi ne kontraŭas al tio. Ni iom vidu en kiu stato li estas ?

Kaj Fineaso kiu, dum sia vivo de pioniro kaj de ĉasisto, akiris kelka sperto en praktika kirurgio, surgenuiĝis apud la vundito kaj atente ekzamenis lin.

- Markso, diris mallaŭte Antono, ĉu estas vi, Markso ?

- Ne, ne ĝuste, amiko, respondis Fineaso, Markso nur zorgas pri sia haŭto, kaj tre malmulte pri vi. Li delonge forkuris.

- Mi kredas ke mia kazo estas finita, diris Antono. La damnita malkuraĝa hundo, lasas min morti sola ! Mia kompatinda maljuna patrino ĉiam diris al mi ke tio tiel finiĝus.

- Disinjoro bona Dio ! Ĉu vi aŭdi la kompatindan estulon ? Li ankaŭ havi panjon ! ekkriis la maljuna nigrulino. Mi ne povi reteni min kompati lin.

- Kvietiĝu, kvietiĝu ! Ne ekpensu boji aŭ mordi, amiko, *diris Fineaso al Antono kiu ŝajnigis voli sin ekĵeti, kaj forpuŝis lin per la mano*. Vi havos tabulon de savo nur se mi haltigos la sangon.

Li tuj klopodis fari kompresojn kaj bandojn per sia poŝtuko, kaj la tolaĵo kiun liaj kunuloj povis provizi al li.

- Estas vi kiu puŝis min malsupren, diris mallaŭte Antono.

- Nu, se mi ne antaŭiĝis, estis vi kiu ekspedis nin en via stato, vi vidas ! *diris Fineaso kliniĝante por apliki la pansaĵon*. Jen, jen, lasu min fiksi ĉi tiun bandaĝon. Ni volas bonon al vi kaj ne havas rankoron kontraŭ vi. Vi estos kondukita en domon kie vi estos bonege flegita, kiel de via propra patrino.

Antono ĝemis kaj fermis la okulojn. Ĉe viroj el tiu klaso, vigleco kaj decido estas tute fizikaj kaj fluas kun la

sango. La ellaciĝo de ĉi tiu kompatinda giganto estis dolora por vidi.

La novevenintoj nun kuniĝis. Oni formetis la benkojn de la ĉaro. Bubalaj feloj estis kvarope malvolvitaj en unu el la flankoj, kaj kvar viroj malfacilege transportis tien la pezan mason de Antono. Tuj kiam li estis en la veturilo, li svenis. La maljuna nigrulino, en sia kompata ardo, sidiĝis apude kaj subtenis al li la kapon sur siaj genuoj. Eliza, Georgo kaj Jakobo lokiĝis kiel ili povis en tion kio restis da spaco, kaj ni ekvojiris.

- Kion vi pensi pri la vundo ? demandis Georgo sida sur la sidloko apud Fineaso.

- Ĝi sufiĉe profundiĝis en la karnon, kaj la transkapiĝoj kiujn li faris, la skrapvundoj kiujn li ricevis rulfalante de supre, ne speciale resanigis lin. Li abunde sangis, tio kio malplenigis lin samtempe de sango kaj de kuraĝo. Sed li resaniĝos, kaj eble li estos lerninta unu aŭ du esencajn aferojn…

- Mi esti plenkontenta pri tio kion vi diri al mi, respondis Georgo. La penso esti la kaŭzo de lia morto, eĉ en justa defendo, ĉiam esti pezanta sur mi.

- Jes, diris Fineaso, mortigi estas aĉa faro, ĉu kontraŭ homo, ĉu kontraŭ besto ! Mi miatempe estis grava ĉasisto, kaj mi vidis damaon, morte vunditan kaj mortantan, rigardi min per okuloj kiuj pensigis min esti malbonulo pro esti mortiganta la kompatindan beston. Kiam temas pri homa estulo, la afero estas ankoraŭ pli grava; ĉar kiel diras via edzino, post morto venos juĝo. Mi do ne kredas ke la skrupuloj de niaj homoj pri tia temo estu tro striktaj; kaj konsidere la maniero per kiu mi estis edukita, necesis al mi fari al ili sufiĉege da koncedojn.

- Kion ni fari pri ĉi tiu kompatinda viro ? diris Georgo.

- He ! Ni alportos lin ĉe Amarja^{n}. Estas la avino de

Stefano, Doroteo, kiel oni nomas ŝin, kiu estas fama flegistino. Tio estas, kiel oni dirus, kunnaskita en ŝi; neniam ŝi estas pli feliĉa ol kiam ŝi havas malsanulon por prizorgi. Ni povos lasi lin al ŝi dum plenplena dusemajno.

Post unu horo de veturado, ni atingis belan bienon, kie abunda tagmanĝo atendis lacajn vojaĝantojn. Antono Lokero baldaŭ estis kuŝigita en liton multe pli pura kaj pli ŝvelmola ol iu ajn kiun li iam okupis. Lia vundo estis zorge pansita kaj bandaĝita. Malfermante kaj fermante, kiel laca infano, liajn malviglajn okulojn, li rigardis la blankajn kurtenojn de la fenestro, kaj la mildajn ombrojn kiuj senbrue glitis en lia ĉambro kaj ĉirkaŭ lia lito.

Nune ni tuj adiaŭos lin kaj liajn kunulojn.

19. Spertoj kaj Opinioj de fraŭlino Ofelio.

Nia amiko Tomo, en siaj naivaj revadoj, ofte komparis sian feliĉan sorton de sklavo al tiu de Jozefo, en Egiptio. Kaj ju pli li havis la okazon agi sub la okulo de la mastro, ju pli la tempo fluis, des pli la komparo fariĝis okulfrapa.

Maldiligenta kaj malmulte estimanta la monon, Sanklaro forlasis ĝis tiam la zorgon provizi la domon al sia ĉambristo, Adolfo, almenaŭ tiel senzorga kaj tiel malŝparema kiel li. Inter ili, ili ambaŭ lukse vivis la aferojn. Tomo, kutimiĝinta ekde multaj jaroj antaŭmeti la interesojn de la mastro multe antaŭ la siajn, vidis kun maltrankvilo kiun li apenaŭ kapablis bridi, tiel frenezan malŝparemon. De tempo al tempo li riskis opinion, laŭ la trankvila kaj diskreta maniero kutima al tiuj de sia raso.

Unue Sanklaro hazarde utiligis lin. Poste, impresita de lia saĝo, de lia kapableco, li pli kaj pli fidis al li, tiel bone ke fine li estis taskita de la provizado de la domo kaj de la plejmulto de la aĉetadoj.

- Ne, ne, diris Sanklaro iun tagon kiam Adolfo plendis ke la potenco transiris en aliajn manojn, lasas Tomo^{n} al sia afero. Vi scias tion kion vi deziras, li ja scias tion kion ĝi kostas. Kaj ni povus tre bone vidi la finon de niaj eskudoj, se iu ne zorge atentigus pri ili.

Ĝuante la senliman fidon de mastro kiu transdonis al li bileton sen rigardi ĝin, kaj kiu enpoŝigis la monon sen kalkuli, Tomo havis por sin protekti kontraŭ tentoj nur sian neskueblan honestecon, fortigita de sia kristana kredo. Sed tio sufiĉis. Fidi al li estis la plej certa garantio de lia skrupula lojaleco.

Pri Adolfo la kazo estis tute malsama. Senpripensa,

egoista, dorlotita de mastro kiu trovis pli facile lasi fari ol regi, li fine konfuzis la vian kun la mia, en tia grado ke Sanklaro mem kelkfoje maltrankviliĝis. Lia komuna saĝo diris al li ke lia maniero trakti malsuperulojn estas senbaza kaj danĝera. Speco de kronika konsciencriproĉo persekutis lin, sen doni al li la forton por ŝanĝi sian kutimon. Ĉi tiu riproĉo mem eksteriĝis per troan indulgon. Li facile forviŝis la plej gravajn kulpojn, dirante al si, ke se li plenumintus sian devon, liaj homoj pli bone farintus la sian.

Ĉi tiu juna mastro, bela, sprita, malatentema, inspiris al Tomo respekton strange miksitan kun maltrankvilo kaj patra korinklino. Ke li neniam legis la Biblion, ke li neniam iris al preĝejo, ke li libere ŝercis pri ĉio kio sin prezentis ĉe la pinto de lia menso, ke li pasigis la dimanĉajn vesperojn en opero aŭ teatro, ke li vizitadis klubojn, tavernojn kaj vespermanĝis pli ofte ekstere ol taŭgis, jen tio kio Tomo ne povis reteni sin vidi, kiel ĉiuj. Li konkludis ke "la mastro ne estis kristano", sed li bone atentis ne sciigi al aliaj ĉi tiun konkludon. Nur, li faris de tio temon de multaj kaj multaj preĝoj, vespere, en sia ĉambreto. Okazis ankaŭ al li kelkfoje diri sian pensmanieron, sed ĉiam kun diskreta takto. Kiel ekzemple, kiam Sanklaro, invitita de bonvivantoj por kuniĝi kun ili, estis hejmen alportita inter la unua kaj la dua matene, en neniiĝa stato kiu pruvis nur tro bone la venkon de la fizikaj apetitoj super la moralo. Tomo kaj Adolfo helpis lin enlitiĝi; ĉilasta rigardanta la aferon kiel bonegan ŝercon, laŭte ridis pri la kruda timego de Tomo, sufiĉe simpla por pasigi la reston de la nokto stare preĝanta apud sia mastro.

- Nu, kion vi do atendas ? *diris Sanklaro sida en la biblioteko la morgaŭon en sia negliĝo kaj pantofloj, kiam li ĵus donis al Tomo monon kaj ordonon iri aĉeti.* Ĉu ĉio ne estas en ordo ? *li aldonis vidante lin senmova ankoraŭ sur la sama loko.*

- Mi timi ke ne, mastro, diris Tomo serioze.

Sanklaro metis sur la tablon sian gazeton kaj sian tason da kafo, kaj rigardis Tomo[n].

- Nu, kio estas ? Vi aspektas preskaŭ tiel ĝojiga kiel katafalko !

- Mi senti min ne bone, mastro. Mi ĉiam kredi mastron bona al ĉiuj.

- Ĉu ne estis tia ? Nu, Tomo, kion vi volas ? Vi deziras ion, mi imagas, kaj ĉi tio estas via antaŭparolo.

- Ho ! Mastro ĉiam esti bona kun mi. Mi ne havi kialon por plendi. Sed esti iu kun kiu mastro ne estas bona.

- Kion diable vi havas en la kapo, Tomo ? Parolu ! Kion vi volas diri ?

- Pasintan nokton, inter la unua kaj la dua, mi pripensi tion. Mi bone rebati la aferon en mia kapo. Mastro ne esti bona kun si.

Tomo havis la dorson turnitan kaj la manon sur la pordotenilo. Sanklaro fariĝis purpura, sed li ridis.

- Ho ! Jen ĉio, ĉu ne ? li gaje diris.

- Ĉio ! ekkriis Tomo, sin turnante kaj surgenue falante. Ho ! Mia kara juna mastro ! Mi timi ke ĉi tio esti la pereo de ĉio - ĉio, korpo kaj animo. Ĉu la Bona Libro ne diri : "Ĝi mordi malantaŭe kiel serpento, kaj ĝi piki kiel bazilisko[(22)] ?

La voĉo de Tomo rompiĝis; larmoj inundis liajn vangojn.

- Kompatinda naivulo ! Kompatinda frenezulo ! diris Sanklaro, liaj okuloj ankaŭ malsekiĝis. Starigu vin do, mi ne volas ke oni ploru pri mi !

Sed Tomo ne volis ekstari, kaj rigardis lin kun peteganta mieno.

- Nu ! Mi ne plu iros al iliaj damnitaj orgioj, Tomo, diris Sanklaro; je mia honoro, mi ne plu iros. Mi ne scias kial mi ne

22 Tute ne rigardu la vinon kiam ĝi montriĝas ruĝa, kaj kiam ĝi donas sian koloron en la pokalo… Ĝi mordas malantaŭe kiel serpento… (Proverbo 23, v.31/32 de Salomono)

rezignis ĝin pli frue. Mi ĉiam malestimis ĉi tian vivon, kaj riproĉis min sekvi ĝin. Do, Tomo, viŝu viajn okulojn, kaj iru al viaj aferoj. Neniujn benojn ! li aldonis, mi ne ankoraŭ estas tre edifa konvertito. *Kaj li milde puŝis Tomo[n] al la pordo.* Mi promesas per mia honoro, Tomo, ke vi ne plu revidos min kiel vi vidis min.

Tomo foriris, kun kontenta koro, viŝante al si la okulojn.

- Mi plenumos mian promeson, diris Sanklaro kiam la pordo estis refermita.

Li plenumos ĝin, ĉar ne estis al kruda sensismo ke lia delikata naturo inkliniĝis.

Sed kiu diros la sennombrajn travivaĵoj de f[ino] Ofelio en la komenco de ŝiaj mastrumaj laboradoj ?

En la sudaj ŝtatoj la geservistoj de la loĝejoj komplete diferencas inter si, laŭ la karaktero kaj kapableco de la mastrinoj kiuj edukis ilin.

En la sudo kiel en la nordo, ekzistas virinoj kiuj samtempe kombinas la regadan sciencon kaj la necesan takton por eduki. Sen uzi severecon, kaj kun videbla facileco, ili regas la malsimilajn regatojn de sia eta regno, profitante eĉ de la difektojn, kaj kompensante tion kio mankas al iuj per tio kion aliaj havas troe, por tiel krei sistemon el la plej harmoniaj kaj el la plej bone ordigitaj.

S[ino] Ŝelbi, kiun ni vidis laborante, estis unu el tiuj bonegaj dommastrinoj, tiaj kiajn niaj legantoj eble renkontis unu aŭ du. Maloftaj ĉie, ili ne estas komunaj en la Sudo, kie tamen ili kelfoje troviĝas, kaj kie la socia ŝtato proponas al ili brilajn okazojn elmontri sin.

Marta Sanklaro ne estis el tiu nombro. Ŝi neniam multe zorgis, ne pli ol ŝia patrino antaŭ ŝi, pri sia domo. Maldiligenta kaj infana, neantaŭvidema kaj senorda, ŝi edukis siajn geservistojn laŭ sia bildo, kaj ŝia priskribo al f[ino] Ofelio pri la profunda malordo de ŝia hejmo estis perfekte ĝusta;

nur ŝi ne atribuis tion al sia vera kaŭzo.

La unuan tagon de sia regenteco, f^ino Ofelio ellitiĝis je la kvara matene. Post esti okupiĝinta pri la aranĝo de sia propra dormĉambro kiel ŝi ĉiam faris ekde sia alveno, je la granda konsterniĝo de la servistinoj, ŝi pretiĝis vigle ekataki la ŝrankojn kaj kamerojn, kies ŝi havis la ŝlosilojn.

La provizejo, la tolaĵejo, la murŝranko por porcelanaĵoj, la kuirejo, la kelo, ĉio estis submetita al severa inspektado. La obskuraj faritaĵoj aperis al la plena lumo, kaj ĉiu kaŝita afero estis elmontrita, tiagrade ke la princolandoj kaj malsuperaj potencoj sonorigis alarmon, kaj aŭdigis obtuzajn murmurojn kontraŭ "ĉi tiuj nordaj sinjorinoj".

La maljuna Dinaho, ĉefkuiristino kaj laŭjure suzerenino en sia fako, furioziĝis vidi tiel uzurpi siajn privilegiojn. Neniu feŭda barono, subskribinto de la granda ĉarto, pli akre travivus trudeniron de la krono.

Dinaho estis persono laŭ sia maniero, kaj estus maljuste por ŝia memoro ne doni kelkan ideon pri ŝi al la leganto. Naskita kuiristino, tute same kiel onklino Kleo, ĉar ĉi tiu alvokiĝo estas denaska al la afrika raso, ŝi ne ricevis, kiel sia kolegino, la avantaĝon esti edukita kaj metode lertigita. Ŝia genio, al ŝi, estis tute laŭnatura, kaj kiel la geniuloj ĝenerale, obstina, akra kaj troe neregula.

Same kiel certa klaso de modernaj filozofoj, Dinaho montris suverenan malestimon al logiko kaj racio; ŝi enfermis sin en sia intima konvinko kiel en fuorto, kaj restis tie tute neatingebla. Neniu lavango da elokvento, da aŭtoritato aŭ da klarigo, iam ajn povus kredigi al ŝi ke alia metodo estus supera al ŝia, aŭ ŝanĝigi al ŝi kion ajn en ŝia agmaniero. Ekde longe ŝia maljuna mastrino, la patrino de Marta, koncedis al ŝi ĉi tiun punkton, kaj f^ino Marta, tiel kiel ŝi daŭrigis nomi S^inon Sanklaro^n ekde ŝia edziniĝo, trovis pli oportuna submetiĝi ol kontesti. Tial Dinaho regis sen kontrolo. Tio kio plie helpis

ŝin, estis tio ke, lerta diplomatino; ŝi kunigis grandan adaptiĝon de maniero kun granda rigideco de enhavo.

Dinaho spertiĝis pri la arto trovi ekskuzojn. Ŝi konis pri ili ĉiujn fakojn, kaj havis kiel aksiomon ke kuiristino neniam povas erari. En la sudaj kuirejoj ne mankas malĉefaj kapoj aŭ ŝultroj sur kiuj faligi la pezon de la pekoj. Se iu tagmanĝo malsukcesis, estis kvindek bonaj kialoj por ke tiel estu, kaj tiom da kulpaj deliktintoj, kontraŭ kiuj Dinaho koleris kun nelacigebla fervoro.

Sed tre malofte okazis fiasko en la lastaj rezultoj de Dinaho. Kvankam ŝia procedmaniero estis aparte zigzaga, malrekta, kaj sen ia ajn kalkulo pri tempo kaj loko, *(kvankam ŝia kuirejo ĝenerale ŝajnis esti ruinigita de ia terura uragano, kaj kvankam ŝi havis, por loki siajn kuirilojn, tiom da diversaj lokoj kiom estas tagoj en la jaro)*, se oni havus paciencon atendi la bonan tempon laŭ ŝi, la tagmanĝo fine alvenus en bona ordo, kaj tia ke epikurano ne kapablus trovi mankon en ĝi.

Estis la momento por la antaŭfaroj de la manĝo. Dinaho, kiu zorgis pri sia komforto, kaj kiu sentis la bezonon ŝpari al si longajn ripozajn intertempojn antaŭ la ago, sidis sur la planko kaj fumis malnovan stumpigitan pipon, specon de incensujo kiun ŝi fumis por helpi al siaj inspiroj. Ĝi estis ŝia maniero alvoki la hejmajn muzojn.

Grupiĝinta ĉirkaŭ ŝi, la juna generacio, kiu ĉiam abundas en suda loĝejo, okupiĝis pri la elgusigo de pizoj, pri la senŝeligo de terpomoj, pri la senplumigo de kokaĵoj. De tempo al tempo, Dinaho, interrompante la fluon de siaj meditoj, ekfrapis per sia lignokulero al kelkaj el la junaj laboristoj. Ĉar Dinaho regis ĉi tiujn etajn krispajn kapojn per fera sceptro. "Ĉi tiuj juninfanoj" estantaj kreitaj kaj naskigtaj, laŭ ŝi, "nur por ŝpari al ŝi paŝojn". Edukita en ĉi tiu sistemo, ŝi rigore aplikis ĝin.

Post esti pririgardinta diversajn partojn de la domo, f^ino Ofelio eniris en la kuirejon. Informita de multaj raportoj pri tio kio okazis, Dinaho decidis sin teni je defensivo kaj kontraŭmeti al la novajn aranĝojn nur ŝajnigan nesciadon, sen okazigi deklaritan militon.

La kuirejo estis vasta kahelita ĉambro, kies grandega kaj antikva kameno okupis iun tutan flankon. Sanklaro vane provis anstataŭigi ĝin per moderna fajrejo kun fornoj. Neniu puzeisto[23], neniu krustiĝinta konservativulo, iam sin montris pli rigide ligita al la uzadoj konsekritaj de la tempo ol Dinaho.

Ĉe sia reveno de Nordo, Sanklaro, impresita de la ordo kiu regis super la detaloj de la mastrumado ĉe lia onklo, kaj lulante sin per la iluzia espero helpi Dinaho^n en ŝiaj aranĝoj, malavare provizis ŝin per ŝrankoj kaj telermebloj. Tiel kiel indintus provizi per ili sciuron, aŭ pigon. Ju pli da tirkestoj, da tenejoj, des pli Dinaho trovis da kaŝejoj por la ĉifonoj, la kombiloj, la malnovaj ŝuoj, la rubandoj, la velkintaj artefaritaj floroj kaj aliaj galanterioj kiuj ĝuigis ŝin.

Kiam f^ino Ofelio eniris en la kuirejon, Dinaho ne ekstaris, kaj daŭrigis fumi kun stoika trankvileco, strabe sekvante la movojn de la malamikino, sed ŝajne absorbita de la inspektado de la laboroj kiuj okazis ĉirkaŭ ŝi.

F^ino Ofelio komencis malfermi la telermeblon. Ekde la unua tirkesto ŝi demandis :

- Kion vi metas ĉi tie, Dinaho ?

- Preskaŭ ĉio, ĉar ĝi esti oportuna kaj sub la mano.

Efektive ĝi estis la universala kolektujo, se oni juĝas laŭ la diverseco de ĝia enhavo. F^ino Ofelio unue eltiris el ĝi belan damaskitan tablotukon, makulitan de sango, kiu evidente servis por envolvi krudan viandon.

23 Disĉiploj de la D^ro Eduardo Buverio Pusej kiu revenigis parton de la Anglikana Eklezio al la katolikaj tradicioj kaj kutimoj.

- Kio estas ĉi tio, Dinaho ? Vi ne iras al la viandejo kun la plej fajnaj tablotukoj de via mastrino ?

- Ho ! Disinjoro ! Ne, fraŭlino. Ĉar ne esti eĉ unu viŝtuko, mi preni la tablotukon; sed mi flankenmeti ĝin por lavi ĝin, kaj jen kial ĝi esti tie.

- Ĉiam kaj ĉie la malordo ! diris al si f^ino Ofelio daŭrigante la inventaron de la tirkesto kie ŝi trovis muskatan raspilon, du aŭ tri nuksojn, metodistan himnaron, paron da malpuraj madrasoj, lanvolvaĵon kaj trikadon, tabaksakon kaj pipon, kelkajn petardojn, unu aŭ du subtasojn el ora porcelano plenigitajn de pomado, unu aŭ du malnovajn duonŝuojn, pecon de flanelo zorge ligitan de pingloj kaj enhavantan etajn blankajn cepojn, plurajn damaskitajn buŝtukojn, kelkajn dikajn viŝtukojn, flikilojn, kaj amason da disŝiritaj paperetoj, el kiuj eskapis diluvo da aromaj herboj.

- Kie vi kolektas viajn muskatojn, Dinaho ? diris f^ino Ofelio kun la mieno de martiro kiu petas al Dio la kapablecon esti pacienca.

- Preskaŭ ĉie, fraŭlino. Esti iuj tien supren sur la tabulo, en tiu fendetita taso, kaj ankaŭ tien en la ŝranko.

- Kaj ĉi tie en la raspilo, diris f^ino Ofelio montrante ilin al ŝi.

- He Disinjoro, jes ! Mi meti ilin tie ne pli malfrue ol ĉi matenon. Necesi al mi havi miajn aferojn sub la mano, diris Dinaho. Nu, Ĵakvo, Kial vi halti ? Ĉu vi povi diri tion al mi ? Bonvoli resti trankvile ! *Kaj ŝi minacis per sia ligna kulero cele al la kulpulo.*

- Kio ĉi tio estas ? rekomencis f^ino Ofelio levante la subtason da pomado.

- Tio ? Esti mia graso por haroj ! Mi meti ĝin tie sub mian manon.

- Kaj estas por tio ke vi uzas la plej belajn subtasojn !

- Disinjoro ! Ĉu mi ne esti dum plena mendopremo ! Mi

ne havi tempon turniĝi ! Mi ĝuste hodiaŭ depreni ĝin.

- Kaj ĉi tiuj du damaskitaj buŝtukoj ?

- Esti por la lesivado unu el ĉi tiuj tagoj.

- Ĉu vi do ne havas lokon kie meti tion kion vi devas doni por purigi ?

- Ho ! Jes ja bone ! Mastro Sanklaro tute intence farigi ĉi tiun grandan kofron; sed mi knedi sur ĝin. Mi enmeti en ĝi multajn aferojn; kaj tio ne esti praktika por levi, komprenu !

- Kial ne knedi viajn biskvitojn en la knedujo ?

- Disinjoro, fraŭlino ! Ĉu ĝi ne esti ĉiam plenega de pladoj, de teleroj, de iu afero kaj de alia ? Ne esti pli da loko ol necesi ! Nu !

- Sed vi povus lavi viajn pladojn kaj sinsekve ordigi ilin.

- Lavi miajn pladojn ! ekkriis plengorĝe Dinaho, ŝia kolero sin trudante al ŝia kutima respekto. Mi ŝati scii kion la sinjorinoj scii pri nia laboro ? Kiam do mastro havi sian manĝon, se mi pasigi mian tempon lavi la vazaron kaj ordigi ? Ĉiaokaze, esti tio kio fraŭlino Marta neniam ordoni al mi.

- Nu ! Jen denove kelkaj cepoj ĉi tie !

- He Disinjoro, jes, daŭrigis Dinaho, jen ili !... Ne ebli rememori kien mi meti ilin ! Kiam mi pensi ke mi envolvi ilin en tiun malnovan flanelon, tiujn karajn cepetojn ! Tute bone por la hodiaŭa raguo. Kiel bonŝanca ĝi esti !

F^ino^ Ofelio levis unu el paketoj da aromaj herboj.

- Pri tio, mi petegi fraŭlinon ne tuŝi ĝin, decideme diris Dinaho. Mi ŝati havi miajn aferojn tie kie mi scii trovi ilin.

- Sed vi ne bezonas truojn en la paperoj, mi supozas ?

- Tamen tio esti oportuna por trapasigi la herbojn.

- Jes, sed ili ankaŭ trapasis al la tirkesto, kiel vi vidas.

- Mi vere kredi ! Se eĉ malmulte fraŭlino daŭrigi meti ĉion fundon supren, multaj aliaj trapasi ! Fraŭlino jam elŝuti dikan amason da ĝi ĉi tie, *diris ŝi ĝene alproksimiĝante al la*

tirkestoj. Se nur fraŭlino voli reiri al la salono, kaj atendi mian tagon de purigado, fraŭlino poste vidi ! Sed mi nenion povi fari dum la sinjorinoj esti malantaŭ mia dorso. Samĉjo ! Bonvoli ne doni ĉi tiun sukerujon al la etulo ! Mi meti al vi vangofrapon, se vi ne priatenti

- Mi tuj trarigardos la kuirejon, kaj definitive reordigos ĉion, Dinaho; vi nur bezonos pluigi la ordon.

- Sinjoro Dio ! Fraŭlino Felio, ĉi tio ne esti sinjorina laboro; en mia tuta vivo mi ne vidi ilin fari tian aferon. Neniam tio esti venanta en la kapo de maljuna mastrino aŭ de fraŭlino Marta, kaj mi ne bone vidi por kio tio utili.

Indignigita Dinaho majeste paŝadis sian imperion, dum f^ino^ Ofelio kunigis la pladojn, stakigis la telerojn, malplenigis en grandan skatolon la enhavon de dekduo da improvizitaj sukerujoj, klasifikis la buŝtukojn, la tablotukojn, la viŝtukojn por la lavado, lavante, viŝante kaj ordigante per siajn proprajn manojn, kun rapideco kaj lerteco kiuj konsternis la kuiristinon.

- Sinjoro bona Dio ! Se esti tiel kiel fari ĉi tiuj "sinjorinoj de la Nordo", ili ne esti veraj sinjorinoj, certege, *ŝi diris al kelkaj el siaj satelitoj, tuj kiam ŝi estis sufiĉe malproksime por ne esti aŭdita*. Mi elturniĝi almenaŭ tiel bone dum la tago de miaj purigadoj, sed mi tute ne bezoni ĉikanantinojn kiuj sin meti ĉirkaŭ mi, sin meti en mian vojon, kaj enŝovi ĉiujn miajn aferojn tien kie mi ne plu povas trovi ilin.

Dinaho vere havis, en kelkfaj epokoj, siajn reformajn krizojn, kiujn ŝi nomis siajn tagojn de purigado. Ŝi tiam komencis kun granda fervoro ĝisfunde malplenigi la tirkestojn kaj ŝrankojn, disŝutante ĉion sur la plankon kaj tablojn, kvinobligante la konfuzon. Poste ŝi ekbruligis sian pipon, kaj ĝissate remaĉis siajn aranĝojn. Ŝi ekzamenis ĉiun objekton, prelegis pri ĝi, metis la tutan sengravularon por

vigle frotpurigi la kuprajn kuirilojn, kaj tenis la domon dum pluraj horoj en stato de vigla malordo, tute pravigita, laŭ ŝi, de la sciigo ke ĝi estis "tago de purigado". La aferoj ne povis tiel daŭri; kaj ŝi devis agi tiamaniere ke ĉi tiujn junulojn konservu pli bonan ordon. Ĉar Dinaho nutris la agrablan iluzion ke ŝi estas la ordo enpersonigita, kaj ke estis kulpo "de ĉi tiu junularo" kaj de ĉiuj loĝantoj de la loĝejo, se ni restis nekapablaj pri perfekteco.

Kiam la kaseroloj estis frotlavitaj, la tabloj skrapitaj kaj ellavitaj, kaj kiam ĉio kio povis ofendi la vidon, estis forpuŝita en truojn kaj kaŝanguloj, Dinaho, vestita de siaj plej belaj festtualetoj, kun blanka antaŭtuko antaŭ ŝi kaj kapvestita de brilan madrason, informis ĉiujn junajn marodulojn, ke ili devos malpermesi al si la eniron en ŝian kuirejon, kie ŝi asertis konservi ekzemplan purecon.

Ĉi tiuj periodaj krizoj havis ja siajn malavantaĝojn. Dinaho travivis malmoderan respekton por la brilo de sia kuirilaro nove frotpurigita, kaj ne povis decidiĝi riski ĝin sur la fajron, ĝis kiam la fervoro de la tago de la purigado estu iom moderigita.

En unu semajno f^{ino} Ofelio sukcesis reorganizi grandan parton de la domo. Sed tuj kiam necesis al ŝi la kunlaboron de la geservistoj, ŝiaj laboradoj fariĝis same senfruktaj kiel tiuj de Sizifo kaj la Danaidinoj. Iun tagon ŝi alvokis, en sia malespero, al Sanklaro.

- Vere ne estas rimedo ĉi tie akiri la plej malgrandan regulecon.

- Mi estas konvinkita pri tio, diris Sanklaro.

- Ĉiam per elturnaĵoj ! Freneza malŝparemo ! Malordo tiel kiel mi neniam vidis !

- Mi vetus ke, fakte, tio por vi estas novaĵo.

- Vi ne indiferente akceptus tion se vi estus la dommastrino.

- Kara kuzino mia, komprenu do unu veran fojon por ĉiam, ke ni estas dividitaj, ni mastroj, en du klasojn: la premantojn kaj la prematojn. Tiuj kiuj, kiel mi, estas bonkoraj kaj malŝatas severecon, rezignacias pri amaso da maloportunaĵoj. Se plaĉas al ni konservi en la respubliko, por nia oportuno, amason da mallertaj, pigraj, sensciaj estuloj, necesas al ni akcepti la konsekvencojn. Mi vidis, en iuj tre maloftaj kazoj, personojn dotitajn de aparta takto, akiri de siaj homoj sintenon, metodon, sen uzi rigorecon. Mi ne estas el ĉi tiuj privilegiuloj. Tial mi rezignaciis antaŭ longe por lasi la aferojn iri kiel ili iras. Mi ne volas ke la kompatindaj diabloj estu skurĝitaj kaj akre trančetitaj; ili scias tion, kaj nature misuzas siajn privilegiojn.

- Sed havi nek fiksitan horon, nek tempon, nek lokon, nek ordon; tiel lasi ĉion hazarde iri !

- Kara mia el Vermonto, vi ja denaskaj de la norda poluso, vi tro multe taksas la tempon ! Kion vi volas ke faru kun ĝi homo, kiu havas ĝin duoble pli ol li povas uzi ? Koncerne ordo kaj metodo, ne gravas horo malfrue aŭ frue por la tagmanĝo aŭ la vespermanĝo, se ni havas nenion por fari ol legi, kuŝanta sur sofo ? Nu jen Dinaho kiu faros al vi bonegan tagmanĝon, supon, raguon, rostitan kokaĵon, deserton, glaciaĵojn kaj la ceteron; ŝi kreas ĉion ĉi el la kaoso kaj la mallumo de sia kuirejo; mi miras kiam mi pripensas tion, kaj mi trovas ŝian arton admirinda. Sed, ĉielo benu nin ! Se ni devus iri en ĉi tiujn malhelajn profundojn, kaj vidi ĉion kio fumas, ĉion kio kuras, ĉion kio svarmas tien, se ni ĉeestus al kelkaj preparaj procedoj, sed ni ne plu manĝus. Kredu min, kara kuzino, evitu ĉi tiun pentofaron ! Ĝi estas malfacila kaj utila po nenio. Vi tie perdus vian bonhumoron; Dinaho freneziĝus. Lasu ŝin fari laŭ ŝia volo !

- Sed, Aŭgusteno, vi ne scias en kiu stato mi trovis la aferojn.

- Mi ! Ĉu mi ne scias ke la past-rulo kutime sin lokas sub ŝia lito, la muskata raspilo en sia tabaksaketo; ke estas sesdek kvin malsamaj sukerujoj, po unu en ĉiu angulo de la domo; ke iun tagon ŝi lavas la telerojn per buŝtuko, kaj la morgaŭon per ŝirpeco de ŝia malnova subjupo ? Ĉio ĉi ne malhelpas ŝin prepari admirindajn tagmanĝojn, fari bongustegan kafon ! Kaj necesas juĝi ŝin, kiel la militistojn kaj ŝtatistojn, laŭ ŝiaj sukcesoj.

- Sed pri la malŝparo, la elspezo, la malordo !

- Nu ! Enfermu ĉion kio povas esti enŝlosita, kaj konservu la ŝlosilon. Donu po malgranda mezuro, kaj ne informiĝu pri la restaĵoj; tio estas la plej bona.

- Tio ĉagrenas min, Aŭgusteno, mi ne povas reteni min timi ke viaj geservistoj ne estu strikte honestaj. Ĉu vi certas ke ni povu fidi ilin ?

Aŭgusteno eksplodis per malmoderaj ekridoj antaŭ la longa vizaĝo kiun faris f^ino^ Ofelio artikulaciante ĉi tiun demandon.

- Ho ! Kuzino, ĉi tio estas tro multe ! Honestaj ! Kvazaŭ tio estus esperinda afero. Honestaj ! Ne, certe ili ne estas ! Kial ili estus tiaj ? Kiu instigus ilin al tio ?

- Ĉu vi do ne povas instrui ilin ?

- Instrui ilin ! Tondro ! Kian instruon mi donus al ili ? Tio bone taŭgus al mi, cetere ! Koncerne Marta, ŝi certe havas sufiĉe da energio por mortigi ĉiujn sklavojn sur plantejo, se mi lasus ŝin fari; sed ŝi ne sukcesus ekzorci la demonon de la ruzo.

- Ĉu do ne estas honestuloj inter ili ?

- Jes; ĉi tie kaj tie, troviĝis unu kiun la naturo faris tiel simpla, tiel obstine verama kaj fidela, ke la plej malbonaj influoj ne povas difekti lin. Ekde la utero de la patrino, la neblankulido vidas kaj sentas ke nur la kaŝitaj vojoj estas malfermitaj por li. Li ne havas alian elirejon por enŝteliĝi en

la bonajn favorojn de siaj gepatroj, de sia amantino, de la juna mastro kaj de siaj kunuloj. Ruzo, mensogo fariĝas por li ordinaraj kutimoj, neeviteblaj. Estus maljusteco atendi de li aliaĵon. Ni ne devas puni lin pro tio. Koncerne la honestecon, la sklavo, duoninfano, estas tenata en tiu stato de dependeco kie preskaŭ neeblas al li kompreni la posedrajto, kaj ne konsideri la havaĵojn de sia mastro kiel siajn, tuj kiam li povas proprigi ilin al si. Pri mi, mi ne vidas kiel li povus esti honesta. Viro kiel Tomo ĉi tie estas, certe, morala miraklo !

- Kaj kio fariĝas iliaj animoj ? demandis f^ino Ofelio.

- Ĉi tio ne estas mia afero, laŭ mia scio, rekomencis Sanklaro. Mi okupiĝas nur pri la nuna vivo. Cetere estas preskaŭ akceptite ke, por nia bonstato, la tuta raso estas destinita por la diablo en ĉi tiu mondo, kio ajn povas okazi al la alia.

- Estas horore ! diris f^ino Ofelio, vi devus ruĝiĝi pro vi mem !

- Tio kelkfoje fakte okazas al mi. Sed kion vi volas ? Ni estas en tiel bona kompanio, reparolis Sanklaro, tiom da homoj sekvas la batitan vojon ! Rigardu supren, malsupren, de la komenco ĝis la fino de la universo, ĉu ne estas la sama historio ? Ĉu la malaltaj klasoj ne eluzas sin, menso, korpo kaj animo, profite al la altaj klasoj ? Tiel estas en Anglio; same estas ĉie; kaj tamen la tuta kristanaro emociiĝas kaj indignas pri tio ke ni agas kiel ĝi, kun iom da diferenco de formo.

- Ne estas tiel en la ŝtato Vermonto.

- Mi konsentas ke en Nov-Anglio kaj en la liberaj Ŝtatoj vi antaŭigas nin. Sed mi aŭdas la sonorilon de la tagmanĝo. Ni iru, kuzino, ni flankenmetu niajn respektivajn antaŭjuĝojn, kaj ni subskribu la amnestion ĉe la tablo.

Pli malfrue en la posttagmezo, f^ino Ofelio estis en la kuirejo, kiam la etaj negrulidoj kriis : "Jen vidu ! Prunjo ŝi

veni tien ! Ŝi grumbli paŝante kiel ĉiam !

Alta kaj senkarna neblankulino eniris portante sur la kapo korbon da biskvitoj kaj da varmaj bulkoj.

- Ho ! Prunjo ! Jen vi finfine ! ekkriis Dinaho.

Prunjo havis agreseman fizionomion, kaj obtuzan kaj grumbletantan voĉon. Ŝi demetis sian korbon sur la grundon, kaŭriĝis apude, kaj kun siaj kubutoj sur siaj genuoj, ŝi diris :

- Ha ! Disinjoro ! Kiel mi do voli esti morta !

- Kaj kial vi volus esti morta ? demandis f^ino Ofelio.

- Por liberiĝi de mia mizero, *rebatis la virino per malafabla tono, sen levi la okulojn de la grundo.*

- Ankaŭ, kial vi bezoni ebriiĝi, por esti poste vipata, Prunjo ? *diris eleganta kvarterona ĉambristino, svingante siajn orelringojn el koralo.*

La virino rigardis ŝin oblikve.

- Vi iam povi finfine sperti tion, vi ! Mi ĝoji vidi vin; kaj eble vi esti plenkontenta, kiel mi, drinki brandon por dronigi vian mizeron.

- Nu, Prunjo, rekomencis Dinaho; ni vidi viajn biskotojn, jen fraŭlino kiu pagi ilin al vi.

Fraŭlino Ofelio elektis du dekduojn.

- Esti kelkaj stampoj en tiu malnova rompita kruĉo, sur la tabulo tie supre, diris Dinaho. Grimpi, Ĵakvo, kaj alporti ilin.

- Stampoj ! Por kion fari ? diris f^ino Ofelio.

- Ni aĉeti la stampojn de ŝia mastro, kaj interŝanĝe ŝi doni al ni panon.

- Kaj li kalkuli la monon kaj la stampojn kiam mi reveni, kaj se la konto ne esti, li draŝi min ĝis mortigi min !

- Li trakti vin kiel vi meriti tion, diris Jane, la pranca ĉambristino, ĉar vi preni lian monon por iri drinki. Tio esti tio kion ŝi konstante fari, fraŭlino.

- Kaj esti tio kion mi ankoraŭ fari. Mi ne kapabli vivi

alimaniere. Mi voli drinki, kaj forgesi mian mizeron.

- Estas stultege, kaj malbonege de vi, ŝteli la monon de via mastro por brutigi vin, diris f^ino Ofelio.

- Eble esti malbone, 'njorino, sed mi ankoraŭ fari tion, mi ĉiam fari tion. Ho Disinjoro ! Kiel do mi voli esti morta ! Jes, morta, kaj esti fininta ! *La maljuna estulino malrapide restariĝis tute rigide, kaj reŝargis sian korbon sur sian kapon; sed antaŭ ol eliri, ŝi rigardis la beletan kvarteroninon kiu daŭrigis svingi siajn orelringojn.*

- Jen vi tre fanfarona, vi, kun viaj pendaĵoj, kaj vi afekti gravan mienon; vi rigardi la kompatindan mondon de supre malsupren ! Nu, atendi; vi eble vivi sufiĉe longe por esti kompatinda malnova dispecigigita skeleto kiel mi. Disinjoro ankaŭ doni al vi vian konton, mi esperi, kaj ni vidi ĉu vi ne ekdrinki, drinki, drinki ĝis la infero ! Tio esti bone farita, ja ! *Kaj eligante malaman kriegon, ŝi eliris.*

- La fia maljuna besto ! diris Adolfo kiu venis serĉi varman akvon por la sinlavado de Sanklaro. Se mi esti ŝia mastro, mi vipi ŝin ankoraŭ pli vigle.

- Ha ! Pri tio, mi defii vin, rekomencis Dinaho. Ŝia dorso esti nur vundo, ŝi ne povi nur laĉi siajn vestaĉojn.

- Vere, oni ne devi sendi tiajn estulinojn al taŭgaj domoj, diris f^ino Jane. Kion vi pensi, sinjoro Sanklaro ? ŝi aldonis koketante al Adolfo.

Inter aliaj uzurpoj de la posedaĵo de sia mastro, Adolfo proprigis al si liajn nomon kaj adreson. En la rondoj de neblankuloj de Nov-Orleano, oni nur nomis lin sinjoro Sanklaro.

- Mi tute samopinii kiel vi, fraŭlino Benigra. *Benigra estis la familinomo de sinjorino Sanklaro, kaj Jane estis ŝia ĉambristino.*

- Ĉu mi povi demandi al vi, fraŭlino Benigra, ĉu ĉi tiuj orelringoj devi aperi dum la morgaŭa balo ? Ili esti ravaj,

honestan parolon !

- Mi vere ne scias, sinjoro Sanklaro, kie finiĝi la senhonteco de vi ja, viroj ! *diris Jane skuante sian beletan kapon por flagretigi siajn orelpendaĵojn.* Mi ne danci kun vi dum la tuta vespero, se vi fari al mi plian demandon.

- Ha ! Vi ne esti tiel kruela ! Mi morti pro envio, daŭrigis Adolfo, scii ĉu vi surmeti vian beletan robon el roza muslino.

- Kio esti ? diris Roza, malgranda kvarteronino el la plej petolaj, kiu facilmove malsupreniris la ŝtuparon.

- Esti s^ro^ Sanklaro kiu montri senhontecon !

- Je mia honoro, diris Adolfo, ke f^ino^ Roza prijuĝi.

- Mi scii ke li esti neeltenebla, *diris Roza balanciĝante sur unu el siaj etaj piedoj, kaj ĵetante petolan rigardon al Adolfo*, li senĉese kolerigi min kontraŭ li.

- Ho ! Sinjorinoj, sinjorinoj, vi ambaŭ fine rompi mian koron ! Oni trovi min morta en mia lito iun el ĉi tiuj matenoj, kaj vi respondeci pri tio !

- Ĉu vi aŭdi lin, la malmodestulon ! ekkriis la du sinjorinoj kun malmoderaj rideksplodoj.

- Nu, liberigi min de vi, interrompis Dinaho. Mi ne voli havi vin por rukuli en mia kuirejo, kaj por pavi sur mia vojo.

- Onklino Dinaho esti furioza pro ne povi iri al la balo ! diris Roza.

- Mi multege fajfi pri viaj koloraj baloj, rekomencis Dinaho, vi vane fari mienon kaj simii la blankulojn, vi estas nur negroj, nek pli nek malpli ol mi.

- Onklino Dinaho ĉiutage grasi sian lanon por glatigi ĝin, diris Jane.

- Kaj finfine ĝi ankoraŭ esti lano, *diris malicete Roza, skuante sian longan kaj silkan hararon.*

- Nu, ĉu, laŭ la okuloj de la bona Dio, lano ne valori haregon ? Mi ŝati ke mastrino iom diri tion kio alporti al ŝi la

plej bonan profiton de paro da maldiligentulinoj kiel vi, aŭ de laborantino kiel mi ! Nu, ekster ĉi tie, sentaŭguloj ! Mi ne voli vin por ĉirkaŭvagi ĉi tie !

La konversacio estis interrompita de duobla incidento. Sanklaro alvokis Adolfo^{n} de la supro de la ŝtuparo, kaj demandis al li ĉu li intencis atendigi lin dum la tuta nokto la varman akvon por lia barbo ? Kaj f^{ino} Ofelio, elirante el la manĝoĉambro, diris al la ĉambristinoj :

- Jane kaj Roza, kial tiel perdi vian tempon ? Iru al via laboro.

Nia amiko Tomo, kiu troviĝis en la kuirejo dum la konversacio kun la maljuna panportistino, sekvis ŝin sur la straton. Li vidis ŝin paŝi, eligante de tempo al tempo obtuzan ĝemon. Fine, ŝi demetis sian ŝarĝon ĉe la sojlo de pordo, kaj retiris ĉirkaŭ siajn ŝultrojn la velkintan malnovan ŝalon kiu apenaŭ kovris ilin.

- Mi porti vian korbon laŭ vojireto, diris Tomo kompateme.

- Por kion fari ? diris la virino. Mi ne peti al vi helpi min.

- Vi ŝajni malsana ?… Vi ŝajni suferanta ? Certege vi havi ion ! diris Tomo.

- Mi tute ne esti malsana, rebatis abrupte la virino.

- Ho ! Se mi povi, diris Tomo, se mi nur povi instigi vin ne drinki ! *Kaj li zorgoplene rigardis ŝin*. Ĉu vi ne scii ke ĉi tio esti la pereo de animo kaj de la korpo ?

- Mi cetere scii ke mi iri al la infero, diris amare la virino. Vi ne bezoni diri tion al mi ! Mi esti malbela, mi esti maljuna, mi esti malafabla ! Mi tute rekte iri al infero. Ho ! Disinjoro ! Mi ŝati jam esti tie !

Tomo ektremis pro ĉi tiuj teruraj paroloj kaj pro ilia tono de vero.

- Disinjoro korfavori vin, kompatinda estulino ! Ĉu do

oni neniam paroli al vi pri Jesuo Kristo ?

- Jesuo Kristo, kiu tio esti ?

- He ! Sed Li esti la Disinjoro.

- Mi fakte kredi esti aŭdinta ilin diri ion pri Disinjoro, pri la juĝado kaj la infero ! Jes, mi aŭdi tion.

- Neniu iam diri al vi kiel Sinjoro Jesuo ami nin, kompatindajn pekulojn ! Kiel li mortis por ni ?

- Ne; mi nenion scii pri tio tute, rebatis la virino. Neniu iam ami min de kiam mia maljunulo mortis.

- De kie vi estas ? demandis Tomo.

- De tie supre, de Kentukio. Mi esti al viro kiu igi min eduki miajn infanojn por la merkato, kaj kiuj vendi ilin laŭmezure kiam ili esti demamigitaj; kaj laste li ankaŭ vendi min, mi ja, al spekulanto, de kiu mia mastro elaĉeti min.

- Kiu sekcesi instigi vin drinki ?

- La mizero ! Mi havi infanon de kiam mi veni ĉi tien, kaj mi kredi ke oni lasi lin kun mi, ĉar la mastro ne komercaĉi ilin. Li ja esti la plej dolĉa eta kreitaĵo ! Mastrino unue esti kiel freneza de li. Neniam li plori ! Tiel pufvanga, tiel vivema ! Sed mastrino ekmalsaniĝi; mi flegi ŝin. Mi esti trafita de la febro; mia lakto ĉesi kaj la infano malfortiĝi, ĉar mastrino ne voli aĉetigi por li lakton. Mi vane diri ke ne resti al mi iun guton, ŝi ne aŭskulti min ! Aŭ ŝi diri ke mi povi ja nutri la infanon per tio kion ĉiuj manĝi. Kaj la kompatinda eta ŝafido fariĝi malgrasega ĝis timigi ! Li havi nur haŭton kaj ostojn ! Li eligi nur ĝemojn nokte kiel tage. Tio tedi mastrinon kiu koleri. Ŝi diri ke mi trodorloti lin, ke ŝi voli vidi lin krevanta ! Ŝi malpermesi al mi teni lin apud mi, ĉar li maldormigi min, kaj la morgaŭon mi esti bona por nenio. Ŝi kuŝigi min en sia ĉambro; necesi al mi elporti mian kompatindan etulon en subtegmenton, kie li laŭtege plori kaj krii dum la tuta nokto ! Kaj li morti. Mi komenci drinki por elpeli lian krion el miaj oreloj. Mi drinki kaj drinki ! Eĉ se tio konduki min rekte al

infero ! Mastro diri ke mi iri al infero ! Mi diri ke mi jam esti tie !

- Ho ! Kompatinda kara estulino ! Pensi ke neniu iam diri al vi ke Sinjoro Jesuo ami vin, ke li morti por vi ! Ĉu oni ne diri al vi ke li veni al via helpo, ke vi fine povi iri al ĉielo kaj tie ripozi ?

- Mi ! Ke mi bonŝanci iri al ĉielo ! diris la virino, ĉu ne esti tie kien iri la blankuloj ? Ni supozi ke ili denove rekapti min tie supre ! Mi pli bone ŝati iri al infero kaj liberiĝi de mastroj kaj de mastrinoj ! Jes, mi pli bone ŝati tion ! *ŝi diris, kaj reŝarĝante sian korbon sur sian kapon kun sia kutima ĝemo, ŝi foriris*.

Tomo malgaje reiris sur la hejmvojon. En la korto li renkontis etan Eva^{n}, kun girlando da tuberosoj sur la kapo kaj la okulojn radiantajn pro ĝojo.

- Ho Tomo ! Jen vi ! Mi ĝojas esti trovanta vin ! Paĉjo volas ke vi tuj jungu la poneojn, por ke vi promenigu min en mia malgranda nova veturilo, ŝi diris. Sed kio estas, Tomo ? Vi aspektas tiel serioza !

- Mi ne esti maltrankvila, fraŭlino Evnjo, diris Tomo. Tamen mi tuj jungi la ĉevalojn.

- Diru al mi, Tomo, kio okazas ? Mi vidis vin longtempe babili kun tiu maljuna grumblema Prunjo.

Tomo rakontis la historion de la virino al Evnjo, per sia simpla kaj naiva lingvaĵo.

Ŝi ne kontestis, ne miris, tute ne ploris, kiel farus aliaj infanoj. Ŝiaj vangoj paliĝis, kaj profunda ombro vualis la brilon de ŝiaj okuloj. Ŝi apogis siajn ambaŭ manojn sur sia brusto, kaj dolore suspiris.

20. Daŭrigo de la Spertoj kaj Opinioj de fraŭlino Ofelio.

- Tomo, ne utilas meti la ĉevalojn, mi ne eliros.

- Kial, fraŭlino Evnjo ?

- Ĉi tiuj aferoj eniras en mian koron, Tomo, diris Evnjo; ili eniris en ĝi tiel profunde ! ŝi serioze ripetis. Ne, mi ne eliros. *Kaj forlasante Tomo", ŝi reiris en la domon.*

Malmulte da tagoj poste, alia virino venis anstataŭ Prunjo por alporti biskotojn. F^ino^ Ofelio estis en la kuirejo.

- He Disinjoro ! ekkriis Dinaho, kion do Prunjo trafiĝi ?

- Prunjo ne plu reveni, diris mistere la virino.

- Kial ? demandis Dinaho; ĉu ŝi ne mortis ?

- Ni ne scias precize. Ŝi estas sube en la kelo, *rebatis la virino ĵetante ekrigardon direkte al f^ino^ Ofelio.*

Ĉi tiu elektis la biskotojn, kaj Dinaho sekvis eksteren la portistinon.

- Kio do okazi al Prunjo ?

La virino, kiu ŝajnis heziti inter la deziro paroli kaj certa timo, mallaŭte respondis :

- Nu ! Vi diri tion al neniu, Prunjo denove ebriiĝi. Ili malsuprenigi ŝin en la kelon; ili lasi ŝin tie la tutan tagon, kaj mi aŭdi ilin diri ke la muŝoj ataki ŝin, kaj ŝi esti morta !

Dinaho levis la manojn al la ĉielo. Ŝi turniĝis, kaj ekvidis ĉe siaj flankoj la puran vizaĝon de Evangelina. Ŝiaj grandaj mistikaj okuloj estis dilatitaj pro hororo, kaj la sango estis forlasinta ŝiajn vangojn kaj ŝiajn lipojn.

- Dio beni nin ! Fraŭlino Evnjo esti malsana ! Pri kio mi pensi lasinte ŝin aŭdi tion ! Ŝia paĉjo tuj esti kiel freneza !

- Mi ne sentos min malbone, firme diris la infano. Kaj kial mi ne aŭdus tion ? Aŭdi tion ne estas tiel dolore por mi

kiel por la kompatinda Prunjo suferi tion.

- Sinjoro bona Dio ! Tiaj rakontoj ne esti faritaj por afablaj kaj delikataj fraŭlinoj kiel vi ! Esti sufiĉe por mortigi ilin !

Evnjo suspiris kaj resupreniris la ŝtuparon per malrapidaj paŝoj. F^ino Ofelio informiĝis pri tio kio okazis. Dinaho rakontis tion al ŝi laŭ sia malkonciza maniero, kaj Tomo aldonis tion kion li eksciis pri la malfeliĉa virino la matenon kiam li sekvis ŝin.

- Tio estas abomena, horora afero ! ŝi ekkriis kiam ŝi eniris en la salonon kie Sanklaro legis la gazeton.

- Kiu nova maljustaĵo denove estas sub la suno ? li demandis.

- Kiu maljustaĵo ?... Ĉi tiuj mizeruloj mortigis Prunjo^n sub la vipo ! *Kaj ŝi vigle komencis la rakonton, emfazante la detalojn.*

- Mi pensis ke tio tiel finiĝus iun tagon aŭ la alian, diris Sanklaro daŭrigante legi sian gazeton,

- Vi pensis tion !... Kaj ĉu vi ne faros ion ? Ĉu ne estas justicoficistoj kiuj povu interveni, ekenketi ?

- Oni ĝenerale supozas ke la intereso de la posedanto estas sufiĉa garantio por la posedaĵo. Se plaĉas al homoj sin ruinigi, mi ne tro scias kion fari pri tio. Ŝajnas ke la kompatinda estulino ebriiĝis kaj ŝtelis, tio kio ne kunhelpos vigligi la simpatiojn favore al ŝi.

- Sed tio estas senhonora ! Tio estas abomena, Aŭgusteno ! Tio krias al venĝo kontraŭ vi !

- Kara kuzino mia, en ĝi, mi estas por nenio, kaj mi povas nenion. La afero dependintus de mi, mi malebligus ĝin. Se limigitaj kaj brutalaj homoj sekvas siajn krudajn instinktojn, kion vi volas ke mi faru pri tio ? Ili havas absolutan potencon, ili estas nerespondecaj despotoj. Por kio utilus interveni ? Ne ekzistas leĝoj aplikeblaj al tiaj kazoj. Pli

bone do estas fermi la okulojn kaj orelojn, kaj lasi pasi. Estas la solsola rimedo kiu restas al ni.

- Kiel vi povas fermi viajn okulojn kaj viajn orelojn ? Kiel vi kapablas lasi tiajn aferojn pasi !

- Kara infano mia, kiel pli bone esperi ? Jen tuta klaso malnobla, malklera, nature maldiligenta, transdonita sen kontrakto aŭ kondiĉoj, inter la manojn de tiuj el kiuj la plimulto de nia mondo konsistas, homoj mamulte skrupulaj, sen ia ajn kutimo sin regi, kiuj eĉ ne estas klerigitaj pri siaj propraj interesoj, kaj tio estas la kazo de la pli granda duono de la homa specio. En tiel organizita respubliko, kion povas fari homo de honoro, krom fermi la okulojn tiel forte kiel li kapablas kaj kirasi al si la koron ? Mi ne povas aĉeti ĉiun kompatindan mizerulon kiun mi renkontas. Mi ne povas agi kiel migra kavaliro, kaj komenci ripari ĉiun individuan damaĝon en urbo kial ĉi tiu. Ĉio kion mi povas, estas teni min for de tio.

La bela vizaĝo de Sanklaro malheliĝis dum momento. Li aspektis afliktita, sed preskaŭ tuj vidigante gajan rideton, li diris :

- Nu, kuzino, ne restu stare tie kiel unu el la malcedemaj Parcoj. Vi nur almetis vian okulon ĉe la truo de la kurteno, nur videtis tion kio okazas, laŭ iu formo aŭ alia, en la tuta mondo. Se ni volus esplori ĉiujn veaspektajn profundojn de la vivo, ni ne plu havus koron por io ajn. Mi jam diris tion al vi, tio estas same danĝera kiel atentege ekzameni la misterojn de la kuirejo de Dinaho. *Sanklaro ekkliniĝis malantaŭen sur la sofo, kaj reabsorbiĝis en sian ĵurnalon.*

F^ino^ Ofelio sidiĝis, eltiris sian trikaĵon kaj komencis triki kun vervo de la indigno. Ŝi silentis, sed la fajro subbrulis interne; fine ĝi eksplodis :

- Mi diras al vi, Aŭgusteno, ke se vi povas rezignacii pri

similaj aferoj, mi ja ne kapablas. Estas abomene de vi defendi tian sistemon ! Jen mia opinio.

- Kio ? diris Sanklaro, levante la okulojn. Denove !...

- Mi ripetas ke tio estas tute abomena de vi defendi tian sistemon ! ekkriis f^ino Ofelio kun kreskanta varmo.

- Mi, defendi ĝin ! Kiu iam diris ke mi defendis ĝin ?

- Certe, vi defendas ĝin, vi ĉiuj, vi la suduloj ! Alie kial vi havus sklavojn ?

- Ĉu vi estas sufiĉe naiva, kara kuzino mia, por supozi ke neniu en ĉi tiu mondo faras tion kion li opinias prava ? Ĉu vi mem neniam faris ion, neniam faras ion kiu devojiĝas de la rekta linio ?

- Se tio okazas al mi, mi pentas pri tio, mi esperas, *diris f^ino Ofelio energie movante siajn trikilojn.*

- Ankaŭ mi, *reparolis Sanklaro senŝeligante oranĝon;* mi pasigas mian vivon pripenti.

- Kial do vi daŭrigas ?

- Ĉu vi neniam daŭrigis malbonfari, post esti pentinta, bona kuzino mia ?

- Eble; kiam la tento estis tre forta, diris f^ino Ofelio.

- Nu ! Ankaŭ por mi la tento estas forta, rekomencis Sanklaro. Estas tie kie troviĝas la malfacileco.

- Sed, almenaŭ, mi estas ĉiam rezoluta rompi kun malbono, kaj mi provas fari tion.

- Mi prenis la saman decidon pli ol centfoje ekde dek jaroj; sed mi ne scias kiel tio okazas, mi ne progresis plu. Ĉu vi ja forĵetis ĉiujn viajn pekojn, kuzino ?

- Kuzo Aŭgusteno, *serioze diris f^ino Ofelio interrompante sian trikadon*, vi sendube pravas malaprobante miajn erarojn. Mi scias ke ĉio kion vi diras, estas vera, neniu sentas tion pli ol mi; sed tamen ŝajnas al mi ke ekzistas kelka diferenco inter ni. Mi pensas ke mi fortrançus mian dekstran manon plivole ol daŭrigi fari tagon post tago tion

kion mi opinias malbona. Mia konduto, tio estas vera, ne ĉiam kongruas kun mia kredkonfeso, kaj tial mi meritas vian mallaŭdon.

- Nun, kuzino, *diris Aŭgusteno sidiĝante sur la pargeton kaj apogante sian kapon sur la genuojn de f^ino Ofelio*, ne montru tiom da soleneco ! Vi scias ke mi ĉiam estis impertinenta knabo, vera sentaŭgulo, mi ŝatas inciteti vin, jen ĉio, por vidi vin iomete koleran. Mi kredas vin perfektan, kun malesperiga bonkoreco ! Nur pensi pri tio nervozigas min, preskaŭ mortigas min !

- Sed temas pri serioza afero, kara infano mia, Aŭgusteno mia, *reparolis f^ino Ofelio metante sian manon sur la frunton de la junulo*.

- Diru timiga ! Kaj mi neniam povas serioze paroli kiam varmas. Kun la moskitoj kaj la ceteraj, ne eblas ekflugi al la sublimaj altaĵoj de la moralo. Sed, mi pensas tion, *diris Sanklaro subite restariĝante*, jen tute evidenta teorio ! Mi nun komprenas kial la popoloj de Nordo estas pli virtaj ol tiuj de Sudo, mi komprenas la kaŭzojn kaj la efikojn.

- Ho ! Aŭgusteno, vi estas vera sencerbulo !

- Ĉu mi estas tia ? Nu, mi akceptas tion. Sed mi esceptokaze volas esti serioza; transdonu al mi ĉi tiun korbon da oranĝoj. Se mi faras ĉi tiun penon, estu preta "revigligi al mi la koron per vino, kaj konsoli min per pomoj"[24]. Nun, *diris Aŭgusteno tirante al li la korbon*, mi komencas : Kiam, tra la homaj eventoj, iu homo juĝas necesan teni kaptitajn du aŭ tri dekduojn de siaj proksimuloj, lumbrikoj kiel li, deca respekto al la antaŭjuĝoj de la socio postulas…

- Mi ne vidas ke vi fariĝas pli serioza, diris f^ino Ofelio.

- Atendu ! Mi alvenas en ĝin. Vi tuj aŭdos. Mi agnoskas, kuzino, *li diris kun sia bela vizaĝo subite mienanta*

24 Inspirita de la Alta kanto de Salomono (ĉapitro 2/versiklo 5).

seriozan kaj penseman esprimon, ke pri ĉi tiu abstrakta temo de la sklaveco, povas esti, laŭ mi, nur unu opinio. La plantistoj kiuj tiras profiton el tio, la klerikoj kiuj volas plaĉi al plantistoj, la politikistoj kiuj utiligas tion por regi, povas tordi la lingvon kaj fleksi la moralon ĝis grado kiu mirigos la mondon. Ili kapablas varbi ĉe sia servado la naturon, la Biblion, kaj kiu scias ankoraŭ kion ! Sed finfine nek ili nek la mondo kredas silabon el tio. Resume, la afero venas de la diablo; kaj miaopinie, tio estas sufiĉe beleta montro de tio kion li kapablas fari.

F^ino^ Ofelio ĉesis triki kaj tute surprizite rigardis lin. Sanklaro ŝajnis ĝui sian miron.

- Vi larĝe malfermas la okulojn ! Ĉar vi venigis min al ĉi tiun temon, mi iros ĝisfunden. Ĉi tiu malbenita institucio, malbenita de Dio, malbenita de homoj, kiu ĝi estas ? Senigu ĝin de ĉiuj ĝiaj ornamaĵoj, penetru ĝis la radiko, kaj en la koro, kion vi trovas tie ? Ĉar mia frato Kuaŝo[25] estas senscia kaj malforta, kaj ke mi estas inteligenta kaj forta, ĉar mi scias kiel elturniĝi, kaj ke mi povas tion, eblas al mi ŝteli de li ĉion kion li havas, konservi lin, kaj doni al li nur tion kio konvenas al mi. Tio kio estas tro peniga, tro malpura, tro malplaĉa por mi, plenrajte estos la laboro de la Kuaŝo. Ĉar mi ne ŝatas labori, la Kuaŝo laboros; ĉar la suno bruligas min, la Kuaŝo suferos la varmegon de la suno. La Kuaŝo perlaboros la monon, mi elspezos ĝin. La Kuaŝo kuŝos en la marĉetoj de la vojo, por ke mi sekpiede transpasu. La Kuaŝo plenumos mian volon, ne lian, ĉiujn tagojn de sia vivo, kun la ŝanco fine meriti la ĉielon, se mi opinios lin taŭga. Jen resume, ĉio kio estas la sklaveco. Mi defias kiun ajn legi nian sklavkodon, tiel kiel ĝi ekzistas en niaj leĝlibroj, kaj eltiri el ĝi ion alian. Oni parolas pri eksceso de la sklaveco ! Blago.

25 Moknomo donita al nigrulo, kiu devenas de la angla verbo *quash*, kiu povas signifi disbati, silentigi, suferigi. Kuaŝo estas do la nigra ŝafo, la propeka kapro, la viktimo.

La afero mem estas la esenco de ĉiu eksceso. Kaj se la tero ne enprofundiĝas sub ni, kiel Sodomo kaj Gomoro, tio estas ĉar ni ankoraŭ uzas ĝin diskrete. Duone pro kompato, duone pro honto, ĉar ni estas homoj naskitaj de virinoj, kaj ne de sovaĝaj bestoj. La plejmulto el ni ne uzas, ne kuraĝas uzi la teruran potencon kiun niaj senkompataj leĝoj metas inter niaj manoj. Tiu kiu iras plej for, tiu kiu faras la plej malbonan, eĉ restas en la limoj kiujn la leĝo atribuas al li.

Sanklaro stariĝis, kaj cedante al sia ekzaltiĝo, li paŝis per hastaj paŝadoj. Lia bela vizaĝo, el greka pureco de trajto, brulis per la fajro de indigno. Liaj grandaj bluaj okuloj flagris, kaj liaj gestoj pasiiĝis sen lia scio. F^ino^ Ofelio neniam vidis lin tiel; ŝi silente kontemplis lin.

- Mi deklaras al vi, li diris subite haltanta antaŭ sia kuzino *(sed ne utilas paroli aŭ senti pri ĉi tiu temo),* mi deklaras al vi ke estis momentoj kiam mi pensis ke, se la lando estus englutita kun ĉiuj siaj maljustaĵoj kaj ĉiuj siaj mizeraĵoj, mi volonte malaperus kun ĝi. Kiam, dum miaj rondvizitadoj de proprietulo, dum miaj vojaĝoj sur la riveregoj sur niaj boatoj, mi renkontis kelkan malnoblan, fian bruton, malindan je la nomo de homo, kaj ke mi diris al mi : "Niaj leĝoj permesas al li fariĝi absoluta despoto de tiom da homaj estuloj kiom li povas aĉeti per la mono de la ŝtelo, de la fraŭdo aŭ de la ludo". Kiam mi vidis tiajn estulojn en suverena posedo de malfortaj infanoj, de junaj knabinoj, de virinoj, mi estis tentita malbeni mian landon, malbeni mian genton !

- Aŭgusteno ! Aŭgusteno ! Vi sufiĉe diris, certe. En mia vivo mi aŭdis nenion similan, eĉ en la Nordo.

- En la Nordo, *diris Sanklaro subite ŝanganta sian mienon kaj reakirante sian kutiman senzorgan tonon.* Pu ! Viaj nordanoj havas frostan sangon. Vi estas malvarma pri ĉio. Vi ne povas decidiĝi iele trapele malbeni kiel ni, tuj kiam

ni komencas tion.

- Sed, reparolis f^ino Ofelio, la demando estas…

- Jes, certe, la demando estas, kaj ĝi estas diabla demando, Kiel vi venis en ĉi tiu stato de peko kaj mizero ? Nu, mi respondos al vi per la bonaj malnovaj paroloj kiujn vi dimanĉe kutimis instrui al mi : "Mi venis al tio per la originala peko". Miaj sklavoj estis tiuj de mia patro, kaj krome de mia patrino. Nun ili estas miaj, ili kaj ilia idaro, kiu ne ĉesas esti sufiĉe konsiderinda kvanto. Mia patro, vi scias tion, alvenis de Nordo. Li estis ĝuste el la sama harditeco kiel la via, maljuna romano, energia, lojala, dotita de nobla animo kaj de ŝtala volo. Via patro loĝis en Nov-Anglio por regi super rokoj, ŝtonoj, kaj devigi la naturon zorgi pri lia ekzisto. La mia loĝis en Luiziano por regi super viroj, virinoj, kaj devigi ilin zorgi pri lia vivo.

- Mia patrino, *daŭrigis Sanklaro ekstaranta kaj haltanta ĉe la alia fino de la ĉambro antaŭ portreto kiun li kontemplis kun fervora respektego*, mia patrino estis dia ! Ne rigardu min tiel ! Vi scias tion kion mi volas diri. Ŝi povis esti el morta raso, sed neniam mi povis malkovri en ŝi spuron de homa malforteco aŭ eraro. Kaj ĉiuj kiuj rememoras ŝin, gesklavoj aŭ liberaj homoj, geservistoj aŭ geamikoj, same diras pri ŝi. Nu, kuzino, ekde jaroj ĉi tiu patrino staris sola inter mi kaj la abismo de kompleta nekredemo. Ŝi estis enkorpiĝo de la Evangelio; viva pruvo de ĝia vereco, neklarigebla kaj neklarigita estulino, alie ol per fido. Ho patrino ! Patrino ! *diris Sanklaro kunigante la manojn kun ekzaltiĝo, poste bremsante sian emocion, li revenis sidiĝi sur la otomano kaj daŭrigis* :

- Ni estis ĝemeloj, mia frato kaj mi. Oni asertas ke la ĝemeloj devas simili, ni ja absolute malsimilis. Li havis nigrajn kaj ardajn okulojn, ebonajn harojn, tre distingan romian profilon, brunan kaj firman vizaĝkoloron. Mi havis

bluajn okulojn, blondajn harojn, grekan silueton, blankan kaj delikatan vizaĝkoloron. Li estis vigla kaj observema; mi estis revema kaj maldiligenta. Malavara al siaj amikoj kaj egaluloj, li estis orgojla, regema, aroganta al la malaltranguloj, kaj tute senkompata rilate al ĉio kio kontraŭstaris al li. Ni ambaŭ respektis la veron; li, pro aroganteco kaj kuraĝo; mi, pro amo de idealo. Ni amis unu la alian kiel knaboj amas unu la alian, kaprice kaj eklipse. Li estis la favorato de mia patro; mi estis tiu de mia patrino.

- Mi havis pri ĉiuj eblaj temoj ekscesan sentemon, intensecon de sentoj kiun mia patro kaj mia frato eĉ ne iom komprenis, kaj kun kiun ili ne povis simpatii. Estis alie kun mia patrino. Kiam mi kverelis kun Alfredo, kaj ke mia patro rigardis min per severa okulo, mi kutimis iri trovi ŝin en ŝian ĉambron, kaj sidiĝi apud ŝi. Mi memoras ŝian sintenon, ŝiajn palajn vangojn, ŝiajn profundajn, mildajn kaj seriozajn okulojn, ŝiajn blankajn vestaĵojn, ŝi ĉiam surhavis blankaĵon, kaj mi pensis pri ŝi kiam mi legis, en Apokalipso, la priskribon de la sanktuloj vestitaj de roboj el fajna linaĵo el brila blankeco. Ŝi havis genion pri multaj aferoj, sed precipe pri muziko. Ofte sidanta antaŭ sia orgeno, ŝi ludis la belajn kaj majestajn ariojn de la katolika eklezio. Ŝi kantis ilin per sia anĝela voĉo, kaj mi apogis mian kapon sur ŝiajn genuojn, mi ploris, mi sentis, mi revis, sen limo aŭ mezuro, aferojn pri kiuj mi tute ne havis vortojn.

- En tiuj tagoj, ĉi tiu demando pri sklaveco neniam estis metita, diskutita, kiel nun. Neniu vidis en ĝi malbonon.

- Mia patro naskiĝis aristokrato. Mi imagas ke, en iu ajn antaŭekzisto, li okupis altan rangon inter la spiritoj kiuj konsistigas la ĉielan hierarkion, kaj ke li gardis la orgojlon de ĝi; tiom ĉi tiu kora orgojlo estis denaska kaj enkorpigita en li, kvankam li origine estis el malriĉa kaj tute ne nobla familio. Mia frato estis kreita laŭ lia bildo.

- Nu, aristokrato, kiel vi scias, havas en la tuta mondo neniun homan simpation preter certa socia limo. En Anglio, ĉi tiu limo haltas ĉe certa punkto; en la Birma Imperio ĉe iu alia; en Ameriko, ĉe ankoraŭ alia; sed la aristokrato de ĉi tiuj diversaj landoj neniam transiras ĝin. Tio kio estus eksceso, suferego, maljusteco en sia propra klaso fariĝas en alia malvarma neceso. La limlinio de mia patro estis la koloro. Neniam estis pli justa, pli malavara homo inter siaj egaluloj; sed li konsideris la nigrulon, tra ĉiuj eblaj gradoj de koloro, kiel interan ligon inter homo kaj bruto, kaj bazis sur ĉi tiu hipotezo ĉiujn siajn ideojn pri justeco kaj malavareco. Mi supozas ke se oni estus abrupte demandita al li : "Ĉu vi kredas ke tiuj homoj havas senmortajn animojn ?" Li fine estus, post kelkaj "Hm ! Ha !" respondanta : "Jes". Sed mia patro ne estis viro multe maltrankviliĝanta pro spiritualismo. Ĉiuj liaj religiaj sentoj kontentiĝis respektegi Dio^{n}, kiel la superegan kaj akceptitan estron de la altaj klasoj.

- Mia patro laborigis ĉirkaŭ kvincent nigrulojn. Li estis malindulga, postulema, ĉikanema pri la aferoj. Ĉio devis funkcii per sistemo, kun rigora precizeco. Nun, se vi kalkulas kun tio ke ĉi tiun matematikan precizecon estis postulita de bando da maldiligentaj, rabemaj, malordemaj sklavoj kiuj, en sia vivo, havis kiel stimulo nur la deziron eviti laboron kaj "ŝteli la tempon", kiel vi ja homoj de Vermonto diras, vi komprenos ke devis okazi sur la plantejo multaj aferoj el la plej teruraj kaj el la plej dolorigaj por sentema infano kiel mi.

- Plie estis laborestro, granda, senkarna, provizita de du fortikaj pugnoj, renegato de la ŝtato Vermonto (pardonu, kara kuzino), kiu post esti farinta regulan lernoservon pri hardado kaj brutaleco, plibonigis siajn konojn en la praktiko. Mia patrino neniam kapablis elporti lin, kaj mi ankaŭ ne. Sed li havis sur mia patro grandegan influon, kaj ĉi tiu viro estis

la absoluta despoto de la bieno.

- Mi tiam estis eta knabo; mi havis la saman amon kiun mi ankoraŭ havas por ĉiuj homaj aĵoj, speco de pasio por la studo de la homaro, laŭ iu ajn formo. Mi vizitadis la kabanojn, mi enŝoviĝis en la kultivaĵojn, inter la laboristoj, el kiuj mi nature estis la plej ŝatata. Ĉiaj plendoj, riproĉoj alvenis al miaj oreloj. Mi raportis ilin al mia patrino, kaj ni ambaŭ formis specon de komitato por la riparo de la damaĝoj. Ni malebligis kaj subpremis multajn kruelecojn, kaj ni ĝojis esti farinta tiom da bono kiam, kiel ofte okazas, mia fervoro transpasis la limojn. Stubo plendis ne plu povi regi super la sklavoj, kaj minacis rezigni sian postenon. Kvankam tenera kaj indulga edzo, mia patro neniam cedis antaŭ tio kion li opiniis necesa. Li metis sian piedon, kiel rokon, inter ni kaj la kampolaboristoj. Li sciigis al mia patrino, per perfekte respektoplena sed tre pozitiva lingvaĵo, ke ŝi estis entute mastrino de la internaj geservistoj, sed ke ŝi ne devis enmiksiĝi kun tiuj eksteraj. Li respektis ŝin pli ol iu ajn vivanta estulo; sed li dirintus la samon al la Virgulino Maria, se ŝi malhelpintus lian sistemon.

- Mi kelkfoje aŭdis mian patrinon rezoni kun li, kaj klopodi veki liajn simpatiojn. Li aŭskultis ŝiajn plej kortuŝajn vokojn kun malesperiga ĝentileco. "*Ĉio finiĝas per ĉi tio, li diris, ĉu mi devas maldungi Stubo*[n] *aŭ gardi lin ? Stubo estas la akurateco, la honesteco mem, iu esenca aferisto, kaj tiel humana kiel la plejmulto da homoj. Ni ne povas havi la perfektecon; se mi konservas lin, mi devas entute konservi lian administradon, eĉ se okazus de tempo al tempo esceptaj aferoj. Ĉiu registaro implicas necesan severecon. Oni ne povas juĝi la ĝeneralajn regulojn surbaze de apartaj kazoj*". Mia patro ŝajnis konsideri ĉi tiun lastan maksimon kiel suverenan decidon pri krueleco. Post esti eldirinta ĝin, li kutime kuŝiĝis sur la sofo, kiel homo kiu finis la aferojn, kaj

kiu pretiĝis por dormeti aŭ legi la ĵurnalon, laŭ la okazo.

- Mia patro fakte havis alvokiĝon por esti ŝtatisto. Li estus dividinta Pollando[n] tiel facile kiel oranĝon, aŭ sisteme dispreminta kompatindan Irlando[n], sen la plej eta skrupulo. Fine mia patrino cedis, pro manko de ebleco. Ni scios nur en la tago de la Lasta Juĝo, tion kiun noblaj kaj sentemaj naturoj kiel ŝia suferis pro sia senpovo, mergita en tiu abismo de maljusteco kaj krueleco, kies ili sole komprenas la obskurajn hororojn. Por ĉi tiuj elitaj animoj, nia mondo estas anticipa infero ! Kio restis al ŝi ? Ŝiaj infanoj, kaj la konsolo eduki ilin laŭ siaj vidmanieroj, kun siaj sentoj. Nu, post ĉio kion oni diras pri edukado, la homo restas tia kia li nature estas, kaj nenio pli. Alfredo estis aristokrato ekde la lulilo; laŭmezure kiel li kreskis, ĉiuj liaj simpatioj, ĉiuj liaj rezonadoj prenis ĉi tiun direkton, kaj la admonoj de mia patrino estis ĵetitaj al la ventoj. Ili male penetris profunde en min. Neniam ŝi malkaŝe kontraŭdiris tion kion diris mia patro; neniam ŝi ŝajnis malkonsenti kun li; sed ŝi ĉizis funde de mia animo, per fajraj signoj, kun la tuta forto de sia nobla kaj firma konvinko, la ideon de la superega perfekteco de la homa animo. Mi rigardis ŝin al la vizaĝo kun respekto miksita kun timego, kiam montrante al mi la stelplenan ĉielon, ŝi diris al mi : "*Ĉu vi vidas, Aŭgusto ! ĉiuj ĉi steloj estingiĝos, sed la animo de la plej malriĉa, de la lasta el niaj sklavoj, postvivos ilin. La animo vivas tiom kiom Dio !*"

- Ŝi havis kelkajn malnovajn pentraĵojn, unu el ili kiu prezentis Jesuon resanigantan blindulon. Ili estis tre belaj, kaj faris sur mi viglan impreson. "*Rigardu, Aŭgusto, ŝi diris, la blindulo estis almozulo, malriĉa, naŭza por vidi. Tial Li ne volis resanigi lin de malproksime ! Li alvokis lin kaj surmetis siajn manojn sur lin. Memoru ĉi tion, infano mia*". Ha ! Se estus donita al mi kreski apud ŝi, ŝi estus edukinta min ĝis mi-ne-scias kiu grado de entuziasmo. Mi povintus fariĝi

sanktulo, reformisto, martiro. Sed bedaŭrinde ! Ve ! Mi forlasis ŝin kiam mi havis nur dek tri jarojn, kaj mi ne plu revidis ŝin !

Sanklaro kaŝis sian vizaĝon en siajn manojn, kaj silentis dum kelkaj minutoj. Fine li relevis la kapon kaj daŭrigis :

- Kia kompatinda kaj humila pretendo tia homa virto ! Afero pri latitudo, longitudo, geografia situo, kunigita al naturaj instinktoj, iu koincido por plejmulto el ni. Via patro, ekzemple, ekloĝis en la ŝtato Vermonto, kie efektive ĉiuj estas egalaj kaj liberaj; li fariĝis regula membro de eklezio, diakono; li partoprenis, post tempo, en Abolisma Societo, kaj rigardis nin ĉiujn preskaŭ kiel paganojn. Tamen pri temperamento, pri kutimo, li estas la duplikato de mia patro. Mi vidas la saman fieran kaj regeman spiriton montriĝi laŭ kvindek manieroj. Vi bonege scias ke neeblus persvadi kelkajn el la homoj de via vilaĝo, ke la eskviro Sanklaro kredas sin el la sama pasto ol ili. Kvankam li alvenis dum demokratian epokon, kaj ke li akceptis la demokratian teorion, li vere estas kora aristokrato, tute same kiel mia patro, kiu regis super kvin ĝis- ses-cent nigruloj.

F^ino^ Ofelio volis kontesti la verecon de ĉi tiu pentraĵo. Ŝi unue demetis sian trikadon, Sanklaro haltigis ŝin.

- Mi anticipe scias tion kion vi estas dironta al mi. Mi ne asertas ke ili ekzakte similas. Unu sin trovis lokita en medio en kiu ĉio reagas kontraŭ lia natura inklino; la alia, en medio en kiu ĉio favoris lin. Tiel ke unu fariĝis maljuna demokrato, sufiĉe volforta kaj obstina; la alia, necedema kaj aroganta maljuna despoto. Se ili ambaŭ posedintus plantejojn en Luiziano, ili estintus same similaj kiel du kugloj fanditaj en la saman muldilon.

- Kia nerespektema knabo vi estas ! diris f^ino^ Ofelio.

- Mi ne volas malrespekti ilin, reparolis Sanklaro, cetere vi scias ke mi ne emas al respekto. Sed, por reveni al mia

rakonto : mia patro mortante postlasis sian tutan proprietaĵon al siaj ĝemelaj filoj, mia frato kaj mi, por esti partigita kiel ni dezirus tion. Ne estas sub la suno pli nobla animo, pli malavara homo ol Alfredo, pri tio kio tuŝas liaj egaluloj. Tial ĉi tiu afero pri proprietaĵo estis aranĝita inter ni sen eĉ unu vorto pro protesto aŭ malakordo. Ni devontigis nin kune labori en la plantejo; kaj Alfredo kies ekstera vivo kaj okupoj duobligis la fortojn, fariĝis entuziasma plantisto kaj el la plej prosperaj.

- Sed du jaroj da eksperimento konvinkis min ke la asocio ne povus daŭri. Posedi aron da sepcent homaj geestuloj, sen persone koni ilin, sen interesiĝi pri ili individue; vidi ilin aĉetitajn, venditajn, gregigitajn, nutritajn, obeigitajn laŭ milita precizeco, ekspluatitaj kiel tiom da kornaj bestoj; la problemo, senĉese reaperanta, akiri de ili la tutan eblan laboron reduktante kiel eble plej multe la plej banalajn ĝuadojn de la vivo; la neceseco de kontrolistoj, de laborestroj; la nemalhavebla vipo, unua, lasta kaj sola argumento. Ĉio ĉi estis naŭza por mi; kaj kiam mi pensis pri la estimo kiun havis mia patrino al kompatinda homa animo. Ho ! Tiam estis terure !

- Oni ne venu diri al mi ke sklavoj ĝuas ĉi tiun situacion ! Mi ne havas paciencon aŭdi la nekredeblajn azenaĵojn kiujn ĉarlatanas kelkaj el viaj protektistoj de Nordo en sia diligenteco pravigi niajn pekojn. Ni scias kion kredi. Aŭdaci aserti ke vivanta homo povas ĝuadi ĉiutage labori de la tagiĝo ĝis la nokto, sub la konstanta okulo de mastro, sen povi permesi al si ununuran faron laŭ sia propra volo, senĉese dediĉita al la sama laciga kaj sendanka tasko, ĉio ĉi por du pantalonoj kaj paro da ŝuoj jare, kaj ĝuste sufiĉe da nutraĵo kaj ŝirmejo por teni lin en funkcia stato. Vere estas ankaŭ tro malbonuzi la parolon ! Iu homo kiu subtenas ke homaj estuloj ĝenerale povas kontentiĝi per ĉi tiu vivmaniero tute

same bone kiel per iu alia, indas provi tion. Koncerne min, mi aĉetus la mizerulon kaj laborigus lin, sen la plej malgranda memriproĉo.

- Mi ĉiam supozis, diris f^ino Ofelio, ke vi, homoj de Sudo, aprobis ĉi tiujn aferojn, kaj kredis ilin pravigitaj de la Sankta Skribo.

- Mensogoj ! Ni ne jam tiel tute fiiĝis. Alfredo, kiu estas despoto el la plej decidemaj, neniam sin turnis al tia defendo. Ne; en sia orgojlo li rezolute staras sur tiu bona, malnova kaj respektinda tereno, la rajto de la plej potenca. Li diras, kun sufiĉe da ĝusteco, laŭ mi, ke la usona plantisto faras, en alia formo, nur tion kion la aristokrataro kaj la kapitalistoj faras en Anglio por la malaltaj klasoj, tio estas konformigi ilin, oston kaj karnon, animon kaj korpon, por sia uzo kaj oportuno. Li defendas sian sistemon kaj la ilian almenaŭ laŭ logika maniero. Li diras ke ne povas esti alta civilizacio sen sklavigo de la amasoj, aŭ nominala aŭ reala. Necesas *(ankoraŭ laŭ li)* subalterna klaso dediĉita al fizikaj laboroj kaj limigita al besta vivo, por havigi al la supera klaso riĉaĵojn kaj libertempon por kleriĝi, kreskigi sian inteligenton kaj fariĝi la reganta kerno de la subulo. Li tiel rezonas ĉar, kiel mi diris al vi, li naskiĝis aristokrato; mi kredas nenion pri tio ĉar mi naskiĝis demokrato.

- Kiel kompari du aferojn tiel malsimilajn ? reparolis f^ino Ofelio. La angla laboristo estas nek aĉetita, nek vendita, nek apartigita de sia familio, nek vipita.

- Li dependas tiel multe de tiu kiu laborigas lin, kiel se li estis vendita al li. La plantisto povas mortigi la ribeleman sklavon sub la vipo; la kapitalisto povas malsatigi lin. Koncerne la sekureco de la familio, estas malfacile decidi kiu estas pli bona, vidi vendi siajn infanojn aŭ vidi malsatmorti ilin hejme.

- Sed pruvi ke sklaveco ne estas pli malbona ol tiu alia

eksceso, tio ne estas pravigi ĝin.

- Tio ankaŭ ne estas tion kion mi volas fari. Mi eĉ dirus ke nia malobservo de la homaj rajtoj estas la plej aŭdaca kaj la plej evidenta. Aĉeti homon kiel oni aĉetus ĉevalon, ekzameni liajn dentojn, krakigi liajn artikojn, provi lian paŝadon kaj kontante pagi lin per sonorantaj moneroj, rajtigi spekulantojn, nutristojn, vendistojn, makleristojn, por brokanti animojn kaj homajn korpoj, tio estas esprimi antaŭ la okulojn de la civilizita mondo, laŭ sia plej impresa formo, tion kio finfine estas nur la sama afero, la konfiskon de iu klaso profite por la alia, sen granda zorgo pri la bonstato de la konfiskita klaso.

- Mi neniam konsideris la demandon laŭ tiu vidpunkto.

- Nu, mi iom vojaĝis en Anglio, mi tralegis multajn dokumentojn pri la stato de ĝiaj malaltaj klasoj, kaj mi ne kredas ke oni povu kontesti la aserton de Alfredo, ke liaj sklavoj estas pli bone traktataj ol granda porcio de la angla loĝantaro. Necesas ne konkludi el tio kion mi diris al vi, ke Alfredo estas tio kion oni nomas malmola mastro; li estas senkompata despoto pri ĉiu malobeado. Li pafus kontraŭ nigrulo kiu kontraŭstarus lin, kun tiel malmulte da memriproĉoj kiel kontraŭ damaoj. Sed ĝenerale, li montras ian orgojlon pri tio ke liaj sklavoj estu bone nutritaj kaj bone loĝataj.

- Kiam ni estis asociitaj, mi insistis por ke estu donata al ili instrukciadon. En sia deziro komplezi al mi, li havis dompastron, kaj dimanĉe katekizigis ilin. Sed mi estas konvinkita ke, funde de li, li pensis ke preferinde estus doni dompastron al siaj hundoj kaj ĉevaloj. Fakte, kion povas fari kelkaj horoj de instruado, ĉiun sepan tagon, por la plibonigo de estulo konsternita, brutigita, forlasita al ĉiaj malbonaj influoj ekde lia naskiĝo, kaj klinita dum la tuta semajno sub la pezo de prema laboro ? La instruistoj de la dimanĉaj

lernejoj en la fabrikaj distriktoj de Anglio kaj en niaj plantejoj eble povus atesti pri la samaj rezultoj, ĉi tie kaj tie. Tamen ĉe ni, estas kelkaj okulfrapaj esceptoj, kiuj tuŝas al la religia sento, pli grava ĉe la nigrulo ol ĉe la blankulo.

- Finfine, diris f^ino Ofelio, kiel vi sukcesis rezigni vian vivon kiel plantisto ?

- Ni laŭeble vojiris kune, daŭrigis Sanklaro. Sed Alfredo rimarkis ke mi ne povis kutimiĝi al ĉi tiu vivo. Post esti reforminta, ŝanĝinta, pliboniginta laŭ miaj ideoj, li trovis sensenca ke mi neniam feliĉu. Finfine tio estis la afero mem kiun mi malŝatis, la servutado de ĉi tiuj viroj, ĉi tiuj virinoj, la malklereco, la krudeco, la senfina malvirteco, nur por gajni monon por mi !

- Plie, mi ĉiam enmiksiĝis en la detaloj. Mi, la plej pigra el la mortemuloj, tro kompatis al la pigruloj. Kaj kiam la kompatindaj diabloj, serĉante elturniĝojn, metis ŝtonojn funde de la korboj da kotono por plie pezigi ilin, aŭ plenigis siajn sakojn per tero, kovritaj de maldika tavolo de lanugo, mi diris al mi, ke mi tute same farintus sur ilia loko. Kaj mi ne povis, mi ne volis permesi ke oni vipu ilin. Ĉi tio kompreneble estis la ruiniĝo de ĉia disciplino. Kaj Alfredo kaj mi alvenis ĝuste ĉe la sama punkto, kie mi alvenis kun mia digna patro, plurajn jarojn antaŭe. Li diris al mi ke mi estis sentimentala, malvira, ke mi neniam komprenus ion pri la aktiva vivo. Li konsilis min deponi miajn monojn en iu banko, retiriĝi en la heredan domon en Nov-Orleanon, dediĉi min al poezio, kaj lasi lin mastrumi la plantejon. Tiel ni disiĝis, kaj mi venis ĉi tien.

- Kial ne tiam liberigis viajn sklavojn ?

- Mi ne sentis min kapabla. Uzi ilin kiel ilojn por gajni monon mallogis min, sed havi ilin por helpi min elspezi ĝin ne aspektis tiel malbone. Kelkaj estis maljunaj servistoj de la

domo, kun kiuj mi estis ligita, kaj la plej junaj estis la idoj de la maljunaj. Ĉiuj kontentiĝis pri sia sorto. *Li paŭzis, kaj penseme paŝadis tien kaj reen.* Estis periodo de mia vivo, li daŭrigis, kiam mi havis projektojn, kaj la esperon fari ion alian en ĉi tiu mondo, ol drive flosi en ĝi. Mi malklare sopiris esti speco de emancipisto, por purigi mian gepatran landon de ĉi tiu makulo, ĉi tiu malpuraĵo ! Ĉiuj junuloj spertis ĉi tiujn febroatakojn, laŭ tio kion mi supozas. Sed tiam…

- Kial ne provi ? diris f^ino Ofelio. Vi devintus *meti vian manon al la plugilo*[26] kaj ne rigardi malantaŭen.

- Ho ! La aferoj ne okazis laŭ mia atendo, kaj kiel Salomono, mi abomenis la vivon. Mi imagas ke tio estis necesa konsekvenco de la saĝeco de ni ambaŭ. Ĉiaokaze, anstataŭ esti aganto kaj regeneranto en la socia ordo, mi fariĝis flosanta bastono, kaj de tiam mi ĉiam surnaĝis kaj kirliĝadis laŭ la plaĉo de la fluoj. Alfredo admonas min ĉiufoje kiam ni revidas nin unu la alian, kaj li facile havas la avantaĝon super mi, ĉar li ja plenumas ion. Lia vivo estas la logika rezulto de liaj opinioj, dum la mia estas nur malestiminda aborto.

- Kara kuzo mia, ĉu vi povas esti kontenta tiel pasigi ĉi tiun provtempon ?

- Kontenta ! Ĉu mi ĵus diris al vi ke mi malestimis min pro tio ? Sed, kie ni estis ?… Ha ! Ĉe la grava afero de la liberigo. Mi ne kredas ke miaj sentoj pri sklaveco estu apartaj al mi. Multe da homoj, funde de sia koro, pensas kiel mi. La tero ĝemas sub la pezo de ĉi tiu maljusteco. Fatala por la sklavo, ĝi estas almenaŭ same fatala por la mastro. Vi ne bezonas okulvitrojn por vidi ke granda klaso de malvirtaj, senzorgemaj, malnoblaj estuloj estas duobla plago, por si kaj por ni. Anglaj kapitalisto kaj aristokrato ne same sentas sin, ĉar ili ne miksiĝas kun la klaso kiun ili malnobligas. Ni male

26 Eltiraĵo de la evangelio kiu signifas "Preni respondecon, okupiĝi pri iu tasko". Luko 9.62.

havas ĝin en niaj hejmoj; ili estas kunuloj de niaj infanoj, kaj ili disvolvas pli da influo ol ni en iliaj junaj mensoj, ĉar ili estas el raso al kiu la infanaro alkroĉiĝas kaj asimiliĝas. Se Evnjo ne similus la anĝeloj, ŝi estus jam perdita. Ni povus tute same lasi la variolon cirkuli en niaj familioj, kaj flati al ni ke niaj infanoj ne trafiĝus de ĝi, kiel kredi ilin ŝirmitaj kontraŭ la danĝeroj de nepura kontakto kun neinstruitaj kaj malvirtaj estuloj. Tamen niaj leĝoj firme malpermesas sistemon de ĝenerala edukado, kaj ili saĝece faras tion; ĉar ĉe la tago kiam generacio estos edukita, estos eksplodo ĝis la nuboj. Se ni ne donus al ili liberecon, ili prenus ĝin.

- Kaj kiel vi pensas ke ĉi tio devas finiĝi?

- Mi ne scias. Unu afero certas, estas ke tra la tuta mondo la amasoj sin komprenas kaj sin alvokas unu la alian, kaj pli malpli frue venos Dies irae[27]. La sama laboro okazas en Eŭropo, en Anglio kaj en ĉi tiu lando. Mia patrino kutimis paroli al mi pri la venonta plenumo de la tempoj, kiam Kristo regos, kiam ĉiuj homoj estos liberaj kaj feliĉaj. Ŝi instruis al mi kiam mi estis infano, diri : "*Venu via regno*". Mi kelfoje komencas pensi ke ĉiuj tiuj suspiroj, ĉiuj tiuj ĝemoj, ĉiu tiu bruetanta frakaso de sekiĝaj ostoj, estas antaŭavertoj de tio kion ŝi kredis proksima. Sed kiu kapablos elteni ĝian ĉeeston ? Kiu kapablos suferi la tagon de ĝia alveno ?

- Aŭgusteno, foje ŝajnas al mi ke vi ne estas for de la regno de la ĉielo, diris f^ino^ Ofelio. Ŝi interrompis sian laboron kaj maltrankvile rigardis lin.

- Dankon pro via bona opinio ! Mi jen brilas, jen malbrilas, teorie ĉe Ĉiela pordo kaj praktike rampanta en la tera polvo. Sed mi aŭdas la sonorilon por la tagmanĝo. Nu, venu ! Vi nun ne diros ke mi ne sukcesis teni dum mia vivo, vere seriozan konversacion.

Ĉe la tablo, Marta aludis pri la incidento de Prunjo : "Mi

27 Poemo latine verkita pri la temo de la kolero de Dio dum la tago de la Lasta Juĝo.

supozas, kuzino, ŝi diris, ke vi rigardas nin ĉiujn kiel barbarojn".

- La ago ŝajnas al mi abomena barbaraĵo, rebatis f^ino Ofelio, sed mi ne konkludas el tio ke vi ĉiuj estas barbaroj.

- Koncerne min, daŭrigis Marta, mi scias ke ne eblas venki kelkajn el ĉi tiuj estuloj. Ili estas tiel malbonaj, ke ili ne meritas vivi. Mi ne havas ombron de simpatio por tiaj malfeliĉoj. Tio ne okazus al ili, se ili volus bone konduti.

- Sed, panjo, diris Evnjo, la kompatinda virino estis tro malfeliĉa, estas tio kio instigis ŝin drinki.

- Sensencaĵoj ! Pa ! Kvazaŭ tio estus ekskuzo ! Ĉu mi ne estas malfeliĉa, mi, tre ofte ! Certe, ŝi penseme diris, mi travivis pli drastajn malagrablaĵojn ol ŝi iam ajn spertis ! Ĉi tio estas tute nura malico. Estas inter tiaj homoj tiuj kiujn oni ne sukcesas obeigi per ia ajn severeco. Mi memoras ke mia patro havis tiel pigran negron, ke li forkuris nur por eskapi el la laboro. Li dormis en la marĉoj, ŝtelis kaj faris ĉiajn hororajn aferojn. Li estis rekaptita kaj vipita, mi ne scias kiom da fojoj, kaj ne plie pliboniĝis. Post la lasta punbatado, kvankam li apenaŭ kapablis paŝi, li sin trenis ĝis la marĉo kaj mortis tie. Ne estis kialo por tio, ĉar la negroj de mia patro ĉiam estis humane traktataj.

- Iam, diris Sanklaro, mi regis super viro sur kiu ĉiuj voktoj kaj submastroj vane sin ĵetis.

- Vi ! ekkriis Marta, mi ĝojus scii kiam vi iam faris tian grandfaron.

- Mi tuj diros al vi. Li estis giganto kun mirindega forto, denaska afrikano, kaj kiu havis en la plejalta grado la plej sovaĝan instinkton de libereco. Vera afrika leono ! Oni nomis lin Scipiono^n. Neniu povis fari ion per li. Li estis vendita kaj revendita, pasis de vokto al vokto, ĝis kiam fine Alfredo aĉetis lin, konvinkita ke li povos malsovaĝigi lin. Iun belan tagon, la nigrulo superfortis la submastron, kaj

forkuris al la marĉojn. Mi estis vizitanta la plantejon, ĉar ni jam ĉesis esti asociitaj mia frato kaj mi. Alfredo estis furiozigita. Mi diris al li ke estis lia kulpo, kaj proponis veti ke mi obeigos ĉi tiun teruran ribelulon. Resume, estis konsentite ke se mi kaptus lin, oni transdonus lin al mi por eksperimenti sur li. Bando de ses aŭ sep viroj ekkomencis la ĉasadon kun hundoj kaj fusiloj. Homoj, kiel vi scias, kapablas estigi same tiom da ardo por ĉasi homon kiom damaon. Ĝi dependas de kutimo. Mi mem estis sufiĉe ekscitita, kvankam mi enmiksiĝis en ĝin nur kiel peranto, en la okazo se li estus kaptita.

- Nu ! La hundoj bojis, tirbojis. Ni galopis post ili, kaj fine elkaŝejigis lin. Li eksaltis, kuris kiel cervo, kaj preterdistancis nin dum kelka tempo; sed, finfine, li devojiĝis en densa kanejo, kaj tie, reduktita al senespera stato, mi certigas vin ke li kuraĝe rezistis antaŭ la hundoj. Li ĵetis ilin dekstren, maldekstren, kaj svenbatis tri el ili per siaj pugnoj, kiam pafo ĵetis lin teren; li preskaŭ falis ĉe miaj piedoj, vundita kaj sanganta. La kompatinda diablo rigardis min per okuloj plenaj de kuraĝo kaj malespero. Mi retroirigis la hundojn kaj la virojn kiuj alkuris al la grupe demoralizado; mi postulis lin kiel kaptiton mian. Estis ĉio kion mi povis fari por malhelpi ilin finmortigi lin en la fajro de la triumfo. Sed mi volis respektigi mian kontrakton, kaj Alfredo vendis lin al mi. Nu, mi eklaboris, kaj post du semajnoj li estis malsovaĝigita. Li fariĝis tiel submetita, tiel fleksebla, kiel oni povus deziri.

- Kion do vi faris al li ? demandis Marta.

- Mia procedo estis el la plej simplaj. Mi loĝigis lin en mia propra ĉambro, mi pretigis por li bonan liton, mi pansis liajn vundojn kaj mem flegis lin, ĝis kiam li denove estis sur la piedoj. Poste, en deca tempo, mi skribigis lian malsklavigan akton kaj sciigis al li ke li povis iri kien ajn li

volis.

- Ĉu li foriris ? diris f^ino Ofelio.

- Ne. La kompatinda naivegulo duige disŝiris la paperon, kaj absolute rifuzis forlasi min. Mi neniam havis pli kuraĝan kaj pli bonan knabon, fidelan kaj lojalan kiel ŝtalo. Li pli poste aliĝis al kristanismo, kaj fariĝis milda kiel infano. Mi konfidis al li la gardadon de mia loĝejo apud la lago; li admirinde plenumis tion. Mi perdis lin dum la unua disvastiĝo de Ĥolero. Fakte li donis sian vivon por mi. Mi estis ekmortanta kaj kiam, cedante al panika teruro, ĉiuj fuĝis, Scipiono restis, kaj prizorgis min kiel giganto, tiel bone ke li revenigis min de tre malproksime. Sed, kompatinda knabo ! Li siavice estis infektita, kaj ne estis rimedo por savi lin. Neniam perdo estis por mi pli amara.

Dum ĉi tiu rakonto, Evnjo iom post iom alproksimiĝis al sia patro. Kun la lipoj duonmalfermitaj, la pupiloj dilatitaj, ŝi aŭskultis lin kun pasia intereso.

Kiam li finis, ŝi ĵetis siajn ambaŭ brakojn ĉirkaŭ lian kolon, ekploris kaj konvulsie plorsingultis.

- Evnjo, kara knabino ! Kion vi havas ? Kio estas tio ? *diris Sanklaro dum la eta korpo de la infano tremis pro la forteco de ŝiaj emocioj*. Ne necesas, *li aldonis*, ke ŝi aŭskultas tiajn rakontojn. Ŝi estas tro nervoza.

- Ne, paĉjo, mi ne estas nervoza, *diris Evnjo, subite sin regante, kun decidforto nekutima en ĉi tiu aĝo*. Mi ne estas nervoza, sed ĉi tiuj aferoj eniras en mian koron.

- Kion vi volas diri, Evnjo ?

- Mi ne scias klarigi tion, paĉjo. Mi pensas pri multe, multe da aferoj ! Mi eble iam diros ilin al vi.

- Nu, pensu tiom kiom vi volos, karulino mia, sed ĉefe ne ploru kaj ne turmentu paĉjon, diris Sanklaro. Rigardu ! Kian belan persikon mi plukis por vi !

Evnjo prenis ĝin kaj ridetis, kvankam la buŝanguloj

ankoraŭ tremis nervoza skuetado.

- Ni iru vidi la oran fiŝon, *li aldonis etendante al ŝi la manon; kaj ili sin direktis al la verando*.

Iom da tempo poste, oni aŭdis gajajn ridojn malantaŭ la silkaj kurtenoj. Evnjo kaj Sanklaro, kurantaj unu post alia sur la ĝardenaj aleoj, ŝtonumis unu la alian per rozoj.

* ** **** ** *

Devojiĝinta per la aventuroj de altrangaj homoj, eble ni tro neglektis nian humilan amikon Tomo[n]. Sed se la leganto bonvolas sekvi min en malgrandan subtegmenton super la stalo, mi priinformos lin. Ĝi estas deca ĉambreto, enhavanta liton, seĝon kaj krudan tableton, sur kiu estas metita la Biblio de Tomo, apud lia himnaro. Li sidas antaŭ, kaj, kliniĝas super sia ardezo, li klopodas per ĉiuj siaj fortoj pri afero kiu ŝajnas kaŭzi al li grandan maltrankvilon.

La sopiroj de Tomo al sia kabano fakte fariĝis tiel fortaj ke li petis al Evnjo paperfolion. Kunigante ĉiun malgrandan rimedon de literatura scio, kiun li ŝuldis al la instruadoj de Georgio, li elpensis la aŭdacan ideon tutsole skribi al onklino Kleo, kaj li ekzerciĝis fari malneton sur sia ardezo. Li estis tre malhelpita, ĉar li tute forgesis la formon de kelkaj literoj, kaj li ne tro sciis kiel uzi tiujn kiujn li rememoris. Dum li laboris kaj dum en sia laborego li laŭte kaj pene spiris, Evnjo alvenis kiel birdo malantaŭ la dorsapogilon de lia seĝo, kaj rigardis super lian ŝultron.

- Ho ! Onklo Tomo, kiajn strangajn aferetojn vi faras !

- Mi provi skribi al mia kompatinda kara edzino, fraŭlino Evnjo, kaj al la etuloj, *diris Tomo pasigante sian mandorson sur siajn okulojn*, sed mi timi ne venki tion.

- Se mi helpos vin, Tomo ? Mi lernis iomete skribi. Pasintjare mi sciis fari ĉiujn literojn, sed mi ankaŭ timas esti forgesinta.

Evnjo metis sian etan oran kapon apud tiun de Tomo, kaj

ĉiuj du komencis seriozan diskuton, ĉiu same plena de fervoro kaj malklereco. Post esti konsultanta unu la alian kaj pesanta ĉiun vorton, la komponado komencis, dank 'al ilia arda bonvolo, preskaŭ simili skribon.

- Jes, onklo Tomo, tio estas tute beleta por rigardi ! *diris Evnjo; ŝi kontemplis la skribaĉaĵon kun rava mieno.* Kiel via edzino estos kontenta, kaj viaj kompatindaj infanetoj ! Estas kompatindaĵo ke oni igis vin forlasi ilin. Mi petos paĉjon lasi vin reiri tien.

- Mastrino diris ke ŝi sendi monon por elaĉeti min tuj kiam ŝi kapabli, diris Tomo, kaj mi esperi ke tio ne daŭri longe. Esti ankaŭ la juna mastro, massa Georgio, kiu promesi veni serĉi min; kaj li doni al mi kiel garantiaĵon tiun jenan dolaron ! *Tomo eltiris la altvaloran etan moneron de sub siaj vestaĵoj.*

- Ho ! Tiam li certe venos ! diris Evnjo. Kiel do mi estas kontenta !

- Mi voli sendi al ili leteron, komprenu, fraŭlino Evnjo, por sciigi al ili kie mi esti, kaj diri al kompatinda Kleo ke mi farti bone. Ŝi preni la aferon tiel grave al la koro, kompatinda animo !

"Tomo !" Ĝi estis la voĉo de Sanklaro kiu alvokis, en la sama momento li aperis ĉe la pordo.

Tomo kaj Evnjo tremetis.

- Kio estas tio ? diris Sanklaro alproksimiĝante kaj rigardante la ardezon.

- Estas la letero de Tomo. Mi helpas lin por skribi ĝin, diris Evnjo. Ĝi estas bona, ĉu ne ?

- Mi ne volus senkuraĝigi vin ambaŭ, reparolis Sanklaro, sed mi kredas, Tomo, ke estus pli bone se mi skribus la leteron por vi. Kaj tion mi faros ĉe mia reveno de la promenado.

- Estas tre grave ke li skribu, ekkriis Evnjo, ĉar vi

scios, paĉjo, ke lia mastrino sendos monon por elaĉeti lin. Li diris al mi ke oni promesis tion al li.

Sanklaro pensis, sen diri tion, ke tio estis unu el tiuj senbazaj promesoj kiujn ememaj mastroj faras al siaj sklavoj, por malpezigi al ili la hororon esti venditaj, sen ia intenco plenumi la atendon kiun ili vekis. Sed li nenion diris pri tio, kaj nur ordonis al Tomo alkonduki al li la ĉevalojn por eliri.

Tiun vesperon mem, la letero estis regule verkita de li, kaj enpoŝtigita.

Tamen fraŭlino Ofelio ankoraŭ persistis en siaj laboroj de mastrumantino, kaj la tuta domo, de Dinaho ĝis la lasta kuirhelpisto, akordiĝis por diri ke ŝi efektive estis strangulino, termino per kiu servisto de la Sudo montras sian antipation kontraŭ siaj superuloj.

La alta kompanio de la ĉefkuirejo, Adolfo, Jane kaj Roza, deklaris ke ŝi ne povis esti sinjorino, ĉar la sinjorinoj ne tiel laboris sen paŭzo. Plie, fraŭlino Ofelio ne havis belajn manierojn, ili vere miris ke ŝi povus esti parenca kun Sanklaro. Marta mem asertis ke ŝi laciĝis ĉiam vidi kuzinon Ofelio^{n} laborantan. Estas vere ke ŝia aktiveco estis sufiĉe senĉesa por pravigi ĉi tiujn plendojn. De mateno ĝis nokto, ŝi orlis, stebis, kudris, kun la energio de iu kiu sentas sin vigligita de la neceso. Kiam la taglumo malheliĝis kaj kiam la kudrado malaperis, la neevitebla trikado anstataŭis ĝin, kaj ĝi daŭrigis kun la sama vigleco. Vidi ŝin estis vera laboro.

21. Topsi.

Iun belan matenon, f^ino Ofelio sin dediĉis al siaj hejmaj okupoj, kiam la voĉo de Sanklaro, kiu alvokis ŝin, aŭdiĝis ĉe la piedo de la ŝtuparo.

- Venu malsupren, kuzino, mi havas ion por montri al vi.

- Kio estas ? demandis f^ino Ofelio malsuprenirante kun sia tasko enmane.

- Mi faris akiraĵon kiu koncernas vin, vidu ĉi tie ! Kaj Sanklaro puŝis antaŭ ŝin etan nigrulidinon kiu povis esti ok-aŭ naŭ-jaraĝa.

Ŝi estis el la plej malhelaj de sia raso. Ŝiaj rondaj, brilantaj, maltrankvilaj okuloj senĉese promenigis super ĉion kion enhavis la ĉambro, siajn fajrerajn pupilojn el gagato. Ŝia buŝo, duonmalfermita pro miro en la ĉeesto de la mirindaĵoj kiujn entenis la salono de la nova mastro, malkaŝis du vicojn da dentoj el hela emajlo. Ŝiaj lanaj haroj, disigitaj laŭ strecaj harplektaĵoj en amaso da malgrandaj rektaj vostoj, la plej amuzaj de la mondo, disstariĝis en ĉiuj direktoj. Estis en ŝia fizionomio kurioza miksaĵo de sagaceco kaj ruzeco, duone vualita sub solena esprimo de plorema seriozeco. Ŝi estis duonkovrita de abomena kaj naŭza kitelo el eluzita saktolo, kaj rekte staris kun manoj modeste krucitaj antaŭ ŝi. La tuta tutaĵo respondis al la ideo kiun oni faras al si pri elfo, pri ruza spirito. Kiel pli poste konfesis f^ino Ofelio, "Tiu sovaĝa kaj pagana mieneto unue timigis ŝin". Tial, sin turnante al Sanklaro :

- En la nomo de la ĉielo, por kiu celo vi alportas ĉi tiun aferon al ni ?

- Por donaci ŝin al vi, kuzino, vi zorgos pri ŝia edukado, vi kondukos ŝin laŭ la rekta vojo. Ŝajnis al mi ke ŝi estis tre

amuza specimeneto de la burleska ĝenro. Hola ! Topsi ! *Kaj Sanklaro fajfis ŝin kiel oni fajfas hundon*, regalu nin per kanteto kaj kelkaj kaprioloj.

La karbonigraj okuloj brilegis per diabla gajeco, kaj la eta aĵo ĵetis en la aeron, per akra voĉo, la plej strangan nigrulan melodion kiun akompanis la groteskaj trepidadoj de ŝia korpo kaj de ĉiuj ŝiaj membroj. Ŝi turniĝis, tordiĝis, brubatis la manojn, neatendite frapis siajn genuojn unu kontraŭ la alia, kaj eltiris el sia gorĝofundo tiujn strangajn guturalajn sonojn kiuj distingas la primitivan muzikon de ŝia raso. Fine, post du mirindegaj transkapiĝoj, eligante kiel finan klimakson, akutan kaj longedaŭran noton, pli similan al la sovaĝa fajfilo de vapormaŝino ol al iu ajn alia konata sono, ŝi refalis stare sur la tapiŝon, kun la manoj pie kunligitaj, kaj kun tiu sama beata kaj solena mieno kiun kontraŭdiris la ruzaj, ŝtelrapidaj, oblikvaj fulmoj eskapitaj el la okulanguloj.

F^ino^ Ofelio, ŝtoniĝinta, restis silenta. Sanklaro, kiel vera bubaĉo, ĝuis kun petola plezuro ŝian konsterniĝon kaj sin direktanta al la infano :

- Topsi, li diris al ŝi, rigardu ! Tie estas via nova mastrino, mi donacas vin al ŝi. Nun atentu bone konduti.

- Jes mastro ! diris la eta flatemulino, ankoraŭ serioza kaj solena, sed kun nova trembrilo en la okuloj.

- Vi estos obeema, tre obeema; ĉu vi komprenas, Topsi ?

- Ho ! Jes, mastro, rebatis Topsi, kun la manoj ankoraŭ devote kunligitaj, kaj la okuloj ankoraŭ brilaj.

- Nu do, Aŭgusteno, kion ĉi tio signifas ? diris f^ino^ Ofelio. La domo jam superabundas je ĉi tiuj etaj petoluloj. Ni ne povus paŝi sen meti la piedo sur ilin. Ĉi matene, mi ellitiĝas, dormanta nigrulido ruliĝas de malantaŭ mia pordo; nigra kapo stariĝas de sub la tablo; mi batas kontraŭ tria nigrulido kuŝantan sur la skraptapiŝo. De ĉiuj flankoj, sur la balkonoj, sur la balustradoj, ni vidas kelkan vizaĝon el fulgo

grimaci. Ĉie nigruloj, nigrulinoj, nigrulidoj, nigrulidinoj, dormas, ridas, ploras, kapriolas, ruliĝas teren kaj svarmas sur la planko de la kuirejo. En la nomo de la ĉielo, kial embarasi nin per unu pli ?

- Por edukigi ŝin de vi; ĉu mi ne diris tion al vi ? Vi prizorgos ŝin. Ĉu via granda temo ne estas la edukado ? Nu, kuzino, mi donas al vi tute novan, tre freŝan ekzempleron, por vi praktiki.

- Al mi ? Mi tute ne bezonas tion; mi povas sufiĉe praktiki en la domo, mi certigas vin.

- Jen vi ja, vi perfektaj kristanoj ! Vi kreas societojn de bonfarado, vi sendas kelkan malbonsortan misiiston uzi siajn malĝojajn tagojn meze paganoj el tiu speco. Sed kiam temas pri ricevi hejme, apud si, unu el ĉi tiuj malfideluloj, pri persone zorgi pri lia konvertiĝo : neniel, vere ! Tiam oni trovas la neofiton malagrabla kaj malpura, la laboro tro enuiga, kaj tiel plu.

- Vi sufiĉe scias, Aŭgusteno, ke tio ne estas mia vidpunkto. *F^ino Ofelio, tio estis klara, mildiĝis*. Eble estas en ĝi vere kristana tasko.

Ŝi ĵetis al la infano malpli malfavoran rigardon. Sanklaro tuŝis la plej senteman kordon, ĉar la konscienco de f^ino Ofelio ĉiam estis vigla.

- Tamen, ŝi aldonis, mi ne povas vidi la neceson aĉeti ĉi tiun infanon, kiam certe estas en via domo sufiĉe por uzi mian tutan tempon, mian tutan sciencon kaj pli.

- Nu do, kuzino, *kaj Sanklaro tiris ŝin flanken*, mi antaŭ ĉio petas vian pardonon pro la vanaĵoj kiujn mi ĵus diris al vi; vi estas tiel perfekte bona ke ili ne povus atingi vi. La koncerna objekto fakte apartenis al la geposedantoj, geedzoj, de restoraciaĉo antaŭ kiu mi ĉiutage preterpasas. Mi estis laca aŭdi la infanon krii, kaj ŝiaj mastroj, paro da gedrinkuloj, dolorigis ŝin per batoj kaj ofendoj. Ŝi havas

certan mienon tiel amuza, tiel vigla, ke ŝajnis al mi ke ni povus profiti el ĝi. Mi do aĉetis ŝin, kaj mi donacas ŝin al vi kiel donacon. Provu nun doni al ŝi unu el viaj bonaj ortodoksaj edukoj de nov-anglio, ni vidos tion kion rezultos de tio. Vi scias ke mi ne havas la talenton de la instruisteco; sed mi tre ŝatus vidi vin provi.

- Bone ! Mi faros tion kion mi kapablos, diris f^ino Ofelio, kaj ŝi antaŭenpaŝis al sia nova posedaĵo, kiel oni povus alproksimiĝi al dika nigra araneo, supozante ke oni havus por ĝi nur bonvolajn intencojn.

- Ŝi estas duonnuda kaj terure malpura !

- Nu ! Malsuprenigu ŝin, kaj ke iu tien frotpurigu ŝin kaj vestu ŝin.

F^ino Ofelio elkondukis sian kaptaĵon en la kuirejajn regionojn.

- Mi ne vidi ke mastro Sanklaro bezoni aliajn negridojn ĉi tie ! *Ĉi tio estis la rimarko de Dinaho kiu konsideris la novan aĉetaĵon kun malmulte amika mieno.* Mi tamen ne voli ŝin por ruliĝi sub miajn piedojn !

- Pu ! diris Jane kaj Roza kun superega naŭzo, ŝi bone fari sin teni distance. Mi iomete demandi al vi, ĉu mastro ne jam havi pli ol sufiĉe de ĉi tiu fiularo de negroj !

- Foriru ! Fiulino vi mem, fraŭlino Roza ! *reparolis Dinaho kiu sentis la aludon*, vi eble kredi esti blanka, vi esti nek blanka nek nigra, kaj mi pli ŝati koncerne min esti, tute honesta, unu aŭ la alia.

Neniu, f^ino Ofelio cetere vidis tion, estis preta por lavi kaj vesti la ĵuŝvenintino. La bona f^ino do zorgis mem pri la taskaĉo, helpata de Jane, kiu sufiĉe malvolonte faciligis la laboron.

Delikataj oreloj ne povus aŭdi la apartaĵojn de ĉi tiu unua banado. Bedaŭrinde ! En ĉi tiu malalta mondo, multaj geestuloj vivas kaj mortas en stato kiun la nervoj de sia

proksimulo eltenus eĉ ne la priskribon. F^ino Ofelio, plena de praktika forto, skrupule plenumis la plej mallogajn operaciojn; sed ŝia mieno, necesas konfesi, tute ne estis flatema, kaj la tasko atingis la lastajn limojn de ŝia kuraĝo. Tamen, kiam ŝi vidis la ŝultrojn kaj dorson de la eta nigrulino strekita de profundaj cikatroj, de karnaj ŝvelaĵoj, de kalaĵoj, neforviŝeblaj spuroj de la reĝimo sub kiu la malfeliĉulino kreskis, ŝia koro emociiĝis pro kompato.

- Vidu ! diris Jane montrante la ruĝajn aŭ bluetajn markojn, jen kiu pruvas kian demonon ŝi estas ! Ŝi klopodigos nin, mi respondas pri tio ! Mi malŝatas ĉi tiujn negridinojn; ili estas tiel naŭzaj ! Kiel mastro sukcesis decidiĝi por aĉeti ĉi tion !

La nigrulidino aŭskultis ĉi tiujn komplezajn komentojn kun humila, obeema, malsaneta mieno alligita al ŝia vizaĝo, kaj ŝia ŝtelrapida rigardo strabe kaŝrigardis la ornamaĵojn kiuj pendis de la oreloj de Jane. Kiam ŝi fine estis surmetinta decan kaj kompletan veston, kiam ŝia kapo estis razita, f^ino Ofelio deklaris, kun kontentiĝa nuanco, ke "la etulino aspektis pli kristana". Kaj, jam zorganta pri siaj edukaj planoj, ŝi sidiĝis, kaj komencis la pridemandadon.

- Kiom jaraĝa vi estas, Topsi ?

- Ne scii, mastrino, diris la bildo kun grimaco kiu vidigis ĉiujn siajn dentojn.

- Kio ! Vi ne scias vian aĝon ?... Neniam iu diris tion al vi ? Nu, kiu estis via patrino ?

- Tute neniam havi patrinon, diris la infano kaj ŝi ripetis sian grimacon.

- Vi tute ne havis patrinon ! Kion vi volas diri ? Kie vi naskiĝis ?

- Neniam naskiĝi, mi, *persistis Topsi kun alia diabla tordiĝo.*

Se eĉ malmulte f^ino Ofelio estintus nervoza, ŝi povintus

kredi sin ekposedanta iun nigran gnomon eltiritan el la lando de la koboldoj. Sed Ofelio estis pozitiva, iris rekte al la celo, kaj aldonis kun iom da severeco :

- Vi ne devas respondi al mi per tiu tono, infano; mi ne ŝercas kun vi. Diru al mi kie vi naskiĝis, kaj kiuj estis viaj gepatroj, patro kaj patrino ?

- Mi neniam naskiĝi, mi, *ripetis la etulinon kun pli da emfazo*, neniam havi aŭ patron, aŭ patrinon, aŭ ion ajn. Spekulanto nutri min kune kun aro da aliaj, kaj maljuna onklino Sue prizorgi pri la aro.

La infano evidente estis sincera.

- Disinjoro, fraŭlino Felio, diris Jane kun moka rido, esti amasoj da tiuj ! La spekulantoj ĉipe aĉeti ilin tre maljunajn, kaj bredi ilin por la merkato.

- Kiom da tempo vi pasigis kun viaj lastaj gemastroj ? rekomencis f^ino^ Ofelio.

- Ne scii, mastrino.

- Ĉu estas unu jaro ? Pli ? Malpli ?

- Ne scii, mastrino.

- Disinjoro ! Fraŭlino, ĉi tiuj fiularoj ne povi respondi ! Tio koni nenion en la mondo, nek tagon, nek jaron, reparolis Jane. Ili eĉ ne scii sian aĝon, de si mem !

- Ĉu vi iam aŭdis paroli pri Dio, Topsi ?

La infano aspektis konsternita, kaj ripetis sian kutiman grimacon.

- Ĉu vi scias, kiu kreis vin ?

- Neniu, kompreneble, diris la infano kun mallonga ekrido.

La ideo ŝajnis multe amuzi ŝin, ĉar ŝiaj rondaj okuloj ekbrilis dum ŝi aldonis :

- Mi kreski, jen ĉio ! Mi ne kredi ke iu iam krei min.

- Ĉu vi scias kudri ? demandis f^ino^ Ofelio, konvinkita ke necesis regresi al surteraj kaj pli pozitivaj demandoj.

- Ne, mastrino ?

- Kion vi povas fari ? Kion vi faris ĉe viaj malnovaj mastroj ?

- Mi porti la akvon, mi lavi la telerojn, mi purigi la tranĉilojn, kaj mi servi la mondon.

- Ĉu ili estis bonaj por vi ?

- Eble, jes !

Kaj la infano strabe ekzamenis sian mastrinon per sia ruza okulo.

Fine, kiam laciĝinta pri la kuraĝiga dialogo, f^ino Ofelio ekstaris, ŝi vidis Sanklaro^n sin apoginta sur la dorsapogilon de sia seĝo.

- Vi ĉi tie trovas virgan humteron, kuzino, tie semu viajn proprajn ideojn. Vi ne devos peni por elradikigi el tio multajn aliajn.

La principoj de f^ino Ofelio estis, pri edukado kiel pri multaj aferoj, fiksaj kaj bone difinitaj. Estis tiuj kiuj ekzistis antaŭ ĉirkaŭ unu jarcento en Nov-Anglio, kaj kies oni trovis spurojn en pluraj foraj anguloj, malapude de la ĉirkaŭaĵo de la fervojoj. Ili estas resumitaj en malmulte da vortoj : instrui la infanojn atenti pri tio kion oni diras al ili, instrui al ili pri ilia katekismon, montri al ili por kudri, legi kaj vipi ilin se ili mensogas. Kvankam la lumfluoj kiuj nuntempe prilumas, la grava temo pri la edukado ĵetas en la ombron tiujn malnovajn agmanierojn, oni ne povas nei ke niaj geavoj edukis, laŭ ĉi tiu reĝimo, sufiĉe rekomendindajn gecivitanojn, kiel plurajn el inter ni povas atesti. Ĉiaokaze, f^ino Ofelio ne sciis pli; ŝi do tutkore turnis sin al sia eta paganino, rezoluta disvolvi favore al ŝi ĉion kion kapablus fervoro kaj viglecatento.

La infano estis prezentita en la domo kiel posedaĵo de f^ino Ofelio. Ĉi tiu sciis ŝin malbone ŝatata en la kuirejo, kaj konsekvence elektis kiel la centron de siaj operacioj sian

propran dormoĉambron; ofero kiu estos eble estimata de kelkaj el niaj legantinoj. Anstataŭ, kiel en la pasinteco, mem fari sian liton, balai, malgraŭ la servopretaj proponoj de ĉiuj ĉambristinoj de la loĝejo por senpolvigi laŭ ŝia plezuro, ŝi kondamnis sin instrui al Topsi ĉi tiujn diversajn ekzercojn. Ho malfeliĉa tago ! Nur tiuj kiuj entreprenis tian taskon, povas kompreni tiun oferadon.

F^ino Ofelio, ekde la unua mateno, enlokiĝis en sia ĉambro, izolis tie Topsi^n kaj solenece komencis sian instruistan kurson.

Jen do Topsi lavita, frotlavita, tondita de ĉiuj hartufetoj, orgojlo de ŝia koro, kaj vestita de pura robo, de bone amelita antaŭtuko, respekteme staranta antaŭ f^ino Ofelio, kun malgaja vizaĝesprimo, tute taŭga por iu enterigo.

- Nun, Topsi, mi tuj montros al vi kiel pretigi liton. Mi estas ĉikanema pri ĉio kio rilatas al mia enlitiĝo. Vi devas agi ekzakte kiel mi.

- Jes, sinjorino, diris Topsi kun profunda suspiro, kaj la vizaĝo pli kaj pli plilongiĝanta.

- Vidu, Topsi, jen la littuko; ĉi tiu estas la orlo, tie estas la reverso, ĉi tie la averso. Ĉu vi bone memoros tion ?

- Jes, sinjorino, kaj Topsi denove suspiris.

- Bone. Nun la malsupra littuko devas esti turnita tre glata super la kolbaskuseno, tiamaniere, kaj refaldita ĉe la piedo sub la matraco, bone egala, bone glata kiel mi faras, ĉu vi vidas ?

- Jes, sinjorino, diris Topsi kun granda atento.

- Sed koncerne la supran littukon, ĝi devas esti altirita kaj refaldita suben, bone firma kaj bone orta; tiel kun la plej mallarĝa orlo ĉe la piedoj.

- Jes, sinjorino, respondis Topsi ankoraŭ laŭ la sama tonalto.

Ni aldonos tion kion ne vidis f^ino Ofelio. Dum la bona

sinjorino, kun la dorso turnita, estis en la fajro de la demonstrado, ŝia juna disĉipl-ino lerte ŝtelis kaj enŝovis en siajn manikojn paron da gantoj kaj rubandon; poste ŝi pie rekrucigis siajn manojn antaŭ si.

- Nun Topsi, ni vidu kiel vi elturniĝas el tio, diris f^ino Ofelio kiu demetis la litotukojn, kaj sidiĝis por rigardi sian lernanton agi.

Kun la sama soleneca seriozeco kaj ne sen lerteco, Topsi plenumis la tutan manovron, por kompleta kontentiĝo de f^ino Ofelio. Ŝi surmetis la littukojn, malaperigis ĉiun ondeton, kaj la seriozeco kiun ŝi estigis por plenumi siajn, funkciojn forte edifis la instruistinon. Bedaŭrinde, eta peco de rubando elglitinta de la rando de la maniko ĝuste kiam Topsi finis la laboron, kaptis la atenton de f^ino Ofelio. Ŝi sin ĵetis sur ĝin : "Kio estas ĉi tio ? ŝi ekkriis. Vi, malbona knabineto, malafabla estulineto, vi ŝtelis ĉi tiun rubandon !

La deliktaĵo estis eltirita el la propra maniko de Topsi, sen ke ŝi ŝajnu eĉ iomete konsternita. Ŝi konsideris ĝin, surprizmiene, kun la plej naiva senkulpeco.

- Disinjoro ! He, sed ! Ĉu tio ne esti la zono de fraŭlino Felio ? Kiel ĝi enŝoviĝis en mian manikon ?

- Topsi, malbona infano, ne komencu fari al mi mensogon. Vi ŝtelis tiun rubandon ?

- Ho ! Mastrino, neniam, certe. Mi simple ne vidi ĝin, ĝis tiu benita minuto.

- Topsi, ĉu vi ne scias ke estas tre malbone mensogi ?

- Mi neniam mensogi, neniam, fraŭlino Felio, *diris Topsi kun virta graveco*. Esti vero tute pura kiun mi diri, kaj nenio alia.

- Topsi, mi devos vipi vin se vi mensogas, pensu pri tio !

- Disinjoro, mastrino, kiam mi esti vipita dum la tuta tago, diris Topsi komencante ploreti, mi povi diri nenion alian. Mi tute ne vidi tion, ĝi eble kapti mian brakon ! Fraŭlino

Felio esti lasanta ĝin sur la lito, ĝi esti kaptita en la litotukoj kaj enŝovita en mian manikon !

F^ino Ofelio estis tiel indignigita de tiom da senhonteco, ke ŝi kaptis la infanon per la ŝultroj, kaj skuis ŝin.

- Ne ripetu tion al mi ! Ne ripetu tion al mi !

La energia skuado faligis la gantojn el la alia maniko.

- Jen, vidu ! Ĉu vi ankoraŭ diros al mi ke vi ne prenis la rubandon ?

Ĉifoje, Topsi konfesis la ŝtelon de la gantoj, sed persistis nei la alian ŝteleton.

- Nu, Topsi, diris f^ino Ofelio, se vi ĉion konfesas, vi ne estos vipita ĉifoje.

Tiel admonita, Topsi konfesis la duoblan krimon, kaj, per la plej plendinda tono, certigis sian penton.

- Nu ! Diru definitive la veron. Mi scias ke vi certe prenis aliaĵon ekde kiam vi estis en la domo, ĉar mi tro lasis vin kuri hieraŭ dum la tuta tago. Se vi konfiskis ion ajn, konfesu ĝin, kaj mi promesas tion al vi, ni ne skurĝos vin.

- He aj ! Mastrino, mi preni tiujn belajn ruĝajn aĵojn, kiuj esti ĉirkaŭ la kolo de fraŭlino Evnjo.

- Ŝtelita ! Malbona infano ! Kaj kion vi ankoraŭ prenis ?

- La aferoj kiuj pendas de la oreloj de fraŭlino Roza… la ruĝaj.

- Alportu ĉion ĉi tien, nun tuj.

- He aj ! Ne povi, mastrino, mi esti rostinta ĝin !

- Rostinta ! Kia fabelo ! Ke vi tujtuj retrovu tion, ĉu vi aŭdas ? Aŭ mi vipos vin.

Kun laŭtaj protestoj, larmoj, ĝemoj, Topsi deklaris ke ŝi ne kapablis. Ĉio estis rostita ! Bruligita !

- Kaj kial esti bruliginta ĉion ? demandis f^ino Ofelio.

- Ĉar mi esti malbona. Tiel esti ! Mi esti tre, tre malbona, ne kapabli reteni min de tio.

Hazarde, ĝuste tiam, Evnjo naive eniris en la ĉambron,

havanta ĉirkaŭ la kolo la identan diskutatan kolĉenon de koralo.

- Evnjo ! Kie do vi retrovis vian kolĉenon ? ekkriis f^ino Ofelio.

- Retrovi ? He, mi havis ĝin dum la tuta tago.

- Sed ĉu vi surhavis ĝin hieraŭ ?

- Jes, vere, onklino, kaj tio kio estas pli amuza, estas ke mi konservis ĝin dum la tuta nokto. Mi forgesis demeti ĝin enlitiĝante.

F^ino Ofelio aspektis ankoraŭ pli konfuzita kiam Roza eniris, portanta ekvilibre sur la kapo korbon da ĵuse gladita tuko, kaj la du orelpendaĵojn de koralo balanciĝis de ŝiaj oreloj.

- Ne, mi ne plu scias kion fari per ĉi tiu infano ! diris f^ino Ofelio kun senespera mieno. Kial ? Ĉielo kompatu nin ! Kial diri al mi ke vi ŝtelis ĉion ĉi, Topsi ?

- Mastrino diri necese mi konfiski, kaj mi nenion alian konfiski, diris Topsi frotante al si la okulojn.

- Konfesi, ne konfiski. Sed mi tute ne diris al vi konfesi tion kion vi ne faris, reparolis f^ino Ofelio. Tio estus alimaniere mensogi, sed estas ankaŭ mensogi !

- Disinjoro, mi ne scii, simplanime diris Topsi.

- Ba ! Ĉu esti grajno da veraĵo en tiu fiularo ! *ekkriis Roza ĵetante al Topsi indignan rigardon.* Se mi nur esti mastro Sanklaro, mi vipi ŝin ĝis la sango ! Jes, certege, kaj ŝi vere esti meritinta tion.

- Ne, ne, Roza, *diris Evnjo kun tiu aŭtoritata sintenado kiun la infano kelkfoje kapablis afekti.* Ne tiel parolu; mi ne povas toleri tion.

- Jen ! Disinjoro helpi nin ! rekomencis Roza. Ankaŭ vi vere esti tro bona, fraŭlino Evnjo. Vi esti tute mallerta por regi la negrojn. Ne ekzisti alia maniero ol tani al ili la haŭton; esti mi kiu diri tion al vi.

- Roza ! Pacon, ankoraŭfoje. Eĉ ne unu vorton pli !

La okuloj de la infano fajreris, kaj ŝiaj vangoj fariĝis purpuraj. Ĉe la momento, Roza estis superfortita. Ŝi foriris el la ĉambro, murmurante duonvoĉe :

- Fraŭlino Evnjo esti el la sango de la Sanklaro, tio esti videbla. Esti ke ŝi povi paroli ĝuste kiel sia paĉjo.

Evnjo restis senmova, kun la okuloj fiksitaj al Topsi.

Tie troviĝis vidalvide du estulinoj kiuj reprezentis la ekstremajn punktojn de la socia skalo. La infano, bela, blanka, aristokrata, kun sia ora kapo, sia inteligenta, alta frunto, siaj noblaj kaj graciaj movoj; kaj la alia eta estulino, nigra, vigla, obeema, sklavema, kaj tamen lerta. Ili estis tie, vivantaj tipoj de siaj rasoj. Unu, saksino, naskita de sinsekvo de jarcentoj de kulturo, de potencado, de fizika kaj morala supereco; la alia, afrikino, produkto de longa serio de malgloroj, de prematéco, de submetiĝo, de laboro kaj de malvirto.

Eble kelkaj dubindaj ideoj el tiu speco konfuze ruliĝis en la menso de Evnjo. Sed infanaj pensoj estas ankoraŭ nur malklare difinitaj instinktoj. Oni sentis aperi funde de ĉi tiu nobla naturo multajn latentajn pripensojn, ĝermantajn impulsojn, obskurajn perceptojn kiujn la infano ne povis esprimi. Kiam f^ino^ Ofelio abunde ekparolis pri la krimoj de Topsi, la anĝela vizaĝo de Evnjo sin kovris per nubo da malĝojo, kaj ŝi mallaŭte diris :

- Kompatinda Topsi, kial vi bezonis ŝteli !... Nun ni bone atentos pri vi. Ĉu vi scias, Topsi, mi pli ŝatus doni al vi ĉion kion mi havas, ol vidi vin preni tion ?

Ĉi tiuj estis la unuaj amoplenaj vortoj kiujn la infano aŭdis en sia vivo. La milda tono, la amika mieno, strange tuŝis ĉi tiun neinstruitan kaj krudan koron; io malseka ekbrilis en la ronda, vigla okulo, sed la mallonga kaj malvarma rikano reaperis preskaŭ tuj. La orelo kiu malfermiĝis nur al insulto

malkonsentas kompreni ion tiel delican kiel bonkorecon. Topsi trovis la parolojn de Evnjo strangaj, neklarigeblaj; ŝi ne kredis ilin.

Sed kion fari de la eta nigrulino ? Estis vera enigmo por f^ino Ofelio; ŝiaj reguloj pri edukado fariĝis neuzeblaj. Por doni al si tempon pripensi tion, kaj kun la malpreciza espero ke funde de malhela ĉambreto ĉiam troviĝas ia kaŝita virto, ŝi tien metis Topsi^n en malliberejon, ĝis kiam siaj ideoj ja iom klariĝis.

- Mi vere ne scias, ŝi diris al Sanklaro, kiel trakti la infanon sen vipi ŝin.

- Vipu ŝin, se la koro tiras vin; vi havas plenan potencon; agu kiel plaĉas al vi.

- Oni vipis la infanojn de ĉiam, diris f^ino Ofelio. Mi neniam aŭdis paroli pri edukado sen iom da vipado, pli malpli.

- Bonege, rebatis Sanklaro, faru kiel eble plej bone. Tamen mi permesos al mi malseveran observon. Mi vidis ĉi tiun infanon batitan de fajrostango por reaktivigi la fajron; mi vidis ŝin teren faligitan de fajroŝovelilo, fajroprenilo, ĉion kio enfalis en la manon ! Ŝi ŝajnas al mi tiel kutimigita de ĉi tiu eduka procedo, ke via vipo devos esti terure energia por eĉ nemulte instigi ŝin.

- Kion fari tiam ? Kion fari ? demandis f^ino Ofelio.

- Vi nun levas gravan demandon, kuzino, kaj mi esperas ke vi sukcesos solvi ĝin. Kion fari efektive de homa estulo nur regata de bastono, kiam la bastono malsukcesas ? Kaj ĉe ni ĉi tiu situacio estas el la plej ordinaraj.

- Mi fakte estas ĉe la ekstremo ! Mi neniam vidis tian infanon !

- Infanoj, kaj eĉ viroj kaj virinoj el ĉi tiu speco, tute ne estas maloftaj ĉi tie. Kiel regi ilin ? diris Sanklaro.

- Estas pli ol mi povas diri ! suspiris f^ino Ofelio.

- Mi ne scias pli ol vi. La hororaj kruelecoj, la

barbaraĵoj kiuj, de tempo al tempo, aperas en la gazetoj, la okazaĵoj kiel ekzemple tiu de Prunjo, de kie ili venas ? Plejofte tio estas nur iompostioma alkutimiĝo de ambaŭ flankoj. La posedanto fariĝas kruela proporcie kiel la sklavo fariĝas hardita. Vipo kaj insultoj estas kiel opio, necesas duobligi la dozon kiam la sentiveco malakriĝas. Fariĝinte posedanto sufiĉe frue, mi komprenis la situacion, kaj mi decidis neniam komenci, ĉar mi ne sciis kien mi ĉesus, almenaŭ mi volis protekti mian propran moralecon. El tio rezultas ke miaj geservistoj kondutas kiel dorlotitaj infanoj; tio kio ŝajnas pli bona por ili kaj por mi ol ni kune brutiĝi. Vi multe diris, kuzino, pri niaj respondecoj koncerne la edukado. Mi vere sentas la bezonon vidi viajn provojn sur iu infano, kiu estas nur la provpeco de miloj da aliaj inter ni.

- Estas via sistemo kiu produktas tiajn infanojn, diris f^ino^ Ofelio.

- Mi scias tion; sed ili ja estas ! Ili ekzistas… Kion fari de ili ?

- Nu ! Mi neniam dankos vin pro la provo; sed ĉar ŝajnas ke estas en tio plenumenda devo, mi tuj persistos kaj faros kiel eble plej bone, diris f^ino^ Ofelio.

Fakte ŝi laboris kun pliigo de fervoro kaj de energio sur sia nova subjekto. Ŝi starigis regulajn studhorojn, kaj komencis instrui al ŝi legi kaj kudri.

La knabineto sin montris vigla en la unua arto. Ŝi lernis siajn leterojn kvazaŭ per magio, kaj baldaŭ kapablis legi simplajn frazojn; sed la kudrado taŭgis malpli bone. Tiel fleksebla kiel kato, tiel facilmova kiel simio, ĉiu diligenteco fariĝis por ŝi neeltenebla. Konsekvence ŝi rompis siajn kudrilojn, kaŝe ĵetis ilin tra la fenestron aŭ elglitigis ilin tra kelkaj fendoj; ŝi implikis kaj malpurigis sian fadenon, aŭ per lerta kaj kvieta gesto malproksimen ĵetis la bobenojn. Ŝiaj movoj estis tiel rapidaj kiel tiuj de profesia ĵonglisto, kaj ŝi

regis la vizaĝesprimon de siaj trajtoj kun ne malpli da kapableco. Kvankam f^ino Ofelio ne povis kredi ke tia multeco da akcidentoj estu normala, neevitebla evento, necesintus al ŝi ĉiumomente vigleco por kapti ŝian lernanton ĉe la freŝa faro.

Topsi baldaŭ famiĝis tra la tuta palaco. Ŝiaj kapabloj por ĉiaj pajacaĵoj, grimacoj, burleskaj imitaĵoj; ŝiaj talentoj por danci, kaprioli, grimpi, kanti, fajfi, reprodukti la sonojn kiuj trafis ŝian orelon, ŝajnis neelĉerpeblaj. Dum la amuzhoroj, ŝi kuntiris malantaŭ si ĉiujn infanojn kiuj sekvis ŝin mirigitaj kaj kun malfermita buŝo, sen escepti Evnjo^n, ensorĉitan de la diablaĵoj de Topsi, kiel turto ĉarmita de la rigardoj de serpento. F^ino Ofelio, malkvieta ke ŝi tiom serĉas la kompanion de ŝia lernantino, petegis al Sanklaro malpermesi tion.

- Ba ! Lasu la infanon trankvila, li diris, Topsi faros al ŝi bonon.

- Sed iu knabineto tiel malvirta ! Ĉu vi ne timas ke ŝi instruas al ŝi kelkajn malicaĵojn ?

- Evnjo ne povus lerni ilin. Topsi, esceptokaze, povas esti danĝera por aliaj; ne por Evnjo. Malbono glitas sur ŝian menson, kiel ruliĝas rosero sur brasika folio, sen eniri en ĝi.

- Ne estu tro fidema, rekomencis f^ino Ofelio, mi certigas vin ke mi neniam lasus miajn infanojn, se mi havus ilin, ludi kun Topsi.

- Ilin, bonege; sed pri mia filino, tio estas sendanĝera. Se Evnjo povintus esti difektita, ŝi estus antaŭ jarcentoj.

Topsi, unue nigra ŝafo, objekto de malŝato kaj de malestimo de la ĉefaj geservistoj, rapide devigis ilin ŝanĝi opinion. Oni baldaŭ ekrimarkis ke la plej eta ofendo farita al la eta nigrulino estis konstante pentofarita de hazarda akcidento. Paro da orelringoj aŭ aliaj preferataj galanterioj subite malaperis; kara tukpeco de tualeto estis makulita aŭ

perdita; la kulpulo stumblis kontraŭ kaldronon da bolanta akvo, aŭ ricevis diluvon da malpura akvo sur sian festan veston. Ĉu iu enketo okazis ? Tute ne ekzistis deliktinto. Topsi, plurfoje asignita antaŭ la barilo de la geservistoj, antaŭ tuta areopago, eltenis la ekzamenon kun sia kutima seriozeco, kaj prezentis plenan elmontron de la plej edifa senkulpeco. Neniu kiu dubis pri ŝia kulpeco; neniu kiu sukcesis trovi pruvon, kaj f^ino^ Ofelio estis tro justa por puni pro konjektoj.

La malicaĵoj ankaŭ prenis strangege sian tempon, kaj la agresanto sciis ŝirmi sin. La venĝoj kontraŭ Roza kaj Jane, la du ĉambristinoj, okazis ĝuste kiam ili falis (*tio kio ne estis malofta*) en plenan malfavoron kun sia mastrino, kaj kiam neniu plendo de ili havintus ŝancon veki simpation. Resume, Topsi perfekte sukcesis komprenigi al ĉiu ke estas pli saĝe respekti ŝian ripozon, kaj konsekvence, oni lasis ŝin trankvila.

Ŝi ĝuis maloftan lertecon, kaj alportis al manaj laboroj tiom da energio kiom da aktiveco. Ŝi lernis kun multe da rapideco tion kion oni instruis al ŝi; malmultaj lecionoj donis al ŝi tiel perfekte klarigojn pri ĉio kio koncernis la ĉambron de f^ino^ Ofelio, ke la plej detalema postulo ne povus trovi ŝin eraranta. Neniam homaj fingroj sukcesus pli bone etendi, glatigi la littukojn, pli zorgoplene aranĝi la kapkusenojn, balai, senpolvigi, ordigi kun pli da perfekteco ol tiuj de Topsi, kiam ŝi bonvolis. Sed ŝi ne ĉiam volis. Se f^ino^ Ofelio, post tri aŭ kvar tagoj da skrupula kontrolado, imagis povi fidi Topsi^n^ kaj okupiĝi pri aliaj zorgoj, Topsi okazigis en la ĉambro, dum unu aŭ du horoj, veran karnavalon. Anstataŭ pretigi la liton, ŝi malaranĝis ĝin, demetis la kusensakojn kaj envolvis sian lanan kapon en ĝin, ĝis kiam ŝi faris al si groteskan perukon el plumoj. Ŝi grimpis kiel kato laŭlonge de la kolonetoj kiuj subtenis la baldakenon; kaj atinginte la supron, pendigis sin kun kapo malsupren. Ŝi svingis la litotukojn, kiujn ŝi trenis

ĉien en la apartamento. Ŝi vestis la kolbaskusenon per la nokta tualeto de sia mastrino, por poste ludigi al ĝi ĉiajn pantomimojn, kantante, fajfante kaj mem regalante sin antaŭ la spegulo per la plej ridigaj grimacoj. Resume, ŝi diable petolis, aŭ laŭ la esprimaniero de f^ino Ofelio, "ŝi elvokis Kaino^n".

Iam, la mastrino, pro nekredebla malatento de ŝi, forgesinte sian ŝlosilon sur iu tirkesto, trovis sian lernanton misvestita de grandioza ruĝa turbano, farita el sia plej bela ŝalo el ĉina krepo, kiun Topsi ĉirkaŭplektis ĉirkaŭ sia kapo, dum ŝi pompe deklamis antaŭ la spegulo.

- Topsi, ekkriis la kompatinda f^ino ĉe la limo de sia pacienco, kiel vi povas tiamaniere agi ?

- Mi ne scii, mastrino, eble esti ĉar mi esti tiel malica !

- Mi ne plu scias kion fari de vi, Topsi !

- Disinjoro ! Mastrino, necesi vipi min. Maljuna mastrino ĉiam vipi min. Mi ne kapabli labori sen esti batita.

- Sed, Topsi, mi ne havas la plej malgrandan emon por frapi vin. Vi kapablas bone fari se vi volas ! Kial vi ne volas tion !

- He, nu, mastrino, mi esti ĉiam vipita; eble, tio esti bona por mi !

F^ino Ofelio provis la recepton. Topsi senŝanĝe faris la plej teruran bruegon, kriante, ĝemante, kriegante, petegante. Poste, sidanta post kvaronhoro sur iun elstaraĵo de balkono, ĉirkaŭita de admiranta rondo de etaj genigrulidoj, ŝi laŭte esprimis sian malestimon por la tuta afero.

- Disinjoro ! Fraŭlino Felio, vipi, ne eĉ mortigi moskiton per sia vipetado ! Necesi vidi maljunan mastron ! Li ja flugigi karnon ĉien ! Tio esti vipadi ! Mastro havi sperton !

Topsi fieregis pro siaj stultaĵoj kaj krimoj, kiujn ŝi rigardis kiel tute apartan distingaĵon.

- Disinjoro ! Vi ja negroj, ŝi diris al kelkaj el siaj aŭskultantoj, vi eble ne scii ke vi esti pekuloj ! Nu, vi esti tia; ĉiuj esti pekuloj, la blankuloj tute same, fraŭlino Felio diri tion. Mi kredi la negrojn esti la plej gravajn ! Sed, Disinjoro ! Tio esti nenio apud mi. Mi esti tiel malica, tiel malica, ke neniu kapabli fari ion de mi, tute nenion. Mi fiere kolerigi maljunan mastrinon, nu ! Necesi vidi kiel ŝi sakradi al mi ! Ha ! Ha ! Mi esti certe la plej malica el la malicaj estuloj de la mondo !

Post tio Topsi faris kapriolon, grimpis iun gradon pli alte sur sia sidstango, kaj paradis, fiera pro tiom da distingiĝo.

Ĉiun dimanĉon f^ino Ofelio, kun fervora graveco, recitigis de Topsi ŝian katekismon. La infano havis la memoron pri vortoj, kaj ripetis kun facileco kiu kuraĝigis la instruistinon.

- Kian bonon vi volas ke tio faru al ŝi ? demandis Sanklaro.

- Sed katekismo ĉiam estis bona por la infanoj; estas tio kion ili lernas, vi bone scias tion, respondis f^ino Ofelio.

- Ke ili komprenas ĝin aŭ ne ! Insistis Sanklaro.

- Ho ! Ili unue neniam komprenas ĝin; sed, laŭmezure kiel ili kreskas, tio rememorigas al ili.

- La mia ne ankoraŭ rememorigis al mi, kaj tamen, mi firme agnoskas tion, kuzino, vi ellernigis ĝin al mi kiam mi estis juna.

- Ha ! Vi mirinde lernis, Aŭgusteno; vi estis infano kun grandaj esperoj.

- Ĉu mi trompis ilin, kuzino ?

- Mi dezirus, Aŭgusteno, ke vi estu tiel bona nun kiel vi tiam estis bonega.

- Ankaŭ mi, kuzino. Tiel do, kuraĝon, kaj daŭrigu ĝissate katekizi Topsi^n; ni vidos tion kio okazos al ŝi.

La temo de la kolokvo, restinta stara, kun la manoj pie krucitaj kiel malgranda bronza statuo, tiam daŭrigis per

klara voĉo, ĉe signo de f^ino Ofelio :

- Niaj unuaj gepatroj, forlasitaj ĉe sia propra volo, falis de la stato en kiu Dio kreis ilin…

La okuloj de Topsi flagris pro scivolemo.

- Kio okazas, Topsi ? diris f^ino Ofelio.

- Bonvolu, mastrino, ĉu ne esti la Ŝtato de Kintuk[28] ?

- Kio, Topsi, kiu ŝtato ?

- Tiu ŝtato de kie ili fali ! Mastro diri tiel ke ni veni de Kentuk ? Sanklaro eksplodis per rido.

- Se vi ne klarigos tion al ŝi, ŝi ĉagreniĝos, li diris. Mi vidas en tio aperi kompletan teorion pri elmigrado.

- Mi petegas, Aŭgusteno, silentu. Kiel mi povas atingi ian ajn rezulton, se vi senĉese mokas ?

- Nu, honore, mi ne plu ĝenos viajn ekzercojn.

Kaj Sanklaro, prenante la gazetojn, sidiĝis en la salonon ĝis kiam Topsi finis reciti. Ŝi bonege ripetis; nur fojfoje ŝi transponis, laŭ la plej amuza maniero, kelkajn gravajn vortojn, kaj persistis en eraro, kvankam ofte korektita. Malgraŭ ĉiuj siaj promesoj esti saĝa kaj muta, Sanklaro, kiu prenis petolan plezuron pro ĉi tiuj eraroj, alvokis Topsi^n al si, kiam li volis iom sin distriĝi, kaj spitante la admonojn de f^ino Ofelio, ripetigis al ŝi la tiklajn eltiraĵojn.

- Kiel vi volas ke mi faru ion de la infano, se vi tiamaniere agas, Aŭgusteno ! ekkriis la kuzino.

- Nu, tio estas tre malbona, mi ne plu revenos al ĝi; sed estas tiel amuze aŭdi la amuzan bildeton stumbli pri tiuj gravaj vortoj !

- Vi fortigas ŝin en ŝiaj eraroj.

- Ne gravas ! Por ŝi, unu vorto valoras la alian.

- Vi deziras ke mi bone eduku ŝin. Tiam vi devus memori ke ŝi estas racia estulino, kaj saĝe uzi vian influon sur ŝin.

28 Kentukio.

- Ho ! Tragika ! Jes, kuzino, mi devus ! Sed, kiel Topsi diras pri si mem, mi estas tiel malica !

La edukado de la eta nigrulino daŭris kun ĉi tiuj agmanieroj dum unu aŭ du jaroj. La ĉiutaga persekutado kontraŭ f^ino Ofelio fariĝis por ŝi speco de kronika sufero, al kiu Topsi kutimiĝis, tiel kiel aliaj kutimiĝas al migreno aŭ al neŭralgio. Sanklaro amuzis sin per la infano kiel per melopsitako aŭ halthundo, kaj kiam la stultaĵoj de Topsi faligis ŝin en malfavoron, ŝi tre bone sciis rifuĝi malantaŭ la seĝo de la mastro, kiu per iu maniero aŭ alia, pacigis. Ŝi ankaŭ ricevis de li, de tempo al tempo, moneretojn, rapidege interŝanĝitajn kontraŭ nuksoj kaj kando, kiujn ŝi poste distribuis kun senzorga malavareco al ĉiuj nigrulidoj de la domo. Ĉar, por rekoni la meritojn de Topsi, ŝi estis malavara kaj el bona naturo. Ŝiaj rankoroj, ŝiaj malicoj povis, verdire, esti rigardata kiel persona defendo.

22. En Kentukio.

Ni iros dum mallonga intertempo rekonduki la leganton al la bieno de Kentukio, kaj vidi tion kio okazas tie.

Estis dum varma somera posttagmezo, ĉirkaŭ vespero. La pordoj kaj fenestroj, tute larĝe malfermitaj, invitis la brizon eniri, se eĉ malmulte ĝi inklinus al tio. La larĝa vestiblo, kiu etendiĝis laŭlonge de la domo, apudestis la salonon, kaj finiĝis per balkono ĉe ambaŭ finoj. S^ro Ŝelbi, balanciĝanta en lulseĝo, kun la kalkanoj apogitaj sur seĝo, ĝue gustumis la bonodoron de sia cigaro. Lia edzino babilis, sidanta apud la pordo. Ŝi ŝajnis havi ion sur la koro, kaj atendi la okazon por paroli.

- Ĉu vi scias, ŝi finfine diris, ke Kleo ricevis leteron de Tomo ?

- Ha ! Vere ! Do Tomo tie trovis iun amikon. Kiel li fartas, la kompatinda diablo ?

- Li estis aĉetita de familio kiun mi kredas tre distingita, diris S^ino Ŝelbi; li estas bone traktata, kaj ne havas multon por fari.

- Ha ! Des pli bone ! Mi estas kontentega ! reparolis kore S^ro Ŝelbi. Mi supozas ke li tute akomodiĝis al sia suda restadejo, kaj apenaŭ zorgas pri reveno ĉi tien ?

- Male, li demandas kun multe da malsereneco ĉu la mono por lia elaĉeto baldaŭ estos preta.

- Vere, mi tute ne scias. Kiam la aferoj deflankiĝas, ne estas kialo por ĉesi. Estas kvazaŭ oni saltus de torfejo al torfejo, tra marĉejo. Necesas pruntepreni de unu por pagi la alian, poste repruntepreni de la alia por pagi unu. Kaj tiuj damnitaj leteroj dense pluvas kiel hajlo. Antaŭ ol viro havu tempon por fumi cigaron aŭ sin turni, leteroj de kreditoroj,

urĝaj kaj premaj mesaĝoj, ĉiuj samtempe alsturmas vin.

- Ŝajnas al mi, mia amiko, ke ni povus rebonigi tion. Ni supozu ke ni vendus ĉiujn niajn ĉevalojn kaj unu el niaj bienoj; ni povus tiam kontante pagi.

- Ho ! Tio estas absurda, Emilia ! Vi estas la plej perfekta virino en Kentukio; sed vi ne havas komunan saĝon en negocoj. Virinoj ne kapablas, kaj neniam kapablos.

- Ĉu vi ne povus almenaŭ doni al mi prezenton de la viaj ? Ekzemple, la listo de tio kion vi ŝuldas, kaj de tio kion oni ŝuldas al vi, kaj mi provos vidi ĉu mi povas helpi vin ŝpari.

- Ho ! Mi petegas, ne persekutu min, Emilia ! Mi ne povas diri ion pozitivan al vi. Mi proksimume scias kie la aferoj estas; sed ne eblas tranĉi kaj kvadratigi miajn aferojn kiel la pastecxo en pasto de Kleo. Vi ne konjektas pri tio kio estas, mi diras tion al vi.

Kaj S^ro^ Ŝelbi plifortigis siajn ideojn per la tuta amplekso de sia voĉo; oportuna kaj konvinka maniero por argumenti kiam ĝentlemano diskutas pri aferoj kun sia edzino.

S^ino^ Ŝelbi silentis; ŝi sufokis suspiron. Kvankam ŝi estis nur virino, tiel kiel diris ŝia edzo, ŝi fakte havis klarvidan, viglan, praktikan inteligenton kaj fortikecon de la karaktero tre superan al tiu de sia edzo. Tiel ke ne estintus tiel absurda kiel supozis S^ro^ Ŝelbi rezervi al ŝi parton en la administrado de la posedaĵoj. Firme decidita plenumi la promeson faritan al Kleo kaj Onklo Tomo, ŝi afliktiĝis pro la multaj obstakloj kiuj paralizis ŝian bonvolon.

- Ĉu vi pripensas iun rimedon por kolekti ĉi tiun monon ? Kompatinda onklino Kleo ! Ŝi havas tion tiel grave al sia koro !

- Mi bedaŭras. Mi tro rapide promesis. Mi ne scias ĉu ne valorus pli bone diri tion al Kleo, kaj instigi ŝin rezignacii. Post unu aŭ du jaroj Tomo havos alian edzinon, kaj siaflanke

ŝi ankaŭ bone faros zorgi pri si mem.

- Neniam mi povus doni tian konsilon al Kleo, sinjoro Ŝelbi. Mi instruis al miaj homoj ke iliaj geedzecoj estas same sanktaj kiel la niaj.

- Estas bedaŭrinde ke vi troŝarĝis ilin per moraleco tre super ilia situacio kaj iliaj atendoj. Mi ĉiam pensis tion.

- Ĉi tio estas nur la moraleco de la Biblio, sinjoro Ŝelbi.

- Bone, bone, Emilia. Mi ne deziras interveni en viaj religiaj ideoj; nur ili ŝajnas al mi tre malmulte destinita por la homoj de ĉi tiu kondiĉo.

- Tio estas vera, kaj jen kial mi funde de mia animo malamas la sklavecon kaj ĉion kio rezultas de ĝi. Mi ripetas tion al vi, amiko mia, mi ne kapablus nuligi la promesojn kiujn mi faris al ĉi tiuj kompatindaj geestuloj. Se mi ne sukcesos alimaniere akiri la monon, mi donos lecionojn pri muziko. Mi scias ke mi facile havos sufiĉe da lernantoj por mem perlabori la necesan sumon.

- Vi ne tiagrade malnobliĝus, Emilia ! Neniam mi konsentos tion.

- Malnobliĝi ! Ĉu ne estus miloble pli malnoblige malplenumi promeson al forlasitaj malriĉuloj ?

- Mirinde bone ! Vi ĉiam estas heroa; vi ŝvebas en la nuboj ! reparolis S^{ro} Ŝelbi. Sed, antaŭ ol vin riski en ĉi tiu donkiĥotismon, vi bone farus pripensi tion.

Nune la konversacio estis interrompata de la apero de onklino Kleo ĉe la fino de la verando.

- Mastrino, voli veni por minuto ?

- Kio, Kleo ? Kio estas ? diris S^{ino} Ŝelbi ekstarante kaj irante al la balkono.

- Se mastrino voli iomete rigardi ĉi tiun aron da birajĵoj ? Kleo fantazie nomis la birdajĵon birajĵon; ŝi persistis en ĝi malgraŭ la oftaj avertoj de la junaj familianoj.

"Sinjoro bona Dio ! ŝi diris, mi ne vidi la diferencon.

Birdaĵo aŭ biraĵo esti ĝuste la sama afero; havi plumojn kaj flugi, kaj esti bona por manĝi; jen ! Kaj ŝi tiel konfirmis sin en sia eraro".

S^ino Ŝelbi ridetis vidante la kokidaĵojn kaj anasaĵojn amase kuŝantajn sur la grundo, kiujn Kleo kontemplis kun meditema mieno.

- Eble, mastrino, ŝati ja havi unu aŭ du en pasteĉo ?

- Vere, onklino Kleo, tio estas al mi preskaŭ egala, preparu ilin kiel vi volos.

Kleo malatente daŭrigis palpi la birdaĵojn. Evidente ŝia menso estis aliloke. Fine, kun la mallonga rido kiu, ĉe homoj el sia raso, ofte antaŭas hazardotan proponon, ŝi diris :

- Sinjoro bona Dio ! Kial do mastro kaj mastrino, ili sin turmenti por fari monon, anstataŭ uzi siajn manojn ? Kaj ŝi denove ekridis.

- Mi ne komprenas vin, Kleo, *diris S^ino Ŝelbi divenante per kelkaj indicoj ke ĉiu vorto de la konversacio kiu ĵus okazis inter si kaj sia edzo, estis aŭdita.*

- He ! Disinjoro, mastrino, diris Kleo ankoraŭ ridante, la aliaj mastroj ludoni siajn genigrulojn, kaj tiel gajni multon. Ili ne amuziĝi konservi amason da homoj por ruinigi la domon, kaj ĉio !

- Nu Kleo, kiun vi proponus al ni ludoni ?

- Disinjoro ! Mi proponi nenion, mastrino ! sed Samĉjo, la nigra, diri ke esti en Luizurbo unu el tiuj papistoj, kiel oni nomi ilin, kiu voli trovi bonan farantinon de kukoj kaj bakaĵoj. Li diri ke li doni al ŝi po kvar dolaroj semajne, li diri tion !

- Nu, Kleo ?

- Nu, mastrino ! Ŝajni al mi ke jam esti tempo ke Salio iomete enŝovi siajn manojn por partopreni la penon. Salio preni bonajn lecionojn de mi, kaj ŝi fari preskaŭ same bone; tio esti kiam ŝi zorgi. Kaj se mastrino voli lasi min iri, mi helpi lukri monon. Mi ne timi meti miajn kukojn, nek ankaŭ

miajn bakaĵojn, apud tiujn de iu ajn papisto.

- Pa-n-isto, Kleo.

- Sinjoro bona Dio ! Mastrino ! Ne esti granda diferenco. Vortoj esti tiel strangaj ! Ĝi ne ĉiam voli lasi sin diri de la kompatinduloj.

- Sed, Kleo, necesus al vi lasi viajn infanojn.

- Ho ! La knaboj esti sufiĉe aĝaj por elturniĝi, esti tute lertaj ! Kaj Salio prizorgi la etulinon, ŝi esti tiel vigla, la karulo ! Preskaŭ ne plu bezoni gvidi ŝin.

- Luizurbo estas tre malproksima.

- Ho, Disinjoro ! Mi ne maltrankviliĝi ! Ĝi esti direkte al Malsupra Rivero, ie apud mia kompatinda edzo, eble, diris Kleo per demanda tono, rigardante S^inon^ Ŝelbi^on^.

- Ne, Kleo; ĝi estas je pluraj centoj da mejloj *(plufoje 160Km)*.

La vizaĝo de Kleo plilongiĝis.

- Ne gravas ! Irante al Luizurbo vi proksimiĝos al li. Jes, vi povas iri, kaj ĉiuj viaj salajroj, ĝis la lasta speso, estos rezervitaj por la elaĉeto de via edzo.

Foje brila sunradio ŝanĝas malhelan nubon en monon, tiel la nigra vizaĝo de Kleo subite lumiĝis kaj fariĝis brilega.

- Disinjoro ! Mastrino ĉiam tiel bona, tro bona ! Mi, esti delonge remaĉinta la aferon: ne plu bezoni surmeti robon, nek ŝuojn nek ion alian. Meti ĉion flanken, ĉiujn monojn. Kiom da semajnoj esti en jaro, mastrino ?

- Kvindek du.

- Tiom multe ! Kaj kvar dolaroj por ĉiu semajno, kion tio povi fari ?

- Ducent ok dolarojn, respondis S^ino^ Ŝelbi.

- Ha ! Ho ! diris Kleo kun miro kaj ĝojo. Kaj kiom da tempo necesi labori, mastrino, por havi la tutan monon ?

- Kvar aŭ kvin jarojn, Kleo; sed vi ne devos ĉion perlabori, mi aldonos ion al ĝi.

- Ho ! Mi ne povi elteni la ideon ke mastrino doni lecionojn, aŭ ion ajn. Mastro havi bonegajn kialojn por ne voli ! Tio ne povi taŭgi. Neniu en la familio iam tiom humiliĝi, mi esperi, tiel longe kiel kompatinda Kleo havi brakojn.

- Estu trankvila, Kleo, mi zorgos pri la honoro de la familio, diris S^ino Ŝelbi ridetante. Sed kiam vi intencas foriri ?

- Ho ! Mi ne kalkuli, sed esti Samĉjo, la nigra, kiu morgaŭ malsupreniri al la rivero kun la ĉevalidoj. Kaj li diri ke li povi alkonduki min, tiel ke mi ĵus fari mian pakon. Se mastrino voli, mi foriri kun Samĉjo morgaŭ matene. Mastrino doni al mi mian permesilon, kaj skribi al mi etan _komendan leteron.

- Nu, Kleo, mi zorgos pri tio, se S^ro Ŝelbi konsentas. Mi tuj parolos pri tio kun li.

S^ino Ŝelbi supreniris, kaj onklino Kleo, ravita, revenis hejmen por fari siajn preparojn.

- Nu, Massa Georgio, ĉu vi ne scii ? Mi iri al Luizurbo morgaŭ ! *ŝi diris al la juna mastro kiu, enirante en la kabanon, trovis ŝin okupata kolekti la etajn vestaĉojn de Paola*. Mi pensi kontroli ĉiujn etajn aferojn kaj iomete plilarĝigi ilin. Sed mi iri, Massa Georgio ! Mi iri gajni kvar dolarojn semajne ! Kaj mastrino flankenmeti ĉiujn por elaĉeti mian maljunulon !

- Hura ! diris Georgio, jen ŝtatrenverso ! Kiel vi foriros, onklino Kleo ?

- Morgaŭ kun Samĉjo. Nune, Massa Georgio, necesi sidiĝi tien por skribi al mia maljunulo kaj rakonti al li ĉion ĉi. Ĉu vi bonvoli ?

- Certe ja, diris Georgio. Onklo Tomo forte ĝojos ricevi niajn novaĵojn. Mi tuj kuros hejmen serĉi paperon kaj inkon. Kaj mi povos samtempe sciigi al li la naskiĝon de la etaj ĉevalidoj, kaj la ceteron, vi scias, onklino Kleo.

- Certe, massa Georgio. Rapidi dum mi tuj pretigi por vi iom da kokidaĵo, aŭ kelkan alian bonan pastecêton. Vi ne plu havi bonajn vespermanĝojn kiel ĉe via kompatinda onklino !

23. La Herbo sekiĝas, la Floro velkas.

Por ĉiuj, la vivo fluas tagon post tago; ĝi tiel forfluis por Tomo, kaj du jaroj pasis. Disigita de ĉio kion li amis, lia penso transigis lin per doloraj impulsoj al tiuj kiujn li lasis malantaŭ si, kaj tamen li ne sentis sin tute malfeliĉa. La harmonio de la animo estas tiel perfekta ke la supera ŝoko, kiu samtempe rompas ĉiujn kordojn, kapablas nur detrui la agordon. Se ni revizitus en nia memoro la longajn jarojn de afliktoj kaj suferoj, ni trovus ke ĉiu horo verŝis sian parton de dolĉiĝoj, de neantaŭviditaj distroj; kaj ke, sen povi diri sin feliĉan, oni ankaŭ ne estis tute mizera.

En la libro kiu, per si mem, konsistigis lian tutan bibliotekon, Tomo legis : "*Volonte ricevu ĉion kio okazos al vi, kaj kviete eltenu la ŝanĝojn kiuj afliktos vin*". Ĉi tiu saĝa doktrino plej bone akordiĝis kun la pripensitaj kutimoj, kun la milda sereneco kiun li ĉerpis el la konstanta legado de tiu sama libro.

La respondo al lia letero, ricevita siatempe, estis skribita, ni diris tion, de Massa Georgio, de bona, ronda kaj firma mano de lernanto. Laŭ la propraj paroloj de Tomo, "*Tio povis preskaŭ esti legi de unu fino de la ĉambro al la alia*". Oni vidis kiel onklino Kleo per sia kapablo pri kukaĵo lukris dikajn salajrojn ĉe panisto en Luizurbo, monon kiun kolektiĝis por kompletigi la elaĉeton de Tomo; kiel prosperis Moseo kaj Petro; kiel la eta karulino trotetis tra la tuta domo, sub la ĝenerala gardado de la familio, kaj aparte de Salio. La kara kabano, verdire, nuntempe estis fermita, sed Georgio senfine parolas pri la ornamaĵoj kaj aldonoj kiuj devos signali la revenon de onklo Tomo.

La cetero de la letero enhavis : la liston de la studoj de

Georgio; ĉiu artiklo kape ornamita de bonega ĉeflitero; plus la nomojn de kvar ĉevalidoj naskitaj ekde la foriro de Tomo; kaj, per la sama spiro, Georgio informis ke panjo kaj paĉjo fartis bone. Ĉi tiu letero, laŭ naiva kaj konciza stilo, ŝajnis al onklo Tomo la plej malofta peco de elokventeco de la modernaj tempoj. Li ne povis laciĝi legi kaj relegi ĝin, kaj li havis, kun Evnjo, longan konsulton por scii ĉu li ne enkadrigus ĝin, por pendigi ĝin en sia ĉambro. La sola malfacileco samtempe elmontri ambaŭ flankojn de la paĝo nuligis ĉi tiun projekton.

La amikeco de Tomo kaj Evnjo kreskanta kun ŝia aĝo, estus malfacile diri kian lokon la afabla infano okupis en tiu tenera kaj sindona koro. Tomo amis ŝin kiel ion surteran kaj nefortan, kaj samtempe preskaŭ adoris ŝin kiel tute ĉielan naturon. La itala maristo ne kontemplas la infanon Jesuon kun pli da pietato kaj tenereco. Lia feliĉo estis iri renkonte al la sendanĝeraj fantazioj, antaŭiĝi la mil dezirojn, ŝanĝiĝeman kaj buntan ĉielarkon de infanaĝo. Matene, ĉe la merkato, liaj okuloj trarigardis la montrajn tablojn de floroj, serĉante por Evnjo la plej maloftajn. La plej velureca persiko, la plej ora oranĝo, estis enŝovitaj en lian poŝon por esti ĉe la reveno proponitaj al la knabineto kiu gvatis lin ĉe la pordo. La ĝuoj de Tomo estis vidi tiun radian vizaĝon, estis aŭdi la infanan demandon : "Onklo Tomo, kion vi alportas al mi hodiaŭ ?"

Por rekoni ĉi tiujn tenerajn atentojn, Evnjo tute ne ŝuldis. Kvankam infano, ŝi admirinde bone legis. Ŝia orelo sensiva por muziko, ŝia poezia kaj vigla pensmaniero, ŝia denaska simpatio por la nobleco kaj la beleco, donis al ŝi, ĉefe kiam ŝi legis la Biblion, emfazojn kiuj emociis ĝisfunde la koron de Tomo. Unue ŝi volis nur plezurigi lin; baldaŭ ĉiuj sopiroj de ŝia arda naturo alkroĉiĝis, volviĝis ĉirkaŭ la sankta libro. Ŝi amis ĝin por ĝi mem; ĉar ĝi vekis en ŝi strangajn

impulsojn, ĉar ĝi penetris ŝin per tiuj malklaraj, profundaj emocioj, en kiuj la junaj imagoj, aktivaj kaj pasiaj ĝojas.

Ĉefe estis la Apokalipso kaj la Profetaĵoj kiuj ĉarmis ŝin. Iliaj mallumaj kaj mirindaj bildoj, ilia fervora lingvaĵo, des pli impresis ŝin ke ŝi ne sukcesis klare kapti la signifon. Ŝi kaj ŝia naiva amiko, la maljuna infano kaj la juna, sentis sin egalaj pri tio. Ili ambaŭ sciis ke la libro parolis pri gloro kiu iam ekaperos, pri venendaj mirindaĵoj, mirindaĵoj en kiuj iliaj animoj disfloris sen scii kial. Ne estas pri moralaj sciencoj kiel pri fizikaj sciencoj, la nekomprenebleco ne ĉiam estas sen profito. La animo vekiĝas, kompatinda fremdulo, tremanta inter du misteraj eternecoj, la eterna pasinteco, la eterna estonteco. Nur unu punkto klariĝas ĉirkaŭ ĝi, kaj ĝi senĉese aspiras al la nekonataĵo. La konfuzitaj alvokoj, la malkleraj signoj kiuj venas al ŝi de tiu kolono el fajro kaj el nuboj, kiu paŝadas antaŭ generacioj, kiel iam antaŭ la Izraelidoj, vekas en ŝi potencajn eĥoj. La mistikaj bildoj de la Biblio estas por ŝi kiel tiom da talismanoj, grandvaloraj ŝtonoj stampitaj de nekonataj hieroglifoj; ŝi kolektas ilin en sia koro, atendante ke la vualo de la templo sin ŝiros, kaj ke ŝi kapablos legi ilin en tiu lumo, kiu dispelos la tutan malklarecon.

La someraj varmoj forpelintaj el la sufoka kaj malsaniga urbo, ĉiujn kiuj povis iri spiri en la kamparo la freŝajn marajn ventetojn, Sanklaro elmigris kun sia tuta domanaro al sia vilao ĉe la lago Ponĉetrejn.

Ĝi estis ĉarma hinda dometo, ĉirkaŭita de maldikaj kaj elegantaj verandoj el bambuoj, kaj lokita meze de ĝardenoj kaj parkoj. La granda kunvenejo eliris sur florbedon kie abundis pitoreskaj plantoj, belegaj floroj el tropikoj. Pluraj padoj serpentis meze de ĉi tiu grandioza vegetaĵaro, kaj kondukis al la rando de la lago, kies la arĝenta tavolo leviĝis kaj malleviĝis sub la sunradiojn; admirinda vido, kaj kiu,

senĉese varia, ĉiam ŝajnis pli bela !

La subironta suno flamigis la horizonton; la lago ŝajnis alia ĉielo striita de roz- kaj or-koloro, sur kiu trairis kiel tiom da anĝelaj spiritoj, la blankaj flugiloj de ŝipoj. Vekiĝante meze de tiu purpura nimbo, malgrandaj steloj ekscintilis, kaj rigardis sian delikatan bildon tremeti sur la akvosurfaco. Tie, sub la laŭbo rande de la lago, dum bela dimanĉa vespero, Evnjo kaj Tomo sidiĝis sur teralto kun musko. La Biblio de Evnjo estis malfermita sur ŝiaj genuoj, ŝi legis : "Post tio, la anĝelo vidigis al mi riveregon de viva akvo klara kiel kristalo, kaj kiu eliris el la trono de Dio…"

- Tomo, diris Evnjo subite haltanta kaj montranta la lagon, jen ĝi !

- Kio, fraŭlino Evnjo ?

- Ĉu vi ne vidas ĝin ? Tien ! *ripetis la infano montrante la travideblajn akvojn kaj la ondojn kiuj reflektis la purpuron kaj la oron de la ĉielo.*

- Estas vere, fraŭlino Evnjo, *diris Tomo; kaj Tomo ekkantis* :

La mateniĝo pruntedonu al mi siajn flugilojn,
Anĝelo etendu al mi la manon,
Tiel ke al la eternaj bordoj,
Al la nova Jerusalemo,
Mi flugu en la matena lumeto !

- Kie vi kredas ke ĝi estas, Nova Jerusalemo, onklo Tomo ?

- Ho ! Altege en la nuboj, fraŭlino Evnjo !

- Tiam mi vidas ĝin, mi pensas. Rigardu tiujn nubojn ! Ili estas kiel grandaj portaloj el perlamotoj. Kaj transen, for, for transen, ĉio estas el oro, Tomo. Kantu do al mi brilantajn spiritojn.

Tomo kantis la himnon tre konata de la metodistoj :

Mi vidas ilin ĉi tiujn brilajn spiritojn,

Meze de la eterna gloro,
Tute kovritaj de blankaj vestoj.
Ili kantas la himnon de venko !

- Onklo Tomo, mi vidis ilin ! diris Evnjo.

Tomo sentis nek dubon nek surprizon. Evnjo dirintus al li ke ŝi estis forrabita al la ĉielo, ke li trovintus la aferon sufiĉe natura.

- Ili venas viziti min kiam mi dormas, ĉi tiuj spiritoj, ŝi diris; kaj ŝiaj okuloj vualiĝis kiam ŝi tute mallaŭte ekkantis :

Mi vidas ilin ĉi tiujn brilajn spiritojn,
Meze de la eterna gloro,
Tute kovritaj de blankaj vestoj.

- Onklo Tomo, ŝi daŭrigis, mi tuj iros…

- Kien, fraŭlino Evnjo ?

La infano, stara, per sia maneto montris la ĉielon; kaj kun la okuloj levitaj supren, dronita kiel ŝi estis en la brilegoj de la sunsubiro, ŝiaj oraj haroj, ŝiaj ruĝiĝantaj vangoj, brilis per dia brilo.

- Mi tuj iros tien ! ŝi ripetis, al la brilaj spiritoj, Tomo ! Mi iros antaŭ nelonge.

La tenera kaj fidela koro sentis subitan ŝokon. Tomo memoris ke, ekde ses monatoj, la manetoj de Evnjo ofte sajnis al li gracilaj; ŝia haŭto fariĝis pli travidebla, ŝia spiro pli manka. Ŝi rapide laciĝis, kaj restis tute malvigla se eĉ malmulte ŝi provis ludi en la ĝardeno, kie antaŭe ŝi gaje petolis dum tutaj horoj. Tomo aŭdis f^{inon} Ofelio^{n} paroli pri la persista tusado kiun ĉiuj ŝiaj kuraciloj ne sukcesis resanigi. Kaj, ĉimomente mem, tiu arda vango, tiuj diafanaj manetoj, brulis per malrapida febro.

Kaj tamen la malgaja penso kiun elvokis la paroloj de Evnjo neniam venis al li.

Ĉu estis infanoj similaj al Evnjo ? Jes, estis; sed iliaj nomoj estas surskribitaj sur tomboj, kaj iliaj dolĉaj ridetoj,

iliaj ĉielaj okuloj, iliaj paroloj, iliaj strangaj faroj, restas enfositaj, doloraj trezoroj, funde de pli ol unu afliktita koro. Ĉu vi ne konis ĉi tiujn familiajn legendojn, ĉi tiujn rakontojn pri la gracioj, pri la boneco de tiu kiu foriris ? Tiu kies ĉiela ĉarmo tiel multe superis la ĉarmojn de tiom da aliaj kiuj restadas ? Ĉu oni ne dirus ke tie supre, la tasko de la anĝelaro estas sin malkroĉi, unu post la alia, por veni pasigi tempon sur la tero, kaj esti amata tie de perditaj koroj, kiujn ili poste kuntiras post si, reirante al la ĉielo ? Tial, kiam vi vidas la profundan rigardon lumiĝi per supernatura brilo, kiam la juna animo montriĝas per pli mielaj, pli saĝaj paroloj ol tiuj kiuj apartenas al infanaĝo, ne esperu reteni la karulon. Li estas markita de la dia sigelo, kaj la senmorteco radias en lia okulo.

Tiel pri vi, Evnjo la kara amatino, radianta stelo de via loĝejo ! Vi baldaŭ malaperos, kaj tiuj kiuj plej amas vin, malmulte suspektas tion.

La dialogo de Evnjo kaj Tomo estis interrompata de la ripetitaj alvokoj de f^{ino} Ofelio.

- Evnjo ! Evnjo ! Nu, infano ! La vesper-roso falas; vi ne devus esti ekstere.

Evnjo kaj Tomo rapidis rehejmeniri.

F^{ino} Ofelio ne plu estis juna, kaj ŝia sperto kiel flegistino estis longa. Naskiĝinta en Nov-Anglio, ŝi konis sufiĉe bone la perfidan evoluon de ĉi tiu insida malbono kiu plukas la plej belajn, la plej amatajn, kaj kiu markas ilin per la nerevokebla stampo de la morto, antaŭ ol la plej eta fibro de vivo ŝajnas trafita. Ŝi rimarkis ĉi tiun delikatan kaj sekan tuson, tiujn vangojn pli brilajn de tago al tago. La brilo de la okulo, la febra agitado de la movoj ne povis iluzii ŝin.

Ŝi provis komuniki siajn maltrankvilojn al Sanklaro, sed li repuŝis ilin tre for, kun nervoza senpacienco, tute malsama ol lia kutima senzorgeco.

- Ho ! Sufiĉe da grakadoj, kuzino, mi abomenas ilin ! Ĉu vi ne vidas ke la infano kreskas ? Ne ekzistas, dum la kreskada momento, junulino kiu ne malgrasiĝas.

- Sed ĉi tiu tuso !...

- Sensencaĵoj ! Tuso ! Estas nenio; eble malvarmumeto.

- Sed, estas ĝuste tiel ke tio komenciĝis por la kompatinda Eleonoro Jakobo, kaj por Helena, kaj por Martena Sanders...

- Ho ! Ŝparu al ni la funebrajn listojn kaj la fabelojn pri fantomoj. Vi fariĝas tiel saĝaj kaj sagacaj, vi la matronoj, ke infano ne kapablus terni aŭ heligi sian voĉon, ke vi ne elvokus malesperon kaj ruinon. Nur prizorgu ŝin; antaŭgardu ŝin kontraŭ la vespera aero, ne lasu ŝin tro ludi, kaj ŝi bonege fartos !

Tiel parolis Sanklaro, sed li estis nervoza, maltrankvila. Li rigardis Evnjon kun febra komplezemo kiun lasis aŭdi konstantaj asertoj : "La infano bone fartis, bonege; ĉi tiu tuso estis nenio; ĝi venis de la stomako; ne estis infano kiu ne estis submetita al ĝi". Li diris, sed liaj okuloj ne plu forlasis Evnjon. Li volis ke ŝi surĉevale akompanu lin dum liaj promenoj; li senĉese alportis por ŝi pastojn, receptojn kaj energidonajn pladojn. "Ne ĉar ŝi sentas la plej malgrandan bezonon de ĝi, li repetis, sed tio neniam malutilos al ŝi".

Se necesas diri tion, tio kio afliktis ĉi tiun patran koron, estis la kreskanta matureco de la animo kaj pensoj de Evnjo. Sen perdi iojn ajn el siaj infanaj gracioj, ŝi lasis foje eligi vortojn tiel profundajn, impresojn el tia graveco ke ili sonis kiel inspiro. Tiam Sanklaro ektremis; li ĉirkaŭbrakis ŝin, kvazaŭ la pasia brakumo povintus savi ŝin; kaj energiaj, furiozaj decidoj konservi ŝin, neniam disiĝi de ŝi, ŝveligis lian bruston.

La animo kaj koro de la infano ŝajnis esti absorbitaj de servoj de bonfarado kaj amo. Oferema, ŝi instinkte ĉiam

estis, dum hodiaŭ oni rimarkis en ŝi, virinan, senteman aĵon malfacile difineblan, kiu superis ŝia aĝo. Ŝi ankoraŭ ŝatis ludi kun Topsi, kun la aliaj infanoj el ĉiuj nuancoj; sed, spektantino prefere ol aktorino. Ŝi restis sida dum tutaj duonhoroj ridante pri la petolaĵoj de Topsi. Poste subite ombro pasis sur ŝian mildan vizaĝon, ŝia okulo malsereniĝis, kaj ŝia pensado vagis malproksime.

- Panjo, ŝi iam diris subite al sia patrino, kial ne instrui legi al niaj sklavoj ?

- Bela demando, infano ! Neniu faras tion.

- Kial ne ? insistis Evnjo.

- Ĉar legado estus senutila por ili. Ĝi ne instruus ilin labori, kaj ili estas faritaj por tio.

- Tamen ĉu ne necesas ke ili legu la Biblioⁿ por koni la volon de Dio ?

- Ho ! Ili nur devas legigi al ili la malmulton kiun ili bezonas.

- Sed, panjo, ŝajnas al mi ke la Biblio estas ĉies libro ? Ĉiu devas kapabli legi ĝin. Ofte ili tiom dezirus tion, kaj sin trovas neniu por helpi ilin !

- Kia stranga infano vi estas, Evnjo !

- Fraŭlino Ofelio bone instruis Topsiⁿ legi, daŭrigis la infano.

- Jes; kaj vi vidas kiom multe ĝi utilas. La scienco mirinde profitigis al ŝi. Topsi ja estas la plej malbona eta kreitaĵo kiun mi iam vidis.

- Kompatinda Avino, persistis Evnjo, ŝi kiu amas sian Biblioⁿ kiel siajn okulojn ! Ŝi estus feliĉa povi legi ĝin ! Kiam ŝi ne plu havos min, kiel ŝi elturniĝos ?

Marta respondante daŭrigis renversi tirkeston :

- Venos la tempo, estas klare, kiam vi ne plu povos legi la Biblioⁿ al ĉiuj niaj sklavoj, laŭvice, ne ĉar mi mallaŭdas vin pro tio, mi same faris kiam mi iom plibone fartis. Sed post

via eniro en la mondo, kiam necesos vestiĝi, gastigi kaj viziti, vi ne plu trovos la tempon. Rigardu, ŝi aldonis, jen la juveloj kiujn mi tiam donos al vi. Mi surmetis ilin por mia unua balo, kaj mi povas certigi tion al vi, Evnjo, mi kaŭzis sensacion.

Evnjo prenis la juvelujon, levis diamantan kolĉenon kaj restis revema, kun ŝiaj grandaj okuloj fiksitaj sur la kolĉeno kaj ŝia penso vojaĝanta foren.

- Kia saĝa kaj diskreta vizaĝo, infano !

- Panjo, ĉu tio valoras multe, multe da mono ?

- Mi vere kredas ! Mia patro aĉetigis ĉi tiujn briliantojn en Parizo. memstare ĝi estas riĉaĵo !

- Mi ŝatus havi ilin por mi kaj povi fari per ili tion kion plaĉus al mi ! diris Evnjo.

- Kaj kion vi farus per ĝi ?

- Mi vendus ilin; mi aĉetus terenon en la liberaj Ŝtatoj, mi alkondukus ĉiujn niajn sklavojn tien, kaj pagus instruistojn por lernigi ilin legi kaj skribi.

Ŝi estis interrompata de ekridego de sia patrino.

- Bonege, vi komencus lernejon, kaj mi esperas ke vi ankaŭ montrus al ili kiel ludi pianon, kiel pentri sur veluro ?...

- Mi instruus ilin legi ilian Biblio^{n}, skribi iliajn leterojn, legi tiujn kiujn oni skribas al ili, diris Evnjo memfide. Mi scias, panjo, ke estas tre malfacile por ili ne povi fari ion pri ĉi ĉio. Ĝi estas korŝiro por Tomo, por Avino, ankoraŭ por aliaj. Kaj plie panjo, mi pensas ke tio estas malbona.

- Nu, nu, Evnjo, vi estas nur infano ! Vi ne komprenas eĉ unu vorton en ĉi ĉio, diris Marta, kaj via babilado dolorigas al mi la kapon.

La migreno ĉiam estis je dispono de Marta tuj kiam la konversacio disvolviĝis malfavore al ŝi. Evnjo retiriĝis tre malrapide; sed ekde tiu tago, ŝi diligente donis al Avino lecionojn de legado.

24. Henro.

Ĉirkaŭ tiu tempo Alfredo, la frato de Sanklaro, venis kun sia filo, dekdujaraĝa knabo, por pasigi unu aŭ du tagojn en la domo de la lago, kun la familio de sia frato.

La aspekto de ĉi tiuj ĝemeloj kuniĝintaj estis samtempe io bela kaj stranga. La naturo, formante ilin, absolute plezuriĝis krei, anstataŭ similecojn, frapantajn kontrastojn, kaj tamen mistera ligo ŝajnis plifirmigi ilian fratan amikecon.

Brako en brako, ili vagis en la aleoj de la ĝardeno, supre, malsupre, ĉie; Aŭgusteno, kun siaj bluaj okuloj, siaj oraj haroj, siaj elastaj kaj elegantaj formoj, siaj viglaj esprimplenaj trajtoj; Alfredo, kun siaj nigruloj, sia romia, aroganta, nefleksebla profilo, siaj forte artikitaj membroj kaj sia firma sinteno. Ili konstante reciproke atakis unu la alian pri siaj opinioj, siaj kutimoj, siaj agoj, kaj tamen neniam estis absorbitaj per la socio de la alia, kvazaŭ por kunigi ilin, la kontraŭdiro ludus inter ili la rolon kiun la altiro plenumas inter la kontraŭaj polusoj de la magneto.

Henro, la plejaĝa filo de Alfredo, nobla knabo, kun nigraj okuloj, kun aspekto de princo, plena de ardo kaj vigleco, apenaŭ vidis sian kuzinon Evangelina^{n}, ke jam li estis fascinita de la ĉiela gracio de la infano.

La preferata poneo de Evnjo, milda kiel ŝi, neĝblanka, kaj kun irmaniero por milde luli, estis ĵus alkondukata de Tomo al la malantaŭa verando, dum mulato je ĉirkaŭ dek tri jaroj, alkondukis tien la malgrandan nigran araban ĉevalon multekoste importitan, de mallonge, por Henro.

Fiera kiel juna knabo pri sia nova rajdobesto, Henro antaŭenpaŝis, prenis la kondukilojn el la manoj de la eta grumo, atente rigardis la ĉevalon, kaj lia frunto tuj nubiĝis.

- Kio tio ĉi estas, Dodo, pigra hundeto ? Vi ne striglis la beston ĉi-matene !

- Jes ja, mastro, respondis la mulato submetiĝe. Esti ĝi mem kiu denove malpurigi sin.

- Silentu, fiulo ! kolere diris Henro, levante sian rajdovipon. Kiel vi kuraĝas malfermi la buŝon ?

La grumo estis beleta mulato kun brilaj okuloj, ĝuste je la staturo de Henro, kaj liaj buklaj haroj enkadrigis altan kaj fieran frunton. La sango de la blankuloj kiu bolis en liaj vejnoj subite koloris lian vangon, kaj briligis lian okulon, kiam li vigle komencis diri : "Mastro Henro…"

Henro travipis lin per la rajdovipon tra la vizaĝon, prenis lin je la brako, devigis lin surgenuiĝi kaj batis lin ĝis esti senspira.

- Jen, aroganta hundo ! Mi lernigos vin rebati ! Elkonduku ĉi tiun ĉevalon, kaj ke ĝi estu purigita kiel necesas. Mi remetos vin sur vian lokon, ĉu vi aŭdas mi !

- Juna mastro, *komencis Tomo*, mi konjekti tion kion li voli diri. La ĉevalo ruliĝi teren ĉe la eliro de la stalo. Ĝi esti tiel juna ! Tiel impeta ! Jen kiel la besto surŝprucigi sin. Mi vidi ĝin esti matene striglata.

- Tenu vian langon, vi, ĝis kiam oni parolos al vi. *Kaj Henro, turnante sin sur la kalkanoj, supreniris la ŝtupojn por iri rekuniĝi kun Evnjo, jam tute preta en rajdvesto.*

- Kara kuzino, pardonu se ĉi tiu stultulo devigas min atendigi vin dum momento. Ni sidiĝu tien. Li ne aŭdacu malrapidi. Sed kio estas, kuzino ? Vi ŝajnas tre kolera.

- Kiel vi povas esti tiel kruela, tiel malbona, kontraŭ tiu kompatinda Dodo ? diris Evnjo.

- Kruela ! Malbona ! *reparolis la junulo, kaj lia surprizo tute ne estis rolata.* Kion vi volas diri, kara Evnjo ?

- Ne nomu min "kara Evnjo" kiam vi tiel agas.

- Sed, kara kuzino, vi ne konas Dodo[n.] Ne ekzistas du

manieroj konduki lin. Li neniam ĉesas pardonpeti kaj mensogi. Necesas unue obeigi lin, ne lasi lin malfermi la buŝon. Paĉjo ne agas alimaniere.

- Onklo Tomo diris ke estis nur simpla akcidento, kaj li ĉiam diras nur la veron.

- Li do estas maljuna nigrula mirindulo. Dodo li diras tiom da mensogoj kiom da paroloj.

- Li mensogas ĉar vi timigas lin. Estas instrui al li la mensogojn, trakti lin kiel vi faris !

- Se vi tiel forte partianiĝas al Dodo, Evnjo, vi tuj ĵaluzigos min.

- Vi frapis lin sen tio ke li faris ion por esti batita…

- Malgranda nepagitaĵo kvitiĝinta. Ĝi estis por ĉiuj fojoj kiam li meritis esti draŝita, sen ke mi batu lin. kelkaj bonaj vipobatoj ĉiam konvenas por Dodo. Li estas, mi certigas tion al vi, vera sentaŭgulo. Sed, nu, ĉar tio ĉagrenas vin, mi neniam plu batos lin antaŭ vi.

Evnjo tute ne estis kontenta, sed ŝi sentis ke ŝi vane provus komprenigi sin de sia bela kuzo.

Tiumomente reaperis la eta mulato alkondukante la du ĉevalojn.

- Bonege, Dodo. Ĉifoje, vi tre bele sukcesis, gracie diris lia juna mastro. Alproksimiĝu, kaj tenu la poneon de fraŭlino Evnjo, dum mi helpos ŝin surĉevaliĝi.

Dodo staris antaŭ la ĉevalo de Evnjo; sed lia vizaĝo estis ŝveliĝinta, kaj en liaj okuloj oni sufiĉe klare vidis ke li ploris.

Henro fieris pri galanteco kaj lerteco. Li baldaŭ surseligis sian belan kuzinon, kaj kunigante la kondukilojn, li prezentis ilin al ŝi.

Sed Evnjo sin klinis flanken kie Dodo troviĝis, kaj kiam la eta mulato ĵus maltenis la bridon, ŝi diris al li :

- Vi estas bona knabo, Dodo; grandan dankon !

Dodo, mirigita, rigardis ĉi tiun dolĉan vizaĝon, liaj vangoj koloriĝis kaj larmoj venis al liaj okuloj.

- Ĉi tie, Dodo ! kriis lia mastro kun imperia tono.

La mulato eksaltis antaŭen, kaj tenis la araban ĉevalon dum lia mastro rajdis ĝin.

- Jen unu picajuno[22] por vi, Dodo. Iru aĉeti kandon; iru !

Kaj Henro galopete malproksimiĝis kun Evnjo. Dodo longe sekvis per la okuloj la du infanojn. De unu, li ricevis moneron; de la alia, tion kio plej multe mankis, tion kion li plej arde bezonis, agrablan vorton amoplene diritan. Estis de nur malmulte da monatoj ke Dodo estis apartigita de sia patrino. La patro de Henro aĉetis lin en tenejo de sklavoj, pro lia beleta kapo, por fari de li la harmonian akompanon de la beleta poneo. Nun estis la afero de la juna mastro rompi kaj obeigi lin.

La du fratoj, promenante de iu flanko al la alia de la ĝardeno, estis tamen vidantaj bati la vipadon.

Aŭgusteno ruĝiĝis, sed nur diris laŭ sia mieno de sardona senzorgeco :

- Tio verŝajne estas tio kion oni nomas respublikan edukadon, Alfredo ?

- Henro estas demoneto, se eĉ oni malmulte stimulas lin, respondis senatente Alfredo.

- Mi supozas ke vi konsideras tian ekzercadon kiel parton de lia edukado. *La voĉo de Agusteno fariĝis seka.*

- Estus alie ke mi ne povus malpermesi lin. Henro estas speco de uragano. Ekde longe lia patrino kaj mi malstreĉis la bridon ! Cetere, kun Dodo, li traktas kun perfekta koboldo kiu ne sentas la batojn. La vipo tute ne ĝenas lin.

- Ĉu ĉi tio estus via metodo fiksi en la memoro de Henro la unuan aksiomon de la respublika katekismo *"Ĉiuj homoj estas denaske liberaj kaj egalaj"* ?

- Pa ! Unu el la sentimentalaj francaj farsoj de Tomaso Ĝefersen. Estas vere ridinde ke tiaj senspritaĵoj ekzistu ankoraŭ hodiaŭ inter ni.

- Tute ridinde ! diris Sanklaro per signifa tono.

- Konsiderante, daŭrigis Alfredo, ke ni povas sufiĉe vidi ke tute ne estas vere ke ĉiuj homoj naskiĝas liberaj, tute ne vere ke ĉiuj naskiĝas egalaj. Estas ĝuste la malo. Miaflanke estas jam de longe ke duono de ĉi tiu respublika frazeologio estis por mi nur fatraso. Estas la bone edukitaj, inteligentaj, riĉaj, altmondaj homoj kiuj devas havi egalajn rajtojn, neniam la kanajlaro.

- Kondiĉe ke vi kapablu konservi la kanajlaron en ĉi tiu opinio, rebatis Aŭgusteno. Ĝi iufoje venĝis en Francio.

- Certe, ĉi tiu raso devas esti submetita, kun firmeco, kun konstanteco, kunpremita kiel mi kunpremus ĝin. Kaj Alfredo pezis sur la grundo kvazaŭ li tretus iun.

- La glitado gravus, se la subulo restariĝus, diris Aŭgusteno; ekzemple en Domingo.

- Ba ! Ni atentos ĝin en ĉi tiu lando. Ni devus fronte ataki ĉiujn tiujn frazistojn, tiujn iniciatintojn de edukado kiuj tro distriĝas. La malalta klaso devas neniam esti instruita.

- Ne plu necesas preĝis, rekomencis Aŭgusteno; tiel ĝi estos. Temas scii kiel, jen ĉio. Nia sistemo formas ĝin al brutaleco kaj barbareco ! Ni rompas ĉiujn ligojn de la humaneco por fari de ĉi tiuj homoj brutajn bestojn. Se ili atingos la superecon, nu, ni trovos ĉe ili tion kion ni faris de ili !

- Neniam ili atingos ĝin, la superecon !

- Bonege, metu la tutan vaporon, firme fermu la sekurigan valvon, sidigu vin sur ĝi, kaj vidu kien vi alteriĝos.

- Konsentite, ni vidos ! Mi ne timas sidiĝi sur la valvo, dum la kaldrono estas solida kaj dum la rado-aro bone

funkcias.

- La nobeloj sub Ludoviko la XVI^{a} pensis kiel vi; Aŭstrio kaj Pio la IX^{a} nuntempe samopinias; sed en iu bela mateno vi riskas renkontiĝi supren en la aeron kiam la kaldrono eksplodos.

- Dies declarabit[29], ekkriis Alfredo ridante.

- Mi ripetas tion al vi, daŭrigis Aŭgusteno, se en niaj tagoj estas brila vero, kiu frapas la okulojn kiel dia evidentaĵo, estas ke la tago de la popolamasoj alvenos. Tiu tago kiam "la lastaj estos la unuaj".

- Brave ! Unu el la burleskaĵoj de viaj ruĝaj respublikanoj, Aŭgusteno ! Kial ne aniĝi al la furiozuloj, la oratoroj pri kultivebligoj, kaj prelegi grimpante sur arbostumpon[30] ? Prediku, aŭguru, kara mia. Mi esperas ke mi estos morta antaŭ ol okazos al ni ĉi tiu granda jarmilo de viaj kotaj homamasoj.

- Kotaj aŭ ne, rekomencis Aŭgusteno, kiam ilia tempo venos, ili regos vin, kaj vi havos la mastrojn kiujn vi estos kreintaj por vi. La franca nobelaro volis havi popolon de senkulotuloj, ĝi akiris nur tro multajn, regantajn senkulotulojn ! La popolo de Haitio…

- Ĉifoje, sufiĉas, Aŭgusteno ! Kvazaŭ ni ne havus super niaj okuloj kaj niaj oreloj, pri ĉi tiu abomena Haitio ! La mastroj de Haitio ne estis anglosaksoj. Se ili estintus tiuj, ni havus tute alian historion. La anglosaksa raso estas la reĝo de la mondo kaj ĉiam estos ĝin.

- Bonege, sed estas sufiĉe grava transdono de anglosaksa sango al niaj sklavoj, ŝajnas al mi, diris Aŭgusteno. Multe el ili konservis da afrika sango nur tion kio necesas por aldoni la ŝaŭman varmecon de la tropikoj, al niaj

29 Latina esprimo kiu proksimume signifus "La tago atestos".

30 Kiel ni dirus grimpi al la tribuno. En la okcidentaj ŝtatoj, la plej bona piedestalo estas la trunko de la arbo kiun la hakilo de la pioniroj ĵus dehakis.

kalkulemaj firmeco kaj antaŭzorgado. Ke la horo de Domingo ekbatu, kaj la anglosaksa sango gvidos la ritmon kaj la honoron de la tago. Filoj de blankaj patroj, kies niaj fieraj sentoj varmigas la vejnojn, ne estos ĉiam vendataj, aĉetataj. Ni ne eterne komercaĉos tiun homan varon. Iam ili stariĝos kaj altigos kun ili la rason de siaj patrinoj.

- Fatraso, sensencaĵo !

- Ĝuste, la malnova diraĵo, daŭrigis Aŭgusteno. Tiel estos kiel dum la tagoj de Noa : "*Homoj manĝis kaj trinkis, edziĝis kaj edziniĝis; ili plantis kaj konstruis, kaj ili pensis pri la diluvo nur kiam ĝi ekvenis kaj forrabis ĉion*" (Mat 24:38-39).

- Vere, Aŭgusteno, mi kredas vin faritan por esti migra predikanto ! *kaj Alfredo ekridis*. Trankviliĝu, ja, posedo valoras rajtigilo. Ni havas la rajton kaj ni bone tenas ĝin. La submetita raso, *li batis per la piedo sur la grundo*, restos submetita. Ni havas sufiĉe da energio por prizorgi nian pulvon.

- Knaboj edukitaj kiel Henro faras famajn gardistojn por viaj pulvejoj, *diris Aŭgusteno*, tiel malvarmaj, tiel memregemaj ! La proverbo diras tion : "Kiu ne kapablas sin regi, tiu ne povas regi aliajn".

- Estas en tio io kiu lamas, estas vere, diris Alfredo, pripensante. Mi ne povas nei ke infanoj estas malfacile edukitaj sub nia reĝimo. Ĝi senbridigas la pasiojn, jam tro ekscititajn de la varmeco de la klimato. Henro maltrankviligas min. La infano estas malavara, lojala, kun varma koro, sed vera brulaĵo tuj kiam oni incitas lin. Por venki lin, necesos, mi kredas, sendi lin en la Nordon kie la obeado pli konvenas, kaj kie li pli vivos kun siaj egaluloj, malpli kun siaj subuloj.

- Se estas vere ke la edukado de la infanoj estas la granda afero de la homa raso, reparolis Aŭgusteno, estas io rimarkenda ke en ĉi tio nia reĝimo tiel malbone funkcias.

- Malbona pri kelkaj punktoj, bona pri aliaj. Ĝi faras niajn knabojn firmaj, kuraĝaj. La malvirtoj mem de malestiminda raso inklinigas fortigi en ili la kontraŭajn virtojn. Henro, mi vetus tion, des pli bone estimas la veron, kaj trovas ĝin des pli bela ke li vidis la mensogon, la friponaĵon, esti unu el la neforigeblaj sigeloj de la sklaveco.

- Ĉi tio certe estas tre kristana kompreno pri la temo !

- Kristana aŭ ne, ĝi estas prava, kaj finfine ne pli kontraŭkristana ol la plejmulto da aferoj de ĉi tiu mondo.

- Estas tio kion mi ne volas nei, aldonis Sanklaro.

- Nu, ĉu tio ne estas sufiĉe turniĝi en la sama cirklo, kiel ni jam faris kvincent fojojn, pli-malpli ? Kion vi dirus pri partio de triktrako ?

La du fratoj surpreniris la ŝtupojn de la verando, kaj baldaŭ, sidaj antaŭ malforta subtenilo el bambuo, kontraŭiĝis nur per la triktrako.

- Mi diros al vi, Aŭgusteno, *rekomencis Alfredo, aranĝante siajn damojn*, ke se mi samopinius kiel vi, mi ne krucus miajn brakojn, mi farus ion.

- Mi estas konvinkita pri tio; vi estas agemulo; sed kion?

- Nu, kial vi ne donas edukon al viaj sklavoj ? Faru de ili modelojn, specojn de specimeno ! *Kaj mokema rideto desegniĝis sur la lipoj de Alfredo.*

- Vi povus tiel bone ruligi la monton Etno[n] sur ilian dorson, kaj ordoni al ili teni sin stare, kiel diri al mi ja, eduki miajn geservistojn, kiam la socia amaso pezas sur ilin. Iu sola homo ne kapablus kontraŭstari al la influo de tuta loĝantaro. Por okazigi rezultojn, la edukado devas komenciĝi de la Ŝtato mem, aŭ almenaŭ de grupo sufiĉe grandnombra por estigi fluon.

- Estas via vico ĵeti la ĵetkubojn, diris Alfredo, kaj la du fratoj, absorbitaj de sia partio, eliĝis el ĝi nur kiam la galopado de la ĉevaloj aŭdiĝis.

- Ha ! Jen la infanoj, ekkriis Agusteno kaj li ekstaris. Rigardu do, Alfredo, ĉu vi iam vidis ion same belan ?

Tio vere estis radia spektaĵo. Henro, kun sia aŭdaca frunto, liaj abundaj brilaj bukloj, liaj skarlataj vangoj, gaje ridis kliniĝanta al sia bela kuzino, kiam ili alvenis. Evnjo surhavis ĉielbluan rajdojupon, ĉapelon el sama nuanco, kaj la ekzercado, kolorigante ŝiajn vangojn per siaj plej lumegaj koloroj, eligis la admirindan harmonion de ŝia blanka kaj travidebla haŭto, kaj de ŝiaj haroj kun oraj rebriloj.

- Per la ĉielo, kia miriga kaj perfekta beleco ! ekkriis Alfredo. Mi asertas tion al vi, Aŭgusteno, ŝi vundos pli ol unu koron antaŭ ol estos longe.

- Tro vera, eble, bedaŭrinde ! Dio scias,ĉu mi timas tion ! *murmuris Sanklaro kun subita amareco; kaj, rapidanta malsupren la ŝtupojn, li kuris por helpi sian filinon deĉevaliĝi*.

- Evnjo, karulino ! Ĉu vi ne estas tro laca ? li demandis, dum li kunportis ŝin en siajn brakojn.

- Ne, paĉjo, *diris la infano. Sed ŝia mallonga, brua spirado alarmis ŝian patron*.

- Kiel vi povas tiel forte galopi, kiam vi scias ke tio ne taŭgas al vi ?

- Mi estis tiel feliĉa, paĉjo, kaj mi tiom amuziĝis ke mi pensis pri nenio.

Sanklaro kunportis ŝin ĝis la salono, kie li kuŝigis ŝin sur sofon.

- Henro, necesas iom pli atenti pri via kuzino; vi gvidis ŝin tro rapide.

- Mi bone prizorgos ŝin, diris la junulo, konfidu ŝin al mi, kaj sidiĝante apud la sofo, li prenis la manon de la knabineto.

Baldaŭ Evnjo fartis pli bone. Ŝia patro kaj ŝia onklo reiris al sia partio, kaj la infanoj estis lasitaj kune.

- Se vi scius, Evnjo, mi tiom bedaŭras ke paĉjo restas ĉi tie nur du tagojn ! Mi post tio estos tiel longe sen vidi vin !

Se mi restus kun vi, mi provus esti bona, ne plu riproĉi al Dodo, aŭ al iu ajn. Ne estas ĉar mi havas la plej malgrandan deziron malbone trakti lin, ne vere ! Mi estas tro rapidaga, jen ĉio. Cetere mi ne estas malbona por li, mi fojfoje donas al li picajuno[n](22). Vi vidas ke li estas bone vestita. Nu, kalkulante ĉion, Dodo estas feliĉa knabo.

- Ĉu vi estus feliĉa, Henro, se estus apud vi ne eĉ unu estulo, kiu amus vin ?

- Mi ! Ne, tio estas evidenta.

- Kaj vi forprenis Dodo[n] el ĉiuj amikoj kiun li iam ajn havis ! Li nun ne plu vidas eĉ unu personon kiu amas lin; kiel li povus esti feliĉa ?

- Nu, kion vi volas ke mi faru pri tio, kuzino ? Mi ne kapablas aĉeti lian patrinon, ne pli ol komenci ami lin, mi aŭ iu ajn, kiun mi konas.

- Kial ne vi ? diris Evnjo.

- Mi, ami Dodo[n] ! Evnjo, ĉu vi pensas pri tio ? Mi povas trovi lin afabla kaj protekti lin, bonege. Sed vi, ĉu vi amas vian homojn ?

- Jes, vere, diris Evnjo.

- Kia stranga ideo !

- Ĉu la Biblio ne diras al ni ami unu la alian ?

- Ho, la Biblio ! La Biblio diras tiom da aferoj ! Sed neniu zorgas pri tio. Vi bone scias tion, Evnjo. Kiu pensas fari tion kio estas en la Biblio ?

Evnjo silentis dum kelkaj minutoj, ŝiaj okuloj restis fiksaj kaj revemaj.

- Ĉiuokaze, ŝi diris finfine, kara kuzo, amu la kompatindan Dodo[n], kaj estu bona al li pro amo de mi.

- Mi amus iun ajn, ion ajn, pro amo de vi, kara kuzino; kaj mi pensas, funde de la animo, ke vi vere estas la plej ĉarma, plej afabla estulino kiun mi iam vidis ! *Henro parolis kun ardo kiu purpurigis lian ĉarman vizaĝon.*

Evnjo akceptis ĉi tiujn parolojn, sen tio ke aperis la plej eta ŝanĝo sur ŝia kvieta kaj anĝela vizaĝo, kaj ŝi respondis kun perfekta simpleco :

- Dankon, kara kuzo, pro tio kion vi nun diras al mi. Mi esperas, mi kredas ke vi rememoros mian peton.

La vespermanĝa sonorado, sonante, ĉesigis la dialogon.

25. Malbonaŭguraj Antaŭsignoj.

Post du tagoj, Alfredo kaj Aŭgusteno Sanklaro disiĝis. Evnjo, kiun la kompanio de ŝia kuzo kuntiris al ekzercoj super ŝiaj fortoj, ekde tiam komencis rapide kliniĝi. Por ne akcepti doloran veraĵon, ŝia patro malkonsentis terurite sin turni al kuracistojn. Ĉifoje li konsentis. Ekde du tagoj, Evnjo, tro malsana, ne kapabis eliri el sia ĉambro, la kuracisto estis alvokita.

Marta Sanklaro, tute absorbita de studado de du aŭ tri novaj malsanoj pri kiuj ŝi kredis sin viktimo, tute ne atentis la laŭgradan malfortiĝon de sia filino. Kiel unua kredartikolo, ŝi opiniis ke neniam iu suferis kaj povis suferi kiel ŝi, kaj tiom kiom ŝi. La plej malgranda aludo ke iu ajn alia povus malsani sub ŝia tegmento, estis forpuŝita kun akrega indigno. "Estis nur mallaboremo, manko de energio. Ha ! Se oni havus la dekan parton de ŝiaj suferoj, oni scius tion kio ĝi estas ! oni sentus la diferencon !

Plurfoje f^ino Ofelio provis veki la patrinajn timojn, estis vane.

- Mi ne vidas, respondis Marta, ke Evnjo havas la plej malgrandan aferon ! Ŝi nur babilas kaj ludas.

- Sed, ŝia tusado…

- Ŝia tusado ! Ne estas al mi ke necesas paroli pri tusoj ! Mi estas submetita al ili ekde kiam mi estas en la mondo. Ĉe la aĝo de Evnjo, oni kredis min ftizulino. Avino pasigis ĉiujn noktojn por flegi min. Ha ! Kompare kio estas la tuso de Evnjo !

- Sed ŝi plimalfortiĝas, ŝia spirado fariĝas mallonga.

- Disinjoro ! Mi sufiĉe konas ĉi tion, kaj ekde jaroj ! Nerva afekcio.

- Sed ŝi nokte ŝvitas.

- Estas mi kiu havis dum tiuj dek lastaj jaroj mirindegajn ŝvitadojn ! ĝis tordi ĉion kion mi surmetis. Ne unu fadeno seka en miaj noktaj vestaĵoj, kaj Avino devis sekigi miajn litotukojn ! Certe la ŝvitoj de Evnjo ne estas komparebla.

F^ino Ofelio nune povis do nur silenti. Sed hodiaŭ kiam Evnjo troviĝis grave malsana, videble malvigla, kaj kiam kuracisto estis alvokita, Marta subite ŝanĝis la tonon.

"Ŝi sciis tion ! Ŝi ĉiam antaŭsentis tion ! Ŝi estis kondamnita fariĝi la plej malfeliĉa el la patrinoj ! Kun ŝia mizera sano, vidi sian solsolan infanon konsumiĝi, malsupreniri sub siaj okuloj en la tombon !"

Kaj Marta, kaŭze de ĉi tiu nova ĉagreno, detruis ĉiun nokton la dormadon de la kompatinda Avino, kaj tedegis, ĉikanis, turmentis tutlonge de la tago.

- Mia kara Marta, ne diru ĉi tiujn aferojn, mi petegas ! insistis Sanklaro, ni tute ne malesperas.

- Vi ne havas la koron de patrino, Sanklaro; neniam vi kapablis kompreni min. Kiel vi hodiaŭ komprenus min !

- Sed almenaŭ ne parolu kvazaŭ ĉio estis perdita.

- Mi ne havas vian feliĉan indiferentecon, Sanklaro. Se la danĝero pri via solsola infano lasas vin ja trankvila, por mi, estas io alia. Ĉi tiu bato estas tro terura post ĉio kion mi eltenis.

- Estas vere, daŭrigis Sanklaro, ke Evnjo estas tre delikata, mi ĉiam timis ke ŝi fariĝis tia. Rapida kreskado elĉerpis siajn fortojn, kaj la situacio estas danĝera. Sed ĉi tio estas nur nedaŭra malvigleco, kiun klarigas la eksesa varmo, la troo da ekzerco kaj la ekscitiĝo kaŭzita de la vizito de ŝia kuzo. La kuracisto esperas.

- Bonege, se vi povas rigardi la aferojn el la plej bona flanko, faru. Estas ŝanco ĉi tie tere, ne havi profundan

sentemon. Certe, mi tre dezirus ne senti tion kiun mi travivas, kaj kiu bedaŭrinde utilas nur por profunde malfeliĉigi min. Plaĉu al Dio ke mi povu esti tiel trankvila kiel vi ĉiuj estas !

Ĉiuj havus bonegajn kialojn por kuniĝi kun ĉi tiu preĝo, ĉar Marta, sin kovranta de sia nova malbonsorto, rajtigis sin lacegigi ĉiun pri tio. Oni ne povis diri parolon, fari aŭ ne fari ion ajn, sen ke ŝi tiru el tio novan pruvon pri la maldeca nesentemo de tiuj kiuj ĉirkaŭis ŝin, ĉiuj same indiferentaj, ŝi diris, pri siaj profundaj angoroj. La kompatinda eta Evnjo kelkfoje aŭdis ĉi tiujn plendojn. Tiam ŝi konsumiĝis de larmoj pro tenera kompato pri la doloroj de sia patrino, kaj profunde afliktiĝis esti la kaŭzo de tiom da ĉagreno.

Unu aŭ du semajnoj forfluis, kaj granda pliboniĝo manifestiĝis en ĉiuj simptomoj, unu el tiuj trompaj kvietiĝoj de senindulga malsano kiuj vivigas esperon ĝis la randoj de la tombo. La lerta paŝo denove glitis en la ĝardenoj, sur la balkonoj, Evnjo ludis, Evnjo ankoraŭ ridis. Ŝia patro deklaris, dum la ekzaltiĝoj de sia ĝojo, ke baldaŭ li vidos ŝin tiel bonfarta kiel neniam. Sole F^ino^ Ofelio kaj la kuracisto tiris neniun kuraĝiĝon el ĉi tiu iluzia paŭzo. Alia koro ankaŭ aprobis ilian konvinkon, kaj estis la eta koro de Evnjo. Kio do kelkfoje parolas funde de la animo per tiel trankvila, tiel klara maniero, por instrui al ĝi ke ĝia tempo sur tero estos mallonga ? Ĉu estas la sekreta instinkto de la malfortiĝanta naturo ? Ĉu estas la pulsadoj, la flugbatadoj de la animo kiuj videtas la senmortecon ? Kia ajn estas la kaŭzo, funde de la koro de Evnjo kuŝis la paca, dolĉa kaj profeta certeco, ke la ĉielo estis proksima. Serena persvado kiel la mildiĝintaj radioj de la subiranta suno, dolĉa kiel la kvietaj aŭtunaj belecoj, kaj en kiu ripozis tiu pura spirito, maltrankviligita. nur de la doloro de tiuj kiuj amis ŝin.

Koncerne ŝin, kvankam ĉirkaŭita ekde la lulilo de tiel

viglaj tenerecoj, kvankam vidanta disvolviĝi antaŭ si la oritajn kaj logajn perspektivojn de la abundeco kaj de la amo, ŝi nenion bedaŭris, kaj ne ploris pri si mem.

Tra la rakontoj de la libro kiun ŝi kaj ŝia humila amiko tiel ofte legis kune, ŝi ekvidis kaj akceptis en sia juna sino, la bildon de tiu kiu amis la infanetojn. Laŭmezure kiel ŝi kontemplis ĝin en siaj naivaj pensoj, la bildo, iom post iom ĉesante esti nur memoro, dia kaj fora rebrilo, preskaŭ alvenis al la radianta realaĵo. Ŝia kortuŝita animo fandiĝis en superhoman tenerecon, kaj estis al Li, ŝi diris, estis al Lia regno, ke ŝi sentis sin gliti.

Poste ŝi rekomencis, kun kortuŝa zorgemo, kompati tiujn kiujn ŝi postlasos, ĉefe sian patron. Evnjo, instinkte kaj sen tio ke ŝi konsciis pri tio, sciis ke funde de tiu koro, ŝi penetris pli antaŭen ol de ĉiuj aliaj. Ŝi ankaŭ amis sian patrinon, ĉu ŝi ne estis tuta amo ? La kruelega egoismo, pri kiu estis tiel malfacile tute fermi la okulojn, iom maltrankviligis ŝin en sia naiva kredo pri la patrina neeraremo. Sed tio kion ŝi difinis malbone, kaj ne povus pravigi, ŝi kompensis tion dirante al si ke finfine ŝi estis panjo, kaj ke ŝi tre amis ŝin.

Ŝi ankaŭ afliktiĝis pri la amataj kaj fidelaj geservistoj, por kiuj ŝi estis lumo kaj suno. Infanoj apenaŭ ĝeneraligas; sed tio kion Evangelina videtis pri la hororoj de la reĝimo sub kiu la sklavoj ĝemas, estis enirita en la profundojn de ĉi tiu pensema, meditema animo kun frua matureco. Ŝi havis malprecizajn strebojn, ardajn kaj dolorajn dezirojn fari ion por ili; savi, feliĉigi, ne nur tiujn kiujn ŝi konis, sed ĉiujn ! Pasiaj, fervoraj impulsoj, tro malmulte en akordo kun ŝia gracila korpo.

- Onklo Tomo, ŝi iam diris interrompante sian legadon al sia humila amiko, mi povas pli bone kompreni nun ke Jesuo volis morti por ni.

- Kial, fraŭlino Evnjo ?

- Ĉar mi sentas iom same.

- Kion ? Fraŭlino Evnjo ? Mi ne bone kompreni.

- Mi ne kapablas klarigi tion; sed kiam mi vidis ĉi tiujn kompatindajn homojn sur la boato, vi scias kiam vi malsupreniris laŭ la rivero kun ni, estis inter ili kiuj sopiris pri siaj patrinoj, aliaj pri siaj edzoj; aliaj ploris siajn etajn infanojn; kaj ankaŭ la kompatinda Prunjo, kiam mi aŭdis ŝian historion ! Ho ! Ĉu ne estis terure ! Kaj ankoraŭ, tiom multe da aliaj fojoj, mi sentis ke mi estus kontenta morti, se mortante mi malebligus ĉi ĉiun malbonon. Mi volus morti por ili, onklo Tomo, se mi povus ! *diris fervore la infano, kaj ŝi metis sur la fortikajn fingrojn de Tomo sian etan diafanan manon*.

Tomo rigardis la infanon kun respekto; kaj kiam, alvokita de ŝia patro, ŝi malrapide malproksimiĝis, li plurfoje viŝis siajn okulojn kaj longtempe sekvis ŝin per la okuloj.

- Ne ebli reteni ŝin kun ni ! Ne ebli konservi fraŭlinon Evnjo^{n} ! *li diris al Avino kiun li renkontis post momento*. La signo de Disinjoro esti sur ŝia frunto !

- He ! Nu, nu ! Bedaŭrinde ! Jes, suspiris Avino levante la manojn al la ĉielo. Mi ĉiam diri tion ! Ŝi neniam esti infano por vivi, ĉiam tie, en la funfundo de ŝiaj okuloj, io nedifinebla. Mi tiom diri al mastrino ! Kaj jen tio fariĝi vera ! Ni ĉiujn vidi tion hodiaŭ ! Ho ! Kara ! Ho ! dolĉa eta benita ŝafido !

Evnjo kuris, suprenirante la ŝtupojn por iri kuniĝi kun sia patro. La vespero alproksimiĝis, la briloj de la subiranta suno kronis ŝian kapon per ia aŭreolo, dum ŝi antaŭenpaŝis, tute delikata, en siaj blankaj vestaĵoj, kun ŝiaj ondaj haroj radiantaj ĉirkaŭ ŝiaj brilantaj vangoj, ŝiaj okuloj lumigitaj de malrapida febro kiu konsumis ŝin.

Sanklaro vokis ŝin por montri al ŝi statueton kiun li

aĉetis por ŝi. Sed ŝia aspekto, ĉe la momento kiam ŝi kuniĝis kun li, frapis lin en la koron. Ekzitas speco de beleco, samtempe tiel intensa kaj tiel delikata, ke oni ne kapablus kontempli ĝin sen maltrankvilo, kaj ŝia patro, forgesante tion kion li estis dironta al ŝi, subite ĉirkaŭpremis ŝin en siajn brakojn.

- Evnjo karulino ! Vi pli bone fartas dum ĉi tiuj tagoj, ĉu ne ?

- Paĉjo ! *La voĉo de Evnjo ekhavis nekutiman firmecon*, estas aferoj kiujn mi delongege deziras diri al vi, mi ŝatus fari tion nun, antaŭ ol mi plimalfortiĝos.

Sanklaro ektremis; Evnjo sidiĝis sur liajn genuojn kaj apogis sian kapon kontraŭ lia brusto.

- Ne utilas, paĉjo, plu kaŝi tion al vi. La tempo alproksimiĝas kiam necesos al mi forlasi vin. Mi foriros por neniam plu reveni. *Evnjo bremsis singulton.*

- Nu, nu, mia kara etulino, Evnjo mia; *kaj tute tremanta, Sanklaro alprenis viglan kaj ĝojan voĉon;* nun vi senkuraĝiĝas kaj nervoziĝas. Necesas ne sin allasi al malgajaj pensoj. Jen, rigardu la beletan figureton kiun mi aĉetis por vi !

- Ne, paĉjo, diris Evnjo; kaj ŝi milde forpuŝis la figureton. Ne trompu vin; ne ekzistas pli bona, mi tre bone scias tion. Mi foriras, mi sentas tion. Mi ne estas nervoza, mi tute ne estas senkuraĝa. Se ne estus vi, kara paĉjo, se ne estus ĉiuj kiujn mi amas, mi estus perfekte feliĉa. Mi deziris tion, mi sopiras al tio !

- He kio, kara trezoro, kiu povas tiom malĝojigi vian kompatindan koreton ? Ĉu vi ne havas ĉion kion vi deziras, ĉion kio povas kontentigi vin ?

- Mi preferas esti en la ĉielo; sed pro la amo de miaj amikoj, mi volus ankoraŭ vivi. Sed estas tiom da aferoj ĉi tie kiuj dolorigas min, kaj kiuj ŝajnas al mi teruraj, ke mi deziras tuj foriri supren. Ne estas ĉar mi ne sentas ĉagrenon forlasi

vin; Ho ! Jen tio kio fendas mian koron !

- Sed, kio estas tio kio povas aflikti vin ? Kion vi vidas, tiel terura, mia infano ?

- Ho ! Aferoj kiuj estas ĉiutage faratai, senĉese ! Mi estas malĝoja pri niaj kompatindaj geservistoj. Ili tiel amas min ! Ili ĉiuj estas tiel atentaj, tiel bonaj al mi. Mi dezirus, paĉjo, ke ili ĉiuj estu liberaj.

- Kio, Evnjo ! Knabineto, ĉu vi do ne trovas ilin feliĉaj kiel ili estas ?

- Sed, paĉjo, se ia malagrablaĵo okazus al vi, kio ili fariĝus ? Estas tiom malmulte da homoj kiel vi, paĉjo ! Onklo Alfredo, ne estas la sama afero; ankaŭ panjo; kaj pensu pri la mastroj de la kompatinda maljuna Prunjo ! Tiom da teruraj aferoj kiuj estas faratai, kiuj rajtas esti faratai ! *Kaj la infano ektremis.*

- Kara amatino, vi estas tro kompatema, tro sentema ! Mi bedaŭras ke mi lasis vin aŭdi tiajn rakontojn !

- Ho ! Paĉjo, jen tio kio ĉagrenas min. Ĉu vi volas min tiel feliĉa ? Vi ne toleras ke mi havu la plej bagatelan doloron; ke mi suferas de io ajn; vi eĉ ne volus lasi min aŭdi malĝojan rakonton, kiam aliaj kompatindaj estuloj havas nur dolorojn kaj malĝojojn dum sia tuta vivo. Ha ! Paĉjo, tio ŝajnas tiel egoisma ! He ! Ĉu mi ne devas scii tion por kompati tion ? Mi tiel multe pensas pri tio ! Tio eniras min ĝis tute funde de la koro. Mi pensas pri tio kaj senĉese repensas. Paĉjo, ĉu ne estas rimedo por ke ĉiuj sklavoj estu liberaj ?

- Tio estas tre malsimpla demando, karulino mia. Nia vojo estas pereiga, ne estas dubo; nia sistemo bedaŭrinda; multe da homoj tiel pensas, kaj mi kun ili. Mi dezirus per mia tuta animo, ke ne plu estu eĉ unu sklavo sur la tero; sed kiel sukcesi ? Kiujn rimedojn preni ? Mi nenion scias.

- Paĉjo, vi estas tiel bona, tiel nobla, tiel tenera; vi

havas tiel agrablan manieron diri ĉion kion vi diras; se vi irus de unu al la alia provi persvadi la homojn fari tion kio estus deca kaj bona ! Post kiam mi estos morta, paĉjo, vi pripensos tion, ĉu ne ? Ĉu vi faros tion pro la amo de mi ? Mi tiom ŝatus fari tion, se mi kapablus !

- Kiam vi estos morta, Evnjo ! *ekkriis Sanklaro kun malespera impulso*. Ho ! Infano, ne tiel parolu al mi ! Ĉu vi ne estas ĉio kion mi havas sur la tero !

- La infano de maljuna Prunjo estis ankaŭ ĉio kion ŝi posedis en la mondo; kaj tamen ŝi aŭdis lin krii ĝis morti, sen povi iri al li ! Paĉjo, ĉi tiuj kompatindaj homoj amas siajn karajn etulojn kiel vi ja amas min. Ho ! Faru ion por ili ! Ĉu ne estas la kompatinda Avino kiun mi vidis plori multfoje parolante pri ŝiaj infanoj; kaj Tomo kiu tiom amas la siajn ! Ĉu tio ne estas terura, kara paĉjo, ke tiaj aferoj ekzistas, kaj tamen ili okazas ĉiutage !

- Jen, karulino mia, jen, mia Evnjo, diris Sanklaro provante trankviligi ŝin. Ne afliktiĝiu, ne plu parolu al mi pri morti, kaj mi faros ĉion kion vi volos.

- Promesu al mi, paĉjo, ke Tomo havos sian liberecon tuj kiam…, ŝi haltis, poste heziteme diris, …kiam mi ne plu estos.

- Jes, kara, mi faros ĉion en la mondo; ĉion kiun vi povas peti al mi.

- Kara patro, *diris la infano apogante sian brulantan vangon kontraŭ tiun de Sanklaro*, kiel mi dezirus ke ni povus iri tien kune !

- Iri kien, trezoro mia ?

- En la domo de nia patro, de nia savanto, kie estas paco, kvieto, kie oni tiom amas unu la alian ! *La infano parolis pri tio kiel loko kiun ŝi estus vidinta*. Ĉu vi ankaŭ ne volas veni tien, paĉjo ?

Sanklaro pli forte ĉirkaŭpremis ŝin kontraŭ sia sino kaj silentis.

- Vi venos al mi, paĉjo, *kaj la tinta voĉo havis tiun seriozan konvinkan akcenton kiun Evnjo kelkfoje prenis sen rimarki tion.*

- Jes, mi sekvos vin, mi ne povas forlasi vin.

La vespero envolvis ilin en siajn ombrojn, pli kaj pli dikajn kaj solenajn. Sanklaro ankoraŭ tenis la malfortikan etan korpon premata kontraŭ sia brusto. Li ne plu vidis tiun profundan kaj esprimoplenan okulon, sed la dolĉa infana voĉo, kiu suspiris en lia orelo, ŝajnis la elspiro de spirito. Kiel en suverena vizio, subite lia tute kompleta pasintaĵo leviĝis antaŭ li. La himnoj kaj preĝoj de lia patrino; liaj unuaj fervoraj aspiroj al justeco kaj virto; poste, inter tiuj malproksimaj tempoj kaj la nuna horo, jaroj de skeptikeco, de monduma vivo, de tio kion homoj nomas honoran ekziston. Ni povas amasigi multmulte da pensoj en sekundo. Sanklaro vidis, sentis, sed tute ne parolis, kaj ĉar la nokto progresis, li kunportis la infanon en ŝian ĉambron; kaj kiam ŝi estis preta enlitiĝi, li foririgis la servistinojn, kaj lulis Evnjoⁿ en siaj brakoj, mallaŭte kantante ĝis kiam ŝi endormiĝis.

26. La eta Evangeliistino.

Estis dimanĉo posttagmeze. Sanklaro, etendita sur bambua sofo, gustumis sian cigaron en la verando. Kontraŭe, antaŭ la malfermita fenestro de la salono, protektita kontraŭ moskitaj trafoj de hermetike fermita remparo el gazo, lia edzino, enfosita en la kusenoj de sofo, tenis en la mano, konsidere de la tago, elegante binditan preĝlibron. Ŝi imagis esti leginta, kvankam ŝi fakte nur lasis la libron malferma antaŭ si, dum sinsekvo da dormetoj.

F^ino^ Ofelio, finfine sukcesinta malkovri je malmulte da distanco, malgrandan metodistan kongregacion, veture iris al la kunveno, akompanata de Evnjo kaj kondukata de Tomo.

- Finfine, Agusteno, diris Marta post esti dum momento duondorminta, necesas sendi al urbo serĉi mian maljunan kuraciston Posej. Mi havas koran malsanon, mi sentas tion.

- Sed kial la doktoro Posej ? La kuracisto kiu prizorgas Evnjo^n^ ŝajnas al mi tre lerta.

- Ho ! Mi ne fidus lin en tia kazo. Ĉi tio estas serioza, mi ne povas trompi min ! Mi nur pripensis pri tio dum tiuj du aŭ tri lastaj noktoj. Estas tiaj angoroj, tiel eksterordinaraj premsentoj !

- Ho ! Marta, vi vidas ĉion nigra ! Mi ne kredas pri ĉi tiu kora malsano !

- Mi anticipe sciis tion, mi atendis tion, mi tion certigas al vi ! Se Evnjo tusas plej malmulte en la mondo, se ŝi havas la plej malgravan doloreton, vi estas tute alarmita; sed mi, kio gravas por vi !

- Se vi absolute volegas havi koran malsanon, bone. Mi volas nur tion kio povas esti agrabla al vi, diris Sanklaro, sed antaŭsciigu min.

- Mi esperas ke iam vi ne afliktiĝus kiam estos tro malfrue ! Sed, kredu tion aŭ ne, miaj maltrankviloj pri Evnjo, la laciĝoj super miaj fortoj, akceptitaj por la kara infano, disvolvis tion kion ekde delonge mi havis ĉiujn kialojn timi.

Estintus malfacile precizigi la laciĝojn, pri kiuj Marta plendis. Estis la pripenso kiun Sanklaro sekrete permesis al si, kaj kiel senkompata estulo kiun li estis, li daŭrigis fumi sian cigaron ĝis la reveno de la veturilo, el kiu Evnjo kaj f^ino^ Ofelio elveturiĝis.

Tiu ĉi, laŭ ŝia senŝanĝa kutimo, antaŭ ol eldiri parolon, paŝis rekte al sia ĉambro por demeti sian ŝalon kaj sian ĉapelon.

Evnjo, alvokita de sia patro, kuris sidiĝi sur liajn genuojn, kaj rakontis al li ĉion kion ŝi vidis kaj aŭdis.

Baldaŭ, viglaj ekkrioj kaj hajlo da riproĉoj, falantaj oni-ne-scias-sur-kiu, eksplodis en la ĉambro de f^ino^ Ofelio, kiu eliris al la galerio.

- Kiun novan diablaĵon fimanovris por ni ĉi tiu elfo de Topsi ? demandis Sanklaro. Ŝi estas la origino de ĉi tiu ŝtormo, mi vetus tion !

En la posta minuto aperis f^ino^ Ofelio, kuntirante la kulpulinon, kaj en fortega ekbolo de indigno :

- Alvenu ĉi tien, ŝi ekkriis, alvenu, mi volas diri tion al via mastro.

- Kio okazas, kuzino ?

- Estas ke mi ne povas esti plu longe ĉikanita de ĉi tiu infano, tio estas transiri tutan kuraĝon : karno kaj sango ne povus elteni tion. Mi enfermis ŝin tien, donis al ŝi himnon por parkere lerni, kaj kion ŝi maltimis ? Spioni min kiam mi kaŝis mian ŝlosilon, malfermi mian ĉifonujon, preni mian plej belan garnaĵon de ĉapon, kaj distranĉi ĝin en pecojn por fari pupajn robojn ! Mi neniam vidis ion similan en mia vivo !

- Mi sufiĉe diris tion al vi, kuzino, rekomencis Marta,

tiaj estuloj ne estas regataj per paroloj. Se mi estus libera por agi, *kaj Marta ĵetis al Sanklaro ripročan rigardon*, mi sendus ĉi tiun infanon al pundomo por ke oni serioze vipu ŝin, kaj ĝis kiam ŝi ne plu povos stari sur siaj kruroj.

- Mi ne dubas pri tio, reparolis Sanklaro; parolu al mi pri virinoj kaj iliaj floraj ĉenoj ! Mi ne konis dekduon de ili, mi kredas, kiuj ne estis pretaj trolacigi, duonmortigi, ĉevalon aŭ serviston, se eĉ malmulte oni lasas ilin fari ! Viro estas nenio apud ili !

- Viaj sentimentalaj sensencaĵoj, Sanklaro, estas tute ekstersezona. Nia kuzino estas prudenta virino, kaj nun ŝi sufiĉe vidas ke mi prave diris.

F^ino^ Ofelio havis nur ĝuste la dozon de indigno kiu apartenas al la perfekta dommastrino, kaj kiun cetere pravigis la multaj malicaĵoj, la senfinaj malŝparoj de Topsi; sed la energio de Marta tro forte superis ŝian koleron, kaj ŝia tuta incitiĝo kvietiĝis.

- Antaŭ la tuta mondo, mi ne volus ke la infano estu tiel traktata, ŝi diris; sed, Aŭgusteno, mi estas fakte ĉe la limo de mia pacienco kaj de elturnaĵoj. Mi instruis, admonis, parolis, ripročis ĝis mi raŭkiĝis. Mi vipis ŝin, mi punis ŝin, kaj ŝi estas ĝuste tia kia ŝi estis unue !

- Ĉi tien, simio, venu ĉi tien ! diris Sanklaro alvokante la infanon apud li.

Topsi antaŭenpaŝis. Ia teruro, miksita kun ŝia stranga kutima mieno, briligis kaj palpebrumigis ŝiajn akrajn rondajn okulojn.

- Kiu instigis vin tiel konduti, nu ? diris Sanklaro kiu penis deteni sin ridi rigardante ŝin.

- Certe, esti mia malbona koro, solene diris Topsi, Fraŭlino Felio diri tion.

- Ĉu vi ne vidas la tutan klopodon kiun fraŭlino Ofelio faras ? Ŝi ne plu scias kion fari de vi, ĉu vi aŭdas ŝin ?

- Disinjoro, jes, mastro ! Maljuna mastrino diri tute same. Ŝi vipi min, ha, ŝi alidraŝe vipi min ! Ŝi elŝiri de mi la harojn, ŝi puŝegi mian kapon kontraŭ la pordon, kaj tio ŝanĝi nenion; tio fari nenian bonon al mi. Certe, ŝi esti plenmane foriganta ĉiujn harojn el mia kapo, ke tio ankaŭ ne utili al mi. Mi esti tiel mabona, Disinjoro ! Kaj plie mi finfine esti nur negrino !

- Mi rezignos la partion, reparolis f^ino^ Ofelio; mi havas sufiĉe, mi ne povos elteni pli.

- Permesu al mi nur tute etan demandon, diris Sanklaro.

- Demandon ! Kiun ?

- Se via Evangelio ne havas la forton reformi kaj savi nur unu etan paganinon, kiun vi regas absolute laŭ via plaĉo, kial sendi unu aŭ du kompatindajn misiistojn, por forporti ĉi tiun saman libron al miloj da samspecaj estuloj ? Ĉar la infano, mi supozas, estas nur bona specimeno de tio kio estas ĉiuj viaj aliaj paganoj de trans la maroj.

F^ino^ Ofelio ne tuj respondis. Evnjo, kiu ĝis tiam aŭskultis silente, signis al Topsi sekvi ŝin, kaj la du infanoj kune englitis en malgrandan vitran kameron ĉe la angulo de la verando, kie Sanklaro kelfoje iris legi.

- Kion Evnjo estas faronta ? demandis Sanklaro. Necesas ke mi vidu tion.

Piedpinte paŝanta, li malrapide antaŭeniris, iom malfermiĝis la pordokurtenon, kaj preskaŭ tuj, metante fingron sur siajn lipojn, li silente gestis al f^ino^ Ofelio apudi lin. La du infanoj estis sidaj vidalvide unu al la alia sur la planko. Topsi, kun sia petola, amuza kaj senzorga mieno, Evnjo, kun vigla, kompatema vizaĝo kaj larmoplenaj okuloj.

- Kio faras vin tiel malbona, Topsi ? Kial vi ne volas provi esti bona ? Ĉu vi ŝatas nenion, Topsi ? diris Evnjo.

- Ne scii. Mi tre ŝati kandon kaj la aliajn bonajn aferojn, jen ĉio.

- Sed, ĉu vi amas iun, vian paĉjon, vian panjon ?

- Mi neniam havi aŭ panjon aŭ paĉjon, vi scii. Mi jam diri tion al vi, fraŭlino Evnjo.

- Ha ! Mi scias, diris malgaje la knabineto, sed ĉu vi ne havas aŭ fraton, aŭ fratinon, aŭ onklinon, aŭ…

- Ho ! Neniam havi ion, neniam havi iun, tute neniun.

- Sed, Topsi, dependus nur de vi esti bona.

- Mi povi esti nur negrino, nenio alia, bona aŭ ne bona, diris Topsi. Se mi povi forigi de mi la nigran haŭton kaj esti tute blanka, ho, mi ne diri !

- Sed homoj povas ami vin, kvankam nigra, Topsi. Fraŭlino Ofelio amus vin, se vi estus bona.

La mallonga, subita, hakata rido, kutima esprimo de la nekredemo de Topsi, estis ŝia sola respondo.

- Ĉu vi ne kredas tion ?

- Ne, ŝi ne povi toleri min, ĉar mi estas negrino. Ŝi pli preferi esti tuŝata de bufon ol de mi ! Neniu ami negrojn, negroj kapabli fari nenion bonan. Sed domaĝe, mi ignori tion ! *Kaj Topsi ekfajfis.*

- Ho ! Topsi, kompatinda infano mia, mi amas vin ! *ekkriis Evnjo kun pasia impeto de animo; kaj ŝi tenere apogis sian travideblan manon sur la nigran ŝultron de Topsi.* Mi amas vin ĉar vi havas nek patron, nek patrinon, aŭ nek geamikojn, ĉar vi estas kompatinda, malfeliĉa kaj forlasita knabineto ! Mi amas vin kaj mi dezirus vin bona ! Komprenu, Topsi, mi estas tre malsana, mi vivos ne longe, kaj mi havas tiom da ĉagrenon vidi vin malbona ! Estu bona pro la amo de mi, mi havas tom malmulte da tempo por resti kun vi, Topsi !

La rondaj kaj akraj okuloj de la eta nigrulino subite vualiĝis. Dikaj brilaj gutoj malrapide ruliĝis unu post la alia, kaj falis sur la blankan maneton. Jes, en ĉi tiu momento, radio de fido, de ĉiela karitato, transiris la mallumon de tiu pagana animo, kaj Topsi kaŝis sian kapon inter siajn genuojn,

ŝi ploris, ŝi plorsingultis, dum la bela infano, ame klinita al ŝi, ŝajnis la brila anĝelo kliniĝanta super la pekulo kiu ĵus sin senpekigis.

- Kara kompatinda Topsi, diris Evnjo, ĉu vi ne scias ke Jesuo amas nin ĉiujn same ? Vin same multe kiel min ? Li amas vin kiel mi amas vin; sed multe, multe pli, ĉar li estas multe pli granda, multe pli bona. Li helpos vin fariĝi bona, kaj vi fine povos iri al la ĉielo, por esti anĝelo por ĉiam, tute kvazaŭ vi estus blankulino. Iom pensu pri tio ! Pensu, Topsi. Dependas nur de vi esti unu el tiuj beataj kaj brilaj spiritoj, kiujn kantas Onklo Tomo !

- Ho ! Kara fraŭlino Evnjo ! Kara ! Kara ! Mi voli, mi provi esti bona. Mi ne zorgi pri tio antaŭe, tute ne.

Sanklaro lasis refali la kurtenon.

- La dolĉa infano memorigas al mi pri mia patrino, li diris al f^ino^ Ofelio. Tio kion ŝi diris al mi, estas vera. Se ni volas redoni vidon al blindulo, ni devas, kiel Jesuo, alvoki lin al ni kaj surmeti la manojn sur lin.

- Mi ĉiam havis ian abomenon kontraŭ nigruloj, tio estas fakto, diris f^ino^ Ofelio. Mi ne ŝatis ke la infano tuŝu min; sed mi ne estis imaganta ke ŝi rimarkis tion.

- Fidu al infanojn por ĉi tiuj malkovroj, respondis Sanklaro. Ne eblas maski al ili la impreson kiun ili kaŭzas. La plej bonkoraj klopodoj, la servoj, la bonfaroj, nenio povas eksciti en ili ombron de dankemo, dum ĉi tiu abomeno ekzistas. Tio povas ŝajni stranga, sed tio estas.

- Kion fari ? diris f^ino^ Ofelio; ili estas al mi tiel malagrablaj, ĉefe ĉi tiu etulino. Mi finfine ne kapablas ŝanĝi miajn impresojn !

- Evnjo sukcesas tion, ŝajnas.

- Ho ! Evnjo estas io alia. Ŝi estas tiel amema ! Kaj tio finfine estas nur esti kristana, aldonis f^ino^ Ofelio per pensema tono. Mi volonte dezirus simili al ŝi, kaj mi kredas

ke ŝi ĵus donis al mi helpan lecionon.

- Eble jes, observigis Sanklaro. Ne estus la unua fojo, ke eta infano estus sendita por instrui maljunan disĉiplon.

27. Morto.

Kompatu, kompatu la novan floron
Kiu mortas velkinta en sia butono,
Kaj la idon de la hirundo
Falinta el la nesto, kompatinda abortaĵo !
Sed ne ploru la infanecon
Kiu, en suspiro al la ĉielo,
Ellasas, laŭ sia naiveco,
Sian animon al la piedo de la Eternulo.

La dormoĉambro de Evnjo, vasta kiel ĉiuj en la domo, ankaŭ rigardanta al la verando, inter la apartamento de siaj gepatroj kaj tiu de f^ino Ofelio, komunikis al la du tra kontraŭaj pordoj. Sanklaro, en sia tenera korinklino, havis plezuron ornami ĉi tiun ĉambron; lia altkvalita gusto sukcesis harmoniigi ĝin kun la ĉarma eta estulino kiu loĝis en ĝi. La maldika mato kiu kovris la plankon, farita en Parizo laŭ la desegnoj kiujn li mem verkis, prezentis en la centro ravan bukedon da florantaj rozoj ĉirkaŭitaj de girlando de butonoj kaj folioj. Kurtenoj el roza kaj blanka muslino pendis ĉe la fenestrojn; la lito, la seĝoj, la sofoj, estis el prilaborita bambuo, ĉirkaŭĉizita en graciajn fantaziajn formojn. Ĉe la litkapo, sur konzolo el alabastro, anĝelo kun etenditaj flugiloj tenis la kronon el mirto de kie verŝiĝis laŭ vaporaj faldoj, la roza gazo striita de arĝentfadeno kiu anstataŭis la kulvualon bezonata sub ĉi tiu klimato. Manoj de skulptitaj figuroj subtenis similajn kurtenojn super ĉiu el la sofoj ornamitaj de kusenoj el roza damasko. Sur la eleganta meza tablo, ankoraŭ el bambuo, vazo de Paroso, laŭ formo de lilio ĉirkaŭita de ĝiaj blankaj butonoj, kaj konstante garnita de la

plej belaj floroj, stariĝis super la libroj, la juveloj de Evnjo kaj la ĉarma skribilujo el alabastro, donaco de ŝia patro, kiam ŝi komencis ŝati la studadon. La marmora kamenbreto estis ornamita de ĉarma statueto de Jesuo alvokanta al si la infanojn. Ambaŭflanke, du marmoraj vazoj ĉiumatene pleniĝis per la grandiozaj bukedoj kiujn Tomo alportis kun tiom da orgojlo kaj da plezuro. Du aŭ tri pentraĵoj de majstroj, reprezentantaj infanojn en graciaj sintenoj, ornamis la lignotegaĵojn. Fine, ĉiutage malfermiĝante, la okuloj de Evnjo renkontis nur feliĉajn bildojn de beleco, de simpleco kaj de paco.

La ŝajna forto kiu dum kelkaj semajnoj subtenis ŝin, rapide malpliiĝis. Oni malpli kaj malpli aŭdis ŝian malpezan paŝadon sub la verando. Kaj oni trovis ŝin pli kaj pli ofte kuŝinta sur tolseĝo, antaŭ la malfermita fenestro, sekvante per la profunda rigardo de siaj grandaj okuloj la alternan movadon de la akvoj de la lago.

Ĉirkaŭ la mezo de la posttagmezo, dum ŝi estis tiel kuŝanta, kun sia Biblio duonmalfermita, kaj ŝiaj malfortaj fingretoj forgesitaj inter la paĝoj, ŝi subite aŭdis la voĉon de sia patrino laŭtigata ĝis akra tonalto.

- Nu, eta senhontulino ! Kian novan malbonfaron de viaj lertaĵoj vi faris nun ? Ĉu vi nune elŝiras la florojn ? *Kaj forte metita vangofrapo preskaŭ sonis en la oreloj de Evnjo.*

- Disinjoro, mastrino ! Tio ĉi esti tute por fraŭlino Evnjo, respondis la voĉo de Topsi.

- Evnjo ! Bona preteksto ! Kion vi volas ke ŝi faru per viaj floroj, sentaŭga eta negrino ? Nu ! Ĉu vi forkuros !

En la minuto, Evnjo saltis el sia lito, kaj aperis sub la verando.

- Ho ! Panjo, ne forpelu ŝin ! Mi amas ŝiajn florojn, donu ilin al mi. Mi tiom deziras ilin !

- Evnjo ! Sed via ĉambro jam estas tute plena de ili ?

- Mi ne povas havi tro multajn de ili. Topsi, alportu do ilin al mi.

La eta nigrulino, flanke restinta, kun la kapo klinita kaj tute malgaja, alproksimiĝis kaj prezentis siajn florojn, ne plu kun sia petola, maltima, senzorga mieno, sed kun sinĝenado, hezito, respekto, tute nova de ŝi.

- Kia bela bukedo ! diris Evnjo konsiderante ĝin.

La epiteto de originala estus pli ĝusta. Ĝi estis brila skarlata geranio, kun ununura blanka kamelio ĉirkaŭita de siaj glataj folioj. La sama stranga gusto kiu sin plaĉis per la tiel akra kontrasto de koloroj, skrupule studis la aranĝon de ĉiu el la folioj.

Topsi ŝajnis ĉarmita kiam Evnjo diris al ŝi : "Ĉu vi scias ke vi tre bele aranĝas la florojn ?" Jen ĉi tiu vazo kiu estas malplena. Mi tre ĝojus havi ĉiutage, por garni ĝin, bukedon el via maniero, Topsi.

- Nu, tio estas strangega ! diris Marta. Por kio en la mondo vi volas tion ?

- Ne gravas, panjo, vi same ŝatas ke Topsi faru ĉi tion kiel ion alian, ĉu ne ?

- Ho ! Ĉion kio plaĉos al vi, kara mia. Topsi, ĉu vi aŭdas vian junan mastrinon ? Pensu esti akurata !

Topsi faris mallongan riverencon, mallevis la okulojn, kaj dum ŝi sin turnis por foriri, Evnjo vidis larmon ruliĝi sur ŝia nigra vango.

Komprenu, panjo, mi estis certa ke la kompatinda Topsi deziregis fari ion por mi, diris duonlaŭte Evnjo al sia patrino.

- Kia infaneco ! La fakto tutsimple estas ke ŝi ŝatas malbonon. Oni malpermesis al ŝi tuŝi la florojn, tiam ŝi elŝiras ilin. Jen tio kio estas. Sed, se tio estas via kaprico ke ŝi nudigu la florbedojn, bonege.

- Mi kredas, panjo, ke Topsi ne plu estas la sama, ŝi estas fariĝanta bona.

- Ŝi havos longan vojon por sukcesi tion, diris Marta kun disdegna rikano.

- Sed vi scias, panjo, ke la kompatinda Topsi konstante trovis ĉion kontraŭ ŝi.

- Ne de kiam ŝi estas hejme, certe ja. Ŝi estis sufiĉe predikata, katekizita, admonita; ĉiu partoprenis en tio, kaj faris ĉion kio estis farinda. Nu, ŝi estas tute same malbela, kaj ĉiam estos tia. Neniam oni eltiros ion bonan el tiu estulino !

- Estas tiel malsame, kara panjo, esti edukita kiel mi estis, ĉirkaŭita de geamikoj kaj de ĉio kio povis feliĉigi kaj bonigi min, aŭ esti forlasita kiel ĉi tiu kompatinda Topsi, tiel malfeliĉa antaŭ ol eniri en nian hejmon !

- Tio povas esti, diris Marta oscedante. Kia varmo ! Oni neniel povas elteni !

- Ĉu vi ne kredas, panjo, ke Topsi povus, tute same kiel ni, fariĝi anĝelo, se ŝi estus kristanino ?

- Topsi, anĝelo ! Kia stranga ideo ! Estas nur vi, Evnjo, por havi ĉi tiujn imagojn de la alia mondo. Tamen laŭ tio kion mi scias pri tio, tio eblas.

- Panjo, ĉu Dio ne estas ŝia patro de ŝi, tutsame kiel de ni ? Ĉu Jesuo ankaŭ ne estas ŝia Savanto ?

- Mi ne diras ne. Mi supozas ke Dio kreis la tutan mondon. Kie do estas mia flakono ?

- Kia domaĝo ! Ho ! Kia domaĝo ! *murmuris Evnjo mem parolante, kun ŝiaj okuloj tenere fiksitaj foren sur la moviĝanta lago.*

- Kio estas tiel bedaŭrinda ? demandis Marta.

- ke tiom da estuloj kiuj povus supreniri tien por brili meze de la anĝeloj, vivi kun la anĝeloj ! falas, falas tiel malsupren, tiel malsupren, sen iu kiu helpu ilin ! Bedaŭrinde !

- Ĉar oni tute ne kulpas pri tio, kial turmenti al si la menson, Evnjo ! Miaflanke mi ne vidas rimedon. Sufiĉas al ni

esti dankemaj pro la donacoj kiuj estas atribuataj al ni.

- Mi apenaŭ povas esti dankema. Estas tiom malĝoje pensi pri tiuj kompatindaj homoj kiuj, ili, nenion ricevis !

- Speciala infano ! Pri mi, mia religio devigas min ĝoji kaj danki pro la avantaĝoj kiujn mi ĝuas.

- Panjo, *reparolis Evnjo kelkajn minutojn poste*, mi volus ke oni tondu parton de miaj haroj, grandan parton.

- Por kion fari ?

- Por doni ilin al miaj geamikoj, panjo, dum mi povas mem fari tion. Ĉu vi bonvolus peti onklineton veni por tondi ilin al mi ?

Marta laŭtigis la voĉon, kaj alvokis al f^inon^ Ofelio^n^ kiu laboris en sia ĉambro.

Kiam ŝi eniris, la infano, duonlevita sur siaj kapkusenoj, skuis siajn longajn buklojn el polurita oro, kaj ŝi diris al ŝi, ridetanta kaj gajeta : "Nu, onklino, venu tondi la ŝafidon".

- Kio okazas ? *demandis Sanklaro dum li eniris alportante iom da maloftaj fruktoj kiujn li ĵus serĉis por Evnjo.*

- Estis mi, paĉjo, kiu petegis onklinon iom tondi miajn harojn, mi ilin havas tro multe. Ili ŝarĝas mian kapon, plie mi volus doni ilin.

F^ino^ Ofelio antaŭenpaŝis kun siaj tondiloj.

- Atentu, ne malbonigu ĉi tiun belan hararon ! diris la patro. Tondu tre suben, ke tio ne ŝajnu. Estas mia orgojlo, al mi, la buklojn de Evnjo.

- Ho ! Paĉjo, ŝi diris malgaje.

- Jes certe, mi volegas konservi ilin en ilia beleco, por la tempo kiam mi kondukos vin al la plantejo de via onklo por vidi la kuzon Henro^n^. *Kaj Sanklaro prenis sian gajan tonon.*

- Mi neniam iros, paĉjo. Mi iras en pli belan landon. Ho ! Kredu tion ! Ĉu vi ne vidas, kara paĉjo, ke ĉiutage mi malfortiĝas ?

- Evnjo, kruela infano ! Kial tiel insisti ?

- Ĉar ĝi estas la vero, paĉjo; se vi nun volus kredi tion, eble vi fine sentus tion kiel mi.

Sanklaro, kun lipoj kunpremitaj, restis stara, senmova, kun okuloj fiksitaj al tiuj belaj bukloj kiuj, laŭmezure kiel la tondilo disigis ilin de la kapo de la infano, estis metitaj unu post la alia sur ŝiajn genuojn. Evnjo prenis ilin, konsideris ilin, volvis ilin ĉirkaŭ siajn maldikajn fingrojn, poste reĵetis malserenan rigardon al sia patro.

- Estas ĝuste kiel mi antaŭdiris tion ! ĝemis Marta. Estas tio kio subfosas tagon post tago mian mizeran sanon. Tio kio faligas min en la tombon, sen tio ke oni nur atentas tion ! Mi antaŭ sufiĉe longe penadis diri tion al vi, Sanklaro ! Vi finfine vidos tion, vi vidos ke mi pravis !

- Tio kio estos por vi granda konsolo, sen ia dubo ! diris amare Sanklaro.

Marta rekliniĝis malantaŭen sur sian tolseĝon, kaj kovris al si la vizaĝon per sia naztuko el batisto.

La lazura okulo de Evnjo pasis de unu al la alia, kun profunda esprimo. Ĝi estis la kvieta, klarvida rigardo de animo duonliberigita de siaj surteraj ligoj. Ŝi sentis, ŝi plene aprezis la diferencon inter ambaŭ.

Ŝi signis per mano al sia patro. Li venis kaj sidiĝis apud ŝi.

- Paĉjo, miaj fortoj malpliiĝas pli kaj pli. Mi sentas ke mi estas foriranta. Tamen estas aferoj kiujn mi volus diri kaj fari, kaj vi estas tiel kolera kiam mi pri tio diras nur unu vorton… Sed necesas, ne plu estas por prokrasti. Se vi permesus tion al mi, paĉjo, mi tuj parolus.

- Mia Evnjo, mi permesas tion, diris Sanklaro. Li kovris al si la vizaĝon per unu el siaj manoj, en la alia li premis tiun de la infano.

- Do mi volus vidi ĉiujn niajn homojn kunigitajn. Estas

ion kion mi devas diri al ili ĉiujn, ŝi diris.

- Konsentite ! diris Sanklaro per seka kaj gorĝa voĉo.

Mesaĝo sendita de f^ino Ofelio, venigis en iom da minutoj ĉiujn geservistojn en la ĉambro.

Evnjo estis refalinta sur siajn kapkusenojn, ŝiaj haroj estis distaŭzitaj ĉirkaŭ ŝia vizaĝo. La viglaj koloroj de ŝiaj vangoj formis doloran kontraston kun la senbrila blankeco de ŝia vizaĝkoloro kaj la delikata maldikeco de ŝiaj puraj trajtoj. Ŝiaj okuloj, ankoraŭ pligrandigitaj, kie spiris ŝia tuta animo, fervore fiksiĝis sur ĉiun.

Ĉiuj estis emociitaj. Ĉi tiu ideala etera vizaĝo; tiuj longaj bukloj de tonditaj haroj, vicigitaj apud ŝi; la deturnita facio de la patro, la singultoj de Marta, tio estis pli ol necese por intense kortuŝi impreseblan kaj teneran rason.

Laŭmezure kiam la geservistoj eniris, ili sin rigardis unu la alian, suspiris, skuis la kapon. Inter ili regis morta silento.

Evnjo leviĝis, fiksis laŭvice sur ĉiun sian penetran rigardon. Ĉiuj ŝajnis malĝojaj, timigita; pluraj virinoj kaŝis al si la vizaĝon en siajn antaŭtukojn.

- Mi alvokis vin, karaj geamikoj, diris Evnjo, ĉar mi amas vin. Mi amas vin ĉiujn, kaj tio kion mi havas por diri al vi, mi volas ke vi ĉiam memoru tion… Mi forlasas vin; mi foriras. Ankoraŭ kelkajn semajnojn kaj vi ne plu vidos min.

Eksplodo de ĝemoj, de lamentoj, en kiuj perdiĝis la mallaŭta voĉo de la infano, interrompis ŝin. Ŝi atendis dum minuto, poste ŝi rekomencis kun peno, per tono kiu subpremis iliajn plorĝemojn :

- Se vi amas min, necesas ne interrompi min. Aŭskultu min ! Estas pri viaj animoj kiujn mi devas paroli al vi… Pluraj ne pensas pri tio, mi timas; vi nur pensas pri ĉi tiu mondo. Mi petegas vin, memoru ke ekzistas unu pli bela, kie estas Jesuo ! Estas tie kien mi iras, kaj vi ankaŭ povos veni tien, ĝi estas por vi tiom kiom por mi. Sed, por atingi ĝin, necesas ne

pasigi senfaran, senzorgan vivon; necesas esti kristano. Pensu pri tion ! Ĉiu el vi povas fariĝi anĝelo, anĝelo por ĉiam… Se vi vere deziras esti kristano, Jesuo helpos vin. Preĝu lin; legu…

La infano haltis, tenere rigardis ilin kaj malgaje diris : "*Ho karaj ! Vi ne kapablas legi. Kompatindaj animoj !*" Ŝi kaŝis sian vizaĝon en sian kapkusenon, kaj plorsingultis. La sufokitaj singultoj de tiuj kiuj surgenue ĉirkaŭis ŝin respondis al ŝi, kaj revokis ŝin al ili.

- Ne gravas ! ŝi rekomencis, kaj sur ŝia radianta vizaĝo rideto brilis tra ŝiaj larmoj. Mi preĝis por vi. Se vi ne povas legi, Jesuo ĉeestas, kiu aŭdas vin. Faru ĉiuj vian plejbonon !… Preĝu !… Petu al li helpi vin. Kiam vi povos, faru legi al vi la Biblion; kaj mi esperas tion, mi revidos vin ĉiujn tien supren en la ĉielon !

- Amen ! murmuris Tomo, Avino kaj kelkaj el la malnovaj geservistoj kiuj apartenis al la metodisma eklezio. La plej junaj, la plej senpripensaj, regataj de sia emocio, plorsingultis kun la kapo klinita sur iliaj genuoj.

- Mi scias, reparolis Evnjo, ke vi ĉiuj amas min.

"Jes, ho jes ! kara fraŭlino Evnjo ! Disinjoro benu ŝin !" Senkonsciaj ekkrioj aŭdiĝis de ĉiuj flankoj.

- Mi scias tion, mi kredas tion. Ne estas unu el vi kiu ne estis bona por mi. Kaj mi volas doni al vi ion kion vi ne povos vidi sen memori pri Evnjo ! Ĝi estas buklo el miaj haroj. Ĉiufoje kiam vi rigardos ĝin, pensu ke mi amis vin, ke mi la unua iris al ĉielo, kaj ke mi tie atendas vin ĉiujn !

La sceno kiu sekvas ne estas priskribebla. Ili singultis, ili ploris, ili alpremiĝis ĉirkaŭ la kara etulino, por ricevi el ŝiaj manoj ĉi tiun lastan signon de ŝia amo. Surgenue kliniĝintaj, ili plorĝemis, kisis la randon de ŝiaj vestoj, kaj la plej maljunaj prezentis al ŝi tenerajn kaj karesajn parolojn, miksitajn kun preĝoj kaj benoj, laŭ la maniero de sia amplena

kaj impresebla raso.

F^ino Ofelio, timante la kortuŝon por sia eta malsanulino, gestis al ĉiu el tiuj kiuj ricevis la altvaloran donacon, por eliri el la apartamento.

Fine, restis nur Tomo kaj Avino.

- Prenu, onklo Tomo, diris Evnjo, jen iu bela por vi. Ho ! Mi tiom ĝojas, onklo Tomo, pensi ke mi revidos vin tien supren ! Ĉar mi certas ke vi ja venos tien ! Kaj vi, Avino ! Kara bona Avino ! *Kaj ŝi ekzaltite ĵetis siajn brakojn ĉirkaŭ la kolon de sia maljuna vartistino*. Ankaŭ vi ja venos tien !

- Ho ! Fraŭlino Evnjo, kiel, malriĉa maljuna Avino, sukcesi vivi kiam vi ne plu ĉeesti ! *diris la fidela estulino*. Ĉio esti foririnta, domo malplena, nenio pli ! *Kaj la kompatinda vartistino sin translasis al la doloro*.

F^ino Ofelio milde pelis ŝin kaj Tomo^n ekster la ĉambron, kaj ŝi kredis ĉiujn foririntaj, kiam sin turnante ŝi vidis Topsi^n stara.

- He ! El kie vi eliras ? ŝi surprizite ekkriis.

- Mi esti tie la tutan tempon, diris Topsi forviŝante kiel eble plej bone, la larmojn kiuj nebuligis ŝian vidon. Ho ! Fraŭlino Evnjo, mi esti tre malica ! Sed ĉu vi ne bonvoli doni unu el ili al mi ankaŭ ?

- Jes, kompatinda Topsi ! Jes, mi volas tion. Jen prenu. Ĉiufoje, kiam vi rigardos ĝin, pensu ke mi amas vin, kaj ke mi tiom deziras ke vi estu bona knabino.

- Ho ! Fraŭlino Evnjo ! mi provi tiom kiom mi povi. Sed, Disinjoro, esti tiel malfacile fariĝi bona ! Tute ne kutimita, ne scii kiel fari tion !

- Jesuo vidas vin, Topsi. Li kompatas vin, li helpos vin.

Topsi, kun vizaĝo kovrita de sia antaŭtuko, silente preterpasis antaŭ f^ino Ofelio. ŝi jam kaŝis la altvaloran buklon sur sia sino.

Ĉiuj estis elirintaj, F^ino Ofelio fermis la pordon. ŝi

ploris pli ol unufoje dum ĉi tiu sceno; sed tio kio ĉefe maltrankviligis ŝin estis la konsekvencoj de ĉi tiu intensa ekscitiĝo por ŝia kara eta malsanulino.

Sanklaro restis sidanta dum la tuta tempo, kun la mano antaŭ la okuloj, en la sama sinteno. Post la foriro de la geservistoj, li ne moviĝis pli.

- Paĉjo ! diris mallaŭte Evnjo metante sian manon sur la sian.

Li ektremis kaj skuiĝis sen respondi.

- Kara paĉjo !

- Mi ne kapablas tion ! li ekkriis ekstarante. Ne ! Tio ne povas esti ! La Ĉiopova senkompate frapas min.

La tono estis ankoraŭ pli akra ol la paroloj.

- Aŭgusteno ! Ĉu Dio ne rajtas fari tion kion Li volas de siaj ? diris f^ino Ofelio.

- Eble, sed tio ne estas pli facile eltenebla.

La tono de Sanklaro estis seka, malmilda, ĝi estis korprema doloro kaj sen larmoj.

- Paĉjo, vi rompas al mi la koron ! *ekkriis Evnjo rektigante sin kaj sin ĵetante en liajn brakojn*. Ne necesas, ne necesas !

La infano plorsingultis kaj ploregis kun vigleco kiu alarmis ilin ĉiujn. Tuje la pensoj de ŝia patro sekvis alian vojon.

- Jen, Evnjo, jen, mia karulino ! Paco, paco ! Mi malpravis, mi agis malbone, mi pentas. Mi sentos, mi parolos kiel vi volos; nur trankviliĝu; ne plu ploru. Mi rezignos.

Kiel laciga kolombo, Evnjo restis alpremiĝinta kontraŭ la sino de sia patro kiu, kliniĝinta al ŝi, provis trankviligi ŝin per la plej teneraj, la plej karesaj paroloj.

Marta ekstaris, rapidis ekster la ĉambron kaj iris fali ĉe si, kaptita de nervaj atakoj.

- Kaj al mi, Evnjo, *diris la patro malgaje ridetante*, ĉu vi

ne donis al mi buklon ?

- Ĉu ili ĉiuj ne estas por vi, paĉjo ? Por vi kaj por panjo ? ŝi respondis kun rideto. Vi lasos onklinon preni tiom, kiom ŝi volos. Se mi mem donacis ilin al niaj kompatindaj homoj, estas ĉar, komprenu paĉjo, ili povus esti forgesitaj kiam mi estos foririnta ! Estas ankaŭ por helpi ilin memori… Vi, paĉjo, vi estas kristano, ĉu ne ? *diris Evnjo kun negrava dubo.*

- Kial vi demandas tion al mi ?

- Mi ne scias. Vi estas tiel bona, ke vi ne povus malhelpi vin esti kristano.

- Sed, kio estas esti kristano, Evnjo ?

- Ĝi estas ami Kristo^{n} antaŭ ĉio.

- Kaj vi tiel amas al li, Evnjo ?

- Ho ! Certe jes !

- Vi tamen neniam vidis lin !

- Kion tio faras ? diris Evnjo. Mi kredas al li, kaj mi baldaŭ vidos lin ! *La juna vizaĝo radiis de ĝojo kaj espero.*

Sanklaro silentis. Li konis ĉe sia patrino ĉi tiun saman fervoron de fido; sed en li neniu sento unisone vibris.

Ekde tiu momento la defalo estis rapida. Ne plu eblis dubo, kaj la plej entuziasmaj esperoj ne povus blindiĝi. La ĉarma rifuĝejo de Evnjo fariĝis ĉambro de malsanulino kie f^{ino} Ofelio plenumis, tage kaj nokte, la oficon de la plej sindonema flegistino; neniam ŝiaj amikoj havis kialon por tiel alte estimi ŝin. Kun tiel spertaj okulo kaj mano, kun tiom da lerteco, kun tiel perfekta praktikemo pri ĉiuj etaj zorgoj kiuj povas daŭrigi ordon, purecon, mildigi suferojn, forigi el la vido ĉiujn dolorajn incidentojn de la malsano; kun tiel ĝusta aprezo de la tempo; kun ĉiam firma, ĉiam ĉeestanta kapo, fidinda memoro, skrupula akurateco por sekvi la receptojn de la kuracistoj; estis per ŝi sola ke Sanklaro kalkulis. Post esti iam moketanta pri ŝiaj malgravaj

strangaĵoj, pri ŝiaj detalemaj kutimoj, tiel kontraŭaj al la senzorga libereco de moroj de la sudaj loĝantoj, oni nun agnoskis ŝian netakseblan valoron.

Onklo Tomo ofte troviĝis en la ĉambro de Evnjo. La infano, kiu suferis nervozan agitiĝon, travivis veran kvietiĝon esti portata, kaj la plej granda ĝojo de Tomo estis teni inter siaj brakoj, sur kapkuseno, la gracilan kaj malfortan etulinon, kiun li transportis tien kaj tien en la ĉambro, sub la verando. Kaj kiam blovis la freŝa mara venteto, kiam matene Evnjo sentis sin iom pli forta, li kelkfoje promenigis ŝin sub la oranĝujoj de la ĝardeno, aŭ momente sidante en kelkaj el la lokoj kiujn ŝi ŝatis, li kantis al ŝi ŝiajn plej ŝatatajn himnojn.

Ŝia patro ankaŭ portis ŝin; sed malpli forta ol Tomo, li pli rapide laciĝis.

- Ho ! Paĉjo, diris al li Evnjo, lasu Tomo preni min. Kompatinda kara onklo Tomo ! Tio tiom plezurigas lin ! Tio estas la sola afero kiun li nune devas fari. Kaj li tiom bezonas senti sin utila !

- Ankaŭ mi, Evnjo ! diris ŝia patro; mi havas la saman bezonon.

- Ho ! Sed,vi, paĉjo, vi povas fari ĉion, kaj vi estas ĉio por mi. Estas vi kiu legas por mi, vi kiu nokte zorgas min. Tomo povas nur porti min aŭ kanti al mi kantojn. Kaj mi cetere scias ke mi lacigas lin malpli ol vin; li estas tiel forta !

Tomo ne estis la sola kiu deziris fari ion por Evnjo. Ĉiuj homoj de la domo deziris tion kun preskaŭ egala ardo. Kaj ĉiu faris ĉiujn servojn laŭ sia povo.

La koro de la kompatinda Avino senĉese suspiris je sia kara infano, sen ke ŝi trovu liberan momenton, nek tage nek nokte. S^ino^ Sanklaro deklaris ke ŝia spiritostato ebligis al ŝi nenian ripozon; konsekvence estis kontraŭ ŝiaj principoj lasi ripozi iun ajn. Dudekfoje nokte Avino devis ellitiĝi por froti al ŝi la piedojn, laveti ŝian kapon per malvarmeta akvo, serĉi

por ŝi ŝian poŝtukon, vidi kial oni bruis en la ĉambro de Evnjo, mallevi kurtenon ĉar estis tro luma, levi ĝin ĉar estis tro malluma. Kaj tage, kiam ŝia tuta deziro estis ŝarĝi sin per malgranda parto de la prizorgoj kiujn postulis la infano, kiun ŝi nutris, ŝia mastrino montris sin inĝenia por okupi ŝin en iu angulo aŭ alia de la loĝejo, se ŝi ne uzis ŝin pri sia persono. Tiel ke ĉio kion povis la kompatinda flegistino estis videti la etan malsanulinon dum kelkaj momentoj kaj ŝtele.

- Mi sentas tion, diris s^ino Sanklaro, hodiaŭ estas por mi trudema devo domaĝi min, malforta kiel mi estas, kaj kiam sur mi sola pezas ĉiuj atentoj kaj ĉiuj flegadoj kiujn postulas la kompatinda infano !

- Verdire, kara, rebatis Sanklaro, mi kredintus ke nia kuzino treege faciligis al vi ĉi tiun taskon.

- Kiel tio estas bone paroli laŭ viro, Sanklaro ! Kvazaŭ patrino povus esti liberigita de la prizorgoj kiujn postulas ŝia filino en tia stato ! Cetere tio estas tute simpla. Kiu iam scios tion kion mi suferas ! Mi ja ne kapablas skui la aferojn kiel vi faras !

Sanklaro ridetis. Pardonu lin, kiel reteni sin ! Ĉar li ankoraŭ povis rideti. La adiaŭa vojo de la tute dia animeto estis tiel brila, tiel serena ! La gracila boato velis, pelata de tiel mildaj, tiel favoraj ventetoj al la ĉielaj randoj ! Ne eblas pensi ke la morto alproksimiĝis ! La infano havis neniun doloron; estis nur senfortiĝo grada, malrapida, preskaŭ sensenta. Pro vidi ŝin tiel bela, tiel amema, tiel plena de fido kaj feliĉo, neniu povis eviti la dolĉegan influon de la paca etoso kiu ŝajnis eliĝi el ŝi. Sanklaro sentis strangan kvietecon kreski en sia animo, ĝi ne estis espero, tio ne plu eblis, ĝi ne estis rezigno; ĝi estis kiel trankvila halto en la nuntempo, tro bela por ke oni volu pensi pri la estonteco. Ĝi estis ĉi tiu ĝuplena ripozo kiun oni aŭtune sentas, kiam en la grandaj silentaj arbaroj, oni ĝuas ju pli la viglan kaj brilan

ruĝecon de la foliaro, la brilon de la lastaj floroj, kliniĝantajn al la rando de la riveretoj, des pli tiuj efemeraj belecoj estas pretaj eskapi vin.

La amiko kiu tiel ofte portis Evnjon, penetris en sian konfidon pli profunde ol iu ajn. Estis al Tomo, ke la infano, kiu timintus aflikti sian patron, faris konfidencon de tiuj antaŭsentoj kiuj vibras en la animo, laŭmezure kiam ŝiaj surteraj ligoj malstreĉiĝas, kaj kiam ŝi sin preparas forlasi por ĉiam sian argilan malliberejon.

Tomo fine ne plu dormis en sia ĉambro. Li pasigis la noktojn surplanke etendita en la verando, preta kuri ĉe la unua bruo.

- Kiun eksterordinaran fantazion vi havas, Onklo Tomo, dormi kiel hundo ie ajn ? demandis al li fino Ofelio. Mi rigardis vin kiel bonkondutan homon, kiu ŝatas tute kristane kuŝi en sia lito.

- Jes, fakte, antaŭe, fraŭlino Felio, diris mistere Tomo; sed nune…

- Nu, kio estas nune ?

- Necesi ne laŭte paroli; mastro Sanklaro ne voli aŭdi tion ! Sed, fraŭlino Felio, vi bone scii, ĉu ne necesi iun kiu vigli por atendi la edzon ? *(Mat 25, 1-13)*

- Kion vi volas diri, Tomo ?

- Esti dirita en la Skribo : "Ĉe noktomezo, oni aŭdi krii : *Jen la edzo kiu veni !* Esti Li kiun mi atendi, fraŭlino Felio. Cetere mi ne povi dormi malproksime, necesi ke mi esti tute proksima por aŭdi…

- Sed, onklo Tomo, de kie venas al vi ĉi tiun penson ?

- Fraŭlino Evnjo paroli al mi. Disinjoro sendi sian mesaĝiston al la animo. Necesi ke mi esti ĉi tie, fraŭlino Felio. Kiam ĉi tiu benita infano eniri en la regnon, la pordo tiel larĝe malfermiĝi ke ni ĉiuj ekvidi la gloron.

- Onklo Tomo, ĉu fraŭlino Evnjo diris al vi, ke ŝi sentis

sin pli malsana ĉi-vespere ?

- Ne; sed ŝi diri ĉimatene, ke la momento esti proksima. Esti iu kiu averti la infanon, fraŭlino Felio; ili esti la anĝeloj. "*Esti la sono de la korno antaŭ la komenciĝo de la tago !*" aldonis Tomo, citante unu el siaj plej ŝatataj himnoj.

Ĉi tiu dialogo inter f^ino^ Ofelio kaj Tomo okazis de la deka ĝis la dekunua vespere, kiam post esti fininta ĉiujn siajn aranĝojn por la nokto, ŝi trovis lin kuŝanta sur la sojlo, irante rigli la eksteran pordon.

Ŝi estis nek nervoza nek impresebla; sed la solena tono, la emociita kaj grava aspekto de Tomo, frapis ŝin. Dum la tuta posttagmezo, Evnjo sin montris pli vigla, pli gaja, multe pli forta. Sidanta en sia lito, ŝi faris alporti al si ĉiujn siajn malgrandajn juvelojn, kaj ŝi nomis tiujn el siaj geamikoj al kiuj ŝi destinis ĉiun aĵon. Ekde pluraj semajnoj ŝi ne aspektis tiel vigla; ŝia voĉo estis pli firma, pli natura. Ŝia patro vespere venis kaj diris ke Evnjo pli aspektis kiel si mem ol iam ajn ekde ŝia malsano. Post esti kisinta ŝin forlasante ŝin, li flustris ĉe la orelo de f^ino^ Ofelio : "*Kuzino , ni finfine konservos ŝin ! Certe ŝi pli bone fartas !*" Kaj li iris enlitiĝi kun la koro pli malpeza ol li havis ĝin ekde longe.

Sed noktomeze, stranga kaj mistika horo, kiam la vualo inter la pasema estanteco kaj la senfina estonteco fariĝas pli travidebla, tiam venis la mesaĝisto !

Aŭdiĝis sono en la silenta ĉambro. Unue rapidaj paŝoj estis tiuj de f^ino^ Ofelio kiu decidis vigili dum la tuta nokto, kaj kiu, ĉe ĉi tiu horo, distingis tion kion la spertaj flegistoj nomas ŝanĝon. La ekstera pordo estis malfermita, Tomo, vigla, staris sur siaj piedoj.

- Alvoku la kuraciston, Tomo, diris f^ino^ Ofelio, ne perdu minuton ! *Kaj, transirante la ĉambron, ŝi malforte frapis al la pordo de Sanklaro.*

- Kuzo, ŝi diris, necesus veni.

Ĉi tiuj vortoj falis sur la koron de Sanklaro kiel terbuloj sur ĉerko… Kial ?… Staranta ĉe la momento mem, li estas ĉe la kaplito, li kliniĝas super Evnjo. Evnjo dormas.

Kion li vidis por ke la batado de lia koro ĉesu ? Kial ne unu vorto interŝanĝita inter ili ? Vi povas diri tion, vi kiu vidis la saman esprimon sur la vizaĝo kiu estis al vi la plej kara ! Tiu rigardo, kiun neniu vorto priskribas, kiu akceptas neniun dubon, kiu mortigas esperon kaj tiel laŭte krias ke la plejamato ne plu apartenas al vi !

Nenio timiga vidiĝis sur tiu dolĉa vizaĝo. Ne; ĝi estis nobla esprimo, preskaŭ sublima. Ĉu estis la diafana ombro de la brilantaj flugiloj de anĝeloj ? Ĉu estis la radianta tagiĝo de la eterneco en ĉi tiu infana animo ?

Ili mute kontemplis ŝin, senmove. Tia silento ! La tiktako de la horloĝo ŝajnis tro laŭta !

Post malmulte da minutoj Tomo revenigis la kuraciston. Li eniris, ekĵetis rigardon al la malsanulino kaj restis senmova kaj silenta kiel ili.

- Je la kioma horo okazis ĉi tiu ŝanĝo ? li finfine flustris ĉe la orelo de f^ino^ Ofelio.

- Ĉirkaŭ la mezo de la nokto.

Marta, vekita de la eniro de la kuracisto, konsternita alkuris.

- Aŭgusteno ! Kuzino ! Ho ! Kio estas ?… ŝi vigle demandis.

- Silentu ! diris Sanklaro per raŭka kaj mallaŭta voĉo, ŝi mortiĝas !

Avino ekkomprenis, kaj kuris veki la geservistojn. Fulmorapide la tuta domo staris sur piedoj. La lumoj iris kaj venis; paŝoj aŭdiĝis, konfuzitaj vizaĝoj amasiĝis sub la verando. Ĉiuj rigardis, kun plorantaj okuloj, tra la vitropordoj. Sanklaro aŭdis nenion, diris nenion; li nur vidis ĉi tiun nenuligeblan esprimon sur la trajtoj de la dormanta

infano.

- Ho ! Se ŝi vekiĝus ! Se ŝi ankoraŭfoje parolus, ankoraŭ unu fojon ! Kaj, klininta al ŝi, li murmuris ĉe ŝia orelo "Evnjo, karulino !"

La larĝaj bluaj okuloj malfermiĝis, rideto pasis, ŝi provas levi sian kapon; ŝi volas paroli.

- Ĉu vi konas min, Evnjo !

- Kara paĉjo !

Kaj, per suverena penado, ŝi ĉirkaŭvolvis la kolon de Sanklaro de malfortiĝanta brako, kiu tuj refalis. Kiam li relevis la kapon, li vidis sur tiu plejamata vizaĝo la spasmon de agonio. Ŝi luktis por spiri, ŝi svingis siajn manetojn.

- Ho ! Dio, ĉi tio estas terura ! li angore ekkriis sin turnante kaj tordante la manon de Tomo sen scii tion kion li faris. "Ho ! Tomo, knabo mia ! Ha ! Ĉi tio mortigas min !

Tomo premis inter liaj, la du manojn de sia mastro; larmoj fluetis el siaj okuloj levitaj al la ĉielo; li serĉis helpon tie supre, de kie li ĉiam atendis ĝin.

- Preĝu ke tio estu mallonga ! murmuris Sanklaro. Tio estas terura torturo.

- Ho ! Benata estu Disinjoro ! Tio pasis, tio finiĝis ! kara mastro, rigardu !

La anhelanta infano restis konfuzita duonsveninta sur siaj kapkusenoj, kun ŝiaj grandaj okuloj klaraj kaj fiksaj turniĝintaj supren. Ha ! Kion diris ĉi tiuj okuloj kiuj tiom multe parolis al la ĉielo ? La tero kaj ĝiaj suferoj fuĝis; sed la triumfa brilo de tiu vizaĝo estis tiel solena, tiel mistera, ke ĝi ĉesigis eĉ la singultojn de la doloro. Ĉiuj sin premis ĉirkaŭ ŝi en senspira silento.

- Evnjo ! diris dolĉe Sanklaro.

Ŝi ne aŭdis.

- Ho Evnjo ! diru al ni tion kion vi vidas, kion vi vidas ? ekkriis ŝia patro.

Brila, glora rideto gajigis ŝian tutan vizaĝon, kaj ŝi diris per hakataj vortoj : "Ho ! Amo, ĝojo, paco !" Poste suspiro, kaj ŝi pasis de morto al vivo.

Adiaŭ, plejamata infano ! La brilaj pordoj, la eternaj pordoj estas fermitaj malantaŭ vi. Ni ne plu revidos vian dolĉan vizaĝon ! Ve al tiuj kiuj vidis ŝin eniri en la ĉielojn, kiam ili vekiĝos, por nur trovi la tagon senbrila kaj griza de la tero, kaj vi, ĝia lumo, estingita por ĉiam !

28. Jen la fino de tio kio estas surtera.

Johano Quincy Adams.

En la ĉambro de Evnjo, statuetoj kaj pentraĵoj estas blanke vualitaj. Sole surdigitaj paŝoj, sufokitaj spiroj ĝenas ĝian solenan silenton. Pala duonlumo penetras tra la fermitaj ĵaluzioj.

La lito estas blanke kovrita. Tie, sub la flugiloj de la preĝanta anĝelo, ripozas dormanta formo, dormanta por ne plu vekiĝi ! Ŝi kuŝas, vestita de unu el la simplaj blankaj roboj kiujn ŝi kutimis surmeti dum sia vivo. La rozaj rebriloj de la kurtenoj disradias sur la rigidan palecon de morto varman nuancon. La longaj okulharoj malleviĝas al tiujn tiel purajn vangojn ! La kapo estas iom turnita flanken, kiel dum dormado, sed ĉiu trajto de la vizaĝo estas trapenetrita de tiu ĉiela esprimo, miksaĵo de ravo kaj paco, kiu sciigas ke ĝi ne plu estas nedaŭra kaj tera dormo, sed la longa kaj dolĉa ripozo kiun Disinjoro donacas al siaj plejamatoj.

"Ne estas morto por vi kaj viaj similaj, kara Evnjo ! Nek ĝiaj kruelaĵoj, nek ĝiaj mallumoj; nur brila krepusko, kiel kiam la matena stelo paliĝas antaŭ la tagiĝaj fajroj. Vi atingis la venkon sen la batalo, la kronon sen la lukto".

Tiel pensis Sanklaro, dum stara kun brakoj krucigitaj, li silente kontemplis ŝin. Ha ! Kiu povintus esplori la abismon de ŝia doloro ! Ekde la fatala horo, kiam en la funebra ĉambro, voĉo diris "*Ŝi foriris !*", nebulo ĉion envolvis; malluma nokto de la animo en siaj angoroj ! Li aŭdis paroli ĉirkaŭ li, oni pridemandis lin, li respondis. Oni demandis lin kiam li volis ke okazu la funebra ceremonio, kaj kien li deziris ke ŝi estu demetita. Li malpacience diris ke ne gravis al li !

Adolfo kaj Roza ordigis la ĉambron. Malgraŭ ilia

neatentemo kaj ilia malseriozeco, nek unu, nek la alia malkuraĝis. Kaj dum f^ino Ofelio direktis la ĝeneralan ordon kaj la purecon, ili metis la lastajn nuancojn de poezio kaj de sento, kiuj forprenas de la morto kaj de ĝia ĉirkaŭaĵo la melankolian kaj teruran aspekton kiu tro ofte markas Nov-Anglian funebron.

Estis sur ĉiuj bretoj blankaj floroj, delikataj, bonodoraj, kun graciaj, pendantaj folioj. Sur la malgranda tablo de Evnjo, kovrita de blanka batisto, estis ŝia plej ŝatata vazo, enhavanta ununuran blankan muskan rozbutonon(31). La faldoj de la kurtenoj kaj la drapiraĵoj estis aranĝitaj kun nobla kaj severa gusto. Dum Sanklaro estis tie, ankoraŭ senmova, Roza enŝoviĝis en la ĉambron, alportante korbon da floroj. Vidante la mastron, ŝi haltis kaj faris kelkajn paŝojn malantaŭen; sed rimarkante ke li ne moviĝas, ŝi alproksimiĝis al la lito. Li vidis ŝin, kiel en sonĝo, meti inter la kunigitajn manetojn branĉon de jasmeno, poste aranĝi la florojn ĉirkaŭ la lito.

La pordo denove malfermiĝis, kaj Topsi, kun ŝiaj okuloj pezaj de larmoj, aperis sur la sojlo. Ŝi kaŝis ion sub sia antaŭtuko. Roza per la mano signis al ŝi ordoneman geston, sed ŝi jam havis piedon en la ĉambro.

- Ĉu vi bonvoli foriri ! diris mallaŭte Roza per nefleksebla tono. Vi havi nenion por fari ĉi tie !

- Ho ! Lasi ! Lasi al mi fari ! Mi porti floron, tiel belan floron ! diris la infano montrante apenaŭ malfermiĝintan te-rozon. Mi petegi vin, lasi min meti ĝin tien !

- Foriri ! diris insiste Roza.

- Ke ŝi restu ! ekkriis Sanklaro piedfrapante. Ke ŝi alproksimiĝu, mi volas tion !

Roza haste foriris. Topsi antaŭenpaŝis kaj demetis sian oferon ĉe la piedon de la korpo. Poste, subite, eligante

31 Rozo kies tigo kaj kaliko estas tre harplenaj kaj ŝajnas esti kovritaj de musko.

timigan, sovaĝan krion, ŝi ruliĝis planken apud la lito, ploris kaj laŭte ĝemis. F^ino Ofelio alkuris; ŝi provis restarigi la infanon, silentigi ŝin; sed vane.

- Ho fraŭlino Evnjo !... Fraŭlino Evnjo ! Ankaŭ mi voli esti mortinta ! Mi voli tion !

Estis en tiu krio tiel korŝira akcento, ke la senesprima vizaĝo de Sanklaro ruĝiĝis. La sango alfluis al ĝin, kaj la unuaj larmoj kiujn li verŝis ekde la morto de Evnjo, ŝprucis el liaj okuloj.

- Stariĝu, infano, diris f^ino Ofelio per mildigita voĉo. Ne ploru tiel laŭte ! Fraŭlino Evnjo foriris al ĉielo ! Ŝi nun estas anĝelo.

- Sed mi ne povi vidi ŝin ! Mi neniam plu vidi ŝin ! kaj Topsi denove plorsingultis.

Okazis momento de silento.

- Ŝi diri ke ŝi ami min, daŭrigis Topsi, jes, ŝi diri tion ! Ho nu ! Dio mia ! Nun restas neniu, neniu !

- Tio fakte estas vera, murmuris Sanklaro sin turnante al f^ino Ofelio. Nu, provu konsoli la kompatindan estulinon.

- Mi voli neniam naskiĝi, diris Topsi. Mi ne bezoni naskiĝi !... Por kio tio utili ?

F^ino Ofelio milde kaj firme levis ŝin, kaj elkondukis ŝin el la ĉambro.

- Topsi, kompatinda infano ! *ŝi diris, kaj larmoj falis el ŝiaj okuloj*. Ne afliktiĝu ! Ankaŭ mi povas ami vin ! Kvankam mi ne multe valoras kiel nia kara Evnjo. Mi esperas ke mi lernis de ŝi iom pri la amo de Jesuo al la mizeruloj. Mi povas ami vin; mi amas vin, Topsi. Kaj mi klopodos por helpi vin fariĝi brava knabino, bona kristanino.

La voĉo de f^ino Ofelio diris pli ol ŝiajn parolojn, kaj la larmoj kiuj fluis sur ŝiaj vangoj estis ankoraŭ pli esprimplenaj ol la vortoj. Ekde tiu momento ŝi akiris sur la spirito de la kompatinda forlasita etulino, influon kiun ŝi ne

plu perdis.

- Ho Evnjo mia, se via tiel mallonga horo pasigita sur la tero tiel multe utilis, pensis Sanklaro, kian konton mi ja ŝuldos por miaj longaj jaroj !

Obtuzaj murmuroj, diskretaj paŝoj sin sekvis en la ĉambro, ĉar ĉiuj venis, unu post la alia, por lastfoje kontempli la mortintinon. Poste oni alportis la malgrandan ĉerkon. Poste venis la tago de la enĉerkigo, la veturiloj sin lokis antaŭ la pordo. Fremduloj eniris kaj sidiĝis. Oni etendis blankajn vualojn, blankajn rubandojn, nigrajn krepojn. Funebrantaj homoj malrapide pasis. Oni legis parolojn el la Biblio; oni preĝis; kaj Sanklaro vivis, paŝis, agis, kiel viro kiu ne plu havas larmojn por verŝi. Ĝis la lasta momento, li vidis nur unu aferon, la etan blondan kapon en la ĉerko; poste li vidis la mortotukon kovri ŝin kaj la ĉerkon fermiĝi. Kaj kiam oni metis lin en lian lokon, apud la aliajn, li piediris ĝis la fundo de la ĝardeno. Tie, apud la muska benko, kie ŝi kaj Tomo tiel ofte babilis kaj kantis, la kaveto estis faŭkanta. Sanklaro haltis sur la rando kaj ĵetis enen konfuzan rigardon. Li vidis la ĉerkon malsupreniri tien; li konfuzite aŭdis la sanktajn vortojn : "*Mi estas la Resurekto kaj la Vivo; tiu kiu kredas al mi, kvankam li mortu, vivos !*" Kaj kiam la tero refalis sur la ĉerkon kaj kiam la kavo estis plenigita, li ne povis persvadi sin ke estis lia Evnjo ke oni enterigis for de liaj okuloj.

Ne, ne estis ŝi, ne estis Evnjo ! Estis nur la gracila semo en senmorta kaj radia formo, laŭ kiu ŝi aperos en la tago de Sinjoro Jesuo.

Ĉiuj disiĝis. La afliktitoj revenis al la domo kie ŝi ne plu revenos. Marta ne volis vidi la tagon; ŝi fermigis la ŝutrojn, sin ĵetis sur sian liton kaj senbride sin fordonis al la larmoj kaj ĝemoj. Ĉiun minuton ŝi postulis zorgojn de ĉiuj siaj geservistoj. Ili ja ne havis tempon por plori. Kial ili plorus ?

Ĉi tiu doloro estis ŝia propra doloro, kaj ŝi estis tute konvinkita ke neniu en la mondo sentis, povis senti kiel ŝi.

"Sanklaro ne verŝis eĉ unu larmon ! ŝi diris. Li ne havas ombron de simpatio ! Tio liaflanke estas nekredebla korharditeco , senekzempla sensenteco, sciante tion kion mi suferas !"

La homamaso estas tiel trompebla per tio kion ĝi vidas, per tio kion ĝi aŭdas, ke la plej multaj geservistoj persvadis sin ke "mastrino" fakte estis la plej kompatinda. Ĉefe kiam Marta havis nervajn atakojn, sendis serĉi la kuraciston kaj deklaris ke ŝi estis mortiĝanta. La iroj kaj reiroj, la almetoj de piedvarmigiloj da bolanta akvo, de varmaj flaneloj, la frotado, la bruo, la embaraso estis tiom da sanigaj distroj.

Tamen Tomo sentis sin funde de la koro altirita al sia mastro. Li sekvis lin ĉien kun maltrankvilo kaj malĝojo; kaj kiam li vidis lin tiel pala kaj kvieta, sida en la ĉambro de Evnjo, tenanta la malgrandan Biblion antaŭ si, sed nekapabla distingi nek vorton nek literon, li komprenis ke estis en ĉi tiu seka kaj fiksa okulo pli da doloro ol en ĉiuj ĝemoj kaj ĉiuj lamentoj de Marta.

Post malmulte da tagoj, la familio Sanklaro reiris al la urbo, Aŭgusteno esperanta eviti siajn pensadojn ŝanĝante la lokon. La domo, la ĝardeno, la malgranda tombo estis forlasitaj, kaj Sanklaro denove travagis la stratojn de Nov-Orleano, strebante plenigi la mankon en sia koro per la kirlado de la mondo kaj de la aferoj. Tiuj kiuj renkontis lin, sur la publika placo aŭ en la kafejo, vidis pri lia funebro nur la nigran krepon de lia ĉapelo; ĉar li ridetis, babilis, legis la ĵurnalojn, parolis pri politiko kaj informiĝis pri la borsa kurzo. Kiu povintus diveni ke ĉiuj tiuj ŝajnoj de vivo estis nur masko sur koro afliktita kaj silenta kiel la tombo ?

- S^{ro} Sanklaro estas stranga viro ! *iam diris Marta al f^{ino} Ofelio per plenda tono*. Mi imagis ke nia kara eta Evnjo

estis ĉio kion li amis en la mondo. Nu ! Li jam ŝajnas esti forgesinta ŝin ! Mi ne povas decidigi lin paroli al mi pri tio. Mi vere kredintus ke li montrintus pli da koro.

- La dormantaj akvoj estas la plej profundaj, oni diras, *rebatis f^ino Ofelio per sentencoplena tono*.

- Ho ! Mi ne kredas eĉ unu vorton; tio estas bona por paroli. Homoj kiuj havas sentemecon, montras ĝin; ili ne povus fari alimaniere. Estas granda malfeliĉo esti sentema. Mi bone ŝatus esti kiel Sanklaro. Mia sentemo konsumas min !

- Esti mastro Sanklaro kiu malgrasiĝi, mastrino ! Li preskaŭ esti ombro ! diris Avino. Li tute ne plu manĝi, li kompreneble ne forgesi fraŭlinon Evnjo^n. Kaj kiu povi forgesi ŝin, karan etan benitan animon ! *ŝi aldonis viŝante al si la okulojn*.

- Ĉiukaze li apenaŭ konsideras min, reparolis Marta, li ne prezentis al mi konsolan parolon, kaj li devas scii ke patrino sentas malsame ol viro.

- La koro sola konas sian propran amarecon, *diris serioze f^ino Ofelio*.

- Estas ĝuste tio kion mi pensas. Nur estas mi kiu scias tion kion mi sentas. Neniu ŝajnas suspekti tion. Evnjo ŝi divenis tion; sed ŝi ne plu estas tie ĉi ! *Kaj Marta singultante rekliniĝis malantaŭen sur sia sofo*.

Ŝi estis el tiuj homoj, malfeliĉe organizitaj, kiuj indiferentaj pri la havaĵoj kiujn ili posedas, donas al ili centoblan valoron tuj kiam ili perdis ilin. Dum io apartenis al ŝi, ŝi serĉis nur la difektojn de ĝi; tuj kiam ĝi mankis, la laŭdoj ne plu ĉesis.

Dum ĉi tiu konversacio okazis en la salono, alia okazis en la biblioteko.

Tomo, kiu maltrankvile sekvis sian mastron ĉien, vidis lin eniri la "libroĉambron" kelkajn horojn antaŭe. Post esti vane

atendante lin ĉe la elirejo, li decidis eniri la bibliotekon sub ia ajn preteksto, kaj malrapide malfermis la pordon. Sanklaro, etendita sur lito por ripozo ĉe la alia flanko de la ĉambro, estis kuŝinta sur la ventro. Ĉe mallonga distanco antaŭ li, la Biblio de Evnjo estis malfermita. Tomo alproksimiĝis, kaj haltis stare apud la lito. Li hezitis, kaj dum sia hezito, Sanklaro subite leviĝis. La honesta vizaĝo, plena de malĝojo, esprimis tiom da korinklino, tiom da simpatio, ke la mastro estis impresita. Li metis sian manon sur tiun de Tomo, kaj apogis sur ĝin sian frunton.

- Ho ! Tomo, mia knabo, la tuta mondo estas malplena, tiel malplena kiel ovoŝelo !

- Mi scii tion, mastro, mi scii tion. Sed se mastro povi nur rigardi tien supren, tien supren kie esti nia kara fraŭlino Evnjo, tien supren kie esti la kara Sinjoro Jesuo !

- Ha ! Tomo, mi rigardas; sed bedaŭrinde, mi nenion vidas. Plaĉu al ĉielo ke mi vidu ion !

Tomo profunde suspiris.

- Ŝajnas ke estas donita al infanoj kaj al humiluloj, senkulpuloj kiel vi, Tomo, vidi tion kion ni ne povas vidi, diris Sanklaro. De kie tio venas ?

- Vi kaŝi ĉi tiujn aferojn al saĝuloj kaj inteligentuloj, kaj malkaŝi ilin al malgrandaj infanoj, murmuris Tomo. Tiel esti, ho mia patro, ĉar tia esti via volo (Mateo 11,25).

- Tomo, mi ne kredas, mi ne kapablas kredi; mi kutimas dubi, diris Sanklaro. Mi volus kredi la Biblion, kaj mi ne sukcesas.

- Kara mastro, preĝi al Sinjoro Jesuo. Diri : "Mi kredi, Disinjoro ! Helpi min en mia nekredemo !" (Marko 9,24)

- Kiu scias nenion pri nenio ? *diris Sanklaro kun la rigardo konfuza, kaj mem parolanta.* Ĉu ĉi tiu tuta pura amo, ĉi tiu tuta admirinda fido, estus nur unu el la ŝanĝiĝantaj fazoj de la homaj sentoj, sin apoganta sur nenio reala,

pasanta kun tiu malgranda spiro de iu tago ? Ĉu do Evnjo ne plu estas ? Neniu ĉielo ? Neniu Kristo ? Nenio ?

- Ho kara mastro ! Ĉio tio esti. Mi scii tion. Mi certi pri tio, *ekkriis Tomo falanta surgenue*. Kredi tion, kara mastro ! Kredi tion !

- Kiel vi scias ke Kristo estas, Tomo ? Vi neniam vidis lin.

- Mi senti lin, mastro ! Mi senti lin en mia animo ! Mi senti lin nune ! Ho mastro ! Kiam mi esti vendita, apartigita de mia kara edzino, de miaj etaj infanoj, ankaŭ mi esti preskaŭ rompita. Mi kredi ke mi ne plu resti ion en la mondo. Sed la bona Disinjoro ĉeesti, apud mi. Li diri : "*Ne timi, Tomo*". Ĝi lumigi kaj ĝojigi la animon de la lasta de la lastaj. Li meti en ĝi pacon. Mi esti tiel feliĉa ! Mi ŝati ĉiujn ! Mi peti nur esti al Disinjoro, kaj ke lia volo plenumiĝi en mi, kaj ĉie; kie kaj kiel tio plaĉi al li. Mi bone scii ke tio ne povi deveni de mi, kiu esti nur mizera estulo submetita al ĝemadoj. Tio esti donaco de Disinjoro, kaj mi scii ke li gardi ĝin tute preta por mastro.

Tomo parolis plorante kaj per sufokita voĉo. Sanklaro apogis sian kapon sur la ŝultron de Tomo, kaj konvulsie premis lian raspan kaj lojalan manon.

- Ĉu vi amas min, Tomo ? li diris.

- Mi volonte doni mian vivon, ĉi tiun benitan tagon mem por vidi mastron kristana.

- Kompatinda bona stultulo ! *diris Sanklaro duonleviĝante*, mi ne indas la amon de brava kaj honesta koro kiel la via.

- Ho mastro ! Ne nur mi ami vin, ankaŭ la beata Sinjoro Jesuo ami vin.

- Kiel vi scias tion, Tomo ?

- Mi ne scii tion, mi senti tion. Ho mastro ! "La amo de Kristo preterpasi inteligentecon".

- Ĉu ne estas strange, diris Sanklaro deturniĝante, ke la historio de viro, kiu vivis kaj mortis antaŭ mil okcent jaroj, tiamaniere tuŝas korojn ? Sed li ne estis viro, *li subite aldonis*. Neniu viro plenumis ĉi tiun longan kaj vivan potencon ! Ho ! Mi povu kredi tion kion instruis al mi mia patrino ! Mi povu preĝi, kiel mi infano preĝis !

- Bonvoli, mastro, diris Tomo, fraŭlino Evnjo kutimi tiel bone legi ĉi tiun paĝon ! Eble mastro bonvoli legi ĝin por mi ? Mi preskaŭ neniam aŭdi la sanktan libron ekde kiam fraŭlino Evnjo foresti.

Ĝi estis la dekunua ĉapitro de la Evangelio de Sankta Johano *(Johano 11)*, la kortuŝa raporto pri la reviviĝo de Lazaro. Sanklaro voĉlegis ĝin; de tempo al tempo li paŭzis por regi sian emocion. Surgenue antaŭ li, Tomo aŭskultis kun manoj kunmetitaj, lia trankvila vizaĝo radianta de amo, de espero kaj de fido.

- Tomo, diris lia mastro, ĉu vi kredas ĉio ĉi vera, reala ?

- Mi vidi tion, mastro, respondis Tomo.

- Kial mi ne havas viajn okulojn, Tomo !

- Mastro havi ilin se plaĉi al kara Disinjoro !

- Sed, Tomo, vi scias ke mi estas multe pli klera ol vi. Se mi dirus al vi ke mi ne kredas al Biblio ?

- Ho, mastro ! *diris Tomo levante la manojn en petega gesto*.

- Ĉu via fido ne ŝanceliĝus, Tomo ?

- Ne eĉ iomete, mastro !

- Kaj tamen, Tomo, vi ne dubas ke mi scias pli multe ol vi ?

- Ĉu vi ne legi, mastro, ke li malkaŝi al malgrandaj infanoj kaj al humiluloj tion kion li kaŝi al saĝuloj kaj al kleruloj ? Sed, mastro ne esti serioza antaŭ momento; mastro ne diri tion tute vere, certe ? *Kaj Tomo maltrankvile rigardis Sanklaro*[n].

- Ne, Tomo, mi ne estas tute nekredema. Mi kredas ke ekzistas fortaj kialoj por kredi, kaj tamen mi ne kredas. Tio estas malbona kutimo, kiun mi akiris, Tomo.

- Se mastro nur voli preĝi !

- Kiu diris al vi ke mi ne preĝas ?

- Mastro preĝi !

- Mi preĝus se mi vidus tien iun al kiu direkti miajn preĝojn. Sed estas neniu, kaj estas kvazaŭ mi parolus en la aero. Vi ja scias preĝi ! Montru al mi kiel preĝi.

La koro de Tomo estis plena, li elverŝis ĝin en preĝoj. Ili fluis el liaj lipoj kiel kurantaj akvoj longe retenitaj. Tio kio evidentiĝis, estas ke Tomo kredis esti aŭdata, kvankam li vidis neniun. Kuntirata de la rapida fluado de ĉi tiu arda fido, transportata preskaŭ al la pordoj de tiu ĉielo, kiun la kompatinda sklavo tiel intense antaŭsentis, Sanklaro trovis sin pli proksima al sia Evnjo.

- Dankon, bona knabo mia, li diris kiam Tomo finis. Mi ŝatas aŭdi vin preĝi. Sed nun lasu min sola. Iam alian, mi parolos pli.

Tomo silente foriris.

29. Kunveno.

Semajnoj sin sekvis, kaj la fluo de vivo denove iris laŭ sia kutima vojo, tie mem kie sinkis la gracila boateto. La senkompata realeco, indiferenta al niaj doloroj, rekaptas nin kaj submetas nin al sia monotona irado. Necesas okupiĝi pri la ĉiutagan zorgadon, postsekvi milojn da ombroj, kiuj ne plu gravas por ni. La malvarma kaj mekanika kutimo vivi daŭras, dum tio kio faris tion interesan kaj ĉarman malaperis.

La tuta estonteco de Sanklaro senscie koncentriĝis en lia filino. Li pligrandigis siajn proprietaĵojn, plibeligis sian hejmon por Evnjo. Estis por Evnjo, ke li volis fiksi la uzon de sia tempo. Aĉeti, plibonigi, ŝanĝi, aranĝi ion por Evnjo, fariĝis tiel dolĉa kaj tiel longa kutimo, ke nun ŝajnis al li ne plu havi ion por plani, ion por fari ĉi tie sur la tero.

Estas, estas vere, alia vivo, iu vivo kiu, tuj kiam oni kredas al ĝi, leviĝas, neŝanĝebla kaj solena cifero antaŭ la nuloj de la tempo, kaj atribuas al ili misteran, nekredeblan valoron. Sanklaro sciis tion; ofte dum siaj horoj de soleco, li aŭdis la mallaŭtan kaj infanan voĉon alvoki lin de la ĉiela alteco; li vidis la maneton montri al li la padon de la Vivo; sed la letargio de la doloro premegis lin, li ne kapablis "ekstari kaj paŝadi". Lia naturo estis el tiuj kiuj pli klare perceptas la religiajn ideojn kaj pli bone komprenas ilin per instinkto ol multaj pozitivaj kaj praktikantaj kristanoj. La kapableco aprezi la plej delikatajn nuancojn, ekkompreni la plej intimajn rilatojn de moralo, ofte troviĝas ĉe tiuj mem kiuj montras pri ĝi la plej senzorgan malestimon. Moore, Bajrono, Goeto pli bone difinis la religian pensmanieron ol la homoj kiuj faris de ĝi la superan regulon de ilia vivo. En tiaj mensoj, la religia indiferenteco estas grava perfido, duoble

mortiga peko.

Sanklaro neniam submetiĝis al religiaj devoj. Li komprenis la plenan gravecon de la devoj kiujn trudas la kristanismo, kaj retiriĝis antaŭ la postuloj de sia konscienco post kiam li enirus en la vojo de la Reformacio. Malgaja nekonsekvenco de homa naturo, kiu preferas nenion entrepreni ol riski sin malsukcesi.

Tamen, pri kelkaj konsideroj, Sanklaro fariĝis alia homo. Li atente legis la Biblion de sia eta Evnjo. Liaj rilatoj kun liaj geservistoj pli maltrankviligis lin, sufiĉe por malkontentigi lin pri lia konduto, pasinta kaj nuna. Iom post sia reveno en la urbo, li komencis la necesajn klopodojn por emancipo de Tomo. Tamen ĉiu tago pli ligis lin al ĉi tiu fidela servisto. Neniu en la tuta mondo ŝajnis tiom memorigi al li pri Evnjo. Li ŝatis havi lin konstante apud si, kaj muta, nepenetrebla pri ĉio kio tuŝis liajn internajn sentojn, li pensis preskaŭ laŭte antaŭ Tomo. Kiu povintus miri pri tio vidante kun kia tenera kaj sindona esprimo Tomo ĉien sekvis sian junan mastron !

- Nu, Tomo, *diris Sanklaro la morgaŭon de la tago kiam li komencis la laŭleĝajn formalaĵojn por lia malsklavigo*, mi baldaŭ faros de vi liberan viron; tial ŝnuru vian kofron, kaj pretigu vin foriri al Kentukio.

La subita fulmo de ĝojo kiu ekbrilis sur la vizaĝo de Tomo kiam, levante la manojn al la ĉielo, li ekkriis "*Benata esti Disinjoro !*" konsternis Sanklaroⁿ. Li bedaŭris ke Tomo estis tiel ĝoja forlasi lin.

- Vi ne tiom malbone pasigis vian tempon ĉi tie, por ke vi devas ĝoji eliri, Tomo, li seke diris.

- Ne, ne, mastro ! Ne esti tio, tio esti esti libera viro ! Jen tio kio feliĉigi min.

- He ! Tomo, ĉu vi ne pensas, ke pri tio kio tuŝas vin, vi nur pli bone fartis ne esti libera ?

- Ne, vere, mastro Sanklaro, *diris Tomo kun energia entuziasmo*; ne, vere !

- Sed, Tomo, neniam per viaj dek fingroj vi estus kapabla perlabori sufiĉe por vesti kaj nutri vin, kiel vi estis ĉe mi.

- Mi scii ĉion tion, mastro Sanklaro. Mastro esti tre bona, tro bona; sed mi pli bone ŝati havi malriĉajn vestaĵojn, kompatindan kabanon, tute mizeran, kaj havi tion por mi, ol havi ĉion belan de alia homo ! Mi pli bone ŝati tion, mastro; mi pensi ke esti nature.

- Mi supozas, Tomo. Tiel do, post ĉirkaŭ unu monato, ĉu vi foriros kaj forlasos min ? *li diris per ĉagrena tono*. Pri tio, mi ne vidas kialon por ke vi faru alimaniere, li aldonis kun pli gaja akcento. *Li ekstaris kaj paŝadi en la ĉambro*.

- Ne; ne dum la mastro esti kun doloro, diris Tomo. Mi resti kun mastro tiom longe kiom li bezoni min; se nur mi povi esti bona por li pri io.

- Tiom longe dum mi estos kun doloro, Tomo ? *diris malgaje Sanklaro rigardante tra la fenestro*. Bedaŭrinde ! Kiam mia doloro finiĝos !

- La tago kiam mastro Sanklaro esti kristano, diris Tomo.

- Kaj vi volus resti ĝis tiu tago ? *Sanklaro daŭrigis duonridetante dum li sin turnis, kaj metis sian manon sur la ŝultron de Tomo*. Ha ! Kompatinda senkulpa knabo ! Mi ne gardos vin ĝis tiam. Iru retrovi viajn edzinon kaj infanojn, kaj diru al ili ke mi amas ilin pro via amo !

- Mi fidi ke la tago veni, *reparolis Tomo kun fervoro kaj larmoj en la okuloj;* Disinjoro havi laboron por mastro.

- Laboron, he ! diris Sanklaro. Nu, Tomo, al kia laboro vi kredas min alvokota ? Ni iom vidu.

- Se kompatindulo kiel mi ricevi de Disinjoro taskon, kion ne kapabli fari por Disinjoro, Mastro Sanklaro, li kiu

havi scion, riĉecon, amikojn !

- Tomo, vi ŝajnas al mi pensi ke Disinjoro tre bezonas nin, diris Sanklaro ridetante.

- Tio kion ni fari por liaj geestuloj, ni fari tion por li.

- Bonega teologio, Tomo; certe pli bona ol tiu kiun predikas doktoro B…

Ĉi tie la konversacio estis interrompata per la anonco de kelkaj vizitoj.

Marta Sanklaro sentis la perdon de Evnjo tiel profunde kiel estis donite al ŝi senti. Kaj ĉar ŝi posedis en la superega grado la kapablecon malfeliĉigi ĉiujn kiuj ĉirkaŭis ŝin, se eĉ malmulte ŝi tia estis, la geservistoj havis certe tro da kialoj bedaŭri sian junan mastrinon, kies la mildaj kaj karesaj manieroj tiel ofte protektis ilin kontraŭ la tiranaj postuloj de ŝia patrino. La kompatinda Avino kiu, senigita de siaj familiaj korinklinoj, trovis nur konsolon en ĉi tiu kara infano, tiel bela, tiel gracia, estis aparte korpremita. Ŝi ploris tage kaj nokte, kaj la troo de ŝia doloro, faris ŝin malpli lerta kaj malpli vigla apud ŝia mastrino, tio kio senĉese altiris sur ŝia senhelpa kapo tondron da insultoj.

F^ino^ Ofelio ankaŭ sentis ĉi tiun perdon, sed ŝia lojala kaj kuraĝa animo eltiris de ĝi instruon por eterna vivo. Ŝi havis pli da mildeco, pli da afableco kaj ĉiam same diligenta en siaj hejmtaskoj, ŝi plenumis ilin kun kvieteco kaj fervoro, kiel iu kiu ne vane traserĉis en sia propra koro. Ŝi estis pli pacienca kun Topsi pri siaj klarigoj de la sankta teksto; ŝi ne plu evitis kontakton kun la infano, kaj ne devis kaŝi malbone briditan abomenon, ĉar ŝi ne plu sentis ĝin. Ŝi nun vidis ŝin tiel kiel Evnjo montris ŝin al ŝi, tra tiu radianta kompatemo kiu faris de ŝi senmorta estulinon, kiun Dio mem sendis al ŝi por konduki ŝin al virto, al eterna gloro. Topsi ne fariĝis sanktulino, sed la vivo kaj la morto de Evnjo okazigis en ŝi rimarkindan ŝanĝon. Ŝia rigida senzorgeco malaperis. La

sentemo, la espero, la deziro atingi bonon vekiĝis. La lukto nun komenciĝis; lukto neregula, neegala, ofte interrompita, sed ĉiam rekomencita.

Iam kiam f^ino Ofelio sendis serĉi Topsi^on, ŝi eniris haste kaŝante ion en sia sino.

- Kion vi ĵus fari, malica sorĉistineto ? Mi veti ke vi denove ŝteli ! *diris la trudema Roza, kiu estis sendita por alvoki ŝin, kaj samtempe ŝi abrupte ekkaptis ŝin per la brako.*

- Ĉu vi bonvoli malteni min, fraŭlino Roza ! *diris Topsi baraktante;* ne esti viaj aferoj !

- Ne provi esti malrespekta ! Mi vidi vin kaŝi ion; mi koni viajn lertaĵojn.

Kaj Roza provis priserĉi ŝin, dum Topsi, furioza, kuraĝe defendis per batoj de piedoj kaj pugnoj tion kion ŝi rigardis kiel sian rajton. La bruego kaj tumulto de la batalo altiris f^inon Ofelio^n kaj Sanklaro^n.

- Ŝi ŝteli ! diris Roza.

- Ne esti vere ! *kolerkriis Topsi plorĝemanta pro pasio.*

- Donu ĝin al mi, kio ajn ĝi estas ! diris firme f^ino Ofelio.

Topsi hezitis; sed post dua ordono, ŝi eltiris el sia sino paketon volvitan en la piedo de malnova ŝtrumpo.

F^ino Ofelio malvolvis la ŝtrumpon. Troviĝis en ĝi eta libro donita al Topsi de Evnjo, enhavanta versiklon el la sankta Skribo por ĉiu tago de la jaro, kaj paperon enhavantan la harbuklon kiun ŝi ricevis en la memorinda tago kiam Evnjo faris siajn lastajn adiaŭojn.

Sanklaro estis profunde kortuŝita. La libreto estis volvita en longa strio el nigra krepo, ŝirita de la funebraj drapiraĵoj.

- Kial vi envolvis ĉi tiun libron per tio ? diris Sanklaro levanta la krepon.

- Ĉar…, ĉar…, tio veni de fraŭlino Evnjo. Ho ! Ne demeti ĝin ! ŝi diris. Bonvoli ne demeti ĝin !

Ŝi surplanke sidiĝis, kaj kovrante al si la vizaĝon per sia antaŭtuko, ŝi singultis per ĉiuj siaj fortoj.

Ĝi estis stranga miksaĵo de patoso kun groteskaĵo : Ĉi tiu malnova eta ŝtrumpo, ĉi tiu nigra krepo, ĉi tiu libro de la sankta teksto, ĉi tiu blonda kaj silkeca buklo, Topsi kaj ŝia aflikto.

Sanklaro ridetis; sed estis larmoj en liaj okuloj kiam li diris : "Nu, nu, ne ploru; ni redonos ilin al vi". Li kolektis la disajn objektojn, ĵetis ilin sur la genuojn de la knabineto kaj kuntiris f^inon^ Ofelion en la salonon.

- Mi reale kredas ke vi povos fari ion de ŝi, *li diris montrante la infanon per fingro super sia ŝultro*. Ĉiu menso kapabla senti sinceran doloron taŭgas por bono. Provu, penu fari ion de ŝi.

- La infano multe progresis, diris f^ino^ Ofelio, kaj mi vere esperas. Sed, Aŭgusteno, *ŝi apogis sian manon sur la brakon de Sanklaro*, necesas ke mi demandu ion al vi : al kiu ŝi apartenas ? Ĉu al vi aŭ al mi ?

- He, mi donis ŝin al vi, rebatis Aŭgusteno.

- Ne laŭleĝe. Mi volas laŭleĝe havi ŝin al mi, diris f^ino^ Ofelio.

- Fi do, kuzino ! Kion pensos la Aboliciisma Societo ? Ĝi ordonos almenaŭ unu fastotagon pro via renegateco, se vi fariĝos sklavposedantino !

- Sensencaĵoj ! Mi volas ke ŝi estu mia por rajti konduki ŝin en liberan ŝtaton, kaj doni al ŝi sian liberecon. Tiam ĉio kion mi strebas fari, ne perdiĝos.

- Ha ! Kuzino, kiom da "malbonoj" povas estigi via furiozo por fari bonon ! Neeblas al mi kuraĝigi vin.

- Mi petas al vi rezoni, ne ŝerci, diris f^ino^ Ofelio. Ne utilas ke mi provu fari de ĉi tiu infano kristaninon, se mi ne savas ŝin de ĉiuj riskoj kaj ĉiuj malsukcesoj de la sklaveco. Ĉu vi reale deziras doni ŝin al mi ? Tiam faru al mi laŭleĝan

akton, laŭregulan donacion.

- Bone, bone, mi faros tion, diris Sanklaro. Li sidiĝis, kaj malfaldis la gazeton.

- Sed mi volas ke la afero estu tuj farita.

- Kio tiom urĝas vin ?

- Ĉar estas nur la nuneco por agi, diris f^ino Ofelio. Nu ! Jen papero, plumo, inko, skribu.

Sanklaro, kiel plej multaj homoj el sia humoro, vere malŝatis la nunan tempon; kaj la pozitiva kaj insista rigoreco de f^ino Ofelio estis por li neeltenebla.

- Nu, kio estas ? Ĉu do vi ne povas fidi mian parolon ? Oni kredus ke vi lernis de la judoj kiel ĉikani kompatindulon.

- Mi volas esti certa pri mia rajto, diris f^ino Ofelio. Vi povas morti aŭ bankroti, kaj tiam Topsi estus aŭkciota, spite al ĉiuj miaj klopodoj.

- Vi vere estas mirinde antaŭvidema ! Nu, ĉar mi estas en la manoj de Jankio, estas nenio farebla krom cedi.

Sanklaro rapide skribis donacian akton; afero des pli facila por li, ke li estis bone informita pri la formalaĵoj de la leĝo; li subskribis ĝin per majuskloj finitaj de grandioza parafo.

- Jen ! Mi esperas ke ĝi estas nigro sur blanko, fraŭlino el Vermonto, li diris dum li prezentis ĝin al ŝi.

- Vi estas brava knabo, ŝi diris ridetanta. Sed ĉu ne necesas ankoraŭ subskribon de atestanto ?

- Ho ! Jes, tio estas tedega ! Marta, *li diris malfermante la pordon de la apartamento de sia edzino*, mia kuzino deziras havi unu el viaj aŭtografoj; surmetu tien vian nomon, bonvolu.

- Kio tio estas ? *demandis Marta traleganta la paperon.* Estas ridinda ! Mi kredis kuzinon Ofelio^n tro pia por fari tiajn hororojn ! *Kaj ŝi senzorgeme subskribis.* Sed se ŝi libervole prenis ĉi tiun beletan artiklon, ŝi certe povas

konservi ĝin.

- Topsi nun estas via per korpo kaj animo, *diris Sanklaro prezentante al ŝi la akton*.

- Ŝi ne estas mia pli ol antaŭe, reparolis f^ino^ Ofelio. Neniu krom Dio rajtas doni ŝin al mi. Sed almenaŭ mi nun povas protekti ŝin.

- Nu, ŝi estas via, per jura fikcio, *diris Sanklaro. Li reiris en la salonon kaj reprenis sian ĵurnalon*.

F^ino^ Ofelio, malmulte atentema resti vidalvide kun Marta, sekvis lin post esti zorge ordiginta la akton.

- Aŭgusteno, *ŝi subite diris interrompante sian trikadon*, ĉu vi faris disponojn por viaj homoj en okazo de morto ?

- Ne, respondis Sanklaro, *kaj li daŭrigis sian legadon*.

- Tiam via tuta indulgo al ili povas tre rapide fariĝi granda krueleco.

Sanklaro ofte havis la saman penson; sed li senzorgeme respondis : "Mi intencas fari disponojn".

- Kiam ?

- Ho ! Unu el ĉi tiuj tagoj.

- Kio se vi mortus antaŭe ?

- Ha tio, sed kuzino, kio do estas ? *diris Sanklaro. Li flankenmetis sian gazeton kaj rigardis ŝin*. Ĉu vi hazarde videtas en mi ian simptomojn de flava febro aŭ de ĥolero, ke vi tiom fervoras pri miaj transtombaj aranĝoj ?

- Ĉe la mezo de la vivo, ni alproksimas al la morto, respondis serioze f^ino^ Ofelio.

Sanklaro ekstaris, kaj metante la gazeton sur la tablon, li direktis sin al pordo eliranta al la galerio, por ĉesigi konversacion kiu tute ne plaĉis al li. Li maŝine ripetis la lastajn vortojn : "la morto !" Apogante sin sur la balustrado, li rigardis la ŝprucantan akvon leviĝi kaj refali en la basenon el marmoro; li vidis, kiel tra konfuza nebulo, la florojn, la

arbustojn, la vazojn kiuj ornamis la korton, kaj liaj lipoj ankoraŭ murmuris la misterajn vortojn, tiel ofte elkraĉitaj de ĉiuj, kaj kun tiel terura signifo : "La MORTO !"

- Estas strange, li diris, ke ekzistas tia nomo, tia afero, kaj ke ni senĉese forgesas ĝin ! Ke iu estulo povas hodiaŭ vivi, bela, vigla, plena de espero, de deziro, kaj morgaŭ, senmova, malvarma, senviva, forpasinta por ĉiam !

La vespero estis varma kaj hela; li iris ĝis la fino de la galerio kaj trovis tie Tomo^{n} absorbitan en lia Biblio, sekvantan per fingro ĉiun vorton, kaj fervore murmurante ĝin duonlaŭte.

- Ĉu vi volas ke mi legu por vi, Tomo ? diris Sanklaro, sidiĝanta apud li.

- Se plaĉi al mastro, diris dankeme Tomo, tio esti multe pli klara kiam mastro legi…

Sanklaro prenis la libron, kaj traserĉanta per la okuloj, li komencis unu el la fragmentoj kiujn Tomo plej surskribis per strioj de inko, liaj kutimaj signoj :

- Kiam la Filo de homo venos ĉirkaŭata de sia gloro kaj akompanata de ĉiuj siaj sanktaj anĝeloj, tiam li sidos sur la trono de sia gloro. Kaj ĉiuj nacioj kolektiĝos antaŭ li; kaj li disigos unujn de la aliaj, kiel la paŝtisto apartigas la ŝafinojn de la virkaproj.

Sanklaro legis per vigla voĉo ĝis kiam li atingis la lastajn versikloj:

- Tiam la Reĝo diros al tiuj kiuj estos ĉe sia maldekstro : Malbenitaj, foriru de mi kaj iru al la eterna fajro ! Ĉar mi malsatis, kaj vi ne donis al mi por manĝi; mi soifis, kaj vi ne donis al mi por trinki; mi estis fremdulo, kaj vi ne gastigis min; mi estis nuda, kaj vi ne vestis min; mi estis malsana kaj en malliberejo, kaj vi ne vizitis min. Tiam ĉi tiuj ankaŭ respondos al li dirante : Disinjoro, kiam ni vidis vin malsati aŭ soifi aŭ esti fremda aŭ nuda aŭ malsana aŭ en

malliberejo, kaj ni ne helpis ? Tiam Li respondos al ili dirante : Vere ja, mi diras al vi ke ĉar vi ne faris ĉi tiujn helpojn al iu el ĉi tiuj malgravuloj, vi ankaŭ tute ne faris tiujn al mi. *(Mateo 25:33-46)*

Sanklaro ŝajnis tuŝita de ĉi tiu lasta versiklo. Li unuafoje legis ĝin, poste duafoje pli malrapide, kvazaŭ li pesus ĉiun vorton de ĝi.

- Tomo, li diris, ĉi tiuj homoj tiel severe punitaj ŝajnas al mi esti nur precize farintaj tion kion mi faris : vivi dolĉan, facilan, honorindan vivon, sen zorgi pri la amaso da siaj fratoj kiuj malsatis, kiuj soifis, kiuj estis malsanaj aŭ en malliberejo.

Tomo ne respondis.

Sanklaro stariĝis kaj paŝis de la komenco ĝis la fino de la verando, enprofundiĝinta en siaj pensoj. Necesis ke dufoje Tomo rememorigu al li ke la te-sonorilo sonoris.

Li iris al la salono, ankoraŭ distrita kaj pensema.

Post la teo, Marta sin etendis sur tolseĝon, kaj kovrita de kulvualo, baldaŭ dormis. F^ino^ Ofelio aktive trikis silente. Sanklaro sidiĝis ĉe la piano kaj improvizis laŭ milda kaj melankolia modalo. Absorbita en profunda revado, li ŝajnis konversacii kun si mem per melodia lingvo. Li ekhaltis, malfermis tirkeston, eltiris el ĝi malnovan muzikan kajeron kaj komencis turni la foliojn flavigitajn de la tempo.

- Ĝi estis unu el la kajeroj de mia patrino, li diris al f^ino^ Ofelio; jen ŝia skribaĵo; venu vidi. Ŝi kopiis kaj aranĝis ĉi tiun kanton laŭ rekviemo de Mozarto.

F^ino^ Ofelio venis antaŭen kaj rigardis.

- Ŝi ofte kantis ĝin, daŭrigis Sanklaro. Mi ankoraŭ kredas aŭdi ŝin.

Li preludis per kelkaj malakutaj tonoj, kaj komencis la antikvan kaj solenan latinan himnon de Dies irae[(28)].

Tomo, kiu aŭdis de la ekstera galerio, alvenis ĝis la

pordo, altirita de la sono, kaj restis tie tute kortuŝita. Li ne komprenis la vortojn, sed la muziko kaj la voĉo skuis al li la animon, ĉefe ĉe la plej patosaj pecoj. Tomo eĉ multe pli simpatiintus kun ĉi tiu kanto, se li komprenintus la belajn parolojn :

Recordare, Iesu pie,
quod sum causa tuæ viæ,
ne me perdas illa die.
Quærens me sedisti lassus,
redemisti crucem passus;
tantus labor non sit cassus.[32]

Sanklaro metis en ĝi profundan kaj penetreman esprimon. Ĉi tiu malhela valo da larmoj ŝajnis al li fermita, kaj li kredis aŭdi la voĉon de sia patrino miksiĝi kun sia. La voĉo kaj la instrumento vibris kaj tremetis en la sama vivo sub la potencaj agordoj trovitaj por lia lasta Rekviemo, de la animo de Mozarto preta eskapi el ĝia malliberejo.

Kiam Sanklaro finis kanti, li restis dum kelkaj momentoj kun la kapo klinita sur la mano; fine li stariĝis kaj paŝadis tien kaj reen.

- Kia superbela koncepto tiu de la Lasta Juĝo ! li diris. La purigo de ĉiuj kulpoj, de ĉiuj akuzaĵoj amasigitaj ekde jarcentoj ! La solvo de ĉiuj moralaj problemoj per senfina saĝeco ! Jes, tio estas granda penso !

- Terure por ni ! rekomencis f^ino^ Ofelio.

- Ĉefe por mi, kiel mi supozas, *diris Sanklaro, haltanta kun revema mieno*. Mi ĉi vespere legis al Tomo la ĉapitron de Sankta Mateo kiu priskribas ĉi tiun momenton; mi estis kortuŝata de tio. Oni timas kelkan teruran krimon, kelkan ekscesaĵon atribuitan al tiuj kiuj estas forpelitaj el la ĉielo. Sed ne, ili estas kondamnitaj pro ne esti farintaj bonon, kvazaŭ ĉi tiu preterlaso enhavus la tutan imageblan

32 Vidu meze de la retpaĝo : Himno por la matena laŭdo.

malbonon.

- Eble maleblas de tiu kiu faras nenian bonon, ne fari malbonon, diris f^ino Ofelio.

- Tiam, *daŭrigis Sanklaro, parolanta al si kun emocio*, kion diri pri la homo vokata de sia propra koro, de sia edukado, de la malbonoj de la socio, al nobla tasko, kaj vane alvokata ? Pri la homo kiu, anstataŭ partopreni al la verko, vagis, neŭtrala, nedecidema spektanto de la luktoj, de la agonioj, de la mizeroj de siaj fratoj ?

- Mi diras ke li devas pripenti, diris f^ino Ofelio, kaj tuje komenci.

- Ĉiam praktika, ĉiam iranta rekte al celo, *diris Sanklaro, duonrideto lumiganta lian vizaĝon*. Vi neniam permesas kvaronhoron al ĝeneralaj pripensadoj. Senĉese vi abrupte haltigas min antaŭ la nuna minuto. Vi havas specon de eterna nuno, ĉiam ĉeestantan en via menso.

- La nuntempo estas la sola tempo kun kiu mi havas nenion por malimpliki, diris f^ino Ofelio.

- Kara eta Evnjo, kompatinda infano ! diris Sanklaro, ŝi trovis por mi, en la simpleco de sia animo, gravan farendaĵon.

Estis la unua fojo ekde la morto de Evnjo, ke li iom longe parolis pri tio. Li strebis regi sin, kaj daŭrigis :

- Laŭ miaj vidpunktoj pri kristanismo, mi ne kredas ke homo povas diri sin kristano, kaj ne energie protesti kontraŭ la monstra sistemo de maljusteco kiu estas la bazo de nia socio, kaj se necese, sin foroferi en la batalo.. Mi, almenaŭ, mi povus esti kristano nur je ĉi tiu kosto; kvankam mi certe havis interrilatojn kun multaj kleraj kaj piaj homoj kiuj faris nenion tian. Mi konfesas tion, la apatio de religiuloj pri ĉi tiu punkto, ilia blindeco pri la kruelaĵoj kiuj plenigis min da hororo, ĉefe kontribuis por skeptikigi min.

- Kun tiaj sentoj, kial nenion fari ? diris f^ino Ofelio.

- Ho ! Ĉar mi havis nur la bondezirecon kiu konsistas en

tio sin etendi sur sofon kaj tie malbeni la eklezion kaj la klerikaron pro ne esti armeo da martiroj kaj da konfesantoj. Nenio esti pli simpla, kiel vi scias, ol montri al aliaj la vojon al martireco.

- Nu ! Ĉu vi agos alimaniere ekde nun ? demandis f^ino Ofelio.

- Nur Dio scias la estontecon, rebatis Sanklaro. Mi estas pli brava ol mi estis, ĉar mi perdis ĉion; kaj tiu kiu havas nenion por perdi, povas ĉion riski.

- Kion vi tuj faros ?

- Mia devo, mi esperas, rilate al malriĉuloj kaj humiluloj, komencante per miaj propraj geservistoj, por kiuj mi ankoraŭ nenion faris. Iam eble pli poste, oni vidos ke mi povis plenumi ion por la tuta klaso, ion por lavi mian landon de la honto kiun trudas al ĝi, antaŭ la okuloj de ĉiuj civilizitaj nacioj, la fian pozicion kiun ĝi prenis.

- Ĉu vi kredas ebla ke la nacio venu al libervola emancipo ?

- Mi nenion scias pri tio. La tempo estas por grandaj agoj. La heroeco kaj la sindonemo aperas, tie kaj tie, sur la tero. La hungaraj nobeloj, malfavore al grandegaj riĉaĵoj, liberigis milionojn da servutuloj. Povas ankaŭ troviĝi inter ni malavaraj animoj, kiuj ne taksas la honoron kaj la justecon per dolaroj kaj cendoj.

- Mi apenaŭ kuraĝas kredi tion, diris f^ino Ofelio.

- Ni supozu ke, morgaŭ amase leviĝante, ni fine emancipus; kiu edukus ĉi tiujn milionojn da estuloj ? Kiu instruus ilin uzi liberecon ? Ili neniam sukcesos sin rangi inter ni. La fakto estas ke ni mem estas tro pigraj, tro nekompetentaj, por doni al ili la ideon pri la necesa energio por formi homojn. Necesos al ili elmigri al la Nordo, kie la laboro estas moda kaj eniĝas la morojn. Nu, diru al mi, ĉu via kristana filantropio estos sufiĉe fortika por taski al si eduki

ilin, rangigi ilin ? Vi sendas milojn da dolaroj al eksterlandaj misioj, sed ĉu vi akceptus paganojn meze de viaj urboj ? Ĉu vi donus al ili vian tempon, viajn zorgojn, vian monon, por fari de ili kristanojn ? Jen tio kion mi volas scii. Se ni emancipus, ĉu vi edukus ? Kiom da familioj troviĝos en via vilaĝo, ĉiu inklina gastigi nigrulon kaj lian edzinon, instrui ilin, toleri iliajn malperfektaĵojn, peni plibonigi ilin ? Kiuj komercistoj dungos Adolfo[n] de mi, se mi volas fari de li komizon ? Kiuj laboristoj, se mi deziras ke li lernu metion ? Kiom da lernejoj estas en la nordaj ŝtatoj, kie Jane kaj Roza estu akceptitaj ? Kaj tamen ili estas tiel blankaj kiel multaj virinoj de Nordo aŭ de Sudo. Vi vidas tion, kuzino, mi volas ke oni rekonu niajn meritojn. Nia pozicio estas malbona, pro tio ke ni estas la evidentaj subpremantoj de la nigrulo, sed la kontraŭkristana antaŭjuĝo de la nordo subpremas lin preskaŭ same.

- Mi scias tion, diris f[ino] Ofelio, mi dividis ĉi tiun antaŭjuĝon ĝis kiam mi komprenis ke estis mia devo venki ĝin, kaj mi esperas esti venkinta ĝin. Mi certas ke estas en la Nordo multaj bravaj homoj, kiuj nur bezonas esti bone informitaj pri ĉi tiu devo por plenumi ĝin. Certe estus pli granda sindonemo akcepti paganojn ĉe ni, ol sendi misiistojn ĉe ili; sed mi kredas ke ni farus tion.

- Vi farus tion, vi, diris Sanklaro, mi ne dubas pri tio. Kion vi ne farus, kondiĉe ke vi konsideru tion kiel devon !

- Mi ne havas tiel maloftan perfektecon, reparolis f[ino] Ofelio. La aliaj same agus se ili vidus la aferojn laŭ la sama vidpunkto. Mi intencas hejmen kunvenigi Topsi[on] kiam mi reiros tien. Mi imagas ke oni unue rigardos rondokule, sed mi kredas ke oni fine vidos kiel mi. Krome mi scias ke estas multaj homoj en la Nordo, kiuj faras ĝuste tion kion vi diras.

- Jes, malplimulto; sed se ni komencus emancipi iom pli rapide, ni baldaŭ aŭdus pri vi !

F^ino Ofelio nenion rebatis. Estis silento dum kelkaj momentoj, kaj la vigla fizionomio de Sanklaro ekprenis malĝojan kaj reveman esprimon.

- Mi ne scias, li diris, tion kio ĉi vespere tiom memorigas al mi pri mia patrino ! Mi havas strangan senton; ŝajnas al mi ke ŝi ĉeestas, apud mi. Ĉio kion ŝi kutimis diri al mi, revenas al mi en la menso. Estas strange ke aferoj de la pasinteco tiel subite reviviĝas !

Li paŝadis tien kaj reen dum kelkaj minutoj, poste li diris : "*Mi kredas ke mi tuj promenetos eksteren por ekscii la vesperajn novaĵojn*". Li prenis sian ĉapelon, kaj eliris.

Tomo sekvis lin ekster la korto sub la volbon kaj demandis al li ĉu li devis akompani lin.

- Ne, mia knabo, diris Sanklaro, mi revenos post unu horo.

Tomo sidiĝis sub la galerio. Estis bela lunlumo. Li sekvis per la okuloj la luman ŝprucon de la akvoj kaj ilia ŝaŭmanta falo en la fontano; li aŭskultis ilian murmuron. Li pensis pri la loĝejo : li baldaŭ estos libera viro; libera laŭplaĉe reiri tien. Per kia ardo li ne laborus por elaĉeti siajn edzinon kaj infanojn ! Li rigidigis la muskolojn de siaj fortikaj brakoj, ĝoja pro la ideo ke ili post nelonge apartenos al li, kaj ke ili helpos lin por malsklavigi lian familion. Poste lia pensado sin redirektis al lia nobla juna mastro, kaj li recitis la preĝon kiun li ĉiutage faris por li. Evnjo poste venis; la bela Evnjo, kiu nun estis anĝelo inter la anĝeloj. Li tiel longe pensis pri ŝi, ke ŝajnis al li vidi la brilan vizaĝon, enkadrigitan en oraj haroj, rigardi lin tra la vapora nebulo. Pensante, li endormiĝis; li dumsonĝe vidis Evnjo^n, kiu alkuris al li saltegante, kiel estis ŝia kutimo, kun girlando da jasmeno en la haroj, rozetaj vangoj kaj ĝojradiantaj okuloj. Sed, dum li kontemplis ŝin, ŝi iom post iom altiĝis super la tero, ŝiaj vangoj paliĝis, ŝiaj okuloj ekprenis ĉielan kaj profundan

brilon, ora aŭreolo ĉirkaŭis ŝian kapon, kaj ŝi malaperis. Tomo estis abrupte vekita de laŭtegaj batadoj frapitaj sur la pordo, kaj de la sono de pluraj voĉoj deekstere.

Li rapidis malfermi. Viroj eniris kun pezaj paŝoj kaj mallaŭte parolantaj; ili portis korpon, envolvitan en mantelo, kuŝantan sur brankardo. La lumo de la stratlanterno lumigis la vizaĝon. Tomo eligis krion de teruro kaj de malespero, kiu eĥiĝis foren sub la galerioj; kaj la viroj antaŭeniris, kun sia ŝarĝo, al la malfermita pordo de la salono, kie f^ino Ofelio ankoraŭ trikis.

Sanklaro eniris en trinkejon por trarigardi la vesperan gazeton. Dum li legis, du duonebriaj viroj ekkverelis; li kunigis siajn klopodojn al tiuj de kelkaj ĉeestantoj por disigi ilin; kaj provante eltiri el la manoj de unu el tiuj frenezuloj ponardon, li ricevis fatalan baton en la flanko.

La domo pleniĝas de krioj, de ĝemoj, de sovaĝaj lamentoj. La geservistoj ŝiris al si la harojn, ruliĝis teren, kuris ĉien kun delira mieno. Tomo kaj f^ino Ofelio solaj konservis iom da spiritvigleco. Marta havis konvulsiojn kaj nervajn atakojn. Laŭ ordono de f^ino Ofelio, unu el la sofoj de la salono estis haste preparita, kaj oni demetis tien la sangantan korpon. Sanklaro svenis sekve de doloro kaj perdo de sango; sed la zorgoj de f^ino Ofelio revivigis lin; li malfermis la okulojn, fikse rigardis tiujn kiuj ĉirkaŭis lin, poste liaj rigardoj, vage flugantaj en la ĉambro, haltis sur la portreton de sia patrino.

La kuracisto venis kaj ekzamenis; lia vizaĝo sufiĉe diris ke ne plu estis espero; sed li komencis bandaĝi la vundon. F^ino Ofelio kaj Tomo kviete helpis lin, meze de la singultoj kaj krioj de la geservistoj, amasigitaj ĉe la sojlo de la pordoj kaj ĉe la fenestroj de la verando.

- Nun, diris la kuracisto, necesas forpeli eksteren ĉi tiun tutan homamasegon; la plej kompleta ripozo necesas.

Sanklaro malfermis la okulojn, kaj rigardis la afliktitajn kompatindulojn kiun f^ino Ofelio kaj la kuracisto provis resendi el la apartamento. "*Kompatindaj geestuloj !*" li murmuris, kaj amara esprimo de memriproĉoj pentriĝis sur liaj trajtoj. Adolfo obstine rifuzis eliri, la teruro paralizis al li la menson : li sin ĵetis teren, kaj nenio povis persvadi lin restariĝi. La aliaj cedis al la insistado de f^ino Ofelio, kiu diris al ili ke la vivo de ilia mastro dependis de ilia rapideco obei.

Sanklaro povis malfacile paroli. Li restis kun fermitaj okuloj; sed estis tro evidente ke li luktas kun doloraj pensoj. Li metis sian manon sur tiun de Tomo, genuanta apud li, kaj diris : "*Tomo ! kompatinda knabo !*"

- Kio, mastro ? diris maltrankvile Tomo.

- Mi mortiĝas ! *li aldonis premante al li la manon.* Preĝu !

- Se vi dezirus pastron… rekomencis la kuracisto.

Sanklaro kapneis, kaj insiste denove diris al Tomo: "*Preĝu !*"

Kaj Tomo preĝis per sia tuta spirito, per ĉiuj siaj fortoj, por la animo kiu baldaŭ foriros, por la animo kiu, de la fundo de siaj grandaj okuloj bluaj kaj melankoliaj, ŝajnis rigardi lin tiel malĝoje. Ĝi fakte estis la preĝo prezentita en larmoj kaj korŝiro.

Kiam Tomo ĉesis paroli, Sanklaro baraktis, kaptis lian manon kaj emocie rigardis lin; sed nenion diris. Li fermis la okulojn sen malstreĉi sian tenon; ĉar, ĉe la pordoj de la eterneco, nigra mano kaj blanka mano fermiĝas en la sama kuntiriĝo. Li dolĉe murmuris, per hakataj intervaloj :

Recordare, Iesu pie,
ne me perdas illa die
Quærens me sedisti lassus,.[(32)]

Paroloj kiujn li kantis dum ĉi vespero mem, petegantaj paroloj direktitaj al Senfina Favorkoreco. Liaj lipoj moviĝis,

laŭmezure kiam eliris fragmentoj de la sankta himno.

- Lia menso perdiĝas, diris la kuracisto.

- Ne ! Li alvenas ! Li alvenas… finfine ! diris energie Sanklaro, finfine ! finfine !

La penado elĉerpis lin; la paleco de la morto kovris lian vizaĝon. Sed kun ĝi malsuprenvenis, kiel sur la flugiloj de kompata anĝelo, la admirinda esprimo de paco de laca infano kiu endormiĝas.

Li tiel restis dum kelkaj sekundoj. Ni vidis ke la ĉiopova mano estis etendinta al li. Ĵus antaŭ ol la spirito disiĝis, li denove malfermis la okulojn kaj, kun subita ekbrilo de ĝojo kaj de dankemo, li ekkriis : "*Mia patrino !*"

Poste li forlasis la spiriton.

30. La Forlasitoj.

Sur la tero ne ekzistas estulo pli izolita, pli senprotekta, pli kompatinda, ol la sklavo kiu perdas bonan mastron.

Post la morto de patro, ankoraŭ restas al infano amikoj kaj la subteno de la leĝo. Li estas iu; li povas fari ion; li havas rajtojn kaj agnoskitan pozicion. Por la sklavo, nenio simila. Laŭ la leĝo li estas konstruaĵo, kaj ne pli. La solaj kompensoj konsentitaj al la bezonoj, al la legitimaj deziroj de homa kaj senmorta estulo, venas al li tra la suverena volo de la mastro, kaj kiam la mastro malaperas, ĉio finiĝas kun li.

Malmultaj homoj uzas senliman potencon kun justeco kaj malavareco, ĉiuj scias tion. Sed la sklavo scias tion pli bone ol iu ajn. Li sentas, ke por bonkora, amema mastro troviĝas dek kruelaj kaj tiranaj. Tial la funebro de bona mastro estas longa kaj profunda por la forlasitaj kompatinduloj kiujn li postlasas.

Sanklaro apenaŭ spiri la lastan spiron ke teruro kaj konsterno kaptis ĉiujn. Li estis mortigita en la potenco kaj floro de sia juneco. La salonoj, la galerioj, la tuta domo resonis de plorĝemoj, de malesperaj krioj.

Marta, nervoza pro la senhalta kutimo aŭskulti sin mem, restis konsternita sub la ŝoko, kaj svenis minuton post minuto dum la agonio de sia edzo. Tiu al kiu la mistera kaj sankta ligilo de la geedzeco kunigis ŝin, forlasis ŝin por ĉiam sen adiaŭa vorto.

F^ino^ Ofelio, dotita per nemulte komuna energio kaj voloforto, restis ĝis la fino apud Sanklaro, tute videma, tute aŭskultema, tute atentema, farante la malmulton kiu povi esti farata, kaj kuniĝante per sia tuta animo al la teneraj kaj

fervoraj preĝoj de la kompatinda sklavo por la animo de lia mortonta mastro.

Kiam ili donis al li la lastajn devojn, ili trovis sur lia brusto malgrandan medalionon kun risorto. Ĝi enhavis portreton de virinon, noblan kaj belan vizaĝon, kaj reverse, tufeton da nigraj haroj. Ili remetis sur la inertan bruston, cindrojn sur cindrojn, tiujn malgajajn restaĵojn de pasinteco kiuj iam tiel rapide batigis tiun senmovan koron.

La animo de Tomo estis tuttute en la pensoj de la eterneco; kaj antaŭ ĉi tiu malvarma kadavro, li ne unufoje pensis ke ĉi tiu neatendita bato sigelis por ĉiam lian sklavecon. Li estis trankvila pri sia mastro; ĉar ĉe la solena horo, kiam li elverŝis sian preĝon en la sinon de la ĉiela Patro, li sentis eniĝi en si perfektan kvietecon kaj kiel la certecon ke li estis elaŭdita. En la profundo de siaj korinklinoj li sentis sin kapabla percepti ion pri la pleneco de la Dia amo; ĉar malnova orakolo skribis : "*Kiu loĝas en la amo, tiu loĝas en Dio, kaj Dio en li*". Tomo kredis, Tomo esperis, kaj Tomo estis en paco.

La tago de la funebro alvenis, kun ĝia deviga sinsekvo da funebraj krepoj, da preĝoj, da dignaj vizaĝoj. Poste la kotaj ondoj de la ĉiutaga vivo ruliĝis kiel antaŭe. Poste venis la eterna demando : Kion ankoraŭ estas farenda ?

Marta metis ĝin al si, dum envolvita de matena negliĝo, ĉirkaŭita de maltrankvilaj vizaĝoj, ŝi ekzamenis, de la fundo de sia kusenfotelo, specimenojn de funebraj ŝtofoj. F^ino^ Ofelio ankaŭ metis ĝin al si, ŝi pensis reiri al Nordo kaj la patra hejmo. Sed la demando ĉefe stariĝis plena de mutaj teruroj en la menso de la geservistoj, kiuj tro bone konis la tiranan nesentecon de sia mastrino. Ĉiuj sciis ke la dolĉeco kiun ili ĝuis, venis al ili de la mastro sole, kaj ke nun kiam li ne plu estas, nenio povus protekti ilin kontraŭ la despotaj kapricoj de karaktero kiun la malsukcesoj pli maldolĉigis.

Ĉirkaŭ duonmonaton post la entombigo, f^ino Ofelio, okupata en sia ĉambro, aŭdis milde frapeti sur la pordo. Ŝi malfermis, estis Roza, la beleta kvarterona ĉambristino, kun haroj taŭzitaj kaj okuloj ŝvelitaj pro larmoj.

- Ho ! Fraŭlino Felio, *ŝi diris, falante surgenuen kaj kaptante la baskon de la robo de f^ino Ofelio*; mi petegi vin, iri trovi mastrinon ! Iri petegi al ŝi por mi ! Ŝi voli sendi min tien por esti vipata. Rigardi, *ŝi montris paperon al f^ino Ofelio*.

Ĝi estis la eleganta kaj fajna manskribo de Marta; iu ordono al la mastro de pundomo doni al la portantino dek kvin vipobatojn.

- Kion vi do faris ? demandis f^ino Ofelio.

- Vi scii, fraŭlino Felio, mi havi tiel malbonan karakteron ! Tio esti tre malbona de mi. Mi provi robon de mastrino Marta. Ŝi frapi min en la vizaĝon, kaj mi paroli sen pripensi tion. Mi esti malrespekta. Ŝi diri ke ŝi cedigi min, ke ŝi instrui min, unufoje por ĉiam, ne plu ludi la princinon kiel antaŭe. Ŝi skribi ĉi tiun bileton, kaj diri al mi alporti ĝin, sed mi pli bone ŝati ke ŝi tuj mortigi min.

F^ino Ofelio tenis la paperon kaj pripensis.

- Kompreni, fraŭlino Felio, daŭrigis Roza, tio ne esti tiom pro timo de batoj; mi ja elteni ilin de via mano aŭ de tiu de sinjorino Marta. Sed esti sendata al viro ! al tia terura homo ! Esti por morti pro honto !

F^ino Ofelio sciis ke la ĝenerala kutimo estas sendi al pundomoj, por esti krude elmontrita kaj submetita al hontindaj batadoj. Kompatindaj virinoj, junaj knabinoj, tiel transdonitaj al la plej malindaj homoj, al homoj sufiĉe aĉaj por fari tian metion.

Ŝi sciis tion; sed ŝi komprenis la abomenan realecon nur vidante la nefortan junan knabinon tordi sin pro angoro ĉe siaj genuoj. La tuta sango de ina sindetenemo, la libera kaj vigla sango de Nov-Anglio, purpurigis ŝiajn vangojn, kaj

refluis al ŝia indignigita koro. Sed, per sia prudento kaj sia kutima firmeco, ŝi regis sin, kaj ĉifante la paperon en sia mano, ŝi simple diris al Roza : "*Sidiĝu, infano, dum mi iros paroli kun via mastrino*". "*Ĝi estas abomena, kruelega, senhonora !*" ŝi diris al si trairante la salonon.

Ŝi trovis Marta^n sidan en ŝia kusenfotelo; Avino, stara malantaŭ ŝi, malimplikis ŝiajn harojn; Jane, kaŭra sur la tero, frotis al ŝi la piedojn.

- Kiel vi fartas hodiaŭ ? demandis f^ino Ofelio.

Marta profunde suspiris, fermis la okulojn kaj ne respondis. Fine, post momento, ŝi langvore diris : "*Mi vere ne scias, kuzino; mi supozas ke mi fartas tiel bone kiel mi de nun povas farti !*" Ŝi viŝis al si la okulojn per poŝtuko el batisto, enkadrigita per larĝa nigra bordero.

- Mi venis, *diris f^ino Ofelio, kaj ŝi estis trafita de la mallonga seka tuso kiu ordinare antaŭas malfacilan temon*, mi venis por paroli al vi pri kompatinda Roza.

La okuloj de Marta ĉi-foje malfermiĝis larĝege, kaj ŝiaj flavaj vangoj ruĝe koloriĝis, dum ŝi acide respondis :

- Nu ! Kion vi havas por diri al mi ?

- Ŝi tre bedaŭras sian kulpon.

- Vere ! Ŝi bedaŭros ankoraŭ pli antaŭ ol mi estos finanta kun ŝi. Mi tro longe suferis ŝian malrespekton, nun mi pretendas humiligi ŝin, faligi ŝin en la koton !

- Sed ĉu vi ne povus alimaniere puni ŝin, per malpli hontinda maniero ?

- Mi volas hontigi ŝin; estas ĝuste tio kion mi volas. Dum ŝia tuta vivo ŝi malmodestis pri sia talio, pri sia vizaĝo, pri siaj sinjorinaj mienoj, ĝis tia punkto ke ŝi forgesis tio kio ŝi estas. Mi donos al ŝi lecionon kiu memorigos ŝin pri tio.

- Sed, kuzino, pripensu ke se vi detruas ĉian delikatecon, ĉian sindetenecon en juna knabino, vi senmoraligas ŝin.

- Delikatecon ! diris Marta kun malestima rido; granda vorto kiu bone taŭgas por ŝi kaj por ŝiaj similuloj ! Mi instruos al ŝi ke, malgraŭ ĉiuj ŝiaj gravaj mienoj, ŝi ne pli valoras ol la plej malgrava ĉifonvestita knabino kiu abundas sur la stratoj. Ŝi ne plu aŭdacos fari mienojn antaŭ mi !

- Vi devos respondi al Dio pro tia krueleco ! diris f^ino Ofelio.

- Krueleco ! Mi volus ja scii, pri kio mi estas kruela ? Mi skribis la mendon nur por dek kvin batoj, mi eĉ aldonis ne doni ilin tro forte. Certe ne estas en tio krueleco !

- Neniu krueleco ! rekomencis f^ino Ofelio. Mi certas ke iu ajn juna knabino centfoje preferus morti !

- Vi juĝas tion laŭ via vidpunkto, sed ĉiuj ĉi kreitaĵoj kutimiĝas al tio. Ĝi estas la sola rimedo obeigi ilin. Lasu ilin unufoje afekti delikatajn sintenojn, kaj ĉion kio sekvas, ili rapidege grimpos sur vian dorson, kiel ĉiam faris miaj servaj knabinoj. Mi komencis revenigi ilin sub mian aŭtoritaton; kaj mi volas ke ili bone sciu ke mi forsendus ilin esti vipatajn, unu kiel la alia, se ili grumblus ! Kaj Marta decideme rigardis ĉirkaŭ si.

Jane mallevis la kapon kaj ankoraŭ pli kliniĝis, ĉar ŝi sentis ke la minaco estis direktita al ŝi.

F^ino Ofelio dum momento ŝajnis esti englutinta pulvon por kanono kaj esti preta eksplodi. Sed memorante la vanecon de ia ajn diskuto kun simila naturo, ŝi rezolute fermis siajn lipojn, ekstaris kaj eliris el la ĉambro.

Estis por ŝi malfacila afero diri al Roza ke ŝi malsukcesis. Baldaŭ servisto venis por diri ke lia mastrino ordonis al li konduki la junan kvarteroninon al la pundomo, kien ŝi estis trenita spite al siaj larmoj kaj preĝoj.

Malmulte da tagoj poste, Tomo pripensis stare sur la balkono, kiam li estis alproksimiĝinta de Adolfo kiu, seniĝinta je siajn tutajn splendaĵojn, estis nekonsolebla ekde la morto

de sia mastro. La mulato konis la antipation kiun Marta aldirektis al li; sed tiel longe kiel lia mastro vivis, li malmulte zorgis pri tio. Nun li estis trafita de konstantaj trancoj kaj tremis pri tio kio povus okazi al li. Marta estis havinta plurajn konsultadojn kun sia advokato, ŝi petis la opinion de la frato de Sanklaro, kaj estis decidita ke oni vendos la domon tiel kiel ĉiuj sklavoj, krom tiuj kiuj apartenis al ŝi propre, kaj kiujn ŝi devis preni kun ŝi dum sia reiro ĉe sian patron.

- Ĉu vi scias, Tomo, ke ni ĉiuj baldaŭ estos venditaj ! diris Adolfo.

- Kiel vi scias tion ? diris Tomo.

- Mi estis kaŝita malantaŭ la kurtenoj dum mastrino parolis kun la advokato. Post kelkaj tagoj de nun, ni ĉiuj estos senditaj al la merkato.

- La volo de Disinjoro estu plenumita ! *diris Tomo, kun brakoj krucitaj kaj eligante profundan suspiron.*

- Ni neniam retrovos mastron kiel nian, *reparolis Adolfo per malkvieta tono;* sed mi eĉ pli ŝatas esti vendita kaj provi mian sorton ol resti kun mastrino.

Tomo deturniĝis; lia koro estis tro plena. La espero pri libereco, la memoro pri lia edzino, pri liaj infanoj, aperis al lia pacienca animo, kiel aperas al ŝiprompa maristo ĉe la enirejo de haveno, la vizio de lia spajro, de la amataj tegmentoj de lia naskiĝvilaĝo, videtataj de la supro de la malhela hulo kiu baldaŭ englutos lin por ĉiam. Li forte premis siajn brakojn sur sia brusto, subpremis siajn maldolĉajn larmojn kaj penis preĝi. La kompatindulo havis strangan, neklarigeblan antaŭjuĝon favore al libereco, kaj la lukto por elradikigi ĝin estis malfacila. Ju pli li ripetis "*Plenumiĝu via volo*", des pli li sentis sin malfeliĉa.

Li iris trovi f^inon^ Ofelio^n^ kiu, de post la morto de Evnjo, ĉiam traktis lin kun afableco, kaj eĉ kun ia respekto.

- Fraŭlino Felio, li diris, mastro Sanklaro promesi al mi mian liberecon. Li komenci fari tion kion necesi por redoni ĝin al mi. Eble, se fraŭlino Felio bonvoli paroli pri tio al mastrino, ŝi bonvoli fini la aferon, nur por fari kiel mastro Sanklaro voli.

- Mi parolos por vi, Tomo, kaj faros kiel eble plej bone, diris f^ino Ofelio; sed se la afero dependas de sinjorino Sanklaro, mi ne havas altan esperon, tamen mi provos.

Estis iom post la okazaĵo de Roza, kaj f^ino Ofelio klopodis pri siaj preparoj por foriro.

Ŝi serioze pripensis, kaj riproĉis al si esti eble tro vigliĝinta dum tiu unua pledo. Decidata moderigi sian fervoron, kaj esti kiel eble plej akordiĝema, ŝi prenis sian trikaĵon, alkonformigis sian vizaĝon kaj alpaŝis al la ĉambro de Marta por tie trakti pri la afero de Tomo, kun la tuta diplomatio per kiu ŝi kapablis.

S^ino Sanklaro, etendita sur tolseĝo kun kubuto apogita sur stako da kusenoj, rigardis diversajn nigrajn ŝtofojn kiujn Jane alportis de pluraj butikoj kaj kiujn ŝi dismetis antaŭ si.

- Ĉi tiu konvenas al mi, diris Marta montrante unu el la pecoj, sed mi ne certas ke ĝi estu sufiĉe funebra.

- Disinjoro, mastrino ! *diris Jane elokvente*, sinjorino generalino Derbenon ne surmetis aliaĵon post la morto de la generalo dum la pasinta somero. Ĝi tiel bone taŭgas !

- Kion vi pensas pri tio ? demandis Marta al f^ino Ofelio.

- Estas afero de kutimo, mi supozas, diris f^ino Ofelio. Vi povas juĝi pri tio pli bone ol mi.

- La fakto estas ke mi ne havas en la mondo eĉ unu robon por surmeti, kaj ĉar venontan semajnon mi estas malplenigonta la domon kaj forironta, nepras ke mi decidas ion.

- Ĉu vi foriras tiel frue ?

- Jes, la frato de Sanklaro skribis, li kaj la advokato

pensas ke pli bone valoras unue surmerkatigi la sklavojn kaj meblojn, eĉ se tio signifas lasi la loĝejon zorge de la juristo por esti pli poste vendata.

- Estas iu afero pri kiu mi volis paroli kun vi, diris f^ino Ofelio. Aŭgusteno promesis al Tomo redoni al li liberecon, li eĉ komencis la necesajn leĝajn demarŝojn. Mi esperas ke vi uzos vian influon por ke ili finiĝos.

- Mi vere nenion faros, diris akre Marta. Tomo estas el ĉiuj geservistoj de la loĝejo, tiu kiu estas la plej valora. Ni ne kapablas fari tian oferon. Cetere, kial li bezonas liberecon ? Li estas multege pli bona tia kia li estas.

- Sed li ardege sopiras esti libera, kaj lia mastro promesis tion al li, insistis f^ino Ofelio.

- Mi ne dubas ke li deziregas tion, rebatis Marta. Ili ĉiuj atingis tiun ŝtupon, ĝuste ĉar ili estas amaso da malkontentuloj kiuj ĉiam volas havi tion kion ili ne havas. Mi havas kiel principon neniel emancipi. Tenu la negron sub la regado de la mastro, kaj li kondutos preskaŭ bone; sed se vi malsklavigas lin, li ne plu volos labori. Li fariĝos pigrulo, ebriulo, kaj ĉio kio estas plej malbona. Mi vidis centojn da ekzemploj pri tio. Tio tute ne estas helpi ilin malsklavigante ilin.

- Sed Tomo estas tiel sobra, tiel bona laboristo, tiel pia.

- Ho ! Vi ne devas insisti ! Mi vidis cent kiel li; li bone dancos tiel longe kiel ni havos okulon sur li, jen ĉio.

- Sed konsideru, diris f^ino Ofelio, ke surmerkatigante lin, vi riskas faligi lin ĉe malbonan mastron.

- Ĉi tio estas malseriozaĵoj ! rekomencis Marta. Ne po unu fojo pro cento okazas ke bona homo falas ĉe malbonan mastron. La plejmulto de mastroj estas bonaj kio ajn oni diras. Mi vivis, mi kreskis en la Sudo, kaj mi tie neniam konis iun kiu ne bone traktis siajn sklavojn, almenaŭ tiel bone kiel ili meritis. Mi ne havas la plej etan zorgon pri tio.

- Nu ! diris energie f^ino Ofelio, mi scias ke unu el la lastaj deziroj de via edzo estis ke Tomo ricevu liberecon. Ĝi estis unu el la promesoj kiujn li faris al kara eta Evnjo mortonta, kaj mi ne imagis ke vi povis kredi vin maldevigata de ĝi.

Ĉe ĉi tiu alvoko, Marta kovris al si la vizaĝon per sia naztuko, kaj uzis sian flakonon da saloj.

- Ĉiuj turniĝas kontraŭ mi ! ŝi diris; neniu montras la plej etan konsideron ! Mi ne povis atendi tian procedon ! Tiel veni veki ĉiujn miajn afliktojn ! Ĝi estas el tia senatenteco ! Sed oni ne volas pripensi pri ĉio kion miaj provoj, de mi, havas kiel apartecon. Estas tre malfacile, kiam mi havis nur solan filinon, vidi ŝin forkaptita ! Kiam mi havis edzon kiu tiel perfekte konvenis al mi, - kaj mi estas tiel malfacila -, estas malfacile perdi lin ! Necesas havi tre malmulte da sentemo por veni tiel senzorge memorigi al mi pri ĉio ĉi, kiam vi scias kiagrade mi estas malforta ! Mi volas kredi ke vi havas bonajn intencojn; sed ĝi estas nekredebla manko de konsideroj !

Kaj Marta plorsingultis, konvulsie spiris, kriis al Avino malfermi la fenestron, alporti al si la kamforon, froti al si la kapon kaj mallaĉi sin. Meze de la ĝenerala konfuzo, f^ino Ofelio elŝteliĝis kaj reiris al sia apartamento.

Ŝi vidis ke ŝi gajnus nenion dirante plian vorton, ĉar Marta havis kapablecon por senlimaj nervatakoj, kaj ŝi metis ĝin en ludon ĉiufoje kiam oni aludis pri la lastaj deziroj de sia edzo aŭ de Evnjo, favore al la geservistoj. F^ino Ofelio faris do tion kio restis al ŝi pli bona por fari por Tomo. Ŝi skribis por li leteron al s^ino Ŝelbi, detalante al ŝi liajn malfacilaĵojn, kaj urĝante ŝin sendi helpon al li.

La morgaŭon, Tomo, Adolfo kaj duondekduo da iliaj kunservistoj estis kondukitaj al sklavdeponejo por atendi la oportunon de la vendisto kiu kolektis stokon por vendado.

31. La Provizejo de Sklavoj.

Sklavdeponejo ! Ĉi tiu vorto eble elvokas hororajn viziojn ĉe kelkaj el miaj legantoj. Ili imagas malluman, malpuregan kavernon, timigan Tartaron, "*informis, ingens, cui lumen ademptum*"[33]. Sed ne, senkulpa amiko ! Nuntempe la arto malbonfari perfektiĝis; oni uzas lertecon, rafinadon en ĝin. Oni zorge evitas ĉion kio povus ŝoki la okulojn, ofendi la sentojn de respektinda socio. La homa posedaĵo plikostas en la merkato; konsekvence oni bone nutras ĝin, oni purigas ĝin, oni vartas ĝin, oni flegas ĝin, por ke ĝi alvenas en la merkato pura, forta kaj brila. Sklavdeponejo en Nov-Orleano estas bone mastrumata domo, kiu ne grave malsimilas al aliaj butikoj, kaj kie vi povas ĉiutage vidi, vicigita en ia ŝedo, ekstere, liniojn da viroj kaj virinoj, signo pri la varoj kiuj estas vendataj ene.

Oni petegos vin, laŭ la plej ĝentila maniero, eniri, ekzameni, kaj vi trovos abundecon da edzoj, edzinoj, fratoj, fratinoj, patroj, patrinoj, junaj infanoj, vendotaj unuope aŭ grupe, laŭ la oportuno de la aĉetanto. La senmorta animo, antaŭ longe elaĉetita de la sango kaj la angoroj de la Filo de Dio farita homon, dum "la tero tremis, kaj la ŝtonoj disfendiĝis, kaj la tomboj malfermiĝis", estas tie vendata, ludonata, hipotekata, interŝanĝata kontraŭ spicoj aŭ tute aliaj sekaj varoj, laŭ la komercaj fazoj kaj la kaprico de la aĉetanto.

Tomo, Adolfo kaj iliaj samsortuloj estis transdonitaj al la bonvola zorgado de s^ro^ Skegso, gardisto de deponejo en la strato ***, por tie atendi la vendadon de la morgaŭo.

33 Eltiraĵo de la Eneado de Vergilio (Libro III, verso 658) signifanta "senforma, vastega kaj senluma".

Tomo, tiel kiel la plejmulto el liaj kamaradoj, kunportis kun li kofron plenigitan de vestaĵoj. Oni enkondukis ilin en longan ĉambron kie ili devis tranokti, kaj kie jam estis kunigitaj homoj el ĉiu aĝo, ĉiu staturo kaj ĉiuj nuancoj, kiuj, lasitaj al ŝajna gajeco, laŭte ridis.

- Ha ! Ha ! Jen kiu bone okazas ! Donu tion al vi ! *diris S^ro Skegso la gardisto*. Mia mondo ĉiam estas tiel gaja ! Li estas Sambo, laŭ tio kion mi vidas, *li diris per aproba tono al dika nigrulo, kiu plenumis kelkan malnoblan pajacaĵon, kaŭzon de la bruaj rideksplodoj kiuj salutis la novevenintojn*.

Tomo, kiel ni imagas tion, ne estis ema por partopreni en la distrado. Do li demetis sian kofron kiel eble plej malproksimen de la brua grupo, kaj sidiĝis sur ĝin kun la vizaĝo turnita al la muro.

La fivendistoj de homaj artikloj faras sistemajn klopodojn disvastigi ĉe siaj varoj krudan kaj brueman gajecon, kiel rimedo por sufoki pripensadon kaj igi la sklavojn nesentemajn al sia sorto. La reĝimo al kiu la negro estas submetita, de kiam li estas aĉetita en la Nordo ĝis sia alveno en la Sudo, celas nur mortigi sian pensadon, brutigi lin. La sklavvendisto akiras sian brutaron en Virginio kaj Kentukio; li poste kondukas ĝin al iu bone situanta kaj sana loko, ofte al varmobanejoj, por tie esti grasigata. Tie la sklavoj laŭvole manĝas; kaj ĉar ĉiam troviĝas kelkaj inklinaj al melankolio, ni ludigas violonon dum la tuta tago, kaj ni devigas ilin danci. Tiu kiu rifuzas esti ĝoja, kies la animo estas ankoraŭ vizitadita de la memoro pri sia edzino, siaj infanoj, sia hejmo, tiu estas taksita kiel ruzan, danĝeran estulon, kaj sekve transdonita al ĉiuj suferoj kiujn povas estigi la malafableco de hardita kaj senzorga homo. La vigleco, la diligenteco, la eksteraĵoj de gajeco, ĉefe antaŭ vizitantoj, estas konstante truditaj al ili, tiom de la espero trovi bonan mastron, kiom de la timo pri ĉio kion la kolero de

la vendisto povas suferigi al ili, se li ne sukcesas forvendi lin.

- Kion ke li fari tie tiu negro ? diris Sambo alproksimiĝante al Tomo, post kiam S^ro Skegso forlasis la ĉambron.

Sambo estis malhela nigrulo, kun alta staturo, vigla, babilema kaj granda faranto de petolaĵoj kaj grimacoj.

- Kion ke vi fari tie ? aldonis Sambo, ŝerceme donante pugnobaton en liajn ripojn. Vi remaĉas, ĉu ne ?

- Mi devi esti morgaŭ aŭkcie vendita, respondis kviete Tomo.

- Aŭkcie vendita. He ! Ho ! Knaboj ! Tio ja esti amuza ! Mi voli esti tia ! Kiel mi ridigi ilin ! Diru, hej ! Ĉu tie esti la tuta stoko kiu foriri morgaŭ ? *li aldonis familiare metante sian manon sur la ŝultron de Adolfo*.

- Lasi min trankvila, bonvoli ! diris sovaĝe Adolfo restariĝante kun abomeno.

- He, he ! Vi ja ! Jen unu el viaj blankaj negroj ! Speco de kremkoloro kiu bonodori ! *Kaj, proksimiĝante al Adolfo, li flaris lin*. Disinjoro ! Bona por tabakvendejo; li bonodorigi la tutan butikon ! Li venigi grandajn klientojn, ha jes !

- Gardi vin kvieta ! Mi jam diri tion al vi, *furioze ekkriis Adolfo*.

- Kiel ni esti ofendiĝemaj, ni blankaj negroj ! Rigardi nin, vi knaboj ! *Kaj Sambo groteske imitis la manierojn de Adolfo*. Tio esti afektoj kaj graciecoj ! Ni esti en bona familio, mi supozi ?

- Mi havi mastron, diris Adolfo, kiu povi aĉeti vin ĉiujn, nur kontraŭ siaj malnovaj sentaŭgaĵoj !

- Disinjoro ! Iomete pensi, diris Sambo; ni esti ĝentlemano ! Alta nobelo !

- Mi aparteni al la familio Sanklaro, diris Adolfo fiere.

- Vere !... Mi voli esti pendumata se ili ne kontentaj forĵeti vin ! Kia fortuno ! Eble vi esti baldaŭ interŝanĝita

kontraŭ aro da rompitaj potoj kaj malnovaj fenditaj tekruĉoj ! *diris Sambo kun provokema grimaco.*

Adolfo, incitegata de ĉi tiuj pikparoloj, pafiĝis al sia kontraŭulo, sakrante kaj frapante lin per sia tuta forto. La aliaj ridis, aplaŭdis. La tumulto altiris la gardiston.

- Kio estas, knaboj ? Bonorde ! Bonorde ! li diris enirante, krakiganta sian longan vipon.

Ĉiuj fuĝis al malsamaj flankoj, krom Sambo. Kuraĝigita de la favoro kiun li ĝuis kiel reganta bufono, li defendis sian terenon, klinante la kapon kun ŝercema grimaco, ĉiujfoje kiam la gardisto alvenis al li.

- Disinjoro, mastro, tio ne esti ni; ni esti tre trankvilaj. Tio esti novvenintoj, tien; esti malafablaj, koleraj ! Ĉiam kontraŭ kompatituloj !

Dirinte tion, la gardisto sin turnis al Tomo kaj Adolfo, disdonis, sen plua esploro, kelkajn batojn per piedo kaj pugno; kaj post ĝenerala rekomendo por esti bonaj infanoj kaj dormi, li foriris.

Dum ĉi tiu sceno okazas en la vira dormejo, ni ĵetu rigardon en la apartamenton de la virinoj. Tie, etenditaj sur la planko, kuŝas, laŭ diversaj sintenoj, multenombraj dormantaj estulinoj, el ĉiuj koloroj, de ebona nigro ĝis ebura blanko, el ĉiuj aĝoj, de infaneco ĝis maljuneco. Ĉi tie, estas bela dekjara knabino kies patrino estis hieraŭ vendita, kaj kiu tiel multe ploris, sen ke iu ajn atentu ŝin, ke ŝi fine endormiĝis. Tie estas maljuna eluzita nigrulino kies la brakoj malgrasegaj kaj la fingroj raspaj atestas malfacilajn laborojn. Senvalora varo, ŝi estos morgaŭ vendita por tio kion oni volos doni. Kelkkvindek aliaj, kun kapoj volvitaj en litkovriloj, aŭ strange vestaĉitaj, amasiĝas ĉirkaŭe. Sed en angulo, du virinoj flanke staras. Unu, mulatino de kvardek ĝis kvindek jaroj, pure vestita, havas afablan fizionomion kun mildaj kaj kristalopuraj okulojn; ŝi turbane portas belan kaj

fajnan madrason; ŝia bone almezurita robo, el bela kaj bona ŝtofo, komprenigas ke atenta mastrino provizis sian tualeton. Premata al ŝi, kaj buliĝanta kiel en nesto, estas dekkvinjara infano, ŝia filino. Ŝi estas kvarteronino kun hela vizaĝkoloro; sed ŝia simileco al ŝia patrino ne malpli okulfrapas. Estas la samaj mildaj kaj nigraj okuloj, vualitaj de longaj okulharoj, la sama bruna, abunda kaj bukla hararo. Ŝia vestado ankaŭ estas tre pura, kaj ŝiaj blankaj kaj delikataj manoj evidente neniam faris sklavajn laborojn. Ambaŭ devos esti morgaŭ vendataj, en la sama aro ke la geservistoj de Sanklaro. La proprietulo, al kiu la enspezo de la vendado estos transdonata, estas membro de kristana eklezio en Novjorko. Li ricevos la monon, kaj sen pli pensi pri tio, sin prezentos al la tablo de Disinjoro, de Dio, kiu ankaŭ estas ilia Dio de ili !

Suzana kaj Emelina estis submetitaj al la persona servo de pia kaj bonkora sinjorino de Nov-Orleano, kiu instruis kaj edukis ilin per la plej granda zorgo. Oni instruis ilin legi kaj skribi; oni parolis kun ili pri la veroj de la religio, kaj ilia sorto estis tiel feliĉa kiel ĝi povis esti. Sed la ununura filo de ilia protektantino, taskita valorigi la havaĵojn, senzorge kompromisis ilin per freneza malŝparemo, kaj ĵus bankrotis. La respektinda domo de la fratoj B. kaj kompanio, de Novjorko, havanta unu el la plej fortaj kreditoraĵoj, la estroj skribis al sia aferŝarĝito en Nov-Orleano kiu konfiskigis la realan proprietaĵon. (Ĝi preskaŭ limiĝis je la du virinoj, kaj aro da sklavoj por la plantejoj). Li skribis leteron tiucele al siajn prokuristojn.

Unu el la fratoj estanta, kiel ni diris tion, kristano, loĝanto de libera ŝtato, sentis sin trafita de iuj skrupuloj. Li ne ŝatis la komercon de sklavoj kaj de homaj animoj, certe ne; sed aliflanke, tridek mil dolaroj esti riskataj, kaj tio estis tro da mono por oferi al iu principo. Tiel ke post esti multe pripensanta, kaj petinta la opinion de tiuj kiujn li sciis

samopinii, frato B. skribis al sia aferŝarĝito por disponigi lin pri la domaĵoj laŭ la maniero kiu ŝajnos al li plej taŭga, kaj transsendi al li la monsumon.

La morgaŭon kiam la letero alvenis, Suzana kaj Emelina estis sendataj al la deponejo, por tie atendi la ĝeneralan vendadon.

La pala lumo de la luno, kiu filtras tra la kraditaj fenestroj, lumigas la patrinon kaj la filinon. Ili ambaŭ ploras, sed ĉiu aparte kaj sen bruo, tiel ke la alia ne povu aŭdi ŝin.

- Patrino, metu vian kapon sur miajn genuojn, kaj provu iom dormi, diris la juna knabino provante ŝajni kvieta.

- Mi ne sentas inklinon por dormi, Emelina ! Mi ne povas. Eble ĉi tio estas la lasta nokto kiun ni kune pasigas.

- Ho ! Patrino, ne diru tion ! Eble ni estos venditaj al sama mastro, kiu scias ?

- Se temus pri iu ajn alia, mi ankaŭ dirus, eble ? rekomencis la virino; sed mi tiom timas perdi vin, Emelina, ke mi vidas nur danĝeron.

- Kial, patrino ? La viro opiniis nin bonaspektaj, kaj li diris ke ni ne mankos aĉetantoj.

La patrino tro bone memoris la rigardojn kaj parolojn de la viro. Ŝi memoris, kun terura korpremo, kiel li ekzamenis la manojn de la juna knabino, levis la buklojn de ŝiaj haroj, kaj deklaris ke ŝi estis unuaklasa artiklo. Suzana, kristane edukita, nutrita de legado de la Biblio, havis tiom da hororo vidi vendi sian filinon por senhonora vivo, kiom povus senti ĉiu alia pia patrino; sed ŝi tute ne havis esperon, protekton.

- Mi kredas, patrino, ke ni mirinde saviĝos, se ni trafos iun bonan domon, kie vi povus esti kuiristino kaj mi ĉambristino aŭ kudristino. Ni havos ĉi tiun ŝancon, mi esperas. Necesas al ni montri plaĉan, viglan mienon, tiel gajan kiel kapablos tion, diri ĉion kion ni povas fari; kaj eble

ni sukcesos tion ?

- Morgaŭ vi kombos viajn harojn, glataj, tute rektaj, ĉu vi aŭdas ? diris Suzana.

- Kial, patrino ? Tio ne konvenas al mi ne eĉ duonbone.

- Jes; sed vi vendos vin nur pli bone.

- Mi ne komprenas kial ! diris la juna knabino.

- Respektindaj homoj estos pli inklinaj aĉeti vin, vidante vin simplan kaj modestan, ol se vi provus beligi vin. Mi konas iliajn ideojn pli bone ol vi, diris Suzana.

- Nu, patrino, mi faros kiel vi volas.

- Emelina, se post la tago de morgaŭ ni devus ne plu revidi nin; se mi estus vendita por iri ien sur iun plantejon, kaj vi sur alian; ĉiam memoru, kiel vi estis edukita, kaj ĉion kion mastrino diris al vi. Alprenu kun vi vian Biblion kaj vian himnaron. Se vi estas fidela al Disinjoro, Disinjoro estos fidela al vi

Tiel parolas la kompatinda animo en sia profunda mizero; ĉar ŝi scias ke morgaŭ ĉiu malnobla kaj kruda, senkompata kaj malpia viro povas fariĝi posedanto de ŝia filino, korpo kaj animo, se li nur havas sufiĉe da mono por aĉeti ŝin. Kaj kiel tiam la kompatinda infano konservos sian fidon ? Ŝi pensas pri ĉio ĉi, kaj, tenante sian filinon inter siaj brakoj, ŝi volus ŝin malpli bela. Ŝi memoras la edukadon kiun Emelina ricevis, tiel puran, tiel ĉastan, tiom multe super ŝia kondiĉo, kaj ŝi preskaŭ ĉagreniĝis pro tio. Ŝia sola rimedo estas preĝi. El fundo de ĉi tiuj prizonaj deponejoj, tiel bone mastrumataj, tiel puraj, tiel decaj, kiom da preĝoj supreniris ĝis Dio ! Preĝoj kiujn Dio ne faligas en forgeson, kiel ni vidos dum la estonta tago, ĉar estas skribite : "Kiu ajn skandalos unu el ĉi tiuj etuloj kiuj kredas al mi, pli bone estus por li ke oni metu muelŝtonon ĉirkaŭ lian kolon, kaj ke oni ĵetu lin en la maron *[Sta Marko 9 versiklo 42]*.

Milda kaj kvieta lunradio falas de supre, kaj desegnas

sur la dormantaj grupoj la ombron de la stangoj de la fenestro. Patrino kaj filino kune kantas, laŭ stranga kaj malĝoja melodio, kantikon komponita de sklavoj, specon de funebra himno komunuza inter ili.

Kie do estas kompatinda Maria,
Kiu ploris, ploris senĉese ?
Kie do estas kompatinda Maria,
Ŝi akiris la paradizon !

Neniu plu insultas ŝin,
Frapas ŝin, malbenas ŝin;
Mortinta, ŝi estas feliĉa Maria,
Ŝi akiris la paradizon !

Ĉi tiuj paroloj, kantitaj de dolĉaj kaj melankoliaj voĉoj, meze de etoso plena de suspiroj de malespero ellasitaj al la ĉielo, eĥis tra la malhelaj ĉambroj de la malliberejo kun penetrema akcento.

Ho ! Karaj amikoj, kiu povas diri al ni
Kie estas kaŝitaj Paŭlo kaj Silas ?
Ilia sorto ne povis esti pli malbona
Ol ĝi bedaŭrinde estis sur la tero !

Ĉi tie sube estis ilia martireco,
Sed tien supren en la benitan ĉielon,
Ili havas tion kion ĉiu koro deziras,
Ili akiris la paradizon !

Kantu, kompatindaj animoj, kantu ! La nokto estas mallonga, kaj morgaŭ disŝiros vin por ĉiam !

Estas mateno, ĉiuj stariĝis sur piedoj. La digna S^ro^ Skegso, vigla kaj klopodema inter ĉiuj, aranĝas sian grupon por la vendado. Estas severa inspektado de la tualetoj; estas ordonita al ĉiu vidigi sian plej bonan vizaĝon, sian plej viglan mienon. Nun ĉiuj ronde metitaj, tuj estos detale ekzamenataj lastfoje antaŭ la foriro al la Borso.

S^ro^ Skegso, kun kapo vestita de sia ĉapelo el plektitaj

palmfibroj, kaj fumanta sian cigaron, ĉirkaŭiras; li korektas lastan aspekton al sia varo.

- Kio tio ? li diris haltante antaŭ Suzana kaj Emelina; kion vi faris al viaj bukloj, knabino ?

La knabino timeme rigardis sian patrinon kiu, kun la ĝentila lerteco, kutima en sia klaso, respondis :

- Mi hieraŭ vespere diris al ŝi tre taŭge kunigi ŝiajn harojn, anstataŭ havi ilin tute hirtaj laŭ bukloj. Tio estas pli honesta, pli deca.

- Stultaĵoj ! *diris la viro; kaj mastreme sin turnante al Emelina*, iru frizi vin, kaj rapide ! *li aldonis krakigante sian rotangon*. Ne faru vin atendi ! Kaj vi, iru helpi ŝin ! *li diris al la patrino*. Nur ĉi tiuj bukloj povas fari diferencon de cent dolaroj ĉe la vendado !

Homoj el ĉiuj nacioj iras kaj reiras, sub pompa kupolo, sur marmora pavimo. Ĉiuflanke de la cirkla areno stariĝas malgrandaj tribunoj, por uzo de aŭkciistoj kaj anoncistoj. Du el ili, kleraj kaj bonaspektaj homoj, konkure klopodas, per duonangla, duonfranca ĵargono, por laŭdi la varojn kaj altigi la proponojn. Tria tribuno, ankoraŭ malplena, estis ĉirkaŭita de grupo kiu atendis la komencon de la vendo. En la unua vico troviĝis la geservistoj de Sanklaro, Tomo, Adolfo kaj iliaj kamaradoj. Tie ankaŭ, Suzana kaj Emelina, malkvietaj, senkuraĝaj, kunpremiĝis unu kontraŭ la alia. Diversaj spektantoj, venintaj sen preciza intenco aĉeti, kolektiĝis ĉirkaŭ la vendotaj varoj, palpas ilin, ekzamenas ilin kaj diskutas pri ilia valoro kaj iliaj aspektojn, kun la sama senĝeno kiun povus uzi aro da ĵokeoj por komenti la meritojn de ĉevalo.

- Hola, Alfonso ! Kiu venigas vin ĉi tie ? diris bela junulo frapante sur la ŝultron de alia elegantulo ekzamenanta Adolfo^{n} tra sia nazumo.

- Oni diris al mi ke la homoj de Sanklaro estis vendotaj

hodiaŭ. Mi bezonas ĉambriston, mi volis vidi ĉu la lia taŭgus por mi.

- Kaptu min iam aĉetante unu el la homoj de Sanklaro ! Dorlotitaj negroj, de la unua ĝis la lasta ! Arogantaj kiel la diablo !

- Nenion timu, diris la belulo, se mi akiros ilin, mi baldaŭ ŝanĝigos iliajn tonon. Ili vidos ke ili trovis alian mastron ol sinjoron Sanklaro[n]. Vere, la knabo plaĉas al mi ! Mi aĉetos lin. Mi ŝatas lian eksteraĵon.

- Li glutos vian tutan havaĵon, nur por sia prizorgado. Li postulas ekstravagancan elspezon !

- Jes; sed ĉi tiu lordo ekrimarkos ke oni ne povas permesi al si ekstravagancon ĉe mi. Kelkaj vizitoj al malliberejo rapidege korektos lin. Ĉi tio estas neerarema maniero, mi certigas vin, sentigi al li la nekonvenecon de siaj manieroj ! Ho ! Mi reformos lin de la piedoj ĝis la kapo. Vi prefere vidos. Mi aĉetos lin, certe.

Tomo angore serĉis en la homamason kiu kunpremiĝis ĉirkaŭ li, vizaĝon al kiu li dezirintus doni la nomon de mastro. *Se vi iam troviĝus, sinjoro, en la nepra neceso elekti inter ducent homoj absolutan mastron, suverenan arbitracianton de via destino, eble, kiel Tomo, vi trovus tre malmultajn al kiuj vi estus kontenta aparteni.* Tomo vidis individuojn el ĉiaj aspektoj, dikajn, altajn, insidemajn, malfortikajn, malgrandajn, parolemajn, kun vizaĝo longforma, ronda, ostecaj; sed la plimulto konsistis el krudaj harditaj homoj kiuj aĉetas siajn similulojn kiel oni aĉetas lignerojn, por meti ilin, kun egala senzorgeco, en la korbon aŭ en la fajron, laŭ la bezono. Kiom ajn Tomo serĉis, li ne vidis eĉ unu Sanklaro[n].

Iom antaŭ la malfermo de la vendo, dikmalalta kaj muskola persono, kies la malpura ĉemizo, kun koloraj strioj, lasis vidi la nudan bruston, kaj kiu surmetis eluzitan pantalonon, makuletitan de koto, trakubutis la homamason

kaj farigis vojon al si kiel viro kiu aktive plenumas la aferojn. Li antaŭenpaŝis al la grupo, kaj komencis zorgeman ekzamenon. Tuj kiam Tomo ekvidis lin, li sentis sin trafata de instinktan hororon; ĉi tiu mallogo ankoraŭ plialtiĝis, kiam li pli proksime vidis lin. Dika kaj peza, li evidente havis gigantan forton. Lia kranio, ronda kiel globo, liaj okuloj el hela grizo superelstaritaj de densaj rufaj brovoj, liaj haroj rektaj, rigidaj, brulitaj de la suno, ne allogigis, necesas konfesi tion, lian aspekton. Lia larĝa kaj vulgara buŝo, dilatita de tabako, malproksimen elĵetis de tempo al tempo la sukon de ĝi kun malofta vigleco de sputado. Liaj grandegaj, vilaj manoj, kovritaj de lentugoj, estis abomene malpuraj kaj provizitaj de ungoj tiel same. Daŭrigante la individuan ekzamenon de la grupo, li kaptis Tomo^{n} per la makzelo, inspektis siajn dentojn, ordonis al li kuspi sian manikon por montri liajn muskolojn, igis lin turniĝi, salti, kuri, por juĝi lian paŝadon.

- Kien vi estis dresita ? li demandis post ĉiuj ĉi esploradoj.

- En Kentukio, diris Tomo serĉanta per la okulo liberiganton.

- Kion vi faris tie ?

- Mi administris la bienon de la mastro.

- Verŝajne ! Kia fabelo !

Kaj li preterpasis. Li faris paŭzon antaŭ Adolfo, rigardis siajn lakitajn botojn, surverŝis ilin per grandega sputado da dekoktaĵo de tabako, kaj kun malestima "Fi !" daŭrigis sian viziton. Li denove haltis antaŭ Suzana kaj Emelina. Li kaptis la junan knabinon, kaj tiris ŝin al li per sia peza kaj malpura mano; li pasigis ĝin sur ŝiajn kolon, talion, brakojn; li rigardis ŝiajn dentojn, poste repuŝis ŝin ĉe ŝia patrino, kies la pala vizaĝo esprimis ŝiajn timojn ĉe ĉiu movado de la malbelega fremdulo.

La juna knabino, timigita, ekploregis.

- Ĉesu tion, eta afektulino ! *diris la makleristo;* ni ne ĝemetas ĉi tie. La vendo tuj komenciĝos.

Fakte la vendado komenciĝis. Adolfo estis aŭkciata kontraŭ sufiĉe dika monsumo al la juna elegantulo, kiu volege prenis lin. La aliaj geservistoj de la grupo de Sanklaro estis aljuĝitaj al diversaj pliproponantoj.

- Je via vico, knabo ! Ĉu vi ne aŭdas ? diris la anoncisto al Tomo.

Tomo supreniris sur la podion, kaj ĵetis ĉirkaŭ si maltrankvilan rigardon.

Ĉiuj sonoj miksiĝas en konfuza zumo. La babilado de la anoncisto kiu detalis, angle kaj france, la kvalitojn de la artiklo, la kruciĝantaj proponoj de la aŭkcioj kiuj sinsekvas en la du lingvoj, la martelbatoj, kaj finfine la fina bato kiu akompanas la laŭtan sonegon de la lasta silabo de la vorto dolaroj, ĉe la momento kiam la aŭkciisto elkrias la prezon de la adjudiko. Tio estas farita, Tomo havas mastron.

Oni puŝas lin el la podio. La dika viro kun kapo de virbovo krude kaptas lin per la ŝultro, tiras lin flanken kaj diras al li per raŭka voĉo : "Restu tie, vi !"

Tomo nur duone komprenis. Tamen la vendo normale daŭrigis. La bruego duobliĝas, jen france, jen angle. La levita martelo refalas… Suzana estas vendita. Ŝi malsupreniras el la podio, haltas, angore sin turnas al sia filino, kiu etendas al ŝi la brakojn. Ŝi senhelpe rigardas sian novan mastron. Li estas mezaĝa viro, kun respektinda aspekto, bonvola fizionomio.

- Ho mastro, aĉetu mian filinon, mi petegas vin !

- Mi ŝatus tion; sed mi timas ne havi la monon por tio, diris la brava viro sekvante per la okulo kun intereso la junan knabinon, kiu supreniris sur la podion kaj sendis ĉirkaŭ si terurigitajn kaj timemajn rigardojn.

Ŝia ekscitita sango koloras ŝiajn palajn vangojn, fajro de febro briligas ŝiajn okulojn, kaj la patrino tremas vidante ŝin pli bela ol ŝi iam ajn vidis ŝin. La anoncisto ankaŭ profitas sian bonŝancon, kaj verve paroladas en sia malbona anglo-franca ĵargono; la proponoj rapide kreskas.

- Mi faros ĉion kion mi povos, diris la bonkora ĝentlemano, kuniĝante al la pliproponantoj kaj proponante sian prezon; sed post kelkaj sekundoj li estis postlasita; ĉio kio enhavis lia monujo ne sufiĉus. Li silentas. La aŭkciisto ekzaltiĝas, la proponoj malrapidiĝas. Nun la lukto daŭras nur inter maljuna aristokrato de Nov-Orleano kaj nia malnobla konato kun malmola kaj ronda kranio. La nobla persono, disdegne mezuranta per la okulo sian kontraŭulon, ankoraŭ faras kelkajn proponojn. Sed la kampulo persistas; li venkas super la alia per la tuta forto de sia obstino kaj per la tuta profundo de bone provizita monujo. Tial la interbatiĝo daŭras nur momenton. La martelo falas… Li havas la junan knabinon, korpon kaj animon, krom se Dio helpos ŝin !

La mastro de Emelina estas S^ro^ Lagrizo, posedanto de kotona plantejo ĉe la Ruĝa Rivero. Ŝi estas puŝita direkte al la grupo kies Tomo estas parto, kune kun du aliaj, kaj foriras plorante.

La brava posedanto de Suzana ĉagreniĝis; sed "*ĉi tiuj aferoj ĉiutage okazas. Preskaŭ ne estas vendoj kie oni ne vidas patrinojn kaj filinojn plori ! Oni ne scias kion fari pri tio !*" Kaj li sin direktas al la alia flanko kun sia nova aĉetaĵaro.

Du tagojn poste, la aferisto de la tre kristana firmo B*** kaj kompanio, en Novjorko, sendis la monon al siaj korespondantoj. Ke ili skribu dorsen de ĉi tiu trato, prezo de larmoj kaj sango, la parolojn de la Superrega Paganto, kun kiu ili iam kvitiĝos : "*Kiam li venĝas pro la verŝita sango, li ne forgesas la krion de la kompatindulo*". (Psalmoj 9, 12)

32. La Transŝipiĝo.

Vi havas la okulojn tro puraj por vidi malbonon, kaj vi ne povus plezuri rigardi la malbonon kiun oni kaŭzas al aliulo. Kial vi rigardus maliculojn kaj silentus, kiam la malvirtulo turmentas sian proksimulon kiu estas pli justa ol li ?

Ĥabakuko, 1, 13.

Tomo, sidinta funde de aĉa ŝipeto, kun katenoj ĉe la piedoj kaj la manoj, havas sur la koro ŝarĝon pli pezan ol siaj ĉenoj. Ĉio forvelkis en la ĉielo, steloj kaj luno; ĉio fuĝis por ne plu reveni, kiel fuĝas nun la arboj kaj la riverbordoj ĉiuflanke de la rivero. Sia kabano de Kentukio, kun sia edzino, siaj infanoj, sia bona mastrino S^ino^ Ŝelbi, Sanklaro kaj lia belega loĝejo; la ora kapo de Evnjo kaj ŝiaj ĉielaj okuloj; sia juna mastro, tiel fiera, tiel gaja, tiel bela, tiel amema sub liaj senzorgaj eksteraĵoj; la facilaj horoj, la dolĉaj libertempoj, ĉio malaperis ! Kaj kio restas anstataŭe ?

Ĉi tiu estas unu el la plej grandaj mizeroj de sklaveco. La nigrulo kies simpatia naturo facile asimiliĝas kun ĉio kio ĉirkaŭas lin, estas senĉese submetita, post esti vivanta meze de bona familio, kaj esti ĉerpinta el ĝi ian rafinaĵon de gustoj kaj sentoj, por fariĝi la sklavo de la plej kruda, de la plej senkora kampulo. Same kiel seĝo aŭ tablo kiu iam ornamis belegan salonon, finiĝas lama kaj misformita en ia kota fidrinkejo aŭ en ia malbelega malĉastejo. La grandega diferenco estas ke la tablo aŭ la seĝo estas sensentaj, sed ne la viro. Ĉar la laŭleĝa akto kiu deklaras lin "personan posedaĵon", konfiskeblan, vendeblan kaj arbitre servodevan, ne kapablus forpreni de li lian animon kaj ĉion kion ĝi enhavas kiel rememorojn, esperojn, amon, timojn, dezirojn.

S^ro^ Simono Lagrizo aĉetis, en Nov-Orleano, ok sklavojn,

kiujn li kondukis katenitajn ĉe piedoj kaj pugnoj, kunigitajn duope, surŝipe de la vaporŝipo La Pirato, kiu haltadis ĉe la digo, preta por supreniri la Ruĝan Riveron.

Post esti enŝipiginta sian varon kaj forpermesanta la ŝipon, li venis revizii ilin kun la mieno de kruda efikeco kiu karakterizis lin. Li haltis antaŭ Tomo kiu surmetis, pro ordono por ŝajni dum vendado, sian plej bonan vestaĵon el drapo, sian plej blankan tolaĵon, siajn plej purajn botojn, kaj diris al li : "Stariĝu !" Tomo ekstaris. "Forigu tiun kravaton !"

Embarasate de siaj mankatenoj, Tomo malrapide efektivigis la operacion. Lagrizo helpis lin, li krude detiris ĝin de la kolo, kaj metis ĝin en sian poŝon.

Li reiris al la kofro kiun li jam traserĉis, eltiris el ĝi malnovan pantalonon kaj ŝiritan jakon, kiujn utilis al Tomo por la laboro en la stalo. Poste, liberigante al li la manojn, kaj montrante al li per fingro kaŝangulon inter la pakaĵoj :

- Iru tien ŝanĝi la vestojn !

Tomo obeis, kaj revenis post momento.

- Demetu viajn botojn.

Tomo demetis siajn botojn.

- Jen surmetu ĉi tion !

Li ĵetis al li dikan paron da ŝuoj kiel la sklavoj portas.

Feliĉe, malgraŭ sia hasto, Tomo ne forgesis en sia vesto sian karan Biblion; ĉar, post esti denove kateninta al li liajn mankatenojn, S^ro^ Lagrizo komencis la esploron de la poŝoj. Li eltiris el ĝi koltukon, kiun li proprigis al si, kaj kelkajn malgrandajn ludilojn, kompatindajn restaĵojn kiujn Tomo konservis kiel trezoron, ĉar Evnjo amuziĝis kun ili. Lagrizo konsideris ilin kun obtuza grumblo de malestimo, kaj ĵetis ilin trans sian ŝultron al la rivero. Metodista himnaro restis, li prenis la volumon kaj foliumis ĝin.

- Hm ! Ni estas devotaj, laŭ tio kio ŝajnas ! Tial, kiel

oni nomas vin ? Ĉu vi ŝategas la Eklezion ? Ĉu ne ?

- Jes, mastro, firme diris Tomo.

- Mi baldaŭ igos vin faligi ĝin ! Mi tute ne volas ĉe mi negrojn muĝantajn, preĝantajn, psalmantajn, mi avertas vin pri tio. Gardu vin ! Aŭskultu ! *li diris stamfante kaj direktante al Tomo la senindulgan rigardon de siaj grizaj okuloj*, estas mi kiu estas via Eklezio ekde nun ! Vi aŭdas ? Vi estos tia kia mi volos ke vi estu.

La nigrulo restis silenta; sed interne de li io diris ne ! Kaj la paroloj de antikva profetaĵo kiujn Evnjo ofte legis al li, revenis al lia menso, kvazaŭ ripetataj de mistera voĉo.

"Ne timu, ĉar mi elaĉetis vin. Mi vokis vin per via nomo, vi estas mia !"

Simono Lagrizo ne aŭdis la voĉon; neniam li aŭdos ĝin. Li dum minuto rigardis la senkuraĝan vizaĝon de Tomo, poste foriris.

La kofro ankoraŭ enhavis bone provizitan vestaĵaron. Li portis ĝin sur la poba kastelo, kie ĝi estis tuj ĉirkaŭata de parto de la ŝipanaro. La vestaĵoj rapide estis venditaj, al unu, al alia, kun multaj ŝercoj koste de la negroj kiuj volas ŝajni sinjoroj, fine la malplena kofro estis ankaŭ aŭkciita. Tio estis, laŭ ĉiuj, bonega ŝerco, des pli bona ke Tomo spektis la prenon kaj vendon de ĉio kion li posedis. La aŭkcio de la kofro ĉefe ekscitis gajecon kaj bonajn vortojn.

Ĉi tiu eta afero finita, Simono revenis al siaj aĉetaĵoj.

- Nun, Tomo, jen vi liberigita de kroma pakaĵo, komprenu ! Zorgu pri viaj vestoj; dum longe vi ne havos aliajn. Mi strebas zorgigi la negrojn. Necesas ke , ĉe mi, ilia vestaro daŭru almenaŭ unu jaron.

Li alproksimiĝis al la loko kie sidis Emelina, ĉenita al alia virino.

- Nu ! Infaneto, li diris pasigante al ŝi la manon sub la mentonon, tenu vin kun gaja koro !

La nevola esprimo de hororo, de timego, kiun esprimis la vizaĝo de la juna knabino rigardante lin, tute ne eskapis al li. Li kruele sulkigis la brovojn.

- Ne da viaj afektadoj, knabino ! Zorgu aspekti ridanta kiam mi parolas al vi, ĉu vi aŭdas ? Kaj vi, maljuna makakino, kun koloro de luno, *li diris puŝante per la pugno la mulatinon al kiu Emelina estis ligita*, ne kuraĝu montri al mi tiun tristan vizaĝon ! Aranĝu vin por havi pli viglan mienon, mi konsilas tion al vi.

- Mi diras tion al ĉiuj, *li retroiris de unu aŭ du paŝoj*, bone rigardu min ! Rigardu min nun, en la okulon, vidalvide ! *li diris stamfante ĉe ĉiu paŭzo*.

Ĉiuj okuloj, kvazaŭ ensorĉataj, fiksiĝis al la brila kaj verdeta okulo de Simono.

- Nun, *li diris fermante sian dikan kaj pezan manon en formo de forĝmartelo*, ĉu vi vidas ĉi tiun pugnon ? Pesu ĝin ! Kaj li faligis ĝin sur la manon de Tomo. Rigardu al mi ĉi tiujn ostojn !... Nu, mi deklaras al vi ke ĉi tiu pugno fariĝis tiel malmola kiel fero por faligi negrojn ! Mi ankoraŭ ne vidis unu kiun mi ne povis tuj teren faligi. *Li venigis tiun timindan pugnon tiel proksime al la vizaĝo de Tomo, ke tiu ĉi sulkigis la brovojn kaj retropaŝis iomete*. Mi ne perdas mian monon por pagi viajn malbenitajn laborestrojn; mi mem estras; kaj mi havas okulon kaj manon. Do vi devos nur tuj imiti, rapide kaj rekte konduti tuj kiam mi parolos. Ĉi tiu estas la sola rimedo por vi sukcesi. Vi ne trovos eĉ unu tiklan punkton en mia tuta persono; ne, ne unu. Tial gardu vin ! ĉar mi estas senkompata !

La virinoj retenis sian spiron, kaj la tuta bando restis fulmobatita. Simono sin turnis sur la kalkano, kaj iris servigi al si glason da rumo servita en la drinkejo.

- Ĉi tiu estas mia maniero komenci kun miaj negroj, *li diris sin direktante al viro kun distingita ŝajno, kiu ĉeestis*

lian paroladon. Mi havas kiel sistemon komenci per la plej impresa, por ke ili sciu kie oni staras.

- Vere ! *diris la fremdulo rigardante lin kun la scivolo de naturscienciston kiu studas kelkan maloftan specimenon*.

- Jes, vere. Mi tute ne estas el viaj ĝentlemanoj plantistoj, kun glataj fingroj, kiuj sin lasas konduki kaj trompi de kelka maljuna vulpa laborestro ! Nur palpu miajn ĉarnirojn; *kaj li prezentis siajn artikojn por ekzameno*. Rigardu de mi tiun pugnon ! Prefere vidu, ĉu la karno ne fariĝis kiel ŝtono, per multe da bataladoj kontraŭ la negroj. Palpu ! Palpu !

La fremdulo fingropinte tuŝis la timigan ilon, kaj diris simple : " *Tre malmola. Mi supozas*, li aldonis, *ke la spertiĝo igis vian koron almenaŭ same malmola ?*"

- Jes, mi flatas min pri tio, *diris Simono kun dika rido*. Mi ne kredas ke pri tio iu povu superi min. Ne estas da jeremiadoj aŭ karesaĵoj de negroj kiuj stumbligas min eĉ iomete; tio estas fakto.

- Vi tie havas belan aron.

- Belan kaj bonan, diris Simono. Estas iu Tomo, kiun ili diris al mi esti malofta afero. Mi pagis por li iom kosta, ĉar mi volas fari lin gardiston, specon de ekonomo. Tuj kiam li estos liberigita de la malsaĝaj ideoj kiujn li akiris vidante sin traktata kiel negroj neniam devas esti, li treege taŭgos ! Koncerne la flava virino, mi estas trompita. Mi kredas ŝin malsana; sed mi aranĝos min por reakiri tion kio ŝi kostis al mi. Estus mirindege se ŝi ne daŭrus unu aŭ du jarojn ! Mi ne zorgas domaĝi la negron, mi. Uzu kaj aĉetu, tio estas mia maksimo. Tio kaŭzas multe malpli da turmentoj, kaj resume mi certas ke estas ŝparado; *kaj Simono trinketis sian rumon*.

- Kiom longe ili ĝenerale daŭras ? demandis la fremdulo.

- Vere, mi ne scias; tio estas laŭ ilia kompleksio. La plej fortikaj iras de ses ĝis sep jaroj; la plej malfortikaj estas

elĉerpitaj post du aŭ tri jaroj. Komence, mi baraktis kiel diablo por provi daŭrigi ilin. Tio estis kuraciloj kiam ili estis malsanaj, kovriloj, vestaĵoj, tuta ekscitiĝo por teni ilin iomete purajn. Nu, tio tute ne utilis, mi perdis amason da mono, sen kalkuli mian penon. Nune, komprenu, mi laboriigas ilin malsanaj aŭ bonfartaj. Kiam negro krevas, mi aĉetas alian; kaj finfine, tio estas pli malmultekosta kaj pli facila.

La fremdulo malproksimiĝis, kaj iris sidiĝi apud sinjoron kiu aŭskultis la konversacion kun evidenta maltrankvilo.

- Necesas ne rigardi ĉi tiu viro kiel specimeno de la plantistoj de la Sudo, diris ĉi lasta.

- Mi esperas ke ne, emfaze rebatis la junulo.

- Li estas malŝatinda, sovaĝa, kruda, malnobla !

- Tamen viaj leĝoj permesas al li teni nedifinitan nombron da homaj estuloj submetitaj al lian absolutan volon, sen ombro de protekto. Kaj, tiel malnobla kiel li estas, vi ne povas nei ke li ne estas la sola el sia speco.

- Troviĝas ankaŭ inter la plantistoj, humanaj kaj moderaj viroj.

- Mi konsentas tion; sed laŭ mi, vi ja, humanaj kaj moderaj homoj, vi respondecas pri ĉiuj bestaĵoj, pri ĉiu malbono kiun faras ĉi tiuj malŝatinduloj. Sen via sankcio kaj via influo, la sistemo ne eltenus unu horon. Se, kiel plantistoj, estus nur homoj tiaj kia ĉi tiu viro, *li diris montrante per la fingro Lagrizo*[n] *kiu turnis al ili la dorson*, la afero memstare kolapsus. Estas via konsidero, estas via humaneco kiu rajtigas kaj protektas lian barbarecon.

- Vi ĉiuokaze havas altan opinion pri mia senafekteco, *diris la plantisto ridetante;* sed mi konsilas al vi ne paroli tiel laŭte, ĉar estas surŝipe homoj kiuj ne estus tute tiel toleremaj kiel mi. Vi pli bone farus atendi nian alvenon en mian plantejon. Tien vi povos insulti nin ĉiujn, laŭ via plaĉo.

La junulo ruĝiĝis kaj ridetis; ambaŭ komencis ludi

triktrakon. Dume, alia konversacio okazis ĉe la kontraŭa fino de la ŝipo, inter Emelina kaj la mulatino ĉenita kun ŝi. Ili kompreneble interŝanĝis kelkajn detalojn pri sia historio.

- Al kiu vi estis ? demandis Emelina.

- Al S^ro Eliaso. Ĝi esti la nomo de mia mastro. Li loĝi en la strato de la Levo. Eble vi vidi la domon ?

- Ĉu li estis bona por vi ?

- Sufiĉe bone, antaŭ ol malsaniĝi. Sed li esti kuŝinta dum preskaŭ ses monatoj; lia farto jen boniĝi, jen malboniĝi, kaj li esti terure malfacila. Li ne voli ke ni dormi aŭ nokte aŭ tage, tio kolerigi lin. Li aranĝiĝi kun neniu, kaj li ĉiam plimalboniĝi. Mi resti stare noktojn kaj noktojn; mi ne plu kapabli teni min vekita; kaj ĉar mi iufoje endormiĝi, li tre koleriĝi ! Li diri ke li certe vendi min al la plej malica mastro kiun li povi trovi. Li tamen promesi al mi ke mi havi mian liberecon post lia morto.

- Ĉu vi havis parencojn ? rekomencis Emelina.

- Jes, mia edzo; li esti forĝisto. La mastro luigi lin eksteren. Ili forpreni min tiel rapide ke mi ne havi tempon por vidi lin. Kaj mi havi kvar etajn infanojn. Ho ! Disinjoro, Disinjoro ! *diris la virino kovrante al si la vizaĝon per la manoj.*

Estas natura sento en ĉiuj, aŭdante doloran rakonton, serĉi kelkajn konsolajn parolojn. Emelina volintus diri ion, sed ŝi nenion trovis… Pri kio ŝi povintus paroli ? Ambaŭ, kvazaŭ per komuna akordiĝo, evitis kun teruro la plej etan aludon al la horora viro kiu fariĝis ilia mastro.

Eĉ en la plej mallumaj horoj, la religia fido restas en ni. Membro de la metodista eklezio, la mulatino havis malmulte kleran piecon, sed sinceran. Emelina multe pli superis ŝin per inteligenteco; ŝi lernis legi, skribi, kaj klera kaj pia mastrino instruis al ŝi la verajĵojn de la Biblio. Sed ĉu ne estas tre severa travivaĵo por la kredo de la plej firma kristano sin

senti ŝajne forlasita de Dio, en la povo de senkompata perforto ? Kiel la fido de ĉi tiuj malriĉuloj, de ĉi tiuj "subuloj" de Kristo, sensciaj, malfortaj, junaj, povus malcedi sub tio ?

La ŝipo kontraŭflue iris, kun sia peza kargo da angoro kaj doloro, tra la ŝlima kaj malklara fluo kiu serpentas tra la abruptaj sinuoj de la Ruĝa Rivero. Kaj malĝojaj kaj lacaj okuloj rigardadis la ruĝetan argilon de la krutaj riverbordoj, kiuj etendiĝis en enuiga monotoneco. Fine la ŝipo haltis antaŭ malgranda urbo, kie alteriĝis Lagrizo kaj lia viva kargo.

33. La Eksteraj Mallumoj.

La tero estas kovrita de densa mallumo kaj plena de nestoj de perforto. Ps 74, versiklo 20.

Sin trenante malantaŭ kruda ĉaro, sur ankoraŭ pli kruda vojo, Tomo kaj liaj kunuloj pene antaŭenpaŝadis.

En la ĉaro sidis Simono Lagrizo, kaj en la malantaŭo la du virinoj, ankoraŭ kune katenitaj, estis stivitaj kun la pakaĵoj. La tuta trupoj iris al la plantejo de Lagrizo, situanta je kelka distanco.

La vojo estas sovaĝa, senhoma. Foje ĝi turniĝadas tra tiuj dezertaj solejoj kiujn oni nomas *barrens*[34], kie la vento ĝemas kaj malgaje fajfas en la branĉoj de la pinoj; foje, sur vicigitaj trunkoj, malebena ŝoseo, ĝi transiras senfinajn spongecajn marĉejojn, punktitajn de cipresoj. La malgajiga arbo, girlandita de funebraj nigraj muskoj, spirale kreskas en la marĉo. De tempo al tempo la marĉa vipero[35] aperas, volvanta per siaj naŭzaj kurbiĝoj la vermoboritajn stumpojn kaj branĉojn kiuj putris en la ŝlimo.

Morna, eĉ antaŭ la okuloj de la vojaĝanto kiu, kun sia poŝo bone provizita, iras kaj reiras sur bona ĉevalo, celante kelkan aferon, la regiono estas multe pli sovaĝa kaj terura por malfeliĉaj sklavoj kiujn ĉiu paŝo forigas de ĉio kion ili amas, de ĉio kio ĉarmis ilian vivon.

Tio estis facile legebla sur tiuj senkuraĝaj kaj malserenaj fizionomioj, en tiuj doloraj, paciencaj rigardoj, malgaje ligitaj al ĉiu objekto kiu fuĝis ambaŭflanke de la vojo.

34 Vorto elprenita de la angla originalo kaj kiu signifus "senvegetaĵejojn".
35 En la angla originalo estas "mocassin snake", en Eo, laŭvorte, estus "mokasena serpento"

Simono ja vojaĝis pli gaje, ĉerpanta de tempo al tempo pliigon da vigleco en la flakono da rumo kiun li ofte eltiris el sia poŝo.

- Hola, he ! Homoj, *li kriis sin turnante kaj ĵetante ekrigardon al malfeliĉuloj kiuj sekvis lin*, kanton, ĉu ne ? Nu, fiuloj miaj, ek do !

La homoj rigardis unu la alian. La "nu" estis ripetita, kaj Simono klakigis la vipon kiun li tenis en mano. Tomo provis kanti metodistan himnon.

Jerusalemo, ho mia patrujo !
Nomo tiel kara, nomo tiel respektata !
En miaj doloroj al vi mi krias,
Plorpetante vian feliĉegon !...

- Kvietiĝu ! Ĉu vi silentos, damnita negro ! rekomencis Lagrizo. Kion mi povas fari per viaj inferaj metodistaj blekadoj ? Ke oni ekkantu al mi ion viglan ! Nu, kaj rapide !

Unu el la homoj komencis iun el tiuj sensignifaj kantoj, kiuj estas uzataj inter la sklavoj.

Esti vera lavurso[13] kiun mi preni,
He hi ! He ho ! He hi ! Ho ha !
Mastro al mi, jen ke li ridegi.
Kion do vi fari tie, knabo mia ?
He hi ! He ho ! La luno
Sin montri en la nebulo!
Ho ! Ho ! Aj ! Hola la !
Ho jo ! He hi ! Ho ha !

La kantisto ŝajnis improvizi laŭ sia fantazio, prenante hazarde rimon tie kaj tie, sen alimaniere zorgi pri signifo kaj kialo. La tuta bando ĥore repetis intermite :

Ho ! Ho ! Aj ! Hola la !
Ho jo ! He hi ! Ho ha !

Tio estis impetege kantata, kun bruaj klopodoj por sin montri gajaj. Sed neniam plendindaj ĝemadoj, neniam

akcentoj de doloro, neniam fervoraj preĝoj povintus atingi la korŝiran, malesperan esprimon de la sovaĝaj notoj de ĉi tiu rekantaĵo. Estis kvazaŭ ĉi tiuj kompatindaj mutaj animoj, minacataj, malliberigitaj, rifuĝantaj en la sanktejon de la harmonio, sin turnis al neklaraj sonoj, melodia lingvaĵo, por ellasi siajn preĝojn al Dio ! Preĝoj kiujn Simono ne povis kompreni. Li aŭdis la viglecon de la voĉoj de la sklavoj; li estis tre kontenta. Li igis ilin "konservi la spiritostaton".

- Nu, eta karulino, *li diris, sin turnante al Emelina kaj etendante sian malglatan manon sur la veluran ŝultron de la juna knabino*, jen ni preskaŭ alvenantaj ĉe la loĝejo !

La kolerkrioj kaj furiozo de Lagrizo teruris la kompatindan Emelinan; sed kiam li metis la manon sur ŝi, kiel li ĵus faris, prenante kaĵoleman tonon, ŝi milfoje preferintus ke li frapus ŝin. La esprimo en liaj okuloj svenigis ŝin, kaj ŝi sentis sin tremeti en sia karno. Nekonscie ŝi alkroĉiĝis al la mulatino sida apud si, kvazaŭ ŝi estus ŝia patrino.

- Vi neniam surmetis pendaĵojn, ĉu ne ? *li diris fingrumante per siaj krudaj fingroj ŝian delikatan oreleton.*

- Ne, mastro, *respondis Emelina tremanta kaj kun la okulojn mallevintaj.*

- Nu, mi donos al vi paron tuj kiam ni estos hejmen, se vi estas bona knabino, kompreneble. Nu ! Ne timu, mi ne metos vin al krudaj laboroj, sciu ! Vi amuziĝos kun mi; vi vere vivos kiel reĝino ! Kondiĉe ke vi estu bona knabino !

Lagrizo drinkis ĝis tia grado kiu emis lin fariĝi gracia; kaj la alproksimiĝo al la plantejo, kies la ĉirkaŭmuro komencis aperi, finis bone inklinigi lin. La proprietaĵo unue apartenis al altedevena, riĉa kaj gustoplena viro, kiu metis multan monon al ornamadoj kaj al plibonigoj; sed li mortis nesolventa, kaj Lagrizo iĝis akiranto, vidante en ĝi, kiel en ĉio alia, nur plian rimedon gajni monon. La loĝejo havis tiun malgajan aspekton de forlasiteco, de malordo, kutima sekvo de la rezigno pri la

planoj de unua posedanto.

Tio kio iam estis deklivo de razita kaj glata gazono antaŭ la fasado, herbobedo ornamita tie kaj tie de florbedoj kaj arbedoj, fariĝis nur senkultivejo, kie stariĝis de loko al loko fostoj por alligi bestojn. Tute ĉirkaŭe, la herboj estis tretitaj, kaj la nudigita tero estis kovrita de malnovaj kuvoj, de rompitaj siteloj kaj aliaj ruboj. Duonmorta jasmeno, velkinta kaprifolio, ankoraŭ pendiĝis de kelkaj kolonetoj, negravaj difektitaj ornamaĵoj, ne plu vertikalaj, pro esti uzinta kiel palisetoj por alligi la ĉevalojn. Tra la amaso da herbaĉoj, sub kiuj la ĝardeno estis kaŝata, montriĝis malgranda nombro da ekzotaj plantoj, pli vivemaj ol la aliaj, kiuj ŝajnis protesti kontraŭ ilia forlasado. Tio kio estis forcejo, nun sen kaj vitroj kaj framoj, dismontris sur la restaĵoj de la ŝtuparoj, kelkajn florpotojn ornamitajn de vergetoj kies la velkintaj foliaro atestis ke iam la bastonetoj estis plantoj.

La ĉaro ruliĝis sur aleo de ŝtonkovro intermiksita de herbaĉoj, sub nobla avenuo ombrita de ĉinaj arboj, kies graciaj formoj kaj ĉiamverda foliaro ŝajnis prosperi solaj meze de universala dekadenco; kiel lojaleco, boneco, enradikiĝintaj en grandaj kaj noblaj animoj, floras kaj firmiĝas meze de suferoj kaj senkuraĝiĝoj.

La domo, kiu estis bela kaj vasta, estis konstruita laŭ sufiĉe ordinara plano en la ŝtatoj de Sudo. Verando, laŭ du etaĝoj (la unua, subtenata de pilieroj el brikoj), ĉirkaŭis la konstruaĵon, kaj ĉiu ĉambro iris al tiuj ĉi larĝaj galerioj. Sed ĉie regis la sama aspekto de difektado kaj neglekto. Kelkaj fenestroj estis ŝtopitaj de tabuloj; la vitroj de aliaj estis rompitaj; la ŝutroj pendis de la muregoj, retenataj de unu sola kardino. Neglekto kaj forlasiteco frapis la okulojn de ĉiuj flankoj.

La tereno estis dissternita de ĉiaj rubaĵoj : lignaĵo,

pajlo, enrompitaj barelegoj, dispecigitaj kestoj. Tri aŭ kvar kruelaj buldogoj, ekscitataj de la bruo de la radoj, alkuris kun larĝe malfermitaj faŭkoj, kaj la klopodoj de malgranda nombro de sklavoj en ĉifonaĵo kiuj sekvis ilin, apenaŭ sufiĉis por malebligi ilin sin ĵeti sur la bandon al kiu Tomo apartenis.

- Ĉu vi vidas, fiuloj miaj ? *kriis Lagrizo sin turnante al ili, karesante siajn hundojn kun naŭza kontentiĝo*, vi vidas tion kio atendas vin, se vi ekhavos la deziregon forkuri ! Tiuj bonaj gardistoj, sciu tion, estas dresitaj por ĉasi negron, kaj frandus unu el vi kiel la plej bona vespermanĝo. Tial gardu vian haŭton !

Nu ! Tembo, *li diris al iu nigrulo kovrita de vestaĉoj, kies la ĉapelo estis tute malprovizita de rando, kaj kiu sin montris tre trorespekta ĉirkaŭ li;* kiel la aferoj iris ĉi tie ? Ĉu ?

- Rave, mastro.

- Kimbo ! *kriis Lagrizo al alia kiu fervore gestadis por altiri lian atenton*, ĉu oni faris tion kion mi diris ?

- Neniu danĝero ke ni manki tion, mastro !

Ĉi tiuj du viroj estis la ĉefaj laboristoj de Lagrizo sur lia plantejo, kaj li sisteme trejnis ilin al sovaĝeco, al krueleco, kiel siaj buldogoj, kun kiuj ili povus konkuri pri sovaĝeco. La rimarko, sufiĉe ĝenerala, ke la nigrula komandoro estas pli tirana kaj pli kruela ol la blankula, simple signifas ke unu estis pli fiigita, pli mistraktita ol la alia. Ne gravas la koloro aŭ la raso, iu ajn sklavo estos la plej malbona el tiranoj, tuj kiam li havos la ŝancon esti tia.

Kiel kelkaj el la potenculoj kies ni legas la rakonton, Lagrizo dividis kaj regi. Tembo kaj Kimbo kore malamis unu la alian; ĉiuj sklavoj de la plantejo abomenis ilin, kaj stimulante la reciprokajn denuncojn, la mastro certis esti, tiel aŭ alie, informita pri ĉio kio intrigis ĉirkaŭ li.

Kiu kapablus plene rezigni pri la tuta socio ? Neniu. Lagrizo mem kuraĝigis ĉe ĉi tiuj ĉefaj nigraj satelitoj, ian

familiarecon, kiu facile fariĝis kaptilo; ĉar pro la plej malgrava provoko, la mastro bezonis nur signon, kaj unu el la du fariĝis la instrumento de siaj venĝoj super la alia.

Tie, antaŭ la mastro, iliaj krudaj kaj malnoblaj trajtoj, ilia malgaja mieno, iliaj rigardoj de envio kaj malamo kiujn ili interŝanĝis ruligante larĝajn pupilojn, la vestaĉoj kiujn la vento flirtigis ĉirkaŭ ili, ilia malklera lingvaĵo, iliaj gorĝan intonacioj malnobligis ilin eĉ sub la bestoj. Kaj ilia aspekto estis en perfekta harmonio kun la fia mizerego de la loko kie ili loĝis.

- Ĉi tie, Tembo ! Konduku por mi tiujn knabegojn al la barakaro. Ĉu mi ne promesis al vi aĉeti por vi edzinon ? Jen ŝi, prenu ! *li aldonis, kaj apartigante Emelina*^{n} *de la mulatino, li puŝis ĉi-lastan al la negro*.

La virino ektremis, kaj retropaŝis ekkriante :

- Ho! mastro, mi lasi mian edzon en Nov-Orleano !

- Kion vi ja kantas al mi ! Vi havos alian ĉi tie. Ne tiom da paroloj, kaj paŝu ! diris Lagrizo levante sian vipon. Venu tien, amorantino, li daŭrigis sin turnante al Emelina; estas ĉi tie, kun mi. Nu, eniru do !

Sovaĝa kaj malgaja vizaĝo ĵetanta ekrigardon tra unu el la fenestroj, aperis kaj elŝteliĝis, kaj kiam Lagrizo malfermis la pordon, virina voĉo diris kelkajn vortojn per seka kaj postulema tono. Tomo, kies la rigardo plena de malsereneco sekvis Emelina^{n}, rimarkis tion, kaj aŭdis la mastron respondi :

- Bridu vian langon, vi; mi faros laŭ mia plaĉo, ĉu tio konvenas al vi aŭ ne !

Tomo ne aŭdis pli, ĉar necesis al li sekvi Tembo^{n} al la sklava barakaro, speco de mallarĝa strato inter du vicoj de krudaj kabanoj, en parto de la plantejo malproksima de la ĉefa domo. Ĉiuj ŝajnis kadukaj kaj mizeraj. La koro de Tomo malfortiĝis rigardante ilin. Li iomete kuraĝigis sin pensante ke li havus sian kabanon, sendube krudan, kuŝejon,

sed ke li povus purigi, trankvila, kie li metus breton por sia Biblio, kaj kie li trovus pacan izolejon dum la intertempoj de la laboro. Li esploris per la okulo interne de pluraj el tiuj ĉi loĝejaĉoj, ne estis aliaĵo, neprovizita de ĉia meblaro, kie nur troviĝis amaso da makulita pajlo, malpura pajlaĵo disĵetita sur la nuda grundo, tretita, malmoligita de sennombraj paŝadoj.

- Kiu el la kabanoj esti por mi ? li demandis al Tembo per humila tono.

- Ne scii; tien, eble esti ankoraŭ loko por unu, diris Tembo, ĉi tie por alia. Tamen esti ĉimomente granda amaso de negroj en ĉiu nun. Ververe, se aliaj plie veni, ne esti mi kiu scii kion fari per ili !

Estis plena vespero kiam aperis la loĝantoj de la kabanoj, lacega grego, viroj kaj virinoj duone kovritaj de naŭzaj ĉifonoj, malĝojaj, malafablaj, malbone inklinaj al la akceptado de la novevenintojn. La sonoj kiuj tiam vigligis la kompatindan vilaĝon, tute ne estis agrablaj. Krudaj, raŭkaj kaj gorĝaj voĉoj kverelis pri la manmueliloj kiuj devis mueli la malgrandan provizon da tritikoj, sur kiu kuŝis la espero de ĉies vespermanĝo. Ekde tagiĝo, ili estis sur la kampo, ĉe la laborejo, laborante, rapidante, sub la vipo de la laborestroj; ĉar ni estis en la ĉefsezono, kaj nenio estis ŝparita por akiri de ĉiu mano ĉion kio povis esti akirita. "*Ba ! diros la senokupa pigrulo, finfine pluki kotonon ne estas peniga laboro !*" Vere, ĉu ne ? Ankaŭ ne estas penige ricevi guton da akvo sur la frunton; kaj tamen la plej kruela torturo kiun la inkvizicio povis trudi, estis ĉi tiuj gutoj senĉese falantaj, unu post la alia, ĉiam sur la saman lokon. La plej bagatela laboro, se ĝi estas devigata, urĝigata, postulata kun senindulga unuformeco, fariĝas la plej malfacila el la laboroj, ĉefe se neniu libera ekzercado de la volo mildigas la seninteresan monotonecon de ĝi.

Tomo, laŭmezure kiam la homamaso alvenis, vane ekzamenis ĉiujn tiujn malgajajn vizaĝojn, serĉante simpatian fizionomion. Li vidis nur trolacigitajn kaj malafablajn virojn, nur senkuraĝigitajn, duonsvenantajn virinojn, aŭ kiuj estis virinoj nur laŭ nomo. La fortulo forpuŝis la malfortulon; ĉie sin montris senvuale la kruda, besta egoismo de geestuloj de kiuj oni povis nenion atendi, nenion bonan esperi. Traktataj kiel la bruto, ili atingis ĝian nivelon. La laŭta knarado de la manmueliloj daŭris tre malfrue en la nokto; ĉar estis multe da malsatuloj, la mueliloj estis malabundaj, kaj la malfortuloj, la elĉerpituloj, forpelitaj de la fortuloj, alvenis nur laste.

- He ! Hola ! Vi ! *diris Tembo ĵetante sakon da tritikoj al la piedoj de la mulatino*, kiu esti via malbenita nomo ?

- Lucia, ŝi respondis.

- Nu, Lucia, jen vi mia edzino. Iri mueli por mi mian tritikon kaj kuiri mian vespermanĝon, ĉu vi aŭdi ?

- Mi ne esti, mi ne voli esti via edzino, diris la mulatino kun la impeto de la malespero, lasi min !

- Mi trakti vin, ja ! diris Tembo kaj li levis minacan piedon.

- Vi povi mortigi min, se vi voli ! Plej frue esti plej bone. Ho ! Mi voli esti mortinta ! ŝi ekkriis.

- Mi diri, Tembo, ke vi baldaŭ difekti niajn manojn. Mi, ne prokrasti sciigi mastron, ĉu vi kompreni ? *grumblis Kimbo profitante de la muelilo de kie li krude forpelis du aŭ tri malfortajn estulojn, kiuj atendis tie por pretigi sian tritikon.*

- Kaj mi ja diri al li ke vi eĉ ne lasi la virinojn alproksimiĝi de la muelilo ! Ĉu vi aŭdi, maljuna negro ! reparolis Tembo. Enmiksi vin pri tio kio koncerni vin.

Tomo, post esti paŝinta dum la tuta tago, malsatmortante, sentis sin malfortiĝi pro manko de nutrado.

- Por vi, kriis Kimbo, *ĵetante al li krudan sakon kiu povis*

enteni ĉirkaŭ naŭ litrojn da tritikoj. Ekpreni tion, negro, kaj atenti pri ĝi ! Ŝpari; ĝi esti la porcio de via semajno.

Tomo trovis lokon ĉe la mueliloj nur je tre malfrua horo de la nokto, kaj kortuŝita de la ekstrema mizerego de du kompatindaj virinoj al kiuj mankis forto, li komencis mueli por ili, revigligis la duonestingitajn brulaĵojn de fajro, kie multaj aliaj bakis unue siajn panojn, kaj zorgis poste nur pri sian propran vespermanĝon. Tio estis tre nova, tre stranga afero en ĉi tiu loko, kaj la malgrava ago de kompatemo vekis vibradon en tiuj paralizitaj animoj. Amema esprimo lumigis iliajn vizaĝojn; ili knedis lian panon, priatentis la kuiradon; kaj Tomo, kaŭrinta apud la fajro, profitis la lumon por legi kelkajn vortojn el sia Biblio. Li tiom bezonis da konsolo !

- Kio tio esti ? demandis unu el la virinoj.

- Iu Biblio, respondis Tomo.

- Disinjoro, mi eĉ ne vidi unu ekde kiam mi forlasi Kentuk !

- Ĉu vi do esti edukita en Kentuk ?

- Jes, kaj bone edukita, kaj ankaŭ flegita, *rekomencis la virino suspirante*; mi ne povi antaŭvidi travivi ĉi tion !

- Kaj kio esti ĉi tiu libro ? demandis la dua virino.

- Kiel ? Sed ĝi esti la Biblio.

- He Disinjoro ! Kion ke ĝi diri, la Biblio ?

- Tion kion ĝi diri ? Ĉu vi scii tute nenion pri ĝi ? *diris la alia virino*. Ho ! Mastrino kelkfoje legi ĝin al mi en Kentuk. Sed, ve ! Koncerne ĉi tie, ni aŭdi nenion krom mensogojn kaj blasfemojn.

- Legi al ni peceton, *reparolis scivoleme post momento la unua virino, vidante kiom Tomo estis absorbita en sia libro*.

Tomo legis : "*Venu al Mi, vi ĉiuj kiuj estas laboregantaj kaj ŝarĝitaj, kaj mi donos al vi ripozon*" *(Mateo 11,28)*.

- Tioj esti bonaj vortoj, aprobis la virino; sed kiu do diri ilin ?

- Disinjoro, rebatis Tomo.

- Mi voli scii nur kie li esti ! Mi rapidege iri tien. Ŝajni neniam plu eble ripozi nun. Ostoj kaj karno ne plu elteni. Mi tremi de ĉie. Tembo boji kontraŭ mi dum la tutan tagon, ĉar mi ne iri sufiĉe rapide por pluki. Esti plena nokto, kaj post noktomezo antaŭ ol mi prepari mian kompatindan manĝon. Kaj mi nur apenaŭ etenĝi kaj fermi la okulojn ke jen la korneto kiu soni, kaj jen la mateno, kaj jen ni necesi rekomenci. Ha ! Kiel mi vere iri diri al li ĉion ĉi, al Disinjoro, se mi scii kien trovi lin !

- Li esti ĉi tie, li esti ĉie, rekomencis Tomo.

- Mizero ! Ne esti al mi ke vi kredigi ke li esti ĉi tie ! Ne esti Disinjoro ĉi tie, tute ne, tute ne, diris la virino. Sed por kio utili paroli ! Mi iri kampi sur la grundo, kaj dormi dum mi povi.

La virinoj iris al siaj kabanoj, kaj Tomo restis sola apud la duonestingita fajro, kiu lumigis per ruĝa rebrilo lian nigran vizaĝon. La trankvila luno, kun arĝenta frunto, desegniĝis en la bluo de la ĉielo. Kaj kvieta, senpasia, kiel la rigardo kiun Dio faligas de supre sur scenoj de mizero kaj premado, la silenta lumeto malsupreniris sur la kompatindan nigrulon, forlasita, sola, sida, kun la brakoj krucitaj, kaj la Biblio sur la genuoj.

"Ĉu do Dio estas ĉi tie ?" Ho ! Kiel la malkleruloj gardos sian fidon senŝanĝa ? Kiel li ne ŝanceliĝos vidante la malordon kaj la maljustecon kiuj regas senkontrole ? La lukto kiu estiĝas en ĉi tiu naiva animo, estas korŝira. Tomo sin sentas neniigita en la ĉeesto de la absoluta triumfo de la malbono. Ĝi estas nekvalifikebla angoro; ĝi estas antaŭsento de senlima mizero; ĝi estas la elruiniĝo de ĉiuj pasintaj esperoj kiujn liaj tumultaj rememoroj ruligas antaŭ li, kiel furiozaj ondoj balancas sub la okulon de la mortanta ŝiprompulo, la senvivajn kadavrojn de lia edzino, de liaj

infanoj, de ĉio kio estis kara al li. Ho ! Kiel estas malfacile kredi kaj sin alkroĉi kun neŝancelebla fervoro al la granda instrukcio de la kristano : "*Dio estas tiu kiu estas, tiu kiu rekompencas tiujn kiuj serĉas lin kaj ne laciĝas*".

Tomo ekstaris malespere kaj iris stumblante en la kabanon kiu estis atribuita al li, la planko jam estis kovrita de dormantoj premitaj de laceco, kaj la fetoraj odoroj preskaŭ retropaŝigis lin. Sed la nokta roso estis malsaneca kaj frosta, liaj lacaj membroj rigidiĝis, li envolvis sin en ĉifonan kovrilon kiu formis lian tutan liton, kuŝiĝis sur la pajlo kaj ekdormis.

Tiam milda voĉo flustris al lia orelo. Li estis sidinta sur la muska seĝo ĉe la bordo de la lago Ponĉetrejn. Evnjo, kun siaj mildaj kaj seriozaj okuloj mallevitaj al la libro, legis al li la Biblion, kaj li aŭdis ĉi tiujn parolojn :

- Kiam vi transiros akvojn, mi estos kun vi; kaj kiam vi transiros riveregojn, ili ne dronigos vin. Kiam vi paŝos en fajron, vi tute ne estos brulvundita, kaj la flamo tute ne ekbruligos vin, ĉar Mi estas Disignoro, via Dio, la Sanktulo de Izraelo, via Savanto *(Jesaja 43,2-3)*.

La vortoj iom post iom ŝajnis dissolviĝi en la aero kaj leviĝi kiel ĉiela muziko. La infano relevis siajn grandajn okulojn, kaj fikis al Tomo kun amo sian profundan kaj dolĉan rigardon, de kiu eliris varmaj kaj vivigantaj radioj kiuj venis radiigi al li la koron. Ŝi ŝajnis ŝvebi kun la sonoj, duone portata de ili. Subite ŝi etendis blankajn flugilojn, de kiuj pluvis brilaj fajreroj, oraj flokoj, pluvego da steloj. Poste, Evnjo malaperis.

Tomo vekiĝis; ĉu ĝi estis sonĝo ? Estu. Sed kiu diros tion ke, al ĉi tiu milda, juna spirito, penetrita dum ŝia vivo de tiel arda deziro por mildigi, por konsoli la malfeliĉulon, kiu diros ke Dio malpermesis post ŝia morto ĉi tiun dian servadon ?

Dolĉa kaj konsola kredo,
Ke ĉirkaŭ la kuŝejo kie vi dormas
Ŝvebu, silente flirtu,
La honorataj spiritoj de la mortintoj.

34. Vidu la larmojn de tiuj kiujn oni subpremas…

…kaj kiuj ricevas nenian konsolon.

Predikanto 4, 1.

Tomo baldaŭ kutimiĝis al ĉio kion oni povis esperi aŭ timi pri lia nova vivmaniero. Lerta kaj sperta laboristo, li plie estis rapida kaj fidela, pro kutimo kaj pro principo. En sia paca temperamento, li esperis, per multe da diligenteco kaj da fervoro, antaŭgardi sin, almenaŭ parte, de la malbonoj de sia situacio. Li vidis ĉirkaŭ si sufiĉe da sufero kaj mizero por havi koron afliktita. Sed li promesis al si labori kun religia pacienco kaj fidi al Tiu kiu juĝas en sia justeco, nutrante neklaran esperon ke savrimedo povus ankoraŭ esti proponita.

Lagrizo silente rimarkis la kapablecon de Tomo. Li konsideris lin kiel manlaboriston el la plej profitaj. Sed li sentis rilate al li sekretan malinklinon, la naturan antipation de la malbonulo kontraŭ la bonulo. Li klare vidis ke ĉiufoje kiam lia perforto kaj lia krudeco falis sur la malfortulon, Tomo rimarkis tion. La etoso de opinio estas tiel subtila, ke ĝi sentiĝas sen paroloj, kaj ke eĉ la silenta penso de sklavo povas lacigi la mastron. Tomo diversmaniere montris koran tenerecon plenan de kompato kiu, stranga kaj nova por liaj samsuferantoj, estis observita de Lagrizo per ĵaluza okulo. Aĉetante Tomo[n], li intencis poste fari de li specon de skipestro al kiu li povus kelkafoje konfidi siajn aferojn, dum mallongaj forestoj. Laŭ lia vidpunkto, la unua, dua kaj tria postulata kondiĉo por ĉi tiu posteno estis la harditeco. Lagrizo, tute ne trovante en Tomo ĉi tiun esencan kvaliton, decidis doni ĝin al li. Kaj malmulte da semajnoj post lia

alveno sur la plantejo, li komencis la procezon.

Iun matenon, ĉe la momento kiam la sklavoj estis forirontaj al la kampoj, Tomo surprizite rimarkis inter ili novevenintinon, kies aspekto altiris lian atenton. Ŝi estis alta, svelta virino kun deca kaj pura vestoaranĝo. Ŝiaj manoj kaj piedoj estis el ekstrema delikateco. Juĝante laŭ ŝiaj trajtoj, ŝi povis aĝi de tridek kvin ĝis kvardek jaroj. Ŝia vizaĝo estis el tia kiu, iam vidata, ne forgesiĝas, el tia kiu, je la unua ekrigardo, vekas en ni la ideon de dolora, stranga, romantika destino. Ŝi havis la frunton alta kaj la brovojn desegnitajn kun malofta pureco. Ŝia nazo, rekta kaj bone formita, ŝia buŝo fajne konturita, la gracia konturo de ŝia kapo kaj de ŝia kolo, montris, ke ŝi certe estis tre bela. Sed ŝia vizaĝo estis profunde sulkiĝinta, spuroj de sufero eltenita kun orgojlo kaj amareco. Ŝi havis flavan kaj malsanan vizaĝkoloron, kaviĝintajn vangojn, akrajn trajtojn, kaj la tutan korpon el timiga malgraseco. Ŝiaj okuloj ĉefe estis rimarkindaj, tiel grandaj, tiel nigraj, tiel senĝojaj, ombrataj de longaj okulharoj ankaŭ obskuraj; okuloj kun esprimo de malespero tiel profunda, tiel terura ! Estis en ĉiu streko de ŝia kapo, en ĉiu kurbiĝo de ŝia tremetanta lipo, en ĉiuj ŝiaj movoj, fiera kaj sovaĝa defio. Sed la angora nokto ŝajnis esti densigita en ŝia okulo, ĉi tiu rigardo senbrila, fiksa, senespera formis teruran kontraston kun la ribelo kaj la disdegno, kiujn esprimis ŝia tuta personeco.

De kie ŝi venis ? Kiu ŝi estis ? Tomo ne sciis tion. Li vidis ŝin por la unua fojo, paŝante apud ŝi, rekta kaj fiera, en la grizeca lumeto de la krepusko. La cetero de la bando tamen konis ŝin, ĉar pluraj sin turnis kaj rigardis ŝin, kaj inter la mizeraj ĉifonuloj, duonmalsataj, kiuj ĉirkaŭis ŝin, estis speco de triumfo, duone sufokita, duone malkaŝita.

- Jen ŝi alvenita finfine ! Mi ĝoji tion ! diris unu el ili.

- Hi, hi, hi, daŭrigis alia. Vi ankaŭ senti tion, la

sinjorinon. Vi sperti la bonon kiun tio fari.

- Ni vidi ŝin labori !

- Mi miri ĉu ŝi esti batata ĉi vespere, kiel ni ĉiuj !

- Mi esti plenkontenta vidi ŝin kuŝitan surteren por esti vipata. Jes, vere ! Mi esti kontenta !

La virino ne atentis pri ĉi tiuj atakparoloj, kaj daŭre paŝis kun sia malhumila kaj malestima mieno, kvazaŭ ŝi aŭdis nenion. Tomo, kiu ĉiam vivis inter distingitaj homoj, instinkte sentis, per ŝia sinteno, per ŝia aspekto, ke ŝi apartenis al supera klaso. Sed kial, kiel ŝi falis en ĉi tiun malnobligan staton ? Tion li ne povis diri. Ŝi nek rigardis lin nek parolis al li, kvankam paŝanta apud li dum la tuta vojiro de la loĝejo al la kampoj.

Tomo baldaŭ absorbiĝis en sia laboro; sed la virino troviĝanta ne for de li, li de tempo al tempo ekrigardis al ŝi. Li vidis per unu vido ke denaska lerteco plifaciligis al ŝi la taskon ol al la aliaj. Ŝi plukis la kotonon tre rapide kaj tre ĝuste, kun malestima mieno, kvazaŭ ŝi malestimus tian laboron kaj la humiligon kiu estis trudata al ŝi.

En ĉi tago, Tomo laboris apud la mulatino aĉetita en la sama aro kiel li. Ŝi evidente estis tre malsaneta; li aŭdis ŝin preĝi, dum ŝi ŝanceliĝis kaj tremis, preta sveni. Tomo alproksimiĝis al ŝi, kaj sen diri ion transpasigis plurajn plenmanojn da kotono el sia sako en la korbon de la kompatinda estulino.

- Ho ! Ne, ne, ekkriis la tute surprizita virino; ne fari tion ! Okazi al vi malagrablaĵoj.

Ĉe la sama momento Tembo ekaperis. Li ŝajnis havi apartan rankoron kontraŭ la virino. Li klakigis sian vipon, kaj diris per gorĝa tono, "*Kion vi fari ĉi tie, Lucia ? Vi fraŭdi, ĉu ne ?*" Samtempe li donis baton per sia peza leda ŝuo al la malfeliĉulino, kaj travipis la vizaĝon de Tomo.

Ĉi tiu silente rekomencis sian taskon; sed la virino,

atinginte la lastan gradon de elĉerpiĝo, svenis.

- Mi certe rekonsciigi ŝin ! diris la vokto kun kruela rideto. Mi doni al ŝi pli bone ol kamforon ! *Li prenis pinglon de la maniko de sia jako kaj enpuŝis ĝin ĝis la kapo en la karnon*. La virino ĝemis kaj duone leviĝis.

- Leviĝi tute, besto ! Kaj labori, alie mi montri al vi aliajn lertaĵojn de mia metio.

La virino, tiel spronita, reakiris dum kelkaj momentoj supernaturan viglecon, kaj, kun malespera strebo, relaboris.

- Zorgi ne senvigliĝi, daŭrigis la viro, alie vi deziri vian morton ĉi vespere. Mi nur diri tion al vi.

- Mi voli esti mortinta ! murmuris la virino. *Tomo aŭdis tion. Ŝi ankaŭ diris :* "Ho Disinjoro ! Kial ne veni helpi nin ?"

Riskante tion kio povis rezulti, Tomo denove alproksimiĝis, kaj metis la tutan kotonon el sia sako en la korbon de la virino.

- Ho, ne necesi ! Vi ne scii tion kion ili fari al vi ! ŝi diris.

- Mi povi pli bone elteni tion ol vi, *rekomencis Tomo kaj li revenis al sia loko. Estis afero de sekundo*.

Subite la fremdulino kiun ni priskribis, kaj kiu, dum sia laboro, alvenis sufiĉe proksima por aŭdi la lastajn parolojn de Tomo, levis al li siajn grandajn nigrajn kaj malgajajn okulojn; poste, preninta el sia korbo certan kvanton da kotono, ŝi metis ĝin en la sakon de Tomo.

- Vi konas nenion pri ĉi tiu loko, ŝi diris, alie vi ne tiel agus. Kiam vi travivos ĉi tie dum unu monato, vi finos helpi kiun ajn ! Vi havos sufiĉe da malfacilaĵoj por savi vian haŭton !

- Disinjoro antaŭgardi min, mastrino ! *diris Tomo instinkte donante al sia kunlaborantino la respektan titolon kiun li antaŭe uzis por la superaj homoj, inter kiuj li vivis*.

- Disinjoro neniam vizitis ĉi tiujn lokojn, *amare diris la*

virino, dum ŝi energie daŭrigis sian taskon. Kaj la sama malestima rideto denove fermis ŝiajn lipojn.

Sed, ĉe la alia flanko de la kampo, la laborestro vidis ŝin. Li alkuris kun la vipo levita :

- Kiel ? Kiel ? li triumfe diris; vi ankaŭ permesi al vi fraŭdi, vi ? Antaŭeniri unu paŝon ! Vi nun esti sub mia mano, atentigi, alie mi vipofrapi vin.

Frakasa fulmo eliris el la grandaj nigraj okuloj. Ŝi sin turnis kun la lipo tremetanta, la naztruoj dilatitaj kaj sin rektigante ĝis sia plena alteco, ŝi fiksis al la gardisto rigardojn fulmajn pro kolero kaj malestimo : "Hundo ! ŝi diris, tuŝu min se vi kuraĝas ! Mi ankoraŭ havas sufiĉe da potenco por disŝirigi vin de la hundoj, bruligi vin vivan aŭ hakigi vin colon post colo. Mi devas nur diri unu vorton !"

- Kial diable vi esti ĉi tie, tiuokaze ? *diris la viro konsternita kaj nubmiene retiriĝanta.* Mi celi nenian malbonon al vi, Fraŭlino Kasiso!

- Tiam, gardu vin malproksime ! *diris la virino. La viro ŝajnis tute preta por tio ĉar, ŝajnigante esti necesa ĉe la alian finon de la kampo, li forrapidis kiel eble plej rapide.*

Ŝi revenis al laboro, kaj hastigis ĝin kun aktiveco kiu mirigis Tomoⁿ. Ŝi laboris kiel magie. La tago ne finiĝis, ke ŝia korbo estis plena, dense plenplena, kvankam ŝi plurfoje malavare partigis kun Tomo. Longe post la noktiĝo, la lacaj laboristoj, portantaj siajn korbojn sur siaj kapoj, defilis por iri al la konstruaĵo kie estis farita la pesado kaj la stokado de la kotono. Lagrizo jam estis tie, en grava konversacio kun siaj du laborestroj.

- Ĉi tiu Tomo doni al ni multajn turmentojn, Tembo diris. Ĉu li ne enmeti de sia kotono en la korbon de Lucia ! Jen iu kapabla korupti ĉiujn negrojn kaj kredigi ilin ke ili esti mistraktataj, se mastro ne havi okulon sur li.

- Ha ! Jes ja ! La malbenita negro ! diris Lagrizo. Li

bezonas ke ni ĝisfunde rompu lin, ĉu ne, knaboj ?

La du negroj grimacis kun aĉa rido.

- Jes Jes ! Lasi majstron Lagrizoⁿ fari ! Li ja rompi lin ! La diablo mem ne kapabli venki mastron pri tio ! diris Kimbo.

- Nu, infanoj, la plej bona maniero por komenci estas taski lin vipi la aliajn, ĝis kiam li regos super siaj ideoj, tio ekzercos lin !

- Disinjoro ! Mastro peni atingi tion de li !

- Necesos al li sukcesi, vole nevole, diris Lagrizo ruligante en sia buŝo tabakmaĉaĵon.

- Ankaŭ esti ĉi tiu Lucia, daŭrigis Tembo, la plej malbela, la plej neeltenebla el la tuta bando.

- Gardu vin, Tembo ! Mi komencas suspekti la kialon de via malamo kontraŭ Lucia.

- La mastro bone scii ke ŝi sin teni firme kontraŭ li, kaj ke ŝi neniam voli min, kiam li diri al ŝi ke ŝi edziniĝi kun mi.

- Mi certe povintus devigi ŝin per la vipo, se ne estus la premo sur la laboro, diris Lagrizo kraĉante; tio ne indas nune skui ŝin. Plie, ŝi ne estas forta; kaj ĉi tiuj magraj knabinoj lasas sin mortigi pli ol duone por agi laŭ sia kapo !

- Nu, Lucia esti diable mallaborema kaj ĉiam kaŝema ! Ŝi tute intenci fari nenion, kaj esti Tomo kiu pluki por ŝi.

- Ah ! Li helpis ŝin, ĉu ne ? Nu, Tomo havos la plezuron vipi ŝin. Tio estos bonega ekzercado por li kaj li indulgos la knabinon; li ne forte bategos kiel vi, demonoj !

Ho ! Ho ! Ha ! Ha ! Ha ! *ridis la du malŝatinduloj; kaj la diablaj sonoj certigis la demonan karakteron kiun rekonis en ili la mastro.*

- Sed Tomo kaj Fraŭlino Kasiso, mastro, ambaŭ plenigi la korbon de Lucia. Mi veti ke esti pli ol la pezo, mastro !

- Mi faros la pesadon, diris emfaze Lagrizo.

La du laborestroj eligis la saman inferan ridon.

- Do, daŭrigis Lagrizo, Fraŭlino Kasiso plenumis sian

taskon ?

- Ŝi pluki kiel la diablo kaj ĉiuj liaj anĝeloj !

- Ŝi estas regata de ili ĉiuj, mi kredas ! *grumblis Lagrizo kun senkora sakraĵo, kaj li ekiris al la peza ĉambro.*

La malfeliĉaj geestuloj, elĉerpitaj, senkuraĝaj, malrapide pasas unu post la alia, kaj prezentas kun teruro siajn korbojn.

Lagrizo notas la pezon sur ardezo rilate al la nomlisto.

La korbo de Tomo estis pesita kaj aprobita. Li angore atendas la sukceson de la virino kiun li helpis.

Ŝanceliĝante pro malforteco, ŝi alproksimiĝis. Ŝia korbo havas pli ol la bezonatan pezon: Lagrizo rimarkas tion, sed li ekkrias kun ŝajniga kolero : "*Kio ! pigra besto ! Ankoraŭ ĉi-foje mankas al vi. Iru flanken ! Vi ricevos vian regaladon post momento*".

La virino eligis malesperan ĝemadon kaj falis sur benkon.

Tiu kiun ni nomis Fraŭlino Kasiso, siavice antaŭenpaŝis; dum ŝi donis sian korbon kun fiera kaj senzorga mieno, Lagrizo ĵetis en ŝiajn larĝajn okulojn ironian kaj demandeman rigardon.

Ŝi fikse rigardis lin, ŝiaj lipoj moviĝis, kaj ŝi diris kelkajn francajn vortojn. Neniu komprenis; sed la vizaĝo de Lagrizo estigis satanan esprimon. Li duone levis la manon kvazaŭ por frapi ŝin. Ŝi ne ektimis, konsideris lin dum momento kun senindulga malestimo, kaj turnante al li la dorson, ŝi foriris.

- Nun pri ni du, Tomo ! diris Lagrizo, proksimiĝu. Mi jam sciigis vin ke mi ne aĉetis vin por fari la komunan laboron. Mi pretendas doni al vi promocion kaj fari vin laborestron. Ekde ĉi-vespere, vi ektrejnos la manon. Kaptu tiun knabinon tien, kaj vipu ŝin ! Vi vidis sufiĉe por scii kiel fari tion.

- Mi peti pardonon de mastro, diris Tomo, sed mi esperi ke mastro ne meti min al ĉi tiu tasko. Mi tute ne kutimi kun tio. Mi neniam fari tion, kaj ne kapabli fari tion. Tio ne ebli.

- Vi havos multe da aferoj por lerni ke vi ne scias, antaŭ ol mi finos kun vi ! *diris Lagrizo. Li prenis bovtendenon kaj frapis lin per ĝi tra la vangoj. Ĉi tiu unua bato estis sekvata de hajlo da aliaj.* Nu ! *li diris, ĉesante por reakiri la spiron;* ĉu vi ankoraŭ diros al mi ke vi ne kapablus fari tion ?

- Jes, mastro, *reparolis Tomo, dum per la mandorso, li viŝis la sangon kiu fluetis laŭlonge de sia vizaĝo.* Mi esti tute preta labori nokte kaj tage, labori tiel longe esti en mi spireto de vivo. Sed, koncerne tion kion mi kredi ne bona, mi ne fari tion. Mi neniam fari tion, mastro, neniam !

La milda voĉo de Tomo, liaj kutime respektoplenaj manieroj kredigis al Lagrizo, ke li estus malkuraĝa kaj facila por subpremi . Kiam li eldiris ĉi tiujn lastajn parolojn, ektremo de teruro trakuris inter la ĉeestantoj. La kompatinda virino kunpremis la manojn kaj ekkriis : "*Ho Disinjoro !*" Ĉiuj nevole sin rigardis reciproke, kaj retenis sian spiron atendante la fulmotondron kiu estis eksplodonta.

Lagrizo estis mirega, konsternita; fine lia kolerego elmontriĝis.

- Kiel ! Malbenita nigra besto ! Vi kuraĝas diri al mi ke vi kredas ne bone fari tion kion mi ordonas al vi ! Kion vi havas por maltrankviligi vin ja, malbenita brutaro, pri tio kio estas bona ? Mi tuj ĉesigos tion ! Kio vi do kredas esti ? Vi imagas vin esti sinjoro, mastro Tomo, ke vi volas pretendi al via mastro kaj instrui al li tion kio estas bona kaj tion kio ne estas tia ! Tiel vi asertas ke estas malbone vipi ĉi tiun knabinon ?

- Mi kredi tion , mastro, rebatis Tomo. La kompatinda estulino esti malforta kaj malsana; tio esti nura krueleco, kaj tion mi neniam fari; mi ne eĉ komenci. Mastro, se vi voli

mortigi min, mortigu min; sed pri levi manon kontraŭ iu ĉi tie, mi neniam fari tion, mi morti antaŭe.

Tomo parolis kun kvieto kiu lasis nenian dubon pri la firmeco de lia decido. Lagrizo tremis pro furiozo; liaj verdetaj okuloj fulmetis per sovaĝa fajro, kaj la hararo de lia barbo hirtiĝis pro kolero. Sed kiel kruelega besto kiu ludas kun sia predo antaŭ ol formanĝi ĝin, li metis bridon al sian koleregon kaj plezuriĝis per amaraj pikparoloj.

- Nu, jen, mi esperas, pia hundo finfine liberlasita inter ni pekuloj ! Sanktulo, ĝentlemano, ne malpli ol tio, por prediki al ni pri niaj pekoj ! Kian miraklon de sanktulo tio faras ! Venu, kanajlo, kiu ŝajnigas esti devotulo, ĉu vi ne scias ke estas en la Biblio : "*Servistoj, obeu al viaj mastroj !*" Ĉu mi ne estas via mastro ? Ĉu mi ne pagis mil ducent dolarojn *(aktuale ±24.000€)*, per bona metala mono, por ĉio kio estas en via malbenita nigra ostaro ? Ĉu vi ne estas al mi, korpo kaj animo ? *li diris, sovaĝe piedbatante Tomo*^{n} *per sia peza boto*. Respondu !

Enigita en abismon de fizika suferado, faligita per sovaĝa premego, Tomo, pri ĉi tiu peto, sentis ĝoja kaj triumfa radio trairi sian animon. Li subite restariĝis, kaj arde kontemplanta la ĉielon, tra la sango kaj la larmoj kiuj miksiĝis sur lia vizaĝo, li ekkriis :

- Ne, ne, ne, ! Mia animo ne esti via, mastro ! Vi ne aĉeti ĝin, vi ne povi aĉeti ĝin ! Ĝi esti elaĉetita kaj pagita de Tiu kiu havi potencon por konservi ĝin ! Ne gravi la cetero ! Vi ne kapabli malbonfari al mi.

- Ha ! Ĉu mi ne kapablas tion ? diris Lagrizo kun malbelega muĝo. Ni tuj vidos ! Ĉi tie, Tembo ! Kimbo ! Donu por mi al ĉi tiu hundo draŝadon de kiu li ne resaniĝos dum unu monato !

La du gigantaj negroj kiuj tiam ekkaptis Tomo^{n}, kun demona ĝojo, ŝajnis veraj fipartianoj de Satano. La

kompatinda mulatino eligis krion de teruro, kaj ĉiuj, kvazaŭ per ĝenerala impulso, ekstaris, ĉe la momento kiam Tomo, kiu kontraŭmetis nenian reziston, estis trenita ekster la ĉambro de siaj turmentistoj.

35. La Potenco estas flanke de la Subpremantoj.

Tial mi pli estimas la mortintojn kiuj jam mortis
ol la vivantojn kiuj ankoraŭ vivas.
Predikanto 4, 2.

La nokto progresis, kaj Tomo, ĝemanta kaj sanganta, kuŝis sola sur la grundo, sub ia hangaro samlima kun la staplejo, inter pecoj de rompitaj maŝinoj, stakoj da difektita kotono kaj aliaj disrompitaĵoj tie amasigitaj pro neglekto kaj tempo.

La nokto estis ŝvitiga, sufoka; la densa aero entenis svarmon da moskitoj, kies kruelaj mordoj ankoraŭ pliakrigis la senĉesan doloron de liaj vundoj. Brula soifo, la plej netolerebla el ĉiuj torturoj, plenigis la mezuron de liaj fizikaj doloroj.

- Ho bona Disinjoro ! Mallevi viajn rigardojn ! Doni venkon al via servanto; doni al li venkon en liaj provadoj ! *preĝis la kompatinda Tomo en sia angoro.*

Paŝado sonis malantaŭ li; la lumo de lanterno subite blindigis lin.

- Kiu estio ĉi tie ? Ho ! Por la amo de la Savanto, iom da akvo ! Kasiso, *ĉar estis ŝi.*

Ŝi teren metis sian lanternon, verŝis akvon el botelo, levis la kapon de Tomo kaj trinkigis lin. Li malplenigis la unuan glason, poste la duan, kun la sama febra ardo.

- Trinku je via soifo, *ŝi diris.* Mi anticipe sciis tion kio ĝi estus. Ne estas la unua fojo ke mi eliras nokte por alporti akvon al kompatinduloj kiel vi.

- Dankon, mastrino, diris Tomo, kiam li estis trinkinta.

- Ne nomu min mastrino, *ŝi amarece interrompis lin.* Mi estas nur mizera sklavo kiel vi, pli senhonorigita ol vi iam ajn

povus esti. Sed, *ŝi daŭrigis alproksimiĝante al la pordo, kaj enen tirante malgrandan pajloliton kiun ŝi kovris per tukoj trempitaj en malvarma akvo*, provu, mia kompatinda knabo, ruligi vin sur ĝin.

Rigida kaj dolorigita pro vundoj kaj kontuzoj, Tomo malrapide realigis ĉi tiun moviĝon; sed kiam li sukcesis, tiu malvarmeteco tuj sentigis al li senseblan kvietiĝon.

La virino, kiun longa praktikado apud viktimoj de sovaĝeco lertigis pri la arto resanigi, utiligis ĉiujn siajn zorgojn al Tomo, kaj li fartis pli bone.

- Nun, ŝi diris post esti metinta lian kapon sur pako de difektita kotono kiel kolbaskuseno, jen, mi kredas, ĉio kion mi povas fari por vi.

Tomo dankis ŝin; ŝi sidiĝis sur la grundo, ĉirkaŭigis siajn genuojn per siaj du brakoj kaj fikse rigardis antaŭ si, kun amara kaj dolora esprimo. Ŝia pajla ĉapelo falis, kaj la longaj ondaj fluoj de ŝia nigra hararo falante enkadrigis ŝian strangan kaj melankolian vizaĝon.

- Estas vana peno, kompatinda knabo mia ! *ŝi fine diris;* ne utilas provi tion kion vi provis. Vi estis kuraĝa, vi havis rajton por vi; sed, kredu min, lukti estas senutila kaj nediskutebla. Vi estas en la ungegoj de la diablo, li estas la plej forta; necesas cedi.

Cedi ! Bedaŭrinde ! Ĉu la homa malkuraĝo, fizika senhelpeco ne jam flustris tion al li ? Tomo ektremis, ĉar ĉi tiu virino, kun sia amara akcento, siaj sovaĝaj okuloj, sia dolora voĉo, aperis al li kiel la enkarniĝinta tento kontraŭ kiu li baraktis dum la tuta tago.

- Ho Disinjoro ! Ho Disinjoro ! li ĝemis. Kiel mi cedus ?

- Por kio utilas alvoki Disinjoron ? Li ne aŭdas, *diris firme la virino*. Ne estas Dio, mi ne kredas; aŭ se Li estas, Li decidiĝis kontraŭ ni. Kontraŭ ni, ĉio interligiĝas, ĉielo kaj tero. Ĉio pelas nin al infero. Kial ni ne iros tien ?

Ĉe ĉi tiuj sendiaj kaj funebraj paromoj, Tomo fermis la okulojn kaj tremetis.

- Vi vidas tion, *ŝi daŭrigis*, vi scias nenion pri ĉi tie; sed mi scias. Ĉi tie, dum kvin jaroj, mi estis piedpremata, korpo kaj animo, sub la piedo de ĉi tiu viro, kaj mi malamas lin kiel mi malamas Satanon ! Ĉi tie, vi estas sur izolita plantejo, dek mejlojn *(+/-16Km)* for de ĉiuj aliaj, meze de marĉoj. Ne unu blankulo por atesti, ĉu oni bruligas vin vivan, ĉu oni brogas vin, ĉu oni dispecigas vin, ĉu oni ĵetas vin kiel nutraĵon al hundoj, ĉu oni pendigas vin post esti elvipinta vin. Ĉi tie neniu dia aŭ homa leĝo kiu povu protekti vin, vin aŭ iun ajn el ni. Kaj li, ĉi tiu viro, ne estas indignindaĵo sur la tero pri kiu li ne kapablas. Mi povus starigi la harojn sur la kapo, kunbatigi la dentojn de la plej kuraĝaj, se mi nur dirus tion kion mi vidis, tion kion mi sciis ĉi tie. Kaj nenia kontraŭstaro eblas ! Ĉu mi volis vivi kun li ? Ĉu mi ne estis virino delikate edukita ? Kaj li, boneco de la ĉielo ! kio li estis, kaj kio li estas ? Kaj tamen mi vivis kun li dum ĉi tiuj kvin jaroj, malbenante ĉiun horon de mia vivo, nokte kaj tage. Nun li akiris novan estulinon, apenaŭ dekkvinjaran infanon. Ŝi, ŝi diris, estis pie edukita. Bona mastrino instruis ŝin por legi la Biblion, kaj ŝi alportis sian Biblion kun si, en ĉi tiun inferon !

Kaj la virino eksplodis per ekridego funebra kaj akrasona, kies sono eĥis sub la malnova ronĝita hangaro kiel la eĥo de alia mondo.

Tomo kunigis la manojn; ĉio estis hororo kaj mallumo.

- Ho Jesuo ! Sinjoro Jesuo ! Ĉu vi tute forlasi viajn kompatindajn geestulojn ? li ekkriis. Helpon, Disinjoro, mi sinki !

La virino daŭrigis per severa voĉo.

- Kaj kio estas la mizeraj dormantaj hundoj, viaj kunlaborantoj ? Ĉu ili meritas ke vi suferu pro ili ? Ne unu kiu, por la plej malgranda gajno, sin turnis kontraŭ vin ! Ili

ĉiuj estas, unu rilate al la alia, sendankaj, kruelaj, senmoraligataj. Kial martirigi vin profite al ili ?

- Kompatindaj homoj ! *diris Tomo;* kiu krueligi ilin ? Se mi cedi unu fojon, mi alkutimiĝi, kaj iom post iom mi hardiĝi kiel ili ! Ne! Ne, mastrino ! Mi perdi ĉion, edzinon, infanojn, kabanon kaj bonan mastron kiu liberigi min se li vivi unu semajnon pli. Mi perdi ĉion en ĉi tiu mondo, por ĉiam, por eterne. Nun mi ne povi ankaŭ perdi la ĉielon ! Ne, mi ne voli fariĝi kruela !

- Sed Disinjoro ne povas imputi tion al ni kiel krimon, *diris la virino*. Ĉu oni ne cedigis nian volon ? Li postulos konton pri tio de niaj persekutantoj !

- Jes, *diris Tomo*, sed tio ne malhelpi nin krueliĝi. Se mi iam fariĝi tiel senkora, tiel hardita kiel Tembo, la maniero per kiu mi atingi tion ne fari grandan diferencon. Esti fariĝi malbone, esti tio kiu timigas min.

La virino fiksis al Tomo siajn konfuzitajn kaj malhelajn okulojn, kvazaŭ nova penso trafis ŝin. Ŝi eligis obtuzan ĝemon kaj ekkriis : "*Ho kompaton ! Vi diras veron ! Ho ! Ho ! Ho !*" Kaj ŝi falis sur la grundon, kun plorĝemoj kiel premegita homo, tordiĝante pro troo da moralaj suferoj.

Estis silento, dum kiu iliaj spiroj aŭdiĝis, poste Tomo mallaŭte diris : "*Ho ! Bonvoli, mastrino ?*"

La virino ekstaris; ŝia vizaĝo reakiris sian kutiman esprimon, amara kaj malgaja.

- Bonvoli, mastrino, mi vidi ilin ĵeti mian jakon en tiun angulon tien, kaj en la poŝo de mia jako troviĝas mia Biblio. Se mastrino bonvoli atingi ĝin por mi ?

Kasiso serĉis en la poŝo kaj eltiris el ĝi la libron. Tomo tuj malfermis ĝin al markita kaj tre eluzita paĝo. Estis la lastaj scenoj en la vivo de Tiu kies vundoj resanigis nin.

- Se mastrino esti tiel bona por legi al mi ĉi tiun ekstrakton al mi, ĝi ankoraŭ pli bone efiki ol akvo.

Kasiso ekprenis la libron kun orgojla kaj indiferenta mieno kaj trarigardis la paĝon. Poste ŝi legis per milda kaj sonora voĉo, kun rimarkinda precizeco de intonacio, ĉi tiun kortuŝan rakonton pri gloro kaj angoro. Ofte, legante, ŝia voĉo aliiĝis kaj tute mankis al ŝi. Tiam ŝi haltis, aranĝis sian vizaĝon ĝis kiam ŝi tute sin regis. Kiam ŝi alvenis al ĉi tiuj vortoj : "*Patro mia, pardonu ilin, ĉar ili ne scias tion kion ili faras*" (*Luko 23, 34*). Ŝi demetis la libron teren, kaj kaŝante sian vizaĝon en la dikaj amasoj de siaj haroj, ŝi tute laŭte plorsingultis kun spasma vigleco.

Tomo ankaŭ ploris kaj murmuris sufokitan preĝon.

- Se ni nur povi fari kiel li ! *li suspiris*. Kiam ni pensi ke tio ŝajni tiel nature al li, kaj ni, ni bezoni tiel forte batali ! Ho Savanto, helpi nin ! Ho ! Helpi nin, benita Sinjoro Jesuo !

- Mastrino, *diris Tomo post momento*, mi bone vidi ke vi esti tre super mi pri ĉio; sed esti iu afero kiun vi povi lerni eĉ de kompatinda Tomo. Vi diri ke Disinjoro decidiĝi kontraŭ ni, ĉar Li lasi nin esti insultataj kaj batataj; sed vidi tion kio okazi al sia propra Filo, la benita Sinjoro de gloro ! Ĉu Li ne ĉiam esti malriĉa ? Kaj ĉu iu el ni malleviĝi tiel malalte kiel Li ? Disinjoro ne forgesi nin, mi estas kiel certa pri tio ! Se ni suferi kun li, ni ankaŭ poste reĝi, la Skribo diri tion. Sed se ni fornei Lin, Li ankaŭ fornei nin. Ĉu ili ĉiuj ne suferi, Disinjoro kaj la siaj ? Ĉu la libro ne diri ke ili esti ŝtonumitaj kaj segitaj tra la korpomezo; ke ili iri laŭ la vojoj, vestitaj de kapraj feloj, persekutitaj, humiligitaj, torturitaj. La suferoj, tio ne esti kialoj por pensigi ke Disinjoro forturni sian vizaĝon de ni; sed ĝuste la malo, kondiĉe ke ni teni firme al li kaj ne cedi al peko.

- Sed kial Li metas nin tie kie ni ne povas malebligi nin peki ? *diris la virino*.

- Mi pensi ke ni povi ĉiam malebligi nin peki.

- Vi vidos ! *reparolis Kasiso*. Kion vi faros morgaŭ ? Ili

denove torturos vin. Mi konas ilin. Mi ĉeestis al ĉiuj iliaj agoj. Mi ne povas elteni la penson pri tio kion ili faros travivi al vi. Ili finfine cedigos vin !

- Sinjoro Jesuo, *ekkriis Tomo*, mi meti mian animon inter viajn manojn ! Vi antaŭgardi ĝin, ho Disinjoro ! Ne lasi min peki !

- Mi jam aŭdis ĉiujn tiujn kriojn, ĉiujn tiujn preĝojn, *diris Kasiso*, kaj tamen ĉiuj estis rompitaj kaj sklavigitaj. Jen Emelina kiu provas rezisti; ankaŭ vi, vi provas; kial ? Necesos al vi rezigni aŭ morti iom post iom, colo post colo.

- Nu ! Mi morti ! *diris Tomo*. Ke ili daŭrigi la suferon tiel longe kiel ili voli, ili ne malhelpi min finfine morti ! Kaj, poste, ili ne plu povi ion ajn ! Mi esti liberigita ! Mi esti libera ! Mi scii ke Disinjoro helpi min; li konduki min tra la fajrego !

La virino nenion respondis. Ŝi sidiĝis, kun siaj nigraj okuloj atente fiksitaj al la tero.

- Eble tio estas la vojo ! *ŝi flustris*; sed pri tiuj kiuj cedis, ne plu estas espero, ne plu ! Ni vivas en malpureco kaj ŝlimo ĝis kiam ni sentas abomenon pri ni mem ! Ni sopiras morti, kaj ni ne kuraĝas mortigi nin ! Ne plu espero, ne plu espero ! Ĉi tiu infano, ŝi ĝuste havas la aĝon kiun mi havis.

- Rigardu min, ŝi diris, parolante rapide, rigardu, kaj vidu tion kio mi estas ! Nu ! Mi naskiĝis en abundeco. Miaj plej foraj memoroj revenigas min al la belega loĝejo, en kiu mi infano loĝis. Mi tiam estis lukse vestita, la homoj kaj amikoj de la domo superŝutis min per laŭdoj. La fenestroj de la salono malfermiĝis al ĝardeno, kaj estis tie kie mi kaŝludis sub la oranĝujoj, kun miaj gefratoj. Oni metis min en la monaĥinejo. Tie mi lernis muzikon, francan, brodadon, kion mi scias ? Dekkvarjaraĝe, mi eliris el ĝi por ĉeesti al la funebraĵoj de mia patro. Li mortis subite, kaj kiam ili volis vendi liajn nemoveblaĵojn, ili apenaŭ trovis sufiĉe por pagi la

ŝuldojn. La kreditoroj starigis inventaron; mi estis aldonita en ĝi. Mia patrino estis sklavino, kaj mia patro ĉiam intencis malsklavigi min; sed li ne faris tion, kaj mi estis inkluzivita en la liston. Kvankam mi sciis kiu mi estis, mi neniam multe pripensis tion. Kiu estas preta vidi morti vigloplenan homon ? Mia patro mirinde bone fartis kvar horojn antaŭ sia morto. Li estis unu el la unuaj viktimoj de ĥolero en Nov-Orleano. La morgaŭon de la entombigo, lia edzino prenis siajn infanojn kaj foriris kun ili al la plantejo de sia patro. Mi pensis ke oni traktis min laŭ stranga maniero; sed mi ne komprenis kial. Juna advokato, komisiita por organizi la aferojn, venis ĉiutage, trairis la domon kaj respekte parolis kun mi. Iun posttagmezon li alkondukis kun li junulon kiun mi trovis pli bela ol ĉiuj junuloj kiujn mi ankoraŭ vidus. Mi neniam forgesos ĉi tiun vesperon de mia vivo. Mi promenis en la ĝardenoj kun li. Mi estis forlasita, afliktita, kaj li estis tiel bona, tiel tenera kun mi ! Li diris al mi esti vidanta min antaŭ ol mia eniro en la monaĥinejon, kaj esti ĉiam amanta min de tiam. Li promesis esti mia protektanto kaj mia amiko. Mallonge, kvankam li ne diris tion al mi, li pagis por mi du mil dolarojn *(aktuale ±40.000€)*, kaj mi estis lia posedaĵo. Mi memvole fariĝis lia sklavino, ĉar mi amis lin. Mi amis lin, *ripetis la virino haltante*. Ho ! Kiom mi amis ĉi tiun viron ! Kiom mi ankoraŭ amas lin, mi amos lin ĝis mia lasta spiro ! Li estis tiel bela, tiel nobla, tiel alta ! Li metis min en grandiozan domon plenan de sklavoj, de ĉevaloj, de ekipaĵoj; li superŝutis min per tualetoj kaj juveloj. Ĉion kion monon povas fari, li fari tion. Sed mi taksis nenian valoron al liaj donacojn. Mi zorgis nur pri li ! Mi amis lin pli ol mian Dion, pli ol mian animon; kaj eĉ se mi volintus kontraŭstari lin, mia amo ne permesintus tion al mi.

Mi sopiris al nur unu afero, unu sola, fariĝi lia edzino, lia laŭleĝa edzino. Mi pensis ke, se li amus min, kiel li diris tion,

ke se mi estus tio kion li ŝajnis kredi, li edziĝus kun mi kaj malsklavigus min. Sed li konvinkis min ke tio estis neebla; afero. Li certigis al mi ke se ni estus fidelaj unu al la alia, ni estus geedziĝintaj antaŭ Dio. Se ĉi tio estas vera, ĉu mi ne estis la edzino de tiu viro ? Ĉu mi ne estis fidela al li ? Dum sep jaroj, ĉu mi ne studis ĉiun el liaj rigardoj, ĉiun el liaj movoj; ĉu mi ne vivis, spiris nur por li ? Li trafis la flavan febron, kaj dum dudek noktoj mi flegis lin. Mi sola ja donis al li liajn trinkaĵojn kaj senĉese prizorgis lin. Li nomis min sian bonan anĝelon, li dankis min pro savi al li la vivon.
Ni havis du belajn infanojn. La unuenaskito estis knabo; ni nomis lin Heliaso kiel lia patro; li estis lia viva bildo. Li havis la samajn belajn okulojn, la saman frunton, la samajn buklajn harojn; li ankaŭ ricevis de li sian spriton, sian inteligenton, sian fieron. La eta Eliza, li diris, aspektis kiel mi. Li asertis ke mi estis la plej bela virino de Luiziano; li estis tiel fiera pri mi kaj la infanoj ! Li ŝatis vidi min mem elegante vesti ilin, promenigi nin en malkovrita kaleŝo, kolekti kun orgojlo la laŭdojn de la homamaso; li poste plenigis miajn orelojn kaj mian kapon per ili. Tio estis feliĉaj tempoj ! Neniu virino en la mondo (almenaŭ mi tiel opiniis) povis havi pli da feliĉo ol mi; sed tiam alvenos la malbonaj tagoj. Unu el liaj kuzoj venis al Nov-Orleano; intima amiko, pri kiu li opiniis mirindaĵon. Tuj kiam mi vidis lin, mi timis lin sen scii kial. Mi antaŭsentis ke li alportos al ni malbonŝancon. Li eliris kun Heliaso, kaj ĉi lasta ne plu revenis antaŭ la dua aŭ tria matene. Mi ne kuraĝis diri ion, ĉar Heliaso estis fiera, kaj mi timis inciti lin. Ĉi tiu amiko forlogis lin en luddomojn, Heliaso estis unu el tiuj kiuj, enirinte tien, ne plu eliras. Li prezentis lin al alia virino, kaj mi tuj vidis lian amon retiriĝi el mi. Li neniam diras tion al mi, sed mi vidis tion, mi sentis tion tagon post tago. Mia koro rompiĝis sen tio ke mi faris ian riproĉon al li. Tiuepoke la malbenita tentanto proponis al Heliaso

aĉeti min kaj miajn infanojn por kovri liajn ludajn ŝuldojn kiuj malebligis lin edziĝi kiel li deziris, kaj li vendis nin. Iun tagon li diris al mi ke li havis negocojn foren, ke li forestos dum du aŭ tri semajnoj. Li parolis al mi pli tenere ol kutime, kaj asertis ke li revenos. Sed mi ne estis trompita; mi sciis ke la horo estis venanta; mi restis ŝtoniĝinta, mi kapablis nek paroli nek plori. Li kisis min; li plurfoje kisis la infanojn, kaj foriris. Mi vidis lin surĉevaliĝi; mi sekvis lin per la okuloj ĝis kiam li estis tute ekster vidado, kaj tiam mi svenis.
La malŝatindulo, la alia, venis ! li venis por ekposedi. Li diris, esti aĉetinta min kaj miajn infanojn; li montris al mi la rajtigilojn. Mi malbenis lin, kaj diris al li ke mi preferas morti ol vivi kun li.
"Laŭ via plaĉo, li respondis. Se vi ne volas prudentiĝi, mi vendos la du infanojn al loko kie vi neniam plu revidos ilin". Li diris al mi esti deziranta min ekde la tago kiam li vidis min, esti deloginta Heliaso^{n}, ŝuldiginta lin nur por la sola celo decidigi lin vendi min. Li aldonis ke estis li, Butlero, kiu ligis lin kun alia virino, kaj ke mi povis konjekti ke, post tiom da penoj, li ne lasos sin malkuraĝigi per krioj, larmoj kaj aliaj afektadoj.
Mi cedis, ĉar mi havis katenitajn manojn. Li estis la mastro de miaj infanoj, se mi rezistis lian volon pri io ajn, li tuj parolis vendi ilin, kaj tiam mi fariĝis tiel fleksebla, tiel obeema kiel li volis. Ho ! Kia abomena vivo ! Vivi ĉiutage kun rompita koro, konservante mian amon kiu ne plu estis alia ol mizero, kaj ligita, korpon kaj animon, al viro kiun mi abomenis. Mi amis laŭte legi por Heliaso, ludi por li, valsi kun li, kanti por li, kaj ĉiuj ĉi aferoj faritaj por la alia estis por mi abomena torturo. Kaj tamen mi ne kuraĝis rifuzi; li estis kun la infanoj tiel severa, tiel postulema ! Eliza estis timema kaj dolĉa knabineto, sed Heliaso havis la aŭdacan kaj kolereman karakteron de sia patro, kaj neniu iam ajn

ĉagrenis lin. La viro ĉiam provoki lin al disputo, ĉiam trovis lin kulpa, senĉese kverelis kun li; mi vivis en teruro kaj en daŭraj turmentoj. Mi provis igi la knabon respektema, mi provis aparte teni la du infanojn, ĉar mi zorgis pri ili pli ol pri mia vivo, sed ĉiuj miaj penoj helpis nenion. Li vendis ilin ambaŭ ! Iun tagon li faris promenadi min per ĉevalo, kaj kiam mi revenis, ne plu estis infanoj ! Li diris al mi esti vendinta ilin, li montris al mi la monon, la prezon de ilia sango ! Tiam ŝajnis al mi ke ĉio kio restis bona en mi, sinkis. Mi deliris, mi blasfemis, mi malbenis Dion kaj la homojn, kaj mi kredas ke dummomente la malŝatindulo timis min ! Sed li eltenis. Li diris ke miaj infanoj estis venditaj, ke nur li povis igi min revidi ilin, kaj ke se mi ne estus trankvila, ili havos por plendi. Oni povas ĉion ricevi de virino minacante ŝin tra ŝiaj infanoj. Li denove submetiĝis kaj trankviligis min. Li komplezis al mi per la espero ke li eble elaĉetus ilin, kaj tiel pasis, bone-malbone, unu aŭ du semajnoj.
Iam mi promenis, kaj mi pasis antaŭ la pundomo. Mi vidis homamason kolektitan antaŭ la pordo. Mi aŭdis infanan voĉon, subite mia Heliaso baraktante eskapis el la manoj de du aŭ tri viroj kiuj tenis lin. Li pafiĝis kriante miflanke, li pendigis sin sur mi. La viroj kuratakis lin, kun timigaj sakraĵoj. Unu el ili, kies vizaĝon mi neniam forgesos, diris al li ke li ne tiel kvitiĝus, ke li tuj revenigos lin al la pundomo kaj tie sentigos al li leciono kiun li neniam forgesus dum sia vivo. Mi preĝis, mi petegis. Ili ridis pri mi ! La kompatinda infano ĝemis kaj ne deturnis siajn okulojn de mia vizaĝo. Li alkroĉiĝis al mi, ĝis kiam oni rabis lin de mi kun ŝirpeco de mia robo, kaj ili forportis lin… la infanon ankoraŭ kriantan : "*Patrino, patrino, patrino !*" Iu viro, iu gapanto, staranta apud la pordo, ŝajnis kompati min. Mi proponis al li la tutan monon kiun mi havis, por ke li interhelpu. Li kapneis. "*La mastro de la infano certigas nin*, li diris, *ke li ĉiam estis*

malrespekta kaj malobeema, li volas rompi lin unu fojon por ĉiam". Mi fuĝis kurante. Je ĉiu paŝo ŝajnis al mi aŭdi la kriojn de mia filo. Mi eniris en la salonon, senspire. Mi tie trovis Butlero[n]. Mi rakontis al li ĉion; mi petegis lin iri interhelpi. Li ridis, kaj respondis al mi ke la infano ricevis nur tion kion li meritis, ke li tre bezonis esti rompata, kaj ke ju pli frue des pli bone. Kion vi ankoraŭ atendas, li demandis. En ĉi tiu momento ŝajnis al mi senti ion rompiĝi en mia kapo. Mi freneziĝis, mi furioziĝis. Mi havas konfuzan memoron esti vidanta tranĉilon sur la tablo, esti ekprenanta ĝin, esti ĵetanta min al la viro. Poste ĉio nigriĝis; kaj dum semajnoj mi nenion vidis, mi nenion komprenis.
Kiam mi rekonsciiĝis, mi estis en pura ĉambro, sed ne la mia. Maljuna negrulino prizorgis min. Kuracisto vizitis min, kaj oni tre zorgis pri mi. Baldaŭ post, mi eksciis ke Butlero foriris, lasante ordonon vendi min. Tial oni tiel bone traktis min.
Mi tute ne deziris reakiri mian sanon, kaj mi esperis ne resaniĝi. Sed malgraŭ miaj deziroj, la febro forlasis min, mi iom post iom resaniĝis kaj finfine ellitiĝis. Tiam ili devigis min ĉiutage bele vesti min. Viroj venis por fumi cigarojn, rigardi min, pridemandi min kaj diskuti mian prezon. Mi estis tiel malvigla kaj tiel malĝoja ke neniu volis min. Oni minacis min vipi min se mi ne pli gajigus min, kaj se mi ne degnus pli agrabligi min. Fine, iam, venis ĝentlemano nomata Stuarto. Li ŝajnis kompati min. Li divenis ke mi havis premegan pezon sur mia koro; li venis sola vidi min plurfoje, kaj finfine decidigis min konfidi al li mian doloron. Li aĉetis min, kaj promesis kiomeble plej barakti por retrovi miajn infanojn. Li iris al la hotelo kie estis mia Heliaso; oni diris al li ke li estis vendita al plantisto ĉe la rivero de Perloj; ĉi tio estis la lasta novaĵo kiun mi havis de la kompatinda infano. Li ankaŭ malkovris kie estis mia filineto; ŝi apartenis al maljuna

sinjorino. Li ofertis grandegan sumon por ŝi, sed oni rifuzis vendi ŝin al li. Butlero eksciis ke estis por mi ke S^ro Stuarto deziris ŝin, kaj li sciigis min ke mi neniam havos ŝin. La kapitano Stuarto estis bonkora, amema; li posedis belegan plantejon, li alkondukis min tien. Mi havis filon dum ĉi jaro. Ho ! La kompatinda kara etulo, kiom mi amis lin ! Li tiel similis al mia kompatinda Heliaso ! Sed en mia koro, mi fiksis decidon, jes, mi fiksis ĝin, kaj tio estis ne plu eduki infanojn ! Mi premis mian knabeton en miajn brakojn, li havis dek kvin tagojn, mi kisis lin. Mi ploris sur li; poste mi trinkigis lin opion, kaj tenis lin premata kontraŭ mia brusto ĝis kiam li endormiĝis en la morto. Kiom mi bedaŭris lin ! Kiom mi ploris lin ! Oni kredis ke mi erare prenigis al li opion. Neniu suspektis la veron. Ĉi tiu akto estas el la malgranda, nombro el tiuj pri kiuj mi aplaŭdas min. Mi ne pentas pri ĝi; li, almenaŭ, estas ekster sufero. Kion mi povis doni pli bone krom la morto al la kompatinda infano ? Post nelonge, nova ĥolera epidemio forprenis la kapitanon Stuarto^n. Ĉiuj kiuj deziris vivi, mortis; kaj mi, kvankam malsuprenirinta ĝis la pordegoj de la morto, mi transvivis ! Mi denove estis vendita, kaj transpasis de mano al mano ĝis kiam, sulkiĝinta, velkinta, difektita, mi trafis malbonan febron. Tiam ĉi tiu malvirtulo aĉetis min kaj venigis min ĉi tien; kaj mi estas ĉi tie !

La virino haltis. Ŝi rapidigis sian rakonton kun sovaĝa energio, alparolante jen al Tomo, jen al ŝi mem. Tiel vigla kaj tiel entuziasma estis la pasio per kiu ŝi parolis ke, dum momento, Tomo estis senatenta, eĉ pri la doloro de liaj vundoj. Levante sin sur la kubuto, li rigardis ŝin dum, en ŝia febra agitado, ŝi iris kaj reiris, kun ŝiaj longaj nigraj haroj senordaj kaj flirtantaj ĉirkaŭ ŝi.

- Vi diras, *ŝi daŭrigis post paŭzo*, ke ekzistas Dio, Dio kiu mallevas al ni siajn rigardojn, kaj vidas ĉion. Eble tio

estas tiel ? La monaĥinoj kiuj edukis min, ofte parolis al mi pri la Lasta Juĝo, kiam tio kio estas plej kaŝita, taglume ekaperos ! Ĉu tiam ne estos la tempo por venĝo ?
Oni rigardas niajn dolorojn kiel nenion; tiujn de niaj infanoj kiel nenion ! Tio estas ne multe, oni diras. Tamen mi vagis tra la stratoj, portante pezon de doloroj sufiĉe pezan por ke la urbo sinku sub mi ! Mi deziris ke la tegmentoj dispremu min, ke la tero malfermiĝu sub miaj piedoj. Jes, kaj je la horo de la juĝo, mi staros antaŭ Dio, kaj atestos kontraŭ tiuj kiuj ruinigis min, min kaj miajn infanojn, korpon kaj animon ! Kiam mi estis fraŭlino, mi kredis min pia, kaj mi amis preĝi al Dio. Nun mi estas perdita animo, destinita al la demonoj kiuj senĉese turmentas min. Ili pelas min antaŭen ! Kaj mi sentas ke mi faros tion unu el ĉi tiuj tagoj ! *ŝi diris, kun la mano kunpremita kaj minaca, dum ruĝa flamo fulmis en ŝiaj malhelaj pupiloj*. Mi sendos lin kien li meritas iri, kaj laŭ la plej mallonga vojo, unu el ĉi tiuj noktoj, eĉ se poste oni bruligos min vivanta ! *Sovaĝa, hakata rido eĥis tra la dezerta hangaro, kaj finiĝis per spasma plorego. Ŝi ĵetis sin teren, kriante kaj baraktante*.

Post kelkaj sekundoj, ĉi tiu frenezo kvietiĝis; ŝi malrapide stariĝis, kaj ŝajnis reakiri sian memregadon.

- Kion mi povas ankoraŭ fari por vi, kompatinda kunulo mia ? *ŝi diris alproksimiĝante al Tomo*; ĉu mi donus al vi iom da akvo ?

Estis en ŝia voĉo kaj ŝia gesto, kiam ŝi elparolis tiujn malmultajn vortojn, gracian kaj kompatan dolĉecon, kiu strange kontrastis kun ŝia antaŭa amareco.

Tomo trinkis la akvon, kaj rigardis ŝin en la vizaĝo, kortuŝita kaj fervora.

- Ho mastrino, kiel mi voli ke vi iri al Tiu kiu povi doni al vi vivajn akvojn !

- Iri al li ? Kie li estas ? Kiu li estas ?

- Tiu kies morton vi antaŭ momento legi, Disinjoro.

- Mi vidis lian krucon sur la altaro, kiam mi estis junulino, *diris Kasiso kun ŝiaj nigraj okuloj perditaj en malĝoja kaj profunda revado*, sed Li ne estas ĉi tie ! Estas nenio ĉi tie, nur la peko, kaj malrapida, malrapida senesperiĝo ! Ho ! *Ŝi premis la manon sur sian bruston kaj pene spiris, kiel ĝenata de fortega pezo.*

Tomo volintus ankoraŭ paroli; ŝi haltigis lin per trudema gesto.

- Sufiĉe, kompatinda kunulo mia. Provu dormi, se vi kapablas. Ŝi metis akvon permane trafeblan, aranĝis lin sur lia kuŝejo kiel eble plej bone, kaj forlasis la hangaron.

36. La Rememoroj.

Kaj malpezaj foje povas esti la aferoj
Kiuj subite revenigas sur la premita koro
La pezon kiun, por ĉiam, li kredis forpelita;
Tio povas esti sono, kanto, somera aŭ printempa vespero,
Floro, la oceano, kiu, en la surprizita animo,
Venas skui la elektran ĉenon,
kiu envolvas nin per siaj nevideblaj ringoj.
El pilgrimado de Childe Harold *(kanto 4)*.

La salono de la loĝejo de Lagrizo estis vasta ĉambro, ornamita de alta kaj larĝa kameno. Multekosta tapetpapero, kun kontrastaj koloroj, iam dekoraciis ĝin, kaj hodiaŭ sin malgluis de la malsekaj muroj, laŭ ŝirpecoj ŝimaj kaj velkintaj. Naŭza kaj nesalubra odoro, miksaĵo de humideco, polvo kaj putro, odoro propra al malnovaj domoj delonge neloĝataj kaj fermitaj, estis flarebla. Makuloj de biero kaj vino malpurigis la tapetpaperon, skribaĉitan per kreto de notoj kaj adicioj kvazaŭ tie iu sin dediĉis al la studo de aritmetiko. Oni lokis en la fajrejo braĝujon plena de ardaj karboj, kvankam la vetero estis milda, ĉar en ĉi tiu vasta ĉambro la vesperoj ĉiam ŝajnis humidaj kaj malvarmegaj. Cetere, necesis al Lagrizo fajro por ekbruligi siajn cigarojn kaj boligi la akvon de sia punĉo. La ruĝeta brilo de la karbo malkaŝis la abomenan kaj konfuzan aspekton de la ĉambro, plenega de supre ĝis malsupre de seloj, de jungilaroj el ĉiuj formoj, de vipoj, de manteloj kaj aliaj vestoj amasigitaj, meze de kiuj loĝis la buldogoj, akomodiĝantaj al tio laŭ sia volo, kaj farantaj al si oportune.

Lagrizo pretigis al si bovlon da punĉo, kaj verŝante

varman akvon el randrompita kruĉo, grumblis inter siaj dentoj :

- Plagon ĉi tiu malbenita Tembo ! Kial li bezonis baraktigi min kontraŭ la novevenintojn ! Jen ĉi tiu knabo nekapabla labori dum unu semajno ! Ĝuste kiam la laboro plej urĝas !

- Jes, kaj vi meritas tion ! *diris voĉo de malantaŭ lia seĝo. Kasiso ĵus eniris kaj ekaŭdis lian monologon.*

- Ha ! Estas vi, ina demono ! Ĉu vi revenas ?

- Jes, mi revenas, *ŝi malvarme diris*, sed por fari laŭ mia propra volo.

- Vi mensogas, sorĉistino ! Mi plenumos mian parolon. Do aŭ vi bone kondutas, aŭ vi restas en la kabanoj, por labori kaj manĝi kun la grego.

- Mi ŝatus dek mil fojojn pli bone, *respondis la virino*, vivi tien en la plej malpura truo, ol esti ĉi tie sub via ungego.

- Sed ĉi tie vi finfine estas sub mia ungego, *li diris al ŝi, turnante sin al ŝi kun sovaĝa grimaco*, kaj tio plaĉas al mi. Do, sidiĝu tie sur miaj genuoj, belulino mia, kaj prudentiĝu. *Kaj per sia fera mano li kaptis ŝian pojnon.*

- Simono Lagrizo, gardu vin ! *ekkriis la virino. Ŝia okulo ekĵetis tiel tremigan fulmon, tiel akran kaj tiel sovaĝan rigardon, ke ŝi estis timiga por vidi.* Vi timas min, Simono, *ŝi decideme diris*, kaj vi pravas timi. Estu singardema, ĉar la demono posedas min kaj pelas min ! *Ŝi siblis tiujn lastajn vortojn en lian orelon.*

- Foriru ! Je mia animo, mi kredas ke vi fakte estas posedata ! *Kaj Lagrizo forpuŝis ŝin de li, kaj maltrankvile ekzamenis ŝin.* Finfine, Kasiso, *li daŭrigis*, kial ni ne estus bonaj amikoj, kiel en la pasinteco ?

- Kiel en la pasinteco ! *ŝi amare ripetis. Ŝi subite haltis, mondo da sentoj ekaperis en ŝia koro, sufokis ŝin, mutigis ŝin.*

Kasiso ĉiam havis sur Lagrizo tian influon kiun energia kaj pasia virino plenumas sur la plej sovaĝa viro. Sed de nelonge ŝi fariĝis pli kaj pli kolerema, pli kaj pli freneza pro la abomena jugo de sia sklaveco, kaj ŝia kolero kelkfoje iris ĝis la deliro. Ĉi tiuj atakoj faris de ŝi teruran objekton por Lagrizo, kiu havis pri la frenezuloj, tiun superstiĉan timegon, ofta ĉe la krudaj kaj sensciaj mensoj. Kiam li alkondukis Emelina^{n} al la loĝejo, ĉiuj virinaj sentoj, ĉiuj doloroj longe kovitaj sub la cindroj, reviviĝis en la eluzita koro de Kasiso, kaj ŝi helpis al la juna knabino. Sekvis senindulga kverelo inter ŝi kaj Lagrizo. En sia furiozo, li ĵuris ke se ŝi ne volis sin teni pace, li sendos ŝin al la plukado de la kotono kun la sklavoj. Kasiso deklaris, en sia orgojla disdegno, ke ŝi iros. Ŝi iris tien kaj plenumis sian taskon, por montri kiel ŝi estimis la minacon.

Lagrizo sekrete estis malkomforta dum la tuta tago, ĉar li ne povis liberiĝi de la influo de Kasiso.

Li esperis, kiam ŝi alportis sian korbon por la pesado, ricevi kelkan koncedon, kaj li parolis al ŝi per duoncedema, duonpostulema tono. Ŝi respondis al li kun la plej ofendega malestimo.

La malinda traktado trudita al la kompatinda Tomo denove incitegis ŝin, kaj ŝi sekvis Lagrizo^{n} nur por riproĉi al li lian kruelecon.

- Mi konsilas al vi, Kasiso, li diris, konduki vin kun iom pli da modereco.

- Estas vi kiu parolas pri modereco, post tio kion vi faris ! Vi kiu ne eĉ havas la saĝon reteni vin, kiu metas ekster servo unu el viaj plej bonaj manlaboristoj, ĝuste ĉe la pinto de la laborpremo, kaj tio danke al via diabla karaktero !

- Mi estis malsaĝulo, tio estas la fakto lasi ekbruligi la pulvon, diris Lagrizo. Sed la knabo obstinis, necesis ja rompi lin.

- Mi avertas vin ke vi ne rompos lin.

- Ĉu mi ne rompos lin ? *ekkriis Lagrizo furioze ekstaranta*. Mi tre ŝatus vidi tion ! Li estus la unua negro kiu kontraŭstarus min. Mi frakasos al li, se necesas, ĉiujn ostojn de la korpo, sed li kliniĝos !

Ĉe tiu momento, la pordo malfermiĝis, kaj Tembo aperis. Li antaŭenpaŝis kun multaj riverencoj, kaj prezentis ion en papero.

- Kio ĝi estas, hundo ?

- Ĝi esti sorĉo, mastro.

- Io kio ?

- Io kion sorĉistoj doni al la negroj ! Tio malebligi ilin senti la vipon kiam ni bati ilin. Li havi ĝin pendigita ĉirkaŭ la kolo per nigra rubando.

Lagrizo, kiel multaj kruelaj kaj malpiaj viroj, estis superstiĉa. Li prenis la paperon kaj malinkline malfermis ĝin.

Eliris el ĝi unu dolaro el arĝento, kaj longa kaj brila hartufeto da belaj haroj buklaj kaj blondaj, kiuj kiel vivantaj aĵoj, volviĝis ĉirkaŭ la fingrojn de Lagrizo.

- Damne ! *li ekkriis subite ekkoleranta, stamfanta sur la plankon kaj furioze eltiranta el siaj fingroj la harojn, kvazaŭ ili bruligus lin*, de kie tio venas ? Forprenu ilin ! Ĵetu ilin en la fajron ! en la fajron ! en la fajron !

Li kriis, sakris, tiradis ilin kaj finfine ĵetis ilin en la fajregon, "*kial diable alporti ĉi tion al mi ?*"

Tembo, konsternita, restis senmova, kun gapanta buŝo, kaj Kasiso kiu pretiĝis por forlasi la ĉambron, haltis kaj konsideris lin tute mirigite.

- Ne plu aŭdacu alporti al mi viajn diablajn sorĉojn ! *li diris minacante per la pugno Tembo" kiu vigle retiriĝis flanken de la pordo; kaj prenante la dolaron, Lagrizo ĵetis ĝin en la mallumon tra la fenestraj vitroj kiuj dissplitiĝis*.

Tembo elŝteliĝis kiel eble plej rapide. Post lia foriro,

Lagrizo ŝajnis honta pro sia frenezaĵo. Li residiĝis en sian seĝon kun mordema mieno, kaj komencis malrapide gustumi sian bovlon da puĉo.

Kasiso, elŝoviĝante nerimarkite el la ĉambro, profitis de ĉi tiu momento por iri helpi la kompatindan Tomo^{n}.

Kio do okazis en la sprito de Lagrizo ? Kio estis en iu simpla buklo da blondaj haroj por incitegi ĉi tiun krudan viron, delonge kutimigitan al ĉiuj subtilaj kruelaĵoj ? Hardita kaj mallaŭdita kiel hodiaŭ aspektis ĉi tiu malpiulo, li estis iam lulita en la sino de patrino, endormiginta per kanto de himnoj kaj preĝoj. Ĉi tiu frunto, nun markita de la infera sigelo, estis akvumita de la sanktaj akvoj de bapto. Dum sia unua infaneco, virino kun blondaj haroj, kondukis lin sub la sono de la dimanĉa sonorilo, por preĝi kaj adori. Ĉe la fundo de malproksima parto de Nov-Anglio, ĉi tiu virino edukis sian solan filon kun pacienca kaj fervora amo. Naskita de viro kun malmola koro, por kiu la milda virino malŝparis mondon da miskomprenita tenereco, Lagrizo sekvis la paŝojn de sia patro. Perforta, senbrida, tirana, li malestimis la konsilojn de sia patrino, neglektis ŝiajn riproĉojn kaj, ankoraŭ tre juna, disiĝis de ŝi por iri serĉi fortunon sur la oceano. De tiam li revenis hejmen nur unufoje. Ŝi, kun la pasia impulso de koro kiu bezonas ami, kaj kiu havas nenion alian por ami, alkroĉiĝis al li, petegis lin per ardaj preĝoj, por la eterna bono de lia animo, rompi kun lia vivo de peko.

Tiu estis la gracotago konsentita al Lagrizo. La anĝeloj petadis lin; li estis preskaŭ persvadita; la dia korfavoro etendis manon al li. Lia koro moliĝis, estis lukto, la peko superis. Li kontraŭmetis la energion de sia kruda kaj malbona naturo antaŭ la konvinkoj de sia konscienco. Li trinkis, sakris, fariĝis pli kruela, pli sovaĝa ol neniam. Iun vesperon kiam ŝia patrino, en la agonio de la malespero, ĵetis sin ĉe liajn genuojn, li malmilde forpuŝis ŝin; ŝi senkonscia

falis sur la pargeto, kaj li fuĝis, kun sovaĝaj malbenoj, por rekuniĝi kun sia veselo. Lagrizo aŭdis paroli pri sia patrino nur unufoje. Estis nokto, li ebriiĝis kun siaj diboĉaj kunuloj; oni transdonis al li leteron, li malfermis ĝin. Longa hartufeto disvolviĝis, volviĝis ĉirkaŭ liaj fingroj. La letero sciigis al li la morton de lia patrino; mortanta, ŝi benis lin kaj pardonis lin.

Estas en la malbono, magia kaj malpia potenco kiu ŝanĝas en teruraj kaj naŭzaj fantomoj la plej sanktajn, la plej dolĉajn aferojn. Ĉi tiu ama patrino, kun pala vizaĝo, ĉi tiuj preĝoj, ĉi tiu pardono plena de amo, sendita de ŝia mortlito, estis por ĉi tiu koro hardita de la peko nur verdikto de damno, timega antaŭsigno de la Dia juĝo kaj de la nerevokebla puno. Lagrizo bruligis la leteron, bruligis la harojn, kaj kiam li vidis ilin tordiĝi kaj sibladi en la flamoj, li ektremis pensante pri la eternaj fajroj. Li trinkis, li festenis, li klopodis por forŝovi ĉi tiun memoron. Sed ofte, en profunda nokto kies solena kvieto alvokas la animon antaŭ ĝia propra tribunalo, li vidis tiun palan vizaĝon stariĝi ĉe siaj flankoj; li sentis ĉirkaŭ siaj fingroj la volviĝon de tiuj haroj, ĝis kiam malvarma ŝvito inundis al li la vizaĝon, kaj kiam li fuĝis el sia lito turmentata de teruro.

Vi kiuj miris legi en la sama Evangelio : "*Dio estas amo*", kaj "*Dio estas konsumanta fajro*"; ĉu vi ne komprenas ke, por la animo dediĉita al malbono, la amo estas la plej kruela torturo, la aresto kaj la sigelo de la plej horora malespero !

- Malbeno ! *diris al si Lagrizo trinkante sian punĉon;* kie diable li trovis tion ? Estas ke tio estis tute ĝuste simila… Uf ! Mi kredis esti forgesinta tion. Sed la diablo forprenu min se ni forgesas nenion, kion ajn ni farus ! Plagon al memoro kaj al ĝiaj ruzoj ! Mi estas sola kiel strigo ! Mi tuj alvokos Emnjo^{n}. Ŝi malamas min, la makakinon ! Ne gravas, necesos ja ke ŝi venos !

Lagrizo eliris en grandan vestiblon kiu komunikiĝas kun

la supra etaĝo per kurbiĝa ŝtuparo, antaŭe belega. La interŝtuparo estis malpura, ruina, embarasita de kestoj kaj de ĉiaj malbelegaj senvalorajĵoj. La ŝtupoj supreniris kaj turniĝis en la mallumo, alkondukanta oni ne sciis kien. La pala lumeto de la luno filtriĝis tra rompita luketo super la pordo. La aero estis nesalubra kaj frosta kiel tiu de kelo.

Lagrizo haltis piede de la ŝtuparo, kaj aŭdis voĉon kiu kantis. Ĝi sonis laŭ stranga kaj supernatura maniero en la senhoma kaj malhela loĝejo. Eble ankaŭ liaj troekscititaj nervoj atribuis al ĝi malgajan akcenton. Voĉo, neinstruita kaj melankolia, kantas himnon kutima al sklavoj. Aŭskultu :

Ho estos funebro, funebro, funebro,
Ho, estos funebro ĉe la juĝseĝo de Kristo !

- Malbenita estu la knabino ! *ekkriis Lagrizo. Mi strangolos ŝin.* Emnjo ! Emnjo ! *li severe alvokis. Sed la moka eĥo de la malnovaj muregoj sole respondis al li. La milda voĉo daŭrigis* :

Gepatroj kaj infanoj tie disiĝos !
Gepatroj kaj infanoj tie disiĝos !
Disiĝos por ne plu sin renkonti !

Kaj la malgajega rekantaĵo sonis, laŭte kaj klare, tra la malplenaj ĉambroj :

Ho estos funebro, funebro, funebro,
Ho, estos funebro ĉe la juĝseĝo de Kristo !

Lagrizo haltis. Li ruĝiĝintus konfesi ke dikaj ŝvitgutoj perlis sur lia frunto; ke lia koro, premita, pezigita, batadis pro timo. Li eĉ kredis vidi blankan ombron leviĝi kaj ŝoviĝi antaŭ li en la mallumo. Li ektremis pro la penso ke la vizaĝo de lia mortinta patrino eble estis ekaperonta al li.

- Mi scias tion kion mi faros, *li diris al si, dum li ŝanceliĝante eniris en la salonon kaj enfalis sur sian seĝon*, mi lasos la knabon ripozi ! Kial mi bezonis lian malbenitan paperon ? Mi kredas, diablo min forprenu, ke mi estas

ensorĉita ! Mi nur ŝvitis kaj tremis ekde tiam ! Kie li kaptis tiujn harojn ? Ili ne povas esti la samaj ! Mi bruligis ilin, la aliajn, mi certas tion ! Estus strange ke haroj povus reviviĝi !

Ha ! Lagrizo ! Ĉi tiuj oraj bukloj havis en si magian ĉarmon en ili ! Ĉiu haro alportis al vi teruron, rimorsojn. Senditaj de dia potenco, ili devintus ligi viajn kruelajn manojn, kaj malebligi vin torturi la senhelpajn malfortulojn.

- Nu ! diris Lagrizo stamfante kaj fajfante al siaj hundoj, vekiĝu, vi ja, kaj kunrestadu kun mi ! *Sed la hundoj malfermis iun okulon, dormeme rigardis lin kaj reendormiĝis*.

- Mi tuj venigos Tembo^{n} kaj Kimbo^{n}, iliaj kantoj, iliaj inferaj dancoj forpelos el mia kapo ĉi tiujn hororajn inkubsonĝojn. Lagrizo surmetis sian ĉapelon, antaŭenpaŝis en la verandon kaj sonigis kornon por alvoki siajn du nigrajn laborestrojn.

Kiam li estis en agrabla humoro, li ofte venigis ĉi tiujn dignajn satelitojn; kaj post esti varmiginta ilin per viskio, amuziĝis kantigi, dancigi aŭ interbataligi ilin, laŭ sia kaprico de la momento.

Kasiso rehejmeniris post sia vizito al kompatinda Tomo, povis esti la unua aŭ dua matene. Ŝi aŭdis foriri de la salono sovaĝajn kriojn, blekadojn, barbarajn kantojn, miksatajn kun la bojadoj de la hundoj, speco de diabla bruego.

Ŝi transiris la ŝtupojn al la verando, kaj rigardis en la hejmon. Lagrizo kaj liaj du kunuloj, ebriaj kaj furiozaj, kriis, blekegis, turniĝadis, renversis la seĝojn kaj faris unu al la alia malbelegajn kaj mallogajn grimacojn.

Ŝia delikata maneto metinta sur la latŝutro, ŝi fikse ekzamenis ilin. Tuta mondo de angoro, de malestimo, de kruelega amareco trairis tra ŝiaj nigraj okuloj.

- Ĉu do estus peko malembarasi la teron de tia malŝatindulo ? ŝi demandis al si.

Ŝi rapidege forturniĝis, kaj ĉirkaŭirante por atingi sekretan enirejon, ŝi enŝoviĝis en la ŝtuparo kaj iris frapi ĉe la pordon de Emelina.

37. Emelina kaj Kasiso.

Kasiso malfermis, kaj ekvidis Emelinan, palan pro teruro, kaŭriĝintan en la plej malproksima angulo de la ĉambro. Ĉe ŝia eniro, la junulino ricevi nervozan ektremon; sed ŝi rekonis ŝin, rapidis antaŭ ŝin, kaptis ŝian brakon kaj ekkriis :

- Ho Kasiso, ĉu estas vi ? Mi tre ĝojas ke vi venis ! Mi tiom multe timis ke estis… Ho ! Vi ne scias kian teruran bruon estis tie malsupre dum la tuta vespero !

- Mi devas koni ĝin, *seke respondis Kasiso*; mi sufiĉe aŭdis ĝin !

- Ho ! Diru, Kasiso ! Ĉu ni ne povus fuĝi ? Ien ajn ! En la marĉojn, meze de la serpentoj, ĉien ! Ĉu ni ne povus forkuri ien, ekster ĉi tie ?

- Nenien krom en niajn tombojn, diris Kasiso.

- Ĉu vi neniam provis ?

- Mi sufiĉe vidis da provoj, kaj tion kio rezultis de ĝi, ŝi rebatis.

- Mi preferus vivi en la marĉoj, ronĝi la ŝelon de arboj. Serpentoj ne timigas min ! Mi pli ŝatus vidi unu el ili apud mi ol ĉi tiun viron, diris energie Emelina.

- Multaj aliaj ĉi tie pensis same. Sed vi ne povus resti en la marĉo. Vi tie estus ĉaspelita de la hundoj kaj revenigita, kaj tiam, tiam…

- Kion li farus ? *demandis la junulino rigardante Kasison frunte, kaj perdante la spiron pro angoro.*

- Demandu prefere tion kion li ne farus ! Li bone lernis sian metion inter la piratoj de Okcidentaj Indioj. Vi ne plu dormus, se mi rakontus al vi la aferojn kiujn mi vidis; la aferojn kiujn li kelkfoje citas kiel bonajn lertaĵojn. Mi ĉi tie aŭdis kriojn tiajn kiajn mi ne sukcesis elpeli ilin el mia kapo

dum semajnoj kaj monatoj. Tien, apud la kabanoj, estas loko kie vi povus vidi arbon kalcinitan de fajro, piede de kiu estas amasigitaj nigraj cindroj. Demandu al ili tion kio okazis tie, vi vidos ĉu ili kuraĝas respondi al vi !

- Ho ! Kion vi volas diri ?

- Nenion; mi ne diros ĝin al vi. Mi eĉ malamas la penson pri ĝi; sed mi asertas al vi ke Disinjoro sola scias tion kion ni povos vidi morgaŭ, se ĉi tiu kompatinda knabo persistas kiel li komencis.

- Hororo ! *ekkriis Emelina, ŝia tuta sango forlasanta ŝiajn vangojn*. Ho Kasiso, diru al mi, kion mi faros ?

- Tion kion mi faris. Faru por la plej bona; faru tion kion oni altrudas al vi fari, kaj plenigu la mezurilon per malamo kaj malbenoj.

- Li volis trinkigi al mi sian abomenan brandon, diris Emelina; mi malŝatas ĝin !

- Vi pli bone farus trinki ĝin, diris Kasiso. Ankaŭ mi ja malŝatas ĝin; nun mi ne kapablus malhavi ĝin. Ni bezonas ebriiĝi, kaj aferoj aperas en malpli terura aspekto post kiam ni trinkis ĉi tion.

- Mia patrino malpermesis al mi iam tuŝi ĝin.

- Via patrino malpermesis al vi, *diris Kasiso malĝoje emfazante la vorton patrino*. Por kio utilas la malpermesoj de patrinoj ? Ĉu vi ĉiuj ne devas esti vendataj, pagataj ? Kaj ĉu viaj animoj ne apartenas al tiu ajn kiu aĉetas vin ? Tiel iras la mondo. Mi ripetas tion al vi, trinku brandon, trinku tiom kiom vi povos, tio faciligos la aferojn.

- Ho Kasiso ! Kompatu min !

- Kompati vin ! Ĉu mi ne kompatas vin ? Ĉu mi ne havis filinon ? Disinjoro scias kie ŝi estas, kaj kio ŝi estas hodiaŭ ! Ŝi sekvas, mi supozas, la vojon kiun ŝia patrino sekvis antaŭ ŝi, kaj kiun ŝiaj infanoj sekvos siavice ! Ne estas fino ĉe ĉi tiu eterna malbeno !

- Mi dezirus neniam esti naskita, diris Emelina tordante al si la manojn.

- Ĝi estas malnova deziro, diris Kasiso. Mi laciĝis fari ĝin. Mi estus mortiganta min, se mi estus maltimanta tion.

Ŝi haltis, rigardis en la mallumo de la nokto kun tiu senmova kaj senĝoja malespero kiu estis la kutima esprimo de ŝia vizaĝo dum ripozo.

- Estus malbone mortigi sin, diris Emelina.

- Mi ne scias tion; tio ne estus pli malbone, ĉiuokaze, ol fari tion kion ni faras ĉiutage. Sed la monaĥinoj diris al mi, dum mi estis en la monaĥinejo, aferojn kiuj timigas min morti. Se ĉio tie finiĝis, ho tiam…

Emelina forturniĝis, kaj kovris sian vizaĝon per siaj ambaŭ manoj.

Dum ĉi tiu konversacio okazis supre en la dormoĉambro, malsupre, Lagrizo, regata de ebrieco, sinkis en la dormon. Ĉi tiu stato ne estis kutima al li. Lia kruda, muskola naturo bezonis eksceson, kaj mirinde eltenis tion kio elĉerpus pli malfortan konstitucion. Sed ĝisosta instinkto de suspektema singardemo detenis lin sin fordoni al siaj bestaj inklinoj ĝis perdi la kontrolon de si mem.

Tiun nokton tamen liaj febraj klopodoj por elpeli el lia menso la teruron kaj le rimorson kiuj persekutis lin, kondukis lin trans la limon; kaj, tuj kiam li forpermesis siajn nigrajn servistojn, li peze falis sur seĝon kaj ekdormis.

Ho ! Kiel la malbona animo maltimas aliri al la fantazia mondo de la dormo, imperio kies la neprecizaj konturoj tuŝas tiel proksime la misterojn de la alia vivo ? Lagrizo havis sonĝon. En sia peza kaj febra dormo, li vidis, stare ĉe sia flanko, neklaran formon kiu metis sur lin malvarman, mildan manon. Ŝajnis al li rekoni ŝin, kaj li ektremis pro hororo, kvankam la vizaĝo estis vualita. Poste li sentis la hartufeton sin volvis ĉirkaŭ siajn fingrojn, sin malrapide gliti ĉirkaŭ sian

kolon, kaj stringi lin, stringi lin ĝis kiam li perdu la spiron. Li kredis aŭdi voĉojn mallaŭte murmuri al li vortojn plenajn de teruro. Subite li troviĝis rande de senfunda abismo, krianta kaj baraktanta, turmentata de mortigaj teruroj, dum nigraj manoj, elirantaj el la krutegaĵo, kaptis kaj altiris lin al ili. Kasiso ekaperis malantaŭ lin kaj puŝis lin ridante. Tiam la solena vualita vizaĝo antaŭeniris kaj sin malkovris. Estis lia patrino. Ŝi deturniĝis de li, kaj li ruliĝis plejprofunde en la abismon, sub la bruo de krioj, de huadoj, de diablaj ekridegoj, kaj… Lagrizo vekiĝis.

La kvieta kaj rozeta lumeto de la tagiĝo enŝoviĝis en la ĉambron. La matena stelo, kiel dia okulo, kun sia ĉasta kaj solena lumeco, rigardis de supre de la ĉielo pli kaj pli radia, la viron de la peko. Kiaj freŝaj kaj sanktaj brilegoj akompanas la tagleviĝon ! Ĉu ili ne ŝajnas diri al la malsaĝulo : "*Rigardu ! Jen plia ŝanco ! Strebu konkeri senmortan gloron !*" Ne ekzistas lingvo aŭ lando, kie ĉi tiu voĉo ne estas aŭdebla; sed la homo hardita en la malbono ne komprenas ĝin. Lagrizo vekiĝis, kun malbeno en la buŝo. Pri kio gravis al li la oro kaj purpuro de la ĉiutaga miraklo de la tagiĝo ? Pri kio gravis al li la sankteco de ĉi tiu stelo kiun la Filo de Dio benis, prenante ĝin kiel emblemon ? Ŝtipkapa kiel li estis, li vidis sen senti. Li stariĝis ŝanceliĝante, verŝis al si glason da brando kaj englutis la duonon.

- Mi travivis inferan nokton, li diris al Kasiso kiu eniris.

- Vi havos multajn similajn antaŭ nelonge, ŝi seke diris.

- Kion vi volas diri per tio, friponino ?

- Vi ekscios tion unu el ĉi tiuj tagoj, *respondis Kasiso per la sama tono*. Nun, Simono, mi havas konsilan vorton por doni al vi.

- Ha diable ! Iun konsilon al mi ?

- Jes, *firme rekomencis Kasiso iomete reordigante la ĉambron*; mi konsilas al vi lasi Tomo^{n} trankvile ripozi.

- Kion vi devas fari en tio ? Tio ne estas viaj aferoj.

- Ne, certege, kaj mi ne scias kial mi enmiksiĝus en tio. Se plaĉas al vi pagi mil ducent dolarojn por sklavo kaj difekti lin en la plej urĝa tempo de la jaro, nur por kontentigi vian koleron, tio certege ne estas miaj aferoj ! Mi faris por li tion kion mi kapablis.

- Tion kion mi kapablis ! Kial vi bezonas enmiksiĝi en tio kio koncernas min ?

- Nenial, certe. Mi ŝparis al vi kelkmil dolarojn, en diversaj okazoj, prizorgante viajn manlaboristojn, tio estas la dankon kiun mi ricevas pro tio. Se vi havas ĉe la merkato pli malgrandan rikolton ol la aliaj, ĉu vi ne perdos vian veton ? Ĉu Tompkins ne kantos venkon ? Kaj vi kontante pagos per belaj moneroj, ĉu ne ? Ŝajnas al mi jam vidi vin tien !

Lagrizo, kiel multaj aliaj plantistoj, havis nur unu ambicion, fari la plej belan rikolton en la regiono. Kaj li metis, pri ĉi tiu temo, plurajn vetojn en la najbara urbo. Kasiso tuŝis do, dank'al la virina takto, la solan ŝnuron kiu povis vibri en li.

- Nu ! Mi kvitigos lin pro tio kion li ricevis, diris Lagrizo; sed li pardonpetos al mi kaj promesos korektiĝi.

- Li ne faros tion, respondis Kasiso.

- Li ne faros tion ! Mi petas ?

- Ne, li nenion faros pri tio, Kasiso ripetis.

- Mi ja ŝatus scii kial, mastrino ? *diris Lagrizo kun suverena disdegno.*

- Pro tio ke li bone agis, ke li scias tion, kaj ke li ne diros ke li malpravis.

- Kiu diable zorgas pri tio kion li scias ? La malbenita negro diros tion kio plaĉas al mi dirigi al li, aŭ…

- Aŭ, vi perdos viajn vetojn pri la rikolto, forigante lin for de la kampo en la premtempo.

- Sed li cedos, li cedos ! Ĉu mi ne konas la negrojn ? Li

rampos kiel hundo ĉi matene.

- Ne, Simono, vi konas nenion pri tiu specio. Vi povas mortigi lin colon post colo, sed vi ne ricevos vorton de pento.

- Ni vidos ! Kie li estas ? diris Lagrizo forirante.

- En la hangaro de la staplejo, respondis Kasiso.

Lagrizo, kvankam li tiel rezolute parolis al Kasiso, foriris de la domo kun dubo, tio kio ne estis ordinara por li. Liaj sonĝoj de pasinta nokto venantaj miksiĝi kun la singardaj sugestoj de Kasiso, hantis lian menson. Li decidis ke neniu estus atestanto de lia intervidiĝo kun Tomo, kaj antaŭdecidis, se li ne sukcesos submeti lin per minaco, prokrasti sian venĝon en pli favora periodo.

Tra la kruda vitralo de la hangaro kie kuŝis Tomo, la milda lumo de la tagiĝo, la anĝela gloro de la matenstelo penetris, ŝajnantaj kunporti kun si ĉi tiujn solenajn parolojn : "*Mi estas la tigo kaj la ido de Davido; mi estas la brila matenstelo !* (*Apokalipso 22.16*)." La misteraj avertoj kaj sugestoj de Kasiso, for de malfortigi lian animon, plifortigis ĝin, kiel alvoko de supre. Li ne sciis ĉu estis la tago de lia morto kiu tagiĝis en la ĉielo, kaj lia koro pulsis pro ĝojo kaj deziro pensante pri ĉiuj mirindaĵoj, konstanta temo de liaj meditadoj. La granda blanka trono, ĉirkaŭita de sia ĉiam radia ĉielarko, la amaso en blankaj roboj, murmuranta kiel la bruo de abundaj akvoj, la kronoj, la palmobranĉoj kaj la oraj harpoj, povis ĉiuj montriĝi al lia vido antaŭ la sunsubiro ! Li do aŭdis, sen timo kaj sen tremeto, la voĉon de sia persekutanto ĉe la momento kiam li alproksimiĝis.

- Nu ! Knabo mia, *diris Lagrizo malestime piedbatanta lin*, kiel vi fartas ? Ĉu mi ne antaŭdiris al vi ke mi instruos al vi unu aŭ du aferojn ? Ĉu vi sentas vin bone ? Ĉu la leciono plaĉis al vi ? Ĉu viaj plendadoj profitigis al vi ? Ĉu vi estas tute same fiere brava kiel vi estis hieraŭ ? Ĉu vi ne povus regali kompatindan pekulon per tute mallonga prediko ?

Tomo nenion respondis.

- Leviĝu, bruto ! *ekkriis Lagrizo donante al li duan piedbaton. Tio estis malfacila afero, rompita, malfortigita kiel estis la kompatinda Tomo. Kaj dum li provis obei, Lagrizo kruele ekridis*. Kiu tiel malmulte vigligas vin ĉi matene, Tomo ? Eble vi estis trafita de malvarmo ĉi nokte.

Tomo sukcesis stariĝi, kaj rigardis vidalvide sian mastron, kun senesprima kaj serena frunto.

- Ha ! Diable, vi povas moviĝi ! *diris Lagrizo konsiderante lin*. Mi kredas ke vi ne jam havas sufiĉe. Nun surgenue, Tomo, kaj petu al mi pardonon pro viaj grimacoj de hieraŭ vespere.

Tomo ne moviĝis.

- Surgenue, hundo ! *ripetis Lagrizo batant lin per sia rajdovipo*.

- Mastro Lagrizo, diris Tomo, mi ne povi tion. Mi fari nur tion kion mi kredi bona. Mi refari, tute same, se la okazo estiĝi. Mi neniam fari kruelaĵon. Okazi tion kio okazi !

- Jes, sed vi ne scias tion kio povas okazi, mastro Tomo. Ĉu vi kredas ke tio kion vi ricevis hieraŭ, estas io ? Nu, mi ja diras al vi ke tio estas nenio, tute nenio. Ĉu vi ŝatus esti ligita al arbo kaj bruligita per malvigla fajro ? Ĉu tio ne estus agrabla tempopasigo ? He, Tomo !

- Mastro, respondis Tomo, mi scii ke vi kapabli fari terurajn aferojn ! Sed, *li rektiĝis kaj kunigis ambaŭ manojn*, sed kiam vi esti mortiginta la korpon, vi ne plu povi ion ajn, nenion ! Kaj poste ! Ho ! Poste ! Veni la Eterneco, la tuta Eterneco !

La Eterneco ! Ĉe ĉi tiu vorto, la animo de la kompatinda nigrulo ektremis, inundita de lumo kaj potenco. Tiu de la pekulo ankaŭ tremis kiel sub la piko de skorpio. Muta pro kolerego, Lagrizo dispremis la vorton sub siaj dentoj. Tomo, simila al kaptito liberigita de siaj ĉenoj,

parolis per klara kaj gaja voĉo.

- Mastro Lagrizo, vi aĉeti min, kaj mi esti lojala kaj fidela servanto al vi. Mi doni al vi la tutan laboron de miaj manoj, mian tutan tempon, mian tutan forton, sed mi neniam cedi mian animon al mortema estulo. Ĉu mi devi vivi aŭ morti, mi persisti en Disinjoro kaj meti Liajn ordonojn antaŭ ĉio; vi povi esti certa pri tio. Mi ne timi morton: mi ami tiom morti kiom vivi. Dependi nur de vi bati min, malsatigi min, bruligi min, mi nur iri pli frue tien kie mi soifi iri.

- Mi cedigos vin antaŭ ol fini kun vi, diris Lagrizo furioze.

- Vi neniam sukcesi, diris Tomo, mi havi helpon.

- Kiu diable helpos vin ? rekomencis Lagrizo malestime.

- La ĉiopova Disinjoro !

- Estu malbenita ! *diris Lagrizo, kaj per unu bato de sia pugno, li faligis Tomon teren.*

Glacia mano tuŝis la lian. Li turniĝis, estis Kasiso. Sed tiu malvarma kaj milda tuŝo elvokis lian noktan sonĝon, kaj ĉiuj hororaj bildoj de la koŝmaro, kiuj turmentis lin, stariĝis en lia cerbo kaj plenigis lin de teruro.

- Ĉu do vi ĉiam agos kiel malsaĝulo ? *diris Kasiso en la franca.* Lasu lin trankvile ! Mi zorgos pri tio ke li baldaŭ kapablos reiri sur la kampojn. Ĉu tio ne estas tute ĝuste kiel mi diris al vi ?

Oni asertas ke la rinocero kaj la krokodilo, kvankam kovritaj de kuglorezistan kirason, tamen havas vundeblan punkton. Inter la plej harditaj kaj plej malpiaj malvirtuloj, ĉi tiu punkto kutime estas superstiĉa teruro.

Lagrizo forturniĝis, decidita tiel lasi tion nuntempe.

- Nu ! Faru laŭ via plaĉo, *li diris al Kasiso per ursa tono.* Aŭskultu, *li aldonis, alparolante al Tomo*, mi ne volas fini kun vi hodiaŭ, ĉar la laboro premas, kaj ĉar mi bezonas ĉiujn miajn manojn. Sed mi neniam forgesas; mi notas tion, kaj

iam via malnova nigra skeleto centoble pagos al mi por tio kion vi ŝuldas al mi. Kalkulu kun tio !

Post ĉi tiu minaco li foriris.

- Iru ! *diris Kasiso rigardanta lin kun malgaja mieno dum li malproksimiĝis*, vi ankaŭ iam ricevos la elkalkulitan konton ! Nu, kompatinda knabo mia, kiel vi fartas ?

- Sinjoro Dio sendi sian anĝelon, kaj li ĉifoje fermi la faŭkon de la leono, diris Tomo.

- Jes, ĉifoje, ŝi ripetis. Sed de nun lia malamo estas ligita al vi; ĝi sekvos vin de tago al tago, alkroĉita kiel hundo al via gorĝo. Ĝi drinkos vian sangon, kaj suĉos vian vivon guto post guto ! Mi konas la viron !

38. La Libereco.

Kia ajn estas la soleneco de la ofero ofertita sur la altaro de la sklaveco, tuj kiam la sklavo tuŝas la sanktan teron de Britio, la altaro kaj Dio sinkas en la polvo, kaj la viro restariĝas, elaĉetita, regenerita, liberigita, de la nerezistebla genio de la universala emancipado.
John Philpot Curran (1750-1817)

Lasante dum tempo Tomon inter la manojn de liaj persekutantoj, ni reiru malantaŭen en la vojranda farmodomo, kie ni lasis Georgon kaj lian edzinon inter amikaj manoj.

Ni memoras Antonon Lokeron ĝemanta kaj skuiĝanta en kvakera lito, el senmakula blankeco, sub la patrina kuracadkontrolo de onklino Doroteo, kiu opiniis sian pacienton en humoro tiel traktebla kiel malsana bizono.

Imagu altan virinon, dignan kaj spiritualistan, kies ĉapo el hela muslino superelstaras ondojn da arĝentaj haroj. Sub larĝa kaj pura frunto malfermiĝas grizaj kaj pensemaj okuloj. Ŝultrotuko el glata krepo, blanka kiel neĝo, kruciĝas sur ŝia brusto. Ŝia silka robo, bruna kaj brila, aŭdigas pacan kaj mildan susuron kiam ŝi iras kaj reiras en la ĉambro.

- Diable ! *ekkriis Antono Lokero ĵetanta flanken la litotukojn.*

- Bonvolu, Antono, ne uzi tiajn vortojn, *diris onklino Doroteo kiu trankvile rearanĝis la liton.*

- Nu, mi ne plu diros diablon, bona panjo, se mi kapablas reteni min, diris Antono; sed teni vin tiel en etuvo, estas sufiĉe por sakrigi sanktulon !

Doroteo demetis la piedkovrilon, kunigis la litotukojn

kaj subŝovis ilin; tiel ke Antono aspektis kiel krizalido.

- Mi dezirus, amiko, *ŝi diris reordigante la liton*, ke anstataŭ sakri kaj furiozi, vi iom pensu pri ĉio kion vi faris.

- Kial, per la infero, mi pensus pri tion ? rekomencis Antono. Tio estas la lasta afero pri kiu mi zorgas pensi ! Ĉiuj iru al la diablo ! *Kaj Antono denove eksaltis, demetante la litokovrilojn kaj kreante ĉirkaŭ si universalan malordon.*

- La viro kaj la knabino estas ĉi tie, mi supozas, *li malbonhumore demandis, post momento.*

- Ili estas ĉi tie, *rebatis Doroteo.*

- Ili bone farus atingi la lagon; la plej frua estus plej bona.

- Estas verŝajne tio kion ili planas fari; *kaj onklino Doroteo pace daŭrigis triki.*

- Atente aŭskultu, diris Antono, ni havas denuncistojn en Sanduskio, kiuj vizitas la boatojn por ni, mi avertas vin pri tio. Ne gravas, ĉu mi nun rakontas tion. Mi esperas ke ili sin savos, nur por kolerigi tiun hundon de Markso, malbenita perfidulo ! Dio damnu lin !

- Antono ! Antono ! *grumblis onklino Doroteo.*

- Mi diras al vi, bona patrino, se vi tro forte ŝtopas la botelon, ĝi krakrompiĝas, kaj mi same ! Sed, revenante al la knabino, diru al ŝi maskovesti sin. Ili havas ŝian priskribon tien en Sanduskio.

- Ni zorgos pri tio, *diris Doroteo kun sia karakteriza trankvilo.*

Antaŭ ol adiaŭi Antono^{n} Lokero^{n}, ni devas aldoni, ke post tri semajnoj pasigitaj en la kvakera domo, malsana de reŭmatisma febro, kiu kuniĝis al ĉiuj liaj aliaj doloroj, Antono restariĝis iomete pli malĝoja kaj pli saĝa. Rezignante ĉassekvi la sklavojn, li ekloĝis en nova kolonio, kie liaj talentoj disvolviĝis laŭ la plej feliĉa maniero. Ĉasante kaj kaptante per kaptilo multajn lupojn, ursojn kaj aliajn

arbarajn loĝantojn, li vere famigis sin tra la tuta lando. Kiam li parolis pri la kvakeroj, ĉiam estis kun estimo : "*Bravaj homoj* ! li diris; *ili volintus konverti min, sed ĉiam estis io kiu ne iris tute glate. Ekzemple, ili estas senegalaj por kuraci malsanulon ! Kian teruran buljonon ili fars ! Kaj kiajn bonajn bagatelaĵojn, por reveki vian apetiton !*"

Laŭ la informoj donitaj de Antono, la fuĝantoj juĝis prudente disiĝi. Jakobo kaj lia maljuna patrino foriris la unuaj. Unu aŭ du noktojn poste, Georgo, liaj edzino kaj infano estis kondukitaj al Sanduskio, kaj loĝigitaj sub gastama tegmento, atendante ke ili morgaŭe enŝipiĝu sur la lagon.

La nokto atingis la matenon, kaj la stelo de libereco nun brilis antaŭ ili. Libereco ! Elektra vorto. Kio do vi estas ? Ĉu estas en vi nur nomo, nur retorika figuro ? Kial, usonanoj, la sango en via koro bolas ĉe tiu vorto ? Tiu vorto por kiu viaj patroj mortis, por kiu viaj patrinoj, eĉ pli kuraĝaj, konsentis vidi la plej bonajn kaj plej noblajn el siaj filoj morti ?

Tio kio estas kara kaj glora por nacio, ne estas malpli kara kaj malpli glora por homo ! Kio estas la libereco de popolo se ne la libereco de la individuoj kiuj ĝin komponas ? Kio estas libereco por ĉi tiu junulo, tie sidanta kun brakoj krucitaj sur sia larĝa brusto, la koloro de afrika sango sur liaj vangoj, lia malhela fajro en liaj okuloj, kio estas libereco por Georgo Hariso ? Por viaj patroj, libereco estis la rajto kiun havas ĉiu nacio esti nacio. Por li, tio estas la rajto kiun havas ĉiu homo esti homo, ne bruto, la rajto nomi lian elektitan virinon, sian edzinon, kaj defendi ŝin kontraŭ maljustaj perfortoj; la rajto protekti kaj eduki lian infanon; la rajto havi propran hejmon, propran religion, propran karakteron, sendepende de la volo de alia. Ĉiuj ĉi pensoj fermentis en la menso de Georgo dum, kun la kapo apogita

sur sia mano, li rigardis sian sveltan kaj delikatan edzinon haste surmeti la virajn vestaĵojn en kiuj estis opiniita plej sekura ke ŝi vestiĝu por la foriro.

- Nun necesi plenumi tion, *ŝi diris dum, staranta antaŭ la spegulo, ŝi malkunigis kaj skuis la nigrajn kaj silkecajn ondojn de siaj abunda hararo*. Esti preskaŭ domaĝe, ĉu ne, Georgo ? Kaj ŝi levis kelkajn buklojn. Esti malfeliĉe ke necesi tondi ĉion !

Georgo malgaje ridetis kaj ne respondis.

La brilantaj tondiloj aperis en la densan arbaron, kaj la longaj hartufetoj falis unu post alia.

- Nu ! Jen tio esti farita ! *ŝi diris prenante la harbroson*; ankoraŭ kelkaj fantaziaj retuŝoj kaj tio esti kompleta. Ĉu mi ne esti afabla knabo ? *ŝi sin turnis al sia edzo, samtempe ridante kaj ruĝiĝante*.

- Vi ĉiam esti beleta, kion ajn vi fari, *diris Georgo*.

- Kio igi vin tiel pensema ? *demandis Eliza metante unu genuon teren antaŭ li kaj metante sian manon sur la lian*. Oni diri ke ni ne plu esti je pli ol dudek kvar horoj de Kanado. Unu tago kaj unu nokto sur la lago, kaj poste, kaj poste !

- Ho Eliza ! *kaj Georgo altiris ŝin al li*, estas tio kio premas al mi la koron ! Nun nia tuta sorto koncentriĝi al unu punkto. Alveni tiel proksime, fariĝi videbla, kaj perdi ĉion ! Mi ne supervivi tion, Eliza.

- Ne timi ion, ŝi diris kun la koro plena de espero. Disinjoro, per sia boneco, ne veniginti nin ĉi tien, se li ne voli protekti nin ĝis la fino. Ŝajni al mi senti lin proksime al ni, Georgo.

- Vi estas benita virino, Eliza ! *kaj Georgo konvulsie ĉirkaŭbrakis ŝin*. Sed, diri al mi, ĉu ebli ke ĉi tiu grandega favoro esti donita al ni ? Ĉu ĉi tiuj longaj jaroj da sufero kaj da mizero esti finiĝontaj ? Ĉu ni esti liberaj ?

- Mi certi pri tio, Georgo, diris Eliza kun la okuloj

levitaj al ĉielo dum larmoj de espero kaj entuziasmo brilis sur ŝiaj longaj okulharoj. Mi senti ke eĉ hodiaŭ Dio liberigi nin.

- Mi kredi al vi; mi voli kredi al vi, Eliza ! ekkriis Georgo stariĝante. Nu, necesi foriri. *Li malproksimigis ŝin laŭ la longo de sia brako, kaj rigardante ŝin kun admiro :* "Esti vere ke vi fari afablan vireton. Ĉi tiuj mallongaj bukloj rave taŭgi al vi ! Surmeti vian kaskedon, tiel, iomete flanken. Mi neniam vidi vin tiel beleta. Sed la veturilo devi esti ĉi tie. Mi pensi ke S^{ino} Smico maskovesti Henriko^{n}Fl".

La pordo malfermiĝis, kaj respektinda mezaĝa sinjorino eniris, alkondukanta la knabeton, vestitan kiel knabino.

- Kiel bela knabineto ŝi aspekti ! diris Eliza turniganta ŝin por pli bone vidi ŝin. Ni nomi ŝin Henrieto^{n}, ĉu ne ? Ĉi tiu nomo tiel bone konveni al ŝi !

La infano serioze rigardis la strangan kaj novan kostumon de sia patrino. Li silentis, eligis profundajn suspirojn kaj ekzamenis ŝin de sub ŝiaj nigraj bukloj.

- Ĉu Henriko ne plu rekoni panjon ? diris Eliza, kaj ŝi etendis al li ambaŭ manojn.

La infano timeme sin alpremis al la sinjorino.

- Nu, Eliza, kial provi kvietigi ŝin, kiam vi scii ke necesi teni ŝin malproksime ?

- Mi scii ke tio esti infanaĵo, sed mi ne povi elteni ke ŝi eviti min. Ni foriri. Kie esti mia mantelo ? Ha ! Jen ĝi ! Kiel viroj elturniĝi por surmeti siajn mantelojn, Georgo ?

- Porti ĝin tiel ! *Kaj li ĵetis ĝin sur ŝiajn ŝultrojn.*

Eliza imitis sian movadon. "*Ĉu mi ne devi stamfi, fari longajn paŝadojn kaj provi aspekti maltimema ?*"

- Ne provi tion, diris Georgo. Oni renkonti de tempo al tempo modestan junulon, kaj esti pli facile por vi ludi tiun rolon.

- Ha ! Kiaj gantoj ! ekkriis Eliza. Kompato ! Miaj

manoj tute perdiĝi en ili.

- Mi konsili al vi ne demeti ilin, diris Georgo, via gracila maneto perfidi nin ĉiujn. Nun, sinjorino Smico, vi vojaĝi kun ni, kaj vi esti nia onklino, ne forgesi tion !

- Mi aŭdis diri, rekomencis sinjorino Smico, ke homoj malsupreniris al la lago por priskribi al ĉiuj kapitanoj de pasaĝerŝipoj, viron kaj virinon kun malgranda knabo.

- Vere ! diris Georgo. Nu, se ni renkonti ilin, ni sciigi ilin.

La veturilo estis ĉe la pordo, kaj la digna familio kiu ricevis la fuĝantojn, kolektiĝis ĉirkaŭ ili por adiaŭi ilin.

Sinjorino Smico, kiu precize loĝis en Kanado, la loko mem kien iris Georgo, konsentis ĉe la antaŭtago de sia foriro esti rigardata kiel la onklino de eta Henriko. Por kutimigi la infanon kun ĉi tiu nova parencino, oni konfidis lin al ŝi dum du tagoj. Multe da karesoj kaj konsiderinda kvanto da kukoj kaj da kandoj, firmigis intiman ligon inter la bona sinjorino kaj ŝia kvazaŭa nevino.

La veturilo alvenis al la kajo. La du junuloj, aŭ almenaŭ tiuj kiuj esti tiel rigardataj, transiris la tabulon, kaj eniris en la ŝipon, Eliza galante donanta la brakon al sinjorino Smico, kaj Georgo zorganta pri la pakaĵoj.

Li poste iris al la kapitana oficejo. Dum li pagis la prezon de la ŝipirado, li aŭdis du virojn paroli ĉe sia kubuto.

- Mi ekzamenis unu post la alia ĉiujn homojn kiuj enŝipiĝis, diris unu, kaj mi certigas ke ili ne estas ĉi tie.

La voĉo estis tiu de la komizo de la pasaĝerŝipo; li alparolis al nia malnova amiko Markso kiu, kun sia laŭdinda kaj kutima persistemo venis ĝis Sanduskio, flarante sian predon.

- Vi apenaŭ povus distingi la virinon de blankulino, diris ĉi lasta. La mulato ankaŭ estas el tre hela nuanco; unu el liaj manoj estis brulstampita.

La mano kiun Georgo etendiĝis por ricevi la biletojn kaj monerojn iom ektremis; sed li senemocie turnis sin, fikse rigardis per indiferenta okulo tiun kiu parolis kaj sin direktis per malrapidaj paŝoj al la alia fino de la ŝipo, kie Eliza atendis lin.

Sinjorino Smico kaj la eta Henriko rifuĝis en la ĉambron de la sinjorinoj, kie la sombra kaj miriga beleco de la kvazaŭa knabineto altiris al ili multajn komplimentojn.

La sonorilo donis la ekvetursignalon, kaj Georgo sentis la kontentiĝon vidi Marksonⁿ retroiri la tabulon kaj atingi la marbordon. Kiam la irado de la ŝipo metis inter ili netraireblan distancon, li eligis kvietiĝan suspiron.

La tago estis bonega; la bluaj ondoj de la Lago Erio trembrilis kaj dancis en la suno; malvarmeta venteto blovis de la marbordo, kaj la majesta ŝipo kuraĝe trasulkis la lazuran kampon.

Ho ! Kian nekonatan mondon enhavas homa koro ! Dum Georgo kviete promenis sur la ferdeko, kun sia timema kunulo ĉe siaj flankoj, kiu suspektintus ĉion kio brulis ene de li ? La feliĉo kiu proksimiĝis, ŝajnis tro granda, tro bela, por iam fariĝi realaĵo. Li ĉiumomente sentis malprecizan teruron pri tio kio povus ekokazi kaj forŝiri ĝin de li.

Tamen la ŝipo rapide antaŭeniris. La horoj forflugis, kaj la feliĉega angla marbordo fine aperis klara kaj distingebla. Marbordo ensorĉita de ĉiopova talismano kies la nura kontakto dissolvas la nigran magion de la sklaveco kaj dispelas ĝiajn sorĉaĵojn, ne gravas en kiu lingvo ili estis prononcitaj, aŭ kiu potenco fortikigis ilin.

Edzo kaj edzino staraj sin tenis unu la alian per la brako kiam la ŝipo alproksimiĝis al la urbeto Amherstburgo, en Kanado. La spirado de Georgo mallongiĝis kaj rapidis; nebulo kolektiĝis antaŭ liaj okuloj; li silente premis la maneton kiu tremis en la lia. La sonorilo sonoris, la ŝipo albordiĝis.

Apenaŭ sciante tion kion li faras, li kolektis la pakaĵojn kaj kunigis siajn kunulojn. La grupeto estis surterigita.

Ili restis senmovaj ĝis kiam la ŝipo malproksimiĝis. Sin ĵetante tiam en la brakojn unu de la alia, la edzo, la edzino kaj la mirigita infano falis surgenue kaj levis siajn korojn al Dio !

Ĝi estis, ĝi estis iri de morto al gloro,
Kaj de la funebra sonorado al venkokantoj;
Ĝi estis el la nigra peko, la detruita imperio,
Kaj el la luktoj de malbono, la libera spirito elirita;
La ĉeno de morto kaj de infero rompita,
Mortemulo vestita de senmorteco,
Kaj la kompato, sur la sojlo de la Elizeo,
Krianta : Estu feliĉa dum Eterneco !

John Brainard (1795-1828)

Sinjorino Smico alkondukis ilin al la gastama hejmo de bona misiisto, kiun kristana bonfarado metis tien, kiel la paŝtisto de la vagantaj ŝafoj kiuj senĉese venas serĉi rifuĝejon sur ĉi tiu marbordo.

Kiu povus diri la ĝojplenon de ĉi tiu unua tago de libereco ? Ĉu ĉi tiu senso de libereco ne estas pli valora, pli nobla, ol iu ajn el la kvin aliaj ? Agi, paroli, spiri, eliri, reveni, sen okulo kiu spionas vin, liberigita de ĉia danĝero ! Kiu povus rakonti la kvietecon de ĉi tiu ripozo fine malsuprenirita sur la liton de la libera homo, protektita de leĝoj kiuj garantias al li la rajtojn kiujn Dio donis al ĉiu homo ? Kiom la vizaĝo de ĉi tiu kara dormanta infano aperis al sia patrino pli bela tra la memoro pri la mil danĝeroj kiujn li riskis ! Kia neebleco dormi en plena posedo de tiom da feliĉo ! Kaj tamen ĉi tiuj du rifuĝintoj ne havis eĉ unu colon de tero, ne tegmenton kie sin ŝirmi ! Ili elspezis ĝis sian lastan dolaron; al ili restis nenion pli ol la birdoj de la ĉielo kaj la floroj de la kampoj, kaj pro la troo de sia ĝojo, ili ne

povis dormi.

Ho vi kiu forigas la liberecon de la homo, kiajn parolojn vi trovos por pravigi vin antaŭ Dio !

39. Venko.

Dankon al Disinjoro kiu donas venkon.

Ĉu pli ol unu el ni ne sentis, en la malglata kaj peniga vojo de la vivo, kiom estintus pli facile al li en certaj tempoj morti ol vivi ?

La martiro, antaŭ terura morto pro angoro kaj torturo, trovas en sia teruro mem, ekscitilon, potencan spronon. Estas batalo, lukto kaj, sekve, ardo, kuraĝo, viviga ektremo, kiu tra la dolora krizo portos la animon al la sojlo de la eterna gloro, de la eterna ripozo.

Sed vivi por eluziĝi, tagon post tago, sub malnobla, amara, senvaloriga, premanta sklaveco; senti ĉiun nervon malstreĉiĝi, malfortiĝi; ĉiun senton malvigliĝi; ĉiun komenco de penso estingiĝi - malrapida, daŭra, bestiga turmento de la animo, en kiu la vivo fluas interne, sanganta guton post guto, horon post horo - Ha ! Tie estas la vera provilo de tio kio la koro de viro aŭ virino enhavas kiel puran oron !

Kiam, vizaĝo kontraŭ vizaĝo kun sia torturisto, Tomo aŭskultis liajn minacojn, kaj kredis funde de la animo, ke lia lasta horo batis, lia koro ŝvelis de kuraĝo. Ŝajnis al li ke li kapablus elteni la torturojn, la fajron, ĉion, kun la bildo de Jesuo kaj la ĉielo tiel proksime. Sed la tirano estis for, kaj kiam la nuna ekscito kvietiĝis, revenis la doloro de liaj vunditaj kaj lacaj membroj, revenis la sento de lia tute malnobligita, senŝanca kaj senespera stato; kaj la tago pasis sufiĉe malbone.

Longe antaŭ ol liaj vundoj estis fermitaj, Lagrizo insistis por ke oni rekomencis regule laborigi la negron sur la kampo. Tiam rekomenciĝos la sinsekvaj plugadoj, la laciĝoj

amasigitaj sur la laciĝoj; la ofendoj de ĉiuj horoj, pliseverigitaj de tio kion povas elpensi la malamikeco de malnobla kaj perversa spirito. Eĉ en senĝeneco kaj libereco, ni scias tion ke, malgraŭ la faciliĝoj kiuj akompanas ĝin, la fizika sufero kaŭzas incitiĝemon. Tomo ĉesis miri pri la agresema kaj malgaja humoro de siaj samsortuloj. Bedaŭrinde, tiu kvieta, feliĉa karaktero, kutimo de lia tuta vivo, preskaŭ cedis al la senĉesaj atakoj de la samaj plagoj. Li promesis al si iom da libertempo por legi sian Biblion; sed tie, ne estis libertempo. Dum la ĉefsezono, ne plu estis dimanĉoj, aŭ paŭzoj, aŭ ripozoj. Lagrizo senĉese instigis ĉiujn siajn manojn. Kaj kial ne ? Li tiel faris pli da kotono kaj gajnis sian veton. Se li cetere eluzus kelkajn negrojn ? Nu ! Li reaĉetus pli bonajn. Unue Tomo, revenante de la laboro, ĉiun vesperon, kutimis legi unu aŭ du versiklojn, ĉe la flagranta brilo de la flamo. Sed post la kruela traktado kiun li spertis, li revenis tiel elĉerpita, tiel suferema, ke lia kapo turniĝis, liaj okuloj malfortiĝis kiam li strebis legi, kaj li sentis sin devigita kuŝiĝi, kun la aliaj, en la lasta stato de elĉerpiĝo.

Ĉu necesas miri ke, meze de tiel profundaj mallumoj, la religia sereneco, la fido kiu ĝis nun vigle subtenis lin, ŝanceliĝis ? La plej terura problemo de nia mistera vivo sin prezentis konstante antaŭ li : dispremitaj, ruinigitaj animoj, la triumfo de malbono, kaj Dio muta. Semajnoj, monatoj fluis; Tomo luktis, kun la animo senkuraĝa kaj malgaja. Li pensis pri la letero skribita de f^{ino} Ofelio al siaj geamikoj de Kentukio, kaj fervore preĝis al Dio sendi al li liberigon. Poste, tagon post tago, li atendis, kun neklara espero, vidi veni iun senditan por elaĉeti lin. Neniu venis, kaj li volintus elŝiri el sia sino la amarajn pensojn. Estis do vane servi Dion, Dio tiamaniere forlasis lin ! Kelkfoje li renkontis Kasiso^{n}; pli malofte, alvokita al la domo, li ŝtele ekvidis la melankolian

vizaĝon de Emelina; sed li komunikiĝis nek kun iu, nek kun la alia. Kaj vere, mankis tempo por konversacii kun iu ajn.

Iun vesperon, tute detruita, li kaŭris apud la duone estingitaj brulaĵoj, antaŭ kiuj kuiris lia mizera porciumo. Li ĵetis du aŭ tri branĉetaĵojn sur la braĝon, provis vigligi iom da flamo, kaj malfermis sian Biblion. Tie estis markitaj tiom kaj tiom da ekstraktoj, kiuj tiel ofte penetris lian animon, paroloj de la patriarkoj kaj viziuloj, de poetoj, de saĝuloj, kiuj ekde la komenco de la jarcentoj instruis la kuraĝon al homo : voĉoj eĥiĝantaj meze de ĉi tiu grandega svarmo da atestantoj kiuj ĉirkaŭas nin dum la luktoj de la vivo. Ĉu la Parolo perdis do sian forton ? Ĉu liaj malfortiĝantaj okuloj, liaj malakrigitaj sensoj, ne plu respondis al la voko de ĉi tiu potenca inspiro ? Kun profunda suspiro, li remetis la libron en sian poŝon. Subita ekridego ektremigis lin. Li levis la kapon. Lagrizo staris antaŭ li.

- Nu, maljuna negro, diris la mastro, vi trovas ke via religio malbone funkcias, laŭ tio kio ŝajnas ! Mi antaŭsentis ke mi fine enirigus iom da komuna saĝo en vian kapon, tra via lano !

La kruela sarkasmo estis pli malbona ol la malsato, la malvarmo, la senhaveco. Tomo silentis.

- Vi estas stultulo, ĉar mi volis bonon por vi, kiam mi aĉetis vin, daŭrigis Lagrizo. Dependis nur de vi esti pli feliĉa ol Tembo aŭ Kimbo, ili ambaŭ kune. Anstataŭ esti draŝita, malvenkegita, ĉiuj du tagoj, vi levintus la kapon inter viaj samuloj, kaj viavice bastonintus la aliajn negrojn ! De tempo al tempo ni revigligintus vian koron per bona glaspleno da varma punĉo kun viskio. Nu ! Tomo, prudentiĝu ! Forĵetu tiun malnovan amason da ĉarlatanaĵoj en la fajron, kaj aliĝu al mia Kredo !

- Disinjoro antaŭgardu min de tio ! diris fervore Tomo.

- Vi vidas ke Disinjoro ne tute zorgas pri vi; se li

zorgus, li unue ne lasus vin fali en miajn ungegojn. Via religio, ĉu vi bone aŭdas, estas nur amaso da mensogoj kaj da trompoj. Mi sperte scias la aferon malfacila, Tomo, sed vi perdos nenion samopinii kiel mi. Mi ja estas persono kaj mi povas fari ion !

- Ne, mastro, diris Tomo, mi rezistadi. Ĉu Disinjoro helpi min aŭ ne helpi min, mi alkroĉiĝi al li, mi kredi al li ĝis la fino !

- Duobla stultulo ! Maljuna trompato ! *kriis Lagrizo kraĉante sur lian vizaĝon, kaj forpuŝante lin per la piedo*. Ne maltrankviliĝu, ja ! Mi persekutos vin, mi subigos vin, vi vidos ! *Kaj Lagrizo malproksimiĝis*.

Kiam, sub tro peza ŝarĝo, la premita sinkanta animo malsupreniras al la lastaj limoj de humiligo kaj de senkuraĝiĝo, subite pro fortega reago okazas ke ĉiuj fibroj, ĉiuj nervoj streĉiĝas, kaj repuŝas la premegan pezon; tiam el la plej neeltenebla angoro naskiĝas neesperita reveno de forto kaj kuraĝo. Tiel estis kun Tomo. La malpiaj mokoj de lia mastro regresis lian lacigitan animon ĝis la plej malalta punkto. Kaj, kvankam la mano de la fido ankoraŭ tenis la eternan rokon, tio estis senpotenca kaj senespera teno. Tomo restis konsternita, klinita apud sia fajro. Subite ĉio kio ĉirkaŭis lin elviŝiĝis. Antaŭ li staris la bildo de la Filo de la homo, kronita de dornaĵoj, frapita, sanganta. Tomo, kortuŝita de admiro kaj de respekto, kontemplis la majestan paciencon de la vizaĝo. La profundaj okuloj, plenaj de tuŝanta tenereco, ravis lin ĝis funde de lia koro; lia animo vekiĝis; li etendis siajn du manojn, surgenue adorkliniĝinta. Grade la vizio lumiĝis; la dornoj plilongiĝis al lumradioj, kaj en nedirebla pompo, li vidis la dian kaj gloran vizaĝon kliniĝi super li, kaj voĉo diris : " *Tiu kiu venkos, sidos sur mia trono kun mi; ĉar ankaŭ mi venkis, kaj mi sidas dekstre de mia Patro*".

Kiom longe Tomo restis tie, li ne sciis tion. Kiam li rekonsciiĝis, la fajro estingiĝis, liaj vestaĉoj malsekiĝis per glacia roso; sed la timinda krizo finiĝis; kaj en la ĝojo kiu inundis lin, li nun sentis nek malsaton, nek malvarmon, nek malestimon, nek forlason, nek mizeron. De la plejprofundo de lia animo, ekde tiu horo, li forskuis ĉiujn surterajn ligojn, disiĝis de ĉiuj esperoj de la nuna vivo kaj proponis sian propran volon kiel holokaŭsto al Eternulo. Tomo kontemplis, sur la senlima volbo, la silentajn kaj senmortajn stelojn, neperfektajn bildojn de la miriadoj de anĝelaj estuloj kies la rigardoj malleviĝas al la homo. Kaj la nokto eĥis la triumfajn paroloj de himno kiun li ofte kantis dum pli feliĉaj tagoj, sed neniam kun tia pleneco de ĝojo :

La tero fandiĝos kiel neĝo,
Kaj la suno forglitos;
Sed Disinjoro kiu protektas nin,
Ĉe mia dekstro stariĝos !
Kiam mia mortema ekzisto
La karno, la sensoj malaperos;
Sen vualo, la eterna gloro,
Venos radii sur mia frunto.
Miloj da milionoj da jaroj,
Antaŭ ni vane fluos;
Niaj feliĉegaj destinoj
Neniam konos finon.

Se eĉ malmulte ni konscias pri la religiaj rakontoj kiuj cirkulas inter la sklavoj, ni scias ke nenio estas pli ofta ol tiaj vizioj kiel ĉi tiu. Ni ofte havis okazon aŭdi mirindajn rakontojn raportitajn kun naiva fido de ĉi tiuj simplaj kaj kredantaj homoj. Psikologoj parolas pri stato en kiu la emocioj fariĝas tiel postulemaj, la imago tiel potenca, ke la sensoj obeas al ili, kaj korpigas la nematerian ideon per videbla formo. Kiu cetere limigos la uzon kiun la Ĉiopovulo

kapablas fari per la fakultoj kiujn li dotis nin ? Kiu indikos al li liajn vojojn por revigligi la prematan animon ? Ha ! Se la sklavo, forlasita de ĉiuj, kredas ke Jesuo manifestiĝis al li, ke Kristo parolis al li, kiu kuraĝos kontraŭdiri lin ? Li, la Savanto, ĉu li ne diris ke lia misio, en ĉiuj jarcentoj, estas resanigi la rompitajn korojn kaj restarigi libera tiun kiun humiligis lia ĉeno !

Kiam la grizecaj lumetoj de la matenkrepusko vekis la dormantojn por la laborado de la plantejoj, inter ĉi tiuj tremantaj malfeliĉuloj en vestaĉoj, estis iu kiu paŝis per ĝoja kaj triumfa paŝado. Ĉar, pli firma ol la grundo kiun li surpaŝis, lia neŝancelebla fido miksiĝis kun la eterna amo de la Ĉiopovulo.

Ha ! Nun provu per viaj tutaj fortoj, Lagrizo ! La lastaj angoroj, la malfeliĉo, la humiligo, la manko, perdo de ĉio, nur plifruigos la horon kiam li stariĝos pastro kaj reĝo, laŭ Dio !

Ekde tiu momento neatencebla horizonto de paco ĉirkaŭis la koron de la humila subpremato. La Savanto, ĉiam ĉeestanta, elektis lin por sia templo. For nun estas la dolorigaj korŝiroj de la surteraj bedaŭroj; for estas la incitaj fluktuoj de esperoj, deziroj kaj timoj. La homa volo tiel longe sanganta en la lukto, hodiaŭ klinita, tute miksiĝis en dian volon. Estis de nun tiel mallonga en liaj okuloj, ĉi tiu resto de vivo ! Tiel proksimaj, tiel brilaj aperis la eternaj feliĉpromesoj, ke la lastaj suferoj, la superaj angoroj, devis esti skuitaj, nerimarkitaj. Ho morto ! Kie estas via pikilo ?

Ĉi tiu ŝanĝo estis evidenta al ĉiuj okuloj. La vigleco, la ĝojego revenis al Tomo, kunigitaj al iu kvieteco kiun nenia insulto, nenia ofendo ne plu kapablis ĝeni.

- Kiu diablo posedas Tomo^{n} ? *demandis Lagrizo al Tembo*. Tiuj lastaj tempoj, li estis veaspekta, kaj nun jen li revigliĝinta kiel grilo !

- Ne scii, mastro; eble li komploti iun forfuĝon.

- Mi sufiĉe ŝatus vidi tion, *diris Lagrizo kun sovaĝa dentgrincado*. Kion vi diras pri tio, Tembo ?

- Esti io por rideksplodi ! Ho ! Ho ! Ho ! *diris la nigra gnomo, ridante per flataĉa rido*. Disinjoro, kia farso ! Vidi lin sinki en la ŝlimon, esti forpelita kaj malimpliki sin de inter la dornaĵoj kun la hundoj persekutantaj lin ! Ĉu mi ne ridegi, tiun alian fojon kiam ni rekapti Molio[n] ? Ĉu mi ne kredi ke ili lasi al ŝi nur la ostojn antaŭ ol mi povi eltiri ŝin el iliaj dentoj ? Ho ! Ŝi certe ankoraŭ konservi profundajn spurojn de ĉi tiu distraĵo !

- Mi vere esperas, daŭrigis Lagrizo, ke ŝi konservos ilin ĝis sia tombofoso. Sed, Tembo, havu okulon sur li; kaj se la negro havas fantazion forkuri, stumbligu lin.

- Fidi vin al mi, mastro ! Mi alkroĉi por vi la lavurso[n](13). Ho ! Ho ! Ho !

Ĉi tiu konversacio okazis dum Lagrizo surĉevaliĝis por iri al la najbara urbo. Revenante dumnokte, li havis la ideon deturniĝi kaj galopi ĉirkaŭ la domaĉaroj, por iom vidi ĉu ĉio okazis laŭ la reguloj.

Estis dum belega lunlumo. La ombroj de la graciaj arboj de la avenuo desegnis sur la grundo sian elegantan foliaron kun ĉiuj ĝiaj eltranĉaĵoj, kaj en la aero regis tiu silenta paco, kiun ŝajnus malpie malkvietigi. Lagrizo alproksimiĝis al la kabanoj kiam li kredis percepti kanton. Tiaj sonoj, en tia loko, estis malofta afero. Li haltis por aŭskulti. Melodia, vigla tenorvoĉo kantis :

Tuj kiam en ĉielaj loĝejoj
Mia titolo klariĝi,
Ne gravi la mallumaj horoj,
La suferoj de la karno !
Ne gravi ke oni ofendegi min,
Ne gravi al mi la zorgoj !
La infero, Satano, kaj lia koleregо,

Al ĉio ĉi mi spiti.

Ha ! Sturmi kontraŭ mia vivo,
Malfeliĉo, ĉagreno kaj abomeno,
Esti supren ke esti mia patrio,
Mia Dio, mia ĉielo kaj mia ĉio !

Himno de Isaac Watts.

- Ha ! Ha ! Estas tiel ! *diris al si Lagrizo.* Ho ! Ĉu vere ? Li frenezas ! Kiel mi malŝatas tiujn diablajn himnojn de metodistoj ! Prenu, negro, *li ekkriis surprize falante sur Tomo*n *kaj levante al li sian rajdovipon.* Kiel vi kuraĝas fari tiun bruegon kiam vi devus esti kuŝita ? Fermu por mi vian maljunan malbenitan nigran faŭkon, kaj reiru hejmen kiel eble plej rapide, ĉu vi aŭdas ?

- Jes, mastro, *diris Tomo kun gaja submetiĝo, kaj li ekstaris por obei.*

La feliĉa kaj trankvila mieno de la nigrulo kolerigis Lagrizon; li deturnigis sian ĉevalon al la flanko de Tomo, kaj frapis al li la kapon kaj la ŝultrojn per sia vipo.

- Jen ! Hundo ! *li diris, vidu ĉu tio ŝajnas al vi bona !*

Sed la batoj falis nur sur la karnon, ne plu kiel antaŭe sur la koron. Tomo restis tute submetita kaj trankvila; kaj Lagrizo ne povis kaŝi al si ke granda parto de lia potenco super lia humila sklavo estis detruita. Ĉe la momento kiam tiu ĉi malaperis en la kabanon, kaj kiam la mastro rapide turnis sian ĉevalon, fulmo, iu el tiuj viglaj flamoj kiujn la konscio kelkfoje sendas tra la plej nigraj, la plej perversaj animoj, subite frapis la spiriton de Lagrizo. Li komprenis ke estis Dio mem kiu staris inter li kaj lia viktimo, kaj li blasfemis lin. Ĉi tiu humila, muta negro, kiun nek insultoj, nek minacoj, nek batoj, nek kruelaĵoj povis malkvietigi, vekis en li tiun voĉon kiun la mastro de Tomo, en la pratempo, tiris el la fundo de la brusto de la demonhavanto, tiun voĉon kiu kriis : "*Kio estas inter ni kaj vi, Jesuo de Nazareto ? Ĉu vi*

venis ĉi tien por turmenti nin antaŭ la tempo ?" (Mateo 8,29).

La animo de Tomo superfluis de kompato, de teneraj simpatioj por la kompatindaj mizeruloj kiuj ĉirkaŭis li. Ĉiu persona doloro malaperis por ĉiam; sed li sentis sin vorita de la arda deziro verŝi sur siajn samsortulojn parton de la neelĉerpebla trezoro da konsolo, da ĝojo, da paco, kiu de la ĉielo malsupreniris tra li. La okazoj estis maloftaj, estas vere; sed, irante kaj venante de la plantejoj, kaj dum la laborhoroj, li trovis rimedon por etendi helpan manon al la laculo, la mizerulo, la senesperulo. Unue ĉi tiuj kompatindaj konsternitaj geestuloj apenaŭ kapablis kompreni; sed, kiam la kompataj klopodoj daŭris dum semajnoj, monatoj, funde de tiuj paralizitaj koroj, delonge mutaj kordoj komencis vibri. Laŭ neperceptеblaj gradoj, ĉi tiu stranga viro, pacienca, silenta, ĉiam preta porti la ŝarĝon de ĉiu, kiu neniam petis helpon, kiu sin tenis flanke, kiu, laste servita, ricevanta la plej malmulte, sin montris ĉiam preta dividi ĉi tiun malmulton kun tiu kiu bezonis tion; viro kiu, en la malvarmaj noktoj, cedis sian pecon de kovrilo por helpi kompatindan virinon tremantan pro febro, kaj kiu plenigis la korbojn de la plej malfortuloj, kun la terura risko trovi la sian malpli pezan; tiu kiu, persekutita de la senindulga krueleco de ilia komuna tirano, neniam kunigis sian insulton al la insultoj, sian malbenon al la malbenoj; ĉi tiu viro finfine komencis akiri eksterordinaran superecon super ili. Kiam, post la ĉefsezono, la dimanĉoj estis redonitaj al la sklavoj, pluraj kolektiĝis ĉirkaŭ Tomo por aŭdi lin paroli pri Jesuo. Ili deziris kunsidi ie ajn, por aŭskulti lin, por kanti kaj preĝi kune. Sed Lagrizo tute ne toleris tion; kun multaj ĵuroj kaj abomenoj, li disigis la grupojn, kaj malsukcesigis ĉiujn provojn. La bona novaĵo tiam povis cirkuli nur sekrete, de orelo al orelo. Sed kiu diros kun kia ravo, plurajn el ĉi tiuj kompatindaj ekzilitoj, kies vivo estis nur peza kaj malĝoja

vojaĝo al malhela kaj nekonata celo; kun kia ekzaltiĝo, ili ricevis la anoncon de pardonema Redemptoro kaj de ĉiela patrio ! La misiistoj asertas ke estas la afrika raso kiu, inter ĉiuj, ricevas la evangelion kun la plej multe da obeemo. Efektive, ĉu lia naturo ne estas tute kredo kaj fido ? Semoj de la veroparolo, hazarde ĵetitaj, portitaj de kelka favora venteto en unu el ĉi tiuj naivaj kaj nesciantaj animoj, kelkfoje ĝermis tie, kaj produktis fruktojn pli abundajn ol tiujn akiritajn de pli alta kaj pli klera kulturo.

La kompatinda mulatino kies la simplaj kredoj estis konfuzita de la lavango da kruelaĵoj kaj maljustaĵoj falita sur ŝi, sentis sian animon revivigita de kelkaj himnoj, kelkaj fragmentoj de la sanktaj Skriboj, kiujn la humila misiisto flustris de tempo al tempo al ŝia orelo, kiam ili iris al la laboro kaj revenis de tie. Ne estis iu, ĝis la sovaĝa kaj duonperdita spirito de Kasiso, kiu ne trankviliĝis, kiu ne mildiĝis pro ĉi tiu dolĉa kaj diskreta influo.

Pelita en malespero, preskaŭ en frenezo, de tuta vivo de agonio kaj angoro, Kasiso decidis en sia animo ke ŝi havos sian punhoron, kiam ŝia propra mano venĝos al sia subpremanto la kruelaĵojn, pri kiuj ŝi estis aŭ atestanto, aŭ viktimo.

Iun nokton, ĉiuj loĝantoj de la kabano de Tomo profunde dormis, kiam li estis abrupte vekata, kaj vidis la vizaĝon de Kasiso aperi ĉe la fenestro, aŭ pli ĝuste ĉe la truo kiu rolis kiel ĝi. Ŝi silente gestis al li por ke li venu eksteren.

Tomo eliris el la kabano; povis esti inter la unua kaj la dua matene. La luno brilis, serena, larĝa kaj pura. Kiam la kvieta lumeto falis sur la grandaj nigraj okuloj de Kasiso, Tomo rimarkis la brilan fulmon, tiel diferencan de ĝia kutima esprimo de malgaja malespero.

- Ĉi tie, pastro Tomo, *ŝi diris, venu ! Kaj metante sian maneton sur la fortikan pojnon de la nigrulo, ŝi kuntiris lin*

kun tiom da forto, kvazaŭ ŝiaj fingroj estus el ŝtalo. Venu ! Estas novaĵoj por vi.

- Kio ĝi esti, Fraŭlino Kasiso ? demandis Tomo maltrankvile.

- Tomo, ĉu vi deziras liberecon ?

- Mi havi ĝin, Fraŭlino, kiam Dio voli.

- Vi povas havi ĝin ĉi nokte mem, *diris Kasiso energie.* Venu !

Tomo hezitis.

- Nu, *ŝi flustris fiksante siajn nigrajn okulojn al liaj.* Rapide ! Li dormas laŭ peza dormo. Mi metis tion kio necesis en lia rumo, por ke la dormo daŭru. Kial mi ne havis pli, kaj via helpo estis senutila. Sed, venu ! La malantaŭa pordo estas malfermetita; estas hakilo tute kontraŭ ĝi. Mi metis ĝin tie; la pordo al lia ĉambro estas malfermita… Mi farintus tion, sed mi havas la brakojn tro malfortaj. Venu ! Venu !

- Ne; ne por dekmil mondoj, Fraŭlino Kasiso ! *diris firme Tomo, haltante kaj retenante ŝin, ĉar ŝi volis kuntiri lin.*

- Sed pensu pri tiom da kompatindaj estuloj kiujn ni povos tuj malsklavigi ! Ni iros post ien en la marĉojn, sur insulon, por kune vivi tien. Samaj aferoj okazis, mi scias tion. Kia vivo ne estus pli preferinda ol la nia !

- Ne ! *diris rezolute Tomo*, ne ! Neniam la bono veni de malbono. Mi prefere distranĉi mian dekstran manon !

- Tiam mi faros tion sola, *diris Kasiso, ankoraŭ paŝanta.*

- Ho ! Fraŭlino Kasiso ! *Kaj Tomo ĵetis sin antaŭ ŝin.* Per la amo de la kara Disinjoro, kiu morti por vi, ne vendi vian altvaloran animon al la demono ! Nenio krom malbono povi veni de malbono. Disinjoro ne voki nin al venĝo; ni devi suferi kaj atendi sian horon.

- Atendi ! diris Kasiso; ĉu mi ne atendis ? Atendis ĝis kiam mia kapo turniĝas, kiam mia koro mankas al mi ! Kiom li

ne suferigis al mi ? kiom li ne suferigis centojn da mizeraj geestuloj? Ĉu li ne elpumpas la sangon de viaj vejnoj ? Mi estas alvokita !... Ĉu vi aŭdas !... Lia horo venis; mi havos la sangon de lia koro !

- Ne ne ne ! *diris Tomo retenanta inter la siaj, la du kuntiritajn manetojn*. Ne, kara kompatinda perdita animo, vi ne fari tion ! La kara benata Disinjoro neniam verŝi alian sangon krom la sian, kaj li verŝi ĝin por ni, ni siaj malamikoj. Ho ! Ke Disinjoro helpi nin kaj instrui nin sekvi lin, ankaŭ ami tiujn kiuj malami nin !

- Ami ! *rekomencis Kasiso kun sovaĝa rigardo*, ami tiajn malamikojn ! Ho ! Tio ne eblas de geestuloj el karno kaj sango !

- Ne, Fraŭlino, tio ne ebli, *kaj Tomo levis siajn okulojn supren*. Sed Li ja povi inspiri tion al ni, kaj tio esti la venko. Kiam ni sukcesi ami, preĝi por ĉiuj, tra ĉio, ne plu esti batalo, la venko esti gajnata, Gloro esti al Dio ! *Kaj, kun hakita voĉo, kun larmoplenaj okuloj, la nigro levis sian rigardon al ĉielo*.

Kaj estas tie, ho Afriko ! La lasta alvokita inter la nacioj. Alvokita al la dornokrono, al la vipo, al la sangoŝvito, al la agonio sur kruco. Tie estas via venko ! Tra tio vi regos kun Kristo kiam lia regno venos sur teron.

La profunda fervoro de la sentoj de Tomo, la penetranta mildeco de lia akcento, liaj larmoj, falis kiel ĉiela roso sur la febran kaj kolereman animon de la kompatinda virino. La malhela fajro de ŝiaj okuloj mildiĝis; ŝi mallevis siajn palpebrojn, kaj Tomo sentis la nervozan tenon de ŝia mano malstreĉiĝi, kiam ŝi daŭrigis :

- Ĉu mi ne diris al vi ke la malbona spirito sekvis min ? Ho ! Patro Tomo, mi ne scias preĝi. Ha ! Se mi kapablus ! Sed mi ne plu preĝis ekde kiam miaj infanoj estis venditaj ! Tio kion vi diras, estas bona, mi scias ke ĝi devas esti bona.

Sed kiam mi provas preĝi, mi nur povas malami kaj malbeni. Mi ne plu kapablas preĝi !

- Kompatinda animo ! *diris Tomo kompateme*. Satano voli allogi vin al li. Li voli dispremi vin kiel tritikon sur la draŝejo. Mi preĝi al Disinjoro por vi. Ho ! Fraŭlino Kasiso, turni vin al la kara Sinjoro Jesuo. Li veni resanigi la rompitajn korojn kaj konsoli tiujn kiuj plori.

Kasiso restis stara, silenta, kaj larmoj falis per dikaj gutoj de ŝiaj mallevitaj okuloj.

- Fraŭlino Kasiso, *reparolis heziteme Tomo post esti silente rigardanta ŝin dum momento;* se vi ja povi foriri de ĉi tie, se la afero ebli, mi konsili al vi kaj Emelina fuĝi. Se tio ebli sen murdo aŭ sango verŝita, sed ne alimaniere.

- Ĉu vi deziras provi tion kun ni, pastro Tomo ?

- Ne, diris Tomo. Esti tempo kiam mi esti volanta tion; sed Disinjoro doni al mi laboron inter ĉi tiuj kompatindaj animoj, kaj mi voli resti apud ili, kaj porti mian krucon kun ili ĝis la fino. Pri vi, tio esti malsama. Esti kaptilo por vi. Esti tro forte por ke vi elteni tion. Pli bone valori forkuri, se ebli !

-Mi ne konas pri tio alian elirejon krom la tombon, diris Kasiso. Ne ekzistas besto aŭ birdo kiu ne trovas sian loĝejon. Eĉ la serpentoj, la aligatoroj havas sian ripozejon kaj sian ŝirmejon; sed por ni, tio ne estas. Tien, en la plej densa de la marĉoj, iliaj hundoj ĉasosekvus nin. Homoj, aferoj, ĉio estas kontraŭ ni. Eĉ la bestoj enviciĝas kontraŭ ni. Kaj kien iri ?

Tomo restis muta; fine li diras : "Tiu kiu savi Danielo en la leonkavo, kiu eltiri la tri infanojn el la fajrego; tiu kiu paŝi sur la maro kaj ordoni al la ventoj kvietiĝi, tiu esti viva ! Mi havi fidon ke li povi liberigi vin. Provi, kaj mi preĝi per mia tuta animo; mi preĝi por vi".

Laŭ kia stranga leĝo, okazas ke ideo, delonge

malakceptita, subite ekbrilas en nova lumo, kaj la ŝtono, ĵetita al niaj piedoj kiel senutila, subite brilas laŭ brilo de diamanto ?

Kasiso tiom kaj tiom foje remaĉis en sia kapo ĉiujn probablajn aŭ eblajn planojn de fuĝo, kaj malakceptis ilin kiel neefektivigeblajn. Ĉi momente iu projekto aperis en ŝia menso kaj ŝajnis al ŝi tiel simpla, tiel facila en ĉiuj ĝiaj detaloj, ke la espero tuj vekiĝis.

- Pastro Tomo ! Mi provos, ŝi subite diris.

- Amen, reparolis Tomo, kaj ke Disinjoro helpi vin !

40. La Strategio.

La vojo de la maliculoj estas kiel la mallumo; ili ne scias sur kio ili stumblas. Proverboj, 4, 19.

La subtegmento de la domo kiun Lagrizo okupis, estis, kiel la plej multaj subtegmentoj, vasta spaco, dezerta, polva, tegita de araneaĵoj, speco de brikabrako embarasita de elĵetaĵoj kaj mebloj iam belegaj, hodiaŭ vermoboritaj, importitaj de la riĉega familio kiu antaŭe loĝis sur la plantejo, poste forgesitaj de ĝi en la dezertaj ĉambroj, aŭ forpuŝitaj en la subtegmenton. Unu aŭ du grandegaj skatoloj, kiuj estis uzataj por la transporto de la meblaro, staris malplenaj kontraŭ la muregoj. Mallarĝa tegmenta fenestro lasis avaran kaj dubindan lumeton fali, tra malpuraj kaj fumnigraj vitroj, sur la seĝoj kun alta dorsapogilo, sur la polvokovritaj tabloj, kiuj spertis pli bonajn tagojn. La aspekto de ĉi tiu loko estis malloga kaj tomba; sed tute malgaje kiel ĝi estis, la legendoj kiuj cirkulis inter la superstiĉaj nigruloj, centobligis la terurojn. Iom da jaroj antaŭe, nigrulino, kiu altiris al si la malplaĉon de Lagrizo, estis enŝlosita tie de pluraj semajnoj. Kio tiam okazis ? Ni ne diros tion. La sklavoj parolis pri tio nur per enigmaj murmuroj. Ĉio kion oni sciis, estas ke la kadavro de la kompatindulino estis malsuprenigita de tie supre kaj enterigita. Ekde tiam blasfemoj, malbenoj, bruo de fortegaj batoj meksitaj kun malagrablegaj krioj, kun senesperaj ĝemadoj aŭdiĝis, oni asertis tion, en ĉi tiu timinda loko. La unuan fojon ke io pri tio atingis la orelojn de Lagrizo, li furioziĝis, kaj ĵuris ke tiuj kiuj fabelus pri la subtegmento, scius tion kio ĝi estas. Li katenus ilin tie dum unu semajno.

Ĉi tiu averto ĉesigis la babiladojn, sed neniel malfortigis la fidon kiun oni havis pri la rakonto.

Tamen ĉiu, timante paroli pri tio, iom post iom evitis la ŝtuparon kiu kondukis al la brikabrako. Eĉ la koridoro kiu antaŭis la ŝtupojn fariĝis senhoma, kaj la legendo dronis en forgeson, kiam venis al la kapo de Kasiso utiligi tion por vigligi la superstiĉajn terurojn de Lagrizo, kaj provi la fuĝon de si kaj de sia kunsuferantino.

La dormoĉambro de Kasiso estis tuj sub la subtegmento. Iam, sen konsulti Lagrizo[n], ŝi prenis sur sin, laŭ la plej trudiĝema maniero, transportigi ĉiujn meblojn en ĉambron ĉe la alia fino de la domo. La subalternaj servistoj ŝarĝitaj fari la transloĝiĝon iris, venis, kuris, konkurantaj en fervoro kaj malordo, kiam Lagrizo eniris de ĉevala promeno.

- Hola ! He ! Kasiso ! Kio okazas sub la vento ?

- Nenio; nur, mi volas ŝanĝi dormĉambron, *ŝi rebatis per insidema tono*.

- Kaj kial, bonvolu ?

- Ĉar mi volas tion.

- Kial diable vi volas tion ?

- Mi dezirus povi dormi kelkfoje.

- Dormi ? Nu ! Kiu malpermesas vin dormi ?

- Mi povus diri tion al vi, se vi volas aŭdi tion, *ŝi sekege rebatis*.

- Ĉu vi parolos, sorĉistino ?

- Tio ne indas. Cetere mi supozas ke tio ja ne ĝenus vin. Estas nenio : ĝemoj, batoj, korpoj ruliĝantaj sur la planko dum duonnokto, de noktomezo ĝis tago.

- Korpoj, tie supre, en la subtegmento ! *diris Lagrizo maltrankvile sed grimacante nenaturan ridon*. La korpoj de kiuj homoj, Kasiso ?

Kasiso levis siajn grandajn, nigrajn kaj akrajn okulojn. Ŝi rigardis lin en la vizaĝon kun esprimo kiu tremetigis lin ĝis

en la medolo de la ostoj.

- De kiuj homoj, Simono ! ŝi ripetis. Estas vi kiu povas diri tion al mi. Vi eble ne scias tion !

Lagrizo sakris kaj levis sian rajdovipon por frapi ŝin, sed ŝi elglitis, transpasis la pordon, kaj diris al li, turnante sin : "*Se vi volas dormi en ĉi tiu ĉambro, vi scios pli pri tio ! Provu tion !*"

Kaj ŝi eniris kaj enfermiĝis per ŝlosilo. Lagrizo muĝis, furiozis, minacis disbati la pordon; sed, post pli longa cerbumado, li direktiĝis al la salono kun konfuzita mieno. Kasiso vidis ke la agmaniero efikis, kaj de tiam penis kun malofta lerteco daŭrigi la komencitan faron.

Ŝi enpuŝis en truon en la tegmento la kolon de malnova botelo. La plej malforta vento, renkontanta ĉi tiun mallarĝan pasejon, enŝoviĝis en ĝin kun malgaja kaj plendinda fajfado kiu, ĉe ventopuŝoj, fariĝis akuta, akra kaj sonis al timigitaj oreloj kiel krioj de teruro kaj de malespero.

Ĉi tiuj sonoj, aŭdataj de tempo al tempo de la servistoj, revigligis la malnovan rakonton de fantomoj. Panika teruro kaptis la tutan domon; kaj kvankam neniu kuraĝis diri eĉ unu vorton pri tio al Lagrizo, li sin trovis ĵetita en etoso de teruro.

Ne estas homo pli superstiĉa ol la ateisto. La kristano certiĝas per sia kredo al la ĉiela Patro, saĝa, ĉiopova, kies ĉeesto plenigas la malplenon, per ordo kaj lumo. Sed, pri tiu kiu detronigis Dion, la mondo de la spiritoj estas vere, laŭ la paroloj de la hebrea poeto, nur "*malluma regiono en la ombro de la morto*", kie regas malordo, kaj kie lumo estas nur mallumo. Laŭ li, morto kaj vivo estas vizitadataj de fantomoj, malprecizaj objektoj de hororo kaj timego.

La morala elemento, tiel profunde paralizita en Lagrizo, vekiĝis rilate al Tomo, vekiĝis por esti venkita de la enradikiginta forto de malbono. Sed preĝo, parolo, himno,

kiel tiom da elektraj ŝokoj, skuis interne, kaj produktis tie superstiĉan timegon.

La influo de Kasiso super ĉi tiu viro havis strangan naturon. Samtempe sia posedanto, sia tirano, sia persekutanto, li sciis ŝin tute en sia potenco, en la neebleco esti helpata aŭ defendata, kaj tamen ŝi superis lin. Ĉar la plej kruda viro ne kapablus vivi en konstantaj rilatoj kun energia virino sen sperti ŝian influon. Kiam li aĉetis ŝin, ŝi estis ankoraŭ delikata kaj distingita; li faris al si neniajn skrupulojn por premi ŝin. Sed laŭmezure kiel la tempo, la malhonoro, la malespero hardigis la koron de Kasiso kaj vekis ŝiajn malbonajn pasiojn, ŝi siavice regis lin, kaj li timis ŝin, tiranante ŝin.

Ĉi tiu influo fariĝis pli ĉikanema kaj decidema, ekde kiam duonfrenezeco atribuis al ŝiaj agoj, ŝiaj paroloj, strangan kaj supernaturan karakteron.

Unu aŭ du vesperojn post la transloĝiĝo, Lagrizo sidis en la malnova ĉambro, antaŭ lignofajro kiu elĵetis tien kaj tien dubindajn lumojn. Tio okazis dum uragana nokto; unu el tiuj noktoj kiuj kurigas tra la malnovaj dezertaj domoj, skadrojn da strangaj kaj fantastaj bruoj. La fenestroj skuiĝis, la latŝutroj batis la murojn, kaj la vento, petole distriĝanta, muĝis, bruegis, enŝoviĝis en la kamenon kaj elpelis el ĝi la fumon kaj la cindrojn, kiel la antaŭuloj de legio da spiritoj. Lagrizo aranĝis kontojn kaj legis la ĵurnalojn, dum Kasiso, sidinta en angulo, rigardis la fajron per senĝoja okulo. Li demetis sian gazeton sur la tablon, kaj vidinta flanke malnovan libron malfermitan, kiun Kasiso legis dum vespero, li prenis kaj foliumis ĝin. Ĝi estis unu el tiuj kolektoj de rakontoj de reaperantoj, de abomenaj murdoj, de supernaturaj vizioj, kiuj, krude presitaj kaj iluminitaj, naskas ĉe la leganto specon de fascino tuj kiam oni komencas legi ilin.

Lagrizo paŭtis, levis la ŝultrojn, sed daŭrigis la legadon paĝon post paĝo, ĝis kiam li fine deĵetis la libron kun sakraĵo.

- Ĉu vi ne kredas al reaperantoj, vi, Kasiso ? *li diris prenante la fajroprenilon kaj reaktivigante la fajron.* Mi kredis vin kun sufiĉe da prudento por ne lasi vin timigi per rumorojn.

- Ne gravas tion kion mi kredas, *ŝi rebatis per kruda tono.*

- Surmare, ili provis pli ol unu fojon timigi min, daŭrigis Lagrizo, per iliaj malbenitaj fabeloj kiuj neniam finiĝis; sed ili neniam sukcesis tion. Mi estas iom tro malcedema pri tiaj sensencaĵoj, mi sciigas vin pri tio.

El la fundo de sia malhela angulo, Kasiso fikse rigardis lin. Ŝi havis en la okuloj tiun strangan lumeton kiu dolore impresis Lagrizon.

- Kio finfine estas ĉi tiuj bruoj ? Nenio nur ratoj kaj vento, li daŭrigis. Ratoj, nur ili, faras bruegon de diablo. Mi ofte aŭdis ilin funde de holdo, en la veselo. Pri la vento, Disinjoro, ne ekzistas sono kiun oni ne povas eliri per ĝi.

Kasiso sciis ke Lagrizo estis ĝenata sub la fajro de ŝiaj okuloj. Ŝi ne respondis, sed daŭrigis alligi al li sian fiksan kaj malĝojigan rigardon.

- Nu, virino, ĉu vi parolos ? Ĉu vi ne pensas kiel mi ?

- Ĉu ratoj povas supreniri la ŝtuparon, trairi la koridoron, malfermi pordon interne fermitan, kaj kontraŭ kiu oni metis seĝon ? Ĉu ili kapablas paŝi, paŝi paŝon post paŝo, rekte al via lito, kaj meti manon sur vin… tiel ?

La fajraj okuloj de Kasiso estis alforĝitaj al tiuj de Lagrizo dum ŝi parolis. Li restis ŝtonigita kiel en inkubsonĝo, ĝis kiam ŝi apogis sian glacian manon sur la lian. Tiam li eksaltis malantaŭen kaj sakris.

- Virino, kion vi volas diri ? Neniu faris ĉi tion al vi !

- Ho ! Ne, neniu. Ĉu mi diris al vi ke estis iu ? *ŝi diris*

kun rideto de frosta mokado.

- Sed… ĉu vi reale vidis ion ? Nu, kio okazas, Kasnjo ? Parolu.

- Dependas nur de vi scii tion, enlitiĝu tien.

- Ĉu tio venis de la subtegmento, Kasiso ?

- Tio, kio ?

- Nu, tio pri kio vi parolas.

- Mi parolis pri nenio, *diris Kasiso kun malgaja amareco*.

Lagrizo paŝadis tien kaj reen, kun konfuzita mieno.

- Mi volas iri funden de ĉi tiu afero. Mi vidos tion dum tiu nokto mem. Mi prenos miajn pistolojn.

- Faru, diris Kasiso; enlitiĝu en ĉi tiun ĉambron. Mi volus vidi vin tien ! Pafu per viaj pistoloj, pafu !

Lagrizo stamfis, kaj kolere sakris.

- Ne blasfemu ! Vi ne scias tiun kiu povas aŭdi vin…Ŝŝ ! … Kio tio estas ?

- Kio ? *diris Lagrizo, ektremante*.

Malnova nederlanda horloĝo, kiu staris en angulo de la ĉambro, malrapide sonis.

Tuŝita de malpreciza teruro, Lagrizo nek parolis nek moviĝis. Stara antaŭ li, Kasiso rigardis lin per siaj brilegaj okuloj, kalkulante la batojn.

- Noktomezo ! *ŝi diris*; nun ni tuj vidos ! *Ŝi malfermis la pordon kiu kondukis al la koridoro, kaj atente aŭskultis*.

- Aŭskultu !… Ĉu vi ne aŭdas ?… *Ŝi levis la fingron*.

- Estas la vento, *diris Lagrizo*. Li blovas kiel rabiulo.

- Simono, venu ĉi tien, *murmuris Kasiso metante sian manon sur la lian, kaj kuntirante lin malsupren de la ŝtupoj*. Ĉu vi scias tion kio ĉi tio estas ?… Aŭskultu !

Akuta krio ekbruis laŭlonge de la ŝtuparo. Ĝi eliris el la subtegmento. La genuoj de Lagrizo kunbatiĝis. Li paliĝis pro timo.

- Ĉu vi ne bone farus pretigi viajn pistolojn ? *diris*

Kasiso kun ironio kiu glaciigis la sangon de la viro. Estas la tempo por vidi ĉe la fundo de ĉi tiu afero. Kial vi supreniras ? Ili laboras !

- Mi ne volas supreniri ! *reparolis Lagrizo kun blasfemo.*

- Kial ne ? Reaperantoj ne ekzistas, vi scias tion ! Venu ! *Kaj Kasiso ekĵetiĝis sur la ŝtupojn, kaj turnis sin por vidi ĉu li sekvas ŝin.* Venu !

- Mi kredas ke vi estas la diablo mem ! Bonvolu malsupreniri, sorĉistino ! Ĉi tien, Kasnjo ! Ne iru !

Sed Kasiso, eligante frenezan ekridon, ankoraŭ supreniris. Li aŭdis ŝin malfermi la unuan pordon kiu kondukis al la subtegmento. La kandelo kiun li tenis en mano, estingiĝis, kaj fortega ventopuŝo malsupreniris, kunportante kun si trapikajn, abomenajn kriojn, kaj kiuj ili ŝajnis kriataj en la orelon mem de Lagrizo. Freneza pro teruro, li revenis al la ĉambro. Kasiso sekvis lin post momento, pala, trankvila, senesprima kiel venĝema spirito. En ŝiaj okuloj ankoraŭ brilis la sama malbonaŭgura lumeto.

- Ĉu pri tio vi havas sufiĉe, mi esperas ? ŝi diris.

- La diablo strangolu vin, Kasnjo !

- Kial ? Mi supreniris kaj fermis la pordojn, jen ĉio. Kion do vi imagas ke estas en ĉi tiu subtegmento, Simono ?

- Nenio kiu koncernas vin.

- Bone ! Ĉiaokaze mi estas plenkontenta ne plu dormi malsupre.

Aŭgurinte ke la vento plifortiĝos ĉi tiun vesperon mem, Kasiso anticipe malfermis la tegmentan fenestron. Kompreneble, tuj post la malfermo de la pordoj, la vento malsupreniris kaj estingis la flamon.

Kasiso daŭrigis la saman ludon ĝis tio ke Lagrizo atingis tiun gradon ke li pli ŝatintus meti sian kapon en la faŭkon de leono ol esplori la malbenitan subtegmenton. Tamen ŝi ĉiunokte iris kaj iom post iom amasigis tien sufiĉe da

proviantoj por povi vivteni tie dum kelkaj tagoj. Ŝi ankaŭ transportis tien, dum la tempo kiam ĉiuj dormis, la plej grandan parton de sia vestaro kaj de tiu de Emelina. Ĉi tiuj aranĝoj finitaj, ŝi atendis favoran okazon.

Kaĵolante Lagrizon, kaj kaptante pliboniĝon en lia migra humoro, ŝi sukcesis akompani lin al la najbara urbo, situanta ĉe la Ruĝa Rivero. Kun memoro mirinde akrigita de espero, ŝi observis, dum la iro kaj reveno, ĉiun kurbiĝon de la vojo, kaj formis al si ĝustan ideon pri la necesa tempo por trairi ĝin.

Finfine la decida momento proksimiĝis. Lagrizo rajde iris viziti bienon en la ĉirkaŭaĵo. Ekde pluraj tagoj, Kasiso montris nekutimajn graciecon kaj mildecon, kaj ili estis kune, almenaŭ laŭaspekte, laŭ la plej bonaj kondiĉoj.

Noktiĝis. Emelina kaj Kasiso, enfermiĝintaj en la ĉambro de la unua, haste faris du malgrandajn pakaĵojn.

- Ili sufiĉos, diris Kasiso; nun surmetu vian ĉapelon kaj ni iru, estas la tempo.

- Sed oni ankoraŭ povas vidi nin.

- Tio estas tio kion mi volas, rebatis malvarme Kasiso. Ĉu vi ne scias ke ĉiaokaze ili ĉassekvos nin ? Jen mia plano : ni elglitos nin eksteren tra la malantaŭa pordo kaj kurante preteriri antaŭ la kabanoj. Tembo aŭ Kimbo ne povas malsukcesi ekvidi nin. Ili tuj postkuros nin, kaj ni eniros en la marĉejon. Neeblas al ili sekvi nin tien. Necesos al ili retroiri, alarmi, kunigi la hundojn; kaj dum ili renkontiĝos unu la alian, dum ili faligos unu la alian kiel ili regule faras ĉe ĉiu neatendita evento, ni vadante sekvos la krekon kiu etendiĝas malantaŭ la domo, ĝis kiam ni troviĝos antaŭ la pordo. Ĉi tiu returne paŝado kulpigos la hundojn, ĉar la akvo rompas la spuron. Ĉiuj forlasos la domon por kuri post ni, kaj ni eniros en ĝin tra la malantaŭa pordo, kaj atingos la subtegmenton kie mi pretigis bonan liton en unu el la grandaj skatoloj. Ni nepre loĝos en ĉi tiu subtegmento dum kelka tempo; ĉar li

movos ĉielon kaj teron kontraŭ nin. Li varbos kelkajn maljunajn laborestrojn de aliaj plantejoj, kaj donos al si la plezuron de granda ĉasado. Ili serĉos colon post colo la tutan grundon de la marĉejo. Estas unu el liaj fieraj temoj, ke neniu iam ajn sukcesis eskapi lin ! Li do ĉasu ĝissate !

- Kasiso, kiel via plano estas bone elpensita ! diris Emelina. Nur vi povis imagi ĝin.

La okuloj de Kasiso esprimis nek ĝojon nek triumfon, nur la firmecon de la malespero.

- Nu, *ŝi diris, etendante la manon al Emelina*.

La du fuĝantinoj ŝteliris eksteren sen bruo, kaj preteriris tra la ombroj de la krepusko la sklavan barakaron. La lunarko, desegniĝanta okcidenten sur la ĉielo kiel arĝenta sigelo, iom prokrastis la alproksimiĝojn de la nokto. Tiel kiel konjektis Kasiso, voĉo kriis al ili por halti, ĉe la momento kiam ili atingis la randon de la marĉo kiu ĉirkaŭis la plantejon. Ne estis Tembo, sed Lagrizo, kiu persekutis ilin superŝutante ilin per insultoj. Emelina sentis sin malfortiĝi, kaj alkroĉita al la brako de sia kunulino, ŝi diris :

- Ho Kasiso, mi malsaniĝas !

- Eltenu, aŭ mi mortigos vin !

Kasiso eltiris el sia brusto stileton; ŝi briligis la klingon antaŭ la okuloj de la juna knabino.

Ĉi tiu ekstrema rimedo sukcesis al ŝi, Emelina ne svenis. Ambaŭ enprofundiĝis en la labirinton de la marĉejo, ĉe iu loko tiel densa kaj tiel malhela, ke estintus malsaĝe por Lagrizo provi sekvi ilin en tion sen helpo.

- Bone ! *li diris kun kruelega rikano*, ili faligis sin en la kaptilon, la friponinoj ! Ili estas en la bona loko. Ili pagos tion multege al mi ! Hola ! He ! Tembo ! Kimbo ! Ĉiuj ! *kriis Lagrizo, alvenante al la kabanaro kiam la sklavoj revenis de la laboro*. Estas du fuĝantinoj en la marĉejo. Kvin dolaroj por la negro kiu kuratingos ilin por mi. Liberlasu la hundojn !

Maltenu Tigron, Furiozon, la tutan hundaron !

La novaĵoj produktis viglan sensacion. Pluraj viroj impetis antaŭen por oferti siajn servojn, kun la espero de la rekompenco, aŭ sekve de tiu humila submetiĝo kiu estas unu el la plej abomenaj efikoj de la sklaveco. Iuj kuris dekstren, aliaj maldekstren; kelkaj ekbruligis rezinajn torĉojn, aliaj malligis la hundojn kies raŭkaj kaj sovaĝaj bojadoj kompletigis la tumulton.

- Ĉu ni pafi ilin, mastro, se ni ne povi elnestigi ilin ? *demandis Tembo, al kiu Lagrizo ĵus donis karabenon.*

- Vi povas pafi Kasison se vi volas. Jam estas tempo por ke ŝi iru al diablo, al kiu ŝi apartenas. Sed pri la knabino, ne. Nun knaboj, vigle kaj rapide ! Kvin dolarojn al tiu kiu kaptos ilin, kaj glason da rumo al ĉiu el vi !

En la lumo de la flamaj torĉoj kaj en la sovaĝaj kriadoj de la bestoj kaj de la homoj, la tuta bando direktiĝis al la marĉejo. La geservistoj sekvis de malproksime; kaj la domo estis tute senhoma, kiam Emelina kaj Kasiso englitiĝis per ŝtelaj paŝoj tra la malantaŭa pordo. La krioj, la muĝoj de la ĉaspelistoj plenigis la aeron. De la fenestroj de la ĉambro, la fuĝantinoj povis vidi la trupon kun ĝiaj torĉoj disiĝi sur la randoj de la marĉejo.

- Vidu ! diris Emelina, la ĉaso komencas ! Vidu la lumojn danci malproksime ! Aŭskultu !... La hundojn ! Ĉu vi ne aŭdas ? Se ni estus tie, nia sorto ne valorus unu picajunon[22] ! Ho ! Mi petegas, ni kaŝu nin rapide !

- Tute ne necesas rapidi, *diris Kasiso malvarme.* Jen ili ĉiuj senditaj, la ĉaso estos la distro de la vespero ! Ni supreniros post momento. Dume, *ŝi decideme prenis ŝlosilon el la poŝo de la surtuto kiun Lagrizo haste demetis*, necesas al ni havi sufiĉe por pagi nian transiron.

Ŝi malfermis la skribotablon, kaj eltiris el ĝi rulvolvaĵon da bankbiletoj, kiujn ŝi rapide kalkulis.

- Ho ! Ni ne faru tion, diris Emelina.

- Kial ? rekomencis Kasiso. Kion vi plej ŝatas ? Ke ni malsatmortus en la marĉoj, aŭ ke ni povus atingi liberan ŝtaton ? Mono povas ĉion, infano. Ŝi metis la monbiletojn sur sian sinon.

- Sed estas ŝteli, *diris Emelina per mallaŭta kaj malĝoja voĉo*.

- Ŝteli ! *ripetis Kasiso kun malestima rido*. Ili prediku al ni, ili kiuj ŝtelas korpon kaj animon ! Ĉiu el tiuj monbiletoj estis ŝtelita, ŝtelita de malriĉaj malsataj geestuloj, kiuj ŝvitas sangon kaj akvon, kaj kiujn li finfine fordonas al la diablo por sia profito. Li parolu pri ŝtelo ! Sed, nu; preferinde iri al nia subtegmento. Mi provizis tien per kandeloj kaj libroj kiuj helpos pasigi la tempon. Konsideru kiel certa ke ili ne venos serĉi nin tien. Se ili provos tion… nu, mi plenumos mian rolon de la reaperantino.

Kiam Emelina atingis la subtegmenton, ŝi trovis tie grandegan malplenan keston flanke kuŝitan tiel ke la aperturo frontis la muron, aŭ pli ĝuste la ĉarpentaĵon de la tegmento. Kasiso ekbruligis malgrandan lampon, kaj glitiĝante sub la solivojn, ili enlokiĝis en ĉi tiun kameron. Ĝi estis provizita de du matracoj kaj kapkusenoj. Tute apude, skatolo estis plenplena de kandeloj, proviantoj kaj ĉiuj vestaĵoj necesaj por la vojaĝo, kolektitaj laŭ paketoj mirinde malgrandaj kaj kompaktaj.

- Jen, *diris Kasiso, kiam ŝi pendigis la lampon sur hokon, kiun ŝi tute intence fiksis al la rando de la kesto;* jen nia domo dum la nuna tempo, ĉu ĝi plaĉas al vi ?

- Ĉu vi tre certas ke ili ne venos esplori la subtegmenton ?

- Mi ŝatus vidi Simono^{n} Lagrizo^{n} provi tion. Ne ne, li preferas teni sin malproksime. Koncerne la geservistojn, ne estas unu kiu ne preferus esti mortpafita anstataŭ ol montri

sian nazon ĉi tie.

Iom trankviligita, Emelina sin aranĝis sur sian kapkusenon.

- Kion vi volis diri, Kasiso, *ŝi naive demandis*, kiam vi parolis pri mortigi min ?

- Mi volis malhelpi vin malsaniĝi, kaj mi sukcesis. Mi antaŭsciigas vin, Emelina, ke necesas al vi elteni, ne sveni, kio ajn okazos. Tio estos tute neutila; se mi ne ĉesigus tion, vi nun estus inter la manoj de ĉi tiu malŝatindulo.

Emelina ektremis.

Ambaŭ silentis dum kelka tempo. Kasiso komencis legi francan libron; Emelina, lacoplena, endormiĝis. Ŝi estis vekita de fortegaj kriegoj ekstere, la galopo de la ĉevaloj kaj la bojado de la hundoj. Ŝi abrupte rektiĝis, kaj eligis mallaŭtan krion.

- Estas nur la ĉasado kiu revenas, *diris malvarme Kasiso*. Ne timu. Rigardu tra ĉi tiu truo. Ĉu vi ne vidas ilin ĉiujn tien malsupren ? Simono rezignas pri tio ĉi nokton.
Vidu kiel lia ĉevalo kovriĝis per koto pro multe sin sternaĉi en la marĉejo ! Ankaŭ la hundoj havas mallevitajn orelojn. Ha ! Bona mastro mia, vi devos rekomenci la kuradon pli ol unu fojon, la ĉasaĵo ne estas tie.

- Ho ! Bonvolu, eĉ ne unu vorton ! *diris Emelina*. Se ili aŭdus vin ?

- Se ili aŭdus ion, ili tenus sin des pli foren, *diris Kasiso*. Ne estas danĝero, ni povas fari la tutan bruon kiun plaĉos al ni. La efiko estos nur pli bona.

Fine, noktomeze, silento restariĝis en la domo. Lagrizo enlitiĝis malbenante sian malbonŝancon, kaj ĵurante sin venĝi la morgaŭon.

41. La Martiro.

Ke la fido de la bonulo ne foriru,
Kvankam la vivo neas liajn komunajn donojn,
Kvankam, kun trapikita kaj sanganta koro,
Kaj malestimita de homoj, li estas mortonta.
Ĉar Dio markis ĉiun bedaŭrindan tagon,
Kaj nombris ĉiun amaran larmon,
Kaj la longaj jaroj de ĉiela feliĉego kompensos
Ĉar ĉiuj liaj infanoj suferas ĉi tie.
William Cullen BRYANT[36]

La plej longa vojo havas sian finon; la plej malluma nokto vidas naskiĝi tagiĝo. La horoj, en sia senkompata fluado, senĉese kuntiras la tagon de maliculoj al eterna tenebro, la nokton de justuloj al tago sen limoj. Ni akompanis la paŝojn de nia humila amiko laŭlonge de la valo de sklaveco, trairante kun li, unue la florajn kampojn de la facileco kaj de la amo, poste, atestantoj de lian korŝiran disigon de ĉio kio estas kara por la homo. Ni haltis kun li en ĉi tiu oazo orita de la suno, kie malavaraj manoj kaŝis liajn ĉenojn sub la floroj. Fine ni sekvis lin ĝis tie kie estingiĝis la lasta radio de surteraj esperoj, kaj tiam ni vidis la firmamenton de la nevidebla mondo pleniĝi por li de steloj kun nedifektebla brilo.

Nun, la matena astro ĵus eklumis ĉe la montopinto, kaj la ventetoj kiuj blovas de la ĉielo sciigis ke la pordoj de la tago komencis malfermiĝi.

La fuĝo de Kasiso kaj Emelina puŝis la perfortan

36 Ĉi tiu poemo ne aperas en la kolektitaj verkoj de William Cullen Bryant, nek en tiuj de lia frato, John Howard Bryant. Ĝi probable estis kopiita de gazeto aŭ revuo.

karakteron de Lagrizo ĝis la lasta grado de kolero, kaj kiel estis facile antaŭvidi tion, lia tuta furiozo falis sur la senhelpan kapon de Tomo. Kiam tute haste la mastro sciigis al siaj negroj la novaĵon pri la fuĝo, la ĝojofulmo kiu ekbrilis el la okuloj de Tomo, la instinkta movo de liaj levitaj manoj, ne eskapis de li. Li vidis ke la negro tute ne partoprenis en la postkuro, kaj unue pensis devigi lin en ĝi. Sed li spertis lian obstinegan kontraŭstaron, ekde kiam temis pri partopreni en malhumana ago, kaj tro urĝis al li por riski konflikton.

Tomo do restis malantaŭe kun la malgranda nombro de tiuj kiuj lernis preĝi de li, kaj ĉiuj kune direktis siajn bondezirojn al la ĉielo por la savo de la fuĝintinoj.

Kiam Lagrizo revenis tute konfuza, la malamo kiu bolis en lia sino kontraŭ lia humila sklavo, subite intensiĝis fortege. Ĉu ĉi tiu viro ne spitis lin, firma, nefleksebla, neregebla, kaj tio ekde la tago kiam li aĉetis lin ? Ĉu ne estis en ĉi tiu negro, mi ne scias kian silentan spiriton, kiu atakis lin, Lagrizo^{n}, kiel infera flamo ?

- Mi malamas lin ! li diris tiun nokton, turniĝadante dum sia sendormeco. Mi malamas lin ! Kaj ĉu ne estas Mia Posedaĵo ? Ĉu mi ne rajtas uzi de li kiel plaĉas al mi ? Kiu povus malebligi min ? *Kunpremante la pugnon, li svingis ĝin en la aero, kvazaŭ por frakasi kelkan nevideblan kontraŭulon.*

Tomo tamen estis valora sklavo; fidela, laborema servisto. Kaj plie malamante lin pro liaj meritoj, Lagrizo hezitis.

La sekvan matenon, li decidis denove silenti; li intencis kunigi, de la najbaraj plantejoj, kelkajn armitajn homojn, kelkajn parojn da hundoj, ĉirkaŭi la marĉejon, plene elĉasadi. Se li sukcesus, nu, bonege; se li malsukcesus… tiam li aperigus Tomo^{n} antaŭ li. Li grincis per la dentoj, liaj vejnoj ŝveliĝis. Tomo cedus. Se ne ! Estis horora vorto, murmurita interne de li, vorto kiun lia animo aprobis.

Vi diras ke la intereso de la mastro estas sufiĉa protekto por la sklavo ! Kio ! En la ardo de sia pasio, la homo, por atingi siajn celojn, vendus eĉ sian animon. Kaj oni volus ke li ŝparu la korpon de sia proksimulo !

- Nu ! *diris Kasiso la morgaŭon, post esti observanta tra la truo de la tegmenta fenestro*, jen ilia ĉaso kiu rekomenciĝas !

Tri aŭ kvar rajdantoj karakolis antaŭ la fasado, kaj unu aŭ du paroj da fremdaj hundoj luktis kontraŭ la nigruloj kiuj tenis ilin parigitaj, bojante kaj grumblante unu al la alia.

Du el ĉi tiuj viroj estis laborestroj de la malplej foraj loĝejoj. La aliaj, botelkamaradoj de Lagrizo, venis de la tavernoj de la najbara urbo, altiritaj de la logpovo de la ĉaso. Oni apenaŭ povus imagi pli malestimindan bandon. Lagrizo abunde servis al ili rumon, kaj ankaŭ ne ŝparis ĝin por la nigruloj, kolektitaj por ĉi tiu servo en la diversaj plantejoj, ĉar estis kutime fari, laŭeble, de la sklavĉaso feston por la aliaj.

Kasiso, kun orelo gluita al la tegmenta fenestro, aŭdis parton de paroladoj kiuj interŝanĝis, kaj kiujn alportis al ŝi la matena venteto. Sardona rido ankoraŭ venis malheligis ŝian malĝojan fizionomion, laŭmezure kiel ŝi aŭskultis ilin partigi la terenon, diskuti pri la meritoj de la diversaj buldogoj, disdoni ordonojn por pafi, kaj decidi pri la maniero trakti, en kazo de kapto, ĉiun el la fuĝintinoj.

Ŝi retropaŝis, kunpremis la manojn, kaj levante la okulojn al la ĉielo :

- Ho Sinjoro Dio Ĉiopova ! ŝi diris, ni ĉiuj estas pekuloj; sed, por esti tiel traktataj, kion ni ja faris pli ol la aliaj ?

Estis en la voĉo, en la esprimo de la trajtoj, terura impeto.

- Se ne estus vi, infano, *ŝi daŭrigis, kaj ŝia rigardo falis sur Emelino"; se ne estus vi*, mi irus rekte al ili, kaj dankus

tiun kiu mortpafus min. Kio estas libereco por mi de nun ? Ĉu ĝi redonos al mi miajn infanojn ? Ĉu ĝi redonos al mi tion kion mi iam estis ?

Emelina, en sia naiva simpleco, duontimigita de la moroza furiozo de Kasiso, rigardis ŝin, maltrankvila, kortuŝita kaj respondis nenion. Nur ŝi prenis al ŝi la manon per movo de timema kareso.

- Ne, *diris Kasiso, provante forpuŝi ŝin*; vi pelus min ami vin; kaj mi ne volas, mi ne plu volas ami ion ajn !

- Kompatinda Kasiso, diris Emelina, ne malesperu. Se la Disinjoro donas al ni liberecon, eble Li redonos al vi vian filinon; kaj kio ajn okazos, mi estos filinon por vi. Mi scias ke mi neniam plu revidos mian kompatindan maljunan patrinon ! Kaj ĉu vi amas min aŭ ne, mi amos vin, Kasiso !

La milda infana spirito triumfis. Kasiso, sida apud la juna knabino, ĉirkaŭbrakis ŝin, karesis ŝiajn silkecajn brunajn harojn, kaj Emelina miris pri la beleco de ŝiaj belegaj okuloj nun emociiĝintaj kaj vualitaj de larmoj.

- Ho ! Emelina, *diris Kasiso*, mi malsatas, mi soifas de miaj infanoj ! Miaj okuloj eluziĝas serĉante ilin en la svageco. Tie, *ŝi ekkriis, frapante al si la bruston*, tie ĉio estas senkonsola ! Ĉio estas malplena ! Ha ! Se Dio redonis al mi miajn infanojn, tiam mi povus preĝi !

- Konfidu vin al li, Kasiso, diris Emelina; li estas nia Patro !

- Lia kolero flamiĝis kontraŭ ni, ŝi reparolis. Li forturnis sian vizaĝon de ni.

- Ne, Kasiso, ne; ni esperu al li. Ho ! Mi esperas, mi ĉiam esperas !

La ĉaso estis longa, tumulta, kompleta, sed tute vana, kaj Kasiso mallevis rigardon de ironia triumfo al Lagrizo kiam, afliktita kaj lacega, li deĉevaliĝis antaŭ la domo.

- Nun Kimbo, *li diris kiam li kuŝiĝis en la salono*, iru serĉi

por mi tiun maljunan friponon; suprenigu lin ĉi tien kaj plej rapide. Ĉi tiu damnita Tomo estas en la fundo de ĉio ĉi, kaj mi eltiros tiun intrigon el lia korpo tra lia maljuna nigra haŭto. Se li silentas, ha ! Li diros kial !

Tembo kaj Kimbo, morte malamante unu la alian, kuniĝis por malami Tomo^{n} ne malpli amike. Ekde la komenco ili sciis ke Lagrizo aĉetis ĉi tiun negron nur por fari de li ilian intendanton dum siaj forestoj. La malinklino kiun ili konsekvence konceptis kontraŭ li, kreskis en ĉi tiuj malnoblaj kaj servemaj viroj, laŭmesure kiel tiu ĉi kaŭzis la malplaĉon de la mastro. Estis do tre ĝoje ke Kimbo plenumis sian komision.

Tomo ricevis la mesaĝon kun firma kaj informita koro; ĉar li sciis pri la fuĝoplano, pri la rifuĝloko. Li konis kaj la senindulgan kaj teruran naturon de la viro kun kiu li traktis, kaj lian despotan potencon; sed, kun la helpo de Dio, li estis preta maltimi la morton plivole ol iel ajn perfidi la kompatindajn fuĝantinojn.

Li demetis sian korbon sur sian linion inter la aliaj, kaj levante la okulojn al la ĉielo, li diris : "*Mi metas mian animon en viajn manojn ! Vi elaĉetis min, ho Sinjoro, Dio de vero !*" Kaj li lasis sin kapti per la krudaj pojnoj de Kimbo, kiu sovaĝe kuntiris lin.

- Aj, aj ! *diris la giganto dum li tiris lin post si*. Vi ja penti pro tio ! Mastro ĉi-foje ĝibigi la dorson definitive; ne forŝteliĝi nun ! Vi vidi kiom kosti por helpi negrojn de mastro forkuri ! Ha ! Vi tuj senti tion ! Vi ne eskapi tute kompeta ! Antaŭeniri !

Sed, el tiuj kruelaj vortoj, ne unu atingis la orelon de Tomo ! Pli laŭta voĉo kriis al li : "*Ne timu tiujn kiuj forprenas la vivon de la korpo kaj kiuj ne povas mortigi la animon*". Subite la nervoj, la ostoj de la kompatindulo ektremis. Estis kvazaŭ la fingro de Dio tuŝis lin. Li sentis en

sia brusto la energion de milo da animoj. Rapide kuntirita de Kimbo, li vidis arbojn, arbustojn, kabanojn, ĉiujn atestantojn de sia difektado, kirliĝi kaj malaperi, kiel la pejzaĝo fuĝas malantaŭ la impetega vetkuro de ĉaro. Lia koro batadis interne de li. Lia ĉiela patrio preskaŭ aperis; la horo de la liberigo sonis !

- Ha do, Tomo, *diris Lagrizo rekte paŝanta al li, kaj malmilde ekkaptanta lin ĉe la kolumo. En sia furioza atako, li parolis kun dentoj kunpremataj kaj per hakataj vortoj* : "Ĉu vi scias ke mi faris la decidon mortigi vin ?"

- Mi kredi tion tre eblan, mastro, respondis kviete Tomo.

- Gardu vin ! *rekomencis Lagrizo kun minaca kaj terura firmeco*, ĝi estas decidiĝo, bone pripensita, ĉu vi aŭdas, Tomo ? Krom se vi diras al mi tion kion vi scias pri ĉi tiuj knabinoj !

Tomo restis muta.

- Ĉu vi aŭdas min ? *diris Lagrizo stamfante kun la rorado de kolera leono*, parolu !

- Mi havi nenion por diri, mastro, *diris Tomo per malrapida, firma kaj decidema voĉo*.

- Ĉu vi kuraĝos subteni, hundo de nigra kristano, ke vi scias nenion ? diris Lagrizo.

Tomo ne respondis.

- Parolu ! *kolerkriis Lagrizo furioze frapante lin*. Ĉu vi scias ion ?

- Mi scii, mastro; sed mi ne povi diri ion; mi povi morti.

Lagrizo profunde enspiris; kaj, bremsante sian furiozon, kaptis Tomo^{n} ĉe la brako, alproksimigis sian vizaĝon tute kontraŭ la lian, kaj diris per terura voĉo : "*Bone aŭskultu, Tomo ! Vi pensas, ĉar mi jam lasis vin, ke mi ne volas tion kion mi diras; sed ĉi-foje mi decidiĝis kaj kalkulis la kostojn. Vi ĉiam rezistis al mi, hodiaŭ, komprenu, mi*

submetas vin aŭ mi mortigos vin ! Mi kalkulos ĉiun sangoguton, laŭmezure kiam mi eltiros ilin unu post unu el viaj vejnoj, ĝis kiam vi cedos.

Tomo levis la okulojn, rigardis Lagrizo^{n} kaj respondis :

- Mastro, se vi esti malsana, aŭ en malhelpo, aŭ mortanta, por savi vin, mi doni la tutan sangon de mia koro. Se, eltiri ĝin guton post guto el ĉi tiu kompatinda maljuna korpo, tio povi savi vian altvaloran animon, mi plenvolonte doni ĝin, kiel la Savanto doni la sian por mi. Ho mastro ! Ne ŝarĝi vian animon per tiel grava peko ! Ĝi pli suferigi vin ol min ! Fari la plej malbonan eblon, la turmentoj pri mi baldaŭ finiĝi; sed pri vi, se vi ne penti, tio neniam havi finon !

Ĝi estis kiel fragmento de ia stranga kaj ĉiela harmonio vibranta tra la muĝado de ŝtormo. Ĉi tiu tenera koraspiro kaŭzis subitan paŭzon. Lagrizo ŝajnis ŝtonigita, kaj restis kun la okulo fiksita al Tomo. La silento estis tiel profunda, ke la bruo de la pendolo de la malnova horloĝo, batanta la lastajn minutojn de kompato kaj provado donitajn al la pento de ĉi tiu hardita animo, klare aŭdiĝis.

Ĝi estis nur momento; hezito de kelkaj sekundoj. La risorto malstreĉiĝis; sed la spirito de la malbono revenis sepoble pli terura, sepoble pli furioza. Lagrizo, ŝaŭmanta pro kolerego, teren faligis sian viktimon kaj premis lin per la piedoj.

La scenoj de murdo kaj torturo estas hororaj por spekti, kaj la orelo ne toleras ĝian raporton. Tio kion homo havas forton por fari, li ne ĉiam havas tiun por aŭdi raporti tion. Tio kion nia proksimulo, frato laŭ sango, frato laŭ religio, eltenas, ne povas esti dirata al ni, eĉ private en nia sekreta ĉambro; ĉar ĉi tiu raporto tiom ŝiras la animon ! Kaj tamen, ho mia lando, ĉi tiuj agoj plenumiĝas en la ombro de viaj leĝoj ! Ho Kristo, via Eklezio vidas ilin kaj ne postulas !

Sed iam naskiĝis Tiu kies suferoj ŝanĝis la instrumenton

de torturo, de malnobligo kaj de honto al simbolo de gloro, de honoro kaj de senmorteco. Kiam lia dia spirito ĉeestas, la malnobliga vergo, la malhonoriga insulto, la sangigaj trafoj eĉ plialtigas la sublimajn kaj lastajn luktojn de la kristano.

Ĉu ĝi estis sola, la heroa kaj tenera animo, dum la longa, longa nokto, sub ĉi tiu malnova hangaro kie li eltenis la multobligitajn batojn, la terurajn torturojn ? Ne; apud la martiro, vidata nur de liaj okuloj, "*simila al filo de Dio*" (*Danielo 3,25*), staris Tiu kiu suferis.

La tentanto ankaŭ ĉeestis blindigita de despota kaj furioza volo; li ĉiumomente urĝis Tomo^n^ por eskapi el tiu agonio kaj stukaĉi la senmaliculo. Sed la lojala, la nobla koro restis firma, ligita al la eterna roko. Kiel lia Redemptoro, li sciis ke por savi aliajn, necesis oferi sin mem, kaj la plej kruelaj ekstremaĵoj ne sukcesis eltordi ion el li krom piaj paroloj, krom sanktaj preĝoj…

- Li preskaŭ esti finita, mastro, diris Tembo kortuŝita, malgraŭ si de la pacienco de la viktimo.

- Frapu ĝis kiam li cedos ! Nu ! Fortike ! Forte batu, kriegis Lagrizo. Mi eltiros el li la lastajn gutojn de lia sango, krom se li parolas, se li konfesas !

Tomo malfermetis la okulojn, kaj rigardis sian mastron

- Kompatinda mizera estulo, li diris, vi nenion pli povi fari. Mi pardoni vin per mia tuta animo, *kaj li svenis*.

- Mi kredas, la diablo forprenu min, ke li ververe estas tute finita, *diris Lagrizo kiu antaŭenpaŝis por rigardi lin*. Certe ja, ĝi estas farita ! Lia malbenita faŭko fine silentos. Tio almenaŭ estas profito.

Jes, Lagrizo; sed kiu silentigos la voĉon kiu krias funde de via animo ? Ĉi tiu animo fermita al pento, al preĝo, al espero, kaj en kiu brulas fajro kiu neniam estingiĝos !

Tamen Tomo ne estis tute mortinta. La mirindaj paroloj eskapitaj dum liaj suferoj, liaj dolĉaj preĝoj, tuŝis eĉ

la koron de la brutigitaj nigruloj, instrumentoj de lia kruela turmentisto. Kaj tuj kiam Lagrizo malaperis, ili rapidis restarigi la disŝiritan korpon, kaj strebis, en sia nescio, revenigi ĝin al vivo, kvazaŭ la vivo estis privilegio por li!

- Certe ni fari nun, malbonan, kruelan laboron, diris Tembo. Mi esperi ke ĝi esti sur la konto de mastro; ni ne ĉiam respondeci !

Ili lavis liajn vundojn, aranĝis por li krudan liton per senvalora kotono, kaj sternis lin sur ĝi. Unu el ili ŝtele enŝoviĝis en la loĝejon, kaj pretekste ke, estante elĉerpita pro frapado, li bezonis refortiĝi, li akiris de Lagrizo glaseton da brando kiujn li tuj revenis verŝi en la gorĝon de Tomo.

- Ho ! Tomo, diris Kimbo, ni esti tre malicaj, tre kruelaj kun vi !

- Mi pardoni vin per mia tuta koro, murmuris Tomo mallaŭte.

- Ho ! Tomo, diri al ni kiu esti Jesuo ? Diri tion al ni, demandis Tembo. Ĉi tiu Jesuo kiun vi vidi dum la tuta nokto apud vi, kiu li esti ?

Ĉi tiuj vortoj revokis la ŝanceliĝantan animon preta por ekflugi. Ĝi elverŝis kelkajn energiajn parolojn pri la mirakla Savanto, lia vivo, lia morto, lia eterna ĉeesto, lia potenco por savi.

Ili ambaŭ ploris, ĉi tiuj senindulgaj viroj ! Ili ploris.

- Kial neniam aŭdi ion, scii nenion pri ĉio ĉi ? diris Tembo. Sed mi kredi ! Mi ne plu povi deteni min ! Sinjoro Jesuo, kompati nin.

- Kompatindaj estuloj, diris Tomo, mi kontenti esti suferanta ĉion kion mi suferi, se tio povi alkonduki vin al Jesuo ! Ho Disinjoro, donaci al mi ĉi tiujn du animojn, mi petegi vin !

La preĝo estis elaŭdita.

42. La Juna Mastro.

Du tagojn poste, iu junulo kondukis malpezan veturilon tra la avenuo de la ĉinaj arboj. Ĵetinte la kondukrimenojn sur la kolon de la ĉevalo, li saltis teren kaj petis vidi la posedanton de la loĝejo.

Ĉi tiu vojaĝanto estis Georgio Ŝelbi. Por ekscii kiel li sin trovis tie, vi nepras reveni iom malantaŭen.

Pro kelkaj bedaŭrindaj cirkonstancoj, la letero de f^ino Ofelio al s^ino Ŝelbi estis retenata dum unu aŭ du monatoj en fora poŝtoficejo, kaj kiam ĝi atingis sian celon, Tomo jam estis ekstervidebla, perdita en la malproksimaj marĉejoj de la Ruĝa Rivero.

S^ino Ŝelbi legis kun profunda malĝojo la malgajajn informojn kiuj alvenis al ŝi, sed neniu tuja agado eblis. Ŝi tiam troviĝis ĉe la litkapo de sia edzo trafita de grava malsano, kaj en la deliro de febro. Massa Georgio kiu tiam ne plu estis lernanto, sed juna viro, fidela helpanto de sia patrino pri la flegendaj zorgadoj de la malsanulo, ankaŭ estis la sola konsilanto al kiu ŝi povus rilati pri la administrado de aferoj. F^ino Ofelio antaŭzorgis sendi la nomon de la proceduristo respondeca pri la heredo de Sanklaro, kaj ĉio kion oni povis fari, estis skribi al ĉi tiu juristo por informiĝi pri tio kio Tomo fariĝis. La morto de S^ro Ŝelbi, okazinta malmulte poste, okupis lian familion dum kompleta sezono de funebro, de urĝaj interesoj kaj de aferoj kiuj ne estis prokrasteblaj.

La mortinto montris sian fidon al la kapableco de sia edzino, nomumante ŝin kiel sola testamenta plenumanto, kaj ŝi trovis sin tute absorbita de sinsekvo da zorgoj kaj embarasoj.

Kun la energio kiu karakterizis ŝin, ŝi diligentis malkonfuzi ĥaoson. Ŝi kaj Georgio iom okupiĝis dum kelka tempo pri kolektado kaj revizorado la kontojn, pri vendado de posedaĵoj, pri pagado de ŝuldoj. S^ino Ŝelbi estis decidita klarigi ĉion, ĝisdatigi ĉion, kiaj ajn povu esti la konsekvencoj por ŝia persona komforto. Intertempe la respondo de la juristo, kiun f^ino Ofelio indikis al ili, alvenis. Li sciigis ke Tomo estis aŭkciita, kaj ke, krom la prezo de pago ricevita en la nomo de liaj klientoj, li neniel enmiksiĝis en tiu afero.

Nek Georgio nek lia patrino povis esti kontentaj per tia rezulto. Konsekvence, ĉirkaŭ ses monatoj poste, kelkaj interesoj alvokantaj Georgio Ŝelbi al la Malsupra Rivero, li decidiĝis malsupreniri al Nov-Orleano, kaj daŭrigi siajn esplorojn ĝis kiam li malkovros Tomo^n kaj elaĉetos lin.

Post kelkaj monatoj da senfruktaj esploroj, Georgio hazarde renkontis viron kiu donis al li la deziratajn informojn. Kun mono en la poŝo, li veturis per la vaporŝipo al la Ruĝa Rivero, decidita retrovi kaj revenigi sian malnovan amikon.

Li baldaŭ estis kondukata al la plantisto kiun li trovis en lia vestiblo. Lagrizo akceptis la vizitanton kun ia agresema gastamo.

- Mi ekaŭdis, diris la junulo, ke vi aĉetis en Nov-Orleano nigrulon nomatan Tomo^n. Li loĝis sur la loĝejo de mia patro, kaj mi venis kun la espero povi elaĉeti lin.

La frunto de Lagrizo malsereniĝis, kaj lia kolero eksplodis per furiozaj paroloj :

- Jes, mi aĉetis fiulon el tiu nomo; damnita marĉandado kiun mi faris tiam ! La plej malobeema, la plej spitema, la plej aroganta hundo ! Li instigis miajn negrojn forkuri, fuĝigis du knabinojn kiuj certe valoris popece de okcent ĝis mil dolarojn. Li konfesis tion. Kaj kiam mi ordonis al li diri kie ili estis, ĉu li ne provoke rektiĝis, la hundo, por respondi

ke li scias tion, sed ke li ne diros tion ! Li plenumis sian parolon, kvankam li ricevis la plej severan draŝadon, la plej aĉan vipadon per kiu mi iam regalis negron. Mi kredas ke li estas mortanta ie. Mi ne scias ĉu li elturniĝos.

- Kie li estas ? impete diris Georgio. Kie li estas ? Ke mi vidu lin. *La vangoj de la junulo fariĝis purpuraj, liaj okuloj ĵetis flamojn, sed, saĝe li sin detenis kaj aldonis nenion pli.*

- Li esti tien sub la hangaro, *diris malgranda sklavo kiu tenis la ĉevalon de Georgio.*

Lagrizo sakrante donis piedbaton al la negridon. Georgio, sen diri vorton, paŝis rekte al la hangaro.

Tomo restis kuŝita dum du tagoj ekde la fatala nokto; sen ia ajn doloro, ĉiu nervo estinta malakrigita, detruita. Preskaŭ la tutan tempon li restis en ia kvieta torporo; la vigla kaj forte konsistigita korpo penis liberigi la animon kiun ĝi entenis. En la nokta mallumo, kompatindaj, afliktitaj geestuloj deprenis kelkajn horojn de sia nesufiĉa ripozo, por veni redoni al li kelkajn el tiuj am-atentoj kies li ĉiam tiom abundis dum sia tempo de travivaĵo. La malfeliĉaj disĉiploj certe ja havis malmulte por proponi, la glason da malvarma akvo, sed donitan kun koro plena de amo kaj okuloj fluantaj de larmoj.

Ĉi tiuj larmoj falis sur la honestan kaj nesenteman vizaĝon, signojn de la malfrua bedaŭro de la kompatindaj neinstruitaj paganoj kiujn lia pacienco kaj lia amo dum lia martiriĝo subite vekis al pento, kaj kiuj verŝis amarajn preĝojn ĉe la piedo de Redemptoro, pri kiu ili apenaŭ konis la nomon, sed kiun neniam fervora kaj simpla koro vane alpreĝi.

Kasiso, kiu, elglitiĝinte el sia rifuĝejo, estis kaŝe aŭskultinta kaj eksciinta la oferon faritan por ŝi kaj por Emelina, ŝteliris dum la antaŭa nokto, riskante esti malkovrita, ĉe la liton de Tomo. La malmultaj vortoj kiujn la amanta animo de la martiro lasis eligi el liaj mortantaj lipoj,

disigis tiun longan vintron, degeligis tiun dikan glacion, kiun malespero kaj suferoj de tiom da jaroj amasigis en la sino de Kasiso. Kaj la kompatinda kortuŝita virino ploris kaj preĝis !

Kiam Georgio eniris sub la hangaron, li tuj vertiĝis, lia koro premiĝis, liaj genuoj fleksiĝis.

- Ĉu eblas ! Ĉu eblas ! *li diris; kaj li falis surgenue apud la agonianto*. Onklo Tomo. Mia kompatinda amiko, mia kara, mia malnova amiko !

Io el la voĉsono penetris la orelon de la mortanto. Li iomete kaj tre malrapide movis la kapon, ridetis kaj murmuris : "*Se Jesuo tuŝas la litkapon, la tuta lito estas nur lanugo*".

Larmoj, kiuj honoris lian viran koron, falis el la okuloj de la junulo, klinita super lia malnova amiko.

- Ho kara onklo Tomo, vekiĝu ! Parolu ankoraŭfoje, malfermu viajn okulojn, mi estas via eta Georgio, via massa Georgio, ĉu vi ne plu rekonas min !

- Massa Georgio ! *diris la malforta voĉo; kaj Tomo denove malfermis la okulojn*. Massa Georgio ! *kaj li ŝajnis konfuzita*.

La ideo, la memoro, malrapide ekaperis en lia animo. La senesprima rigardo fiksiĝis, la okulo lumiĝis, lumeto gajigis la trajtojn, la malfortaj kaj raspaj manoj proksimiĝis unu la alian, kuniĝis, kaj du larmoj fluis laŭlonge de la vangoj.

- Benata esti Disinjoro ! Esti, ha ! Esti, esti ĉio kio manki al mi ! Ili ne forgesi min ! Ha ! Tio varmigi la animon, tio bonefiki en la kompatinda maljuna koro ! Nun, ho ! Mi morti kontenta ! Beni Disinjoron, ho mia animo !

- Ne, vi ne mortos ! Necesas ke vi ne mortu ! Ne pensu forlasi nin. Mi venas elaĉeti vin, mi revenigos vin ! *ekkriis Georgio kun vivega ardo*.

- Ho massa Georgio ! Veninta tro malfrue; esti la Sinjoro Jesuo kiu aĉeti min; li alvoki min al lia hejmo. Mi

malpacience deziri iri tien. Pli bone ĉielo ol Kentukio !

- Ho ! Necesus ne morti, tio mortigus min ! Mi rompos mian koron pro pensi pri tio kion vi suferis. Kaj vidi vin kuŝita tie, sub ĉi tiu mizera hangaro ! Ho kompatinda, kompatinda kara amiko !

- Ne nomi min kompatinda, reparolis solene Tomo; mi esti kompatinda mizerulo, sed antaŭe. Esti pasinta, pasinta. Nun mi esti ĉe la pordoj de la gloro. Ho massa Georgio, la ĉielo esti proksima ! Mi gajni la venkon ! Sinjoro Jesuo doni ĝin al mi ! Gloro esti al lia nomo !

Georgio, kortuŝita de la energio per kiu ĉi tiuj interrompitaj frazoj estis eldiritaj, restis respektoplena kaj silenta, kontemplante sian malnovan amikon.

Tomo premis al li la manon kaj daŭrigis, reakirante la spiron preskaŭ post ĉiu vorto :

- Ne diri al Kleo. Kompatinda animo ! Tro terura por ŝi. Nur diri al ŝi ke vi trovi min preta eniri en la gloron, kaj ke mi ne povi resti por iu ajn. Diri al ŝi Disinjoro esti kun mi, ĉiam, ĉie; li fari ĉion malpezan, ĉion facilan. Kaj… ho ! La kompatindaj infanoj ! Kaj la etulino ! Mia maljuna koro preskaŭ fendiĝi por ili multfoje ! Diri al ĉiuj necesi sekvi min, sekvi min ! Al mastro, al bona mastrino, diri ke mi ankoraŭ ami ilin. Ĉiujn ankaŭ en la malnova kara domo. Vi ne scii ! Mi ami ilin ĉiujn, mi ami ĉion, ĉiujn geestulojn, ĉie. Esti nenio alia, nur amo ! Ho ! Massa Georgio, kia bonega afero esti kristano !

En tiu momento, Lagrizo kiu senzorge vagis ekster la pordo, ĵetis malafablan ekrigardon internen kaj malproksimiĝis.

- Maljuna Satano ! ekkriis indigne Georgio; mia konsolo estas pensi ke la diablo ŝuldos ĝin al li iun el ĉi tiuj tagoj !

- Ho ne ! Ne necesi, diris Tomo alkroĉiĝante al la mano kiun li tenis. Kompatinda mizerulo ! Esti plorinde pensi pri

li ! Ho ! Se li nur penti, Disinjoro pardoni lin. Mi tiom timi ke li ne penti !

- Mi vere esperas ke ne, diris Georgio. Dio gardu min renkonti lin tie supre !

- Ŝŝ ! Massa Georgio, pace ! Tio ĉagreni min, necesi ne tiel pensi. Li ne reale dolori min, nur malfermi por mi la pordojn de la regno. Tio estas ĉio.

La mortanto, kiun la ĝojo pro revidi sian junan mastron plenigis per nedaŭra forto, subite sinkis. La risortoj malstreĉiĝis, la okuloj fermiĝis; kaj sur lia vizaĝo aperis ĉi tiu mistera, ĉi tiu sublima ŝanĝo kiu parolas pri alia vivo.

Li komencis spiri per longaj kaj profundaj spiroj; lia larĝa brusto peze leviĝis kaj malleviĝis; sed la esprimo de la trajtoj estis tiu de triumfo.

- Ho ! Kiu iam… disigi nin… de la amo… de Kristo ! *li diris per voĉo apenaŭ flustrata, kaj kun rideto endormiĝis en la Sinjoro.*

Georgio restis tuŝita de respekto; ŝajnis al li esti en konsekrita loko. Kaj kiam li restariĝis, post esti ferminte la senvivajn okulojn, li havis nur unu penson, tiun kiun lia maljuna amiko esprimis : "*Kia bonega afero esti kristano !*"

Li deturniĝis, Lagrizo, kun malgaja mieno, staris malantaŭ li.

La sereneco de ĉi tiu sceno de morto bremsis la impeton de la junaj pasioj. La ĉeesto de la viro ne plu vekis en Georgio aliaĵon ol senton de profunda abomeno, kaj la urĝeman deziron liberigi sin de li plejrapide kaj kun kiel eble plej malmulte da vortoj.

Fiksante siajn nigrajn kaj penetrajn okulojn al Lagrizo, per la fingro li montris la mortinton kaj diris simple :

- Vi elprenis de li ĉion kion vi iam ajn povis havi. Kiom vi volas de la korpo ? Mi deziras kunpreni lin kaj dece enterigi lin.

- Mi ne vendas mortintajn negrojn, respondis krude Lagrizo; entombigu lin kien kaj kiel plaĉos al vi.

- Knaboj, diris aŭtoritate Georgio al du aŭ tri da nigruloj kiuj staris tie rigardantaj la korpon, helpu min por levi lin kaj alporti lin al mia veturilo, kaj donu al mi ŝpaton.

Unu el ili kuris serĉi ĝin; la du aliaj helpis Georgio^{n} por transporti la kadavron.

La junulo direktis nek parolon nek rigardon al Lagrizo kiu, sen kontraŭstari liajn ordonojn, restis stara tie, fajfanta kun ŝajna senzorgeco. Li malbonhumore sekvis ilin ĝis la veturilo kiu estis haltita antaŭ la pordo de la domo.

Georgio etendis sian mantelon, faris zorge demeti la korpon sur ĝin, malarangante la sidlokon por fari lokon. Fine li turnis sin, fikse rigardis Lagrizo^{n} kaj diris al li kun devigita flegmo :

- Mi ne sciigis al vi mian penson pri ĉi tiu tuta kruelega afero; tio estas nek la horo nek la momento. Sed, sinjoro, ĉi tiu senkulpa sango ricevos justecon. Mi proklamos ĉi tiun murdon sur la tegmentoj, se necesos ! Kaj mi akuzos vin antaŭ la unua juĝisto kiun mi povos trovi.

- Iru ! *diris Lagrizo disdegne klakante per siaj fingroj.* Mi plezuros vidi vin barakti. Kie vi esperas trovi viajn atestantojn, bonvolu ? Kie estas viaj pruvoj ? Nu ! Bonan kuraĝon !

Georgio vidis la tutan gravecon de ĉi tiu defio. Ne estis unu blankulo sur la loĝejo; nu en ĉiuj sudaj tribunaloj la atesto de neblankuloj ne estas akceptita. Ŝajnis al li en tiu momento ke la indigna krio kiun li subpremis funde de sia koro, povis penetri la ĉielan volbon por malsuprenigi la justecon. Vana espero !

- Finfine, kiom da embaraso por morta negro ! diris Lagrizo.

Ĉi tiu vorto estis sparko en pulvejo. La singardeco ne

estas la virto de la junuloj de Kentukio. Georgio turniĝis, kaj per unu bato sovaĝe donita, faligis Lagrizon. Stara sur la mizerulo falinta vizaĝo teren, li similis kiel sia mastro triumfanta super la spirito de malbono.

Iaj homoj tamen klare pliboniĝas estante bone draŝitaj; ili tuj respektas la homon kiu ruligis ilin en la polvon. Lagrizo estis el tiuj naturoj. Kiam li restariĝis, kaj kiam li iom skuis siajn vestojn, li sekvis per la okuloj kun ia respekto la veturilon kiu malrapide malproksimiĝis. Kaj li malfermis la buŝon nur kiam ĝi estis ekster vido.

Trans la limoj de la plantejo, Georgio venante rimarkis malgrandan sekan teralton, sabloriĉan kaj ombritan de kelkaj arboj. Estas tie ke ili fosis la kavon.

- Ĉu necesi demeti la mantelon, massa ? demandis la nigruloj kiam la kavo estis preta.

- Ne ne, enterigu lin kun ĝi. Estas ĉio kion mi nun povas doni al vi, mia kompatinda amiko, kara onklo Tomo ! Kaj vi havos ĝin.

Ili demetis lin envolvitan de la mantelo, kaj la viroj silente reĵetis la teron, ŝovelplenon post ŝovelpleno. La kavon plenigitan, ili kovris ĝin per gazono.

- Vi povas reiri, miaj infanoj, diris Georgio ŝovante arĝentan moneron en la manon de ĉiu, sed ili restis tie, hezitantaj.

- Se juna mastro voli aĉeti nin ?… fine diris unu el ili.

- Ni fidele servi lin, aldonis la alia.

- La tempoj ĉi tie tiel malfacilaj, juna mastro, diris la unua. Ho ! Mastro, laŭ graco, aĉeti nin ! Ni peti !

- Mi ne kapablas ! Mi ne kapablas tion ! *diris malgaje Georgio gestanta al ili per la mano malproksimiĝi*. Neeblas.

La kompatindaj homoj, afliktitaj, retiriĝis silente kaj kun la kapo mallevita.

- Estu mia atestanto, Eterna Dio ! *diris Georgio*

genuiĝante sur la tombo de sia kompatinda amiko. Ho ! Mi atestigas vin ke ekde ĉi tiu horo mi faros ĉion kion homo povas fari, por elpeli el mia lando la malfeliĉon de la sklaveco.

Ne estas ŝtono por marki la lokon kie ripozas nia amiko. Kial li bezonas monumenton ! Disinjoro scias kie trovi lin por restarigi lin senmorta ĉe la tago kiam li aperos en sia gloro.

Ne kompatu lin. Tia vivo, tia morto ne postulas larmojn. Estas nek en riĉeco nek en potenco ke brilas la gloro de Dio, sed en suferanta kaj sindona amo. Benataj estas tiuj kiujn Li alvokas por sekvi Lin kaj porti sian krucon post Li kun pacienco ! Estas pri ili ke estas skribita : "*Feliĉegaj tiuj kiuj ploras, ĉar ili estos konsolataj*" (Mateo 5.4).

43. Rakonto de Aŭtentikaj Reaperantoj.

La tombaj legendoj pli ol neniam cirkulis en la domo de Lagrizo.

Oni tute mallaŭte flustris esti aŭdanta, en la profundo de la nokto, paŝojn malsupreniri la subtegmenta ŝtuparo kaj vagi en la koridorojn. Vane oni ŝlosis la pordon de la supra etaĝo, la reaperanto havis en poŝo duoblan ŝlosilon, aŭ uzanta la privilegion akiritan de la fantomoj ekde nememoreblaj tempoj, trapasis la serurtruon, kaj paradis kiel antaŭe, kun tute zorgiga aŭdaco.

Pri la eksteraj formoj de la fantomo, la raportoj multe variis, pro iu tre disvastigita kutimo inter la nigruloj, kaj ankaŭ inter la blankuloj, fermi la okulojn en tia okazo, kaj kaŝi sian kapon sub litkovriloj, subjupoj aŭ iuj ajn alia vualo proksime de la mano. Nu, kiu ne scias ke kiam la okuloj de la korpo rezignas, la okuloj de la spirito estas nur pli viglaj kaj pli akraj. Estis do multe da piedostaraj portretoj de la reaperanto, ĉiuj atestitaj kaj garantiitaj similaj, kvankam, kiel ofte okazas pri la portretoj, ne estis inter ili alia analogio ol la klasika kostumo de la fantomoj, la granda blanka tuko. La kompatindaj sklavoj, malmulte spertaj pri malnova historio, ne sciis ke Ŝekspiro aŭtentikigis ĉi tiun pitoreskan detalon, dirante :

- La mortintoj envolvitaj en tukoj trairis la stratojn de Romo, eligante neartikulaciatajn ĝemadojn kaj kriojn (*Hamleto, akto 1, sceno 1*).

Ĉi tiu renkontiĝo estas stranga fakto pri pneŭmatologio, kiun ni prezentas al la studado de la spiritualistoj.

Kio ajn estu, ni scias, sen ia dubo, ke alta figuro, kovrita de blanka tuko, promenis dum nekonvenaj horoj tra la tuta

domo de Lagrizo, transiris la pordojn, ŝoviĝis kiel ombro en la dezertaj ĉambroj, malaperis intermite, kaj sin montris ĉe la supro de la mistera ŝtuparo kiu kondukis al la fatala subtegmento. Kaj tamen la morgaŭon ĉio estis fermita kaj tiel firme riglita kiel la antaŭtago.

Lagrizo ne sukcesis tute fermi la orelojn al ĉi tiuj bruoj, des pli lacigaj ke oni klopodis kaŝi ilin al li. Li drinkis eĉ pli ol kutime, levis la kapon pli alte kaj tage sakris pli ol neniam. Sed nokte li havis malbonajn sonĝojn, kaj la vizioj kiuj vizitadis lian litkapon estis tute ne agrablaj. La vesperon de la morgaŭo de la entombigo de Tomo, li ĉevale iris al la najbara urbo por plenumi orgion. li komplete plenumis ĝin. Li eniris hejmen malfrue kaj laca, ŝlosis sian pordon interne, prenis la ŝlosilon kaj enlitiĝis.

Kian ajn klopodon oni povu fari por sufoki animon, ĝi estas por la malbonulo maloportuna, malkvietiga, timinda gasto. Kiu povas fiksi limojn al ĝia agado ? Kiu konas ĉiujn ĝiajn misterajn eblecojn, ĝiajn timetojn kaj ĝiajn tremetojn, ke li ne povu pli superi ol li ne povas liberigi sin de sia eterneco ! Ĉu li ne estas malsaĝa, la homo kiu fermas sian pordon al spiritoj, kiam li havas unu el ili interne de si mem, kiun li ne kuraĝas renkonti vidalvide ? Kies voĉo, kvankam enfosita sub montoj, ankoraŭ resonas kiel la trumpeto de la lasta juĝo !

Lagrizo sin barikade enŝlosis, metis seĝon kontraŭ sian pordon, bruligis noktolampeton kaj metis siajn pistolojn permane atingeblajn. Li ekzamenis la fenestrofermilojn de la fenestroj, kaj ĵurante ke li timis nek la diablon, nek ĝian sekvantaron, li endormiĝis.

Li profunde dormis, ĉar li estis lacega. Sed finfine enigma ombro, sento de hororo, neklara antaŭtimo de danĝero ŝvebanta super li, enŝoviĝis en lian dormon. Li vidis la mortotukon de sia patrino. Kasiso tenis ĝin disfaldita

antaŭ li. Li aŭdis konfuzan bruon de dolorkrioj kaj de ĝemoj. Li sciis ke li dormis, kaj baraktis por vekiĝi. Li duonsukcesis. Ĉi-foje, li estis certa, io eniris en lian ĉambron. Lia pordo malfermiĝis. Li ne povis dubi, sed timo paralizis lin. Fine li abrupte turniĝis. La pordo estis malfermita; kaj mano estingis sian lumon.

Estis nebula kaj vualita lunlumo; tamen li vidis, tie, blankaĵon gliti, anstataŭ paŝi, li aŭdis la flugtuŝon de la mortotuko sur la pargeto. Ĝi estis tie, stara, senmova, apud lia lito. Frosta mano tuŝis lian; mallaŭta, obtuza voĉo trifoje murmuris en lian orelon : "*Venu ! Venu ! Venu !*" Kaj dum li estis kuŝanta kovrita de malvarma ŝvito, la aperaĵo malaperis, sen tio ke li sciu kiam kaj kiel. Li saltis el la lito, kaj kuris al la pordo; ĝi estis duturne ŝlosita. Li eksvenis.

Ekde tiu nokto Lagrizo sin allasis al ebrieco. Li drinkis, ne plu kiel antaŭe kun sufiĉe da singardo, sed supermezure kaj sen ĉeso.

Baldaŭ la famo ke li estis mortanta disvastiĝis en la ĉirkaŭaĵoj. Liaj ekscesoj estigis la teruran malsanon (*la deliran tremon*) kiu ŝajnas ĵeti sur la nunan vivon la kadavrajn ombrojn de estonta damno. Neniu kapablis elteni la hororojn de tiu funebra ĉambro, kie li deliris, baraktis, timkriis kaj parolis pri halucinaĵoj kiuj glaciigis la sangon de tiuj kiuj aŭdis lin. Stara, apud sia mortolito, li vidis stariĝi palega, terura, severega figuro kiu ripetis al li : "*Venu ! Venu ! Venu !*"

Per stranga koincido, la mateno kiu sekvis la nokton kiam la fantomo unuafoje aperis al Lagrizo, oni trovis la pordon de la domo malfermita, kaj kelkaj nigruloj videtis du blankecajn ombrojn glitantajn laŭlonge de la avenuo kiu kondukis al la granda vojo.

Iom antaŭ la sunleviĝo, Emelina kaj Kasiso haltis en arbetaro proksime al la urbo.

Kasiso, nigre vestita, surhavis la hispanan kreolan kostumon. Vualo, ĵetita super ŝian ĉapelon kaj superŝarĝita de brodaĵoj, kaŝis al ŝi la vizaĝon. Estis interkonsentite ke ŝi ŝajnigus sin kiel kreola sinjorino, kaj Emelina kiel ŝia ĉambristino.

Edukita ekde sia infanaĝo meze de distingitaj homoj, Kasiso troviĝis en perfekta harmonio de lingvo, de manieroj kaj de sinteno, kun la rolo kiun ŝi prenis. Tio kio ankoraŭ restis al ŝi de juveloj kaj riĉaj vestaĵoj ebligis al ŝi kompletigi sian personon.

Ŝi haltis en la antaŭurbo de la urbo, ĉe magazeno kie ŝi rimarkis vendotajn kofrojn. Ŝi aĉetis unu el ili, kaj petegis la komerciston portigi ĝin por ŝi. Tiel eskortita de servisto kiu veturigis ŝian bagaĝon per ĉarumo, de Emelina kiu sekvis ŝin ŝarĝita de ŝia noktosako kaj de diversaj pakaĵoj, ŝi eniris en la malgrandan gastejon kiel ĝentlemanino.

La unua persono kiun ŝi renkontis tie, estis Georgio Ŝelbi. Li atendis la venontan boato.

De la fenestreto de la subtegmento, Kasiso observis la junulon; ŝi vidis lin forigi la korpon de Tomo, kaj spektis de malproksime, ne sen ia kontentiĝo, lian lukton kun Lagrizo. Pli poste, dum siaj noktaj ekskursoj, kaj ligante la pecetojn de konversacioj kiujn ŝi aŭdis inter la nigruloj, ŝi eksciis kiu li estis, kaj komprenis lian rilaton kun Tomo. Vidante lin atendi kiel ŝi la boaton, ŝi sentis sin trankviligita.

La sinteno, la manieroj, kaj ĉefe la malŝparemo de Kasiso, forigis en la hotelon eĉ la ombron de suspekto. Homoj estas kutime malmulte pretaj serĉi kverelon kun iu ajn kiu bone pagas. Estas tio kion Kasiso planis kiam ŝi sin provizs per monon.

Krepuske oni aŭdis alproksimiĝi la boaton. Georgio Ŝelbi, kun la natura ĝentileco de ĉiu Kentukiano, proponis la brakon al Kasiso por alkonduki ŝin surŝipe, kaj zorgis taŭge

loki ŝin.

Tiel longe kiel daŭris la ŝipirado de la Ruĝa Rivero, ŝi restadis en la ĉambro kaj en la lito pretekstante malsaneton, kaj ŝia neoficiala kunulino sin montris el la plej klopodema por prizorgi ŝin.

Atingante Misisipo^{n}, Georgio, kiu sciis ke la fremda sinjorino direktiĝis kiel li al la alta lando, proponis al ŝi komune lui salonon en la sama boato. Li kompatis ŝin pro ŝia malforta sano, kaj deziris fari sian plejbonon por helpi ŝin.

Jen do niaj vojaĝantinoj sanaj kaj savitaj, lokitaj sur la bona boato la Cincinnatio, kaj plenvapore kontraŭflue irantaj laŭ la riverego.

La sano de Kasiso ege pliboniĝis; ŝi promenis sur la ferdeko, sidiĝis tie, vespermanĝis ĉe la tablo. Ĉiuj rimarkis en ŝi spurojn de malofta beleco.

Tuj kiam Georgio ekvidis ŝin, li emociiĝis pro unu el tiuj neklaraj kaj glitaj similecoj kiujn preskaŭ ĉiuj el ni renkontis kaj kiuj konsternas nin. Li ne povis sin deteni rigardi ŝin, konstante observi ŝin. Ĉe la tablo aŭ en la salono, la okuloj de la junulo fiksiĝis al ŝi, kaj sin deturnis nur kiam ŝi montris sin laca de ĉi tiu persisteco.

Kasiso maltrankviliĝis; ŝi opiniis ke li suspektis ion, kaj, decidita fidi al lia nobleco, ŝi rakontis al li sian historion.

Georgio estis tute inklina al simpatio kun kiu ajn fuĝis el la plantejo de Lagrizo, ĉi tiu malaminda loko, pri kiu li ne povis paroli sen indigno. Kun ĉi tiu kuraĝa malestimo pri la konsekvencoj, aparteco de lia aĝo kaj de lia karaktero, li certigis al Emelina kaj Kasiso ke li kiomeble plej baraktus por protekti kaj helpi ilin en ilia celo.

La najbara ĉambro estis okupata de francino, sinjorino de Tukso, kiu havis kun ŝi beletan knabineton el ĉirkaŭ dekdu jaroj.

Ĉi tiu sinjorino, eksciinte el la konversacio de Georgio,

ke li estis el Kentukio, sin montris deziranta konatiĝi kun li. Ŝi estis helpata de la gracioj de la infano kiu akompanis ŝin. Ŝi estis la plej dolĉa etulino kiu iam ĉarmis la enuon de dekkvintaga restado sur vaporŝipo.

Georgio ofte sidis ĉe la pordo de la ĉambro de s^ino de Tukso, kaj Kasiso povis de la galerio aŭdi ilian konversacion.

La alilandanino metis mil demandojn pri Kentukio kie, ŝi diris, ŝi pasloĝis dum sia junaĝo. Georgio mire malkovris ke ŝi loĝis en la proksima najbareco de lia familio. Ŝi montris pri la lando kaj ĝiaj loĝantoj konon kiu konfuzis lin.

- Ĉu iam vi ne havis en via ĉirkaŭaĵo, ŝi demandis al li, viron nomatan Hariso^n ?

- Fakte estas maljuna plantisto kun tiu nomo, kiu loĝas je malmulta distanco de ĉe mia patro, respondis Georgio; sed ni neniam multe rilatis kun li.

- Li estas granda sklavposedanto, mi kredas, *reparolis s^ino de Tukso per tono kiu esprimis pli da intereso ol ŝi volis montri*.

- Jes, *rebatis Georgio mire rimarkanta ŝian konfuzon*.

- Eble vi sciis… eble vi aŭdis diri ke li havis… mulaton nomatan Georgo^n.

- Ho ! Certe. Georgo Hariso. Mi bone konis lin. Li edziĝis kun unu el la virinoj de mia patrino. Li eskapis, kaj nun devas esti en Kanado.

- Forfuĝinta ! Dio estu laŭdata ! *ekkriis s^ino de Tukso*.

Georgio, pli kaj pli surprizita, scivoleme rigardis ŝin, sed diris nenion. S^ino de Tukso ekploris. "*Li estas mia frato !*" ŝi diris.

- Sinjorino ! kriis Georgio.

- Jes, s^ro Ŝelbi, *kaj ŝi levis la kapon kun sento de fiereco*, Georgo Hariso estas mia frato !

- Ĉu eblas ? *diris Georgio malproksimiĝante kaj ekzamenante ŝin miregigita*.

- Mi estis vendita en la Sudo, kiam li ankoraŭ estis nur infano, *ŝi daŭrigis*. Bona kaj malavara viro aĉetis min; li alkondukis min al la francaj kolonioj, malsklavigis min kaj edziĝis kun mi. Antaŭnelonge mi malĝojis perdi lin, kaj iris al Kentukio esperante trovi mian fraton tie kaj elaĉeti lin.

- Mi fakte aŭdis lin paroli pri fratino Emma kiu estis vendita en la Sudo.

- Mi estas tiu fratino, *reparolis s^ino de Tukso*. Sed diru al mi, mi petegas, tiu kiu li estis ?

- Bela junulo, *rebatis Georgio*; kaj malgraŭ la malbeno de la sklaveco, li faris al si bonegan reputacion, pri inteligenteco kaj pri principo. Mi estas des pli informita, ke li edziĝis en nia domo.

- Kaj kiu estis lia edzino ? *demandis maltrankvile s^ino de Tukso*.

- Trezoro, *diris Georgio*, inteligenta, pia kaj bela junulino. Mia patrino edukis ŝin preskaŭ kiel sian infanon. Ŝi sciis legi, skribi; ŝi mirinde kudris kaj brodis. Ŝi plie havis rimarkindan voĉon kaj kantis tre bone.

- Ĉu ŝi naskiĝis ĉe vi ?

- Ne; mia patro aĉetis ŝin dum unu el siaj vojaĝoj al Nov-Orleano, kaj donis ŝin al mia patrino kiel donacon. Ŝi tiam havis inter ok kaj naŭ jarojn. Li neniam volis diri, kiom li pagis ŝin; sed la alian tagon, ordigante malnovajn paperojn, ni trovis la vendokontrakton. Ŝi kostis al li ekscesan sumon, sendube pro ŝia malofta beleco.

Georgio, donante ĉi tiujn detalojn, turnis la dorson al Kasiso kaj ne povis vidi la esprimon sur ŝia vizaĝo.

Ĉe ĉi tiu punkto de la rakonto ŝi tuŝis al li la brakon, kaj pala pro emocio, ŝi diris :

- Ĉu vi scias la nomon de la homoj kiuj vendis ŝin ?

- Iu Simonso estis, mi kredas, la ĉefa posedanto; almenaŭ ĉi tiu nomo, se mi ne eraras, troviĝis en la fronto de

la kontrakto.

- Ho ! Dio mia ! *ekkriis Kasiso, kaj ŝi falis sen konscio sur la plankon.*

Georgio kaj s^ino de Tukso rapidis ĉirkaŭ ŝin; kvankam ili nenion komprenis pri ĉi tiu sveno, ili estis konsternataj, kaj sekve de tio faris en tia kazo ĉiujn ordinarajn mallertecojn. En sia fervoro Georgio verŝis poton da akvo kaj rompis du glasojn. La sinjorinoj arigitaj en la salono, eksciinte ke iu svenis, obstrukcis la pordojn malebligante la eniron de aero. Resume, ĉio kio devintus ne esti farita, estis farita.

La kompatinda Kasiso, malgraŭ ĉio ĉi, rekonsciiĝis. Deturnanta sian vizaĝon, ŝi ploris kaj singultis kiel infano. Eble, vi, patrinoj, vi povus diri pri kio ŝi pensis ? Eble vi ne kapablus. Sed tiumomente, ŝi sentis sin certa ke Dio kompatis ŝin kaj ke ŝi revidos sian filinon. Kaj, efektive, pli poste… Sed ni anticipas.

44. Rezultoj.

Restas al ni malmulte da aferoj por aldoni. Kortuŝita, kiel devis esti junulo, pro la esperoj kaj angoroj de la kompatinda patrino, kaj plena de sentoj de humaneco, Georgio Ŝelbi ne perdis tempon por serĉi la akto de vendo kaj transdoni ĝin al ŝi. Nomoj, dato, ĉio ĝuste kongruis kun la memoroj de Kasiso. La dubo ne plu eblis pri la identeco de la infano. De nun temis nur trovi la spurojn de la fuĝintoj.

S^{ino} de Tukso kaj Kasiso, kunigitaj de la aparta koincido de iliaj destinoj, tuj iris al Kanado, kaj komencis sian enketon en ĉiuj stacioj kie ekloĝis la multaj fuĝintaj sklavoj. En Amherstburgo, ili malkovris la misiiston kiu akceptis la junajn geedzojn tuj post iliaj elŝipiĝoj, kaj eksciis de li ke la tuta familio translokiĝis al Montrealo.

Georgo kaj Eliza tie ĝuis sian liberecon ekde ĉirkaŭ kvin jaroj. La edzo trovis stabilan okupon en la metiejoj de honesta maŝina inĝeniero, kaj liaj enspezoj sufiĉis por komforte vivteni lian familion, kiu pliiĝis de knabineto.

Henriko, fariĝinta bela kaj vigla juna knabo, diligente vizitadis bonan lernejon, kie lia, progresoj estis rapidaj.

La digna pastro de la stacio Amherstburgo estis tiel kortuŝita de tio kion s^{ino} de Tukso kaj Kasiso rakontis al li ke li cedis al la instigaj petoj de la unua, kaj konsentis akompani ilin en ilia serĉado, la riĉaĵo de s^{ino} de Tukso ebliganta ŝin zorgi pri ĉiuj elspezojn.

Ĉu vi vidas, funde de unu el la antaŭurboj de Montrealo, ĉi tiun tutpuran dometon ? Tie, dumnokte, ĝoja fajro gajigas la hejmon; la teotablo, kun sia neĝblanka tablotuko, estas preparita por la vespera manĝo. En iu angulo de la ĉambro, sur alia tablo kovrita de verda tuko, troviĝas la pupitro, la

plumoj, la papero; super ĝi iu mallarĝa breto estas provizita de malgranda sortimento de elektindaj libroj. Tie estas la kabineto de Georgo; ĉar ĉi tiu sama inteligenta aktiveco kiu kapabligis lin kaŝe lerni la arton legi kaj skribi, meze de ĉiuj obstakloj, de laciĝoj, de laboroj de lia unua vivo, ankoraŭ instigas lin dediĉi siajn libertempajn horojn al kulturado de sia menso.

En ĉi tiu momento, li sidas antaŭ sia tablo kaj prenas kelkajn notojn el iu volumo en la familia libraro, kiun li finas legi.

- Nu, Georgo, *diris Eliza*, vi laboris eksteren la tutan tagon, ĉu vi bonvoli demeti ĉi tiun libron nun kaj konsenti al ni iom da babilado dum mi pretigi la teon ? Esti bone !

La eta Elina helpas la penojn de sia patrino; ŝi trotetas al la leganto, kaj provas sin loki sur liajn genuojn ĉe la loko de la volumo kiun ŝi provas forpreni de li.

- Ho eta friponino ! *diris Georgo cedante kiel faras ĉiuj patroj*.

- Bonege ! *rekomencis Eliza kiu tranĉis la pantranĉaĵojn*.

Iom malpli juna, iom malpli svelta, ŝi havas en la vizaĝo ion pli patrinan, malpli junulinan ol antaŭe. Sed ŝi ŝajnas tiel feliĉa kiel virino povas esti.

- Henriko, knabo mia, kiel vi elturniĝis por fari ĉi tiun adicion ? *demandis Georgo metante sian manon sur la kapon de sia filo*.

Li ne plu estas la infano kun longaj silkaj bukloj; sed li konservis la brilantajn okulojn, la dikajn kaj longajn okulharojn, la altan kaj aŭdacan frunton kiu koloriĝis de orgojlo kiam li respondis : "*Mi faris ĝin tute sola, paĉjo, neniu helpis min*".

- Estas bone, knabo mia; apogu vin sur vi mem, filo mia, vi havas por tio pli bonan ŝancon ol via kompatinda patro.

Ĉe ĉi tiu momento oni batis la pordon; Eliza iris malfermi. Je ŝia ĝojkrio : "*Kio, estas vi !*" Ŝia edzo ekstaris, kaj la bona pastro de Amherstburgo estis akceptata. Du sinjorinoj akompanis lin, Eliza invitis ilin sidiĝi.

Se necesas ĉion diri, la bona misiisto antaŭe faris sian etan programon. La tuta afero devis iom post iom disvolviĝi memstare; kaj survoje li bone avertis siajn kunulinojn kontraŭ tro subita malkovro.

Kia estis la konsterniĝo de la brava viro kiam, ĝuste en la momento kiam, post esti per gesto indikanta al la du sinjorinoj iliajn sieĝojn, li eltiris sian naztukon por improvizi la paroladon kun la dezirata graveco, subite s^ino de Tukso renversis ĉiujn liajn planojn, kaj ĵetante siajn du brakojn ĉirkaŭ la kolon de Georgo : "*Ho Georgo !* ŝi ekkriis, *ĉu vi ne rekonas min ? Mi estas via fratino Emma !*"

Kasiso, restinta sida kun pli da sinteno kaj da sereneco, pretiĝis laŭeble plenumi sian rolulon, kiam la eta Elina aperis al ŝi sub la trajtoj, la talio, la tuta aspekto de ŝia filino tiel longe perdita kaj plorita, kaj skuanta sur ŝia malgranda ronda kapo la samajn ondiĝantajn buklojn. La eta petolulino kaŝrigardis la vizaĝon de la sinjorino per grandaj scivolemaj okuloj. Kasiso ne eltenis, ŝi kaptis ŝin, altiris ŝin kaj premis ŝin kontraŭ sia brusto, kriante tion kio, en la emocio de la momento, ŝajnis al ŝi reala : "*Karulino mia, mi estas via patrino !*"

Estis ja malfacila afero por reordigi ĉion kaj trankviligi ĉiujn. Ne estis sen malfacilaĵo ke la digna pastoro fine sukcesis. Finfine, li povis prezenti la paroladon kiu devis malfermi la kunsidon, kaj sukcesis kontentigante ĉiun oratoron malnovan aŭ modernan, ĉar la tuta aŭskultantaro ekploregis.

Ĉiuj surgenuiĝis, kaj la bonega viro elparolis la preĝon por ĉiuj. Ekzistas sentoj tiel malkvietaj, tiel tumultaj, ke ili

povas trovi ripozon nur elverŝante ĝin en la sinon de la Eternulo, fonto de ĉiu amo. Restariĝante, frato, fratino, patrino kaj filino, tiel neatendite retrovitaj, reciproke sin kisis kun dankemaj impetoj al ĉi tiu Dio kiu, tra tiom da suferoj, tiom da danĝeroj kaj tra tiel malklaraj vojoj, finfine kunigis ilin.

La notoj kolektitaj de misiisto de Kanado abundas je pli mirindaj rakontoj ol la plej romaneskaj fikcioj. Ĉu povas esti alie en situacio kiu disĵetas la familiojn en ĉiujn direktojn, kiel ŝtorma vento disigas la aŭtunajn foliojn ? Simile al la eternaj marbordoj, ĉi tiu rifuĝlando ofte kunigas, en komuna ĝojego, tiujn kiuj dum multaj jaroj ploris unu pri la alia, kredante sin perditaj por ĉiam. Nenio estas pli kortuŝa ol la malkvieta ardo per kiu oni akceptas ĉiun alvenanton kiu povas alporti kelkajn novaĵojn pri patrinoj, fratinoj, infanoj, edzinoj ankoraŭ perditaj en la malgajaj limboj de la sklaveco.

Okazas heroaĵoj supre de ĉiuj romaneskaj fikcioj kiam, spitante torturojn kaj maltimante morton, la unuafoje savita fuĝinto memvole reiras sin riski al ĉiuj danĝeroj de ĉi tiuj lokoj de mallumo, por eltiri el ĝi patrinon, fratinon, edzinon !

Iu junulo, kies misiisto rakontis al ni la historion, dufoje rekaptita, disŝirita de hontindaj vipobatoj pro lia heroeco, denove eskapis, kaj, en letero kiun ni aŭdis legi, parolas pri reiri riskante ĉion por provi liberigi sian fratinon. Ĉu ĉi tiu viro estas, laŭ via opinio, krimulo aŭ heroo ? Por savi vian fratinon, ĉu vi ne farus same ? Kaj ĉu vi povas mallaŭdi lin ?

Ni revenu al la amikoj kiujn ni postlasis, viŝantaj siajn larmojn kaj provante reakiri spiron meze de la ekzaltiĝoj de tro vigla kaj tro neatendita ĝojo. Jen ili kunigitaj ĉirkaŭ agrabla manĝilaro, kaj vere iĝintaj societemaj kaj de bona kompanio. Nur Kasiso, kun la eta Elina sur siaj genuoj, ne kapablis moderiĝi kaj ofte ĉirkaŭbrakis ŝin kun ekzaltiĝo. La eta petolulino mirigita rigardis ŝin, kaj ne komprenis ke la

sinjorino rifuzis lasi sin sufokigi per multe da kukoj kiujn la infano persistis enŝovi en ŝian buŝon ! Kaj kiam Kasiso asertis esti finfine trovanta tion kion ŝi pli ŝatis ol ĉiujn kukojn kaj bombonojn, la etulino fiksis sur ŝin grandajn okulojn tute surprizitajn.

Du aŭ tri tagoj faris Kasiso^n nerekonebla. Ŝia esprimo de konstanta malespero cedis lokon al mieno de dolĉa kaj tenera konfido. Ŝi ŝajnis malrapidege miksiĝi en la familio kaj proprigis al si la infanojn kiel posedaĵon longtempe deziregitan. Ŝia amo superfluis al la etulino, pli ol al sia propra filino. En la infano, ŝi vidis la bildon tiel perfektan de tiu kiun ŝi perdis. La eta kreitaĵo, inter ŝia avino kaj ŝia patrino, estas kiel flora ĉeno, ligo de simpatio kaj amo. La firma kaj solida pieco de Eliza, kiun la konstanta legado de la sankta parolo nutris, igas ŝin bonega gvidantino por la malkvieta kaj laca spirito de ŝia kompatinda patrino. Kaj baldaŭ, submetita al tiom da utilaj influoj, Kasiso fariĝas pia kaj tenera kristanino.

Pasis apenaŭ du tagoj kiam S^ino de Tukso, sciigante sian fraton pri siaj propraj aferoj, proponis dividi kun la familio de Georgo la konsiderindan kaj sendependan riĉaĵon kiun ŝia edzo lasis al ŝi.

- Ho ! kara Emma, *respondis al ŝi ŝia frato*, donu al mi tion kion mi ĉiam deziris antaŭ ĉio, bonan kaj kompletan edukadon, kaj mi zorgos pri la resto.

Post matura pridiskuto, estis decidata ke la tuta familio iros al Francio. Ili foriris, kunprenante Emelin^an. Ĉi-lasta dum la ŝipirado, akiris la koron de la vickapitano de la ŝipo, fariĝis lia edzino iom post ilia alveno al Havro.

Georgo restis dum kvar jaroj en franca universitato, kaj, diligentante per senĉesa fervoro, akiris tre ĝisfundan edukadon. La politikaj tumultoj okazantaj en Francio en tiu epoko decidigis la revenon de la familio al Usono. Tio kion la

edukado kaj kompanio de kleruloj kontribuis al la maturiĝo de la sentoj kaj vidpunktoj de Georgo, plej bone estos komprenata per la fragmentoj de iu letero kiun li tiam skribis al unu el siaj amikoj :

"Mi sentas min iom perdita pri miaj planoj por la estonteco. Estas vere ke mi povas, kiel vi instigas min, partopreni en la societo de la blankuloj de ĉi tiu lando. La miksaĵo de koloro, apenaŭ rimarkebla pri mi, tute malaperas pri mia edzino kaj miaj infanoj. Do dependas nur de mi ŝajnigi min kiel blankulon; sed, por diri veron al vi, mi tute ne deziras tion.

"Miaj simpatioj ne estas por la raso de mia patro. Kiu mi estis por li ? Tio kio estas bela hundo, bela ĉevalo, eble. Pri mia kompatinda kara patrino, mi estis filo, kaj ŝia raso estas la mia. Neniam mi revidis ŝin ekde la kruela vendado kiu disigis nin. Ŝi mortis sen kisi min. Sed mi scias, mi scias tion per mia propra koro, ĝis la fino ŝi kare amis min. Kiam mi pensas pri tio kion ŝi suferis, pri la angoroj de mia infanaĝo kaj de mia frua juneco, pri la malespero, pri la luktoj de mia heroa edzino, de mia fratino vendita en sklavmerkato al Nov-Orleano, sen manki de kristana karitato, mi esperas tion, mi povas diri ke mi tute ne deziras esti rigardata kiel usonano, kaj ke mi tute ne adoptas Usonon kiel mian patrion.

"Estas al la subpremita raso, sklavigita, estas al la afrika raso ke mi aliĝas per la tuta energio de miaj korinklinoj. Tute ne deziranta malproksimiĝi de ĝi perdante ĉiujn spurojn de koloro, mi dezirus al mi pli malhelan koloron, por similiĝi al ĝi.

"Ĉiuj miaj simpatioj, ĉiuj fervoroj de mia animo estas por iu afrika nacieco. Mi volas aniĝi al iu popolo videble apartigita de la aliaj popoloj. Kie serĉi ĝin ? Ne en Haitio. Komencintaj malalte, ĉi tiuj homoj ne povus distingiĝi. La

riverego ne supreniras super la nivelo de sia fonto. La raso kiu formis la haitan popolon, estis eluzita, dolortimema, kaj por ke tiuj kiujn ĝi submetis, regeneras, necesos jarcentoj.
"Kien rigardi tiam ? Sur la bordoj de Afriko, mi vidas respublikon formitan de homoj elektitaj ĉie, plejparte edukitaj super sia kondiĉo de sklavo per multe da individua energio, kies inteligenteco formiĝis, kleriĝis denove dank'al persona klopodado. Ĉi tiu respubliko travivis tempojn de malforto kaj de provo; ĝi sukcesis agnoskigi sin sur la surfaco de la terglobo. Ĝi estas akceptita de Francio, de Anglio. Tien mi iros, tie estas mia popolo.
"Ne komencu ĉiuj protesti, atendu; antaŭ ol ĵeti al mi la ŝtonon, aŭskultu min. Dum mia restado en Francio, mi studis kun profunda intereso la historion de mia raso kaptita en Ameriko. Mi sekvis la opiniojn, observis la debatojn inter la koloniistoj kaj la aboliciistoj[37]*. Kiel spektanto de malproksime, mi povis formi mian opinion kiu eble estus alia, se mi partoprenintus en la lukto.*
"Mi ne neos ke la kolonio de Liberio servis kiel instrumento por ĉiaj intencoj kontraŭ ni; ke ĝi estis armilo en la manoj de niaj premantoj; ke ĝi partoprenas en la rimedoj uzataj por prokrasti, se ne por ĉiam malebligi, nian emancipiĝon. Sed, por mi, la demando estas alia. Ĉu ne ekzistas super la planoj faritaj de homoj, Dio kiu renversante iliajn projektojn, eble kreis per iliaj manoj, kaj malgraŭ ili, nacion por ni ?
"Niatempe nacio naskiĝas en unu tago. Kiam popolo subite leviĝas, ĝi trovas ĉiujn gravajn problemojn de socia vivo, de politika vivo kaj de civilizacio jam pretaj, solvitaj por ĝi. Ĝi bezonas nenion malkovri, ĝi nur devas apliki. Lasu do nin,

37 Tiuj ĉi, sen zorgi pri la estonteco de liberigitaj sklavoj, vidas nur iliian rajton : la tuja kaj senrestrikta malsklavigo. La aliaj parolas pri sinsekve malsklavigi kaj transporti la sklavojn al la bordoj de Afriko, al Liberio.

helpante nin unu la alian, kolekti niajn fortojn, paŝi ĉiuj kune, kaj vidi tion kion ni kapablos plenumi, havante la belegan kontinenton de Afriko malfermitan antaŭ ni kaj niaj infanoj. Nia potenca raso ruligos la ondojn de civilizacio kaj kristanismo laŭlonge de siaj grandiozaj marbordoj, kaj plantos viglajn respublikojn kiuj, kreskante kun la rapideco de la tropika vegetaĵaro, mirigos la estontajn jarcentojn.

"Ĉu vi diros ke mi forlasas miajn kaptitajn fratojn ? Mi ne pensas tion. Ha ! Se mi iam forgesus ilin dum unu horo, dum momento, ke Dio siavice forgesu min ! Sed ĉi tie, kion mi farus por ili ? Ĉu mi povas rompi iliajn ĉenojn ? Ne, kiel individuo. Partprenante en nacio havanta voĉon inter la nacioj, tio estas alia afero. Tiam ni aŭskultigos nin. Nacio rajtas argumenti, admoni, petegi, eĉ postuli kaj subteni la kazon de sia raso; individuo povas nenion.

"Se iam Eŭropo fariĝos granda konsilio de kleraj kaj liberaj nacioj, kaj mi fidas al Dio ke ĉi tiu tempo venos, se ĉiu servuteco, ĉiu maljusta kaj subprema malegaleco malaperus, se ĉiuj popoloj, kiel faris francoj kaj angloj, agnoskus nian sendependecon; tiam ni apelacius al ĉi tiu supera kongreso, kaj ni pledus antaŭ ĝi la kazon de nia subpremata kaj suferanta raso. Neeblas tiam ke la elerarigita Usono ne rapidu mem forviŝi la sinistran strekon kiu makulas ĝian blazonon, malindigas ĝin inter la popoloj kaj fariĝas por ĝi malbeno pli malbona ol por tiuj mem kiujn ĝi subpremas.

"Vi diras al mi ke nia raso havas por miksiĝi en la usona respubliko la samajn rajtojn kiel la irlandanoj, la germanoj kaj la svedoj. Mi konsentas tion al vi; ĝi eĉ havas pli pravajn rajtojn. Ni devus esti liberaj por asociiĝi, miksiĝi kun la usonanoj, leviĝi inter ili, laŭ la propra merito, sen konsidero de kasto aŭ de koloro. Tiuj kiuj rifuzas al ni ĉi

tiun rajton, mensogas al la principoj mem de homa egaleco kiujn ili malkaŝe deklaras. Ĉi tie niaj rajtoj devus superi tiujn de ĉiuj aliaj homoj; ĉar al ni, insultita raso, estas ŝuldata riparo; sed mi ne volas ĝin. Mi petas patrion, nacion kiu estas mia. Mi kredas ke la afrika raso havas virtojn, kapablecojn kiuj devas disflori laŭ la lumoj de la civilizacio kaj de la kristanismo, kaj kiuj, aliaj ol tiuj de la anglosaksuloj, povas morale esti el pli alta rango.

"La destinoj de la mondo estis komisiitaj al ĉi tiu raso de la Nordo, firma kaj entreprenema, dum ĝia pionira periodo de luktoj kaj konfliktoj. Ĝiaj rigidaj, energiaj, nefleksebla elementoj preparis ĝin por ĉi tiu misio. Sed, kiel kristano, mi atendas malpli profitaman epokon, kaj mi kredas tuŝi ĝin. La doloroj kiuj, en niaj tagoj, agitas, skuas la naciojn, estas, laŭ mia vidpunkto, nur la antaŭtimegoj, la angoroj de la nasko de ĉi tiu prospera horo de paco kaj universala frateco, kiun mi esperas.

"Mi havas la plej firman konvinkon ke la disvolviĝo de la afrika raso estos esence kristana. Se ĝi estas nek supera, nek trudema, nek energia, ĝi estas amema, tenera, plena de grandanimo kaj de la subpremo. Elprovita en la fornego de la maljusto kaj subpremo, necesis al ĝi aliĝi, kun pli intima kaj arda fido, al doktrino de amo kaj de pardono, kiun ĝi estas komisiita disvastigi kaj regigi sur la tuta afrika kontinento.

"Mi mem, mi konfesas tion, sentas mian malforto pro tio, la impetega kaj bolanta sango de la sakso estas duone en tiu kiu varmigas miajn vejnojn. Sed mi senĉese havas ĉe miaj flankoj tiun kies persvada voĉo predikas al mi la Evangelion per tiel penetra mildeco; mi havas mian belan, mian ĉarman edzinon. Se mi eraras kaj ekkoleras, ŝia dolĉa kaj tenera spirito venas kvietigi min, kaj meti antaŭ miajn okulojn la alvokiĝon kaj la mision de nia raso. Kiel kristana patrioto,

kiel kristana predikisto, mi iras en la patrio kiun mi elektis, al glora Afriko. Estas al mia nacio ke, el plejfunde de mia koro, mi ofte aplikas la grandiozajn promesojn de la profeto : "Anstataŭ tio ke vi estu forlasita kaj malamata, tiom ke estis neniu kiu pasis al vi, Mi metos vin en eternan alteco kaj en ĝojo kiu daŭros de generacio al generacio ! (Isaïe 60,15).

"Vi traktos min kiel entuziasman; vi diros al mi ke mi ne sufiĉe pripensis kaj ĝustigis tion kion mi entreprenas. Mi ekzamenis ĉion, amiko mia, mi scias al kio mi riskas min kaj konas miajn celojn. Mi iras al Liberio, ne kiel al lando de romaneskaj esperoj, mi iras tien kiel al la plugkampo. Mi iras tien por labori per ambaŭ brakoj, por vigle labori; labori kontraŭ ĉiuj specoj de malfacilaĵo, de senkuraĝigo, fine labori tien ĝis kiam mi mortos. Jen kial mi iras tien. Pri ĉi tiu punkto, mi pensas, vi konsentos ke mi tute ne riskas esti elrevigita.

"Kion ajn vi pensos pri mia decido, ne forprenu vian fidon, vian amikecon, kaj estu certa ke, kion ajn mi faras, mi agas kun koro kaj animo tute sindonemaj al mia popolo.

Georgo Hariso".

Kelkajn semajnojn poste, la verkinto de ĉi tiu letero, lia edzino, liaj infanoj, lia fratino kaj lia bopatrino enŝipiĝis al Afriko; kaj se ni ne eraris, la mondo pli poste aŭdos pri ili.

Pri niaj aliaj roluloj ni havas nenion tre apartan por skribi, krom vorto koncerne fraŭlinon Ofelio^{n} kaj Topsi^{n}, kaj adiaŭa ĉapitro kiun ni dediĉos al Georgio Ŝelbi.

F^{ino} Ofelio kunkondukis Topsi^{n} kun si en la ŝtaton Vermonto^{n}, je la neesprimebla surprizo de la grave solena organo, seriozaj homoj kiuj en Nov-Anglio estas ekskluzive nomata "nia mondo". Ĉi tiu aldono al la ĝis tiam tiel bone ordigita organizo de la familio ŝajnis al "nia mondo" el la plej maloportuna kaj tute stranga. Sed la klopodoj de f^{ino} Ofelio

por plenumi sian devon al ŝia lernantino estis tro fervoraj, tro persistaj, por ne fariĝi efikaj. Baldaŭ la infano, kiu rapide kreskis en gracieco kaj en saĝeco, estis bonvena, kaj en la hejmo, kaj en la familioj de la najbaraĵo. Fariĝinte inteligenta junulino, ŝi petis kaj ricevis bapton, kaj kiel membrino de la kristana eklezio, montris tiom da agado, da fervoro, da ardo por esti utila, da deziro por fari iom da bono en ĉi tiu mondo, ke finfine rekomendita, elektita, aprobita, ŝi estis sendita kiel misiistino al iu el la stacioj de Afriko. Tie, kiel ni eksciis tion, la tumulta aktiveco, la senorda inteligenteco, kiu igis ŝian infanaĝon al ŝi mem tiel laciga, tute ne malutilas al ŝi nun. Ŝi aplikas ĉi tiujn reguligitajn kapablojn, laŭ la plej feliĉa kaj plej bonfara maniero, al la edukado de la infanoj de sia raso.

PS : Kelkaj patrinoj plezure ekscios ke la esploradoj okazigitaj de s^{ino} de Tukso, por malkovri la filon de Kasiso, ricevis favoran rezulton. Ĉi tiu junulo, dotita de energia naturo, sukcesis, kelkajn jarojn antaŭ sia patrino, eskapi. Li estis akceptita kaj edukita en la Nordo, de la amikoj de la subprematoj, kaj li iris por rekuniĝi kun sia familio en Afriko.

45. La Liberiganto.

Georgio Ŝelbi skribis kelkajn liniojn al sia patrino por anonci al ŝi sian revenon. Li tute ne parolis pri la morto de sia kompatinda malnova amiko, ĉar lia koro malfortiĝis tuj kiam li ektraktis ĉi tiun malĝojan temon. Li plurfoje ripetis tion, sed sufokita de siaj singultoj, li ŝiris la paperon, viŝis al si la okulojn kaj kuris serĉi aliloken por iom da kvieto.

La tuta "granda domo" estis ekscitita tiutage; oni atendis massan Georgio^{n}. S^{ino} Ŝelbi sin lokis en la salono, kie vigla lignofajro dispelis la malvarmajn nebulojn de aŭtuna vespero. La manĝilaro, brilega pro arĝentaĵaroj kaj kristaloj, estis aranĝita por la vespermanĝo sub la inspektado de nia malnova amikino, onklino Kleo.

Vestita de robo el nova kotonaĵo, de blanka antaŭtuko kaj de alta amelita turbano, kun ŝia nigra kaj brila vizaĝo radianta pro kontentiĝo, Kleo perfektigis la aranĝojn de la tablo, kun detalema asidueco, kiun ankaŭ servis al ŝi kiel preteksto por resti kaj iom babili kun "mastrino".

- Jen ! Nun kiam ĉio estis en loko, *ŝi diris*, ĉu ne ŝajni al massa Georgio esti ne moviĝinta ? Jen lia telero ĝuste tie kie li bezoni ĝin, ne for de la fajro, massa Georgio ĉiam tre ŝati bonan lokon varman. Ho ! Nur necesi lasi min fari ! Kial do Salio ne meti la belan tekruĉon, la novan, kiun massa Georgio donis al mastrino por Kristnasko ? Mi ja iri serĉi ĝin. Ĉu mastrino ricevi novaĵojn de massa ? *ŝi diris per demanda tono*.

- Jes, Kleo, unu aŭ du liniojn, nur por diri ke li estos ĉi tie ĉi-vespere, se li povos; estas ĉio.

- Kaj ĉu massa ne diri etan vorton pri mia maljunulo ? Nenion ? *ŝi demandis, moviĝante ĉirkaŭ la tasoj*.

- Ne, li ne parolas pri li, Kleo, kaj diras nur ke li rakontos ĉion al ni pri tio, tuj post sia reveno.

- Tute kiel massa Georgio esti, ja ! Eta knabo, li ĉiam voli diri la aferojn de si mem. Ho ! Mi bone koni massan Georgio^{n} ! Fakte, mi ne scii kial la blankuloj tiel agi, multe da skribaĵoj; ĝi estas tiel longa kaj tiel nepraktika maniero !

Sinjorino Ŝelbi ridetis.

- Certege, mia maljunulo ne rekoni la knabojn, ankaŭ ne la beletan etulinon. Disinjoro ! Paola nun esti granda knabino, kaj bona knabino, tute ne tro mallerta. Ŝi resti en la kabano por priatenti la kukon, tute ĝuste la saman kiel tiu kiun mia maljunulo tiom ŝati ! La saman kiun mi fari al li la tagon kiam oni forkonduki lin ! Disinjoro beni nin ! Mi ne scii kie mi esti tiu mateno !

S^{ino} Ŝelbi suspiris, ĉi tiu memoro falis sur ŝi kiel pezaĵo sur la koron. Ekde kiam ŝi ricevis la leteron de sia filo, ŝi sentis konfuzan timeton; ŝi timis ke lia silento kaŝu iun malbonan novaĵon.

- Ĉu mastrino bone havi la salajrajn biletojn ? *maltrankvile demandis Kleo.*

- Jes, Kleo.

- Esti ĉar mi voli vidigi al mia maljunulo la verajn salajrajn biletojn kiujn tiu sukeraĵisto de tie doni al mi. "Kleo, ke li diri al mi, mi bedaŭri ke vi ne resti pli longe". "Dankon, mastro, ke mi respondi al li; tio ne ebli ĉar mia maljunulo baldaŭ reveni, kaj ĉar mastrino ne povi plie malhavi min". Jen tute ekzakte kiel mi diri. Tre justa kaj tre deca viro, S^{ro} Ĝonso.

Kleo insiste petis ke la samaj bankbiletoj, kiuj estis pagitaj al ŝi kiel salajro, estu konservitaj por esti montrataj al ŝia edzo, kiel pruvo de ŝia kapableco, kaj s^{ino} Ŝelbi tutkore konsentis tion.

- Ho ! Li neniam kapabli rekoni Paola^{n}, mia maljunulo ! Li

ne rekoni ŝin, certe. Disinjoro ! Diri ke antaŭ kvin jaroj ili forpreni lin ! La etulino apenaŭ povi stari sur siaj piedoj. Mi memori kiel li ĉiam eksalti, timante ke ŝi fali, kiam ŝi komenci paŝi ! Ŝajni ke esti hieraŭ.

La bruo de la radoj aŭdiĝis.

- Messa Georgio ! diris Kleo rapidante al la fenestro.

S^ino Ŝelbi kuris al la enireja pordo, kie ŝia filo brakumis ŝin. Onklino Kleo restis senmova, strebante per la tuta potenco de siaj okuloj malkovri iun en la mallumo.

- Ho ! Kompatinda onklino Kleo ! *diris emocie Georgio haltante apud ŝi, kaj premante ŝian krudan kaj nigran manon inter la siaj*, mi donintus ĉion, ĉion kion mi posedas por revenigi lin kun mi; sed li foriris, li iris al pli bona mondo.

S^ino Ŝelbi eligis doloran ekkrion, sed Kleo nenion diris.

Ili eniris en la salonon. La mono pri kiu Kleo tiel fieris, estis dismetita sur la tablo.

Ŝi kolektis ĝin, prezentis ĝin per tremanta mano al sia mastrino.

- Jen, ŝi diris, mi neniam plu voli vidi ĝin aŭ aŭdi paroli pri ĝi. Mi scii kiel tio finiĝi : vendita kaj murdita tien sur tiuj abomenaj plantejoj !

Kleo deturniĝis, kaj malhumile direktiĝis al la pordon. S^ino Ŝelbi sekvis ŝin, prenis unu el ŝiaj manoj, milde altiris ŝin sur seĝon kaj sidiĝis apud ŝi :

- Kompatinda bona Kleo mia !

La fidela estulino klinis sian kapon sur la ŝultron de sia mastrino kaj plorĝemis.

- Ho ! Pardoni min, mastrino, kompatinda koro de mi disfendiĝi ! Tio estas ĉio !

- Mi scias tion, *diris s^ino Ŝelbi kies larmoj dense falis*. Mi ne povas resanigi lin, sed Jesuo ja povas tion. Li cikatrigas rompitajn korojn kaj bandaĝas iliajn vundojn.

Estis longa silento; ĉiuj kune ploris. Fine, Georgio,

sidanta apud la kara kompatindulino, rakontis al ŝi, per kortuŝa simpleco, la gloran morton de ŝia edzo, kaj ripetis al ŝi liajn tenerajn kaj lastajn vortojn.

Ĉirkaŭ unu monato poste, ĉiuj sklavoj de la Ŝelbi-plantejo estis matene kunvokataj en la granda vestiblo por tie aŭdi tion kion la juna majstro havis por diris al ili.

Li aperis meze de ili, kun fasko da paperoj en la mano. Je ilia granda surprizo, ili estis leteroj de malsklavigo. Li legis ilin, kaj disdonis ilin al ili, meze de la ploroj kaj de ekkrioj de la tuta kunveno. Tamen pluraj amasiĝis ĉirkaŭ li, petegante lin tute ne forpermesi ilin, kaj repreni la paperojn, kiujn ili direktis al li kun maltrankvila vizaĝo.

- Ni tute ne bezoni pli da libereco, ili diris. Nenion manki al ni ĉi tie. Ni ne voli forlasi la malnovan domon, nek mastron, nek mastrinon, nek ĉion !

- Miaj bonaj amikoj, *diris Georgio tuj kiam li sukcesis ekhavi silentan momenton*, vi ne devos forlasi min. La loĝejo bezonas tiom da manoj kiom ĝi neniam havis. Ni konservas en la domo la saman nombron da geservistoj. Nur ekde ĉi tiu tago vi estas liberigitaj. Mi pagos al vi por via laboro interkonsentitan salajron. La granda avantaĝo estas ke se mi fine ŝuldiĝus aŭ mortus, aferoj kiuj povas okazi, vi nun ne povus esti aŭ kaptitaj aŭ venditaj. Mi daŭrigos valorigi la teron, kaj klopodos instrui al vi tion kio ne estas lernebla en unu tago, bone uzi la rajtojn kiujn mi donas al vi. Mi atendas de vi mildecon, bonvolon por lerni, kaj kun la helpo de Dio, mi estos lojala kaj fidela por instrui. Nun, miaj amikoj, levu la okulojn supren, kaj danku Dion pro la bonfaro de la libereco.

Maljuna patriarka nigrulo kies haroj blankiĝis sur la plantejo, kaj kiu blindiĝis, ekstaris kaj, kunigante siajn tremantajn manojn, diris : "*Infanoj, ni danki Disinjoron !*" Ĉiuj samtempe surgenuiĝis. Neniam Tedeumo, kun la pompoj de la orgeno, de la sonoriloj kaj de la kanono, estis duone tiel

kortuŝa kaj supreniris pli rekte al la ĉielo, ol la simpla triumfkanto elirita el ĉi tiuj piaj kaj naivaj koroj.

Dum ili restariĝis, alia ekkantis metodistan himnon kiu havis kiel rekantaĵon :

"Venis la jubilea jaro,
Reiru hejmen elaĉetitaj pekuloj".

- Ankoraŭ unu vorton ! *diris Georgio tuj ĉesigante la dankojn de la homamaso*, vi ĉiuj memoras nian karan, nian bonan Onklon Tomo[n].

Li tiam mallonge raportis pri lia morto, kaj parolis pri liaj amemaj memoroj pri ĉiuj liaj iamaj kunuloj.

- Estis sur lia tombo, miaj amikoj, ke mi prenis, antaŭ Dio, decidon neniam plu posedi sklavon, dum eblos al mi malsklavigi lin. Mi ĵuris ke neniu, almenaŭ pro mia kulpo, de nun riskos esti ŝirita el sia domo, el sia familio por iri morti kiel li mortis, sola sur izolita plantejo. Tiel, ĝojante pro via libereco, pensu ke vi ŝuldas ĝin al ĉi tiu bona kaj bela animo, kaj senŝuldigu vin rilate al ĝi per multe da tenereco al lia edzino kaj liaj infanoj. Pensu pri la ĝojo esti libera ĉiufoje kiam vi vidas la Kabano de Onklo Tomo, kaj ke ĝi vekas en vi ĉiuj la deziron sekvi liajn paŝojn por esti kiel li honesta, fidela, kuraĝa kristano.

46. Konkludo.

Korespondantoj el pluraj lokoj de ĉi tiu lando ofte demandis al la verkistino, ĉu la antaŭa rakonto estis fikcio aŭ fakto; jen ŝia respondo al ĉi tiuj diversaj enketoj.

La apartaj okazaĵoj de ĉi tiu rakonto estas ĝenerale aŭtentikaj. La plejmulto okazis sub la tuja observado, ĉu de la verkistino, ĉu de ŝiaj intimaj geamikoj. La karakteroj estis studataj laŭ naturo, kaj kompletaj frazoj estas laŭvorte transdonitaj, tiel kiel ili frapis la orelon de la verkistino, aŭ tiun de fidindaj geamikoj kiuj raportis ilin al ŝi.

La vizaĝo kaj la tuta karaktero de Eliza estas nur la skizo de reala portreto. La verkistino konas multnombrajn ekzemplojn de nekoruptebla fideleco, de tenera kaj sincera pieco, de necedema lojaleco, kiu karakterizas onklon Tomo^{n}. Inter la eventoj de la rakonto, la plej profunde tragediaj, tiuj kiuj prezentas la plej romaneskan, la plej impresan intereson, estas nur ĝusta spegulbildo de tio kio okazis en la reala vivo. Interalie la historio de la patrino transiranta Ohio^{n} sur la flosantaj glacioj, estas tre konata fakto. La tragika morto de la "maljuna Prunjo" okazis laŭ persona kono de frato de la verkistino, tiam ĉefa komizo-kolektisto de unu el la famaj komercaj domoj de Nov-Orleano. Estas li kiu konis la plantiston prezentitan kiel Lagrizo^{n}. Parolante pri ĉi tiu mizerulo, kiun en sia rondvizitado de enspezo li ĵus vizitis, li skribis al mi : "*Li palpigis al mi sian pugnon, tute similan al forĝmartelo aŭ martelego el ŝtalo, fanfaronante ke ĝi estis kalaj knokaŭtante negrojn. Elirante el lia plantejo, mi plenpulme enspiris, kvazaŭ mi ĵus eskapis el la kaverno de ogro*".

Estas nur tro da vivantaj atestantoj en nia lando kiuj

povas atesti ke la tragika sorto de Tomo ne estas fikcio. Ekzemploj el ĉi tiu speco bedaŭrinde tute ne estas maloftaj aferoj. Sufiĉos memori ke unu el la fundamentaj principoj de la jurisprudenco de la Sudaj Ŝtatoj malakceptas, se blankulo estas koncernata, ajnan ateston de neblankulo. Ni komprenos ke, multokaze, la pasio de la mastro povas blindigi lin pro sia intereso por mono, kaj ke la sklavo povas havi en si sufiĉe da vireca energio, sufiĉe da firmeco de principo, por rezisti ĝis la morto. En la tiama situacio, la vivo de la sklavo havas kiel protekton nur tiun kiun povas doni al li la individua karaktero de la mastro. Faktoj, tro doloraj por ke oni volu trakti ilin, okaze alvenas al la publika kono, kaj la komentoj kiuj sekvas, estas apenaŭ malpli indignigaj ol la eventoj kiuj kaŭzas ilin. "*Ĉi tiuj kazoj, oni diras, estas maloftaj; ili okazas, laŭ ĉia probableco, nur de tempo al tempo. Ne estus do juste konkludi ion de tio rilate al ĝenerala praktiko*". Se la leĝoj de Nov-Anglio estus aranĝitaj tiel ke mastro povus, de tempo al tempo, ĝismorte torturi unu el siaj metilernantoj, sen tio ke ebligus alvoki la kulpulon antaŭ tribunalon, ĉu ni akceptus la aferon laŭ ĉi tiu stranga trankvilo ? Ĉu ni dirus : "*Ĉi tiuj kazoj estas maloftaj; ne estus juste konkludi ion de tio rilate al ĝenerala praktiko ?*" Ne; ĉi tiu rifuzo de justeco, propra al sklaveca sistemo, povas ekzisti nur en la sklavaj ŝtatoj.

La okazintaĵoj kiuj sekvis la kapton de la ŝipo La Perlo konigis ĉien la skandalan senhontecon de la publikaj vendoj de belaj mulatinoj kaj kvaroninoj. Ni donos ĉi tie eltiraĵon de la prelego de la honorinda Horacio Mann, unu el la defendaj advokatoj : "*Inter la sepdek ses homoj, li diris, kiuj provis en 1848 eskapi el la distrikto de Kolumbio per la skuno La Perlo, kies la oficiroj prenis min kiel defendanton, troviĝis pluraj florantaj junulinoj, dotitaj de tiuj ĉarmoj, de tiuj ĉarmaj allogoj, kiujn la spertuloj tiel alte aprezas.*

Elizabeto Russel, unu el ili, falis en la ungegojn de sklavvendisto, kaj estis tuj destinata esti vendata sur la merkato de Nov-Orleano. La koroj de ĉiuj kiuj vidis la kompatindan junulinon, estis tiel vigle tuŝitaj, ke oni proponis ĝis mil ok cent dolaroj por elaĉeto. Pluraj subskribis proksimume ĉion kion ili posedis da mono. La fivendisto estis senkompata; Elizabeto, sendita al Nov-Orleano, estis ŝtelita dank'al dia kompato, el la fatala sorto kiu atendis ŝin; ŝi mortis duonvoje. Du aliaj kvarteroninoj, tute junaj, nomataj Edmundson, estis parto de la kapto. Fratino, pli aĝa ol ili, iris sin ĵeti ĉe la piedoj de la vendisto kiu ankaŭ sendis ilin al Nov-Orleano, kaj petegis lin, pro la Diamo, indulgi ĉi tiujn junajn viktimojn. La malŝatindulo senhonte ŝerci ŝin, detalante la belajn vestaĵojn, la riĉajn tualetojn, kiujn ŝiaj fratinoj baldaŭ havos. 'Jes, ŝi diris, tio povas sukcesi en ĉi tiu vivo, sed kio ili fariĝos en la alia !' La du junaj kvarteroninoj foriris do por esti vendataj al la granda merkato. Pli poste, ili estis tie aĉetitaj je grandegaj prezoj kaj revenigitaj al la Nordo". Ĉu ne estas evidente post tio, ke la historio de Emelina kaj Kasiso eniras en la ordinara sinsekvo de la aferoj ?

Per sento de justeco, la verkistino deziras deklari ke anima lojaleco, la varma malavareco de Sanklaro ne estas fremdaj kvalitoj de la loĝantoj de Sudo. Anekdoto pravigos tion. Antaŭ malmutaj jaroj, loĝanto de Sudo sin trovis en Cincinnatio kun preferata sklavo kiu servis lin ekde la infanaĝo. Tiu ĉi lasta profitis de la okazo, forfuĝis kaj rifuĝis ĉe kvakero, konita pro komplezoj faritaj al nigruloj en tia cirkonstanco. La mastro incitiĝis; li traktis sian sklavon kun tiel konstanta indulgo, montris al li tian fidon ke li estis konvinkita ke, por forkuri, la junulo devis esti influata. La ĝentlemano iris ĉe la kvakero dum la unua fajro de indigno, kiu tamen ne daŭris, ĉar la naiveco kaj la

sincereco estis grandaj ĉe li. Unu punkto pri la demando kiun li neniam konsideris, estis metita antaŭ liaj okuloj, kaj li tuj deklaris ke se la sklavo esprimis en lia ĉeesto, la deziron esti libera, li promesis malsklavigi lin. La interparolado konsekvence okazis, Natano estis pridemandata de lia juna mastro, kiu demandis al li ĉu iam, pri kio ajn temis, li devis plendi pri la maniero kiel li estis traktita ?

- Ne, mastro, diris Natano, vi ĉiam esti bona por mi.

- Nu, kial vi volas forlasi min ?

- Mastro povi morti. Tiam al kiu mi fali ? Ne, mi preferi havi mian liberecon.

Post momenta pripensado, la mastro rebatis :

- Sur via loko, Natano, mi probable pensus same. Vi estas libera.

Kaj senprokraste li redaktis la malsklavigan akton, transdonis ĝin en la manoj de la kvakero, kun monsumo destinata helpi la junulon sur sia nova vojo, kaj li aldonis al ĝi leteron plenan de saĝaj kaj amoplenaj konsiloj dediĉitaj al sia iama sklavo. Ĉi tiu letero estis dum kelka tempo inter la manoj de la verkistino de ĉi tiu libro.

Ŝi esperas esti rekoninta la meritojn de nobleco, de malavareco, de humaneco, kiuj kelkfoje distingas la sudulojn. Tiaj kazoj savas nin de kompleta malespero pri nia speco. Sed, ŝi demandas al ĉiu homo konanta la mondon, ĉu tiaj karakteroj ne estas ĉiam, kaj ĉie, esceptoj ?

Dum la plej granda parto de sia vivo, la verkistino evitis ĉian legadon, ĉian aludon, kiuj rilatis al la temo de la sklaveco. La temo ŝajnis al ŝi tro dolora, kaj ŝi kalkulis kun la pliiĝo de klerismo kaj civilizado por trakti laŭmerite ĉi tiun restaĵon de barbareco. Sed, ekde la leĝa akto de 1850, kiam, en sia neesprimebla surprizo kaj sia profunda konsterniĝo, ŝi aŭdis kristanojn, virojn ĝuantajn reputacion de humaneco, rekomendi kiel devon de bona civitano, redoni

al iliaj ĉenoj la malfeliĉajn fuĝantajn sklavojn. Kiam, ĉiuflanke en la liberaj ŝtatoj de Nordo, multiĝis inter teneraj, kompatemaj kaj estimindaj homoj diskutoj pri la devo de la kristano en tiaj cirkonstancoj, ŝi diris al si : *Ĉi tiuj homoj, ĉi tiuj kristanoj ne scias tion kio estas sklaveco; se ili nur suspektus tion, tia demando ne povus esti metita.* Estas tiam ke ŝi deziris pentri en viva drama realaĵo la sklavecon tian kia ĝi estas. Ŝi strebis rekoni la meritojn de la pli favora flanko. Koncerne la alian ! Ha ! Kiu iam pentros per ĝiaj veraj koloroj tion kio ne povas esti malkaŝita, tion kio sin kaŝas kamuflita en malluma valo, kio sub la ombro de la morto etendiĝas al la alia flanko !

Al vi, suduloj, viroj, virinoj, kun sindonema koro, al vi kies virto, grandanimeco, pureco de karaktero des pli brilas ke ili malcedis antaŭ severaj luktoj, estas vi ke la verkistino apelacias ! Ĉu vi ne sentis, funde de via animo kaj en la intimeco de viaj rilatoj, ke ĉi tiu abomena sistemo estigas malnoblaĵojn, vundojn, ulcerojn, kiuj multege superas tion kion ni malforte skizis en ĉi tiu libro, tion kion ni eĉ ne kuraĝus diri ? Ĉu povas esti alie ? Ĉu estas al la homo ke tute senrespondeca potenco povas esti konfidita ? Kaj la leĝo kiu senigas la sklavon je lia voĉo, kiel laŭleĝa atestanto, ĉu ĝi ne faras de ĉiu mastro despoton kies potenco estas tute arbitra ? La praktika konkludo devas esti klara antaŭ ĉiuj okuloj. Se inter vi, homoj de honoro kaj de humaneco, regas, kiel ni rekonas tion, publika opinio kies lojala ŝato estas bremso, ĉu ne regas publika opinio el alia speco inter la malŝatinduloj, la banditoj, la malnoblaj, perfortaj, krudaj homoj ? Ĉu ĉi-lastaj ne havas la laŭleĝan rajton posedi tiom da sklavoj kiom la unuaj ? Kaj ĉu homoj justaj kaj bonaj estas la plimulto en ĉi tiu mondo ?

La komerco de nigruloj hodiaŭ similiĝas al piratado laŭ usona leĝaro. Sed sklavkomerco, tiel regule organizita kiel

tiu de la afrika marbordo, estas la nepra sekvo de la usona sklaveco. Kaj ĝian doloron, ĝiajn hororojn, kiu povas rakonti ilin ?

La verkistino donis nur netrudiĝeman skizon, diskretan nefinitaĵon pri la malesperaj angoroj kiuj, en ĉi tiu momento mem, disŝiras milojn da koroj, disigas milojn da familioj kaj instigas al frenezeco kaj al malespero iun senteman rason sen defendo. Ili vivas, tiuj kiuj konas patrinojn kiujn ĉi tiu abomena trafiko devigis buĉi iliajn infanojn, pro patrina amo. Ili serĉis en morto ŝirmon kontraŭ malbonoj pli malbonaj ol morto. Nenio tragika, nenio kruela povas esti revita, rakontita, konceptita, kiun ne superas la terura realeco de scenoj kiuj, ĉiutage je ĉiu horo, okazas sur niaj marbordoj, sub la protekto de usonaj leĝoj, en la ombro de la kruco de Kristo.

Kaj nun, ho miaj samlandanoj ! Viroj kaj virinoj de mia lando, ĉu tio estas bagatela afero kiu povas pardonpeti kaj gardi silenton ? Farmistoj de Masaĉuseco, de Nov-Hampŝiro, de Vermonto, de Konektikuto, kiuj legas ĉi tiun libron en la hela lumo de viaj vintraj hejmoj, kuraĝaj varmkoraj maristoj, kuraĝaj ŝipposedantoj de Majno, ĉu tio estas tion kion vi asertas protekti kaj stimuli ? Grandanimaj loĝantoj de Novjorko, farmistoj de fekunda, gaja Ohio, kaj vi pioniroj de la vastaj okcidentaj ŝtatoj kun senlimaj herbejoj, respondu : ĉu estas tio kion viaj leĝoj venas defendi kaj protekti ? Kaj vi, usonaj patrinoj, vi kiuj lernis, super la lululoj de viaj propraj infanoj, ami kaj senti por ĉiuj homoj; en la nomo de la sankta amo kiun vi donas al la kara eta sucĉinfano; en la nomo de la ĉielaj ĝojoj kiun donas al vi lia bela, senkulpa kaj ludema infaneco; en la nomo de tiu patrina kaj sindona pieco kiu gvidos lin laŭmezure kiam li kreskos; en la nomo de la delikataj prizorgadoj kiuj akompanas liajn unuajn paŝojn en la vivo; en la nomo de la fervoraj preĝoj

senditaj al la ĉielo por la eterna savo de lia animo, mi petas vin, mi petegas vin, pensu pri la patrino kiu, enigita de ĉiuj viaj maltrankviloj, brulanta per la sama amo, ne havas la plej etan leĝan rajton protekti, gardi eduki la infanon de ŝia utero ! En la nomo de la fatala horo, kiam via karuleto komencis malvigli sur via brusto, per tiuj mortantaj rigardoj kiujn vi neniam forgesos, per tiuj lastaj krioj kiuj turmentis vian koron kiam vi ne plu povis mildigi aŭ savi, per la aflikto de ĉi tiu malplena lulilo, de ĉi tiu muta ĉambro, ho ! mi petegas vin, kompatu ĉi tiujn patrinojn senigitajn de ilia infano for de ilia brusto per la laŭleĝa komerco de Usono ! Kaj diru, ho patrinoj, ĉu ĉi tio estas aferoj subtenindaj, aprobindaj aŭ prisilentindaj ?

Ĉu la loĝantoj de la nordaj ŝtatoj lavos siajn manojn, kiel en la pasinta tempo, "*de la sango de ĉi tiu justulo*"; ĉu ili diros ke ili havas nenian rilaton kun tio, nenion por fari kun tio ? Dio volu ke tiel estu ! Sed tio ne estas vera. La civitanoj de la liberaj Ŝtatoj defendis kaj subtenis la sistemon. Ili estas pli kulpaj antaŭ la dia tribunalo pro ĉi tiu partopreno ol iliaj fratoj en la Sudo; ĉar ili ja povas preteksti nek la ekskuzon de la edukado nek tiun de la kutimo.

Se ĉiuj patrinoj de la liberaj Ŝtatoj emociiĝus ekde la komenco, se ili estus kortuŝitaj tiel kiel ili devus esti, iliaj filoj neniam estus sklavposedantoj, kaj ne estus proverbe rigardataj kiel la plej severaj mastroj. Iliaj filoj ne partoprenus la disvastiĝon de la sklaveco en nia nacio; ili ne finegocus animojn kaj homajn korpojn kiel ĉiu alia varo. Estas multegoj da sklavoj provizore poseditaj kaj revenditaj de negocistoj de nordaj urboj. Post tio ĉu ni ĵetos la krimon kaj la honton de la sklaveco nur sur la Sudo ?

La viroj de Nordo, la patrinoj de Nordo, la kristanoj de Nordo havas ion pli por fari ol denunci siajn fratojn de la

Sudo, ili devas esplori sian propran ulceron.

Sed kion kapablas individuo en sia soleco ? Lia konscienco diros tio al li. Almenaŭ unu afero eblas ĉe ĉiu, tio estas vidi laŭ justeco kaj penetriĝi de honesta sento. Magneta atmosfero ĉirkaŭas ĉiun homan estulon, kaj tiu kiu pensas laŭ justeco, kun energio kaj honesteco pri la gravaj interesoj de la homaro, estas, per tio mem, unu el la bonfarantoj de sia raso; li enspiris, kaj li elspiras la veron. Esploru do viajn simpatiojn pri ĉi tiu temo; ĉu ili harmonias kun tiuj de Kristo, aŭ ĉu ili sin lasas influi kaj perversigi per la sofismoj de la monduma politiko ?

Ni iru pli. Vi havas ion pli por fari, gekristanoj de la Nordo; vi povas preĝi ! Ĉu vi kredas je la efikeco de la preĝo ? Aŭ ĉu ĝi estus por vi nenio pli ol malklara apostola tradicio ? Vi preĝas por la paganoj de la foraj marbordoj, preĝu por tiuj kiuj loĝas ĉe vi. Preĝu ankaŭ por tiuj malbonsortaj kristanoj kies la fido devas provi la ŝancojn de la komercado, kies la religia kaj morala persisteco ofte fariĝas neebla, krom se de supre venas al ili la energio kaj graco de martireco.

Plie eĉ : ĉe la limoj de niaj liberaj ŝtatoj, ekaperas tie kaj ĉi tie la disaj restaĵoj de rompitaj familioj, viroj, virinoj, eskapintaj, dank'al mirakloj de la Providenco, el la teruraj huloj de la sklaveco. Malfortaj pri sciado, ofte elementaj pri sia morala konstitucio, dank'al la sistemo kiu renversas kaj perversigas ĉiujn principojn de la kristanismo kaj de la moraleco, ili venas serĉi rifuĝon inter vi kaj petas : edukadon, instruadon, religion.

Kion vi ŝuldas al ĉi tiuj malfeliĉaj homoj, ho kristanoj ? Kio ! Ĉu vi ne ŝuldas al ili tion kion ĉiu usonano ŝuldas al la afrika raso, kompense pro la malbonoj amasigitaj sur ĝi de Usono mem ? Ĉu la pordoj de viaj preĝejoj kaj viaj lernejoj restos fermitaj al ili ? Ĉu ĉiu ŝtato leviĝos por forpuŝi ilin

de ĝi ? Ĉu la kristana eklezio lasos ĵeti insulton kaj honton al vizaĝo de la humiluloj kaj suferantoj ? Ĉu ĝi retroiros antaŭ la malforta mano kiu plorpetas ĝin, kaj ĉu ĝia silento subtenos la kruelecon kiu forpelas ilin de niaj landlimoj ? Se tiel estas, la spektaklo estas funebra ! Se tiel estas, Usono devas tremi; ĉar la sorto de la nacioj estas en la manoj de tiu kiu estas nur korfavoro kaj tenera kompato.

"*Ni tute ne bezonas ilin, vi diras, ke ili iru en Afrikon !*"

Ke la dia Providenco preparis rifuĝon por ĉi tiu subpremata raso, tio certe estas fakto el la plej rimarkinda kaj el grandega graveco. Sed ĉu tio estas motivo por ke la Eklezio de Kristo rifuzas al proskribitoj la garantiojn kiujn ĝi deklaras doni al kiu ajn postulas ilin ?

Subite inundi Liberion per senscia, nesperta, duonkruda, loĝantaro apenaŭ eskapinta de la katenoj, estus senfine plilongigi ĉi tiun periodon de luktoj kaj de malfeliĉaĵoj propran al la komencoj de grandaj entreprenoj. Ne; sed ke la eklezio de la Nordo akceptas ĉi tiujn kompatindajn suferantojn kun la spirito de la Evangelio; ke ĝi proponas al ili la avantaĝojn de la religia edukado de nia respublika socio; ke ĝi malfermas por ili niajn lernejojn ĝis kiam ili atingos ian intelektan kaj moralan maturecon; ke tiam ĝi helpas ilin por ilia veturado al tiuj marbordoj kie ili povos praktiki la lecionojn kiujn Usono donis al ili.

Estas, en la Nordo, kunveno de usonanoj, kompare malmulte nombraj, kiuj tiel agis, kaj rezulte vidis homojn, unue sklavojn, rapide akiri statuson, reputacion, edukadon. Tre rimarkindaj talentoj, se oni konsideras la cirkonstancojn, disvolviĝis. Kaj pri la trajtoj de honesteco, de humaneco, de tenereco, pri heroaj sindonemoj, pri la noblegaj sinoferoj faritaj por eltiri el la sklaveco amikojn, fratojn, ili estas senkomparaj, ĉefe se ni pensas pri pereiga influo sub kiu tiom da virtoj aperis.

Tiu kiu verkis ĉi tiujn paĝojn, vivis plurajn jarojn ĉe la landlimoj de sklavistaj ŝtatoj. Ŝi konsekvence havis multnombrajn okazojn observi tiujn kiuj eskapis siajn ĉenojn. Pluraj el ili loĝis ĉe ŝi kiel servistoj, kaj pro manko de alia institucio kiu volu akcepti ilin, ŝi bonvenigis ilin pli ol unu fojon al sia familia lernejo kun siaj propraj infanoj. Laŭ sia propra sperto, laŭ la atesto de misiistoj loĝantaj inter la fuĝintaj sklavoj en Kanado, ŝi povas aserti ke la kapableco kaj la inteligenteco de ĉi tiu raso estas treege esperplenaj.

La unua aspiro de la emancipiĝinta sklavo estas por la edukado. Estas nenio kiun li ne farus, nenio kiun li ne estas preta doni por la instruado de siaj infanoj. Laŭ tio kion la verkistino mem observis, laŭ la atesto de la instruistoj kiuj instruis junajn nigrulojn, ilia inteligenteco estas vigla, kaj ili bonege lernas. La sukceso de la lernejoj fonditaj por ili en Cincinnatio de bonkoraj individuoj atestas tion.

La jenaj faktoj, transdonitaj sub la aŭtoritato de la profesoro C E Stowe *(edzo de la verkistino)*, ĉe Lane-Seminario, en Ohio, rilatas al emancipiĝintaj gesklavoj, kaj pruvas la kapablecon de la nigrula raso, eĉ kiam la individuoj renkontis nenian subtenon aŭ apartan helpon.

Ni ĉi tie donas nur la komencajn literojn de la nomoj; ĉiuj pri kiuj temas loĝas en Cincinnatio :

B.: Fabrikanto de mebloj; dum dudek jaroj en la urbo; riĉa je dekmil dolaroj, fruktoj de lia laboro; anabaptisto.

C.: Pura nigra raso; forrabita en Afriko, vendita al Nov-Orleano; libera antaŭ dek kvin jaroj, pagis por elaĉeti sin sescent dolarojn. Li estas farmisto kaj posedas plurajn bienojn en la ŝtato Indianio. Presbiteriano. Riĉa, probable, je dek kvin ĝis dudek mil dolaroj lukritaj de lia industrio.

K.: Ankaŭ nigra; terspekulanto; posedas certe tridek mil dolarojn; povas esti kvardekjaraĝa; libera antaŭ ses jaroj; pagis mil okcent dolarojn por elaĉeti sian familion; membro

de la anabaptista eklezio; ricevis testamentaĵon de sia mastro, kiun li plivalorigis.

G.: Pura nigra raso; karbokomercisto, ĉirkaŭ tridekjara; sin elaĉetis dufoje, estinte unue fraŭdata de mil sescent dolaroj; li gajnis ĉi tiun tutan monon per siaj propraj klopodoj, granda parto dum li estis ankoraŭ sklavo, ludonante sian tempon al sian mastron, kaj plie farante siajn proprajn aferojn. Li estas bela kaj vere distingita knabo.

W.: Trikvarone nigrulo, barbiro kaj kelnero; edukita en Kentukio; libera antaŭ dek naŭ jaroj, pagis por elaĉeti sin kaj sian familion, pli ol tri mil dolarojn; estas riĉa je ĉirkaŭ dudek mil dolaroj; li estas diakono de la anabaptista eklezio.

G. D.: Trikvarone nigrulo; kalkisto; de Kentukio; libera antaŭ naŭ jaroj, pagis mil kvincent dolarojn por elaĉeti sin kaj sian familion; ĵus mortinta, sesdekjaraĝa kaj riĉa je ses mil dolaroj.

Profesoro Stowe aldonas : "*Krom G., ĉiuj ĉi nigruloj estis persone konataj de mi ekde pluraj jaroj, kaj mi povas garantii la ĝustecon de miaj informoj*".

La verkistino bonege memoras aĝan neblankulinon, lavistinon en la familio de ŝia patro. La filino de ĉi tiu virino edziniĝis kun sklavo. Inteligenta kaj tre aktiva, ŝi sukcesis, dank'al sia lerteco, sia ŝparado, kaj senigante sin je ĉio, kolekti naŭcent dolarojn por elaĉeti sian edzon, monon laŭmezure elspezitan en la manojn de la mastro. Mankis nur cent dolaroj por kompletigi la elaĉetan monon, kiam la edzo mortis; neniam lia vidvino reakiris tiun monon.

Ĉi tio estas nur tre malgranda parto de la amaso da ekzemploj kiuj povus esti prezentitaj, pri la abnegacio, la sindonemo, la energio, la pacienco, la honesteco kiujn montras la sklavo sukcesinta liberiĝi.

Estu ankaŭ konsiderita pri tiuj kiuj sukcesis konkeri socian pozicion kaj kelkan bonhavecon, la malfacilaĵojn, la

senkuraĝiĝojn, kiujn necesis superi kaj batali. La neblankulo, laŭ leĝo de Ohio, eĉ ne rajtas voĉdoni, kaj ĝis tiuj lastaj tempoj ne povis en proceso atesti kontraŭ blankulo. Ne estas nur en Ohio, estas en ĉiuj ŝtatoj de la Unio ke ni vidas homojn kiuj rompis siajn katenojn nur de la antaŭtago, kaj kiuj, dank'al aŭtodidakta forto kiun oni ne povus tro admiri, altiĝis al tre respektataj sociaj pozicioj. Ni citos, kiel tre konatajn ekzemplojn, Pennington inter la klerikoj, Douglass kaj Ward inter la verkistoj.

Se ĉi tiu persekutata raso, kun ĉiuj malinstigoj kaj malavantaĝoj, tiom faris, kiom pli ĝi povus fari se la kristana eklezio agus kun ili en la spirito de sia Disinjoro !

Ni estas en tempo kiam la nacioj skuitaj tumultas. Potenca blovo estas ekstere; ĝi perturbas kaj boligas la mondon kiel dum tertremo. Ĉu Usono estas sekura ? Ĉu ĉiu nacio kiu entenas en sia sino gravan kaj evidentan maljustaĵon, ne portas en si la elementojn de terura kaj supera konvulsio ?

Kial ĉi tiu potenca influo tiel vekas en ĉiu nacio kaj en ĉiu lingvo, tiujn neartikulaciitajn ĝemojn al libereco kaj egaleco de la homo ?

Eklezio de Kristo, legu la signojn de la tempoj ! Ĉu ĉi tiu potenca blovo, ne estas la spirito de Tiu kies la regno estas ankoraŭ venonta ? Tiu kies la volo plenumiĝos sur la tero kiel ĝi estas en la ĉielo ?

"*Sed kiu kapablos subteni la tagon de sia alveno ? Ĉar tiu tago venos flamigi kiel fajrego. Ĝi rapidos esti atestanto kontraŭ tiuj kiuj retenas la salajron de la dungito, de la vidvino kaj de la orfo, kaj kiuj alportas malbonon al la fremdulo kaj li frakasos la premanton*". (Malaĥi 3, 2-5)

Ĉu tiuj vortoj ne estas adresitaj al la nacio kiu portas kaj entenas en sia sino tiel okulfrapan maljustaĵon ? Kristanoj kiam vi ĉiutage diras : "*Venu via regno !*" Ĉu vi

povas forgesi ke la timinda profetaĵo kunigas la horon de venĝo kun la horo de elaĉeto ?

Iu tago de graco estas ankoraŭ donacita al ni. Nordo kaj Sudo estas same kulpaj antaŭ Dio, kaj la kristana Eklezio ŝuldas pezan konton. Tute ne estas unuiĝante por protekti la maljustecon kaj la kruelecon, por kune amasigi siajn pekojn ke la Unio saviĝos. Estas per pento, justeco, kompatindulgo; ĉar la eterna leĝo, kiu faras ke la muelŝtono sinkas en la oceano, estas eĉ malpli neerarema ol la pli alta leĝo kiu malsuprenigas la koleron de la Ĉiopovulo al la nacioj kulpaj pro maljusteco kaj krueleco.